

Ilja Ilf

Evgenij Petrov

Ora bovido

Hajfo
2015

Tradukis A.Kerbel

Ora bovido

Ilja Ilf (1897 – 1937)

Evgenij Petrov (1902 – 1942)

Parto unua **Personaro de «Antilopo»**

Ĉapitro 1 **Pri tio kiel Panikovskij rompis la konvencion**

Antaŭ ol transiri straton pririgardu la ambaŭ flankojn. (El leĝoj de trafikado).

Piedirantojn oni devas ŝati.

Piedirantoj estas plej granda parto de homaro. Eĉ pli: ili estas plej bona ĝia parto. Piedirantoj kreis la mondon. Tio estas ili kiuj konstruis urbojn, altigis multetaĝajn domojn, instalis akvoduktojn kaj kloakojn, pavimis stratojn, kaj lumigis ilin per elektraj lampoj. Tio estas ili kiuj disvastigis civilizon tra la tuta mondo, inventis libropresadon, elpensis pulvon, transĵetis pontojn, deĉifris egiptajn hieroglifojn, kreis sendanĝeran razilon, neniigis sklav-komercadon, kaj evidentigis ke el faboj de sojo

oni povas prepari cent-dek-kvaron da bongustaj kaj nutraj manĝaĵoj.

Kaj kiam ĉio estis jam preta, kiam nia kara planedo ekaspektis relative komforte, aperis aŭtistoj.

Oni devas mencii ke ankaŭ aŭto estas inventita far piedirantoj. Sed aŭtistoj ial tuj forgesis pri tio. La mildajn kaj saĝajn piedirantojn oni komencis elvivigi. Stratoj, kreitaj per piedirantoj, transiris sub regado de aŭtistoj. Pavimoj ekestis duoble pli vastaj, trotuaroj ŝrumpiĝis. Kaj piedirantoj ekis time premiĝi al muroj de domoj.

En granda urbo piedirantoj vivas martire. Oni enigis ilin en iun transportan geton. Transiri straton estas permesate nur ĉe vojkrucoj, tio estas ĝuste en lokoj kie trafiko estas plej intensa, kaj kie hareto, sur kiu pendas kutime vivo de piediranto, estas plej disŝirebla.

Ordinara aŭto, destinita laŭ pensoj de piedirantoj al paca transportado de homoj kaj varoj, akceptis en nia vasta lando minacajn trajtojn de fratmortigilo. Ĝi eligas el vicoj tutajn spalirojn da sindikatanoj kaj anoj de iliaj familioj. Se piediranto iufoje sukcesas elflirti el de arĝenta nazo de aŭto, lin monpunas polico pro rompo de trafik-kateĥismo.

Peshexoda надо любить¹ («Piediranton oni devas ŝati»)

Kaj, entute, aŭtoritato de piedirantoj forte ŝanceliĝis. Ili, donintaj al nia mondo tiel rimarkindajn homojn kiel Goracij (Horacio), Bojl (Boyle), Mariot (Mariotte), Lobaĉevskij, Gutenberg kaj Anatol Frans (France), estas nun devigataj klounadi plej vulgare nur por ke oni rimarku ilian ekziston. Dio, ĝis kio humiligis Vi piediranton!

Jen iras li el Vladivostoko en Moskvon sur siberia vojo, per unu mano tenante flagon kun teksto: «Reordigu ni vivmanieron de teksistoj», kaj metinte sur la ŝultron bastonon, sur kies pinto pendas rezervaj sandaloj «Onklo Ivano» kaj lada tekaldrono sen kovrilo. Tio estas sovetia piediranto-sportisto, kiu junaĝe eliris el Vladivostoko kaj, estiel oldulo, estos elvivigita ĉe pordegoj de Moskvo mem per peza ŝarĝaŭto, kies numeron oni ne sukcesos rimarki.

Aŭ alia, eŭropa ekzemplero de ŝrumpanta piedirantaro. Li paŝas ĉirkaŭ tuta mondo, ruligante antaŭ si barelon. Li volonte irus sen la barelo, sed tiam neniu rimarkos ke li vere estas longdistanca piediranto, kaj oni ne skribos pri li en ĵurnaloj. Do tutan sian vivon ruligos li la

1. Tio estas ligiloj al ilustraĵoj far fama (en sovetio – rusio) pentrista triopo, kiu nomis sin «Kukriniksoj» (angle: Kukryniksy; ruse: Кукрыниксы).

malbenitan ujon sur kiu, krom tio, (malhonoro, malhonoro!) estas pentrita granda flava surskribo laŭdanta superbajn kvalitojn de aŭtooleo «Revoj de ŝoforo». Tiel degradiĝis piediranto.

Kaj nur en etaj rusiaj urboj oni ĝis nun estimas kaj ŝatas piediranton. Tie li daŭre estas mastro de la stratoj, senzorge vagas sur la pavimo, kaj transiras stratojn iu ajn loke kaj iu ajn direkte.

Civitano en kaskedo kun blanka supro, kiun plej ofte portas administrantoj de publikaj somerĝardenoj, kaj koncert-anoncistoj, sendube apartenis al pli granda kaj pli bona parto de homaro. Sur stratoj de urbo Arbatov li moviĝis piede, kun degna scivolemo rigardante diversflanken. En la mano li tenis negrandan akuŝistan valizeton. La urbo, ŝajne, per nenio konsternis piediranton en la aktora kaskedo.

Li ekvidis ĉirkaŭ dekon da bluaj kaj ruĝetaj sonorilturoj; lian atenton trafis multloke deplakiĝinta jam surogata oro de preĝejaj kupoloj. Super oficiala konstruaĵo kraketis flago.

Ĉe blankaj turaj pordegoj de la provinca kremlo du rigoraj maljunulinoj konversaciis france, plendis pri sovetia reĝimo, kaj elmemoris la amatajn filinojn. El preĝeja keletaĝo blovis malvarmo, frapis de tie acida vina odoro. Tie, ŝajne, oni deponis terpomojn.

– Templo de Savo sur Terpomoj, – nelaŭte diris la piediranto.

Subirinte kruclignan arkon kun freŝa kalka slogano

«Saluton al 5-a distrikta konferenco de virinoj kaj junulinoj»

li okazis komence de longa aleo, nomata Bulvarado de Junaj Talentoj.

– Ne, – diris li ĉagrene, – tio ne estas Rio-de-Ĵanejro, tio estas io multe pli malbona.

Preskaŭ sur ĉiuj benkoj de Bulvarado de Junaj Talentoj sidis solaj fraŭlinoj kun malfermitaj libroj en la manoj. Truaj ombroj falis sur paĝojn de la libroj, sur la nudajn kubutojn, sur la kortuŝajn fruntajn franĝharetojn. Kiam la alveturinto surpaŝis la malvarmetan aleon, sur la benkoj okazis videbla moviĝo. La fraŭlinoj, ŝirmante sin per verkoj far Gladkov, Oĝeŝko kaj Sejfulina, ĵetis sur la veninton timidajn rigardojn. Li paradpaŝe preteriris la ekscititajn legantinojn, kaj venis al la urbodomo – celo de sia promeno.

Ĉi-momente el post la angulo elveturis fiakro. Apud ĝi, tenante sin je la polva deplakita radkovrilo, kaj svingante pufan paperujon kun prempresita surskribo «**Musique**»², rapide iris homo en longbaska jako. Li varme pruvis ion al la pasaĝero. La pasaĝero, nejuna viro kun nazo, pendanta kiel banano, kunpremis per siaj

2. Musique: kursivo indikas ne-esperantaĵon.

genuoj la valizon, kaj tempo de tempo montris al sia konversacianto maldecan fingrogeston. Pro ardo de la disputo deŝoviĝis lia inĝeniera kaskedo, kies rubando brilis per verda kanapa pluŝo. La ambaŭ disputantaj flankoj ofte kaj speciale laŭte prononcis vorton «salajro». Poste ekaŭdeblis ankaŭ aliaj vortoj.

- Vi respondecos pri tio, kamarado Talmudovskij! - kriis la longbaskulo, forigante de sia vizaĝo la inĝenieran fingrogeston.

- Kaj mi diras al vi, ke pro tiuj ĉi kondiĉoj neniu kontentiga specialisto venos labori ĉi tien, - respondis Talmudovskij, penante revenigi la maldecan fingraĵon al antaŭa pozicio.

- Ĉu vi denove pri salajro? Tio jam devigas nin pridiskuti vian elŝiremon.

- Kraĉis mi pri la salajro! Mi eĉ senpage laboros! - kriis la inĝeniero, ekscite desegnante plej diversajn kurbaĵojn per sia fingraĵo. - Se mi volos, eĉ pensiiĝos mi. Lasu vi tiujn ĉi viajn sklavigajn rajtojn! Ĉie oni skribas «libereco, egaleco, frateco», sed min oni volas igi labori en tiu ĉi rata truo.

Ĉi tie inĝeniero Talmudovskij rapide demetis sian signon, kaj komencis kalkuli per la fingroj:

- La loĝejo - porkejo, teatro forestas, la salajro... Fiakristo! Al la stacidomo!

- Halt! - jelpis la longbaskulo, vante antaŭkurante la ĉevalon kaj kaptante ĝin je la brido. Mi, estiel sekretario de inĝeniera kaj

teknikista sekcio... Kondrat Ivanoviĉ, komprenu, la tuta fabriko restos sen specialistoj... Timu vi Dion... La socio ne permesos tion, inĝeniero Talmudovskij... Ĉe mi en la paperujo estas protokolo.

Kaj sekretario de la sekcio, disigante la piedojn, ekis rapide malligi laĉojn de sia «*Musique*».

Tiu ĉi nesingardo decidis sorton de la disputo. Vidante ke la vojo estas libera, Talmudovskij surpiediĝis, kaj per ĉiuj fortoj elkriis:

– Al la stacidomo!

– Kien? Kien? – balbutis la sekretario, impetante post la veturilo. – Vi estas dizertulo de labora fronto!

El paperujo «*Musique*» elflugis folioj da maldika tajppapero kun iuj bluetaj «aŭskultis – decidis».

La alveturinto, kun intereso observinta la incidenton, dum minuto staris sur la malpleniĝinta placo, kaj plendecide diris:

– Ne, tio ne estas Rio-de-Ĵanejro.

Post minuto li frapis jam pardon de la urbestra kabineto.

– Vi al kiu? – demandis lin sekretario, sidanta ĉe sia tablo apud la pordo. – Por kio al la urbestro? Kun kiu afero?

La vizitanto, ŝajne, detale konis sistemon de rilatoj kun sekretarioj de registaraj, mastrumaj

kaj sociaj organizaĵoj. Li ne ekis kredigi ke venis pro iu urĝa ŝtata afero.

– Private, – diris li seke, ne retrorigardante la sekretarion, kaj enŝovante la kapon en la pordan fendon. – Ĉu oni povas al vi?

Kaj, ne atendente la respondon, li proksimiĝis al la skribotablo:

– Saluton, ĉu vi rekonas min?

La urbestro, nigraokula grandkapa homo en blua jako kaj samaj pantalonoj, enigitaj en botojn kun altaj kalkanumoj, rigardetis la vizitanton sufiĉe malatente, kaj deklaris ke ne rekonas.

– Ĉu vere vi ne rekonas? Tamen tre multaj trovas ke mi mirinde similas mian patron.

– Ankaŭ mi similas mian patron, – senpacience diris la urbestro. – Kion vi volas, kamarado?

– Ĉi tie gravas kiu estas la patro, – malgaje rimarkis la vizitanto. – Mi estas filo de leŭtenanto Ŝmit.

La urbestro konfuziĝis kaj ekstaris. Li vigle ekmemoris faman aspekton de la revolucia leŭtenanto kun pala vizaĝo kaj en nigra pelerino kun bronzaĵaj leonaj agrafoj. Dum li kolektis la pensojn por trovi taŭgan demandon al filo de la nigramara heroo, la vizitanto pririgardis meblaron de la kabineto per okuloj de postulema aĉetanto.

Antaŭe, dum cara reĝimo, oni mebligis

ŝtatoficejojn ŝablone. Estis elkreskita specifa raso da fiska meblaro: plataj, forirantaj al plafono ŝrankoj, lignaj benkoj kun tri-colaj poluritaj sidlokoj, tabloj sur dikaj bilardaj piedoj, kaj kverkaj bariloj, dividantaj la oficejon de maltrankvila ekstera mondo. Dum la revolucio tiu ĉi raso da mebloj preskaŭ malaperis, kaj sekreto de ĝia produktado perdiĝis. Homoj forgesis kiel oni mebligu ejojn de oficialaj personoj, tial en oficaĵ kabinetoj aperis aĵoj opiniataj ĝis nun parto de privata loĝejo. En oficejoj aperis risortaj advokataj sofoj kun spegulaj bretetoj por sepo da porcelanaj elefantoj, kiuj onidire alportas feliĉon, vitroŝrankoj por vazaro, etaĝeretoj, disŝoveblaj ledaj brakseĝoj por reŭmatuloj, kaj bluaj japanaj vazoj. En kabineto de Arbatov-urbestro enloĝiĝis, krom kutima skribotablo, du pufseĝetoj, tegitaj per krevita rozkolora silko, stria mola benketo, atlasa ekrano kun Fuĵimonto kaj floranta ĉerizo, kaj spegula slava ŝranko de kruda bazara laboro.

«Sed speco de la ŝranko estas 'Hej, slavo!'» – pensis la vizitanto. – «Ĉi tie oni ne prenos multe. Ne, tio ne estas Rio-de-Ĵanejro».

– Estas tre bone ke vi venis, – diris finfine la urbestro. – Vi, verŝajne, el Moskvo?

– Jes, preterveture, – respondis la vizitanto, pririgardante la benketon, kaj daŭre konvinkiĝante ke financaj aferoj de la

urbestraro estas malbonaj. Li preferis urbestrojn kun nova sveda meblaro, produkto de leningrada lignaĵ-trusto.

La urbestro intencis demandi la leŭtenantan filon pri celo de lia alveturo **na**³ Arbatov sed, neatendite por si mem, li **smajlis**⁴ kompat-pete kaj diris:

– Preĝejoj ĉe ni estas mirindaj. Oni jam el Ĉefscienco vizitis nin, intencas oni restaŭri ilin. Diru, kaj vi, vi mem, ĉu vi memoras ribelon sur kirasŝipo «Oĉakov»?

– Neklare, neklare, – respondis la vizitanto.
– Dum tiu heroa tempo mi estis ekstreme eta. Mi estis bebo.

– Kio estas, pardonu, via nomo?

– Nikolaj... Nikolaj Ŝmit.

– Kaj la patronomo?

«Aĥ, kiel nebone», – pensis la vizitanto, kiu mem ne konis nomon de sia patro.

– Je-es, – diris li, flankiĝante de la rekta respondo, – nun multaj ne konas jam nomojn de la herooj. Haladzo de **NEP**⁵. Forestas jam iama entuziasmo. Mi, fakte, trafis vian urbon tute hazarde. Dumvoja malagrablaĵo. Restis sen

3. na Arbatov: Arbatov-on.

4. smajlo: utilas por indiki ĝoj-esprimon mienan, **senŝonan**, kontraste al rido, kiu estas ĝoj-esprimilo **sona**: smajlo, smajleto, smajlego; rido, rideto, ridego. (Propono).

5.NEP: nova ekonomika politiko, prezentanta, portempe, rajton al privata entreprenado.

kopeko.

La urbestro tre ekĝojis pri ŝanĝo de la paroltemo. Al li ŝajnis malhonora tio ke li forgesis nomon de la heroo.

«Vere», – pensis li, ame rigardante inspiran vizaĝon de la heroo, – «degeneras mi ĉi tie pro la laboro. Majestaj vojsignoj jam forgesiĝas».

– Kion vi diras? Sen kopeko? Interese.

– Certe mi povus turni min al privata persono, – diris la vizitanto, – al mi ĉiu donos; sed vi ja komprenas ke tio ne tre konvenas de politika vidpunkto. Filo de revoluciulo, kiu subite petas monon de privatulo, de NEP-ulo...

Tiujn ĉi lastajn vortojn la filo de la leŭtenanto prononcis kun super-streĉo. La urbestro maltrankvile fiksaŭskultis la novan tonakcenton en voĉo de la vizitanto. «Kio se li estas paroksismulo?» – pensis li. – «Klopodoj sur mian kapon...»

– Jes, tre bone ke vi ne turnis vin al privatulo, – diris la tute konfuziĝinta urbestro.

Poste filo de la nigramara heroo mole, sen premo, venis al la afero. Li petis kvindek rublojn. La urbestro, limigita per malvastaj kadroj de loka buĝeto, povis doni nur ok rublojn kaj tri tagmanĝajn kuponojn en kooperativan restoracion «Eksa stomakamiko».

Filo de la heroo enmetis la monon kaj la kuponojn en profundan poŝon de sia eluzita griza jako, kaj intencis jam leviĝi de la

rozkolora pufseĝeto, kiam post la pordo de la kabineto ekaŭdiĝis piedfrapoj kaj gardanta krio de la sekretario.

La pordo haste malfermiĝis, kaj sur la sojlo aperis nova vizitanto.

– Kiu estas ĉefa ĉi tie? – demandis li, malfacile spirante, kaj serĉe vagante tra la ĉambro per siaj maldecaj okuloj.

– Nu mi, – diris la urbestro.

– Saluton, estro! – kriis la novveninto, etendante la fosilsimilan manplaton. – Estu ni konataj. Filo de leŭtenanto Ŝmit.

– Kio? – demandis la urbestro, vaste malfermante la okulojn.

– Filo de fama neforgesebla heroo leŭtenanto Ŝmit, – ripetis la veninto.

– Sed jen la kamarado sidas – filo de kamarado Ŝmit, Nikolaj Ŝmit.

Kaj la urbestro en plena konsterno montris la unuan vizitanton, kies vizaĝo subite akceptis dormeman aspekton.

Молочные братья («Samlaktaj fratoj»)

En vivon de la du friponoj venis tikla momento. En manoj de la modesta kaj kredema urbestro ĉiumomente povis ekbrili longa kaj malagrabra glavo de Nemeza. Sorto donis nur unu sekundon por kreo de iu sava kombinaĵo. En okuloj de dua filo de leŭtenanto Ŝmit respegulis teruro.

Lia staturo en somera ĉemizo «Paragvajo», en marista pantalono kaj bluetaj veltolaj ŝuoj, nur antaŭ minuto bruska kaj anguleca, komencis dissolviĝi, perdis siajn minacajn konturojn, kaj jam decide sugestis neniun estimon. Sur vizaĝo de la urbestro aperis aĉa smajleto.

Kaj jen, kiam al dua filo de la leŭtenanto ŝajnis ke ĉio jam estas perdita, kaj ke terura urbestra kolero tuj falos sur lian rufan kapon, de la rozkolora pufseĝeto venis savo.

– Vasja! – kriis unua filo de leŭtenanto Ŝmit, saltleviĝante. – Frateto mia! Ĉu vi rekonas fraton Kola?

Kaj la unua filo enigis la duan en siajn brakojn.

– Jes, mi rekonas! – kriis la elblindiĝinta Vasja. – Mi rekonas fraton Kola.

La feliĉan renkonton akompanis tiel senordaj karesoj, kaj tiom nekutimaj pro la forto brakumoj, ke dua filo de la nigramara revoluciulo eliris el ili kun paliĝinta pro la doloro vizaĝo. Frato Kola, pro la ĝojo, ĉifis lin sufiĉe forte.

Brakumiĝante, la ambaŭ fratoj strabe rigardis la urbestron, de kies vizaĝo ne foriris vinagra mieno. Tial tuj, surloke, oni devis disvolvi la savigan kombinaĵon, plenigi ĝin per ĉiutagaĵoj, kaj per novaj detaloj pri ribelo de matrosoj en jaro 1905, kiuj forglitis de partiaj

historiistoj. Intertenante la manojn, la fratoj malleviĝis sur la benketon kaj, ne forigante la flatajn okulojn de la urbestro, enprofundiĝis la elmemorojn.

– Ĝis kiom mirindas la renkonto! – false elkriis la unua filo, per la rigardo invitante la urbestron aliĝi la familian jubilon.

– Jes, – diris la estro per frostigita voĉo. – Okazas, okazas.

Vidante ke la urbestro daŭre troviĝas en ungegoj de dubo, la unua filo tuŝis rufajn, kiel ĉe setero, buklojn de la dua, kaj karese demandis:

– Sed kiam vi forveturis el Mariupol, kie vi loĝis ĉe nia avino?

– Jes, mi loĝis, – elmurmuris la dua filo de la leŭtenanto, – ĉe ŝi.

– Sed kial vi tiel malofte skribis al mi? Mi tre maltrankviliĝis.

– Okupata mi estis, – malserene respondis la rufharulo.

Kaj, timante ke la senlaca frato tuj ekinteresiĝos pri kio li estis okupata (ĉar okupata li estis plejparte pri tio ke sidis en prizonoj de diversaj regionoj kaj aŭtonomaj respublikoj), la dua filo de leŭtenanto Ŝmit elŝiris la iniciaton kaj demandis mem:

– Kaj vi, kial vi ne skribis?

– Mi skribis, – neatende respondis la frateto, sentanta nekutiman atakon de gajeco, –

registritajn leterojn sendis. Mi eĉ poŝtajn kvitancojn havas.

Kaj li enigis la manon en la flankan poŝon, kaj vere eltiris multon da ĉifitaj paperaĉoj, sed ial li montris ilin ne al la frato sed, de malproksime, al la urbestro.

Kvankam tio strangas, sed aspekto de la paperaĉoj iom trankviligis la urbestron, do elmemoroj de la fratoj ekestis pli viglaj. La rufharulo jam tute adaptiĝis, kaj sufiĉe klare, kvankam iom monotone, rerakontis enhavon de amasa broŝuro «Ribelo sur "Oĉakov"». La frato plibeligis lian sekan rerakonton per detaloj tiel pitoreskaj, ke la estro, jam preskaŭ trankviliĝinta, denove streĉis la orelojn.

Tamen li pace liberigis la fratojn, kaj ili elkuris sur la straton, sentante grandan malstreĉiĝon.

Post angulo de la urbestra domo ili haltis.

– Bonokaze, pri infaneco, – diris la unua filo, – tiajn kiel vi, infanaĝe, mi mortigis surloke. El stonetĵetilo.

– Kial? – ĝoje demandis dua filo de la fama patro.

– Tiaj estas severaj leĝoj de vivo. Aŭ, pli kurte, vivo diktas al ni siajn severajn leĝojn. Kial vi enrampis la kabineton? Ĉu vi ne vidis ke la estro estas okupata?

– Mi pensis...

– Ha, vi pensis? Do iam vi pensas? Vi estas

pensulo. Kio estas via nomo, pensulo? Ĉu Spinozo? Ĵan Ĵak Ruso (Rousseau)? Marko Aŭrelio?

La rufharulo silentis, premita per la justa akuzo.

– Nu, bone, mi pardonas vin. Vivu. Kaj nun konatiĝu ni. Tiel aŭ aliel, sed ni estas fratoj, kaj parenceco devigas. Mia nomo estas Ostap Bender. Permesu ekscii vian unuan familinomon.

– Balaganov, – prezentis sin la rufharulo, – Ŝura Balaganov.

– Pri profesio mi ne demandas, – ĝentile diris Bender, – sed konjektas. Verŝajne io intelekta, ĉu? Kiom da aljuĝoj ĉi-jare?

– Du, – libere respondis Balaganov.

– Tio ne estas bone. Kial vi vendas sian senmortan animon? Homo ne devas esti juĝata. Tio estas vulgara okupo. Mi konsideras ŝtelojn. Ne parolante eĉ pri tio ke ŝtelo estas peko – la patrino, verŝajne, konatigis vin infanaĝe kun tiu ĉi doktrino – tio, krome, estas sencela perdo de fortoj kaj energio.

Ostap ankoraŭ longe disvolvus sian vivkredon, se Balaganov ne interrompus lin.

– Rigardu, – diris li, montrante la verdajn profundojn de Bulvardo de Junaj Talentoj. – Ĉu vi vidas, jen iras homo en pajla ĉapelo?

– Jes, mi vidas, – digne diris Ostap. – Kio do? Ĉu tio estas guberniestro de insulo Borneo?

– Tio estas Panikovskij, – diris Ŝura. – Filo

de leŭtenanto Ŝmit.

Sur la aleo, en ombro de nobelegaj tilioj iris, iom kliniĝinte flanken, ne juna jam civitano. Dura pajla ĉapelo kun orligita rando sidis sur lia kapo flanke. La pantalono estis tiel mallonga, ke nudigis blankajn laĉojn de la kalsono. Sub lipharoj de la civitano flamis, simile al cigareda lumeto, ora dento.

Паниковский («Panikovskij»)

– Kio, ĉu ankoraŭ unu filo? – diris Ostap. – Tio iĝas amuza.

Panikovskij venis al la urbodomo, medite irdesegnis ok-similaĵon ĉe la eniro, prenis per la du manoj randon de sia ĉapelo, ĝustigis ĝin sur la kapo, ĉirkaŭtiretis la jakon kaj, peze suspirinte, eniris.

– Ĉe la leŭtenanto estis tri filoj, – rimarkis Bender, – **unuaj du estis saĝaj, sed la tria – stultulo**⁶. Oni devas averti lin.

– Ne, – diris Balaganov, – sekvontfoje li scios ke oni ne rompu konvencion.

– Kio estas tiu konvencio?

– Atendu. Mi poste rakontos. Li eniris, eniris!

– Mi estas homo enviema, – konfesis Bender, – sed ĉi tie estas nenio enviinda. Ĉu vi iam spektis toreadon? Iru ni spekti.

6. Tiel komenciĝas sufiĉe multaj rusaj popolaj fabeloj.

La amikiĝintaj filoj de leŭtenanto Ŝmit eliris el post la angulo, kaj alpaŝis fenestron de la urbestra kabineto.

Post la nebula nelavita vitro sidis la urbestro. Li rapide skribis. Same al ĉiuj skribantoj lia vizaĝo estis funebra. Subite li suprenigis la kapon. La pordo vaste malfermiĝis, kaj la ĉambron enpenetris Panikovskij. Premante la ĉapelon al la malpura jako li haltis apud la tablo, kaj longe movis la dikajn lipojn. Post tio la urbestro eksaltis de sur la seĝo, kaj vaste malfermis la buŝon. La amikoj ekaŭdis longan krion.

Kun vortoj «ĉiuj malantaŭen» Ostap fortiris post si na Balaganov. Ili alkuris la bulvardon, kaj kaŝis sin post arbo.

– Demetu ĉapelojn, – diris Ostap, nudigu la kapojn. Post nelonge okazos elporto de la korpo.

Li ne eraris. Ankoraŭ ne silentiĝis tondradoj kaj modulaĵoj de la urbestra voĉo, kiam en portalo de la urbestrejo aperis du fortegaj laborantoj. Ili portis na Panikovskij. Unua tenis lin je la manoj, dua – je la kruroj.

– Korpo de la forpasinto, – komentis Ostap, – estis elportata sur manoj de proksimuloj kaj amikoj.

La laborantoj eltiris la trian malsaĝan idon de leŭtenanto Ŝmit sur la peroneton, kaj komencis nerapide balanci lin. Panikovskij

silentis, humile rigardante bluan ĉielon.

Вынос тела («Elporto de la korpo»)

– Post nelonga funebra kunveno... – komencis Oŝtap.

Ĉi-momente la kunlaborantoj, aldonante al korpo de Panikovskij sufiĉan svingon kaj inercion, forĵetis lin sur la straton.

– ... la korpo estis enterigita, – finis Bender.

Panikovskij falaĉis sur la teron kiel bufo. Li rapide leviĝis kaj, kliniĝante flanken pli ol antaŭe, ekkuris sur Bulvardo de Junaj Talentoj kun neverŝajna rapideco.

– Nu, kaj nun rakontu, – diris Oŝtap, – kiamaniere tiu ĉi rampulo rompis la konvencion, kaj kio estas tiu ĉi konvencio.

Ĉapitro 2

Trideko da filoj de leŭtenanto Ŝmit

La klopode pasigita mateno finiĝis. Bender kaj Balaganov, sen iu ajn interkonsento, rapide iris for de la urbestro. Sur la ĉefa strato oni per plilongita kamparana ĉaro veturigis longan bluan relon. Tiaj sono kaj kantado plenigis la ĉefan straton, kvazaŭ la veturigisto, vestita fiŝistan krudtolan laborveston, veturigis ne relon sed surdigan muzikan noton. La suno enrompiĝis ekŝpon-fenestron de lernejo-vara vendejo kie, super globusoj, kranioj, kaj

kartona, gaje pentrita hepato de alkoholulo, amike interbrakumis du skeletoj. En malriĉa fenestro de stampilmetiejo plej vastan lokon okupis emajlitaj plataĵoj kun surskriboj «Interrompo de 2-a ĝis 3-a», «Fermite por tagmeza interrompo», simple «Fermite», «La vendejo estas fermita» kaj, fine, nigra fundamenta tabulo kun oraj literoj: «Fermite por reregistrado de la varoj». Ŝajne tiuj ĉi decidaj tekstoj ĝuis plej vastan aĉetemon. Al ceteraj fenomenoj de vivo la metiejo reagis nur per unu blua plateto «Deĵora vartistino».

Poste lokiĝis tri vendejoj de blovmuzikiloj, mandolinoj kaj basaj balalajkoj. Kupraj blovmuzikiloj, malĉaste brilante, digne kuŝadis sur la eksponfenestraj ŝtupetoj, tegitaj per ruĝa ŝtofo. Precipe bela estis basa tubjo. Ĝi estis tiel herkula, tiel maldiligente varmiĝis sub la suno, volviĝinte spirale, ke oni decus teni ĝin ne en la eksponfenestro, sed en ĉefurba zooparko, ie inter elefanto kaj sufok-serpento. Por ke gepatroj, dum la ripoztagoj, konduku al ĝi la infanojn, kaj diru al ili: «Jen, infaneto, tio estas pavilono de tubjo. Nun la tubjo dormas. Sed kiam vekigos, ĝi nepre ektrumpetos». Kaj ke infanoj rigardu la miraklan tubjon per siaj grandaj mirindaj okuloj.

Alitempe Ostap Bender atentus kaj la freŝe elhakitajn balalajkojn, grandajn kiel traba vilaĝa domo, kaj ruliĝintajn pro la suna varmego

gramofonajn diskojn, kaj ankaŭ la infankomunistajn tamburojn, kiuj per siaj bravaj koloroj venigis al penso ke kuglo estas stultulo, sed bajoneto – bravulo, tamen ĉi-foje ne tio interesis lin. Li volis manĝi.

– Vi certe staras sur rando de financa abismo, ĉu? – demandis li na Balaganov.

– Ĉu vi pri mono? – diris Ŝura. – Mono ĉe mi forestas jam tutan semajnon.

– Ĉi-okaze vi finos malbone, juna homo, – edife diris Ostap. – Financa abismo estas plej profunda el ĉiuj, oni povas fali en ĝin tutan vivon. Sed bone, ne ĉagrenu. Malgraŭ ĉio mi forportis en mia beko tri tagmanĝajn kuponojn. La urbestro ekamis min de unua rigardo.

Sed la samlaktaj fratoj ne sukcesis eluzi bonkorecon de la urbestro. Sur pordo de restoracio «Eksa stomak-amiko» pendis granda seruro, kovrita ĉu per rusto, ĉu per fagopira kaĉo.

– Certe, – amare diris Ostap, – okaze de reregistrado de kotletoj la restoracio estas fermita por ĉiam. Ni estas devigataj fordoni niajn korpojn al disŝiro de privatuloj.

– Privatuloj ŝatas kontantan monon, – oponis Balaganov obtuze.

– Nu, nu, mi ne turmentu vin. La urbestro superŝutis min per ora pluvo sume ok rubloj. Sed sciu, estimata Ŝura, mi ne intencas nutri vin sen rekompenco. Kontraŭ ĉiu vitamino kiun

mi formanĝigos al vi, mi postulos de vi multon da etaj servoj.

Tamen okazis ke en la urbo forestas privata manĝeja sektoro, do la fratoj tagmanĝis en somera kooperativa ĝardeno, kie specialaj afiŝoj informis la civitanojn pri lasta novaranĝo en sfero de popolnutrado:

BIERO ESTAS VENDATA NUR AL ANOJ DE SINDIKATO

- Do ni kontentiĝos per kvaso, - diris Balaganov.

- Des pli - aldonis Ostap, - ke lokan kvason produktas privata metia kolektivo simpatianta sovetian reĝimon. Kaj nun rakontu pri kio kulpas bandito Panikovskij. Mi ŝatas rakontojn pri etaj friponaĵoj.

Satiĝinta Balaganov dankeme alrigardis sian savanton, kaj komencis la rakonton. La rakonto daŭriĝis ĉirkaŭ du horoj, kaj enhavis speciale interesajn informojn.

En ĉiuj sferoj de homa aktivado propono kaj postulo pri laborforto reguliĝas per specialaj organoj. Aktoro veturos na Omsk nur kiam estos klare ke li ne devas timi tie konkurencon, kaj ke por lia rolo de malvarma amanto aŭ «la manĝo estas surtabligita» forestas aliaj pretendantoj. Fervojistojn prizorgas iliaj karaj personar-sindikatoj, zorge publikigantaj en ĵurnaloj informojn pri tio ke senlaboraj pakaĵ-distribuantoj ne povas esperi pri ricevo de

laboro en regiono de Sizran-Vjazma relvojo, aŭ pri tio ke Centr-Azia relvojo bezonas kvar barierajn gardistinojn. Var-eksperto publikigas anoncon en ĵurnalo, kaj la tuta lando informiĝas ke ekzistas en la mondo vareksperto kun dekjara laborsperto, kiu, pro familiaj cirkonstancoj, ŝanĝas servon en Moskvo al laboro en provinco.

Ĉio reguliĝas, fluas ene de prizorgitaj fluejoj, funkcias plenkonkorde kun leĝo, kaj sub ĝia defendo. Kaj nur merkato de specifa kategorio de friponoj, nomantaj sin infanoj de leŭtenanto Ŝmit, troviĝis en ĥaosa stato. Anarĥio disŝiris la korporacion de la leŭtenantaj idoj. Do ili ne povis akiri per sia profesio tiujn profitojn kiujn, sendube, povis alporti al ili minuta konatiĝo kun administrantoj, mastrumantoj, sociaj agantoj, homoj, plejparte, mirinde kredemaj.

Tra la tuta lando, ĉantaĝante kaj petaĉante, moviĝas falsaj nepoj de Karlo Markso, neekzistantaj genevoj de Fridriĥ Engels, fratoj de Lunaĉarskij, kuzoj de Klara Cetkin (Zetkin), aŭ, malbonokaze, posteuloj de fama anarkiisto princo Kropotkin.

De Minsko ĝis Beringa markolo, de Naĥiĉevan sur Araks-rivero ĝis Franc-Jozefaj insuloj, parencoj de famaj personoj eniras regionajn estrejojn, eltrajniĝas sur staciajn kajojn, kaj zorgoplene veturas per fiakroj. Ili

rapidas. Ili havas multe da laboro.

Sed venis momento kiam propono de parencoj superis la postulon, kaj al tiu ĉi specifa merkato venis depresio. Sentiĝis bezono pri reformoj. Poiome ordigis sian agadon nepoj de Karlo Markso, kropotkinanoj, engelsanoj kaj similaj al ili, sed ne senbrida korporacio de filoj de leŭtenanto Ŝmit, kiun, same al polan parlamenton, ĉiam disŝiris anarĥio. La gefiloj, iukaŭze, estis arogantaj, avidaj, obstinaj, kaj malhelpis unu al alia plenigi la grenejojn.

Ŝura Balaganov, kiu opiniis sin unuanaskito de la leŭtenanto, serioze maltrankviliĝis pri la okazinta konjunkturo. Pli kaj pli ofte li kunpuŝiĝis kun kolegoj de la korporacio, tute difektintaj fekundajn stepojn de Ukrainio kaj kuracajn altaĵojn de Kaŭkazo, kie li kutimis labori profite.

– Do vi ektimis la kreskantajn malfacilaĵojn?
– mokete demandis Ostap.

Sed Balaganov ne rimarkis la ironion. Trinkante la malvarman kvason li daŭrigis sian rakonton.

Eliro el tiu ĉi streĉa situacio estis nur unu: konferenco. Pri ĝia kunvoko Balaganov laboris tutan vintron. Li korespondis kun kolegoj kiujn li konis persone. Al nekonatoj li transdonis invitojn per renkontitaj survoje nepoj de Markso. Kaj jen, fruprintempe de jaro 1928, preskaŭ ĉiuj konataj filoj de leŭtenanto Ŝmit

kunvenis en Moskva taverno, ĉe Suĥarev-turo.

Nombro de la partoprenantoj estis alta: ĉe leŭtenanto Ŝmit okazis tridek filoj, kies aĝo variis de dek ok ĝis kvindek du jaroj, kaj kvar filinoj, stultaj, ne junaj, kaj malbelaj.

En sia kurta malferma parolado Balaganov esprimis esperon ke la gefratoj trovos komunan lingvon, kaj ellaboros finfine konvencion, kies neceson diktas la vivo mem.

Tuta Sovetio, laŭ projekto de Balaganov, devis esti dividata je tridek kvar ekspluataj terenoj, laŭ nombro da kunvenintoj. Ĉiun terenon oni transdonu por longtempa uzado al unu el la idoj. Neniu el anoj de la korporacio havas rajton transiri la limojn kaj invadi fremdan teritorion profitcele.

La novajn principojn de la laboro kontraŭis neniu, se ne kalkuli na Panikovskij, kiu jam tiam deklaris ke li scipovas vivi ankaŭ sen konvencio. Sed dum divido de la lando disvolviĝis bruskaĵoj. La altaj kontrakt-flankoj diskverelis dum la unua minuto mem kaj, post tio, rilatis unu al la alia nur per aldono de insultaj epitetoj.

La tutan kverelon elvokis divido de terenoj. Neniu volis preni universitatajn centrojn.

Neniu bezonis multe vidintajn Moskvon, Leningradon kaj Ĥarkovon.

Tre malbonan reputacion havis ankaŭ malproksimaj ensabliĝintaj orientaj regionoj. Oni akuzis ilin pri malklereco kaj nekono de

personeco de leŭtenanto Ŝmit.

– Serĉu vi aliajn stultulojn, – jelpo kriis Panikovskij. – Donu al mi Mezrusian altaĵon, kaj tiam mi subskribos la konvencion.

– Ĉu? La tutan altaĵon? – refutis Balaganov. – Eble vi konsentas preni aldone na Melitopol kaj na Bobrujsk?

Ĉe vorto «Bobrujsk» la kunveno dolore ekĝemis. Ĉiuj konsentis eĉ tuj veturi na Bobrujsk. Oni taksis na Bobrujsk estiel bonega, civilizita loko.

– Nu, se ne la tutan altaĵon, – insistis avida Panikovskij, do almenaŭ duonon. Mi estas ja homo edziĝinta, mi havas du familiojn.

Sed oni donis al li eĉ ne duonon.

Post longaj kriadoj oni decidis distribui la terenojn lote. Estis eltranĉitaj tridek-kvaro da paperetoj kun geografia nomo sur ĉiu el ili. Fekunda Kursk kaj dubinda Ĥerson, ne sufiĉe prilaborita Minusinsk, kaj preskaŭ malesperaj Aŝĥabad, Kiev, Petrozavodsk kaj Ĉita – ĉiuj respublikoj kaj ĉiuj regionoj kuŝis en ies lepore ĉapo kun oreŝirmiloj, kaj atendis la mastrojn.

Gajaj krioj, obtuzaj ĝemoj kaj insultoj akompanis la lotadon.

Kruela stelo de Panikovskij influis la rezulton. Li ellotis Volga-regionon. Al la konvencio li aliĝis estante ege kolera.

– Mi veturos, – kriis li, – sed mi avertas: se oni rilatos min malbone, mi rompos la

konvencion kaj transiros la limon!

Дети лейтенанта Шмидта («*Idoj de leŭtenanto Ŝmit*»)

Balaganov, kiu gajnis oran terenon de Arbatov, maltrankviliĝis, kaj jam tiam deklaris ke li toleros neniun rompon de la ekspluatnormoj.

Tiel aŭ aliel, sed la afero estis aranĝita, post kio trideko da filoj kaj tri filinoj de leŭtenanto Ŝmit forveturis al siaj labor-terenoj.

– Kaj nun vi mem vidis, Bender, kiel tiu ĉi rampulo rompis la konvencion, – finis sian rakonton Ŝura Balaganov. – Li delonge rampis sur mia tereno, sed ĝis nun mi ne povis kapti lin.

La malbona ago de Panikovskij, kontraŭ atendo de la rakontanto, ne elvokis ripriĉon de Ostap. Bender sidis sur la seĝo duonkuŝe, malatente rigardante antaŭ si.

Sur alta malantaŭa muro de la restoracia ĝardeno estis desegnitaj arboj, multlaŭbaj kaj rektaj, similaj al bildoj en krestomatio. Veraj arboj en la ĝardeno forestis, sed ombro, ĵetita de la muro, donis vivigan malvarmeton, kiu tute kontentigis la civitanojn. La civitanoj, ŝajne, senescepte estis anoj de sindikato, ĉar ili drinkis nur bieron, kaj eĉ ne postmanĝis ĝin.

Al pordego de la ĝardeno, senĉese eligante aĥ- kaj paf-sonojn, alveturis verda aŭto, sur kies pordeto estis pentrita blanka arka frazo:

«Hej, ekveturu ni!». Sube lokiĝis kondiĉoj de promeno per tiu ĉi gaja aŭto. Unu horo – tri rublojn. Unudirekte – laŭ interkonsento. Pasaĝeroj en la aŭto forestis.

Klientaro de la ĝardeno maltrankvile ekinterflustradis. La ŝoforo ĉirkaŭ kvin minutoj pete rigardis tra la ĝardeno krado kaj, perdinte verŝajne esperon akiri pasaĝeron, defie elkriis:

– La taksio estas libera! Mi petas ensidi!

Sed neniu el la civitanoj esprimis deziron eniri la aŭton «Hej, ekveturu ni!». Eĉ la invito mem efikis ilin tre strange. Ili klinis la kapojn, kaj penis ne rigardi la aŭton. La ŝoforo balancis la kapon, kaj malrapide deveturis. La arbatovanoj malgaje sekvis lin per la rigardoj. Post kvin minutoj la verda aŭto furioze preterhastis la ĝardenon alidirekten. La ŝoforo saltadis sur sia sidloko, kaj kriis ion neklaran. La aŭto, kiel antaŭe, estis malplena.

Ostap rigard-akompanis ĝin, kaj diris:

– Do jen kio, Balaganov, vi estas dandaĉo. Ne ofendiĝu. Mi volas nur ĝuste indiki lokon kiun vi okupas sub suno.

– Iru al diablo! – krude diris Balaganov.

– Do vi ofendiĝis? Ĉu, laŭ vi, posteno de leŭtenanta filo ne estas dandaĉaĵo?

– Sed vi mem estas filo de leŭtenanto Ŝmit!
– kriis Balaganov.

– Vi estas dandaĉo, – ripetis Ostap, – kaj filo de dandaĉo. Ankaŭ idoj viaj estos dandaĉoj.

Knabo! Kio okazis hodiaŭ matene, tio estas eĉ ne epizodo, sed pura hazardaĵo, kaprico de artisto. Ĝentlemano serĉanta dekrublaĵon. Kapti per tiuj ĉi mizeraj ŝancoj estas ekster mia karaktero. Kio ja, pardonu min Dio, estas tiu ĉi profesio! Filo de leŭtenanto Ŝmit! Nu jaro ankoraŭ, nu du. Kaj poste? Poste viaj rufaj bukloj ekestos konataj, kaj oni komencos simple bati vin.

– Do kion fari, – maltrankviliĝis Balaganov,
– kiel perlabori la panon ĉiutagan?

– Oni devas mediti, – severe diris Ostap. – Min, ekzemple, nutras ideoj. Mi ne etendas la manon por acida urbeŝtrara rublo. Miaj interesoj estas pli vastaj. Vi, kiel mi vidas, senprofite ŝatas monon. Diru, kiu kvanto da ĝi plaĉas al vi?

– Kvin mil, – rapide respondis Balaganov.

– Ĉu monate?

– Po jare.

– Se tiel, ni ne estas samvojanoj. Mi bezonas kvincent mil. Kaj, se eblas, tuj, ne poparte.

– Tamen, eble, vi konsentos preni poparte?
– demandis venĝema Balaganov.

Ostap atente alrigardis sian konversaciulon, kaj tute serioze respondis:

– Mi prenus poparte. Sed mi bezonas tuj.

Balaganov volis jam priŝerci ankaŭ tiun ĉi frazon, sed, levante na Ostap sian rigardon, tuj

stumblis. Antaŭ li sidis atleto kun vizaĝo preciza, kvazaŭ stampita sur monero. La sunbrunan gorgon tranĉis rompebla blanka cikatro. La okuloj brilis per minaca ĝojo.

Balaganov eksentis subite nesupereblan deziron ekstari kun manoj malsupren. Li eĉ ekvolis tuseti, kio okazas al homoj de meza respondeco dum konversacio kun kamarado pli altpostena. Kaj vere, post ioma tusado li demandis konfuze:

– Por kio al vi tiom da mono... kaj tuj?

– Se paroli ĝenerale, mi bezonas pli, – diris Ostap, – kvincent mil – tio estas mia minimumo. Mi volas forveturi, kamarado Ŝura, forveturi tre malproksimen, en Rio-de-Ĵanejron.

– Ĉu vi havas tie parencojn? – demandis Balaganov.

– Kio, ĉu mi similas homon kiu povas havi parencojn?

– Ne, sed mi...

– Mi ne havas parencojn, kamarado Ŝura, – mi estas sola en tuta mondo. Havis mi patron, civitanon de Turkio, sed ankaŭ li delonge forpasis ene de teruraj konvulsioj. Sed ne tio gravas. En Rio-de-Ĵanejron mi volas de la infaneco. Vi, certe, ne scias pri ekzisto de tiu ĉi urbo.

Balaganov funebre balancis la kapon. El mondiskalaj centroj de civilizo li konis, krom Moskvo, nur Kievon, na Melitopol kaj Ĵmerinka.

Kaj entute li kredis ke Tero estas plata.

Ostap ĵetis sur la tablon paĝon, elŝiritan el libro.

– Tio estas eltranĉaĵo el «Mezgranda Sovetia Enciklopedio». Jen kio estas skribite ĉi tie pri Rio-de-Ĵanejro: «1360 mil loĝantoj...» tiel... «Konsiderinda kvanto da mulatoj... ĉe vasta golfo de Atlantika oceano...». Jen, jen! «Ĉefaj stratoj de la urbo, laŭ riĉeco de la vendejoj kaj lukso de la konstruaĵoj ne cedas al ĉefaj urboj de mondo». Ĉu vi imagas, Ŝura, Ne cedas! Mulatoj, golfo, eksporto de kafo, ĉarlestono nomata «Ĉe mia knabino estas unu eta objekto» kaj... pri kio paroli! Vi mem vidas kio okazas. Unu punkto kvin milionoj da homoj, kaj ĉiuj senescepte en blankaj pantalonoj. Mi volas forveturi de ĉi tie. Inter mi kaj sovetia reĝimo aperis dum lasta jaro gravega malkonsento. Ĝi volas konstrui socialismon, sed mi – ne. Al mi estas enue konstrui socialismon. Ĉu nun klaras al vi por kio mi bezonas tiom da mono?

– Sed kie vi prenos kvincent mil? – mallaŭte demandis Balaganov.

– Ie ajn, – respondis Ostap. – Oni nur montru al mi riĉan homon, kaj mi deprenos monon de li.

– Kiel? Ĉu mortigo? – eĉ pli mallaŭte demandis Balaganov, kaj ĵetis la rigardon sur la najbarajn tabletojn, kie arbatovanoj suprenigis la tostkruĉojn.

– Ĉu vi scias, – diris Ostap, – estus pli bone se vi ne subskribus tiel nomatan Suĥarev-konvencion. Tiu ĉi mensa streĉo, ŝajne, ege elĉerpigis vin. Vi stultiĝas surloke. Rimarku, Ostap Bender neniam neniun mortigis. Lin oni jes mortigis – tio okazis. Sed li mem estas pura antaŭ leĝo. Certe mi ne estas kerubo. Ĉe mi forestasflugiloj, sed mi estimas kriminalan kodon. Tio estas mia malfortaĵo.

– Do kiel vi intencas depreni la monon?

– Kiel mi intencas? Forpreno aŭ depreno de mono varias laŭ cirkonstancoj. Mi, presone, havas kvarcenton da relative honestaj manieroj de la forpreno. Sed ne manieroj gravas. Problemas tio ke forestas nun riĉaj homoj. Tio estas teruro de mia stato. Iu alia ĵetus sin, certe, sur iun sendefendan ŝtatan institucion, sed tio estas ekster miaj reguloj. Vi konas jam mian estimon al kriminala kodo. Ne valoras rabi kolektivon. Donu al mi kiom eble pli riĉan individuon. Sed li, tiu ĉi individuo, li forestas.

– Kion vi diras! – kriis Balaganov. – Estas tre riĉaj homoj.

– Ĉu vi konas ilin? – tuj diris Ostap. – Ĉu vi povas doni familinomon kaj ĝustan adreson de eĉ unu sovetia milionulo? Tamen ili estas, ili devas esti. Se ene de la lando vagas iuj ajn bankaj biletoj, do devas esti homoj ĉe kiuj ili estas multaj. Sed kiel trovi tiun ĉi lertulon?

Ostap eĉ suspiris. Revoj pri riĉa individuo,

verŝajne, jam delonge maltrankviligis lin.

– Kiel agrable, – diris li enpensige, – labori kun laŭleĝa milionulo en bone organizita burĝa ŝtato kun antikvaj kapitalismaj tradicioj. Tie milionulo estas persono populara. Lia adreso estas konata. Li loĝas en vilao, ie en Rio-de-Ĵanejro. Vi iras rekte en lian akceptejon, kaj jam en la enirĉambro, post unuaj salutoj, vi deprenas de li monon. Kaj ĉio, rimarku, bonmaniere, ĝentile: «Halo, sinjoro, ne nervumu. Mi devos iom maltrankviligi vin. *O rajt*. Prete». Jen estas ĉio. Civilizo! Kio povas esti pli simpla? Ĝentlemano en komunumo de ĝentlemanoj okupiĝas pri sia eta komerco. Nur oni ne pafu lustron. Tio superfluas. Sed ĉe ni... Dio, Dio! En kiel malvarma lando ni loĝas! Ĉe ni ĉio estas sekreta, ĉio estas kaŝa. Sovetian milionulon povas trovi eĉ ne Financkomisarejo, kun ĝia superpotenca imposta aparato. Kaj la milionulo, eble, sidas nun en tiu ĉi tiel nomata somerĝardeno ĉe najbara tableto, kaj drinkas kvardek-kopekan bieron «Tip-Top». Jen kio ofendigas!

– Do vi opinias, – demandis Balaganov postio, – ke se vi trovus tiun ĉi kaŝan milionulon...

– Ne daŭrigu. Mi scias kion vi volas diri. Ne, tute ne tiel. Mi ne sufokos lin per kuseno, kaj ne batos lian kapon per nigra revolvero. Kaj entute okazos nenio stulta. Ho, se mi trovus la

individuo! Mi ordigus tiel ke li mem alportu monon al mi, en subtaso kun blua bordero.

– Tio estas bone. – Balaganov kredeme ekridetis. – Kvincent mil sur subtaso kun blua bordero.

Li leviĝis, kaj komencis turniĝadi ĉirkaŭ la tableto. Li plende ŝmacis per la lango, haltis, eĉ malfermis la buŝon, kavazaŭ dezirante prononci ion, sed, nenion dirinte, sidiĝis kaj denove ekstaris. Ostap indiferece sekvis evoluojn de Balaganov.

– Ĉu mem alportos? – demandis subite Balaganov per knara voĉo. – Sur subtaso? Kaj kio se ne alportos? Kie estas tiu Rio-de-Ĵanejro? Ĉu malproksime? Ne povas esti ke ĉiuj portas tie blankajn pantalonojn. Vi lasu tion, Bender. Kun kvincent mil rubloj oni ankaŭ ĉe ni povas vivi bone.

– Certe, certe, – gaje diris Ostap, – oni povas vivi. Sed vi ne kraku per la flugiloj senpretekste. Vi ja ne havas kvincent-milon.

Sur senzorga neplugita frunto de Balaganov aperis profunda sulko. Li nekonvinke alrigardis na Ostap kaj diris:

– Mi konas tian milionulon.

Vizaĝon de Bender momente lasis vigleco. La vizaĝo tuj ekestis firma, kaj denove akceptis medalajn konturojn.

– Iru, iru, – diris li, – almozon mi disdonas nur sabate.

- Je mia honora vorto, *mesje* Bender...
- Aŭskultu, *Ŝura*, se vi decide transiris la francan, do nomu min ne *mesje*, sed *situajen*, kio signifas civitano. Bonokaze, kio estas adreso de via milionulo?
- Li loĝas en **Nigramarsk**⁷.
- Nu certe, ĝuste tion mi supozis. Nigramarsk! Tie eĉ dum antaŭmilita tempo homo kun deko da miloj nomiĝis milionulo. Kaj nun... Mi povas imagi! Ne, tio estas sensencaĵo!
- Sed ne, donu al mi diri. Tio estas vera milionulo. Ĉu vi komprenas, Bender, okazis al mi sidi en tiea prizono...

Post dek minutoj la laktaj fratoj lasis la kunbieran someran kooperativ-ĝardenon. La granda kombinanto sentis sin kiel kirurgo antaŭ sufiĉe serioza operacio. Ĉio estas jam preta. En elektraĵoj kaseroletoj vaporiĝas tuketoj kaj pansaĵoj. Flegistino en blanka togo senbrue moviĝas sur la ceramika planko, brilas medicinaj fajenco kaj nikelo, la malsanulo kuŝas sur vitra tablo, tenere levante la okulojn al la plafono, en speciale varmigita aero sentiĝasodoro de germana maĉgumo. La kirurgo kun disigitaj manoj alvenas la operacian tablon, akceptas de la asistanto steriligitan poŝtranĉilon, kaj seke diras al la malsanulo:

7. Nigramarsk: tio, sendube, estas Odeso, intima urbo de la aŭtoroj.

«Nu-s, **demetu na burnus'** ⁸».

– Ĉe mi ĉiam estas same, – diris Bender, brilante per la okuloj, – milionan aferon mi devas komenci ĉe sentebla nesufiĉo de monbiletoj. Tuta mia kapitalo, fiksa, cirkula kaj rezerva enkalkulas kvin rublojn... Kio, vi diris, estas nomo de la kaŝ-milionulo?

– Korejko, – respondis Balaganov.

– Jes, jes, Korejko. Bonega familinomo. Do vi asertas ke neniu scias pri liaj milionoj?

– Neniu, krom mi kaj Pruĵanskij. Sed Pruĵanskij, mi ja diris al vi, ankoraŭ du aŭ tri jaroj sidos en la prizono. Se vi vidus kiel li ĉagrenis kaj ploris kiam oni liberigis min. Verŝajne li sentis ke ne decidis rakonti al mi pri Korejko.

– Tio ke li malkaŝis sian sekreton al vi estas sensencaĵo. Ne pro tio li ĉagrenis kaj ploris. Li, verŝajne, antaŭsentis ke vi rakontos tiun ĉi historion al mi. Kaj tio estas vera malgajno al kompatinda Pruĵanskij. Kiam Pruĵanskij eliros el la prizono Korejko serĉos konsolon nur en banala proverbo «Malriĉeco ne estas malvirto».

Ostap demetis sian someran kaskedon, svingis ĝin en la aero, kaj demandis:

– Ĉu estas ĉe mi grizaj haroj?

Balaganov entiris la ventron, disigis la ŝupintojn laŭ vasteco de fusila kolbo, kaj per voĉo de dekstraflankulo respondis:

– Tute ne!

8. demetu na burnus': rabaj senvestigoj estis ordinaraj tiam.

– Do estos. Nin atendas grandaj bataloj. Ankaŭ vi griziĝos, Balaganov.

Subite Balaganov ekridis stultete:

– Kion vi diras? La monon li alportos mem, sur subtaso kun blua bordero?

– Al mi – sur subtaso, al vi – sur telereto.

– Kaj kio pri Rio-de-Ĵaneiro? Ankaŭ mi volas blankan pantalonon.

– Rio-de-Ĵaneiro estas kristala revo de mia infaneco, – severe respondis la granda kombinanto, – ne tuŝu ĝin per viaj manaĉoj. Al la afero. Sendu la gvardion en mian disponon. Regimentoj venu na Nigramarsk ekstrem-frue. Uniformo garda. Nu, trumpetu marŝon! La paradon komandos mi!

Ĉapitro 3

Benzino via – ideoj niaj

Unu jaro antaŭ ol Panikovskij rompis la konvencion, penetrante la fremdan ekspluatan terenon, en urbo Arbatov aperis unua aŭto. Fondinto de la aŭta afero estis ŝoforo kies familinomo estis Kozleviĉ.

Al stira rado lin venigis decido rekomenci la vivon. Antaŭa vivo de Adam Kozleviĉ estis peka. Li senĉese rompis kriminalan kodon de Rusia respubliko, specife paragrafon 6-an, traktantan kaŝan forprenon de malpropra posedaĵo (ŝtelo).

Tiu ĉi paragrafo havas multajn punktojn, sed punkto «a» (ŝtelo okazigita sen uzo de teknikaj rimedoj) estis fremda al peka Adam. Tio estis

tro primitive por li. La punkto «do», punanta per malliberigo kvinjara, ankaŭ ne taŭgis. Li ne ŝatis sidi en prizono longe. Do, ĉar li de infaneco estis inklina al teknikaĵoj, li tutan sin fordonis al punkto «bo» (kaŝa forpreno de malpropraĵoj, okazigita kun uzo de teknikaj rimedoj, aŭ ne unuafoje, aŭ kun antaŭa interkonsento kun aliaj personoj, en stacidomoj, ŝiphaltejoj, vagonoj kaj hoteloj).

Sed Kozleviĉ ne prosperis. Oni kaptis lin kiam li uzis la ŝatatajn teknikajn rimedojn, kaj ankaŭ kiam li agis sen ili. Oni kaptis lin en stacidomoj, ŝiphaltejoj, sur ŝipoj kaj en hoteloj. Ankaŭ en vagonoj oni lin kaptis. Oni kaptis lin eĉ kiam li, en plena malespero, komencis forpreni malpropraĵojn laŭ antaŭkonsento kun aliaj personoj.

Pasiginte pli-malpli tri prizon-jarojn, Adam Kozleviĉ venis al ideo ke aperta akumulo de propra havaĵo multe pli oportunas ol kaŝa forpreno de la malpropra. Tiu ĉi penso venigis trankvilon en lian ribelan animon. Li ekestis ekzempla malliberulo, verkis senvualigajn versojn por prizona murgazeto «Leviĝas, malleviĝas suno», kaj diligente laboris en mekanika metiejo de la prizono. La puniga sistemo efikis lin bone. Kozleviĉ, Adam Kazimiroviĉ, kvardek-ses-jara, origina el kamparanoj de eksa Ĉenstoĥovskij regiono, fraŭlo, neunuvoje juĝita, eliris el la malliberejo

estiel honesta homo.

Post dujara laboro en unu el moskvaj garaĝoj li aĉetis hazardaĵon: aŭton tiel antikvan, ke ĝian aperon sur la merkato oni povas klarigi nur per likvido de aŭtomuzeo. La rara eksponaĵo estis vendita al Kozleviĉ per cent naŭdek rubloj. Iukaŭze la aŭton oni vendis kune kun imita palmo en verda duonbarelo. Do li aĉetis ankaŭ la palmon. La palmo estis ne tro problema, sed pri la aŭto li endis klopodi multe: estis bezonate serĉi en bazaroj forestantajn partojn, ripari la sidlokojn, renovigi la elektran sistemon. La riparo estis kronita per kolorigo de la aŭto per lacerte verda farbo. Raso de la aŭto estis nekonata, sed Adam Kazimiroviĉ deklaris ke tio estas «Loren-ditriĥ». Por pruvi tion li alnajlis al ĝia radiilo kupraĵon kun «Loren-ditriĥ»-a fabrika marko. Restis nur komenci la privatan taksiadon, pri kio Kozleviĉ revis jam delonge.

Sed en tago kiam Adam Kazimiroviĉ intencis unuafoje prezenti sian kreaĵon ĉe taksi-atendejo, okazis evento malgaja por ĉiuj privataj ŝoforoj. En Moskvon venis cent-dudeko da etaj, nigraj, similaj al pistoloj taksioj «Reno». Kozleviĉ eĉ ne penis konkuri kontraŭ ili. La palmon li pruntedonis al fiakrista restoracio «Versajlo», kaj forveturis por labori en provinco.

Senaŭta Arbatov ekplaĉis al la ŝoforo, kaj li

decidis resti en ĝi por ĉiam.

Adam Kozleviĉ imagis kiel diligente, gaje, kaj, grave, honeste, laboros li sur kampo de aŭtouzado. Imagis li fruan arktikan matenon dum kiu li deĵoras ĉe stacidomo, atendante elmoskvan trajnon. Envolviĝinte en rufan bovan peltaĵon, kaj levinte sur la frunton aviadistajn okulvitrojn, li amike regalas per cigaredoj la valiz-portistojn. Ie malantaŭe premiĝas frostiĝintaj fiakristoj. Ili ploras pro la malvarmo, kaj skuas siajn dikajn blujajn jupojn. Sed jen aŭdiĝas alarma sono de stacia sonorilo. Tio estas informo. Venis la trajno. La pasaĝeroj eliras sur la stacidoman placon kaj, kontente grimacante, haltas antaŭ la aŭto. Ili ne atendis ke en provincan Arbatov jam enpenetris ideo de aŭtouzado. Trumpetante, Kozleviĉ haste veturigas la pasaĝerojn en la kamparanan gastejon.

Laboro sufiĉas por tuta tago. Ĉiuj estas ĝojaj akcepti servon de la mekanika veturilo. Kozleviĉ kaj lia fidela «Loren-ditriĥ» estas nepraj partoprenantoj de ĉiuj urbaj edziĝfestoj, ekskursoj kaj festenoj. Sed plej multe da laboro estas somere. Per aŭto de Kozleviĉ, dum dimanĉoj, elurbiĝas tutaj familioj. Sonas sensenca rido de la infanoj, la vento ŝiras skarpojn kaj rubandojn, la virinoj gaje babilas, patroj de la familioj estime rigardas ledan dorson de la ŝoforo, kaj demandas lin pri

prospero de aŭtoafero en Nordusonaj Unuiĝintaj Ŝtatoj. (Ĉu veras, interalie, ke Ford ĉiutage aĉetas por si novan aŭton?).

Tiel pentriĝis al Kozleviĉ lia nova mirinda vivo en Arbatov. Sed realeco, dum tempo ekstreme mallonga, ruinigis la aerkastelon konstruitan per imago de Adam Kazimiroviĉ, kune kun ĉiuj ĝiaj turetoj, lev-pontoj, ventomontriloj kaj standardoj.

Komence embarasis la fervoja horaro. Rapidaj kaj kurieraj trajnoj preterveturis stacion Arbatov senhalte, akceptante la trafik-sceptrojn dum la moviĝo, kaj deĵetante hastajn poŝtaĵojn. Miksaj trajnoj venis nur dufoje semajne. Ili venigis precipe popolon etan: peticianojn, kaj botistojn kun siaj dorsosakoj kaj ŝu-formiloj. Tiuj ĉi miksaj pasaĝeroj kutime ne uzis la aŭton. Ekskursoj kaj solenaĵoj forestis, kaj oni ne invitis na Kozleviĉ al edziĝfestoj. En Arbatov oni kutimis dungi por edziĝ-procesioj fiakristojn kiuj, tiuokaze, enplektis en kolharaĵojn de la ĉevaloj paperajn rozojn kaj krizantemojn, kio tre plaĉis al la bopatroj.

Eksterurbaj promenoj, tamen, estis tre multaj. Sed ili estis tute ne tiaj pri kiuj revis Adam Kazimiroviĉ. Estis nek infanoj, nek flagrantaj skarpoj, nek la gaja babilado. Jam dum unua vespero, lumigita per nebrilaj kerosenaj lampoj, al Adam Kazimiroviĉ, kiu la tutan tagon senfrukte staris sur Savo-

Kooperativa placo, alvenis kvar viroj. Longe kaj silente pririgardis ili la aŭton.

Poste unu el ili, ĝibulo, necerte demandis:

– Ĉu iu ajn povas veturi?

– Iu ajn, – respondis Kozleviĉ, mirante pri timido de Arbatov-civitanoj. – Kvin rublojn pohore.

La viroj ekinterflustris. Ĝis Kozleviĉ venis strangaj suspiroj kaj vortoj: «Promenu ni, kamaradoj, post la kunsido, ĉu? Ĉu estas konvene? Po rublo kaj dudek kvin por persono tio ne estas multekoste. Kio nekonvena povas esti ĉi tie?..»

Taksi подано! («La taksio disponeblas»)

Kaj unuafoje la ampleksa aŭto prenis en sian katunan internon anojn de Arbatov. Dum kelkaj minutoj la pasaĝeroj silentis, premitaj per rapideco de la veturo, per varmega odoro de benzino, kaj per fajfo de la vento. Poste, turmentataj per iu neklara antaŭsento, ili mallaŭte ekkantis la studentan: «Onde ruliĝas tagoj de l' vivo». Kozleviĉ prenis trian rapidumon. Preterflugis malhelaj konturoj de konservita butikoj, kaj la aŭto elŝiriĝis kamparon, sur lunan grundan vojon.

«Tago post tago – voj' al la tomb'», – tenere plenumis la pasaĝeroj. Ili ekkompatis sin, al ili ekestis ofende ke ili neniam estis studentoj. La refrenon ili plenumis laŭtvoĉe: «Glaseton drinku

post glaset', tirlim-bom-bom, tirlim-bom-bom».

– Halt! – kriis subite la ĝibulo. – Reveturu!
La animo brulas.

En la urbo la pasaĝeroj kunprenis multe da blankaj boteletoj, kaj iun vastŝultran civitaninon. En kamparo ili bivakis, vespermanĝis kun vodko, kaj poste, sen muziko, dancis polkon.

Lacigita per la nokta aventuro, Kozleviĉ la tutan tagon dormetis ĉe la stirilo sur sia haltejo. Kaj vespere venis hieraŭa kompanaro, jam ebrieta. Ili denove ensidis la aŭton, kaj la tutan nokton hastis ĉirkaŭ la urbo. La trian tagon ripetiĝis la samo. La noktaj festenoj de la gaja kompanaro, sub gvido de la ĝibulo, daŭriĝis tutajn du semajnojn. Ĝojoj de la aŭto-uzado influis strange klientojn de Adam Kazimiroviĉ: iliaj vizaĝoj ŝveliĝis, kaj en mallumo blankiĝis kiel kusenoj. La ĝibulo kun peco de kolbaso, pendanta el la buŝo, similis vampiron.

Ili ekestis vantaj, kaj iam, ene de la ĝojo, ploris. Foje la aventurema ĝibulo alveturigis al la aŭto, per fiakro, sakon da rizo. Dum mateniĝo oni venigis la rizon en vilaĝon, ŝanĝis ĝin tie kontraŭ **pervac⁹**, kaj tiutage jam ne revenis en la urbon. Sidante sur fojno ili fratiĝe drinkis kun la kamparanoj. La nokte ili bruligis fajron, kaj ploris precipe komplate.

9. Pevac⁹: (ruse) memdistilita vodko, produktita komence de la distilado.

Dum sekvanta grizeta mateno la fervoja kooperativo «Vojano», en kiu la ĝibulo estis administranto, kaj liaj gajaj kamaradoj – anoj de la estraro kaj de la kontrolo komisiono, fermiĝis por reregistro de varoj. Sed ĝis kiom amara estis miro de la reviziistoj, kiam ili malkovris en la vendejo nek farunon, nek pipron, nek brikojn da sapo, nek lavkuvojn kamparanajn, nek teksaĵon, nek rizon. La bretoj, vendotabloj, kestoj kaj bareletoj – ĉio estis nudigita. Nur gigantaj ĉasistaj botoj numero kvardek naŭ, kun flavaj kartonaj plandumoj, staris meze de la vendejo sur la planko, leviĝante al la plafono, kaj malklare briletis en la vitra budo aŭtomata kasregistrilo «Nacional», kies nikelizita virina busto estis semita per diverskoloraj butonoj. En loĝejon de Kozleviĉ oni alsendis inviton de juĝesploristo: la ŝoforon oni alvokis esti atestanto pri afero de kooperativo «Vojano».

La ĝibulo kaj liaj kamaradoj ne aperis plu, kaj la verda aŭto tri tagoj staris senlabore.

Novaj pasaĝeroj, same al la antaŭaj, aperis sub vualo de mallumo. Ankaŭ ili komencis de senkulpa eksterurba promenado, sed penso pri vodko aperis ĉe ili tuj post la unua duonkilometro. Verŝajne arbatovanoj ne imagis ke aŭton oni povas uzi ankaŭ en sobra stato, kaj opiniis ke aŭtoĉaro de Kozleviĉ estas nesto de malĉasto, en kiu oni nepre devas teni sin

diboĉe, eligi maldecajn sonojn, kaj entute forbruligi la vivon. Nur tiam Kozleviĉ komprenis kial viroj, preteririntaj tage lian haltejon, okulumis unu al la alia, kaj malbone smajlis.

Ĉio iris tute ne kiel supozis Adam Kazimiroviĉ. Nokte li veturegis kun la lumantaj lanternoj preter apudurbaj arbaretoj, aŭdante post si ebrian baraktadon kaj kriaĉojn de la pasaĝeroj, kaj tage, stultiĝinta pro la sendormeco, li sidis ĉe juĝeja esploristo estiel atestanto. Iu-kaŭze la arbatovanoj forbruligis siajn vivojn per mono apartenanta al ŝtato, komunumo kaj kooperativo. Do Kozleviĉ, kontraŭ sia volo, denove profundiĝis en abismojn de kriminala kodo, en mondon de ĉapitro tri kiu edife parolis pri oficaĵ krimoj.

Komenciĝis juĝaj procesoj. Kaj en ĉiu el ili, estiel atestanto de akuzita flanko, elpaŝis Adam Kazimiroviĉ. Liaj strikte veraj rakontoj renversigis la akuzitojn, kaj ili, anhelante en larmoj kaj nazmukoj, konfesis pri ĉio. Li pereigis tre multajn instituciojn. Lasta el liaj viktimoj falis filio de regiona filmproduktejo, kiu kreadis en Arbatov historian filmon «Ribelulo Razin kaj la princino». La tutan filion oni malliberigis por ses jaroj, kaj la filmon, kiu prezentis nur malvast-juran valoron, oni transdonis en muzeon de pruvaĵoj, kie jam troviĝis la ĉasistaj botegoj el kooperativo «Vojano».

Poste venis fiasko. La verdan aŭton oni

komencis timi kiel peston. Civitanoj de malproksime ĉirkaŭiris Savo-Kooperativan placon, sur kiu Kozleviĉ instalas striigitan foston kun plateto «Taksi-haltejo». Dum kelkaj monatoj Adam perlaboris eĉ ne unu kopekon, kaj vivis per ŝparoj akumulitaj dum la noktaj veturadoj.

Tiam li decidis oferi. Sur la pordeton de la aŭto li pentris blankan kaj tre allogan, laŭ li, surskribon «Hej, ekveturu ni!», kaj malpliigis la prezon de kvin rubloj pohore ĝis tri. Sed ankaŭ post tio civitanoj ne ŝanĝis sian taktikon. La ŝoforo malrapide veturadis tra la urbo, proksimiĝis al institucioj, kaj kriis en la fenestrojn:

– Ja kiel bonegas la aero! Ĉu promen-veturu ni?

La oficialaj personoj duonelsoviĝis en la straton, kaj ĉe frapobruo de la tajpiloj respondis:

– Vi mem promenadu, pereigulo!

– Kial pereigulo? – preskaŭ plorante demandis Kozleviĉ.

– Ĉar pereigulo vi estas, – respondis la oficistoj, – sub juĝsesion vi altiros.

– Sed vi veturadu per via propra mono! – ekscite kriis la ŝoforo.

Ĉe tiuj vortoj la oficaj personoj humure interrigardis, kaj fermis la fenestrojn. Promeno en aŭto per propra mono ŝajnis al ili vera

stultaĵo.

Posedanto de «Hej, ekveturu ni!» diskverelis kun la tuta urbo. Li jam salutis neniun, ekestis nervuma kaj kolera. Vidinte iun sovetian oficiston en longa kaŭkaza ĉemizo kun balonaj manikoj, li alveturis lin de malantaŭe, kaj kun amara rido kriis:

– Friponoj! Ja mi vin tuj sub preventigan proceson venigu! Sub paragrafon cent-naŭan.

La sovetia oficisto ekstremis, indiferece ordigis sian zoneton kun fiksitaj sur ĝi arĝentaj pecetoj, per kiuj oni kutimas plibeligi rimenaron de pezĉevaloj kaj, aspektante ke la krioj koncernas ne lin, plirapidigis la paŝojn. Sed venĝema Kozleviĉ daŭre veturis apude kaj incitis la malamikon per monotona legado de la poŝa krim-preĝaro:

– «Alproprigo de mono, valoraĵoj, aŭ aliaj havaĵoj, troviĝantaj en dispono de oficiala persono pro ties ofica stato, estas punata...»

La sovetia oficisto time forkuris, alten ĵetante la postaĵon, platiĝintan pro longa sidado sur kontora tabureto.

– «... per malliberigo», – kriis Kozleviĉ al dorso de la forkuranto, – «ĝis tri jaroj!»

Sed ĉio ĉi donis al la ŝoforo nur moralan kontentiĝon. Liaj materialaj aferoj estis malbonaj. La ŝparoj proksimiĝis al fino. Ne eblis jam daŭrigi tiel, do li devis veni al iu decido.

En tia inflama stato sidis foje Adam

Kazimiroviĉ en sia aŭto, kun abomeno rigardante la stultan striigitan foston «Taksi-haltejo». Neklare li komprenis ke la honesta vivo ne prosperis, ke la aŭta mesio venis antaŭtempe, do la civitanoj ne ekkredis ĝin. Kozleviĉ estis tiel profundiginta siajn malgajajn meditojn, ke eĉ ne rimarkis paron da junaj homoj, jam sufiĉe longe admirantaj lian aŭton.

– Originala konstruo, – diris fine unu el ili, – aŭroro de aŭtismo. Ĉu vi vidas, Balaganov, kion oni povas fari el simpla kudromaŝino Zinger (Singer)? Ioma modifo, kaj rezulte – ĉarma kamparana garboligilo.

– Deiru, – malgaje diris Kozleviĉ.

– Kial «deiru»? Por kio do vi stampis vian draŝmaŝinon per reklama surskribo «Hej, ekveturu ni!»? Ĉu ne povas okazi ke mi kaj mia kompano volas entrepreni poraferan veturon? Eble ni deziras ĝuste hej-ekveturi?

Sur vizaĝo de la martiro de aŭtoafero, unuafoje dum la arbatov-periodo de lia vivo, aperis smajlo. Li elsaltis el la aŭto, kaj lerte funkciigis la peze ekfrapantan motoron.

– Bonvolu, – diris li, – kien veturigi?

– Ĉi-foje – nenien, – diris Balaganov, – mono forestas, kamarado mekanikisto: malriĉeco.

– Ne gravas, sidu! – kriis Kozleviĉ furioze. – Mi veturigos senpage. Ĉu vi ne drinkos? Ne dancos nudaj sub luno? Hej, ekveturu ni!

– Nu, kial ne, ni akceptas la gastamon, – diris Ostap, sidante apud la ŝoforo. – Vi, mi vidas, havas bonan karakteron. Sed kial vi opinias ke ni kapablas danci nudaj?

– Ĉi tie ĉiuj estas tiaj, – respondis la ŝoforo, elgvidante la aŭton sur la ĉefan straton, – ŝtat-krimuloj.

Lin turmentis deziro rakonti al iu pri sia malfeliĉo. Plej bone, certe, estus rakonti pri la suferoj al sia tenera sulka patrino. Ŝi kompatus. Sed sinjorino Kozleviĉ jam delonge forpasis pro ĉagreno, kiam eksciis ke ŝia filo Adam komencas akiri famon estiel profesia ŝtelisto. Do la ŝoforo rakontis al la novaj pasaĝeroj tutan historion pri falo de urbo Arbatov, sub kies ruinoj baraktas nun lia verda aŭto.

– Kien veturi nun? – angore finis Kozleviĉ. – Kien direktiĝi?

Ostap prokrastis, multsignife ekrigardis sian rufan kompanon, kaj diris:

– Ĉiuj viaj malfeliĉoj devenas de tio ke vi estas serĉanto de vero. Vi estas simple ŝafido, nesukcesinta baptisto. Malgajas observi ene de ŝoferaro tiel dekadencajn humorojn. Vi havas aŭton, sed ne scias kien veturi. Ĉe ni aferoj statas malpli bone – ni ne havas aŭton. Sed ni scias kien veturi. Ĉu ni veturu kune?

– Kien? – demandis la ŝoforo.

– Na Nigramarsk, – diris Ostap. – Nin atendas tie negranda intima afero. Ankaŭ al vi

troviĝos laboro. En Nigramarsk oni aprezas antikvaĵojn, kaj volonte promenadas pere de ili. Veturu ni.

Komence Adam Kazimiroviĉ nur smajlis kiel vidvino, al kiu valoras jam nenio en la vivo. Sed Bender ne avaris farbojn. Li malvolvis antaŭ la konfuzita ŝoforo mirindajn malproksimojn, kaj tuj farbis ilin per blua kaj roza koloroj.

– En Arbatov vi havas nenion perdi krom la **rezervaj ĉenoj**¹⁰. Dum la vojo vi ne malsatos. Tion mi prenas sur min. Benzino via – ideoj niaj.

Kozleviĉ haltis la aŭton kaj, daŭre kontraŭante, diris malserene:

– Benzino malmultas.

– Ĉu por kvindeko da kilometroj sufiĉos?

– Sufiĉos por okdeko.

– Tial ĉio estas en ordo. Mi jam informis vin ke ideoj kaj pensoj ne mankas ĉe mi. Ĝuste post sesdek kilometroj vin atendas ĉevoje granda fera barelo kun avia benzino. Ĉu vi ŝatas avian benzinon?

– Ŝatas, – sinĝene respondis Kozleviĉ.

La vivo, subite, ekŝajnis al li facila kaj gaja. Li ekvolis tuj veturi na Nigramarsk.

10. Rezervaj ĉenoj:

a) K. Marks: «Proletaro havas nenion por perdi krom siaj ĉenoj».

b) La aŭto estis vere antikva, ĉar ĉenoj, transdonantaj movon al la radoj, delonge jam, tiutempe, ĉesis esti uzataj.

– Kaj tiun ĉi barelon, – aldonis Ostap, – vi ricevos tute senpage. Eĉ pli. Oni petos vin akcepti la benzinon.

– Kiu benzino? – flustris Balaganov. – Pri kio vi balbutas?

Ostap grave alrigardis oranĝajn lentugojn, dissemitajn sur vizaĝo de la lakta frato, kaj same mallaŭte respondis:

– Homojn kiuj ne legas ĵurnalojn oni devas morale mortigi surloke. Al vi mi lasas vivon ĉar esperas reeduki vin.

Ostap ne klarigis kiu ligo ekzistas inter lego de ĵurnaloj kaj barelo kun avia benzino, kiu kvazaŭ kuŝas ĉe la vojo.

– La grandan rapid-veturadon Arbatov – Nigramarsk mi deklaras malfermita, – solene deklaris Ostap. – En komandanton de la rapidveturado mi enoficigas min. Estiel ŝoforo de la aŭto enlistiĝas... Kio estas via familinomo? Adam Kozleviĉ. Civitano Balaganov estas konfirmata estiel ĉefmekanikisto kun devoj de servisto pri ĉio. Sed jen kio, Kozleviĉ: surskribon «Hej, ekveturu ni!» oni devas forigi tuj. Ni ne bezonas specifajn indicojn.

Post ĉirkaŭ du horoj la aŭto kun freŝa flanka malhel-verda makulo malrapide elgaraĝiĝis, kaj lastfoje ekruliĝis sur stratoj de urbo Arbatov. En okuloj de Kozleviĉ lumis espero. Apud li sidis Balaganov. Li klopode refrotis per la ĉifoneto kuprajn partojn, zorge plenumante novajn por li

taskojn de ĉefmekanikisto. Komandanto de la rapid-veturado duonkuŝis sur la flavruĝa sidloko, kontente rigardante siajn novajn subulojn.

– Adam! – kriis li, superante grincadon de la motoro. – Kiel oni nomas vian ĉaron?

– «Loren-ditriĥ» – respondis Kozleviĉ.

– Ĉu tio estas nomo? Aŭto same al milita ŝipo devas havi propran nomon. Via «Loren-ditriĥ» distingiĝas per rimarkinda rapideco kaj beleco de la trajtoj. Tial mi proponas alproprigi al ĝi nomon «Antilopo-Gnu». Kiu kontraŭas? Ĉiuvoĉe.

La verda «Antilopo», grincante per ĉiuj siaj partoj, haste traveturis eksteran flankon de Bulvardo de Junaj Talentoj, kaj alflugis la bazaran placon.

Tie al rigardoj de «Antilopo»-personaro prezentiĝis stranga vidaĵo. De la placo, direkte al la ŝoseo kuris, kliniĝinte, homo kun blanka ansero sub la brako. Per maldekstra mano li subtenis sur la kapo duran pajlan ĉapelon. Post li, kriante, kuris granda homamaso. La forkuranto ofte retrorigardis, kaj sur lia bonaspekta aktora vizaĝo oni povis rimarki esprimon de teruro.

– Panikovskij kuras! – kriis Balaganov.

– Dua stadio de anser-ŝtelo, – malvarme rimarkis Ostap. – Tria stadio komenciĝos post kapto de la kulpanto. Ĝin akompanas sentebraj

batoj.

Gusekrad («Anserŝtelisto»)

Verŝajne Panikovskij konjektis proksimiĝon de la tria stadio, ĉar li kuris kiom eble rapide. Pro timo li ne ellasis la anseron, kaj tio elvokis en la persekutantoj signifan inciton.

– Cent-dek-sesa paragrafo, – parkere diris Kozleviĉ. – Kaŝa, kaj same malkaŝa forpreno de granda brutaro de laboranta kamparana kaj brutbredista loĝantaro.

Balaganov ridegis. Lin plezurigis penso ke rompinto de la konvencio ricevos laŭleĝan punon.

La aŭto surgrimpis la ŝoseon, distranĉinte la bruantan homamason.

– Savu! – kriis Panikovskij, kiam «Antilopo» preterveturis lin.

– Dio helpos, – respondis Balaganov, kliniĝante trans la randon.

La aŭto superŝutis na Panikovskij per ombro de framba polvo.

– Prenu min, – kriaĉis Panikovskij, el lastaj fortoj kurante apud la aŭto. – Mi estas bona.

Voĉoj de la persekutantoj kuniĝis en komunan malamikan obtuzan bruon.

– Eble ni prenu la rampulon? – demandis Ostap.

– Ne valoras, – krude respondis Balaganov, – alifoje li scios ke oni ne rompu konvenciojn.

Sed Ostap jam decidis.

– Ĵetu la birdon! – kriis li al Panikovskij kaj, rilatante al la ŝoforo, aldonis:

– Malaltan rapidumon.

Panikovskij tuj obeis. La ansero malkontente leviĝis de la tero, gratis sin kaj, kvazaŭ okazis nenio, ekiris reen en la urbon.

– Enrampu, – proponis Ostap, – diablo vin prenu! Sed ne peku plu, alie mi elŝiros viajn manojn kune kun la radikoj.

Panikovskij, alternante la piedojn, kaptis la aŭtokorpon, ekkuŝis ventre sur la rando, transiĝis kiel bananto en boaton kaj, frapante per la manumoj, falis sur la fundon.

– Plenrapide! – ordonis Ostap. – La kunsido daŭriĝas.

Balaganov premis la pneŭmaĵon, kaj el la kupra hupo elsaltis malnovmodaj, gajaj, subite ĉesantaj sonoj:

Maĉiŝ estas rava danco. Ta-ra-ta.

Maĉiŝ estas rava danco. Ta-ra-ta...

Kaj «Antilopo-Gnu» enrompiĝis la sovaĝan kamparon, renkonte al la barelo kun avia benzino.

Ĉapitro 4

Ordinara valizaĉo

Homo sen ĉapelo, en griza tola pantalono, en ledaj sandaloj, vestitaj monaĥe sur la nudajn

piedojn, kaj en blanka senkoluma ĉemizoj, eliris klininte la kapon el malalta pordeto de domo numero dek ses. Okazinte sur la trotuaro, pavimita per bluetaj ŝtonaj platoj, li haltis, kaj mallaŭte diris:

– Hodiaŭ estas vendredo. Do denove endas iri al la stacidomo.

Prononcinte tiujn ĉi vortojn, la homo en la sandaloj rapide retrorigardis. Al li ekŝajnis ke post lia dorso staras civitano kun zinka muzelo de pririgardanto. Sed Eta Tanĝanta strato estis tute malplena.

La junia mateno nur komencis formiĝi. La akacioj tremetis, faligante sur la platajn ŝtonojn malvarman stanan roson. Strataj birdetoj elklakadis iun gajan sensencaĵon. Fine de la strato, sobe, post tegmentoj de domoj, brulegis gisita peza maro. Junaj hundoj, malgaje rigardante flankojn, kaj frapante per la ungoj, grimpis sur la lignajn rubaĵkestojn. Horo de kortistoj jam pasis, horo de laktistinoj ankoraŭ ne komenciĝis.

Estis tiu intervalo inter la kvina kaj sesa kiam kortistoj, ĝissate swinginte la pikajn balailojn, jam disiris en siajn loĝejojn, en la urbo estas lume, pure kaj senbrue, kiel en ŝtata banko. Dum tia minuto aperas deziro plori kaj kredi ke acida lakto vere estas pli utila kaj pli bongusta ol vodko; sed jam aŭdiĝas malproksima tondro: tio el ĉeurbaj trajnoj

elŝarĝiĝas laktistinoj kun siaj ladaj laktuloj. Nun ili ĵetiĝos la urbon, kaj sur **malĉefaj**¹¹ ŝtuparplacetoj komencos sian kutiman kverelon kun hejmmastrinoj. Por momento aperos laboristoj kun mansaketoj, kaj tuj malaperos en uzinaj pordegoj. Fabrikaj tuboj ekpafos fumon. Kaj poste, saltante pro la malico, sur noktotabloj eksonoros sennombraj vekhorloĝoj (far firmao «Paul Bure» – malpli laŭte, far trusto de preciza mekaniko – pli sonore), kaj muĝos vekiĝante sovetaĵaj oficistoj, falante de siaj altaj fraŭlinaj litetoj. Horo de laktistinoj finiĝos, venos horo de oficistaro.

Sed ankoraŭ estis frue, oficistoj ankoraŭ dormis sub siaj banjan-arbetoj.

La homo en la sandaloj trairis la tutan urbon, renkontinte preskaŭ neniun sur la vojo. Li iris sub akacioj, kiuj en Nigramarsk plenumis ankaŭ iom da sociaj funkcioj: sur iuj el ili pendis bluaj poŝtkestoĵ kun departementa blazono (koverto kaj fulmo), kaj al aliaj estis alforĝitaj ledaj ujetoj kun akvo por hundoj.

Al Ĉemara stacidomo la homo en la sandaloj venis en la momento kiam el ĝi eliris laktistinoj. Dolore batiĝinte kelkfoje je iliaj feraĵ ŝultroj, li venis la pakaĵ-deponejon, kaj prezentis la

11. Malĉefa ŝtuparejo: loĝejoj en domoj por bonstatuloj, konstruitaj antaŭrevolucie, havis ŝtuparojn ĉefajn (por la mastroj) kaj malĉefajn (por la servistaro). Post la revolucio en ĉiu ĉambro de la loĝejoj ekloghis po unu, aŭ eĉ pli da familioj.

kvitancon. Deponisto, kun nenatura severeco, kutima nur en fervojoj, enrigardis la kvitancon, kaj tuj elĵetis al la prezentinto ties valizon. La prezentinto, siavice, malfermis la ledan monsaketon, kun suspiro elprenis de tie dekkopekan moneron, kaj metis ĝin sur la pakaĵtablon, faritan el seso da malnovaj reloj, poluritaj per kubutoj.

Okazinte sur la stacidoma placo, la homo en la sandaloj metis la valizon sur la pavimon, zorge pririgardis ĝin de ĉiuj flankoj, kaj eĉ tuŝis permane ĝian blankan tekan serureton. Tio estis ordinara valizaĉeto, farita el ligno, kaj ĉirkaŭgluita per fortika papero.

En tiaj valizaĉoj pasaĝeroj pli junaj entenas kotonajn duonŝtrumpojn «skeĉ», du bluzojn, kalsonetojn, broŝuron «Taskoj de komunista junularo en vilaĝo», kaj tri rompitaĵojn, malmole kuiritajn ovojn. Krom tio en la angulo nepre troviĝas bulo da malpura tolaĵo, envolvita en ĵurnalon «Ekonomika vivo». Pasaĝeroj pli aĝaj tenas en tia valizo plenan jakan kostumon kaj, aparte de ĝi, pantalonon el kvadrato kolorigita teksaĵo, konata sub nomo «Centjariĝo de Odeso», ŝelkon, pantoflojn, flakonon da parfumo, kaj blankan marsejlan litkovrilon. Oni devas mencii ke ankaŭ ĉi-okaze en la angulo troviĝas io envolvita na «Ekonomika vivo», sed tio estas ne malpura tolaĵo, sed pala kuirita kokino.

Kontentiĝinte per la supraĵa pririgardo, la homo en sandaloj kaptis sian valizon, kaj leviĝis en blankan tropikan vagonon de tramo, veniginta lin en alian flankon de la urbo, al Orienta stacidomo. Ĉi tie liaj agoj estis tute kontraŭaj al kion li ĵus faris en Ĉemara stacidomo. Li deponis sian valizon, kaj ricevis de la majesta deponisto kvitancon.

Plenuminte tiujn ĉi strangajn evoluojn, la mastro de la valizo lasis la stacidomon ĝuste tiun momenton kiam sur la stratoj aperis plej ekzemplaj oficistoj. Li enmiksiĝis iliajn malordajn vicojn, post kio lia kostumo perdis iun ajn originalecon. La homo en la sandaloj estis oficisto, kaj oficistoj en Nigramarsk preskaŭ ĉiuj vestiĝis laŭ neregistrita modo: nokta ĉemizo kun manikoj kuspitaj ĝis post la kubutoj, malpeza orfa pantalono, samaj sandaloj aŭ velŝtofaj ŝuoj. Neniu portis ĉapelon aŭ kaskedon. Nur malofte renkontiĝis ĉapoj, pli ofte – nigraj hirtaj hararoj, kaj eĉ pli ofte, kiel melono en legom-ĝardeno, flagris sunbrunigita kalvaĵo, sur kiu estis tre dezirinde surskribi certan vorton.

Oficejo, en kiu servis la homo en sandaloj, nomiĝis «Herkules», kaj troviĝis en eksa hotelo. La turniĝanta vitra pordo kun kupraj ŝipaj teniloj enpuŝis lin en grandan roz-marmoran vestiblon. En alterigita lifto troviĝis informejo. De tie jam elŝoviĝis ridanta virina vizaĝo.

Trakurinte laŭinercie kelkajn paŝojn, la eniranto haltis antaŭ maljuna pordisto en kaskedo kun ora zigzago sur la rubando, kaj per bravula voĉo demandis:

– Nu kio, oldulo, ĉu venis jam tempo iri en kremaciejon?

– Venis, kara mia, – respondis la pordisto ĝoje ridetante, – en nian sovetian kolumbarion.

Li eĉ svingis manojn. Sur lia bonkora vizaĝo respegulis preteco tuj fordoni sin al la flama ceremonio.

En Nigramarsk oni intencis konstrui kremaciejon kun konformaj ejoj por cindrujoj: kolumbario, kaj tiu ĉi novaranĝo de la sepulka subfako ial tre gajigis la civitanojn. Povas esti ke ilin ridigis la novaj vortoj: kremaciejo, kolumbario, sed, eble, ilin amuzis penso ke homon oni povas forbruligi kiel ŝtipon. Tiel aŭ aliel, sed en tramoj kaj sur stratoj oni ĝenis ĉiujn gemaljunulojn per krioj: «Kien vi trapuŝiĝas, oldulino? Ĉu en la kremaciejon rapidas?». Aŭ «Permesu al la olduleto trairi, venis jam lia vico por kremaciado». Kaj, mirinda afero, la ideo de la flama ceremonio tre plaĉis al maljunuloj, do tiuj ĉi gajaj ŝercoj elvokis en ili plenan aprobon. Kaj, entute, konversacioj pri morto, opiniataj ĝis tiam ĝenaj kaj malĝentilaj, ekestis aprezataj en Nigramarsk egale al anekdotoj el juda kaj kaŭkaza vivo, kaj elvokis komunan intereson.

Preteririnte nudan marmoran junulinon, kiu staris komence de la ŝtuparo, tenante en la mano elektran torĉon, kaj malplezure alrigardinte afiŝon «Personar-purigo en 'Herkules' komenciĝas. For konspiron de prisilento», la oficisto leviĝis duan etaĝon. Li laboris en financ-kalkula fako. Ĝis komenco de la okupoj restis ankoraŭ dek kvin minutoj, sed ĉe siaj tabloj sidis jam Saĥarkov, Drejfus, Tezoimenickij, Muzikant, Ĉevaĵevskaja, Kukuŝkind, Borisoĥlebskij, kaj Lapidus-juna. La purigon ili tute ne timis, pri kio ili multfoje certigis unu la alian, sed ial, lastatempe, ili komencis veni en la oficejon kiom eble pli frue. Uzante malmultajn minutojn da libera tempo ili brue parolis inter si. Iliaj voĉoj zumis en la vastega halo, kiu en antaŭa tempo estis hotela restoracio. Pri tio memorigis plafono kun kverkaj ornamaĵoj, kaj pentritaj muroj, kie kun terurigaj smajloj kapriolis menadoj, najadoj kaj driadoj.

– Ĉu vi aŭdis novaĵon, Korejko? – demandis la enirinton Lapidus-juna. – Ĉu vere ne aŭdis? Nu? Vi estos konsternita.

– Kiun novaĵon?.. Saluton, kamaradoj! – diris Korejko. – Saluton, Ana Vasilevna!

– Vi eĉ imagi tion ne povas! – kun plezuro diris Lapidus-juna. – Librotenisto Berlaga trafis frenezulejon.

– Kion vi diras? Berlaga? Sed li estas

normalega homo!

- Ĝis hieraŭa tago li estis normalega, - eniris la konversacion BorisoĤlebskij, - sed de hodiaŭa tago ekestis nenormalega. Tio estas fakto. Al mi telefonis lia bofrato. Ĉe Berlaga estas ege serioza psikiatria malsano: misfunkcio de kalkana nervo.

- Oni devas nur miri ke ĉe ni ĉiuj ankoraŭ forestas malfunkcio de tiu ĉi nervo, - malbonaŭgure rimarkis oldulo Kukuŝkind, rigardante la kunlaborantojn tra siaj ovalaj nikelizitaj okulvitroj.

- Ne graku, - diris Ĉevaĵevskaja, - ĉiam li venigas angoron.

- Tamen bedaŭrindas Berlaga, - resonis Drejfus, turniĝinte sur sia ŝraŭba tabureto vizaĝe al la societo.

La societo silente konsentis kun Drejfus. Nur Lapidus-juna enigme eksmajlis. La konversacio transiris al konduto de psikmalsanuloj; oni parolis pri maniuloj, estis rakontitaj kelkaj historioj pri famaj frenezuloj.

- Ĉe mi ekzemple, - kriis Saĥarkov, - estis freneza onklo kiu imagis sin samtempe Abrahamo, Isaako kaj Jakobo! Imagu kiun bruon li estigis.

- Oni devas nur miri, - per leda voĉo diris oldulo Kukuŝkind, nehaste purigante la okulvitrojn per basko de sia jako, - oni devas nur miri ke ni ĉiuj ankoraŭ ne imagas sin

Abrahamo, – la oldulo nazosiblis, – Isaako...

– Kaj Jakobo? – ironie demandis Saĥarkov.

– Jes! Kaj Jakobo! – subite ekjelpis Kukuŝkind. Kaj Jakobo! Ĝuste Jakobo. Oni vivas en tiel nerviga tempo... Sed kiam mi laboris en banka oficejo «Sikomorskij kaj Cezarido», tiam okazis neniuj purigoj.

Dum vorto «purigo» Lapidus-juna vigliĝis, prenis na Korejko je la brako, kaj venigis lin al la grandega fenestro, kiu per diverskoloraj vitretoj figuris du gotikajn kavalirojn.

– Plej interesan pri Berlaga vi ankoraŭ ne scias, – flustris li, – Berlaga estas sana kiel bovo.

– Ĉu? Do li ne troviĝas en frenezulejo?

– Li jes troviĝas tie.

Lapidus fajne smajlis.

– En tio la tuta truko. Li simple ektimis la purigon kaj decidis pretersidi la maltrankvilan tempon. Nun li, verŝajne, muĝas kaj ridegas. Jen lertulo! Eĉ enviinde!

– Ĉu io malordas pri liaj gepatroj? Ĉu vendistoj? Ĉu fremda elemento?

– Jes, liaj gepatroj ne estas en ordo, kaj ankaŭ li mem, inter ni parolate, havis apotekon. Sed kiu povis scii ke okazos revolucio? Homoj aranĝis siajn vivojn laŭ siaj povoj. Iu havis apotekon, iu eĉ fabrikon. Mi, persone, vidas en tio neniun malbonon. Kiu povis scii?

– Oni devis scii, – malvarme diris Korejko.

- Jes, ankaŭ mi diras la samon, - rapide subkaptis Lapidus, - al tiuj ĉi homoj ne estas loko en nia sovetia institucio.

Kaj, rigardante na Korejko per pligrandigitaj okuloj, li malproksimiĝis al sia tablo.

La halo jam pleniĝis per oficistoj, el kestoj estis prenitaj elastaj metalaj liniiloj, rebrilantaj per haringa arĝento, abakoj kun palmaj bidoj, dikaj libroj, strekitaj per rozaj kaj bluaj linioj, kaj multo da ceteraj etaj kaj grandaj oficejaj iloj. Tezoimenickij jam deŝiris de la kalendaro hieraŭan paĝon: komenciĝis nova tago, kaj iu el la oficistoj jam kroĉigis siajn junajn dentojn en longan sandviĉon kun ŝafa pasteĉo.

Ankaŭ Korejko eksidis ĉe sia tablo. Metinte la sunbrunajn kubutojn sur la skriban tablon li komencis enigi notojn en la aktual-momentan kontant-libron.

Aleksandr Ivanoviĉ Korejko, unu el plej malsignifaj oficistoj de «Herkules», troviĝis ene de lasta atako de juneco: li estis tridek-ses-jara. Sur lia ruĝa sigelvaksa vizaĝo sidis flavaj tritikaj brovoj kaj blankaj okuloj. Anglaj lipharoj ankaŭ similis, per sia koloro, al tiu ĉi matura cerealo. Vizaĝo lia ŝajnus tute juna, se ne krudaj ĉefsoldataj faltoj, krucigantaj liajn vangojn kaj nukon. En oficejo Aleksandr Ivanoviĉ tenis sin kiel postdevigserva soldato: li ne rezonadis, estis plenumema, laborema, favorserĉanta kaj stulteta.

– Iel timida li estas, – diris pri li estro de la financa fako, – iel tro humila, tro fidela. Tuj kiam oni nur deklaras distribuon de ŝtataj prunt-obligacioj, li jam ŝoviĝas kun sia monata salajro. Unua li subskribas. Sed tuta lia salajro – kvardek ses rubloj. Volus mi scii kiamaniere li ekzistas per tiu ĉi mono...

Estis ĉe Aleksandr Ivanoviĉ mirinda specifaĵo. Li momente multiplikis kaj dividis parkere grandajn tri- kaj kvarciferajn nombrojn. Sed tio ne liberigis na Korejko de reputacio de stulteta bubo.

– Aŭskultu, Aleksandr Ivanoviĉ, – demandis najbaro, – kiom estas okcent tridek ses multiplikita per kvarcent dudek tri?

– Tricent kvindek tri mil sescent dudek ok, – respondis Korejko post tute nesignifa prokrasto.

Kaj la najbaro ne kontrolis la rezulton de la multipliko, ĉar li sciis ke stulteta Korejko eraras neniam.

– Iu alia, sur lia loko, karieron farus, – diris kaj Saĥarkov, kaj Drejfus, kaj Tezoimenickij, kaj Muzikant, kaj Ĉevajevskaja, kaj Borisoĥlebskij, kaj Lapidus-juna, kaj olda stultulo Kukuŝkind, kaj eĉ fuĝinta en frenezulejon librotenisto Berlaga, – sed tiu ĉi – senkapulo! Tutan sian vivon sidos li ĉe siaj kvardek ses rubloj.

Kaj, certe, kolegoj de Aleksandr Ivanoviĉ, kaj estro mem de la financa fako kamarado Arnikov, kaj ne nur li, eĉ Serna Miĥajlovna,

persona sekretariino de kamarado Brulegov, estro de tuta «Herkules», do unuvorte ĉiuj estus ege mirigitaj se ekscius, ke Aleksandr Ivanoviĉ Korejko, plej humila el la kontoristoj, antaŭ nur unu horo relokigis iukaŭze de unu stacidomo en alian valizon, en kiu kuŝas nek pantalono «Centjariĝo de Odeso», nek pala kokino, kaj nek iuj «Taskoj de junkomunistoj en vilaĝo», sed dek milionoj da rubloj per alilanda valuto kaj sovetiaj monbiletoj.

En jaro 1915 Aleks Korejko, el etburĝoj, estis dudekjara filistro el nombro de tiuj kiujn oni prave nomas eks-gimnaziano. Profesio li ne akiris, per iu ajn afero ne okupiĝis, vagadis li sur bulvaroj, kaj nutretis ĉe la gepatroj. De milita servo liberigis lin la onklo, aktisto ĉe militista estro, tial Aleks sentime aŭskultis kriojn de duonfreneza ĵurnalvendisto:

– Jen lastaj telegramoj! Niaj ofensivas! Dankon al Dio! Multe da mortigitoj kaj vunditoj! Dankon al Dio!

Tiutempe Aleks imagis sian estonton tiel: li iras sur strato, kaj subite, ĉe pluvtubo, plibeligita per zinkaj steloj, ĉe la muro mem, li trovas ĉerizkoloran, knarantan kiel selo ledan monujon. En la monujo estas tre multe da mono, du mil kvincent rubloj... Kaj poste ĉio estos ege bona.

Li tiel ofte imagis al si kiel li trovos la monon, ke eĉ sciis ĝuste kie okazos tio: sur

strato de Poltava Venko, en asfalta angulo, kiun okazigas eliĝo de la domo, ĉe la stela pluvtubo. Tie kuŝas ĝi, la leda bonfarulo, iom superŝutita per sekaj floroj de akacioj, najbare al platigita cigareda stumpo. Straton Poltava Venko Aleks vizitis ĉiutage, sed, al lia ega surprizo, la monujo forestis. Li disŝovis la fatrason per sia gimnaziana bastoneto, kaj stulte rigardis emajlitan plateton, fiksitan ĉe la ĉefenira pordo: «Imposta inspektoro J.M. Najtingalo». Kaj Aleks senraciigite treniĝis al la hejmo, falis sur la ruĝan pluŝan kanapon, kaj revis pri riĉeco, surdigita per frapoj de la koro kaj per la pulsoj. La pulsoj estis etaj, malicaj, senpaciencaj.

Revolucio de 1917-a jaro depelis na Korejko de lia pluŝa kanapo. Li komprenis ke oni povas ekesti feliĉa heredanto de nekonataj riĉuloj. Li sentis ke ĉie en la lando senorde kuŝaĉas nun grandegaj kvantoj da senmastra oro, valoraĵoj, superba meblaro, pentraĵoj kaj tapiŝoj, peltaĵoj kaj servicoj. Oni devis nur perdi eĉ ne minuton, kaj rapide kapti la riĉaĵojn.

Sed tiam li estis ankoraŭ juna kaj stulta. Li uzurpis grandan loĝejon, kies havanto prudente forveturis per franca ŝipo na Istanbul, kaj aperte ekloĝis en ĝi. Tutan semajnon enkreskis li la malpropran riĉan vivmanieron de la malaperinta komercisto, drinkis trovitan en la bufedo muskat-vinon, postmanĝante ĝin per nutraĵ-distribua haringo, elportis en la bazaron

diversajn bagatelaĵojn, kaj estis tre mirigita kiam oni arestis lin.

El la prizono li eliris post kvin monatoj. De penso iĝi riĉulo li ne rezignis, sed komprenis ke la afero postulas kaŝemon, mallumon kaj poiomon. Oni devis survesti iun gardo-felon, kaj ĝi venis al Aleksandr Ivanoviĉ en aspekto de altaj oranĝaj botoj, senfunda blua pantalono, kaj longa militjako de laboranto pri proviant-provizado.

En tiu maltrankvila tempo ĉio farita per homaj manoj funkciis malpli bone ol antaŭe: hejmoj ne savis de malvarmo, manĝaĵoj ne satigis, elektron oni distribuis nur okaze de amasa serĉo de dizertuloj kaj banditoj, akvokondukilo venigis akvon nur al unuaj etaĝoj, kaj tramoj tute ne funkciis. Sed fortoj de naturo ekestis pli malicaj kaj danĝeraj: vintroj estis pli malvarmaj ol antaŭe, ventoj estis pli fortaj, kaj malvarmumo, kiu antaŭe enlitigis homon por tri tagoj, nun dum samaj tri tagoj mortigis ĝin. Kaj grupoj da junaj homoj sen specifaj okupoj vagadis sur la stratoj, senbride kantante pri mono kiu perdis sian valoron:

**En stratetan apotekon
mi enkuris sen kopeko:
Estu bona, ŝanĝu milionon...**

Aleksandr Ivanoviĉ kun maltrankvilo vidis ke mono, kiun li akiris per grandegaj artifikoj,

transformiĝas en nenion.

Tifo faligis milojn da homoj. Aleks vendis medikamentojn, ŝtelitajn el deponejo. Per tifo li gajnis kvincent milionojn, sed la inflacio dum unu monato transformis ilin en kvin milionoj. Per sukero li gajnis miliardon. La kurzo transformis la monon je polvo.

Unu el plej sukcesaj liaj aferoj dum tiu ĉi periodo estis ŝtelo de trajno kun nutraĵoj, kiu iris al formortanta pro malsato regiono ĉe rivero Volgo. Korejko estis komandanto de la trajno. La trajno eliris el Poltavo en Samaron, sed Samaron ĝi ne atingis, kaj en Poltavon ne revenis. Kune kun ĝi senspure malaperis Aleksandr Ivanoviĉ.

Ĉapitro 5

Subtera regno

La oranĝaj botoj elplonĝis en Moskvo fine de jaro 1922. Super la botoj pavis verdeta taliigita palto kun subŝtofo el ora vulpa pelto. La suprenigita ŝafida kolumo, simila de ekstere al stebita litkovrilo, gardis de frosto la bravulan muzelon kun vangobarboj. Sur kapo de Aleksandr Ivanoviĉ troviĝis ĉarma krispa kaŭkaza ĉapo.

Kaj en Moskvo, tiutempe, jam kuradis novaj aŭtoj kun kristalaj lanternoj, paŝadis sur la stratoj rapidriĉuloj en fokpeltaj vertoĉapetoj kaj en peltaj paltetoj provizitaj per ornamaĵa felo

«liro». Ekmodiĝis malvastpintaj gotikaj ŝuoj kaj paperuoj kun valizaj rimenoj kaj teniloj. Vorto «civitano» komencis forpuŝi la kutiman «kamarado», kaj iuj junaj homoj, rapide komprenintaj kio, fakte, estas vivĝojo, jam dancis en restoracioj na *ŭanstep* «Diksi», kaj eĉ fokstroton «Floro de l' suno». La urbon plenigis kriadoj de rapidfiakristoj, kaj en domego de Komisarejo pri eksteraj rilatoj tajloro Ĵurkeviĉ tage kaj nokte stebis frakojn por forveturantaj alilanden sovetaĵaj diplomatoj.

Aleksandr Ivanoviĉ kun miro ekvidis ke lia vestaĵo, opiniata en provinco signo de vireco kaj riĉeco, ĉi tie, en Moskvo, estas nur postrestaĵo de pasinteco, kaj ĵetas malavantaĝan ombbron sur sian posedanton.

Post du monatoj sur Sretenskij bulvardo malfermiĝis nova entrepreno sub elpendaĵo «Produktiva kooperativo de kemiaĵoj 'Kvitiĝo'». La kooperativo posedis du ĉambrojn. En la unua pendis portreto de fondinto de socialismo Frederik Engels, sub kiu, senkulpe smajlante, sidis Korejko mem, vestita en grizan anglan kostumon plibeligitan per ruĝa silka fadeno. La krudaj vangobarboj kaj la oranĝaj botoj malaperis. Vangoj de Aleksandr Ivanoviĉ estis bone razitaj. En posta ĉambro troviĝis la produktaĵoj. Tie staris du kverkaj bareloj, provizitaj per manometroj, kaj vitraj nivelkontroliloj, unu – sur la planko, dua, sur la

duonetaĝo. La bareloj estis kunigitaj per klistera kanulo tra kiu, laboreme lirlante, verŝis likvaĵo. Kiam ĝi transiris el supra ujo la malsupran, la produktojn eniris knabo en feltaj botoj. Ne infane suspirante li, per sitelo, elĉerpis likvaĵon el suba barelo, trenis ĝin sur la duonetaĝon, kaj enverŝis en supran barelon. Fininte tiun ĉi komplikan produktad-procezon la knabo denove foriris en la kontoron varmiĝi, kaj el la klistera kanulo denove aŭdiĝis la ploretoj: la likvaĵo daŭrigis sian kutiman vojon: el la ŝupra ujo la suban.

Aleksandr Ivanoviĉ eĉ mem ne sciis ĝuste kiun specon de kemiaĵoj produktas kooperativo «Kvitiĝo». Li ne havis tempon por tio. Ankaŭ sen tio lia labortago estis ŝtopita. Li veturadis el banko en bankon, klopodante pri pruntoj por plivastigo de la produktado. En trustoj li kontraktis pri livero de kemiaj produktoj, kaj ricevis krudmaterialojn laŭ privilegia prezo. Pruntojn li ankaŭ ricevis. Tre multe da tempo prenis revendo de la ricevitaj krudmaterialoj al ŝtataj entreprenoj laŭ dekobla prezo, kaj multe da energio postulis valutaj operacioj sur la nigra merkato, ĉe postamento de monumento al herooj de Plevna.

Post paso de jaro ĉe la bankoj kaj la trustoj aperis deziro ekscii ĝis kiom bonefika okazis la financa kaj krudmateriala subteno por disvolviĝo de produktiva kooperativo «Kvitiĝo»,

kaj ĉu ne bezonas la utila privatulo iun ajn alian helpon. La komisiono, ĉirkaŭpendata per sciencaj barboj, venis en kooperativon «Kvitiĝo» per tri fiakroj. En la malplena kontoro la prezidanto de la komisiono longe pririgardis indiferentan vizaĝon de Engels, kaj frapis per la bastono la lignan tablon, elvokante gvidantojn kaj anojn de la kooperativo. Fine la pordo de la produktejo malfermiĝis, kaj antaŭ anoj de la komisiono aperis ploranta knabo kun sitelo en la mano.

El konversacio kun la juna reprezentanto de kooperativo «Kvitiĝo» evidentiĝis ke la produktado troviĝas en stadio de plena vigleco, kaj ke la mastro jam semajnon ne venas. En produktejo mem la komisiono troviĝis nelonge. La likvaĵo, kiu tiel laboreme lirlis en la klistira kanulo, laŭ siaj gusto, koloro kaj kemia enhavo similis ordinaran akvon, kio ĝi fakte estis.

Post evidentigo de tiu ĉi nekredebla fakto prezidanto de la komisiono diris «hm», kaj ekrigardis la anojn, kiuj ankaŭ diris «hm».

Реванш («Kvitiĝo»)

Poste la prezidanto kun terura smajlo ekrigardis la knabon kaj demandis lin:

- Sed kioman jareton vi aĝas?
- La dek duan, - respondis la knabo.

Kaj ekverŝiĝis per tiaj larmoj, ke anoj de la komisiono, interpuŝante, elkuris sur la straton

kaj, dislokiĝinte en la fiakroj, forveturis en plena konfuzo. Sed kio koncernas kooperativon «Kvitiĝo», do ĉiuj operacioj pri ĝi estis enregistritaj en bankajn kaj trustajn librojn pri profitoj kaj malprofitoj, ĝuste en tiujn iliajn partojn, kiuj per eĉ ne unu vorto mencias gajnojn, sed plene dediĉas sin al perdoj.

La saman tagon kiam la komisiono multsignife konversaciis kun la knabo en kontoro de «Kvitiĝo», Aleksandr Ivanoviĉ Korejko eliris el litvagono en malgrandan vinberan respublikon, troviĝantan de Moskvo je tri mil kilometroj.

Li malfermis fenestron de sia hotelĉambro, kaj ekvidis urbeton en oazo kun bambua akvokondukilo, kun aĉa argila fortreso, urbeton, ĉirkaŭbaritan disde sabloj per poploj, kaj plenan per azia bruo. Jam sekvonttage li eksciis ke la respubliko komencis konstrui elektrocentralon. Eksciis li ankaŭ ke la monrimedoj konstante mankas, kaj ke la konstruado, de kiu dependas estonto de la respubliko, povas halti.

Do la utila privatulo decidis helpi al la respubliko. Li denove enigis sin en la oranĝajn botojn, surkapigis la vertoĉapeton kaj, kunpreninte la pufan paperujon, direktiĝis en administrejon de la konstruado.

Oni renkontis lin ne tro tenere; sed li kondutis sin sufiĉe digne, nenion petis por si, kaj substrekis ĉefe ke ideo de elektroproduktado

estas tre proksima al lia koro.

– Al via projekto, – diris li, – mankas mono. Mi akiros ĝin.

Kaj li proponis organizi apud konstruejo de la elektrocentralo helpan enspezan entreprenon.

– Kio povas esti pli simpla! Ni vendos poŝtkartojn kun panoramo de via konstruejo, kaj tio alportos rimedojn tiel bezonatajn por la projekto. Memoru: vi donos nenion, vi nur ricevados.

Aleksandr Ivanoviĉ decide hakis aeron per la manplato, vortoj liaj ŝajnis konvinkaj, la projekto estis fidinda, kaj certigis profiton. Post subskribo de kontrakto, laŭ kiu li ricevis kvaronon de ĉiuj profitoj de la poŝtkarta entrepreno, Korejko eklaboris.

Komence estis bezonataj cirkulaj rimedoj. Okazis necese preni ilin el mono asignita por konstruo de la centralo. Alia mono en la respubliko forestis.

– Ne gravas, – konsolis li la konstruantojn, – memoru: de tiu ĉi momento vi komencos nur ricevi.

Aleksandr Ivanoviĉ, sur rajdĉevalo, inspektis la montofendejon, kie jam altiĝis betonaj paralelepipedoj de la estonta centralo, kaj unurigarde aprezis pitoreskon de la porfiraj rokoj. Post li, per benk-ĉaro, en la montofendejon enruliĝis fotografistoj. Ili ĉirkaŭigis la konstruejon per multartikaj

longpiedaj stativoj, kaŝiĝis sub la nigraj ŝaloj, kaj longe klakis per la eksponiloj. Kiam ĉio ekestis fotografita, unu el la fotografistoj mallevis la ŝalon, kaj rezone diris:

– Pli bone estus, certe, konstrui la centralon pli maldekstre, sur fono de la monaĥejaj ruinoj, tie estas multe pli pitoreske.

Por presado de la poŝtkartoj oni decidis konstrui, kiom eble rapide, propran presejon. La mono, kiel unuafoje, estis prenita el la konstruaj rimedoj. Tial en la elektrocentralo oni ĉesis kelkajn laborojn. Sed ĉiuj konsolis sin per tio ke profito de la nova entrepreno permesos reatingi la perditan tempon.

La presejon oni konstruis en sama montofendejo, kontraŭ la stacio. Kaj baldaŭ iom flanke de la betonaj paralelepipedoj de la centralo aperis betonaj paralelepipedoj de la presejo. Poiome bareloj kun cemento, feraj vergoj, brikoj kaj gruzo translokiĝis de unu flanko de la montofendejo en la alian. Poste simplan transiron tra la montofendejo realigis ankaŭ laboristoj: ĉe la nova konstruado oni pagis pli.

Post duonjaro sur ĉiuj relvojoj stacioj aperis agentoj-distribuantoj en striaj pantalonoj. Ili vendis poŝtkartojn montrantajn rokojn de la vinbera respubliko, inter kiuj okazas grandiozaj laboroj. En someraj ĝardenoj, teatroj, kinejoj, sur vaporŝipoj kaj en ripozejoj fraŭlinoj-ŝafinoj

turnis vitrigitajn tamburojn de bonfara loterio. La loterio estis senmalgajna: ĉiu el gajnoj prezentis poŝtkarton kun panoramo de la elektra montofendejo.

La vortoj de Korejko efektiviĝis: enspezoj alfluis de ĉiuj flankoj. Sed Aleksandr Ivanoviĉ ne lasis ilin el siaj manoj. Kvaronon li prenis laŭ la kontrakto, saman kvanton li alproprigis pretekste ke raportoj venis ankoraŭ ne de ĉiuj agentoj, kaj restantajn rimedojn li uzis por larĝigi la bonfaran kartelon.

– Oni devas esti bona mastrumanto, – mallaŭte diris li, – unue ni dece ordigu la aferon, kaj ĝuste tiam aperos vera profito.

Tiutempe fosmaŝino «Marion», prenita de la elektrocentralo, fosis profundan kavegon por fundamento de nova preseja konstruaĵo. Laboro sur la elektrocentralo ĉesiĝis. La konstrua tereno dezertiĝis. Tie baraktadis nur fotografistoj kaj intermitis la nigraj ŝaloj.

La afero prosperis, kaj Aleksandr Ivanoviĉ, de kies vizaĝo ne malaperis honesta sovetia smajlo, komencis presadon de portretoj de kinoaktoroj.

Foje, kiel kutimas, per skuiga aŭto alveturis rajtigita komisiono. Aleksandr Ivanoviĉ ne prokrastis; li ĵetis adiaŭan rigardon sur la fendiĝintan fundamenton de la elektrocentralo, sur grandiozan, plenan de lumo konstruaĵon de la helpa entrepreno, kaj fuĝis.

- Hm! - diris la prezidanto, enigante la bastoneton en fendojn de la fundamento. - Sed kie estas la elektrocentralo?

Li ekrigardis anojn de la komisiono, kiuj siavice diris «hm». Elektrocentralo forestis.

Tamen en vorko de la presejo la komisiono trovis laborojn en plena kulmino. Brilegis violaj lampoj, kaj plataj print-maŝinoj zorge klakis per siaj flugiloj. Tri el ili elbakis unukolore la montofendejon, kaj el la kvara, multkolora, kiel ludkartoj el maniko de karttrompisto, elflugis poŝtkartoj kun portretoj de Duglas Ferbenks kun nigra duonmasko sur la pufa samovara muzelo, de ĉarma Lia de Putti, kaj de simpatia bubo kun elstreĉitaj okuloj, konata sub nomo Monti Benks.

Kaj ankoraŭ longe, post tiu ĉi memorinda vespero, en la montofendejo, sub libera ĉielo, daŭriĝis preventigaj juĝprocesoj. Sed Aleksandr Ivanoviĉ aldonis al sia kapitalo duonmilionon da rubloj.

Liaj etaj malicaj pulsoj batiĝis, kiel antaŭe, senpacience. Li sentis ke ĝuste nun, kiam antaŭa mastruma sistemo malaperas, kaj nova nur komencas vivi, oni povas akumuli egan riĉecon. Sed li sciis ke en Sovetio ne estas jam pripensebla libera porriĉiĝa lukto. Do, kun smajlo de supereco rigardis li unuopajn NEP-ulojn, kiuj ĝisputradis sub elpendaĵoj:

«Vendado de produktoj de glatdrapa trusto

B. A. Cignoĵviĉ», «Brokaĵo kaj ilaro por preĝejoj kaj kluboj» aŭ «Spicvara vendejo de K. Robinson kaj M. Vendredo».

Sub premo de la registara preso krakis financa bazo de Cignoĵviĉ, de Vendredo, kaj de mastroj de muzika pseŭdokooperativo «Tintadas tamburino tie».

Korejko komprenis ke nuntempe eblas nur kaŝa komerco, bazita sur strikta sekreto. Ĉiuj krizoj, kiuj skuis la junan mastrum-sistemon, utilis al li, ĉio per kio la ŝtato perdis, venigis al li profiton. Li enrompiĝis ĉiun varan breĉon, kaj forportis de tie sian centon da miloj. Li komercis per pano, drapo, sukero, teksaĵoj – per ĉio. Kaj li estis sola, tute sola kun siaj milionoj. En diversaj partoj de la lando por li laboris grandaj kaj malgrandaj friponoj, sed ili ne sciis por kiu ili laboras. Korejko agis nur pere de aliaj homoj. Kaj nur li mem sciis longecon de la ĉeno, laŭ kiu iris al li mono.

Ĝuste tagmeze Aleksandr Ivanoviĉ forŝovis la aktual-momentan kontant-libron, kaj komencis la matenmanĝon. Li prenis el la tirkesto antaŭe senŝeligitan nekuiritan rapeton kaj **pe**¹²-manĝis ĝin, serioze rigardante antaŭ si. Poste li forglutis malvarman duonkuiritan ovon. Malvarmaj duonkuiritaj ovoj estas manĝo tre

12. Prefikso **pe** utilas por indiki kompletan plenumon, realigon, efektivigon de la ago: konstruis **pe**-konstruis; kuiros **pe**-kuiros; kuracus **pe**-kuracus. Propono.

malbongusta, do bona gaja homo neniam manĝos ilin. Sed Aleksandr Ivanoviĉ ne manĝis, sed nutris sin. Li okazigis fiziologian procezon, enigis en la organismon necesan kvanton da grasoj, karbonhidratoj kaj vitaminoj.

Ĉiuj herculesanoj kronis sian matenmanĝon per teo, Aleksandr Ivanoviĉ trinkis glason da boligita akvo. Teo provokas superfluan agadon de koro, sed Korejko alte taksis sian sanstaton.

Havanto de dek milionoj similis boksiston, prudente preparantan sian triumfon. Li subiĝas al speciala reĝimo, ne drinkas, ne fumas, penas eviti ekscitiĝojn, trejnas sin, kaj enlitiĝas frue; ĉio por en antaŭe fiksitan tagon elsalti sur la radiantan boks-arenon estante feliĉa venkanto. Aleksandr Ivanoviĉ volis esti juna kaj freŝa en tago kiam ĉio revenos al malnovo, kiam li povos eliri el la kaŝejo, sentime malfermante sian ordinaran valizaĉon. Pri tio ke la antaŭa tempo revenos, Korejko dubis neniam. Li gardis sin por kapitalismo.

Kaj por ke neniu deĉifru lian duan kaj gravan vivon, li vivis almoze, penante ne eliri ekster kadroj de sia kvardek-ses-rubla salajro, kiun li ricevis kontraŭ kompatinda kaj enuiga laboro en la financkalkula fako, ĉirkaŭpentrita per menadoj, najadoj kaj driadoj.

Ĉapitro 6 "Antilopo-Gnu"

La verda kesto kun kvaro da friponoj salte kuregis sur la fuma vojo.

La aŭto subiĝis al premo de samaj fortoj kiujn toleras homo naĝanta dum ŝtorma vetero. Ĝi estis depuŝata per subite alfluginta turbulo, entirata en kavojn, ĵetata de flanko al flanko, kaj ŝutata per ruĝa sunsubira polvo.

– Aŭskultu, studento, – rilatis Ostap al la nova pasaĝero, kiu jam liberiĝis de la antaŭnelonga teruro, kaj senzorge sidis apud la komandanto, – kial vi aŭdacis rompi Suĥarev-konvencion, tiun estimatan pakton, konfirmitan per tribunalo de Ligo de Nacioj?

Panikovskij ŝajnis ke li ne aŭdas, kaj eĉ turniĝis flanken.

– Kaj entute, – daŭrigis Ostap, – vi agas malhoneste. Ĝus ni estis atestantoj de abomena sceno. Vin postkuris arbatovanoj, kies anseron vi forkondukis.

– Mizeraj sensignifaj homoj! – kolere elbalbutis Panikovskij.

– Jen kiel! – diris Ostap. – Kaj vin vi opinias, ŝajne, socia kuracisto? Ĝentlemano, ĉu? Tial jen kio: se al vi, same al vera ĝentlemano, venos ideo fari notojn sur la manumoj, vi devos skribi ilin per kreto.

– Kial? – incite demandis la nova pasaĝero.

– Ĉar ili ĉe vi estas tute nigraj. Ĉu pro malpureco?

– Vi estas mizera sensignifa homo! – rapide

deklaris Panikovskij.

– Kaj tion vi diras al mi, al via savanto? – milde demandis Ostap. – Adam Kazimiroviĉ, haltu por momento vian aŭton. Dankon. Ŝura, kara mia, bonvolu restarigi *status kvo*.

Balaganov ne komprenis kion signifas "*status kvo*". Sed li orientiĝis laŭ voĉtono per kiu la vortoj estis prononcitaj. Aĉe ridetante li prenis na Panikovskij sub la brakojn, elportis el la aŭto, kaj sidigis lin sur la vojon.

– Studento, – seke diris Ostap, – iru reen, en Arbatov. Tie vin senpacience atendas mastroj de la ansero. Ni ne bezonas krudulojn. Ni mem estas kruduloj. Veturu ni.

– Plu mi ne faros tion! – petegis Panikovskij.
– Mi estas nervuma!

– Genuiĝu, – diris Ostap.

Panikovskij tiel haste falis sur la genuojn, kvazaŭ oni hakis liajn krurojn.

– Bone! – diris Ostap. – Via pozo kontentigas min. Vi estas prenita kondiĉe, ĝis unua rompo de disciplino, kun meto sur vin taskoj de servisto pri ĉio.

«Antilopo-Gnu» akceptis la obeiĝintan krudulon, kaj ekruliĝis pluen, balanciĝante kiel funebra ĉaro.

Post duonhoro la aŭto turniĝis sur Novleporan trafikvojon kaj, ne malpliigante la rapidecon, enveturis vilaĝon. Ĉe traba domo, sur kies tegmento kreskis branĉa kaj malrekta

radio-masto, kunvenis homoj. El la homamaso decide elŝoviĝis senbarba viro. En la mano la senbarbulo tenis paperfolion.

– Kamaradoj, – kolere diris li, – la solenan konferencon mi deklaras malfermita! Permesu, kamaradoj, tiujn ĉi viajn aplaŭdojn opinii...

Li, ŝajne, preparis sian paroladon, kaj jam enrigardis la paperon sed, rimarkinte ke la aŭto ne haltas, lasis ĝin.

– Ĉiuj ni enviciĝu Aŭto-voj-organizaĵon! rapide diris li, rigardante preterveturantan Ostap. – Ordigu ni serian produktadon de sovetiaj aŭtoj. Fera ĉevalo iras por anstataŭigi kamparanan ĉevalineton.

Kaj jam al dorson de la malproksimiĝanta aŭto, superante aproban bruon de la homamaso, li elkriis lastan sloganon:

– Aŭto estas ne luksaĵo sed transportilo.

Ĉiuj antilopanoj, krom Ostap, estis iom maltrankviligitaj per la solena akcepto. Komprenante nenion ili turniĝis en la aŭto kiel paseridoj en sia nesto. Panikovskij, kiu entute ne ŝatis grandajn kuniĝojn de honestaj homoj, kaŭriĝis tiel, ke al okuloj de la vilaĝanoj prezentiĝis nur malpura pajla tegmento de lia ĉapelo. Sed Ostap neniom konfuziĝis. Li demetis la kaskedon kun blanka supraĵo, kaj respondis al la salutoj per fiera turno de la kapo jen dekstren, jen maldekstren.

– Plibonigu la vojojn! – kriis li adiaŭe. –

Mersi pri la akcepto!

Antilopa-Gnu («Antilopo Gnu»)

Kaj la aŭto denove okazis sur la blanka vojo, distranĉanta la grandan trankvilan kamparon.

– Ĉu ili ne postkuros nin? – zorgoplene demandis Panikovskij. – Kial homamaso? Kio okazis?

– Simple la homoj neniam vidis aŭton, – diris Balaganov.

– Interŝanĝo de la impresoj daŭriĝas, – rimarkis Bender. – Vorto al la stiristo. Via opinio, Adam Kazimiroviĉ?

La ŝoforo ekpensis, fortimigis per sonoj de la «maĉiŝ» hundon, pro la stulteco elkurantan sur la vojon, kaj diris ke kaŭzo de la kunveno estas verŝajne religia festo.

– Tiaspecaj festoj, – klarigis ŝoforo de «Antilopo» – ofte okazas ĉe vilaĝanoj.

– Jes, – diris Ostap. – Nun mi klare vidas ke mi trafis komunumon de nekulturaj homoj, tio estas de trampoĵoj sen supera klereco. Aĥ infanoj, amindaj infanoj de leŭtenanto Ŝmit, kial vi ne legas ĵurnalojn? Oni devas legi ilin. Ili sufiĉe ofte semas saĝan, bonkoran, eternan.

Ostap elpoŝigis na «Novaĵoj», kaj plenvoĉe pe-legis al personaro de «Antilopo» artikoleon pri aŭta rapid-veturado Moskvo – Ĥarkovo – Moskvo.

– Nun, – memkontente diris li, – ni troviĝas

sur etinero de la rapidveturado, ĉirkaŭ cent-kvindeko da kilometroj antaŭ la avana aŭto. Mi opinias ke vi jam komprenis pri kio mi parolas?

Malaltranguloj de «Antilopo» silentis. Panikovskij malbutonumis la jakon, kaj gratis la nudan bruston sub la malpura silka kravato.

– Do vi ne komprenis? Ŝajnas ke en kelkaj okazoj ne helpas eĉ lego de ĵurnaloj. Bone, mi esprimos min pli detale, kvankam tio ne estas parto de miaj reguloj. Unue: la kamparanoj opiniis ke «Antilopo» estas avana aŭto de la rapid-veturado. Due: ni ne rifuzas de tiu ĉi rango; pli ol tio, ni turnos nin al ĉiuj organizaĵoj kaj personoj kun peto okazigi al ni koncernan helpon ĝuste pro tio ke ni estas avana aŭto. Trie... Cetere, sufiĉas al vi ankaŭ la du punktoj. Estas tute klare ke iom da tempo ni sukcesos teni nin antaŭ la rapid-veturado, deprenante kremon kaj ceterajn laktaĵojn de tiu ĉi altkultura entrepreno.

La parolaĵo de la granda kombinanto okazigis grandegan impreson. Kozleviĉ ĵetadis sur la komandanton fidelajn rigardojn. Balaganov frotis per la manplatoj sian flavruĝan hararon kaj ridegis. Panikovskij, antaŭĝuante sekuran gajnon, kriis «hura».

– Nu, ĉesu emocii, – diris Ostap, – Pro veno de la mallumo mi proklamas la vesperon malfermita. Halt!

La aŭto haltis, kaj lacaj antilopanoj

surteriĝis. Ene de la maturiĝanta grenejo ĉirpis lokustoj. La pasaĝeroj sidis jam ronde ĉe la vojo mem, sed maljuna «Antilopo» daŭre boladis: iam, sen videbla kaŭzo, krakis la korpo, iam aŭdiĝis mallonga enmotora klako.

Nesperta Panikovskij aranĝis ĝis tiom grandan fajron, ke ŝajnis ke brulas vilaĝo. La flamo, siblante, ĵetiĝis ĉiujn flankojn. Dum la vojaĝantoj militis kontraŭ la flama kolono, Panikovskij, kliniĝinte, forkuris en kampon, kaj revenis tenante en la mano varman kurban kukumon. Ostap rapide elŝiris ĝin el manoj de Panikovskij, dirante:

– Ne faru el manĝado kulton.

Post tio li mem pe-manĝis la kukumon. Ili vespermanĝis per kolbaso, kiun mastrumema Kozleviĉ kunprenis el la hejmo, kaj ekdormis sub la steloj.

– Nu, – diris mateniĝe Ostap al Kozleviĉ, – prepariĝu bone. Tagon, kiu venos hodiaŭ, via mekanika lavkuvo ankoraŭ ne vidis, kaj vidos neniam.

Balaganov kaptis cilindran sitelon kun surskribo «Arbatov-akuŝejo», kaj kuris al la rivero por preni akvon.

Adam Kazimiroviĉ levis la kapoton, fajfante enigis la manojn en la motoron, kaj komencis pristudi ĝiajn kuprajn intestetojn.

Panikovskij apogis la dorson je la aŭta rado kaj, melankolie, sen palpebrumi, rigardis la

oksikokan sunan segmenton, aperantan super la horizonto. Okazis ke vizaĝo de Panikovskij estas sulka, kun multo da maljunulaj detaloj: saketoj, pulsantaj angietoj, kaj fragaj vangruĝoj. Tian vizaĝon havas homo kiu vivis longe kaj honeste, kiu havas plenkreskajn infanojn, trinkas matene sanigan kafon «Glano», kaj verkadas por la oficeja murĵurnalo sub pseŭdonomo «Antikristo».

– Ĉu mi rakontu al vi, Panikovskij, kiel vi mortos? – diris subite Ostap.

La maljunulo ekstremetis kaj retrorigardis.

– Vi mortos tiel. Foje, kiam vi revenos en malplenan kaj malvarman ĉambron de hotelo «Marsejlo» (tio okazos ie en provinca urbo, kien venigos vin via profesio), vi sentos vin malbone. Ĉe vi malfunkciiĝos kruro. Malsata kaj nerazita kuŝos vi sur la ligna litaĉo, kaj neniu venos al vi. Neniu kompatos vin, Panikovskij. Infanojn vi ne naskis pro ŝparemo, kaj la edzinojn forlasadis. Vi turmentiĝos tutan semajnon. Agonio via estos terura. Vi mortados longe, kaj tio tudos al ĉiuj. Vi mortos ankoraŭ ne tute, sed burokrato, administranta la hotelon, jam skribos peton en sekcion de la komunuma fako pri alsendo de senpaga ĉerko... Kio estas viaj nomo kaj patronomo?

– Miĥail Samueleviĉ, – respondis konsternita Panikovskij.

– ... pri alsendo de senpaga ĉerko por

civitano M.S. Panikovskij. Tamen larmojn for, ĉirkaŭ du jaroj vi ankoraŭ vivos. Nun – al la afero. Oni devas prizorgi kultur-agitan flankon de nia kampanjo.

Ostap prenis el la aŭto sian akuŝistan valizeton, kaj metis ĝin sur la herbon.

– Mia ĉefa helpanto, – diris la granda kombinanto, frapetante la valizeton je ĝia dika kolbasa flanko. Ĉi tie estas ĉio kion povas bezoni eleganta civitano de miaj jaroj kaj larĝaj kadroj de la agado.

Bender kaŭriĝis super la valizeto, kiel vaganta ĉina iluziisto super sia mirakla sako, kaj unu post alia komencis elpreni diversajn aĵojn. Komence li elprenis ruĝan brak-ligaĵon kun ore brodita vorto «Administranto».

Poste sur la herbon estis metita polica kaskedo kun blazono de urbo Kievo, kvar ludkartaroj kun sama reverso, kaj pakajeto da dokumentoj kun rondaj lilak-koloraj sigeloj.

Tuta personaro de «Antilopo-Gnu» kun estimo rigardis la valizeton. Kaj el ĝi daŭre aperadis novaj aĵoj.

– Vi, kolomboj, – diris Ostap, – vi certe neniam komprenos ke honesta sovetia pilgrimo, sama al mi, ne povas agi sen kuracista kitelo.

Krom la kitelo en la valizeto okazis ankaŭ stetoskopo.

– Mi ne estas kirurgo, – rimarkis Ostap. Mi estas neŭrologo, mi estas psikiatro. Mi pristudas

animojn de miaj pacientoj. Kaj, ial, mi ĉiam trafas tre stultajn animojn.

Poste estis eligitaj: aboco por surd-mutuloj, filantropiaj poŝtkartoj, emajlitaj surbrustaj insignoj, kaj afiŝo kun portreto de Bender mem en vasta orienta pantalono kaj turbano. La afiŝo tekstis:

VENIS KRIŜNA-PASTRO

(Fama bramano-jogano el Bombajo)

Filo de Fortikulo

Ŝatato de Rabindranat Tagor

JOKANAAN MARUSIDZE

(Honora aktoro de sovetiaj respublikoj)

Prezentoj laŭ sperto de Ŝerlok Holms.

– Hindia fakiro. – Nevidebla kokino. –

Kandeloj el Atlantido – Infera tendo. –

Profeto Samuelo respondas al demandoj de la publiko

Materiigo de animoj

kaj disdono de elefantoj.

Enirbileto de 50 kopekoj ĝis 2 rubloj.

Malpura eluzita turbano aperis post la afiŝo.

– Tiun ĉi amuzaĵon mi uzas tre malofte, – diris Ostap. – Imagu al vi, sed per la Kriŝno-pastro kaptiĝas ĝis tiom progresemaj homoj kiel administrantoj de fervojistaj kluboj. La laboro estas facila, sed abomena. Mi, persone, ne ŝatas esti ŝatato de Rabindranat Tagor. Kaj al profeto Samuelo oni ĉiam turnas kun samaj demandoj: «Kial en vendejoj forestas butero?» aŭ: «Ĉu vi estas judo?».

Fine Ostap trovis kion serĉis: ladan lakitan skatolon kun mielaj farboj en porcelanaj kuvetoj, kaj du peniketojn.

– Aŭton kiu iras avane oni devas plibeligi per minimume unu slogano, – diris Ostap.

Kaj sur longa strio de flaveta kotonajo, elprenita el sama valizeto, li surskribis brunlitere:

PER LA RAPID-VETURADO FRAPU NI SENVOJECON KAJ NAPKAPECON!

La sloganon oni fiksas super la aŭto sur du branĉetoj. Tuj kiam la aŭto ekveturis, la slogano kurbiĝetis pro la ventopremo, kaj akceptis ĝis tiom bravan aspekton, ke jam ne eblis dubi pri bezono frapi per la rapidveturado senvojecon, napkapecon, kaj eble eĉ burokratismen. Pasaĝeroj de «Antilopo» eksidis iom pli digne. Balaganov vestis sur sian rufan kapon la kaskedon, kiun li konstante tenis en la poŝo. Panikovskij reversis la manumojn kaj eligis ilin el la manikoj je du centimetroj. Kozleviĉ pli zorgis pri la aŭto ol pri si mem. Antaŭ la forveturo li lavis ĝin per akvo, kaj sur neregulaj flankoj de «Antilopo» ekbrilis suno. La komandanto mem gaje duonfermetis la okulojn kaj incitetis la kunulojn.

– De maldekstra ŝiprando – vilaĝo! – kriis Balaganov, aligante la manplaton al sia frunto. – Ĉu ni haltos?

– Post ni, – diris Ostap, – iras kvin

unuaklasaj aŭtoj. Rendevuo kun ili ne eniras niajn planojn. Ni devas kiel eble rapide depreni kremon. Tial mi planas halti en urbo Udojev. Tie, interalie, devas atendi nin barelo kun la brulaĵo. Rapidu, Kazimiroviĉ.

- Ĉu respondi al bonvenigoj? - zorge demandis Balaganov.

- Respondu nur per kliniĝoj kaj smajloj. La buŝojn, mi petas, ne malfermu. Alie vi elparolaĉos diablo scias kion.

La vilaĝo renkontis la avanan aŭton varme. Sed kutima gastamo akceptis ĉi tie sufiĉe strangan karakteron. Verŝajne la vilaĝa komunumo estis informita pri tio ke iu preterveturos, sed kiu, kaj kun kiu celo - ĝi ne sciis. Tial por iu ajn okazo estis elprenitaj ĉiuj sentencoj kaj devizoj produktitaj dum kelkaj lastaj jaroj. Laŭ la strato staris lernantoj kun diverskalibraj malnovmodaj sloganoj: «Saluton al Ligo de Tempo kaj al ĝia fondinto kara kamarado Kerĵencov», «Ne timigas ultimato de Kerzon - aristokrato», «Por plibonigi de l' infanoj farton, konstruu ejojn por ilia varto».

Krom tio estis multaj sloganoj, plenumitaj per malnovslava preĝeja literaro kun sama vorto sur ĉiuj: «Bonvenon!».

Ĉio ĉi rapide preterkuris la veturantojn. Ĉi foje ili memfide svingis siajn kapvestojn. Panikovskij ne eltenis kaj, spite al la malpermeso saltleviĝis, kaj malbonprononce

elkriis politike analfabetan saluton. Sed pro bruo de la motoro kaj krioj de la homamaso oni komprenis nenion.

– Hura, hura! – kriis Ostap.

Kozleviĉ malfermis la dampilon, kaj la aŭto liberigis strion da blua fumo, pro kiu ekternis hundoj, kurantaj post la aŭto.

– Kio pri la benzino? – demandis Ostap. – Ĉu ĝis Udojev sufiĉos? Restis nur tridek kilometroj. Poste ni forprenos ĉion.

– Devas sufiĉi, – nekonvinke diris Kozleviĉ.

– Atentu, – diris Ostap, severe ĉirkaŭrigardante sian militistaron, – mi ne toleros maroderadon. Neniujn rompojn de leĝaro. La paradon komandos mi.

Panikovskij kaj Balaganov konfuziĝis.

– Udojev-anoj mem fordonos al ni cion kion ni bezonas. Nun vi vidos tion. Preparu lokon por la donacoj.

La tridek kilometrojn «Antilopo» trakuris dum horo kaj duono. Dum la lasta kilometro Kozleviĉ tre vantis, premis la akcelilon, kaj domaĝe turnadis la kapon. Sed ĉiuj penoj kaj ankaŭ krioj kaj instigoj de Balaganov rezultis nenion. Brila alveturo, kiun planis Adam Kazimiroviĉ, ne sukcesis pro nesufiĉo da benzino. La aŭto malglorie haltis ene de la strato, ne veninte centon da metroj ĝis la katedro, plibeligita, honore al la bravegaj aŭtistoj, per koniferaj girlandoj.

La kunvenintoj kun laŭtaj krioj ĵetis sin renkonten al la «Loren-ditriĥ», veninta el nebulo de jarcentoj. Dornoj de gloro tuj eniĝis noblajn fruntojn de la veturantoj. Oni kruele eltiris ilin el la aŭto, kaj komencis suprenĵeti kun tiu krudeco, kvazaŭ ili estis dronintoj, kiujn oni nepre devas revivigi.

Kozleviĉ restis ĉe la aŭto, kaj ĉiujn aliajn oni kondukis al la katedro kie, laŭ plano, devis okazi spontana trihora mitingo. Al Ostap trapuŝiĝis juna homo de ŝofora tipo kaj demandis:

– Kio pri aliaj aŭtoj?

– Prokrastas, – indifereente respondis Ostap.

– Trapikoj, rompoj, entuziasmo de loĝantaro. Ĉio ĉi detenas.

– Ĉu vi venis per avana aŭto? – ne lasis lin la amatora ŝoforo. – Ĉu Kleptunov veturas kun vi?

– Mi forpostenigis na Kleptunov, – diris Ostap malkontente.

– Kaj profesoro Pesoĉnikov? Ĉu en «Pakard»?

– En «Pakard».

– Kaj verkistino Vera Kruc? – scivolis la duonŝoforo. – Estus tiel bone ekvidi ŝin. Ŝin kaj kamaradon Neĵinskij. Ĉu ankaŭ ili estas kunaj al vi?

– Ĉu vi scias, – diris Ostap, – mi estas lacigita per la veturo.

- Kaj vi, ĉu vi veturas per «Studebeker» (Studebaker)?

- Vi povas opinii nian aŭton «Studebeker»,
- diris Ostap malice, - sed ĝis nun ĝi nomiĝis «Loren-ditriĥ». Ĉu vi kontentiĝis?

Sed la amatora ŝoforo ne estis kontentigita.

- Permesu, - kriis li kun junula altrudeco, - sed en la rapid-veturado estas neniuj "Loren-ditriĥ"! En ĵurnalo mi legis ke iras du «Pakard»-oj, du «Fiat»-oj, kaj unu «Studebeker».

- Iru vi al diabla patrino kun via «Studebeker»! - kriaĉis Ostap. - Kio estas Studebeker? Ĉu Studebeker estas via parenco? Ĉu patro via estas Studebeker? Kial vi algluiĝas al la homo? Ja per klara lingvaĵo oni diras al li ke lastmomente la «Studebeker» estis anstataŭigita per «Loren-ditriĥ», sed li ĝenas! «Studebeker»!

La junulon jam delonge forpuŝis la administrantoj, sed Ostap ankoraŭ longe svingis manojn kaj murmuris:

- Sciuloj! Oni devas mortigi tiujn sciulojn! Studebeker oni donu al li!

Prezidanto de komisiono pri akcepto de la rapid-veturado enigis en sian salutan paroladon ĝis tiom longan ĉenon da kunorditaj propozicioj, ke ne scipovis elgrimpi el ili dum duonhoro. Ĉiun ĉi tempon la komandanto de la veturado pasigis en granda maltrankvilo. De la alta katedro li sekvis suspektajn agojn de Balaganov

kaj Panikovskij, kiuj tro vigle moviĝis ene de la homamaso. Bender faris terurajn okulojn kaj, fine, per sia signalado alpinglis idojn de leŭtenanto Ŝmit al unu loko.

– Mi estas ĝoja, kamaradoj, – deklaris Ostap en sia responda parolado, – rompi per la aŭta hupo patriarkecan trankvilon de urbo Udojev. Aŭto, kamaradoj, estas ne luksaĵo sed transportilo. Fera ĉevalo iras anstataŭigi kamparanan ĉevalineton. Ordigu ni serian produktadon de sovetiaj aŭtoj. Per tiu ĉi aŭta rapid-veturado ni batu senvojecon kaj senzorgecon. Mi finas, kamaradoj. Tuj post ioma manĝeto ni daŭrigu nian malproksiman vojon.

Dum la homamaso, senmove pozicianta ĉirkaŭ la katedro absorbis vortojn de la komandanto, Kozleviĉ disvolvis vastan agadon. Li plenigis la benzinujon per la benzino kiu, kiel diris Ostap, okazis ege altkvalita, senhonte prenis tri grandajn ladskatolojn da brulaĵo, ŝanĝis pneŭojn de ĉiuj kvar radoj, prenis pumpilon kaj eĉ krikon. Per tio li ĝisfine malplenigis kiel bazajn tiel portempajn deponejojn de Udojev-filio de Aŭto-organizaĵo.

Vojo ĝis Nigramarsk ekestis provizita per bezonaĵoj. Forestis nur mono. Sed tio ne maltrankviligis la komandanton. En Udojev la vojaĝantoj bonege tagmanĝis.

– Pri poŝaj monbiletoj oni ne zorgu, – diris Ostap. – Ili kuŝaĉas sur la vojo, kaj ni prenos

ilin laŭbezone.

Distanco inter antikva Udojev, fondita en jaro 794, kaj Nigramarsk, fondita en jaro 1794, enkalkulas milon da jaroj kaj milon da kilometroj de grunda kaj ŝosea vojo. Dum tiu ĉi milo da jaroj sur ĉefa vojo Udojev – Nigra maro aperadis diversaj personoj.

Moviĝis sur ĝi vojaĝantaj oficistoj kun varoj de Bizancaj komercaj firmaoj. Renkonten al ili el zumanta arbaro eliris Najtingalo-rabisto, kruda viro en astrakana ĉapo. La varojn li forprenis, kaj la oficistojn neniigis. Treniĝis sur tiu ĉi vojo konkerantoj kun siaj taĉmentoj, veturadis kamparanoj, kantante paŝadis pilgrimuloj. Vivo de la lando ŝanĝiĝis kun ĉiu jarcento. Ŝanĝiĝis vestoj, perfektigis armiloj, estis subpremitaj terpomaj ribeloj. Homoj ellernis razi barbojn. Ekflugis unua aerostato. Estis inventitaj feraj ĝemeloj: vaporŝipo kaj vaporlokomotivo. Ektrumpetis aŭtoj.

Sed la vojo restis ĝuste sama kia ĝi estis dum Najtingalo-rabisto. Ĝiba, kovrita per vulkana koto aŭ superŝutita per polvo, venena kiel pulvoro kontraŭ cimoj, etendiĝas tiu ĉi patruja vojo preter vilaĝoj, urbetoj, fabrikoj kaj kolĥozoj, etendiĝas per milkilometra kaptilo. Ĉe ambaŭ ĝiaj flankoj, en flaviĝintaj malpurigitaj herboj, kuŝaĉas ostaroj de kamparanaj ĉaroj, kaj pe-torturitaj mortaĉantaj aŭtoj.

Povas esti ke elmigrinto, fuĝinta de la revolucio, kaj freneziginta pro ĵurnal-vendado sur asfaltaj kampoj de Parizo, elmemoras rusian grundvojon kiel ĉarman detalon de la intima pejzaĝo: en flaketo sidas luno, laŭte preĝas griloj, kaj tintetas malplena sitelo, ligita al kamparana ĉaro.

Sed al luna lumo estas donita jam alia tasko. Luno povas bonege brili sur gudigitaj ŝoseoj. Aŭtaj sirenoj kaj hupoj anstataŭigos la simfonian tintadon de kamparana siteleto. Kaj grilojn oni povos aŭskulti en specialaj rezervejoj; tie estos konstruitaj tribunoj, kaj la civitanoj, preparitaj per antaŭvortoj de iu griza gril-profesiulo, povos ĝissate ĝui kantadon de la ŝatataj insektoj.

Ĉapitro 7

Dolĉa ŝarĝo de gloro

Komandanto de la rapid-veturado, la ŝoforo, la ĉefmekanikisto kaj la servisto pri ĉio, ĉiuj sentis sin bonege.

La mateno estis malvarmeta. En perla ĉielo komplikiĝis la pala suno. En herbaro kriadis etbirda kanajlaro. Survojaj birdetoj «paŝtistinoj» malrapide transiris la vojon antaŭ

la aŭtoradoj mem. La stepaj horizontoj eligis ĝis tiom vigligajn odorojn, ke iu kamparana mezvalora verkisto, el unuiĝo «Ŝtala best-mamo», se li estus sur loko de Ostap, ne eltenus, elirus el la aŭto, sidus sur herbon, kaj surloke komencus verki sur paĝoj de la vojaĝa not-libro novan novelon, komencantan per vortoj: «Kaj elŝvitadis la aŭtunsemitaĵoj. Eljungiĝis la sunjo, kaj ekdisĵetadis ĝi siajn radietojn tra tuta nia vasta mondeto. Ekflaris oldulo Romuald sian piedtukon, kaj eĉ stuporiĝis...»

Sed Ostap kaj liaj kunuloj estis malproksimaj de percepto de poeziaj sentoj. Jam noktotagon hastis ili antaŭ la rapidveturado. Oni renkontis ilin per muziko kaj paroladoj. Infanoj tamburadis por ili. Plenkreskuloj nutris ilin per tag- kaj vespermanĝoj, provizis ilin per antaŭe preparitaj aŭtopartoj, kaj en unu el urbetoj prezentis al ili panon-salon sur kverka gravurita plado kun mantuko, brodita krucetmaniere. Pano-salo kuŝis sur aŭta fundo inter piedoj de Panikovskij. Li ĉiam depinĉis de la panbulo pecetojn, kaj fine faris en ĝi musan truon. Post tio naŭziĝema Ostap elĵetis la panon-salon sur la vojon. La nokton la antilopanoj pasigis en vilaĝeto, ĉirkaŭigitaj per prizorgo de la vilaĝa aktivularo. Ili forveturigis de tie grandan kruĉon da kuirita lakto kaj dolĉajn elmemorojn pri

parfumaodoro de fojno, sur kiu ili dormis.

– Lakto kaj fojno, – diris Ostap, kiam «Antilopo» lasis mateniĝe la vilaĝon, – kio povas esti pli bona! Ĉiam oni pensas: «Tion mi ne malhavos. Ankoraŭ multe da lakto kaj fojno estos en mia vivo». Sed en reala vivo tio jam okazos neniam. Do, miaj kompatindaj amikoj, sciu: tio estis plej bona nokto en nia vivo. Kaj vi eĉ ne rimarkis tion.

Kunvojaĝantoj de Bender rigardis lin kun estimo. Ilin admirigis la facila vivo, aperinta antaŭ ili.

– Estas tiel bone vivi! – diris Balaganov. – Jen ni veturas, ni estas sataj. Eble nin atendas feliĉo...

– Ĉu vi estas firme konvinkita pri tio? – demandis Ostap. – Ĉu vere feliĉo atendas nin survoje? Povas esti ke ĝi eĉ svingetas la flugiletojn pro la malpacienco? «Kie», – diras ĝi, – «estas admiralo Balaganov? Kial li ĝis nun ne venis?». Vi estas frenezulo, Balaganov! Feliĉo atendas neniun. Ĝi vagas en la lando en longaj blankaj vestoj, kantante infanan kanteton: «Ho, Usono, – lando kie oni festenas, kaj drinkas sen postmanĝeti». Tiun ĉi naivan infaneton oni devas ĉasi, oni devas ekplaĉi al ŝi, oni devas ŝin amindumi. Kaj vi, Balaganov, ne sukcesos pri amindumo de tiu ĉi infaneto. Vi estas ĉifonvestulo. Rigardu kiun vi similas! Homo en viaj vestoj neniam atingos feliĉon. Krom tio,

devas mi diri, tuta personaro de «Antilopo» estas vestita abomene. Mi miras ke oni ĝis nun opinias nin anoj de la aŭta rapid-veturado.

Ostap kun bedaŭro ĉirkaŭrigardis siajn kunulojn, kaj daŭrigis:

– Ĉapelo de Panikovskij decide konsternas min. Kaj entute li estas vestita kun provoka lukso. Tiu ĉi valorega dento, tiuj ĉi kalsonaj laĉoj, tiu ĉi harkovrita brusto sub la kravato... Vi, Panikovskij, devas vestiĝi pli simple. Vi estas estimata maljunulo. Vi bezonas nigran surtuton kaj feltan ĉapelon. Al Balaganov konvenos kvadratigita vakera ĉemizo kaj ledaj botoj. Li tuj aspektos kiel studento-sportulo. Sed nun li similas matroson de komerca ŝipo, maldungitan pro drinkado. Pri nia estimata ŝoforo mi eĉ ne parolas. La gravaj malfacilaĵoj, kiujn la sorto sendis al li, malhelpis al li vestiĝi konforme al sia rango. Ĉu vere vi ne vidas kiel konvenus al lia inspira vizaĝo, iomete malpurigita per oleo, leda kombin-vesto kaj nigra leda kaskedo? Jes, knabetoj miaj, vi devas alivestiĝi.

– Mono forestas, – diris Kozleviĉ, turniĝante.

– La ŝoforo pravas, – afable respondis Ostap, – mono vere forestas. Forestas tiuj ĉi etaj metalaj rondetoj, kiujn mi tiel ŝatas.

«Antilopo-Gnu» deglitis de altaĵeto. Kampoj daŭrigis la malrapidan turniĝadon ambaŭflanke de la aŭto. Granda rufa strigo sidis ĉe la vojo

mem, turniginte la kapon flanken, kaj stulte eliginte siajn flavajn nevidantajn okulojn. La birdo, maltrankviligita per knarado de «Antilopo», etendis laflugilojn, ekŝvebis super la aŭto, kaj baldaŭ forflugis al siaj enuaj strigaj aferoj. Nenio meritanta atenton okazis plu dum la veturado.

– Rigardu! – kriis subite Balaganov. – Aŭto!

Por iu ajn okazo Ostap ordonis forigi la sloganon, kiu admonis civitanojn frapi napkapecon per la rapid-veturado. Dum Panikovskij plenumis la ordonon, «Antilopo» proksimiĝis al la renkontita aŭto.

Fermita griza «Kadilak» iom kliniĝinte staris ĉe la voja flanko. Mezrusia naturo, respegulata en ĝiaj dikaj poluritaj vitroj, aspektis pli pura kaj bela ol ĝi estis efektive. Surgenuiĝinta ŝoforo demetadis pneŭon de la antaŭa rado. Super li, atendante, suferis tri personoj en sablokoloraj vojaĝaj paltoj.

– Ĉu vi toleras paneon? – demandis Ostap, ĝentile levante la kaskedon.

La ŝoforo levis la streĉitan vizaĝon kaj, respondinte nenion, denove profundiĝis en la laboron.

Antilopanoj elgrimpis el sia verda kaleŝo. Kozleviĉ kelkfoje ĉirkaŭiris la mirindan aŭton, envie suspirante kaŭriĝis apud la ŝoforo, kaj baldaŭ komencis specifan konversacion. Panikovskij kaj Balaganov kun infana scivolo

pririgardis la pasaĝerojn, du el kiuj havis sufiĉe fieran alilandan aspekton. La tria, se juĝi laŭ sveniga galoŝaodoro, kiun eligis lia gum-trusta pluvmantelo, estis samlandano.

– Ĉu vi toleras paneon? – ripetis Ostap, delikate tuŝinte guman ŝultron de la samlandano kaj, samtempe, mediteme rigardante la alilandanojn.

La samlandano incite ekparolis pri la krevinta pneŭo, sed lia balbutado preterflugis orelojn de Ostap. Sur ĉefa vojo, cent-tridek kilometroj de proksima regiona centro, en mezo mem de eŭropa Rusio promenadis apud sia aŭto du diketaj alilandaj kokidoj. Tio emociigis la grandan kombinanton.

– Diru, – interrompis li, – ĉu tiu ĉi duopo venis el Rio-de-Ĵanejro?

– Ne, – respondis la samlandano, – ili el Ĉikago. Kaj mi estas tradukisto el «Aliland-tur».

– Sed kion ili faras ĉi tie, en la sovaĝa antikva kampo, malproksime de Moskvo, de baleto «Ruĝa papavo», de antikvaĵaj butikoj, kaj de fama pentraĵo de Repin «Ivan la severa mortigas sian filon»? Mi ne komprenas! Por kio vi venigis ilin ĉi tien?

– Al diablo ilin! – funebre diris la tradukisto. – Jam trian tagon hastas ni el vilaĝo en vilaĝon. Pe-turmentis ili min. Mi multe laboris kun alilandanoj, sed tiajn mi ankoraŭ ne vidis, – kaj li svingis la manon en direkton de siaj

ruĝvangaj kunveturantoj. – Ĉiuj turistoj kondutas sin turisme, kuras en Moskvo, aĉetas en metiistaj butikoj lignajn drinkkuvojn. Sed tiu ĉi duopo deflankiĝas. Ekis veturadi en vilaĝojn.

– Laŭdinde, – diris Ostap. – Vastaj tavoloj da miliarduloj konatiĝas kun vivmaniero de nova sovetia vilaĝo.

La civitanoj de urbo Ĉikago digne observis riparon de la aŭto. Ili vestis silverajn ĉapelojn, frostiĝintajn amelitajn kolumetojn, kaj ruĝajn nebrilajn ŝuojn.

La tradukisto indigne alrigardis na Ostap kaj elkriis:

– Ĉu! Ili tute ne interesiĝas pri nova vilaĝo! Vilaĝan memdistilaĵon ili bezonas, sed ne vilaĝon.

Ĉe vorto «memdistilaĵo», kiun la tradukisto prononcis kun akcento, la ĝentlemanoj maltrankvile retrorigardis, kaj komencis proksimiĝi al la konversaciantoj.

– Ĉu vi vidas! – diris la tradukisto. – Eĉ vorton tiun ili ne povas aŭskulti trankvile.

[Первач?](#) («Memdistilaĵo?»)

– Jes. Ĉi tie estas iu mistero, – diris Ostap, – aŭ perversaj gustoj. Mi ne komprenas kiel oni povas ŝati memdistilaĵon, kiam en nia patrolando troviĝas tiom granda sortimento da noblaj fortaj drinkaĵoj.

– Tio estas multe pli simple ol ŝajnas al vi, –

diris la tradukisto - ili serĉas recepton por produkti bonan memdistilitan vodkon.

- Jes, certe! - kriis Ostap. - Ja ĉe ili regas "abstina leĝo". Nun ĉio klaras... Ĉu ili trovis la recepton?.. Ne, ne trovis? Certe. Kial vi ne venis eĉ per tri aŭtoj! Sendube oni opinias vin estraranoj. Do mi kuraĝas kredigi vin ke vi ne trovos la recepton.

La tradukisto ekplendis kontraŭ la alilandanoj.

- Ĉu vi kredas, eĉ sur min ili komencis ĵetiĝi: rakontu mi al ili sekreton de memdistilado. Sed mi ne estas memdistilulo. Mi estas ano de klerigist-sindikato. Ĉe mi en Moskvo estas maljuna patrino.

- Ĉu vi tre volas reen en Moskvon? Al la patrino?

La tradukisto ĉagrene suspiris.

- Tiuokaze la kunsido daŭriĝas, - diris Ostap. - Kiom donos viaj ĉefoj kontraŭ la recepto? Ĉu cent-kvindekon ili donos?

- Ili donos ducenton, - flustris la tradukisto. - Ĉu vi vere havas la recepton?

- Mi tuj diktos ĝin al vi, tio estas tuj post ricevo de mono. Kiun vi volas: terpoman, tritikan, abrikotan, hordean, el morus-beroj, el fagopira kaĉo. Eĉ el ordinara tabureto oni povas distili drinkaĵon. Estas kiuj ŝatas taburetaĵon. Eblas fari ankaŭ simplan sekvinberaĵon aŭ prunaĵon. Unuvorte iun ajn el cent-kvindeko da

receptoj kiujn mi konas.

Ostap estis prezentita al la usonanoj. En la aero longe ŝvebis ĝentile levigataj ĉapeloj. Poste oni venis al la afero.

La usonanoj elektis tritikan memdistilitan brandon, kiu allogis ilin per simpleco de produktado. La recepton oni longe registris en la notlibrojn. Estiel senpaga premio Ostap informis la usonanojn pri plej bona konstruo de kabineta distil-aparato, kiun oni senprobleme povas kaŝi de eksterulaj rigardoj en kesto de la labortablo. La recept-serĉantoj certigis na Ostap ke por usona tekniko produkti tiun ĉi aparaton estas afero tute senproblema. Ostap, de sia flanko, informis la usonanojn ke aparato de lia konstruo donas ĉiutage sitelon da ĉarma aroma *pervaĉ*.

– Ho! – kriis la usonanoj.

Ili jam aŭdis tiun ĉi vorton en unu estimata familio en Ĉikago. Tie pri la «*pervaĉ*» estis donitaj superbaj recenzoj. La familiestro estis iam ano de usona okupada korpuso en **Arĥangelsk**¹³, drinkis tie «*pervatsch*», kaj de tiu tempo ne povas forgesi ĉarman percepton kiun li spertis tiam.

En plenumo de la ravitaj turistoj kruda vorto «*pervaĉ*» sonis tenere kaj alloge.

La usonanoj facile fordonis ducent rublojn, kaj longe skuis manon de Bender. Panikovskij

13. Arĥangelsk: nordrusia havenurbo.

kaj Balaganov ankaŭ sukcesis adiaŭi permane la civitanojn de la transatlantika respubliko, turmentatajn per «abstina leĝo». La tradukisto, pro la ĝojo, kisetis na Ostap je ties firman vangon, kaj petis envenadi, aldonante ke la maljuna patrino estos tre ĝoja. Sed la adreson, iukaŭze, li ne lasis.

La amikiĝintaj vojaĝantoj dissidis en siajn aŭtojn. Kozleviĉ, adiaŭe, elhupis «maĉiŝ», kaj ĉe ĝiaj gajaj sonoj la aŭtoj disflugis diversdirekten.

– Ĉu vi vidas, – diris Ostap, kiam la usonan aŭton vualigis la polvo, – ĉio okazis kiel mi diris al vi. Ni veturis. Sur la vojo kuŝaĉis mono. Mi prenis ĝin. Rigardu, ĝi eĉ ne polviĝis.

Kaj li ekkrakis per pakaĵeto da monbiletoj.

– Verdire ne estas pri kio fanfaroni, la kombinaĵo estis simpleta. Sed puremo, honesto, jen kio valoras. Ducent rublojn. Dum kvin minutoj. Kaj mi ne nur evitis rompon de leĝoj, sed eĉ faris agrablaĵojn. Personaron de «Antilopo» mi provizis per mono. Al maljuna patrino mi redonis la filon tradukiston. Kaj, fine, mi kontentigis la animan soifon de civitanoj de la lando, kun kiu ni, tiel-aliel, havas komercajn ligojn.

Proksimiĝis tagmanĝa tempo. Ostap enprofundiĝis mapon de la aŭtokuro, kiun li elŝiris el aŭto-revuo, kaj informis proksimiĝon de urbo Luĉansk.

– La urbo estas malgranda, – diris Bender, – kaj tio malbonas. Ju malpli grandas la urbo, des pli longas la salutaj paroladoj. Tial ni petos estimatajn estrojn de la urbo ke por unua plado estu tagmanĝo, kaj la paroladoj – por la dua. Dum interakto mi provizos vin per vestaĵoj. Panikovskij, vi komencas forgesi viajn taskojn. Restarigu la sloganon.

Kozleviĉ, sperta jam pri la solenaj alveturoj, brave bremsis la aŭton antaŭ la tribuno mem. Ĉi tie Bender limigis sin per mallonga saluto. Oni interkonsentis prokrasti la mitingon je du horoj. Plifortiĝinte per senpaga tagmanĝo, la aŭtistoj, en tre agrabla humoro, ekiris al vestaĵ-vendejo. Ilin ĉirkaŭigis scivoluloj. Antilopanoj digne portis falintan sur ilin dolĉan ŝarĝon de famo. Ili iris meze de la strato, intertenante la manojn, kaj balanciĝante kiel matrosoj en alilanda haveno. Rufa Balaganov, vere simila al juna ĉefserĝento, kantis maristan kanton.

Vendejo «Vestaĵoj viraj, virinaj kaj infanaj» troviĝis sub grandega elpendaĵo, okupanta tutan duetaĝan domon. Sur la elpendaĵo estis pentritaj dekoj da figuroj: flavvizaĝaj viroj kun maldikaj lipharoj, en elegantaj peltaĵoj, sinjorinoj kun mufoj en la manoj, mallongpiedaj infanoj en matrosaj kostumoj, jun-komunistinoj en ruĝaj kaptukoj, kaj malgajaj mastrumistoj, profundiĝintaj ĝis femuroj en feltajn botojn.

Ĉiu tiu ĉi luksaĵo rompiĝis je papereton,

algluitan al enirpordo de la vendejo:

PANTALONOJ FORESTAS

– Fi, kiel krude, – diris Ostap, enirante, –
tuj videblas provinco. Prefere ili skribus kiel oni
skribas en Moskvo: «Pantalonoj dume ne
aĉetebblas». Dece kaj noble. Civitanoj kontente
disiras al siaj hejmoj.

En la vendejo la aŭtistoj troviĝis nelonge.
Por Balaganov estis trovita vakera ĉemizo kun
vastaj kanari-koloraj kvadratoj, kaj firma ĉapelo
kun truetoj. Kozleviĉ devis kontentiĝi per
promesita leda kaskedo kaj sama jako, brilanta
kiel dispremita kaviaro. Oni longe okupiĝis pri
Panikovskij. Pastra longbaska surtuto kaj mola
ĉapelo kiuj laŭ intenco de Bender devus nobligi
aspekton de la rompanto de la konvencio,
defalis dum unua minuto. La vendejo povis
proponi nur kostumon de fajrobrigadisto: jakon
kun oraj kolum-insignaj pumpiloj, harozan
duonlanan pantalonon, kaj kaskedon kun blua
pasamento. Panikovskij longe saltis antaŭ la
onda spegulo.

– Mi ne komprenas, diris Ostap, – kial al vi
ne plaĉas kostumo de fajrobrigadisto? Malgraŭ
ĉio ĝi estas pli bona ol kostumo de reĝo en
ekzilo, kiun vi portas nun. Turniĝu, fileto mia.
Perfekte! Mi diru rekte. Tio konvenas al vi pli ol
projektitaj per mi surtuto kaj ĉapelo.

Sur straton ili eliris en la novaj vestoj.

– Mi bezonas smokingon, – diris Ostap, sed

ĉi tie ĝi forestas. Atenduni pli bonan tempon.

Ostap malfermis la mitingon en plibonigita humoro, ne suspektante kiu tempesto proksimiĝas al anaro de «Antilopo». Li spritis, rakontis ridindajn vojaĝajn aventurojn kaj judajn anekdotojn, per kio gajnis favoron de la publiko. Finon de la parolado li dediĉis al jam delonge maturiĝinta problemo.

– Aŭto, – kriis li per la trumpeta voĉo, – estas ne luksaĵo, sed...

Tiuminute li ekvidis ke prezidanto de komisio pri la akcepto prenis el manoj de alkurinta knabo telegramon.

Elparolante vortojn: «ne luksaĵo sed transportilo», Ostap kliniĝis maldekstren kaj trans ŝultro de la prezidanto enrigardis la telegrafan folion. Tio kion li pe-legis trafis lin. Li opiniis ke ili ankoraŭ havas en sia dispono tutan tagon. Lia konscio momente registris vicon da vilaĝoj kaj urboj, en kiuj «Antilopo» profitis per malpropraj materialoj kaj rimedoj.

La prezidanto ankoraŭ longe movis la lipharojn, penante penetri enhavon de la telegramo, sed Ostap, dum duonvorto desaltinta de la tribuno, jam penetradis tra la homamaso. «Antilopo» verdis sur la vijkruciĝo. Feliĉe la pasaĝeroj sidis sur siaj lokoj kaj, enuante, atendis momenton kiam Ostap ordonos transporti en la aŭton donacojn de la urbo. Tio kutime okazis post mitingo.

Finfine senco de la telegramo atingis konscion de la prezidanto.

Li levis la okulojn, kaj ekvidis forkurantan komandanton.

– Tio estas friponoj! – kriis li sufere.

Tutan nokton laboris li por verki la salutan paroladon, kaj nun lia aŭtora memestimo estis trafita.

– Kaptu ilin, knaboj!

La krio de la prezidanto atingis orelojn de antilopanoj. Ili nerveze ektumultis. Kozleviĉ funkciigis la motoron, kaj per unu salto enflugis sian sidaĵon. La aŭto ĵetiĝis antaŭen, ne atendante na Ostap. Antilopanoj, pro la hasto, eĉ ne komprenis ke lasas en la danĝero sian komandanton.

– Haltu! – kriis Ostap, farante gigantajn saltojn. – Atingos mi kaj ĉiujn maldungos!

– Haltu! – kriis la prezidanto.

– Haltu, stultulo! – kriis Balaganov al Kozleviĉ, – ĉu vi ne vidas ke ni la ĉefon perdis!

Adam Kazimiroviĉ premis la pedalojn, «Antilopo» ekgrincis kaj haltis. La komandanto transkapiĝis en la aŭton kun senespera krio: «Plenan rapidecon!». Malgraŭ multflankeco kaj trankvileco de sia karaktero li ne toleris fizikan punadon. Freneziĝinta Kozleviĉ enigis trian rapidumon, la aŭto eksaltis, kaj el la malfermiĝinta pordeto elfalis Balaganov. Ĉio okazis dum unu momento. Dum Kozleviĉ denove

bremsis, sur Balaganov falis jam ombro de la alkuranta homamaso. Jam etendiĝis al li fortegaj manoj kiam «Antilopo», veturante malantaŭen, proksimiĝis al li, kaj fera mano de la komandanto kaptis lin je la vakera ĉemizo.

– Plej rapide! – elhurlis Ostap.

Kaj tiam loĝantoj de Luĉansk unue komprenis avantaĝon de mekanika transporto antaŭ ĉevala. La aŭto ektintis per ĉiuj siaj partoj, kaj rapide forkuregis, forportante de justa puno kvaron da deliktuloj.

Dum unua kilometro la friponoj pene spiris. Balaganov, aprezanta sian belecon, pririgardis per la poŝa speguleto frambkolorajn gratvundojn, ricevitajn dum la elfalo. Panikovskij tremis en sia kostumo de fajrobrigadisto. Li timis venĝon de la komandanto. Kaj ĝi venis senprokraste.

– Ĉu tio estas vi kiu ekpelis la aŭton antaŭ ol mi sukcesis ensidi? – demandis la komandanto minace.

– Je Dio... – komencis Panikovskij.

– Ne, ne malkonfesu! Tio estas viaj artifikoj. Do vi estas ankaŭ timulo? Ĉu mi trafis en kompanion de ŝtelisto kaj timulo? Bone! Mi degrados vin. Ĝis nun vi, en miaj okuloj, estis ĉefestingisto. De nun vi estas simpla hakisto.

Kaj Ostap solene deŝiris de la ruĝaj kolumekstremoj la orajn pumpilojn.

Post tiu ĉi procedo Ostap konatigis la

kunulojn kun enhavo de la telegramo.

- La afero malbonas. En la telegramo oni preskribas halti la verdan aŭton kiu iras antaŭ la rapid-veturado. Oni devas tuj turniĝi en iun ajn flankon. Finiĝis por ni triumfoj, palmaj branĉoj kaj senpagaj tagmanĝoj kun oleo. La ideo elĉerpiĝis. Turniĝi ni povas nur sur Grjaĵan ŝoseon. Sed ĝis la ŝoseo estas tri horoj da veturo. Mi estas certa ke varma akcepto pretiĝas jam en ĉiuj proksimaj loĝlokoj. Malbenita telegrafo ĉie enŝovaĉis siajn fostojn kun dratoj.

La komandanto ne eraris.

Sur ilia vojo troviĝis urbeto, kies nomon antilopanoj eksciis neniam, kvankam volus scii ĝin, por elmemori per malbona vorto. La vojon, ĉe eniro mem en la urbeton, baris peza trabo. «Antilopo» turniĝis, kaj kiel blinda hundido komencis ekzameni flankojn, serĉante ĉirkaŭan vojon. Sed ĝi forestis.

- Iru ni malantaŭen - diris Ostap, estinta tre serioza.

Kaj tiam la friponoj ekaŭdis tre malproksiman kulan kanton de motoroj. Ŝajne iris aŭtoj de vera rapid-veturado. Moviĝi malantaŭen ne eblis, do antilopanoj denove ĵetiĝis antaŭen.

Kozleviĉ faltis la frunton, kaj rapide algvidis la aŭton al la trabo mem. La civitanoj starantaj ĉirkaŭe time deŝoviĝis, atendante paneon. Sed

Kozleviĉ neatendite malpliigis la rapidecon, kaj malrapide transveturis la obstaklon. Kiam «Antilopo» veturis tra la urbo, la piedirantoj kverele insultis la aŭtanojn, sed Ostap eĉ ne respondis.

Al Grjaĵa ŝoseo «Antilopo» venis ĉe ĉiam fortiĝanta muĝo de ankoraŭ nevideblaj aŭtoj. Tuj post kiam ili sukcesis turniĝi de la malbenita ĉefvojo, kaj ĉe veninta mallumo kaŝi la aŭton post altaĵeton, ekaŭdiĝis eksplodoj kaj pafadoj de motoroj, kaj en fostoj da lumo aperis avana aŭto. La friponoj kaŝiĝis en herboj ĉe la vojo mem kaj, subite perdinte sian kutiman arogantecon, senvorte rigardis la preterirantan kolonon.

Tolaj da blindiga lumo verŝiĝis sur la vojon. La aŭtoj mole knaris, preterkurante la surterigitajn antilopanojn. Polvo flugis el sub la radoj. Longsone hurlis la hupoj. Vento tumultis ĉiudirekten. Post minuto ĉio malaperis, kaj nur longe balanciĝis kaj saltis en la mallumo rubena lanterneto de la lasta aŭto.

Vera vivo preterflugis ilin, ĝoje trumpetante kaj brilante per siaj lakaj flugiloj.

Al la aventur-serĉantoj restis nur benzina vosto. Longe post tio sidis ili en la herboj, ternante kaj deskuante la polvon.

– Jes, – diris Ostap, – nun ankaŭ mi vidas ke aŭto estas ne luksaĵo, sed transportilo. Ĉu vi envias, Balaganov? Mi envias.

Ĉapitro 8

Krizo de la ĝenro

Je la kvara nokte pelĉasita «Antilopo» haltis super deklivo. Sobe, sur telereto, kuŝis nekonata urbo. Ĝi estis stranĉita akurate, kiel torto. Super ĝi ŝvebis diverskoloraj matenaj vaporoj. Al la elaŭtiĝintaj antilopanoj ŝajnis ke ili aŭdas malfacile percepteblajn kraketojn kaj tre fajnan fajfadon. Verŝajne tio estis ronkado de la civitanoj. Al la urbo proksimiĝis denta arbaro. La vojo maŝe falis de la deklivo.

– Paradiza valo, – diris Ostap. – Tiajn urbojn estas agrable rabi matene, kiam suno ankoraŭ ne bruligas. Oni malpli laciĝas.

– Sed nun estas ĝuste frua mateno – rimarkis Panikovskij, – flate enrigardante okulojn de la komandanto.

– Silenton, ora roto! – kriis Ostap. – Jen senpacienca maljunulo! Ŝercojn li ne komprenas.

– Kion ni faru pri «Antilopo»? – demandis Kozleviĉ.

– Jes, – diris Ostap, – en la urbon en tiu ĉi kuvo oni nun ne enveturu. Oni arestos nin. Necesas agi laŭ ekzemploj de plej progresemaj regnoj. En Rio-de-Ĵanejro, ekzemple, ŝtelitajn aŭtojn oni alifarbas. Oni faras tion pro pure humanaj motivoj: por ke antaŭa mastro ne ĉagrenu, vidante ke per lia aŭto veturadas aliulo. «Antilopo» akiris acidan famon, oni devas

alifarbi ĝin.

Estis decidite eniri la urbon piede, kaj akiri farbojn, kaj por la aŭto elserĉi fidindan rifuĝejon ekster la urba limo.

Ostap rapide ekiris sur vojo laŭ la deklivo, kaj baldaŭ ekvidis oblikvan traban dometon, kies etaj fenestroj brilis per rivera bluo. Post la dometo troviĝis remizo, kiu ŝajnis esti konvena por kaŝi na «Antilopo».

Dum la granda kombinanto meditis per kiu preteksto oportunas penetri la dometon kaj amikiĝi kun ĝiaj loĝantoj, la pordo malfermiĝis, kaj sur la peroneton elkuris estiminda sinjoro en soldataj kalsonoj kun nigraj ladaĵ butonoj. Sur liaj palaj parafinaj vangoj troviĝis decaj grizaj vangobarboj. Ene de pasinta jarcento tia fizionomio ŝajnus esti ordinara. Tiam plimulto da viroj kreskigis sur siaj vizaĝoj tiujn ĉi fiskajn, sindonemajn hararanĝojn. Sed nun, kiam sub la vangobarboj troviĝis nek blua uniformo kun ordena rubandeto, nek oraj kolum-insignaj steletoj de sekretkonsilisto, tiu ĉi vizaĝo ŝajnis nenatura.

– Ho Dio, – sendente parolis loĝanto de la traba dometo, etendante la manojn al eliranta suno. – Dio, Dio! Denove samaj songoj! Ĝuste samaj!

Prononcinte tiun ĉi plendon la maljunulo ekploris, kaj trene ekkuris sir padeto ĉirkaŭ la domo. Ordinara koko, kiu ĉi-minute intencis

kanti trian fojon, kaj venis tiucele sur mezon de la korto, ĵetiĝis flanken; pro la emociĝo ĝi faris kelkajn hastajn paŝojn, kaj eĉ faligis plumon, sed baldaŭ ĝi rekonsciiĝis, surgrimpis la plektan barilon kaj, jam de tiu ĉi sendanĝera pozicio, informis mondon pri veno de la mateno. Tamen en ĝia voĉo sentiĝis eksciteco, elvokita per maldigna konduto de la dommastro.

– Songas ili, malbenitaj, – venis al Ostap voĉo de la maljunulo.

Bender mire pririgardis la strangan homon kun vangobarboj, kiujn oni povas trovi nun nur sur ministra vizaĝo de konservatoria pordisto.

Dume la nekutima sinjoro pe-is sian rondkuron, kaj denove aperis ĉe la peroneto. Ĉi tie li haltetis, kaj kun vortoj: «Iru mi, provu ankoraŭfoje», – malaperis post la pordo.

– Ŝatas mi maljunulojn, – flustris Ostap, – kun ili oni neniam enuiĝas. Mi devas atendi rezultojn de la mistera provo.

Ostap atendis nelonge. El la dometo ekaŭdiĝis plora hurlo kaj, retroirante, kiel Boris Godunov en lasta akto de samnoma opero far Musorgskij, sur la peroneto aperis la maljunulo. – Lasu, lasu min! – kriis li kun voĉmodulado de kantisto Ŝalopin. – Ĉiam la sama sonĝo! A-a-a!

Li turniĝis kaj, stumblante je propraj piedoj ekiris rekte al Ostap. Decidinte ke venis jam tempo agi, la granda kombinanto elpaŝis el post la arbo, kaj ĉirkaŭprenis la vangbarbulon per

siaj herkulaj brakoj.

– Kio? Kiu? Kio okazas? – kriis la maltrankvila maljunulo – Kio?

Ostap singarde malfermis la ĉirkaŭpremon, kaptis la maljunulon je la mano, kaj tutkore skuis ĝin:

– Mi kunsentas vin! – diris li kortuŝe.

– Ĉu vere? – demandis mastro de la dometo, premante sin al ŝultro de Bender.

– Tute vere. – respondis Ostap. – Ankaŭ mi ofte sonĝas.

– Kaj kion vi sonĝas?

– Diversaĵojn.

– Sed kiujn ja? – insistis la maljunulo.

– Ja diversaĵojn. Miksaĵon. Tion kio en ĵurnaloj nomiĝas «De ĉie pri ĉio» aŭ «Tutmonda ekrano». Antaŭhieraŭ, ekzemple, mi sonĝis enterigon de japana imperiestro, kaj hieraŭ – jubileon de Susĉeva fajrobrigado.

– Dio! – diris la maljunulo. – Dio! Ĝis kiom feliĉa vi estas! Ĝis kiom feliĉa! Diru, ĉu vi sonĝis iam iun general-guberniestron aŭ... eĉ ministron?

Bender ne obstinis.

– Sonĝis, – diris li gaje. – Kial ne. General-guberniestron. Dum pasinta vendredo. Tutan nokton mi sonĝis lin. Kaj, memoras mi, apud li ankaŭ polic-estro staris en arabeska pantalono.

– Ho, kiel bone! – diris la maljunulo. – Kaj ĉu vi sonĝis iam alveturon de lia moŝto

imperiestro en urbon Kostroma?

– Na Kostroma? Estis tiu ĉi sonĝo. Kiam, permesu, okazs tio?.. Jes, certe, la trian de februaro de tiu ĉi jaro. Lia moŝto imperiestro kaj, memoras mi, apud li grafo Frederiks staris, tiu, ĉu vi scias, korteg-ministro.

– Dio mia! – maltrankviliĝis la maljunulo. – Sed kial ni staras ĉi tie. Okazu favoron, eniru. Pardonu, ĉu vi estas socialisto? Partiano?

– Ja kio vi! – bonanime diris Ostap. – Mi tute ne estas ano de la partio. Mi estas senpartia monarkisto. Servanto al la caro, patro al soldatoj. Kaj, entute, gardu Dio la caron...

– Teon, ĉu vi permesos prezenti teon al vi? – balbutis la maljunulo, puŝetante na Bender al la pordo.

Okazis ke la dometo konsistas el unu ĉambro kaj enirejo. Sur la muroj pendis portretoj de sinjoroj en uniformaj surtutoj. Se juĝi laŭ la koluminsignoj, tiuj ĉi sinjoroj servis iam en ministerio pri popol-klerigo. La lito aspektis senorda, kaj atestis pri tio ke la mastro pasigis sur ĝi plej maltrankvilajn horojn de sia vivo.

– Ĉu longe vi vivas tiel aparte? – demandis Ostap.

– De la printempo, – respondis la maljunulo. – Mia familinomo estas Malsanulev. Ĉi tie, pensis mi, komenciĝos la nova vivo. Sed kio okazis? Vi ja komprenu...

Fjodor Nikitiĉ Malsanulev estis monarkisto, kaj malamis sovetian reĝimon. Tiu ĉi reĝimo estis abomena al li. Li, eksa estro de lerneja distrikto, devis servi estiel estro de metodik-pedagogia sektoro de loka Proletkult. Tio elvokis abomenon en li. Ĝis fino mem de la servo li ne sciis kiel deĉifri vorton "Proletkult", kaj pro tio eĉ pli malestimis ĝin. Anoj de loka sindikata komitato, kolegoj kaj vizitantoj de la metodik-pedagogia sektoro elvokis en li tremon de naŭzo sole per sia aspekto.

Li malamis vorton "sektoro". Ho, tiu sektoro! Fjodor Nikitiĉ, aprezanta ĉion elegantan, enkalkulante geometrion, neniam antaŭvidis ke tiu ĉi belega matematika nocio, signifanta parton de areo de kurba figuro, estos tiel vulgarigita.

Multaj aferoj kolerigis na Malsanulev en lia laborloko: kunsidoj, murĵurnaloj, ŝtatpruntoj. Sed ankaŭ hejme li ne trovis trankvilon ene de sia fiera animo. Ankaŭ hejme estis murĵurnaloj, ŝtatpruntoj, kunsidoj. Konatuloj parolis ekskluzive pri vulgaraj, laŭ Malsanulev, aferoj: pri salajro, kiun ili nomis laborpago, pri monato de helpo al infanoj, pri socia signifo de teatraĵo "Kiras-trajno".

Oni povis nenien fuĝi de sovetia reĝimo. Kiam ĉagrenita Malsanulev sole promenadis sur stratoj de la urbo, ankaŭ ĉi tie el amaso de la promenantoj elflugis tedaj frazoj:

- ...Kaj tiam ni decidis eligi lin el vicoj de la administracio...

- ...Kaj mi diris ĝuste tiel: kontraŭ via RKK ekzistas primkamero!

Kaj, kun angoro rigardante afiŝojn, vokantajn plenumi la kvinjaran planon dum kvar jaroj, Malsanulev incite ripetis:

- Eligi! El vicoj! Primkamero! Dum kvar jaroj! Vulgara reĝimo!

Kiam la metodik-pedagogia sektoro transiris al seninterrompa laborsemajno kaj, anstataŭ puraj dimanĉoj, ripoztagoj de Malsanulev okazis iuj violkoloraj kvinaj tagoj, li kun abomeno elklopodis al si pension, kaj ekloĝis malproksime, ekster la urbo. Li faris tion por foriri de la nova reĝimo, kiu ekposedis lian vivon, kaj senigis lin de la trankvilo.

Tutajn tagojn sidis la monarkisto-solulo sur supro de la deklivo kaj, rigardante la urbon, penis pensi pri agrablaĵoj: pri preĝ-ceremonioj pro nomtago de iu reĝa persono, pri gimnaziaj ekzamenoj, pri la parencoj, kiuj servis en ministerio de popol-klerigo. Sed, al lia miro, la pensoj tuj resaltis sur ion sovetian, malagrablan.

«Kio okazas nun en tiu ĉi malbenita Proletkult?» – pensis li.

Post Proletkult memoriĝis al li jam absolute indignaj epizodoj: unuamajaj kaj oktobraj manifestacioj, enklubaj familiaj vesperoj kun

lekcioj kaj biero, duonjaraj financ-dokumentoj de la metodik-pedagogia sektoro.

«Ĉion forprenis de mi sovetia reĝimo», – pensis eksa estro de lerneja distrikto, – «rangojn, ordenojn, honoron, kaj monon en la banko. Eĉ miajn pensojn ĝi substituis. Sed estas sfero kiun komunistoj ne enpenetros: tio estas sonĝoj, senditaj per Dio. Nokto alportos trankvilon al mi. En miaj sonĝoj mi vidos tion kion agrablas vidi».

En unuan jam nokton post tio al Fjodor Nikitiĉ estis sendita terura sonĝo. Li sonĝis ke sidas li en la oficeja koridoro, lumigita per kerosena lampo. Sidas li kaj scias ke post kelkaj minutoj oni devas eligi lin el vicoj de la administracio. Subite malfermiĝas la fera pordo, kaj el ĝi elkuras liaj kolegoj kun krioj: «Al Malsanulev oni devas komisii sociajn aktivecojn!». Li volas forkuri, sed ne povas.

Fjodor Nikitiĉ vekiĝis meznokte. Li preĝis al Dio, klarigante al Li ke, ŝajne, okazis domaĝa miskompreno, kaj la sonĝo, destinita por gvidanta, aŭ eĉ partia kamarado, maltrafis la adreson. Li, Malsanulev, volus vidi komence caran eliron el Uspenskij katedralo.

Trankviliĝinta, li denove ekdormis, sed anstataŭ vizaĝo de la ŝatata monarko li tuj ekvidis prezidanton de la loka sindikata komitato kamaradon Surĵikov.

Kaj jam ĉiunokte, kun fatala sistemeco, na

Fjodor Nikitiĉ vizitis nur politike korektaj sovetiaj songoj. Songis li: membrajn kotizojn, murĵurnalojn, sovetian agro-mastrumon «Giganto», solenan malfermon de unua **fabriko-kuirejo**¹⁴, prezidanton de kremaci-amikaro, kaj grandajn sovetiajn transflugojn.

La monarkisto ploregis dormante. Li ne volis vidi amikojn de kremacio. Li volis vidi na Puriŝkeviĉ, plej dekstrulan deputiton de la regna parlamento, patriarkon Tiĥon, urbestron de Jalto Dumbadze, aŭ eĉ iun simplan kontrolanton de popolaj lernejoj. Sed okazis nenio el tio. Sovetia reĝimo enrompiĝis eĉ songojn de la monarkisto.

- Ĉiam samaj songoj! - konkludis Malsanulev per plora voĉo. - Malbenitaj songoj!

- Malbonas via stato, - kunsentis Ostap, - kiel oni diras, estado difinas la konscion. Se vi loĝas en Sovetio, do ankaŭ songoj viaj devas esti sovetiaj.

- Eĉ ne minuto de ripozo, - plendis Malsanulev. - Mi jam pri ĉio konsentas. Se ne Puriŝkeviĉ, do eĉ Milukov. Malgraŭ ĉio tio estas nia homo, kun supera klereco, kaj monarkisto en la animo. Sed ne! Ĉiam tiuj ĉi sovetiaj antikristoj.

- Mi helpos al vi, - diris Ostap. - Jam okazis

14. Fabriko-kuirejo: celis (malsukcese) liberigi dommastrinojn de «neproduktiva hejma preparado de manĝaĵoj».

al mi kuraci amikojn kaj konatulojn laŭ Frojd (Freud). Ne sonĝo gravas. Gravas forigi kaŭzon de la sonĝo. Plej grava kaŭzo estas ekzisto mem de sovetia reĝimo. Sed, ĉi-momente, mi ne povas forigi ĝin. Mi simple ne havas tempon. Ĉu vi scias, mi estas turisto-sportisto, kaj nun mi devas plenumi negravan riparon al mia aŭto, do permesu enruligi ĝin en vian remizon. Sed pri la kaŭzo vi ne maltrankviliĝu. Mi forigos ĝin dum rea vojo. Tuj post pe-o de la aŭtokurado.

La monarkisto, stultiĝinta pro la pezaj sonĝoj, volonte permesis al la simpatia kaj kunsentema juna homo eluzi la remizon. Sur la noktan ĉemizon li surĵetis la palton, vestis galoŝojn sur la nudajn piedojn, kaj eliris post Bender en la korton.

– Do mi povas esperi? – demandis li, rapide paŝetante post sia frumatena gasto.

– Ne dubu, – senzorge respondis la komandanto, – kiam sovetia reĝimo malaperos, vi tuj sentos trankviliĝon. Vi mem vidis tion.

Post duonhoro «Antilopo» estis kaŝita ĉe Malsanulev, kaj lasita al gardo far Kozleviĉ kaj Panikovskij. Bender, kun akompano de Balaganov, ekiris en la urbon por akiri farbojn.

La samlaktaj fratoj iris renkonte al la suno, penetrante centron de la urbo. Sur kornicoj de la domoj promenadis grizaj kolomboj. Lignaj trotuaroj, ŝprucitaj per akvo, estis puraj kaj malvarmetaj.

Al homo kun pura konscienco estas agrable eliri dum tia mateno el la hejmo, halteti minuton ĉe la pordego, elpoŝigi skatoleton da alumetoj, sur kiu estas desegnita avio kun maldeca fingrogesto anstataŭ helico, kaj kun surskribo «Respondo al Kerzon (Curzon)», admire pririgardi freŝan cigaredskatolon, per la incensia fumo fortimigante abelon kun oraj galonoj sur la ventreto.

Bender kaj Balaganov trafis sub influo de la mateno, de puretaj stratoj, kaj de senprofitemaj kolomboj. Por iom da tempo al ili ŝajnis ke ilia konscienco estas pezigita per nenio, ke ĉiuj ŝatas ilin, ke ili estas fianĉoj irantaj al rendezuo kun siaj fianĉinoj.

Subite vojon de la fratoj baris homo kun faldebla pentrostablo kaj polurita kesto por farboj en la manoj. Li aspektis ĝis tiom ekscitita, kvazaŭ ĵus elsaltis el brulanta domo, sukcesinte savi el la flamo nur la pentrostablon kaj la keston.

- Pardonu, - sonore diris li, - ĉi tie ĵus devis trairi kamarado Karno-Kisov. Ĉu vi renkontis lin? Ĉu li iris ĉi tie?

- Ni neniam renkontas tiajn, - malĝentile diris Balaganov.

La pentristo puŝis na Bender je la brusto, diris «pardonu», kaj ekimpetis pluen.

- Karno-Kisov? - grumblis la granda kombinanto, kiu ankoraŭ ne matenmanĝis. - Mi

mem havis konatinon-akuŝistinon kun familinomo Meduza-Gorgoner, sed mi ne faris bruon pri tio, ne kuris sur stratoj kun krioj: «Ĉu vi hazarde vidis civitaninon Meduza-Gorgoner? Ŝi, onidire, promenis ĉi tie». Ha! Karno-Kisov!

Apenaŭ sukcesis Bender pe-i la paroladon, kiam rekte sur lin elsaltis du homoj kun nigraj pentrostabloj kaj poluritaj etudaj kestoj. Tio estis tute diversaj homoj. Unu el ili opiniis ŝajne ke pentristo nepre devas esti multhara kaj, se juĝi laŭ kvanto da survizaĝaj kreskaĵoj, li estis rekta ensovetia anstataŭanto de Henriko la Navar-a. Lipharoj, bukloj kaj barbo tre vigligis lian platan vizaĝon. La alia estis simple kalva, kaj kapo lia estis glita kaj glata kiel vitra lampa lumŝirmilo.

– Kamaradon Karno... – diris anstataŭanto de Henriko Navar-a, anhelante.

– Kisov – aldonis la lumŝirmilo.

– Ĉu vi vidis lin? – elkriis Navara.

– Onidire li promenadas ĉi tie – klarigis la lampoŝirmilo.

Bender deŝovis na Balaganov, kiu jam malfermis la buŝon por eligi insultojn, kaj kun ofenda ĝentileco diris:

– Kamaradon Karno ni ne vidis, sed se la priparolata kamarado vere interesas vin, tiam rapidu. Lin serĉas iu civitano, strat-portretisto laŭaspekte.

Kunkroĉante per la pentrostabloj, kaj

puŝante unu la alian, la pentristoj ekkuris pluen. Samtempe el post la angulo elhastis fiakrista kaleŝo. En ĝi sidis dikulo ĉe kiu sub faldoj de la blua jako diveniĝis ŝvita ventregio. Ĝenerala aspekto de la pasaĝero memorigis antaŭrevolucionan reklamon de patentita ŝmiraĵo, komencanta per vortoj:

«Aspekto de nuda korpo, kovrita per haroj, efikas forpuŝe». Diveni profesion de la dikulo estis facile. Li tenis la manon sur granda ateliero pentrostablo. Ĉe piedoj de la fiakristo kuŝis polurita kesto en kiu sendube troviĝis farboj.

– Hola! – kriis Ostap. – Ĉu vi serĉas na Kisov?

– Ĝuste tiel, – konfirmis la grasa pentristo, plende rigardante na Ostap.

– Rapidu! Rapidu! Rapidu! – kriis Ostap. – Vin avancis jam tri pentristoj. Sed pri kio la afero? Kio okazas ĉi tie?

Tamen la ĉevalo, tondrante per la hufferoj sur la sovaĝaj pavimŝtonoj, jam forportis la kvaran reprezentanton de plastikaj artoj.

– Ĝis kiom kultura urbo! – diris Ostap. – Vi verŝajne rimarkis, Balaganov, ke el kvaroj da renkontitaj per ni civitanoj kvaroj okazis pentristoj. Tre interese.

Kiam la samlaktaj fratoj haltis antaŭ mastruma vendejo, Balaganov flustris al Ostap:

– Ĉu vi ne ĝenas?

– Pri kio? – demandis Ostap.

– Pri tio ke vi intencas pagi pro la farbo per viva mono?

– Ha, vi pri tio, – diris Ostap. – Jes, verdire estas iom ĝene. Certe la situacio estas stulta. Sed kion fari? Ja ne kuru ni en la urbestaron por peti tie farbojn por efektivigo de «Tago de alaŭdo». Ili ja certe donos, sed ni perdos tutan tagon.

Sekaj farboj en ladaj vazoj, vitraj cilindroj, en sakoj, bareletoj kaj en ŝiritaj paperaj pakaĵoj havis allogajn cirkajn kolorojn, kaj donis al la vendejo festan aspekton.

La komandanto kaj la ĉefmekanikisto komencis severe elekti farbon.

– Nigra koloro estas tro funebra, – diris Ostap. – Verda ankaŭ ne taŭgas: tio estas koloro de disfalinta espero. Viola – ne. En viola aŭto veturadas estro de krim-esploro. Roza – vulgara, blua – banala, ruĝa – tro lojala. Do farbu ni na «Antilopo» flavkoloro. Estos iom tro hele, sed bele.

– Sed kio vi estas? – demandis la vendisto, kies mentono estis iomete polvita ruĝe.

– Pentristoj, – respondis Bender, – batalistoj kaj marinistoj.

– Tiam vi eniru ne ĉi tien, diris la vendisto, demetante de la vendotablo pakaĵojn kaj vazojn.

– Kial ne ĉi tien! – kriis Ostap. – Sed kien?

- Transen.

La vendisto alkondukis la amikojn al la pordo, kaj montris permane transstratan elpendaĵon. Tie estis bildigita bruna ĉevala kapo, kaj per nigraj literoj sur blua fono estis skribite: "Aveno kaj fojno".

- En ordo, - diris Ostap, - firmaj kaj molaj nutraĵoj por brutoj. Sed kiel tio rilatas al ni, pentristoj? Mi vidas neniun kunligon.

Tamen la kunligo okazis ege esenca. Ostap trovis ĝin jam en komenco mem de la vendista klarigo.

La urbo ĉiam ŝatis pentroarton, kaj kvaroj da pentristoj, delonge loĝantaj ĉi tie, fondis grupon «Dialektika stablisto». Ili pentris portretojn de respondecaj oficuloj, kaj debitis ilin en lokan muzeon de pentroarto. Post iom da tempo kvanto da nepentritaj respondeculoj signife malpliiĝis, kio senteble malpliigis enspezojn de la dialektikaj stablistoj. Sed tio ankoraŭ estis tolerebla. Jaroj da suferoj komenciĝis de kiam la urbon enveturis nova pentristo, Feofan Muŝo.

Jam unua lia laboro elvokis en la urbo grandan bruon. Tio estis portreto de administranto de la hotela trusto. Feofan Muŝo lasis la stablistojn malantaŭe. Administranto de la hotela trusto estis bildigita nek per karbo, nek per plumba aŭ paŝtela kraĵonoj, nek per akvofarboj, nek per farboj oleaj, guaŝaj, temperaj. La portreto estis ellaborita per aveno.

Kaj kiam pentristo Muŝo per fiakro transportis la pentraĵon en la muzeon, la ĉevalo maltrankvile retrorigardis kaj henis.

Iom post iom Muŝo komencis uzi ankaŭ aliajn cerealojn.

Tondran sukceson havis portretoj el milio, tritiko kaj papavo, kuraĝaj etudoj per maizo kaj fagopiro, pejzaĝoj per rizo.

Nun li laboris pri grupa portreto. Granda kanvaso prezentis kunvenon de Distrikta planejo. Tiun ĉi artaĵon Feofan pretigis per fazeolo kaj pizo. Sed en profundo de sia animo li restis fidela al aveno, kiu faris al li karieron kaj forŝovis de la pozicioj la dialektikajn stablistojn.

– Per aveno ja certe estas pli oportune, – kriis Ostap fiakriste. – Sed Rubens kun Rafael, stultuloj, per oleo penadis. Ankaŭ ni estas stultuloj, samaj al Leonardo da Vinĉi. Donu al ni flavan emajlan farbon.

Kvitiĝante kun la parolema vendisto Ostap demandis:

– Parenteze, kio estas Karno-Kisov? Ni ne estas lokuloj, do ni ne scias.

– Kamarado Kisov estas fama politikisto laboranta en centro, nia samurbano. Nun li alveturis el Moskvo, por forpermeso.

– Ĉio klaras, – diris Ostap. – Dankon pro la informo. Ĝis revido!

Sur la strato la laktaj fratoj ekvidis

dialektikajn stablistojn. Ĉiuj kvar, kun vizaĝoj melankoliaj kaj langvoraj, kiel ĉe ciganoj, staris ĉe vojkruciĝo. Apud ili staraĉis la stabloj, kunigitaj pafil-piramide.

– Kio, soldatetoj, ĉu malbone? – demandis Ostap. – Preterlasis vi na Karno-Kisov?

– Preterlasis ni, – suspiris la pentristoj. – El la manoj mem elglitis li.

– Ĉu Feofan rekaptis? – demandis Ostap, montrante bonan konatecon pri la afero.

– Jam pentras li, fuŝulo, – respondis anstataŭanto de Henriko la Navara. – Per aveno. Al kutima maniero, – li diras, – revenas mi. Plendas li, grenisto, pri recesio de la ĝenro.

– Sed kie troviĝas ateliero de tiu aferulo? – scivolis Ostap. – Mi volus rigardeti.

La pentristoj, kiuj havis multe da libera tempo, volonte kondukis na Ostap kaj na Balaganov al Feofan Muŝo. Feofan laboris en sia ĝardeneto. Antaŭ li, sur tabureto, sidis kamarado Karnov, homo, ŝajne, timida. Li senspire rigardis la pentriston, kiu same al semisto sur tridekrubla bankbileto elkaptis plenmanojn da aveno el plektita korbeto, kaj ĵetis ĝin sur la kanvason. Muŝo sulkis la brovojn. Al li malhelpis paseroj. Ili aroge alflugis la pentraĵon, kaj elbekis el ĝi certajn detalojn.

[Обес и сено \(«Aveno kaj fojno»\)](#)

– Kiom vi ricevos kontraŭ tiu ĉi pentraĵo? –
singene demandis Karnov.

Feofan haltetis la semadon, kritike alrigardis
sian verkon, kaj pripense respondis:– Kio ja! La
muzeo kontraŭ ĝi donos ĉirkaŭ ducent kvindek
rublojn.

– Tamen multe.

– Sed aveno nun, – diris Muŝo kante, –
multekostas. Ja multekostas aveno!

– Nu, kiel prosperas la aŭtun-semado? –
demandis Ostap, enigante la kapon tra reto de
la ĝardeneto. – La semado, mi vidas, iras
sukcese. Cent procente! Sed tio estas
malgravaĵo kompare kun tio kion mi vidis en
Moskvo. Tie unu pentristo faris pentraĵon el
haroj. Grandan pentraĵon kun multaj figuroj,
ideologie, rimarku, konvenan, kvankam la
pentristo uzadis harojn de senpartiuloj, estis tia
peko. Sed ideologie, mi ripetas, la pentraĵo estis
perfekte konvena. Ĝi nomiĝis «Komunuma
traktoro en nokta laboro». Tio estis ĝis tiom
obstina pentraĵo, ke oni eĉ ne sciis kion fari pri
ĝi. Okazadis ke la haroj hirtiĝis. Sed foje ili
griziĝis tute, kaj de la traktoro restis eĉ ne
spuro. Sed la pentristo sukcesis elkapti kontraŭ
la elpenaĵo milon kaj duonon. Tial vi ne tre
delogiĝu, kamarado Muŝo! Via aveno subite
elĝermos, sur la pentraĵo elkreskos spikoj, kaj
vi jam neniam rikoltos plu.

La dialektikaj stablistoj kunsente ekridegis.

Sed Feofan ne konfuziĝis.

– Jes, tio sonas parodokse, – rimarkis li, redaŭrigante la semajn manipulojn.

– Enorde, – informis Ostap, forirante, – semu saĝan, bonan, eternan, kaj tiam oni vidos! Adiaŭ ankaŭ vi, soldatetoj. Forĵetu viajn farbojn. Transiru al mozaiko el ŝraŭbingoj, ŝraŭbetoj, kaj ŝpalaj najlegoj. Portreto el ŝraŭboj! Bonega ideo!

La tutan tagon farbis antilopanoj sian aŭton. Antaŭ vespero ĝi ekestis nereconebla, kaj brilis per ĉiuj subtonoj de ova flavaĵo.

Frumatene de sekvonta tago aliigita «Antilopo» lasis la gastaman remizon, kaj ekmoviĝis suden.

– Bedaŭrindas ke ni ne sukcesis adiaŭi la mastron. Sed li tiel dolĉe dormis, ke mi ne volis vekti lin. Eble li sonĝas finfine kion li tiel longe atendis: metropolito Dvulogij benas oficiulojn de ministerio de popola klerigo dum jubileo de tricentjariĝo de Romanov-dinastio.

Sed samminute de malantaŭe, el la traba dometo, ekaŭdiĝis plora muĝo, konata jam al Ostap.

– La sama sonĝo! – kriaĉis maljuna Malsanulev. Dio, Dio!

– Mi eraris, – rimarkis Ostap. Li ŝajne sonĝis ne metropoliton Dvulogij, sed plenkunsidon de literatura grupo «Forĝejo kaj kamparana korto». Tamen diablo lin prenu! La aferoj vokas nin na

Ĉapitro 9

Denove krizo de la ĝenro

Pri kio ne okupiĝas homoj!

Paralele al granda mondo, en kiu loĝas grandaj homoj kaj grandaj aĵoj, ekzistas eta mondo kun etaj homoj kaj etaj aĵoj. En granda mondo estas inventita dizel-motoro, verkita romano «Mortaj animoj», konstruita Dnepra hidrostacio, kaj efektivita ĉirkaŭmonda flugo. En eta mondo estas inventita krianta veziko «ŭi-ŭi», verkita kanteto «Briketoj», kaj konstruita pantalono de fasono «politik-reprezentanto». En granda mondo homojn movas strebo prifeliĉigi homaron. Eta mondo estas malproksima de tiuj altaj materioj. Ĝiaj loĝantoj strebas nur elvivi ne sentante malsaton.

Etaj homoj hastas post la grandaj. Ili komprenas ke devas esti kongruaj kun la epoko, ĉar nur tiam ilia varaĉo povos trovi debiton. Dum la sovetia tempo, kiam en la granda mondo estas kreitaj ideologiaj solidaĵoj, en eta mondo rimarkiĝas vigliĝo. Sub ĉiujn inventetojn de la formika mondo oni subigas granitan bazon de «komunisma» ideologio. Sur veziko «ŭi-ŭi» oni bildigas na Ĉemberlen, tre similan al ties portreto en «Novaĵoj». En unu populara kanteto saĝa laboristo, por akiri amon de juna komunistino, dum tri refrenoj plenumas kaj eĉ

superplenumas industri-financan planon. Kaj dum en la granda mondo iras furioza disputo pri aspekto de nova vivstilo, en eta mondo ĉio jam estas preta: estas kravato «Revo de labor-avangardulo», gipsa skulptaĵeto «Baniĝanta kolĥozino» kaj inaj korkaj subbrakaĵoj «Amo de abeloj laboraj».

Ankaŭ sferon de rebusoj, ŝaradoj, ŝaradoidoj kaj enigmaj bildoj eniris jam novaj influoj. Labori malnovmaniere ekestis nemode. Estroj de ĵurnalaj aŭ revuaj sekcioj «En horoj de libera tempo» aŭ «Movu la cerban kurbaĵon» decide ĉesis preni senideologian varon. Kaj dum la giganta lando bruis, dum oni konstruis traktor-uzinojn, kaj kreis grandiozajn gren-fabrikojn, maljunulo Sinickij, rebusisto laŭ profesio, sidis en sia ĉambro kaj, fiksrigardante la plafonon per siaj vitriĝintaj okuloj, verkis ŝaradon pri moda vorto «industriigo».

Sinickij aspektis kiel gnomo. Pentristoj, kutime, figuras tiajn gnomojn sur elpendaĵoj de ombrel-vendejoj. La elpendaĵaj gnomoj staras en ruĝaj pintaj ĉapoj, kaj amike okulumas la pasantojn, kvazaŭ invitante ilin tuj aĉeti silkan ombrelon aŭ irbastonon kun silvera tenilo en formo de hunda kapo. Longa flaveta barbo de Sinickij sinkis sub la tablon, en la paperkorbon.

– Industriigo (ruse: industrializacija), – malĝoje flustris li, movante la maljunulajn lipojn, palajn kiel krudaj kotletoj.

Kaj kutimmaniere li dividis la vorton (indus-tri-ali-za-cija) je ŝaradajn partojn:

– Indus. Tri. Ali. Za...

Ĉio iris bonege. Sinickij jam imagis al si pompan ŝaradon, signifoplenan laŭ enhavo kaj malfacilan por diveno. Problemis nur ĝia lasta parto: «cija».

– Kio estas tiu ĉi «cija»? – streĉiĝis la maljunulo. Se tio estus «ákcija» (= akcio), tiam estus perfekte: indus-tri-ali-z-ákcija.

Turmentiĝinte duonhoron kaj ne elpensinte kion fari pri la kaprica finaĵo Sinickij decidis ke la finaĵo venos memstare, kaj ekis labori. Li komencis verki sian poemon sur paĝo elŝirita el librotenista kajero kun surskribo «debeto».

Tra blanka vitrizita pordo de la balkono videblis florantaj akacioj, flikitaj tegmentoj de domoj, kaj klara blua linio de mara horizonto. Nigramarska tagmezo superverŝis la urbon per glua varmego.

La maljunulo pripensis kaj surpaperigis la unuajn liniojn:

**Silab' unua, en turban',
en lando loĝas orienta.**

(**indus** [**hindo**]-tri-ali-za-cija.)

– En lando loĝas orienta, – plezure prononcis la maljunulo.

Al li plaĉis la verkaĵo, malfacilis nur trovi rimon por vortoj «turban'» kaj «orienta». La

rebusisto iradis tra la ĉambro kaj tuŝis per la manoj sian barbon. Subite venis ideo:

**Silabon duan konas mi,
ja estas ĝi cifere aŭtenta.**

(indus-**tri** [**tri**]-ali-za-cija.)

Ankaŭ pri «Ali» kaj «Za» li sukcesis:

**Silabo tria, en turban',
Ĝi same loĝas oriente.
Silabo kvara, helpu Di',
ĝi estas ja prepozici'.**

(indus-tri-**ali** [**virnomo**]-**za** [**post'**]-cija.)

Lacigita pro la lasta streĉo Sinickij apogis sin je dorso de la seĝo, kaj fermis la okulojn. Li estis jam sepdekjara. Dum kvindeko da jaroj li verkis rebusojn, ŝaradojn, enigmajn desegnojn kaj ŝaradoidojn. Sed neniam al la estimata rebusisto estis tiel malfacile. Li malavanciĝis de la okazaĵoj, estis politike analfabeta, kaj junaj konkurantoj superadis lin tre facile. Ili alportis en redakciojn enigmojn kun tiom perfekta ideologia bazo, ke la maljunulo, legante ilin, ploris pro envio. Li ne povis superi tiun, ekzemple, problemon:

ENIGMO-ARITMETIKOIDO

En tri stacioj: Pasera, Frugilega kaj Kornika estis po sama kvanto da laborantoj. Sur stacio Kornika estis sesfoje malpli da junaj komunistoj ol en du aliaj stacioj kune, kaj en stacio Pasera partianoj estis je 2 homoj pli multaj ol en stacio

Frugilega. Sed en tiu ĉi lasta estis je 6 senpartianoj pli ol en aliaj du. Kiom da laborantoj estis en ĉiu el la stacioj, kaj kiom da partianoj kaj junkomunistoj estis tie?

Rekonsciiĝinte de siaj malgajaj pensoj la maljunulo denove prenis la folion kun surskribo "debeto", sed en tiu ĉi minuto la ĉambron eniris junulino kun malsekaj tonditaj haroj, kaj kun nigra bana kostumo sur la ŝultro.

Ŝi silente eniris la balkonon, pendigis la malsekan kostumon sur la defarbiĝintan parapeton, kaj ekrigardis soben. La junulino ekvidis malriĉan korton, kiun ŝi vidis jam multajn jarojn: almozan korton kie kuŝaĉas disbatitaj kestoj, vagas malpuraj pro karbo katoj, kaj ladisto tondre riparas sitelon. En tera etaĝo dommastrinoj konversaciis pri sia malfacila vivo.

Tiujn ĉi konversaciojn la junulino aŭdis jam ne unuan fojon, ankaŭ nomojn de la katoj ŝi konis, kaj la ladisto, kiel ŝajnis al ŝi, riparas tiun ĉi sitelon jam multajn jarojn seninterrompe. Zosja Sinickaja revenis la ĉambron.

- Ideologio turmentas, - aŭdis ŝi balbuton de la avo, - sed ĉu povas en rebusa afero troviĝi ideologio? Rebusa afero...

Zosja enrigardis la maljunulan fuŝskribaĵon, kaj tuj elkriis:

- Kion vi skribis ĉi tie? Kio estas tio? «Silabo kvara, helpu Di', ĝi estas ja prepozici».

Kial Di'? Ja vi mem diris ke redakcioj ne prenas nun ŝaradojn kun preĝejaj esprimoj.

Sinickij aĥis. Kriante: «Kie estas Dio, kie, ne estas ĉi tie Dio», li per la tremantaj manoj surtiris la okulvitrojn en blankaj kadroj, kaj kaptis la folion.

– Estas Dio, – diris li aflikte. – Troviĝas... Denove mi eraris. Aĥ, kiom bedaŭre! Ĉar bona rimo defalas.

– Enigu vi na «sort'» anstataŭ «Di'», – diris Zosja.

Sed timigita Sinickij rifuzis de «sort'».

– Ankaŭ tio estas mistiko. Mi scias. Ho kiel mi eraris! Do kio nun estos, Zosja?

Zosja indifere alrigardis la avon kaj konsilis verki alian ŝaradon.

– Nenion vi perdas, – diris ŝi, – vorto kun finaĵo «cija» ne prosperas al vi. Ĉu vi memoras kiom vi turmentis pri vorto «elektrofikacija» (elektrigo)?

– Kial ne, – vigliĝis la maljunulo, – tria silabo tiam estis «kac», kaj mi skribis tiel: «Silabo tria, sankta Galilejo! signifas oftan nomon de hebreo». Ne prenis ili la ŝaradon. Diris: «malforta, ne taŭgas». Eraris mi!

Kaj la maljunulo, eksidinte ĉe sia tablo, komencis prilabori grandan, ideologie ĝustan rebuson. Antaŭ ĉio li vigle desegnis anseron, kiu tenis en la beko literon (rusan) "Г", grandan kaj pezan kiel pendumilo. La laboro progresis.

Zosja komencis surtabligi por la tagmanĝo. Ŝi iris de telerŝranko kun spegulaj ŝipfenestretoj al la tablo, kaj metis manĝilaron. Aperis fajenca porsupa vazo kun derompitaj teniloj, teleroj kun kaj sen floroj, flaviĝintaj forkoj, kaj eĉ kompotujo, kvankam al la tagmanĝo antaŭvideblis neniu kompoto.

Stato de Sinickij-familio, entute, estis malbona. Rebusoj kaj ŝaradoj venigis en la hejmon pli da ekscitoj ol da mono. Hejmaj tagmanĝoj, kiujn la maljuna rebusisto prezentis al la konataj civitanoj, kaj kiuj estis ĉefa parto de la familia enspezo, ankaŭ ne prosperis. Podvisotskij kaj Bomze forveturis forpermesi, Seĝjan edziniĝis je grekino, kaj komencis tagmanĝi hejme, kaj na Almozulov oni maldungis el la oficejo laŭ dua kategorio, do, pro la eksciteco, li perdis la apetiton. Nun li vagadis tra la urbo, haltis konatulojn, kaj prononcis la saman frazon, plenan per kaŝita sarkasmo: «Ĉu vi aŭdis la novaĵon? Oni elpurigis min laŭ dua kategorio». Iuj el la konatuloj kunsente respondis: «Jen kion alfaraĉis tiuj ĉi Marks kaj Engels!». Kaj iuj respondis nenion, strabis na Almozulov per sia fajra okulo, kaj preterhastis, skuante la paperujojn. Do el ĉiuj tagmanĝuloj restis unu, sed ankaŭ li ne pagis jam semajnon, klarigante tion per prokrasto de la salajro.

Malkontente movinte la ŝultrojn Zosja eniris

la kuirejon kaj, kiam ŝi revenis, ĉe la manĝotablo sidis jam lasta manĝulo: Aleksandr Ivanoviĉ Korejko.

Ekster la oficejo Aleksandr Ivanoviĉ ne ŝajnis homo timida kaj humila. Tamen lian vizaĝon eĉ ne por minuto lasis singardema mieno. Nun li atente pririgardis novan rebuson de Sinickij. Inter aliaj enigmaj desegnoj tie estis desegnita papersako, el kiu ŝutiĝis literoj "To", abio, el de post kiu eliris suno, kaj pasero, sidanta sur nota linio. La rebuso finiĝis per renversita komo.

– Tiu ĉi rebuso ne estas facile divenebla, – diris Sinickij, promenante apud la manĝulo. – Longe vi devos peni pri ĝi.

– Devos mi, devos, – respondis Korejko kun smajlo, – jen la ansero konfuzas min. Por kio ja tiu ĉi ansero? A-a-a! Prete! «La rajtojn por vi en luktad' vi akiros», ĉu?

– Je-es, – elreviĝe tiris la maljunulo, – kiel vi divenis tiel rapide? Talentulo. Tuj oni vidas kontiston de unua kategorio.

– De dua, – korektis Korejko. – Sed por kio vi tiun ĉi rebuson verkis? Ĉu por publikigo?

– Por publikigo.

– Kaj tute vane, – diris Korejko, scivole rigardante la barĉon, en kiu naĝis oraj medaloj da graso. Estis en tiu ĉi barĉo io merita, io suboficira. – «La rajtojn por vi en luktad' vi akiros» – tio estas slogano de iamaj socialistoj-

revoluciuloj. Por publikigo tio ne taŭgas.

- Dio mia, - ĝemis la maljunulo, -
Dipatrino! Denove eraro. Ĉu vi aŭdas, Zosja?
Eraris mi. Do kion fari nun?

Ili trankviligis la maljunulon. Malatente
manĝinte li leviĝis, kolektis la enigmojn,
verkitajn dum la semajno, surkapigis la ĉevalan
pajlan ĉapelon kaj diris:

- Nu, Zosja, iru mi en «Junularaj novaĵoj».
Iom maltrankviliĝas mi pri la algebroido, sed,
entute, monon mi tie akiros.

En junkomunista revuo «Junularaj novaĵoj»
oni ofte malakceptis verkojn de la maljunulo,
insultetis lin pro la malbona kono de nuntempo,
tamen ne ofendis, kaj tiu ĉi revuo estis sola loko
el kiu al la maljunulo lirlis eta mona fonteto.
Sinickij kunprenis ŝaradon, komenciĝantan per
vortoj: «Silab' unua sur marfundo kuŝas», du
kolĥozajn lotogrifojn, kaj unu algebroidon kiu,
post tre komplikaj multiplikoj kaj dividoj pruvis
avantaĝon de sovetia reĝimo antaŭ ĉiuj aliaj
reĝimoj.

Kiam la rebusisto foriris, Aleksandr Ivavoviĉ
komencis malserene pririgardi na Zosja.
Komence Aleksandr Ivanoviĉ tagmanĝis ĉe
Sinickij familio ĉar manĝaĵoj tie estis
malmultekostaj kaj bongustaj. Krom tio plej
baza lia regulo estis eĉ ne por minuto forgesi ke
li estas nur eta oficisto. Li ŝatis paroli pri tio kiel
malfacilas vivi en granda urbo per la almoza

salajro. Sed antaŭ iom da tempo prezo kaj gusto de la tagmanĝoj perdis por li tiun abstraktan kaj elmontran signifon kiun li atribuis al ili. Se oni postulus de li, kaj se li povus fari tion senkaŝe, tiam li pagus por la tagmanĝo ne sesdek kopekojn, kion li faris nun, sed tri aŭ eĉ kvin mil rublojn.

Aleksandr Ivanoviĉ, asketo, konscie turmentanta sin per financaj ĉenoj, malpermesanta al si tuŝi ĉion kio kostas pli ol duonrublo, kaj samtempe ekscitita per tio ke pro timo perdi milionojn li ne povas libere elspezi centon da rubloj, enamiĝis kun tiu decidemo, al kiu kapablas homo forta, rigora, kaj malicigita per senfina atendado.

Hodiaŭ, finfine, li decidis deklari al Zosja pri siaj sentoj, kaj proponi al ŝi sian manon, kie batiĝas pulso eta kaj malica kiel furo, kaj sian koron, kuntiritan per fabelaj ringoj.

– Jes, – diris li, – jen kiaj aferoj, Zosja Viktorovna.

Farinte tiun ĉi informon, civitano Korejko kaptis de la tablo cindrujon, sur kiu estis skribita antaŭrevolucia slogano: «Edzo, ne kolerigu la edzinon», kaj komencis atente enrigardi ĝin.

Ĉi tie oni devas klarigi ke ne ekzistas en mondo junulino, kiu ne scius minimume antaŭ semajno pri pretiĝanta eldiro de la sentoj. Tial Zosja Viktorovna zorgeme suspiris, haltinte

antaŭ la spegulo. Ŝi havis tiun sportan aspekton kiun dum lastaj jaroj akiris ĉiuj belaj junulinoj. Kontrolinte tiun ĉi cirkonstancon ŝi eksidis kontraŭ Aleksandr Ivanoviĉ, kaj prepariĝis aŭskulti. Sed Aleksandr Ivanoviĉ diris nenion. Li konis nur du rolojn: de oficisto kaj de kaŝmilionulo. Trian li ne konis.

– Ĉu vi aŭdis novaĵon? – demandis Zosja. – Oni elpurigis na Almozulov.

– Ankaŭ ĉe ni komenciĝis la purigado, – respondis Korejko, – multaj forflugos. Ekzemple Lapidus-juna. Ankaŭ Lapidus-maljuna, verŝajne...

Ĉi tie Korejko rimarkis ke iras sur pado de malriĉa oficisto. Plumba enpenŝiĝo denove ekposedis lin.

– Jes, – diris li, – vivas mi tiel, sole, ne konante delicojn.

– Kion, kion ne konante? – vigliĝis Zosja.

– Ne konante virinan proksimecon, – rimarkis Korejko per premita voĉo.

Trovinte neniun subtenon de flanko de Zosja li disvolvis sian penson.

Li estas jam maljuna. Tio estas ne maljuna, sed ne juna. Kaj eĉ ne tio ke ne juna, sed simple tempo pasas. Pasas jaroj. Kaj tiu ĉi movo de tempo sugestas al li diversajn pensojn. Pri edziĝo, ekzemple. Oni ne pensu ke li estas iel tia. Li estas bona, entute. Tute senofendiga homo. Oni devas bedaŭri lin. Kaj al li ŝajnas eĉ

ke oni povas lin ami. Li ne estas dandaĉo, kiel aliaj, kaj ne ŝatas disĵeti la vortojn. Kial do certa junulino ne konsentu edziniĝi kun li?

Espriminte siajn sentojn en tia nekuraĝa formo, Aleksandr Ivanoviĉ kolere alrigardis na Zosja.

– Ĉu vere oni povas elpurigi na Lapidus-juna? – demandis nepino de la rebusisto.

Kaj, ne ricevinte respondon, ŝi ekparolis pri la afero.

Ŝi bonege komprenas ĉion. Estas vero ke tempo iras terure rapide. Antaŭ tiom nelonge ŝi estis dek-naŭ-jara, sed nun ŝi estas jam dudek-jara. Kaj post unu jaro ŝi estos dudek-unu-jara. Ŝi neniam opiniis ke Aleksandr Ivanoviĉ estas ia ne tia. Inverse, ŝi estas certa ke li estas bona. Pli bona ol multaj aliaj. Kaj certe li indas ĉion. Sed ĝuste nun ĉe ŝi estas iuj serĉoj, ŝi mem ankoraŭ ne scias kiuj. Se paroli entute, ŝi nuntempe ne povas edziniĝi kun li. Kaj kia vivo okazos ĉe ili? Ĉe ŝi estas serĉoj. Kaj ĉe li, se diri honeste kaj malkaŝe, nur kvardek-ses-rubla salajro. Kaj, krome, ŝi ankoraŭ ne amas lin, kio, se paroli entute, tre gravas.

– Kiuj kvardek ses rubloj! – per terura voĉo diris subite Aleksandr Ivanoviĉ, ekstarante plentature, – Ĉe mi... al mi...

Li nenion diris plu. Li ektimis. Komenciĝis rolo de milionulo, kaj tio povis finiĝi nur per perejo. Lia timo estis tiom forta, ke li komencis

eĉ balbuti ion pri tio ke ne mono alportas feliĉon. Sed tiutempe post la pordo ekaŭdiĝis ies snufado. Zosja elkuris en la koridoron.

Tie staris la avo en sia granda ĉapelo, brilanta per pajlaj kristaloj. Li ne decidiĝis eniri. Pro la malfeliĉo lia barbo disiĝis kiel balailo.

– Kial tiel rapide? – kriis Zosja. – Kio okazis?

Снова кризис жанра («Denove krizo de ĝenro»)

La maljunulo levis sur ŝin la okulojn plenajn de larmoj.

Timigita Zosja kaptis la maljunulon je la pikaj ŝultroj, kaj entiris lin en la ĉambron. Duonhoron kuŝis Sinickij sur la sofo kaj tremis.

Post longaj petegoj la avo komencis rakonti.

Ĉio estis bonega. Redakcion mem de «Junularaj novaĵoj» li atingis sen iuj ajn aventuroj. Fakestro de «Cerbaj ekzercoj» renkontis la rebusiston ege ĝentile.

– Manon li donis al mi, Zosja, – suspiris la maljunulo. – Sidu, – diras li, – kamarado Sinickij. Kaj ĉi tie li surprizis min. Sed nian fakon, – diras li, – oni fermas. Venis nova redaktoro kaj deklaris ke niaj legantoj ne bezonas cerbajn ekzercojn, sed bezonas ili, Zosja, specifan fakon pri damludo. Sed kio nun estos, demandas mi. Ja nenio, diras la estro, nur tio ke ne estos via materialo prenita. Sed la ŝaradon mian li laŭdis. Vere, diras li, kvazaŭ ĉe

Puŝkin. Precipe tiun ĉi lokon: «Silab' unua sur marfundo kuŝas, silabo dua same sur marfundo».

La maljuna rebusisto ankoraŭ longe konvulsiiĝis sur la sofo, kaj plendis pri superpremo de soveta ideologio.

– Denove dramo! – kriis Zosja.

Ŝi surkapigis la ĉapeleton, kaj direktiĝis al la eliro. Aleksandr Ivanoviĉ ekmoviĝis post ŝi, kvankam li komprenis ke pli bone estus ne iri.

Sur la strato Zosja prenis brakon de Korejko sub sian brakon:

– Ni tamen amikados. Ĉu?

– Pli bone estus se vi konsentus edziniĝi kun mi, – malkaŝe elgrumblis Korejko.

En vaste malfermitaj bufedoj de artefaritaj mineralaj akvoj amasiĝis junaj homoj sen ĉapeloj, en blankaj ĉemizoj kun manikoj, kuspitaj post la kubutojn. Bluaj sifonoj kun metalaj kranoj staris sur la bretoj. Longaj vitraj cilindroj kun siropoj sur turniĝebla bazo flagretis per apoteka lumo. Persoj kun ĉagrenaj vizaĝoj rostis nuksojn sur la karbujoj, kaj la haladza fumo allogis la promenantojn.

– En kinejon mi volas, – kaprice diris Zosja.

– Nuksojn mi volas, gasakvon kun siropo.

Korejko estis preta je ĉio por Zosja. Li eĉ decidiĝus iom rompeti sian konspiron, elspezante ĉirkaŭ kvin rublojn por la diboĉo. En lia poŝo, en plata fera skatoleto de cigaredoj

«Kaŭkazo» kuŝis nun dek mil rubloj per ducent-kvindek-rublaj bankbiletoj. Sed eĉ se li freneziĝus, kaj decidus evidentigi eĉ unu bankbileton, oni povus monŝanĝi ĝin en neniu kinejo.

– La salajron oni prokrastas, – diris li en plena malespero, – oni elpagas ĝin ekstreme neakurate.

En tiu ĉi minuto el amaso de la promenantoj deiris juna homo en belegaj rimen-ŝuoj sur nuda piedo. Li salutis na Zosja suprenigante la manon.

– Saluton, saluton, – diris li, – mi havas du senpagajn biletojn en la kinejon. Ĉu vi volas? Sed momente.

Kaj la juna homo en la rimarkindaj rimenŝuoj enlogis na Zosja sub nebrilan elpendaĵon de la kinejo, kiu antaŭe nomiĝis «Kvo vadis».

Tiun ĉi nokton la kontoristo-milionulo ne dormis hejme. Ĝis la mateno mem li vagis tra la urbo, stulte pririgardis fotografaĵojn de nudetaĵ beboj en vitrinoj de fotografistoj, disĵetis per la piedoj gruzon sur la bulvaroj, kaj rigardis nigran abrupton de la haveno. Tie konversaciis nevideblaj ŝipoj, aŭdiĝis fajfoj de policistoj, kaj turniĝis ruĝa lumtura lumeto.

– Malbenita lando! – murmuris Korejko. – Lando en kiu milionulo ne povas venigi sian fianĉinon en kinejon.

Zosja jam ŝajnis al li fianĉino.

Mateniĝe, blankiĝinta pro la sendormo, Aleksandr Ivanoviĉ envagis la urban limkvartalon. Kiam li iris sur Besarabia strato, li ekaŭdis sonojn de «maĉiŝ». Mirigita li haltis.

Renkonte al li de la deklivo malsupreniĝis flava aŭto. Ĉe la stirilo, kliniĝinte, sidis laca ŝoforo en leda jako. Apud li dormetis larĝŝultra bubo, pendigante flanken la kapon en ĉapelo kun truetoj. Sur malantaŭa sidloko liberpoze sidis ankoraŭ du pasaĝeroj: fajrobrigadisto en plena libertempa uniformo, kaj atletik-statura viro en mara kaskedo kun blanka supro.

– Saluton al unua Nigramarskano! – kriis Ostap, kiam la aŭto kun traktora bruego preterkuris na Korejko. – Ĉu varmaj enmaraj banadoj ankoraŭ funkcias? Ĉu funkcias la urba teatro? Ĉu oni jam deklaris na Nigramarsk libera urbo?

Sed Ostap ne ricevis respondon. Kozleviĉ malfermis la dampilon, kaj «Antilopo» dronigis la unuan Nigramarsk-anon en nuboj da blua fumo.

– Nu, – diris Ostap al rekonsciiĝinta Balaganov, – la kunsido daŭriĝas. Donu al mi tiun ĉi vian kaŝan Rokfeler (Rockefeller). Nun mi komencos senvestigi lin. Ho tiuj ĉi princoj kaj almozuloj!

Parto dua

Ĉapitro 10

Telegramo de fratoj Karamazov

De iu tempo la kaŝ-milionulo eksentis sur si ies konstantan atenton. Komence okazis nenio konkreta. Malaperis nur kutima kaj trankvila sento de soleco. Poste ekis evidentiĝi signoj pli timigaj.

Foje, kiam Korejko per ordinara ritma paŝado iris al sia oficejo, ĉe «**Herkules**»¹⁵ mem haltis lin impertinenta almozulo kun ora dento. Surpaŝante tiriĝantajn post si laĉojn de la kalsonoj, la almozulo kaptis na Aleksandr Ivanoviĉ je la brako, kaj rapide ekbalbutis:

– Milionon, donu milionon, milionon donu!

[Дай миллион!](#) («Donu milionon!»)

Post tio la almozulo eligis la dikan malpuran langon, kaj ekparolaĉis tute sence. Tio estis ordinara almozulo, kiuj ofte renkontiĝas en sudaj urboj, tamen Korejko leviĝis al si, en finac-kalkulan halon, kun konsternita animo. De tiu ĉi renkonto komenciĝis mistikaĵoj.

Oni vekis na Aleksandr Ivanoviĉ je la tria

15. Herkules: ruslingve vorto «Herkules» (Геркулес) signifas Herkulo. Samtempe ĝiaj tri lastaj literoj («les») signifas ruse «arbaro; arbaĵoj», aludante okupon de la entrepreno pri lignaĵ-produktoj.

nokte. Venis telegramo. Frapante per la dentoj pro la matena malvarmeto, la milionulo malfermis la sendaĵon kaj tralegis:

grafino kun ŝanĝita vizaĝo kuras laĝeto

- Kiu grafino? - senraciigite flustris Korejko, starante nudpieda en la koridoro.

Sed respondis neniu. La poŝtisto foriris. En la korta ĝardeneto pasie muĝis kolomboj. La loĝantoj dormis. Aleksandr Ivanoviĉ ĉirkaŭrigardis la grizan blankon. Adreso estis ĝusta. Ankaŭ la familinomo.

eta tanĝanta 16 al aleksandr korejko grafino kun ŝanĝita vizaĝo kuras laĝeto

Aleksandr Ivanoviĉ komprenis nenion, sed tiomgrade maltrankviliĝis, ke pe-bruligis la telegramon en kandela flamo.

Je la deksepa tridek kvin, de sama tago venis dua sendaĵo:

la kunsido daŭriĝas komo miliono da kisoj

Aleksandr Ivanoviĉ paliĝis pro la kolero, kaj disŝiris la telegramon je pecetoj. Sed samnokte oni alportis ankoraŭ du urgajn telegramojn.

La unua:

ŝarĝu oranĝojn bareloj fratoj karamazov

Kaj la dua:

glacio ekmoviĝis komo la paradon

Post tio na Aleksandr Ivanoviĉ trafis ofenda okazo en la laborejo. Multiplikante mense, laŭ peto de Ĉevaĵevskaja, naŭcent okdek kvin je dek tri, li eraris kaj diris malĝustan produton, kio okazis al li neniam antaŭe. Sed nun ne aritmetikaj ekzercoj estis gravaj al li. La frenezaj telegramoj ne lasis lin trankvila.

– Bareloj, – flustris li, rigardante maljunulon Kukuŝkind. – Fratoj Karamazov. Vera porkaĵo.

Li penis trankviligi sin per penso ke tio estas agrablaj ŝercoj de iuj amikoj, sed ekestis necese tuj forĵeti tiun ĉi version. Li ne havis amikojn. Koncerne la kunlaborantoj, tio estis homoj seriozaj, kaj ŝercis ili nur foje jare: la unuan de aprilo. Ankaŭ dum tiu ĉi tago de gajaj petoloj kaj mistifikoj ili operaciis nur per sama malgaja ŝerco: fabrikis, per tajpilo, falsan ordonon pri maldungo de Kukuŝkind, kaj metis ĝin sur ties tablon. Kaj ĉiufoje dum lastaj sep jaroj la maljunulo kaptis la koron, kio tre ridigis ĉiujn. Krom tio ili estis ne tiom riĉaj por elspezi por urgaj sendaĵoj.

Post telegramo en kiu nekonata civitano informis ke la paradon komandos ĝuste li, kaj neniu alia, oni ne maltrankviligis na Aleksandr Ivanoviĉ dum tri tagoj. Li jam komencis kutimiĝi al penso ke ĉio okazinta neniom rilatas lin, kiam venis dika registrita pakaĵo. Ĝi enhavis libron nomatan «Kapitalismaj ŝarkoj» kun subtitolo:

«Biografioj de usonaj milionuloj».

Alitempe Korejko mem aĉetus tiun atentokaptan libron, sed nun li eĉ grimaciĝis pro teruro. La unua frazo estis substrekita per blua krajono kaj tekstis:

«Ĉiuj grandaj nuntempaj riĉaĵoj estas akiritaj per plej malhonestaj rimedoj».

Aleksandr Ivanoviĉ decidis ke ne valoras dume viziti la karan enstacidoman valizeton. Lia animstato estis sufiĉe alarma.

– Plej gravas, – diris Ostap, promenante en vasta ĉambro de hotelo «Karlsbad», – enigi panikon en tendaron de la kontraŭulo. La malamiko devas perdi la animan ekvilibron. Fari tion estas facile. Homojn pli ol io alia timigas nekomprenaĵoj. Mi mem foje estis mistikulo-solulo, kaj venis ĝis tiu stato ke oni povus timigi min per ordinara ponardo. Jes, jes. Pli da nekomprenaĵoj. Mi estas certa ke mia lasta telegramo «Mense ni estas kunaj» skue impresis nian kontraŭagenton. Ĉio ĉi estas superfosfato, sterko. Li maltrankviliĝu. Oni devas alkutimigi la klienton al penso ke li endas fordoni la monon. Oni devas morale senarmigi lin, sufoki en li reakciajn proprajajn instinktojn.

Elparolinte tion Bender severe ekrigardis siajn subulojn. Balaganov, Panikovskij kaj Kozleviĉ sidis sur ruĝaj pluŝaj brakseĝoj, provizitaj per franĝoj kaj kvastoj. Ili ĝenis. Ilin

konfuzis la vivmaniero de la komandanto, konfuzis orizitaj lambrekinoj, tapiŝoj, radiantaj per helaj kemiaj koloroj, kaj gravuraĵo «Revelacio de Kristo antaŭ la popolo». Ili, kune kun «Antilopo», loĝis en kamparan-gastejo, kaj venis en la hotelon nur por ricevi instrukciojn.

- Panikovskij, - diris Ostap, - al vi estis komisiite renkonti hodiaŭ nian klienton, kaj denove peti de li milionon, akompanante la peton per idiota rido, ĉu?

- Tuj kiam li ekvidis min, li transiris sur kontraŭan trotuaron, -memkontente respondis Panikovskij.

- Bone. Ĉio iras korekte. La kliento komencas nervoziĝi. Nun li trairas de stulta nekompreneo al senkaŭza timo. Mi ne dubas ke nokte li leviĝas salte en sia lito kaj plende balbutas «Panjo, panjo». Ankoraŭ iom, vera malgravaĵo, lasta penik-frapo, kaj li maturiĝos ĝisfine. Kun ploro rampos li al la telerŝranko, kaj elprenos el ĝi telereton kun blua bordero...

Ostap okulumis al Balaganov, Balaganov okulumis al Panikovskij, Panikovskij okulumis al Kozleviĉ, sed malgraŭ tio ke honesta Kozleviĉ komprenis tute nenion, ankaŭ li komencis palpebrumi per la ambaŭ okuloj.

Kaj ankoraŭ longe en ĉambro de hotelo «Karlsbad» daŭriĝis la amika okulumado, akompanata per elridoj, langoklakoj, kaj eĉ saltado en la ruĝaj pluŝaj brakseĝoj.

- Ĉesu la ĝojon! - diris Ostap. - Dume la telereto kun la mono troviĝas en manoj de Korejko, se ĝi vere ekzistas, tiu ĉi mirakla telereto.

Poste Bender forsendis na Panikovskij kaj Kozleviĉ en la kamparan-gastejon, ordonante teni na «Antilopo» preta.

- Nu, Ŝura, - diris li, restinte kun Balaganov, - telegramoj ne estas jam bezonataj. La preparan labonon oni povas opinii pe-ita. Komenciĝas aktiva lukto. Nun ni iru rigardi la trezoran bovidon ĉe plenumo per li siaj oficaĵ taskoj.

Tenante sin en travidebla ombro de akacioj, la laktaj fratoj trairis la urban ĝardenon, kie supraĵo de dika fontan-ŝpruco degelis kiel kandelo; preteriris kelkajn spegulajn bierejojn, kaj haltis sur angulo de strato Mering. Floristinoj kun ruĝaj matrosaj vizaĝoj banis sian teneran varon en emajlitaj pelvoj. Asfalto, varmiĝinta pro suno, siblis sub la piedoj. El blua kahela laktejo eliris civitanoj, viŝante dumire la lipojn malpurigitajn per kefiro.

Dikaj makaroniaĵ literoj el ligna oro, ordigantaj vorton «Herkules» brilis alloge. Suno saltis sur grandegaj vitroj de la turniĝanta pordo. Ostap kaj Balaganov eniris la vestiblon, kaj miksiĝis kun homamaso da aferaj homoj.

Ĉapitro 11

Herkulesanoj

Ĉiuj penoj de ofte ŝanĝataj estroj elpeli el «Herkules» la hotelan spiriton estis vanaj. Kiom ajn la mastrumistoj superfarbis la malnovajn surskribojn, ili tamen elrigardis de ĉie. Jen, en venda fako, elsaltis vorto: "Kabinetoj", jen subite, sur vitra netravedebla pordo de tajpa fako rimarkiĝis filigranaj signoj "Deĵora ĉambristino", foje evidentiĝis oraj montraĵaj fingroj desegnitaj sur la muroj, kun franca teksto "Por damoj". La hotelo elŝiriĝis eksteren.

Oficistoj negravaj okupis unurublajn ĉambrojn de la kvara etaĝo kie, siatempe, gastis vilaĝaj pastroj, venintaj al regionaj konferencoj, aŭ etaj vetur-agentoj kun varsoviaj lipharetoj. Tie ankoraŭ odoris subbrakoj, kaj staris rozkoloraj feraj lavtabloj. En ĉambroj pli puraj, kien enveturis bilardaj reĝoj kaj provincaj dramaj aktoroj, lokiĝis estroj de sekcioj, iliaj helpantoj kaj mastrumestro. Ĉi tie estis jam pli bone: staris vestaj ŝrankoj kun speguloj, kaj la planko estis kovrita per rufa linoleumo. En luksaj ĉambroj kun bankuvoj kaj alkovoj nestiĝis la estraro. En blankaj bankuvoj kuŝaĉis paperujoj, kaj en duonlumaj alkovoj pendis diagramoj kaj skemoj, demonstrantaj strukturon de «Herkules», kaj ankaŭ ĝiajn ligojn kun periferio. Ĉi tie konserviĝis stultaj orumitaj sofetoj, tapiŝoj, kaj noktaj tabletoj kun marmoraj bretoj. En kelkaj alkovoj staris eĉ

maŝ-kirasaj nikelizitaj litoj kun globetoj. Ankaŭ sur ili kuŝis paperujoj kaj diversaj bezonataj korespondaĵoj. Tio estis ege oportune, ĉar la paperoj ĉiam estis facile atingeblaj.

En unu el tiuj ĉambroj, en ĉambro numero kvin, gastis, en jaro 1911, fama verkisto Leonid Andreev. Ĉiuj herculesanoj sciis pri tio, kaj ĉambro numero kvin akiris ial malbonan famon.

Al ĉiuj respondeculoj, establintaj ĉi tie sian kabineton, nepre okazis iu malfeliĉo. Ankoraŭ ne sukcesis ĉambro kvin enprofundiĝi en siajn taskojn, sed oni jam malfunkciigis lin, kaj sendis labori aliloken. Bone se sen malaprobo. Ĉar okazis ke kun malaprobo, kaj kun publikigo en ĵurnaloj, okazis ankaŭ pli malbone, pri kio eĉ mencii ne agrablas.

- Diabla ĉambro, - unuanime asertis suferitoj. - Sed kiu povis supozi?

Kaj sur kapon de la verkisto, aŭtoro de timiga "Rakonto pri sepo da pendumitoj", falis teruregaj akuzoj, kvazaŭ ĝuste li kulpas pri tio ke kamarado Lapŝin dungis sepon da propraj fratoj-forteguloj, ke kamarado Spravĉenko, respondeca pri provizado per arboŝeloj, kaj esperinta ke la afero ordiĝos memstare, fiaskigis per tio tutan tiun ĉi provizadon, kaj ke kamarado Hindoĉina malgajnis, ludante kartojn, 7384 rublojn kaj 03 kopekojn da fiska mono. Malgraŭ ĉiuj penoj de Hindoĉina pruvi al koncernaj instancoj ke 03 kopekoj li elspezis

kun utilo por la ŝtato, kaj ke li povas prezenti pravigajn dokumentojn por tiu ĉi sumo, nenio helpis al li. Ombro de la mortinta verkisto estis senindulga, kaj dum unu aŭtuna vespero oni forkondukis na Hindaĉina en malliberejon. Vere malbona estis tiu ĉi ĉambro numero kvin.

Estro de tuta «Herkules», kamarado Brulegov troviĝis en eksa vintra ĝardeno, lia sekretariino Serna Miĥajlovna ofte intermitis inter ĝisvivintaj tie palmoj kaj platanoj. Tie staris ankaŭ tablo, kovrita per framba drapo, longa kiel stacidoma kajo, ĉe kiu okazis oftaj kaj longaj kunsidoj de la estraro. Kaj, antaŭnelonge, en ĉambro numero 262, kie iam troviĝis eta manĝejo, eksidis komisiono pri la purigo, kvante je ok grizetokulaj kamaradoj, laŭaspekte elstaraj per nenio. Ili venadis akurate ĉiutage, kaj daŭre legis iujn oficajn paperaĉojn.

Kiam Ostap kaj Balaganov leviĝis laŭ la ŝtuparo, eksonis alarma sonoro, kaj tuj el ĉiuj ĉambroj elsaltis oficistoj. Impeto de tiu ĉi amasmoviĝo memorigis ŝipan krizostaton. Sed tio estis ne krizostato sed matenmanĝa interrompo. Iuj el la oficistoj rapidis en bufedojn por sukcesi elkapti sandviĉojn kun ruĝa kaviaro. Aliaj faris promenadon, manĝante dum la irado.

El plana fako eliris oficisto kun ekstreme nobla aspekto. Juna ronda barbo pendis de sur lia pala karesa vizaĝo. En mano li tenis

malvarman kotleton, kiun li tempo de tempo alportis al la buŝo, ĉiufoje atente pririgardante ĝin.

Balaganov, deziranta scii sur kiu etaĝo troviĝas financkalkula fako, preskaŭ malhelpis al li en ĉi okupo.

- Ĉu vi ne vidas, kamarado, ke mi manĝetas? - diris la oficisto, kun indigno turniĝante sin de Balaganov.

Kaj, dediĉante plu neniun atenton al la laktaj fratoj, li enprofundiĝis en pririgardo de lasta peceto de sia kotleto. Pririgardinte ĝin plej zorgeme de ĉiuj flankoj, kaj eĉ flarinte ĝin adiaŭe, la oficisto sendis ĝin en la buŝon, eligis la bruston, forskuis de la jako panerojn, kaj nerapide alvenis alian oficiston, starantan ĉe pordo de sia fako.

- Nu kio, - demandis li, retrorigardante, - kiel vi fartas?

- Ja ne demandu, kamarado Bomze, - respondis tiu kaj, ankaŭ retrorigardante aldonis: - Ĉu tio estas vivo? Neniu vasteco por individuo. Ĉiam samo: kvinjaran planon dum kvar jaroj, kvinjaran planon dum tri jaroj.

- Jes, jes, - flustris Bomze, - terure! Mi tute konsentas kun vi. Ĝuste neniu vasteco por individuo, neniu stimulo, neniu persona perspektivo. Mia edzino, vi ja komprenas, dommastrino, ankaŭ ŝi diras ke forestas stimuloj, forestas personajperspektivoj.

Suspirinte, Bomze ekmoviĝis renkonten al alia oficisto.

– Nu kio, – demandis li malgaje antaŭsmajlante, – kiel vi fartas?

– Ĉu vi scias, – diris la konversacianto, – hodiaŭ matene mi revenis el oficvojaĝo. Sukcesis mi viziti sovĥozon. Grandioze. Grenfabriko! Vi eĉ ne povas imagi, kara mia, kio estas kvinjara plano, kio estas volo de kolektivo!

– Sed mi ĵus diris ĝuste samon! – arde kriis Bomze. – Ĝuste volo de kolektivo! Kvinjaran planon dum kvar, aŭ eĉ tri jaroj! Jen estas stimulo kiu... Prenu eĉ mian edzinon. Dommastrino, sed ankaŭ ŝi digne rilatas al la industriigo. Fakte antaŭ niaj okuloj mem elkreskas nova vivo!

Deirinte flanken li ĝoje turnetis la kapon. Post minuto li jam tenis manikon de milda Borisoĥlebskij kaj diris:

– Vi pravas, ankaŭ mi pensas same. Por kio konstrui ferindustrion, sovĥozojn kaj diversajn rikoltajn kombinmaŝinojn kiam oni sufokas individuecon?

Kaj ankoraŭ post minuto lia obtuzeta voĉo gluglis sur ŝtupara placeto:

– Sed ĝuste tion mi diris ĵus al kamarado Borisoĥlebskij. Kial priplori individuecon, personan vivon, kiam antaŭ niaj okuloj kreskas gren-fabrikoj, ferkombinuroj, diversaj

agrikulturaj maŝinoj, betonmiksiloj, kiam kolektivo...

Dum la interromo Bomze, kiu ŝatis proksimajn interrilitojn, sukcesis konversacieti kun deko da kunlaborantoj. Enhavon de ĉiu el la konversacioj oni povis kompreni laŭ mieno de lia vizaĝo, sur kiu amaro pro subpremo de individueco rapide ŝanĝiĝis je hela smajlo de entuziasmo. Sed senlige al la sentoj, regantaj na Bomze, lian vizaĝon ne lasis esprimo de naturdevena nobleco. Kaj ĉiuj, komencante de konsekvencaj kamaradoj el loka sindikata komitato, ĝis politike nematura Kukuŝkind, opiniis na Bomze honesta, kaj grave, principa homo. Cetere ankaŭ li opiniis sin tia.

[Геркулесовцы](#) («Herkulesanoj»)

Nova sonoro, informanta pri fino de la krizostato, revenigis la oficistojn en la ĉambrojn. La laboro renoviĝis.

Fakte vortoj «la laboro renoviĝis» ne havis rilaton al rektaj okupoj de «Herkules» kiu, laŭ la statuto, devis okupiĝi pri diversaj financaj operacioj en sfero de arbar- kaj seg-materialoj. Dum lasta jaro herkulesanoj, forĵetinte ĉiujn pensojn pri enuaj traboj, kruclignaj platoj, eksportaj cedroj kaj ceteraj neinteresaj aferoj, fordonis sin al interesea okupo: ili luktis pri la ejo, pri sia ŝatata hotelo.

Ĉio komenciĝis de papereto kiun en diktola distribua libro alportis maldiligenta kuriero el komunuma fako de la urbestraro.

«Post ricevo de tio ĉi», – tekstis la paperaĉo, – «estas proponate al vi dum unu semajno liberigi ejon de eksa hotelo "Kairo" kaj transdoni ĝin, kun ĉiu hotela inventaro, en disponon de la hotela trusto. Al vi estas disponata ejo de eksa akcia kompanio "Lado kaj lardo". Bazo: decido de la urbestraro de 12 / 1929 jaro».

Vespere oni metis tiun ĉi paperaĉon sur tablon aŭtaŭ vizaĝo de kamarado Brulegov, sidanta en elektra ombro de palmoj kaj platanoj.

– Kio! – nervume eksklamaciis estro de «Herkules». – Ili skribas al mi «estas proponate»! Al mi, kiu subordiĝas rekte al centro! Kio, ĉu ili freneziĝis tie?

– Bone ke ili ne skribis «estas ordonate», – aldonis ardon Serna Miĥajlovna. – Kamparanaĉoj!

– Tio estas ja vera anekdoto, – diris Brulegov, minace smajlante.

Senprokraste estis diktita respondo de plej decida karaktero. Estro de «Herkules» absolute rifuzis liberigi la ejon.

– Alifoje ili scios ke mi ne estas ilia nokta gardisto, kaj ke neniujn «estas proponate» oni skribu al mi, – murmuris kamarado Brulegov,

elpoŝigante kaŭĉukan stampileton kun sia faksimila subskribo kaj, pro ekscitiĝo, stampante inverse.

Kaj denove maldiligenta kuriero, ĉi foje herkulesa, treniĝis sur sunaj stratoj, haltante ĉe kvasaj vendobudetoj, enmiksiĝante ĉiujn stratajn skandalojn, kaj furioze svingante la distribuon libron.

Tutan semajnon post tio herkulesanoj pridiskutis la estiĝintan situacion. La oficistoj kunopiniis ke Brulegov ne toleros tiun subfoson de sia aŭtoritato.

– Vi ankoraŭ ne konas nian Brulegov, – diris bravuloj el financkalkulo, – li estas lavita-relavita. Per simpla decido oni lin ne prenos.

Baldaŭ post tio kamarado Bomze eliris el kabineto de la estro kun listeto de elitaj kunlaborantoj. Li paŝis el fako en fakon, kliniĝis ĉe indikita en la listo persono, kaj mistere flustris:

– Eta vesperfesteno. Po tri rubloj de persono. Adiaŭo kun Brulegov.

– Kio? – timiĝis la kunlaboranto, – Ĉu Brulegov foriras? Ĉu oni depostenas lin?

– Ja ne. Li veturas por semajno en centron por klopodi pri la ejo. Do ne malfruiĝu. Ĝuste je la oka, ĉe mi.

La adiaŭo pasis tre gaje. La kunlaborantoj fidele rigardis na Brulegov, kiu sidis kun pokaleta en la mano. Ili ritme klakis per la

manplatoj kaj kantis:

– Drin-ku-ĝis-fun-de, drin-ku-ĝis-fun-de,
drinkuĝisfunde.

Oni kantis ĝis kiam la amata estro elsekigis sufiĉe multajn pokaletojn kaj altajn glasetojn, post kio, siavice, li komencis per la vibranta voĉo kanton: «Sur vojo al urbo Kaluga, proksime al versto kvardek». Tamen neniu eksciis kio okazis ĉe tiu ĉi versto, ĉar Brulegov, neatendite por ĉiuj, ekiris al alia kanto:

**Iris tramo preter horto.
En la tram' okazis morto.
Oni trenas la kadavron
ne ĉesante la palavron.**

Post forveturo de Brulegov laborproduktiveco en «Herkules» iom malpliiĝis. Estus ja ridinde labori plenforte ne sciante ĉu oni restos en sama ejo, aŭ estos devigataj kun ĉiuj siaj kancelariaj laboriloj treniĝi na «Lado kaj lardo». Sed eĉ pli ridinde estus labori plenforte post reveno de Brulegov. Li revenis, laŭ esprimo de Bomze, sur ŝildo, la ejo restis ĉe «Herkules», kaj la kunlaborantoj dediĉis la laborhorojn al prirido de la komunuma fako.

La venkita organizaĵo petis transdoni almenaŭ la lav-tablojn kaj la maŝkirasajn litojn, sed Brulegov, ekscitita per la sukceso, eĉ ne respondis. Tiam la batalo renoviĝis kun nova forto. En la centron flugadis plendoj. Brulegov proprapersonne elveturadis refuti ilin. Pli kaj pli ofte en loĝejo de Bomze aŭdiĝis venka

«drinkuĝisfunde», pli kaj pli vastaj tavoloj da personaro entiriĝis la ejo-luktan laboron. Poiome forgesiĝis arbar- kaj seg-materialoj. Kiam Brulegov trovis subite sur sia tablo paperaĉon koncernantan eksportajn cedrojn aŭ kruclignajn platojn, li tiel miris, ke iom da tempo eĉ ne komprenis kion oni volas de li. Nun li estis absorbita per plenumo de ekstreme grava tasko: per plej alta salajro li delogis al si duopon da precipe danĝeraj komunfakuloj.

– Al vi prosperis, – diris Ostap al sia kuniranto. – Vi partoprenas ridindan okazaĵon: Ostap Bender postiras varman spuron. Lernu! Eta krimulo, kiel Panikovskij, sendus leteron al Korejko: «Sub la enkortan rubujon metu sescent rublojn, alie estos malbone», kaj aldesegnus sube krucon, kranion kaj kandelon. Sonja Ora Maneto, kies kvalitojn mi tute ne volas malpliigi, uzus finfine ordinaran ĉantaĝon, kio profitigus al ŝi ĉirkaŭ milon kaj duonon. Ina konduto. Prenu ni, fine, leŭtenanton Savin. Elstara krimaferulo. Kiel oni diras, ne restis eĉ loko por meti titrostampon. Sed kion li farus? Li alveturus loĝejon de Korejko aspektante sin bulgara caro, skandalus en la domadministrejo, kaj difektigus la tutan aferon. Sed mi, kiel vi vidas, ne rapidas. Ni troviĝas en Nigramarsk jam semajnon, sed nur hodiaŭ mi iras al la unua rendevuo. Jes, jen ĝi estas, la financkalkula halo! Nu, ĉefmekanikisto, montru al mi la

malsanulon. Ja vi estas spertulo pri Korejko.

Ili eniris blekantan ansere, plenan per vizitantoj halon, kaj Balaganov kondukis na Bender en angulon, kie post flava barilo sidis Ĉevaĵevskaja, Korejko, Kukuŝkind kaj Drejfus. Balaganov jam levis la manon por montri la milionulon, sed Ostap kolere elflustris:

- Vi jam pretas elkriaĉi plengorĝe: «Jen li estas, riĉulo! Kaptu lin!». Trankvilon. Mi divenos mem. Kiu el la kvaroj?

Ostap eksidis sur malvarmetan marmoran fenestrobreton kaj, infane balancante la krurojn, komencis rezoni:

- La junulino - ekster la pripensoj. Restis triopo: la ruĝmuzela flatulo kun blankaj okuloj, la maljunulo-fungeto kun feraj okulvitroj, kaj dika hundaĉo, aspektanta plej serioze. Maljunulon-fungeton mi indigne forbalaas. Li havas neniujn valorajojn krom la vato, per kiu li ŝtopas siajn vilajn orelojn. Restas duopo: la hundaĉo kaj la blank-okula flatulo. Kiu el ili estas Korejko? Endas pripensi tion.

Ostap etendis la kolon kaj komencis kompari la kandidatojn. Li tiel rapide turnadis la kapon, kvazaŭ spektis tenisludon, akompanante per la rigardo ĉiun pilkon.

- Jen kio, ĉefmekanikisto, - diris li fine, - la dika hundaĉo pli taŭgas al rolo de kaŝ-milionulo ol la blankokula flatulo. Rimarku maltrankvilan brilon en okuloj de la hundaĉo. Estas malfacile

al li sidi sur la loko, li ne toleras tion, li volus
tuj kuri hejmen kaj enigi siajn ungojn en
pakaĵojn da dekrublaĵoj. Certe tio estas li,
kolektanto da karatoj kaj dolaroj. Ĉu vi ne vidas
ke tiu ĉi dika muzelaĉo estas nenio alia ol
demokratia kombinaĵo el Ŝejlok (Shylock),
Avara Kavaliro kaj Harpagon? Kaj tiu,
blankokula, estas simple nenio, sovetia museto.
Certe ankaŭ ĉe li estas havaĵo: dek du rubloj en
ŝparkaso. Pinto de liaj noktaj revoj estas aĉeto
de haroza palto kun bovida kolumo. Tio ne estas
Korejko. Tio estas muso kiu...

Sed ĉi tie la brila parolo de la granda
kombinanto estis rompita per aŭdaca krio, kiu
venis el profundoj de la financ-kalkula halo kaj,
sendube, apartenis al laboranto kiu havis rajton
krii:

– Kamarado Korejko! Kie estas cifer-
donitaĵoj pri ŝuldoj de la komunuma fako al ni?
Kamarado Brulegov urĝe postulas ilin.

Ostap puŝis na Balaganov per piedo. Sed la
hundaĉo trankvile daŭrigis knari per sia plumo.
Lia vizaĝo, kiu portis plej distingajn trajtojn de
Ŝejlok, Harpagono kaj Avara Kavaliro, ne
ŝanĝiĝis. Tamen la ruĝmuzelaĉa blondulo kun
blankaj okuloj, tiu ĉi nenio, tiu ĉi sovetia
museto, kiun gvidis revo pri palto kun bovida
kolumo, elmontris nekutiman aktivadon. Li
klopode ekfrapadis kestojn de sia tablo, kaptis
iun paperaĉon, kaj rapide ekkuris al la voko.

La granda kombinanto grakis kaj ekzamene alrigardis na Balaganov.

Ŝura ekridis.

– Jes, – diris Ostap post ioma silento. – Tiu ĉi ne alportos monon sur telereto. Eble nur se mi ege petos lin. Subjekto meritanta estimon. Kaj nun – rapide al freŝa aero. En mia cerbo naskiĝis amuza kombinaĵo. Hodiaŭ vespere ni, kun Dia helpo, unuafoje tuŝados mamon de sinjoro Korejko. Tuŝos vi, Ŝura.

Ĉapitro 12

Homero, Milton kaj Panikovskij

La instrukcio estis plej simpla:

1. Hazarde, surstrate, renkonti civitanon Korejko.
2. Neniokaze bati lin, kaj entute apliki neniun fizikan forton.
3. Depreni ĉion kio estos trovita en poŝoj de la nomita civitano.
4. Raporti plenumon de la tasko.

Malgraŭ ekstremaj simpleco kaj klareco de instrukcioj far granda kombinanto, Balaganov kaj Panikovskij ekis pasian kverelon. Filoj de la leŭtenanto sidis sur verda benko en la urba ĝardeno, multsignife rigardante enirejon de «Herkules». Kverelante ili ne rimarkis eĉ ke vento, kurbiganta fajroestingistan ŝprucon de la fontano, ŝutas sur ilin kribritajn akverojn. Ili

nur konvulsie movis la kapojn, sence rigardis la puran ĉielon, kaj daŭrigis la disputon.

Panikovskij, kiu pro la varmego ŝanĝis dikŝtofan jakon de fajrobrigadisto je katunan ĉemizeton kun mola kolumo, tenis sin digne. li tre fieris pri tasko komisiita al li.

– Nur ŝtelo, – diris li.

– Nur rabo, – refutis Balaganov, kiu ankaŭ estis fiera pri konfido de la komandanto.

– Vi estas mizera sensignifa persono, – deklaris Panikovskij, abomene rigardante la konversacianton.

– Kaj vi estas kriplulo, – rimarkis Balaganov.

– Nun mi estas estro!

– Kiu estas estro?

– Mi estas estro. Al mi estas komisiite.

– Ĉu al vi?

– Al mi.

– Ĉu al ci?

– Sed al kiu? Ĉu eble al ci?

Kaj la konversacio eniris sferon kiu havis nenion komunan kun la ricevitaĵoj instrukcioj. La friponoj tiel entuziasmiĝis, ke komencis eĉ iomete forŝovi unu la alian per la plandoj kaj krii: «Sed vi, kio vi estas?». Tiuj agoj kutime antaŭas ĉefan pugnobatalon, dum kiu la kontraŭuloj ĵetas la ĉapojn surteren, vokas preterirantojn esti atestantoj, kaj disŝmiras sur la nerazitaj vizaĝaĉoj siajn infanajn larmojn.

Sed pugnobatalo ne okazis. Kiam venis plej

taŭga momento por unua vangofrapo, Panikovskij subite forigis la manojn, kaj konsentis opinii na Balaganov sia senpera estro. Verŝajne li elmemoris ke lin ofte batis apartaj personoj kaj tutaj kolektivoj, kaj ke al li, dum tio, estis tre dolore. Kaptinte la potencon en siajn manojn Balaganov tuj moliĝis.

- Sed kial ne prirabi? - diris li malpli persiste. - Ĉu tio malfacilas? Korejko iras vespere sur la strato. Mallume. Mi venas de maldekstre. Vi venas de dekstre. Mi puŝas lian livan flankon, vi puŝas la dekstran. Tiu ĉi stultulo haltas kaj diras al mi: «Huligano!». - «Kiu estas huligano?» - demandas mi. Kaj ankaŭ vi demandas kiu estas huligano, kaj premas de dekstre. Tiam mi frapas lian muzelaĉon... Ne, tio ne permesatas!

- Ĝuste tio problemas ke oni ne povas bati, - hipokrite suspiris Panikovskij. - Bender ne premasas.

- Jes, mi scias... Entute, mi kaptas liajn manojn, kaj vi kontrolas ĉu ne estas en liaj poŝoj io superflua. Li, laŭkutime, krias «polico», kaj tiam mi... Diablo, batoj ne estas permesataj! Do ni revenos hejmen. Nu, kia la plano?

Sed Panikovskij evitis rektan respondon. Li prenis el manoj de Balaganov la gravuritan promenbastoneton kun vo-disbranĉiĝo anstataŭ bastonkapo kaj, desegninte sur la sablo rektan

linion diris:

– Rigardu. Unue, ni atendu ĝis la vespero. Due...

Kaj de dekstra finaĵo de la linio Panikovskij suprenigis ondan perpendiklon.

– Due, hodiaŭ vespere li povas simple ne eliri surstraten. Kaj eĉ se li eliros, tiam...

Ĉi tie Panikovskij kunigis la du liniojn per tria tiel, ke sur la sablo aperis io simila al triangulo, kaj finis:

– Kiu lin scias? Eble li promenos en granda kompanio. Kiel tio ŝajnas al vi?

Balaganov ekrigardis la triangulon kun estimo. Pruvoj de Panikovskij ŝajnis al li ne tre konvinkaj, sed la triangulo sentigis tiel veran senesperon, ke Balaganov ekhezitis. Rimarkinte tion, Panikovskij ne prokrastis.

– Veturu Kievon! – diris li subite. – Kaj tiam vi komprenos ke mi pravas. Nepre venuru Kievon!

– Kiun Kievon! – balbutis Ŝura. – Kial?

– Veturu vi Kievon kaj demandu tie kion Panikovskij faris ĝis la revolucio. Nepre demandu!

– Kial vi kroĉiĝas al mi? – malserene diris Balaganov.

– Ne, vi demandu! – postulis Panikovskij. – Veturu kaj demandu! Kaj oni diros al vi ke ĝis la revolucio Panikovskij estis blindulo. Kion vi opinias, ĉu mi irus en infanojn de leŭtenanto

Ŝmit se ne la revolucio? Ja mi estis riĉa homo. Ĉe mi estis familio, kaj sur la tablo staris nikelizita samovaro. Kaj kio nutris min? Bluaj okulvitroj kaj bastoneto.

Li elpoŝigis kartonan ingon, ĉirkaŭgluitan per nigra papero kun malhelaj arĝentaj steletoj, kaj montris bluajn okulvitrojn.

- Per tiuj ĉi okulvitroj, - diris li suspirante, - mi nutriĝis multajn jarojn. Kun la okulvitroj mi iris **Kresĉatik-straton**¹⁶, kaj petis iun sinjoron, vestitan pli malpli pure, helpi al la malfeliĉa blindulo transiri la straton. La sinjoro prenis min je la brako, kaj kondukis. Sur alia trotuaro al li mankis horloĝo, se li havis horloĝon, aŭ monujo. Estis kiuj portis tiam monujojn.

- Sed kial vi lasis tiun ĉi okupon? - demandis Balaganov vigliĝinte.

- Revolucio, - respondis la eksa blindulo. - Al policisto, kiu staris tiam ĉe angulo de Kresĉatik kaj Proreznaja-stratoj, mi pagis kvin rublojn monate, kaj neniu tuŝis min. La policisto observis eĉ ke oni ne ofendu min. Bona li estis homo. Familinomo lia estas Nebaba, Semjon

16. Kresĉatik-strato: sur tiu ĉi ĉefa strato de ukraina ĉefurbo staras nun bronza plenstatura monumento al... Panikovskij. Ĝi prezentas blindulon kun bastono, kaj estis skulptita de fama sovetia aktoro, kiu ludis rolon de Panikovskij en filmo "Ora bovido". Provu:

<http://www.playcast.ru/view/994905/f7ec89d63244c0df7345e0482eeae8ca33414c66pl>

Vasileviĉ. Antaŭ nelonge mi renkontis lin. Li ekestis muzik-kritikisto. Sed nun? Ĉu oni povas nun ligiĝi kun polico? Pli malbonan popolon mi ne vidis. Iaj ideoj ili ekestis, iaj kulturportantaj. Kaj jen, Balaganov, mi, en miaj maljunaj jaroj, endis ekesti fiaferulo. Sed por tiu ĉi eksterordinara afero mi povas reuzi miajn malnovajn okulvitrojn. Tio estas pli fidinde ol rabo.

Post kvin minutoj el la publika necesejo, ĉirkaŭplantita per floroj, eliris blindulo kun bluaj okulvitroj. Suprenigante la mentonon al ĉielo, kaj ofte frapante antaŭ si per la ripozloka bastoneto, li direktiĝis al la ĝardena eliro. Post li moviĝis Balaganov. Oni ne povis rekoni na Panikovskij. Fleksinte malantaŭen la ŝultrojn, kaj singarde metante la piedojn sur la trotuaron, li kontakte aliris domojn, frapante per la bastoneto eksponfenestrajn bariletojn, stumblis je la pasantoj kaj, rigardante trans ilin, paŝadis pluen. Li laboris ĝis tiom konsciencie, ke eĉ ĉifigis longan vicon, kies kapo apogis sin je fosteto kun surskribo «Aŭtobusa haltejo». Balaganov nur miris, rigardante la energian blindulon.

Panikovskij fiagadis ĝis kiam el herkulesa pordo eliris Korejko. Balaganov ektumultis. Komence li alsaltis tro proksimen al la agadtereno, poste dekuris tro malproksimen. Nur post tio li, ĉe frukta butiko, prenis pozicion

oportunan por la observado. En lia buŝo ial aperis aĉa gusto, kvazaŭ li duonhore suĉis kupran pordan manilon. Sed rigardante movojn de Panikovskij li trankviliĝis.

Balaganov vidis ke la blindulo turniĝis al la milionulo, kroĉis lin per la bastoneto je la kruro, kaj batis per la ŝultro. Post tio ili interŝanĝis, verŝajne, kelkajn vortojn. Poste Korejko eksmajlis, prenis la blindulon je la brako, kaj helpis al li surpaŝi la pavimon. Por plia kredebleco Panikovskij plenforte frapis per la bastoneto la pavimajn ŝtonojn, kaj tiris la kapon supren, kvazaŭ li estis bridita. Postaj agoj de la blindulo distingiĝis per tia pureco kaj precizeco, ke Balaganov eksentis eĉ envion. Panikovskij ĉirkaŭprenis sian kuniranton je talio. Lia mano glitis laŭ liva flanko de Korejko, kaj por iu parto de sekundo ĝi prokrastis super la velŝtofa poŝo de la milionulo-kontoristo.

[Гомер, Милтон и Паниковский](#)
(«Homero, Milton kaj Panikovskij»)

- Nu, nu! - flustris Balaganov. - Agu, maljunulo, agu!

Sed sammomente ekbrilis vitroj, alarme ekmuĝis hupo, ekstremis la tero, kaj granda blanka buso, pene tenanta sin sur la radoj, abrupte haltis meze de la pavimo. Samtempe eksonis du krioj:

- Idioto! Buson li ne vidas! - jelpis

Panikovskij, saltante el sub la rado, kaj minacante al la ŝoforo per la okulvitroj, deŝiritaj de la nazo.

– Sed li ne estas blindulo, – mire kriis Korejko. – Ŝtelaĉulo!

Ĉio kovriĝis per blua fumo, la buso ekruliĝis pluen kaj, kiam la benzina kurteno disŝiriĝis, Balaganov ekvidis ke Panikovskij estas ĉirkaŭigita per negranda amaso da civitanoj. Ĉirkaŭ la kvazaŭ-blindulo komenciĝis iu tumulto. Balaganov alkuris pli proksimen. Sur vizaĝo de Panikovskij vagis malbela smajlo. Li estis strange indiferenta al ĉio okazanta, kvankam unu lia orelo estis tiel ruĝa ke, verŝajne, lumus en obskuro, do ĉe ĝia lumo oni povus eĉ riveli fotografajn plataĵojn.

Dispuŝante de ĉie kunkurantajn civitanojn, Balaganov ĵetiĝis en hotelon «Karlsbad».

La granda kombinanto sidis ĉe la bambua tableto kaj skribis.

– Na Panikovskij oni batas! – kriis Balaganov, pitoreske aperante en la eniro.

– Jam? – afereme demandis Bender. – Ial tro frue.

– Na Panikovskij oni batas! – malespere ripetis rufa Ŝura. – Apud «Herkules».

– Kial vi muĝas kiel blanka urso dum varma vetero? – severe diris Ostap. – Ĉu oni delonge batas?

– Ĉirkaŭ kvin minutoj.

– Sed kial vi ne diristion tuj? Jen kverelema maljunulo! Nu, iru ni spekti. Rakontu dum la vojo.

Kiam la granda kombinanto venis al loko de la okazaĵo, Korejko jam forestis, sed ĉirkaŭ Panikovskij ondiĝis grandega amaso, baranta la straton. Senpacience grakis aŭtoj, apogante sin je la homamasa masivo. El fenestroj de malsanulejo rigardis flegistinoj en blankaj kiteloj. Kuris hundoj kun kurbitaj sabraj vostoj. En la urba ĝardeno ĉesis ŝpruci la fontano. Decide suspirinte, Bender enpenetris la homamason.

– Pardonon, – diris li, – ankoraŭ pardonon! Pardonu, *madam*, ĉu tio estas vi kiu perdis ĉe la angulo kuponon por marmelado? Kuru rapide, ĝi ankoraŭ kuŝas tie. Tralasu la ekspertiziston vi, viroj! Ja enlasu min vi, senrajtigiton!

Uzante tiamaniere politikon de vipo kaj kuko, Ostap penetris la centron kie suferis Panikovskij. Ĝis tiu tempo ĉe lumo de ankaŭ alia orelo de la konvenci-rompanto oni povus procedi diversajn fotografajn laborojn.

Ekvidante la komandanton Panikovskij plende klinis la kapon.

– Ĉu tiu? – seke demandis Ostap, puŝante na Panikovskij je la dorso.

– Ĝuste, tiu, – gaje konfirmis multnombraj ver-ŝatantoj. Per propraj okuloj ni vidis.

Ostap alvokis civitanojn al trankvilo,

elpoŝigis notlibron kaj, rigardinte na Panikovskij, diris per potencula voĉo:

– Mi petas atestantojn indiki la familinomojn kaj adresojn. Atestantoj, enskribiĝu!

Ŝajnis ke civitanoj, montrintaj tiun aktivadon en kupto de Panikovskij, ne prokrastos pruvi la krimon per siaj atestoj. Sed okazis ke post vorto «atestantoj» ĉiuj verŝatantoj ekmalgajis, stulte ektumultis, kaj komencis retiriĝi. En la homamaso aperis elfluaĵoj kaj kirlaĵoj. Ĝi evidente disfalis.

– Sed kie estas atestantoj? – ripetis Ostap.

Komenciĝis paniko. Laborante per la kubutoj la atestantoj elgrimpis for kaj, post minuto, la strato akceptis sian kutiman aspekton. Aŭtoj ŝiriĝis de la lokoj, fenestroj de la malsanulejo frape fermiĝis, la hundoj komencis atente pririgardi bazojn de ĉe-trotuaraj ŝtonoj, kaj en la urba ĝardeno kun gassaturita jelpo denove leviĝis ŝpruco de la fontano.

Konvinkiĝinte ke la strato estas purigita, kaj ke al Panikovskij jam ne minacas danĝero, la granda kombinanto grumble diris:

– Sentalenta maljunulo! Sentalenta frenezulo. Ankoraŭ unu granda blindulo aperis: Panikovskij! – Homero, Milton kaj Panikovskij! Bona kompanio! Kaj Balaganov? Jen matroso de rompita ŝipo! Na Panikovskij oni batas! Na Panikovskij oni batas! Kaj mem... Iru ni la urban ĝardenon. Tie mi ordigos al vi scenon ĉe

fontano.

Ĉe fontano Balaganov tuj metis tutan kulpon sur Panikovskij. La kompromitiĝinta blindulo atentigis pri siaj nervoj, difektiĝintaj dum la nigraj jaroj kaj, bonokaze, deklaris ke pri ĉio kulpas Balaganov, persono, kiel sciante, mizera kaj sensignifa. La fratoj tuj komencis deŝovi unu la alian per la manplatoj. Jam aŭdiĝis unuformecaj krioj: «Kaj vi, kio vi estas?», kaj el okuloj de Panikovskij elŝiriĝis jam granda larmo, antaŭsigno de serioza pugna batalo, kiam la granda kombinanto, dirante «*brek*», kiel boks-juĝisto, disigis la kontraŭulojn.

– Vi boksados dum dimanĉoj, – diris li. – Beleta paro: Balaganov en pezo de koko, Panikovskij en pezo de kokino! Sed, sinjoroj ĉampionoj, laborantoj vi estas samaj al kribrilo, farita el hunda vosto. Tio finiĝos malbone. Mi maldungos vin, des pli ke socie vi prezentas nenion valoran.

Panikovskij kaj Balaganov, forgesinte pri la kverelo, komencis ĵuri kaj certigi ke jam hodiaŭ vespere ili, malgraŭ ĉio, priserĉos na Korejko. Bender nur smajlis.

– Ja vidos vi, – paradis Balaganov. – Surstrata atako. Sub vualo de nokta mallumo. Ĉu vere, Miĥail Samueleviĉ?

– Honora nobla vorto, – subtenis Panikovskij. – Mi kaj Ŝura... Ne maltrankviliĝu! Vi ja havas rilatojn kun Panikovskij.

- Ĝuste tio malĝojigas min, - diris Bender, - kvankam, bonvolu... Kiel vi diras? Sub vualo de nokta mallumo? Faru sub la vualo. Certe la penso estas primitiva. Ankaŭ la plenumo, verŝajne, estos mizera.

Post kelkaj horoj de la surstrata deĵorado aperis, finfine, ĉiuj necesaj donitaĵoj: vualo de nokta mallumo, kaj la paciento mem, elirinta kun junulino el domo kie loĝas la maljuna rebusisto. La junulino ne konformis al la plano. Ekestis bezonate sekvi dume la promenantojn, kiuj direktiĝis al la maro.

Brulanta rompaĵo de luno malalte pendis super la malvarmiĝanta bordo. Sur la rokoj sidis nigraj bazaltaj, por eterne brakumiĝintaj paroj. La maro flustris pri ĝisĉerka amo, pri senrevena feliĉo, pri suferoj de koro, kaj pri ceteraj neaktualaj malgravaĵoj. Stelo parolis kun stelo telegrafe, bruliĝante kaj estingiĝante. Tunelo de lumĵetilo kunigis bordojn de la golfo. Kiam ĝi malaperis, sur ĝia loko ankoraŭ longe tenis sin nigra fosto.

- Mi laciĝis, - ploretis Panikovskij, trenante sin sur klifoj post Aleksandr Ivanoviĉ kaj ties damo. - Mi estas maljuna. Al mi estas malfacile.

Li stumblis je teraj nestoj de zizeloj, kaj falis, kaptante per la manoj sekajn bovajn fekaĵojn. Li volis en la kamparan-gastejon, al Kozleviĉ, kun kiu estis tiel agrable trinki teon

kaj bableti pri io ajn.

Sed saman momenton kiam Panikovskij jam firme decidis iri hejmen, proponante al Balaganov sole pe-i la aferon, de antaŭe oni diris:

- Kiel varme! Ĉu vi baniĝas nokte, Aleksandr Ivanoviĉ? Do atendu ĉi tie. Mi nur enakviĝos kaj - reen.

Ekaŭdiĝis bruo de ŝtonetoj, ŝutiĝantaj de la deklivo, la blanka robo malaperis, kaj Korejko restis sola.

- Rapide! - flustris Balaganov, ŝirante na Panikovskij je la brako. - Do mi venas de maldekstra flanko, kaj vi - de la dekstra. Nur rapide.

- Mi de maldekstra, - timeme diris rompanto de la konvencio.

- Bone, bone, vi de maldekstra. Mi puŝas lian livan flankon, ne, dekstran, kaj vi premas de la maldekstre.

- Kial de maldekstre?

- Ja kio vi! Nu de dekstre. Li diras «Huligano», kaj vi respondas: «Kiu estas huligano?»

- Ne, vi respondos unua.

- Bone. Pri ĉio mi diros al Bender. Iru ni, iru. Do vi de maldekstre...

Kaj la heroaj filoj de la leŭtenanto proksimiĝis, ege timante, al Aleksandr Ivanoviĉ.

La plano estis rompita je la komenco mem.

Anstataŭ ol proksimiĝi, laŭ la dispozicio, de dekstre kaj puŝi la milionulon je la dekstran flankon, Balaganov fars kelkajn paŝojn surloke, kaj neatendite diris:

– Permesu peti fajron.

– Mi ne fumas, – respondis Korejko malvarme.

– Tiel do, – stulte diris Ŝura retrorigardante na Panikovskij. – Ĉu vi scias kioma horo estas nun?

– Ĉirkaŭ dek-dua.

– Dekdua, – ripetis Balaganov. – Hm... Mi tute ne sciis.

– Varma vespero, ĉu, – favorserĉe diris Panikovskij.

Venis paŭzo, dum kiu furiozis griloj. La luno blankiĝis, kaj ĉe ĝia lumo oni povis rimarki bone formitajn ŝultrojn de Aleksandr Ivanoviĉ. Panikovskij ne eltenis la streĉon, venis post dorson de Korejko kaj jelpe elkriis:

– Manojn supren!

– Kio? – mire demandis Korejko.

– Manojn supren, – ripetis Panikovskij per falinta voĉo.

Li tuj ricevis mallongan, tre doloran baton je la ŝultro, kaj falis surteren. Kiam li ekstaris, Korejko jam kunkroĉiĝis kun Balaganov. Ili ambaŭ spiris malfacile, kvazaŭ relokigis koncertan pianon. De sobe venis najada rido kaj plaŭdo.

– Sed kial vi batas min? – kriegis Balaganov.
– Mi nur demandis kioma horo!..

– Mi montros al vi kioma horo! – siblis Korejko, enigante en siajn batojn multcentjaran malamon de riĉulo al rabisto.

Panikovskij manpiede ŝteliĝis al loko de la batalo, kaj de malantaŭe enigis ambaŭ manojn en poŝojn de la herkulesano. Korejko piedbatis lin, sed estis jam malfrue. Fera skatoleto de cigaredoj "Kaŭkazo" eknomadis el lia liva poŝo en manojn de Panikovskij. El alia poŝo elŝutiĝis surteren paperaĉoj kaj membrokartoj.

– Kuru ni! – kriis Panikovskij ie el la mallumo.

Lastan baton Balaganov ricevis je la dorson.

Post kelkaj minutoj ĉifita kaj ekscitita Aleksandr Ivanoviĉ ekvidis alte super si du lunajn blujajn figurojn. Ili kuris sur montospino, direktante sin en la urbon.

Freŝa, odoranta per jodo Zosja trovis na Aleksandr Ivanoviĉ ĉe stranga okupo. Li staris sur la genuoj, bruligante alumetojn, kaj per la tremantaj fingroj deprenis de la herboj iujn paperaĉojn. Sed antaŭ ol Zosja sukcesis demandi kio okazis, li jam trovis la kvitancon por la valizaĉo, kiu troviĝis en la pakajdeponeja fako, inter kana korbo kun merizo kaj flanela plejdo.

– Hazarde elfalis, – diris li, streĉe smajlante, kaj atente kaŝante la kvitancon.

Pri cigared-skatoleto "Kaŭkazo" kun deko da miloj, kiujn li ankoraŭ ne sukcesis enigi en la valizon, li elmemoris nur enirante la urbon.

Dum tiu ĉi titana marborda lukto Ostap Bender decidis ke troviĝado en la hotelo, sub rigardoj de la tuta urbo, eliĝas el kadroj de la entreprenita afero, kaj aldonas al ĝi nebezonatan oficialigon. Tial, traleginte en nigramarska vesperaĵo anoncon: «Lu. bon. ĉa. kn ĉ. bez. k kun m. v. al sol. int. fr.», kaj momente kompreninte ke la anonco signifas: «Luiĝas bonega ĉambro kun ĉiuj bezonaĵoj kaj kun marvidaĵo al sola intelektula fraŭlo», Ostap ekpensis: «Nun mi, ŝajne, estas fraŭlo, ĉar antaŭnelonge mi ricevis el Stargorod informon pri tio ke mia geedzeco kun civitanino Gricacujeva estas nuligita pro deklaro de ŝia flanko, kaj ke al mi atribuiĝas antaŭgeedziĝa familinomo O. Bender. Do vivu mi antaŭedziĝe. Mi estas fraŭlo, solulo kaj intelektulo. La ĉambro sendube estos mia».

Kaj, surtirinte malvarmetan blankan pantalonon, la granda kombinanto ekiris laŭ adreso indikita en la anonco.

Ĉapitro 13

Vasisualij Loĥankin, kaj lia rolo en rusia revolucio

Ĝuste je la dek-sesa kaj kvardek minutoj Vasisualij Loĥankin deklaris malsat-strikon.

Li kuŝis sur la lak-tola kanapo, forturniĝinte de tuta mondo, vizaĝe al la konvekso kanapa dorseto. Kuŝis li en ŝelkoj, kaj en verdaj duonŝtrumpoj, kiujn en Nigramarsk oni nomas ankaŭ *karpetkoj*.

Malsatante ĉirkaŭ dudek minutoj en tiu ĉi stato Loĥankin ekĝemis, turniĝis sur alian flankon, kaj ekrigardis la edzinon. Dum tio la verdaj *karpetkoj* desegnis en la aero negrandan arkon.

[Васисуалий Лоханкин](#) («*Vasisualij Loĥankin*»)

La edzino ĵetadis en la kolorigitan vojaĝsakon siajn aĵojn: figurajn flakonojn, kaŭĉukan rulileton por masaĝo, du robojn kun vosto, kaj unu malnovan sen vosto, feltan ĉapelon kun vitra duonluno, kuprajn kartoĉojn kun lippomado, kaj trikotan pantalonon.

– Varvara! – diris Loĥankin tra la nazo.

La edzino silentis, laŭte spirante.

– Varvara! – ripetis li. – Ĉu vere vi foriras de mi al Ptiburdukov?

– Jes, – respondis la edzino. – Mi foriras. Tio endas.

– Sed kial ja, kial? – diris Loĥankin kun bovina pasio.

Liaj ankaŭ sen tio grandaj naztruoj ĉagrene disbloviĝis. Ektremis la faraona barbeteto.

– Ĉar mi amas lin.

– Kaj kio pri mi?

– Vasisualij! ankoraŭ hieraŭ mi informis: Mi jam ne amas vin.

– Sed mi, mi amas vin, Varvara!

– Tio estas via privata afero, Vasisualij. Mi foriras al Ptiburdukov. Tiel decas.

– Ne! – kriis Loĥankin. Ne decas tiel! Ne povas unu homo foriri se alia amas lin!

– Povas, – incite diris Varvara, rigardante la poŝan speguleton. – Kaj, entute, ĉesu viajn stultaĵojn, Vasisualij.

– Tiukaze mi daŭrigas la malsaton! – kriis la malfeliĉa edzo. – Mi malsatos ĝis kiam vi revenos. Tagon. Semajnon. Jaron mi malsatos!

Loĥankin denove turniĝis, kaj premis sian dikan nazon al glita kaj malvarma laktolo.

– Jen tiel mi kuŝos en la ŝelkoj, – aŭdiĝis de la kanapo, – ĝis kiam mi mortos. Kaj kulpos pri tio vi kun via inĝeniero Ptiburdukov.

La edzino ekpensis, remetis sur la blankan nebakitan ŝultron la defalintan ŝelketon, kaj subite elvoĉigis laŭte:

– Vi ne rajtas paroli tiel pri Ptiburdukov! Li estas pli bona ol vi!

Tion Loĥankin ne eltenis. Li ŝiriĝis, kvazaŭ elektra kurento trabatis lin laŭlonge de la ŝelkoj ĝis la verdaj duonŝtrumpoj.

– Vi estas masklino, Varvara, – per tira voĉo lamentis li. – Publikulino vi estas.

– Vasisualij, vi estas stultulo! – trankvile

respondis la edzino.

– Lupino aĉa, – daŭrigis Loĥankin per sama tira tono, – vin mi malestimas. Foriras vi de mi al la konkubo. Al Ptiburdukov iras vi de mi. Al aĉa Ptiburdukov vi foriras. Do jen al kiu vi foriras nun! Vi pri volupto volas okupiĝi, lupino olda, fia, abomena.

Profundiĝinta en sian malfeliĉon Loĥankin eĉ ne rimarkis ke li parolas per kvinjambo, kvankam li neniam verkis versaĵojn, kaj ne ŝatis legi ilin.

– Vasisualij! Ĉesu arlekenadi, – diris la vulpino, ŝlosante la sakon. – Rigardu kion vi similas. Pli bone vi lavu vin. Mi foriras. Adiaŭ, Vasisualij. Viajn kuponojn por pano mi lasas sur la tablo.

Kaj, preninte la sakon, Varvara ekiris al la pordo. Vidante ke la lamentoj ne helpis, Loĥankin vigle saltis de la kanapo, alkuris la tablaron, kaj kun krio «Savu!» disŝiris la kuponojn. Varvara ektimis. Ŝi imagis la edzon sekiĝintan pro la malsato, kun silentiĝintaj pulsoj kaj malvarmaj piedoj.

– Kion vi faris? – diris ŝi. – Vi ne rajtas malsati!

– Mi faros tion! – obstine deklaris Loĥankin.

– Tio stultas, Vasisualij. Tio estas ribelo de individuulo.

– Kaj mi fieras pri tio, – respondis Loĥankin per suspektinda jambo. – Vi ne sufiĉe aprezas

signifon de individueco, kaj de intelektularo entute.

– Sed publika opinio malaprobos vin.

– Malaprobu ĝi, – decide diris Vasisualij, kaj denove falis sur la kanapon.

Varvara senvorte ĵetis la sakon sur la plankon, haste deŝiris de la kapo pajlan ĉapelon kaj, murmurante: «rabiĝinta virbesto», «tirano», «privatulo», haste faris sandviĉon kun melongena ŝmiraĵo.

– Manĝu! – diris ŝi, alportante la manĝaĵon al puncaj lipoj de la edzo. Ĉu vi aŭdas, Loĥankin? Tuj manĝu. Nu!

– Lasu min, – diris li demovante ŝian manon.

Uzante momenton dum kiu buŝo de la malsatanto okazis malfermita, Varvara lerte enŝovis la sandviĉon en la spacon, formiĝintan inter la faraona barbeto kaj ĉirkaŭrazitaj moskvaj lipharoj. Sed la malsatanto per forta langobato elpuŝis la manĝon eksteren.

– Manĝu, kanajlo! – senespere kriis Varvara, puŝante la sandviĉon. – Intelektulo!

Sed Loĥankin deturnis la vizaĝon, kaj negative bovin-blekis. Post kelkaj minutoj Varvara, ekscitita kaj malpurigita per la verda ŝmiraĵo, rezignis. Ŝi eksidis sur sian sakon, kaj ekploris per glaciaj larmoj.

Loĥankin forsvingis el la barbo eniĝintajn tien panerojn, ĵetis sur la edzinon singardan

oblikvan rigardon, kaj silentiĝis sur sia kanapo. Li ege ne volis perdi na Varvara. Apud multaj mankoj ŝi havis du avantaĝojn: grandajn kaj blankajn mamojn, kaj laboron. Vasisualij servis neniam kaj nenie. Servado malhelpus al li pensi pri signifo de rusa intelektularo, al kies socia tavolo li enkalkulis ankaŭ sin. La longaj meditoj de Loĥankin kondukis lin al agrabla kaj proksima temo: ««Vasisualij Loĥankin kaj lia signifo», «Loĥankin kaj tragedio de rusa liberalismo», «Loĥankin kaj ties rolo en rusia revolucio». Pri ĉio ĉi estis agrable kaj trankvile mediti promenante tra la ĉambro en feltaj botoj, aĉetitaj per mono de Varvara, kaj rigardante tempo de tempo la ŝatatan ŝrankon, kie flagretis per preĝeja oro librodorsoj de enciklopedia vortaro de Brokhaus (Brockhaus). Longe staradis Vasisualij antaŭ la ŝranko, movante la rigardon de unu librodorso sur alian. Laŭrange dispoziciis tie ravaj ekzempleroj de binda arto: Granda medicina enciklopedio, «Vivo de animaloj», pezega volumo «Viro kaj virino», kaj ankaŭ «Tero kaj homoj» de Elize Reclu (Reclus).

«Apud tiu ĉi trezorejo de penso», – nehaste meditis Vasisualij, – «oni iĝas pli pura, iel kreskas spirite».

Veninte al tiu ĉi konkludo li ĝoje enspiris, eltiris el sub la ŝranko na «Patrujo» je 1899-a jaro en bindaĵo kolorigita mar-onde kun ŝaŭmo

kaj ŝprucoj, pririgardis bildetojn de angla-bura milito, anoncon de nekonata sinjorino, titolitan «Jen kiel mi pligrandigis la mamojn je ses coloj», kaj ceterajn interesajn aferojn.

Kun foriro de Varvara malaperus ankaŭ materia bazo sur kiu apogiĝis bonstato de la plej valora reprezentanto de meditanta homaro.

Vespere venis Ptiburdukov. Li longe ne decidis eniri ĉambrojn de Loĥankin-familio, kaj vagadis tra la kuirejo inter longflamaj primusoj kaj kruce etenditaj ŝnuroj, sur kiuj pendis seka gipsa tolaĵo kun makuloj de bluigaĵo. La loĝejo vigliĝis. Frapadis pordoj, preterkuris ombroj, lumiĝis okuloj de la loĝantoj, kaj ie oni suspiris pasie: viro venis.

Ptiburdukov demetis la kaskedon, ŝiris sin je la inĝeniera liphararo kaj, fine, decidiĝis.

– Varja, – petege diris li, enirante la ĉambron, – ja ni interkonsentis...

– Spektu, Saŝa! – kriis Varvara, kaptante lin je la mano kaj puŝetante al la kanapo. – Jen li! Kuŝas! Masklo! Malbenita privatulo! Ĉu vi komprenas, tiu ĉi servutmastro deklaris malsatstrikon pro tio ke mi volas foriri de li.

Ekvidante na Ptiburdukov, la malsatanto tuj ekuzis la kvinjambon.

– Vin, Ptiburdukov, mi malestimegas, – lamentis li. – Edzinon mian vi ne rajtas tuŝi. Krudulo kaj fiulo estas vi! Kien forprenas vi edzinon mian?

- Kamarado Loĥankin, - konsternerne diris Ptiburdukov, kaptante siajn lipharojn.

- Foriru tuj, ĉar vin mi malamegas, - daŭrigis Vasisualij, balanciĝante kiel maljuna preĝanta judo, - ja estas vi, bastardo, prostituo, mizera pedikovo kaj kanajlo!

- Kial vi ne ĝenas, Vasisualij Andreiĉ, - diris enuiĝinta Ptiburdukov, - tio estas eĉ stulte. Pripensu ja, kion vi faras? Dum dua jaro de la kvinjara plano...

- Al mi li diras ke ĉi tio stultas! Li, la edzinon mian forŝtelinta! Foriru de ĉi tie, Ptiburdukov, alie vian nukon mi batados.

- Malsana homo, - diris Ptiburdukov, penante resti en kadroj de konveno.

Sed al Varvara tiuj ĉi kadroj estis malvastaj. Ŝi kaptis de la tablo jam sekiĝintan verdan sandviĉon, kaj alpaŝis la malsatulon. Loĥankin defendis sin tiel furioze, kvazaŭ oni intencis kastrigi lin. Ptiburdukov deturniĝis kaj rigardis tra la fenestro la kaŝtanarbon, florantan per blankaj kandeloj. Post si li aŭdis abomenan blekadon de Loĥankin, kaj kriojn de Varvara: «Manĝu, kanajlo! Manĝu, servutul-mastro!»

Sekvonttage Varvara, ĉagrenita per la neatendita obstaklo, ne iris sian oficejon. La malsatanto eksentis sin pli malbone.

- Jen, jam tranĉdoloroj en la stomako komenciĝis, informis li kontentiĝe, - kaj poste - skorbuto pro nesufiĉa nutrado, forfalo de haroj

kaj dentoj.

Ptiburdukov venigis sian fraton-militkuraciston. Ptiburdukov-dua longe almetadis orelon al korpo de Loĥankin, kaj aŭskultis funkcion de ties organoj kun tia atento kun kiu kato aŭskultas movojn de muso, engrimpinta sukerujon. Dum tiu ĉi pristudo Vasisualij per larmoplenaj okuloj rigardis sian bruston, vilan kiel intersezona palto. Li tre bedaŭris sin. Ptiburdukov dua alrigardis na Ptiburdukov-unua kaj informis ke la malsanulo ne devas observi dieton. Li povas manĝi ĉion. Ekzemple supon, kotletojn, kompoton. Ankaŭ panon, legomojn kaj fruktojn. Ne ekskluzivas fiŝoj. Fumi li povas, certe ne troigante. Drinki li ne rekomendas, sed por apetito estus bone enigi en la organismon glaseton da bona portovino. Entute la kuracisto malbone komprenis animan dramon de Loĥankin-familio. Brue spirante kaj frapante per la botoj li foriris, deklarinte adiaŭe ke al la malsanulo ne estas malpermesate bani sin en maro kaj veturi per biciklo.

Sed la malsanulo intencis enigi en sian organismon nek kompoton, nek fiŝojn, nek aliajn delikataĵojn. Li ne ekiris al la maro por bani sin, sed daŭrigis kuŝi sur la kanapo, superŝutante ĉirkaŭulojn per la insultaj jamboj. Varvara sentis kompaton al li. «Pro mi li malsatas», – meditis ŝi fiere, – «kia tamen

pasio. Ĉu kapablas Saŝa al tiu ĉi alta sento?» Kaj ŝi ĵetadis maltrankvilajn rigardojn sur satan Saŝa, kies aspekto montris ke la amaj suferoj ne malhelpas al li regule enigi en la organismo tagajn kaj vesperajn manĝaĵojn. Foje eĉ, kiam Ptiburdukov eliris el la ĉambro, ŝi nomis na Vasisualij «malfeliĉeta». Dum tio ĉe buŝo de la malsatanto denove aperis sandviĉo kiu denove estis malakceptita. «Ankoraŭ iom da eltenemo», – pensis Loĥankin, – «kaj ne vidas Ptiburdukov mian Varvara».

Li plezure aŭskultis voĉojn el la najbara ĉambro:

– Li mortos sen mi, – diris Varvara, – ni devas atendi. Vi ja vidas ke mi ne povas foriri nun.

Nokte Varvara spektis timigan sonĝon. Sekiĝinta pro la alta sento Vasisualij ronĝis blankajn spronojn sur botoj de la milita kuracisto. Estis terure. Vizaĝo de la kuracisto esprimis humilon kvazaŭ ĉe bovino, kiun melkas vilaĝa ŝtelisto. La spronoj tondris, la dentoj klakis. Timigita Varvara vekiĝis.

Flava japana suno lumis preme, uzante tutan sian forton por lumigi tiajn bagatelaĵojn kiel flakon-ŝtopilon de parfumo «Turandot». La laktola kanapo estis malplena. Varvara movis la okulojn, kaj ekvidis na Vasisualij. Li staris ĉe malfermita pordeto de la ŝranko, dorse al la lito, kaj laŭte ŝmacis. Pro senpacienco li kliniĝis,

frapetis per la piedo en verda duonŝtrumpo, kaj elnazigis fajfantajn kaj plaŭdajn sonojn. Malpleninte altan vazeton da konservaĵoj, li singarde demetis kovrilon de la kaserolo kaj, eniginte la fingrojn en la malvarman barĉon, eltiris de tie pecon da viando.

Konec голодовки («Fino de la malsat-striko»)

Se Varvara kaptus la edzon dum tiu ĉi okupo eĉ en plej bona tempo de ilia geedza vivo, ankaŭ tiam na Vasisualij trafus malbono. Sed nun lia sorto estis decidita.

– Loĥankin! – diris ŝi per terura voĉo.

La malsatanto, pro la timo, ellasis la viandon, kiu plaŭdis reen en la kaserolon, suprenigante ŝpruceton el brasiko kaj karotaj steloj. Kun plenda hurlo Vasisualij ĵetiĝis sur la kanapon. Varvara silente kaj rapide vestiĝis.

– Varvara! – diris li tra la nazo, – ĉu vere Ptiburdukov vin forlogas?

Respondo mankis.

– Lupino aĉa, fia, abomena, – necerte deklaris Loĥankin, – foriras vi de mi al Ptiburdukov...

Sed estis jam malfrue. Vane ĝemploris Vasisualij pri la amo kaj la malsat-morto. Varvara foriris por ĉiam, tirante post si la vojaĝsakon kun kolora trikot-pantalono, felta ĉapelo, figuraj flakonoj, kaj ceteraj objektoj de virina ĉiutagaĵo.

Kaj en vivon de Vasisualij Andreiĉ venis periodo de turmentaj meditoj kaj moralaj suferoj. Estas homoj kiuj ne scipovas suferi, iel ne sukcesas ili. Eĉ se ili suferas, do penas fari tion kiom eble rapide kaj nerimarke por ĉirkaŭantoj. Sed Loĥankin suferis aperte, majeste, li drinkaĉis sian suferon per teaj glasoj, li festenis ĝin. La granda funebro donis al li eblecon ankoraŭfoje primediti signifon de rusa intelektularo, kaj ankaŭ tragedion de rusa liberalismo.

«Sed eble tiel decas», – pensis li, – «eble tio estas elsufero, kaj mi eliros el ĝi purigita? Ĉu ne estas tio sorto de ĉiuj homoj kun delikata konstitucio, kiuj staras pli alte ol homamaso? Galilejo, Milukov, A.F. Koni. Jes, jes, Varvara pravas, tiel decas!».

Tamen la anima depresio ne malhelpis al li aperigi gazetan anoncon pri lu-dono de la dua ĉambro.

«Tio, malgraŭ ĉio, subtenos min materie dum la komenca tempo», – decidis Vasisualij. Kaj li denove profundiĝis en nebulajn pensojn pri suferoj de karno kaj pri signifo de animo estiel fonto de belo.

De tiu ĉi okupo ne povis delogi lin eĉ insistaj atentigoj de la najbaroj pri endo malŝalti post si lumon en la necesejo. Troviĝante en malakordo de sentoj, Loĥankin konstante forgesis fari tion, kio tre indignis la ŝparemajn najbarojn.

Tamen loĝantoj de multĉambra komuna loĝejo numero tri, en kiu loĝis Loĥankin, estis opiniataj estiel homoj kapricaj, kaj estis konataj al la tuta domo pro siaj oftaj skandaloj kaj pezaj kvereloj. Loĝejon numero tri oni alinomis eĉ «Korvejo». Longa komuna loĝado hardis tiujn ĉi homojn, kaj ili ne konis timon. Loĝejan balancon subtenis aliancoj inter apartaj loĝantoj. Iam la loĝantoj de «Korvejo» kuniĝis kontraŭ iu el si, kaj sorto de tiu fariĝis tre malbona. Centrifuga forto de fijuĝado kaptis ĝin, entiris en kancelariojn de jurist-konsilistoj, ciklone portis tra fumigitaj juĝejoj koridoroj, kaj enpuŝis en ĉelojn de kamaradaj kaj popolaj juĝejoj. Kaj ankoraŭ longe vagis la malobeema loĝanto en serĉado de justo, venante eĉ ĝis tutsovetia vilaĝestro kamarado Kalinin. Kaj ĝis sia morto mem tiu ĉi luanto elŝutos jurajn vortetojn, kiujn li akiros en diversaj oficejoj, kaj nomos sin ne «kamarado Ĵukov», kiel li devus nomiĝi de sia naskiĝtago, sed «la viktimiĝinta flanko». Sed plej ofte, kaj kun aparta plezuro, li prononcados frazon «okazigi perjuĝan postulon». Kaj vivo lia, kiu ankaŭ ĝis tio ne fluis per lakto kaj mielo, ekestos jam tute aĉa.

Aviadisto Sevrjugov kiu, antaŭ la dramo de Loĥankin-familio, ankaŭ loĝis, al sia malfeliĉo, en la loĝejo numero tri, forflugis en urĝan

vojaĝon laŭ ordono de **Osoviaĥim**¹⁷ trans arktan cirklon. Tuta mondo ekscite sekvis flugon de Sevrjugov. Malaperis alilanda ekspedicio, iranta al norda poluso, kaj Sevrjugov devis trovi ĝin. Mondo vivis per espero pri sukcesaj agoj de la piloto. Konversaciis radiostacioj de ĉiuj kontinentoj, meteorologoj avertis heroan Sevrjugov pri la magnetaj tempestoj, kurtonduloj plenigis eteron per la fajfado, kaj pola ĵurnalo «Kuriero de Polonio», proksima al ministerio de eksteraj aferoj, jam postulis disvastigon de Pollando ĝis limoj de 1772-a jaro. Tutan monaton flugadis Sevrjugov super la glacia dezerto, kaj bruego de liaj motoroj estis aŭdebla en tuta mondo.

Finfine Sevrjugov faris tion kio tute konsternis ĵurnalon, proksiman al pola ministerio pri eksteraj aferoj. Li trovis la ekspedicion, perdiĝintan inter glaciaj rokoj, sukcesis informi pli ĝia ĝusta lokiĝo sed, post tio, subite malaperis mem. Post la informo tuta terglobo pleniĝis per krioj. Nomon de Sevrjugov oni prononcis per tricent dudek lingvoj kaj dialektoj, inkluzive lingvon de nigrapiedaj indianoj; portretoj de Sevrjugin en bestaj feloj aperis sur ĉiu libera peco de papero. Gabrielo D'Annuncio, en konversacio kun reprezentantoj de gazetaro, deklaris ke li ĵus pe-is novan

17. Osoviaĥim: «publika organizaĵo por kontribuado al defendo avia kaj kemia».

romanon, kaj tuj elfugas al serĉado de la heroo ruso. Aperis ĉarlestono «Al mi kun mia karulino sur nordpoluso estas varme». Kaj oldaj moskvaj fuŝistoj Malplenulo-Verter, Leonid Babilevskij kaj Boris Amoniakov, kiuj delonge praktikis literaturan dumpingon, elĵetante en la merkaton sian varon je forĵet-prezoj, jam verkis revuon sub titolo: «Ĉu ankaŭ al vi estas malvarme?». Unuvorte nia planedo travivis grandiozan sensacion.

Sed sensacion eĉ pli grandan elvokis tiu ĉi informo en loĝejo numero tri, pli konata sub nomo «Korvejo», kaj troviĝanta en domo numero ok sur Citrona interstrato.

– Malaperis nia loĝanto, – ĝoje diris eksa stratpurigisto Nikita Prjaĥin, sekigante super primuso sian feltan boton. – Malaperis, karulo. Ne flugu ja, ne flugu! Homo devas ne flugi sed iri. Iri devas li, iri.

Kaj li turnadis la boton super la ĝemanta flamo.

– Ĝisflugis la flavokululo, – balbutis la avino, kies nomon-familinomon konis neniu. – Jen la ĉambro liberiĝis, loĝa spaco!

Ŝi loĝis en mezetaĝo, super la kuirejo kaj, kvankam la tuta loĝejo lumiĝis per elektro, la avino bruligis ĉe si, supre, kerosenan lampon kun reflektilo. Elektron ŝi ne konfidis. La avino unua prononcis la vorton kiu delonge jam pezigis korojn de «korvejanoj». Pri ĉambro de la

malaperinta piloto ekparolis ĉiuj: kaj eksa montara duko, nun orient-devena laboristo civitano Higienoŝvili, kaj Dunja, luanta liton en ĉambro de onklino Paŝa, kaj onklino Paŝa mem, – vendistino kaj alkoholistino, kaj Aleksandr Dmitrieviĉ Suĥovejkin, kiun en tiu ĉi loĝejo oni nomis simple Mitriĉ, kiu iam estis kortegano de lia imperiestra moŝto; kaj ceteraj loĝejoj malgravuloj, kiujn estris respondeca luantino Lucino Francevna Pferd.

– Kio ja, – diris Mitriĉ, ordigante orkadrigitajn okulvitrojn, kiam la kuirejo pleniĝis per la loĝantoj, – se la kamarado malaperis, oni devas dividi. Mi, ekzemple, delonge havas rajton je aldona spaco.

– Kial doni spacon al viro? – oponis litdungitino Dunja. – Oni devas al virino. Ĉe mi dum tuta mia vivo eble neniam ripetiĝos okazo ke viro subite malaperis.

Kaj longe post tio ŝi puŝiĝis inter la kuniĝintoj, donante diversajn pruvojn, kaj precipe ofte prononcante vorton «viro».

Ĉiuokaze opinioj de la loĝantoj kuniĝis al tio ke la ĉambron oni devas forpreni senprokraste.

Samvespere mondo ektremis pro nova sensacio. Kuraĝa Sevrjugov ekestis trovita. Niĵnij Novgorod, Kvebeko kaj Rejkjaviko aŭdis vokojn de Sevrjugov. Li sidis kun deformita ĉasio sur okdek kvara latitudo. Etero skuiĝis pro informoj: «La kuraĝa ruso sentas sin perfekte»,

«Sevrjugov sendas raporton al la aviadestraro». «Ĉarlz Lindberg (Lindbergh) opinias ke Sevrjugov estas plej bona el nuntempaj aviadistoj». «Sep glacirompiloj eliris por helpi al Sevrjugov kaj al trovita per li ekspedicio». En spacoj inter tiuj ĉi informoj ĵurnaloj publikigis nur fotografaĵojn de iuj glaciaj randoj kaj bordoj. Senĉese aŭdiĝis vortoj: «Sevrjugov, Nordkap, latitudo, Sevrjugov, Franc-Jozefa insularo, Spicbergo, felaj botoj, brulaĵo, Sevrjugov».

Senkuraĝiĝon, kiu trafis na «Korvejo», baldaŭ ŝanĝis trankvila certeco. La glacirompiloj moviĝis malrapide, pene rompante glaciajn kampojn.

– Depreni la ĉambron kaj fino, – diris Nikita Prjaĥin. – Estas bone al li sidi tie, sur la glacio, sed ĉi tie, ekzemple, Dunja ĉiujn rajtojn havas. Des pli ke, laŭ leĝo, loĝanto ne rajtas foresti pli ol du monatoj.

– Hontu, civitano Prjaĥin! – oponis Varvara, tiam ankoraŭ Loĥankina, svingante ĵurnalon «Novaĵoj». – Ja tio estas heroo. Li troviĝas nun sur okdek-kvara latitudo!

– Kiu tiu latitudo estas tio, – malklare resonis Mitriĉ. – Eble tiu ĉi latitudo tute ne ekzistas. Tion ni ne scias. Ni en gimnazioj ne lernis.

Mitriĉ diris puran veron. En gimnazio li ne lernis. Li pe-lernis Paĝian liceon.

- Ja komprenu vi, - ekscitiĝis Varvara, ŝovante al nazo de la kortegano la ĵurnalan paĝon. - Jen artikolo. Ĉu vi vidas? «Inter glacirompaĵoj kaj *ajsbergoj*¹⁸».

- *Ajsbergoj!* - diris Mitriĉ ironie. - Tion ni povas kompreni. Jam dek jaroj oni ne donas vivi. Ĉie tiuj ĉi Ajsberg-oj, Vajnberg-oj kaj ceteraj Rabinoviĉ-oj. Ĝuste diras Prjaĥin. Forpreni - kaj fino. Des pli ke ankaŭ Lucina Francevna konfirmas pri la leĝo.

- Kaj la aĵojn sur la ŝtuparon forĵeti, al diablo hunda! - per brusta voĉo kriis eksa duko kaj nuna orient-devena laboristo civitano Higienoŝvili.

Oni rapide pe-bekis na Varvara, kaj ŝi kuris plendi al sia edzo.

- Sed ĉu ne eblas ke devas esti ĝuste tiel, - respondis la edzo, levante la faraonan barbon, - eble per buŝo de simpla kamparano Mitriĉ parolas majesta kruda vero. Primeditu vi rolon de rusa intelektularo kaj ĝian signifon.

En tiun grandan tagon kiam la glacirompiloj atingis finfine tendon de Sevrjugov, civitano Higienoŝvili rompis seruron sur pordo de Sevrjugov, kaj elĵetis en la koridoron tutan havaĵon de la heroo, inter alie ankaŭ pendantan sur la muro ruĝan helicon. La ĉambron enloĝiĝis Dunja, kiu tuj enlasis, kontraŭ pago, seson da

18. *ajsberg*: (ruse, sed ne nur) flosanta glaci-monto.
PIV: glaciinsulo.

lit-luantoj. Sur la akirita spaco dum la tuta nokto daŭriĝis festeno. Nikita Prjaĥin ludis tir-harmonikon, kaj kortegano Mitriĉ dancis «rusan» kun ebria onklino Paŝa.

Se famo de Sevrjugov estus iomete malpli tutmonda ol kiun li akiris per siaj rimarkindaj flugoj super Arktiko, li neniam vidus sian ĉambron, ensuĉus lin centrifuga forto de juĝaĉado, kaj ĝis sia morto mem li nomus sin ne «kuraĝega Sevrjugov», ne «glaci-heroo», sed «la suferanta flanko». Sed ĉi-foje «Korvejo» okazis signife pinĉita. La ĉambron oni redonis (Sevrjugov baldaŭ translokiĝis en novan domon), kaj brava Higienoŝvili pasigis en malliberejo kvar monatojn pro eksterrajta agmaniero, kaj revenis de tie kolera kiel diablo.

Tio estas li kiu prezentis al orfiĝinta Loĥankin unuan postulon pri tio ke lasante la necesejon oni devas regule malŝalti la elektron. Dum tio liaj okuloj estis decide diablaj. Distriĝema Loĥankin ne aprezis gravecon de la deklaro kiun entreprenis civitano Higienoŝvili, kaj tiamaniere preterrigardis komencon de la konflikto, kiu venigis baldaŭ al evento teruriga, neniam okazinta en loĝeja praktiko.

Jen kiel okazis tio. Vasisualij Andreiĉ daŭre forgesis malŝalti lumon en la ejo de komuna uzado. Ĉu povis li memori pri tiaj estad-malgravaĵoj post kiam foriris la edzino, kiam li restis eĉ sen monereto, kaj kiam ankoraŭ ne

estis ĝisfine komprenita tuta multflanka rolo de rusa intelektularo? Ĉu povis li imagi ke sensignifa bronza lumaĉo de ok-kandela lampo elvokos ĉe la najbaroj tiel fortan senton? Unue oni avertis lin kelkfoje tage. Poste alsendis leteron, verkitan per Dmitriĉ, kaj subskribitan per ĉiuj loĝantoj. Kaj, fine, oni ĉesis averti, kaj jam ne sendis leterojn. Loĥankin ankoraŭ ne aprezis signifon de la okazantaĵo, sed jam neklare ekŝajnis al li ke iu ringo estas preta fermiĝi.

Marde vespere alkuris knabino de onklino Paŝa kaj unuspire raportis:

– Ili lastfoje diras ke vi malŝaltu.

Sed ial okazis ke Vasisualij Andreiĉ denove forgesis, kaj la lampo daŭrigis sian kriman lumadon tra la araneaĵo kaj malpuraĵo. La loĝejo eksuspiris. Post minuto en pordo de Loĥankin-ĉambro aperis civitano Higienoŝvili. Li vestis bluajn tolajn botojn kaj platan ĉapon el bruna ŝafida pelto.

– Iru, – diris li, invitante na Vasisualij per fingre.

Li forte prenis lin je la mano, kondukis tra la malluma koridoro, kie Vasisualij ial eksopiris kaj komencis eĉ iomete elŝiriĝi, kaj per bato je la dorso li enpuŝis na Vasisualij en mezon de la kuirejo. Kroĉiĝinte je ŝnuroj por tolaĵ-sekigo, Loĥankin retenis la ekvilibron, kaj time ĉirkaŭrigardis. Ĉi tie kolektiĝis ĉiuj loĝantoj.

Silente staris ĉi tie Lucina Francevna Pferd. Violkoloraj kemiaj sulkoj kuŝis sur potencohava vizaĝo de la respondeca luantino. Apud ŝi, malĝojante, sidis sur la kuir-forno ebrieta onklino Paŝa. Nudpieda Prjaĥin ridetante rigardis iom timiĝintan Loĥankin. De sur mezetaĝo pendis kapo de nenies avino. Dunja faris gestojn al Mitriĉ. Eksa kortegano eksmajlis, kaŝante ion post sia dorso.

- Kio? Ĉu okazos komuna kunsido? - demandis Vasisualij Andreiĉ per alteta voĉo.

- Okazos, okazos, - diris Nikita Prjaĥin, proksimiĝante al Loĥankin, - ĉio estos al vi. Kafo estos al vi kaj *kakava*! Kuŝu! - kriis li subite, elspirante na Vasisualij ĉu alkoholon, ĉu terebinton.

- En kiu senco kuŝu? - demandis Vasisualij Andreiĉ, komencante tremi.

- Pri kio ja paroli kun la malbona homo! - diris civitano Higienoŝvili. Kaj, kaŭriĝinte, li komencis palpe priserĉi talion de Loĥankin, malfiksante la ŝelkojn.

- Helpu! - flustre prononcis Vasisualij, sendante frenezan rigardon al Lucina Francevna.

- Elektron vi devis malŝalti! - severe respondis civitanino Pferd.

- Ni ne estas burĝoj por vane elektron bruligi, - aldonis kortegano Mitriĉ, mergante ion en sitelon kun akvo.

- Mi ne kulpas! - elpepis Loĥankin, penante

liberiĝi el manoj de eksa duko kaj nuna orient-
devena laboristo.

– Ĉiuj ne kulpas! – balbutis Nikita Prjaĥin,
altenante la skuiĝantan loĝanton.

– Sed mi nenion tian faris.

– Ĉiuj nenion tian faris.

– Ĉe mi estas anima depresio.

– Ĉe ĉiuj estas anima depresio.

– Vi ne rajtas min tuŝi. Mi estas anemia.

– Ĉiuj, ĉiuj estas anemiaj.

– De mi la edzino foriris! – superstreĉiĝis
Vasisualij.

– De ĉiuj la edzino foriris, – respondis Nikita
Prjaĥin.

– Agu, agu, Nikita! – klopode diris
kortegano Mitriĉ, elprenante al lumo malsekajn
brilajn vergojn. Pro la paroladoj eĉ ĝis la
vespero ne pe-os ni.

Oni kuŝigis na Vasisualiaj Andreiĉ ventre sur
la plankon. Liaj kruroj eklumis lakte.
Higienoŝvili svingis plenforte, kaj la vergo alte
fajfis en la aero.

– Panjo! – jelpis Vasisualij.

– Ĉe ĉiuj estas panjo, – mentore diris
Nikita, premante na Loĥankin per la genuo.

Kaj tiam Vasisualij subite eksilentis. «Ĉu,
eble, tiel decas», – pensis li, ŝiriĝante pro la
batoj, kaj pririgardante grizajn kirasajn ungojn
sur piedo de Nikita. – «Eble ĝuste en tio kaŝiĝas
elsufero, puriĝo, majesta ofero...».

Tial dum oni vergis lin, dum Dunja konfuze ridis, kaj la avino alkriis de la duonetaĝo: «Tiel lin, kompatindan, tiel lin, karuleton!» – Vasisualij Andreiĉ koncentriĝe pensis pri signifo de rusa intelektularo, kaj pro tio ke ankaŭ Galilejo suferis pro la vero.

Lasta prenis la vergojn Mitriĉ.

– Nu, donu al mi provi, – diris li, suprenigante la manon. – Gustumu mi la vergojn al liaj lumbaj partoj.

Sed Loĥankin ne gustumis la korteganan vergojn. Oni frapis je pordo de la malĉefa eniro. Dunja ĵetiĝis malfermi. (Ĉefa pordo de «Korvejo» estis delonge alnajlita kaŭze de tio ke la loĝantoj neniel povis solvi kiu unua lavu la ŝtuparon. Pro sama kaŭzo por ĉiam estis ŝlosita ankaŭ la banĉambro.)

– Vasisualij Andreiĉ, pri vi nekonata viro demandas, – diris Dunja, kvazaŭ okazis nenio.

Kaj vere ĉiuj ekvidis nekonatan viron en blanka ĝentlemana pantalono, starantan ĉe la pordo. Vasisualij Andreiĉ vigle saltleviĝis, ordigis la tualeton kaj, kun nebezona smajlo, turnis la vizaĝon al eniranta Bender.

– Ĉu mi ne malhelpis? – ĝentile demandis la granda kombinanto, duonfermante la okulojn.

– Jes, jes, – elmurmuris Loĥankin, ĝentile riverencante, – mi, ĉu vi scias, estis ĉi tie, kiel diri, iom okupata... Sed... ŝajnas ke mi jam liberiĝis, ĉu?

Kaj li favorserĉe rigardis la flankojn. Sed en la kuirejo estis jam neniu, krom onklino Paŝa, endormiĝinta sur la kuir-forno dum la vergado.

Sur la tabula planko kuŝaĉis apartaj vergetoj, kaj blanka tola butono kun du truetoj.

Я вам не помешал? («Ĉu mi ne malhelpis al vi?»)

– Bonvolu al mi, – invitis Vasisualij.

– Sed ĉu ne eblas ke mi, malgraŭ ĉio, delogis vin? – demandis Ostap, okazinte en unua ĉambro de Loĥankin. – Ne? Do bone. Ĉu tio ĉe vi «Lu. bon. ĉa. kn ĉ. bez. k kun m. v. al sol. int. f.». Kaj ĉu ĝi vere estas «bon.» kaj «kn. ĉ. bez.»?

– Tute ĝuste – vigliĝis Vasisualij, – bonega ĉambro kun ĉiuj bezonaĵoj. Kaj mi prenos malmulte. Kvindek rublojn monate.

– Mi ne marĉandos, – ĝentile diris Ostap, sed jen la najbaroj... kio pri ili?

– Bonegaj homoj, – respondis Vasisualij, – kaj entute, ĉiuj bezonaĵoj. Kaj la prezo malaltas.

– Sed ili, ŝajne, enigis ĉi tie korpajn punojn?

– Aĥ! – diris Loĥankin multsignife, – ja kiu finfine scias? Povas esti ke tiel decas. Povas esti ke ĝuste en tio troviĝas majesta krud-tola vero.

– Krud-tola? – enpensiĝe ripetis Bender. – Kiu estas ankaŭ hejme teksita? Jen kiel. Do, el kiu klaso de gimnazio oni forpelis vin pro malsukceso, ĉu el sesa?

– El kvina, – respondis Loĥankin.

– Ora klaso. Do ĝis fiziko de Krajeviĉ vi ne venis? Kaj de tiam vi vivas ekskluzive intelektmaniere, ĉu? Sed, cetere, por mi tio ne gravas. Vivu kiel vi volas. Morgaŭ mi enloĝiĝos.

– Kaj kio pri la antaŭpago? – demandis la eksa gimnaziano.

– Vi estas ne en preĝejo, oni ne trompos vin, – decide diris la granda kombinanto. – Estos antaŭpago. Post iom da tempo.

Ĉapitro 14

Unua rendevuo

Kiam Ostap revenis en hotelon «Karlsbad» kaj, respegulinte en nekalkulebla nombro da vestiblaj, ŝtuparaj kaj koridoraj speguloj, per kiuj oni tiel ŝatas dekori samspecajn instituciojn, eniris sian ĉambron, lin konfuzis malordo reganta tie. La ruĝa pluŝa brakseĝo kuŝis per siaj mallongaj piedetoj supren, evidentigante ne-allogan jutan inverson. La velura tablotuko kun pasamentoj deŝoviĝis de la tablo. Eĉ pentraĵo «Apero de Kristo antaŭ la popolo», ankaŭ ĝi oblikviĝis flanken, perdinte ĉi-state plimulton da edifo, kiun enigis en ĝin la pentristo. De la balkono blovis malvarmeta vaporŝipa vento, movante disĵetitajn sur la lito bankbiletojn. Inter ili kuŝaĉis fera skatoleto de cigaredoj «Kaŭkazo». Sur la tapiŝo, kroĉiĝinte, kaj elĵetante la piedojn, silente ruliĝis

Panikovskij kaj Balaganov.

La granda kombinanto kun abomeno transpaŝis la interbatantojn, kaj eniris la balkonon. Sobe, sur la bulvardo, murmuretis promenantoj, mueliĝis sub iliaj piedoj gruzo, super la nigraj aceroj ŝvebis kunfandiĝa spiro de simfonia orkestro. En malluma profundo de la haveno fanfaronis per la lumoj kaj tondris per la fero la konstruata fridejo.

Post la moleo muĝis kaj ion postulis nevidebla vaporŝipo: verŝajne ĝi petis permeson eniri la havenon.

Reveninte la ĉambron Ostap ekvidis ke la laktaj fratoj sidas jam unu kontraŭ la alia sur la planko kaj, lace deŝovante unu la alian per la plandoj, balbutas: «Kaj ci, kio ci estas?»

– Ĉu vi ne sukcesis dividi? – demandis Bender, fermante la kurtenon.

Panikovskij kaj Balaganov tuj saltleviĝis kaj komencis rakonti. Ĉiu el ili atribuis tutan sukceson al si, kaj kalumniis agojn de la alia. Ofendajn por si detalojn ili, sen interkonsento, forlasis, prezentante anstataŭ ili grandan kvanton da detaloj, montrantaj pozitive ilian bravecon kaj lertecon.

– Nu, sufiĉas! – diris Ostap. – ne frapu la pargeton per siaj kalvaĵoj. Bildo de la batalo estas klara al mi. Vi diras ke kun li estis junulino? Tio bonas. Do, mizera oficisto senĝene portas en la poŝo... vi, ŝajne, jam kalkulis, ĉu?

Kiom estas tie? Ha! Dek mil! Salajro de sinjoro Korejko por dudek jaroj da sindediĉa servo. Spektaĵo por dioj, kiel skribas plej saĝaj el ĉefartikolistoj. Sed verŝajne mi malhelpis al vi? Vi ion faris ĉi tie sur la planko, ĉu? Ĉu vi dividis la monon? Daŭrigu, mi spektos.

- Mi volis honeste, - diris Balaganov, kolektante la monon de sur la lito, - juste. Al ĉiu same: po du mil kvincent.

Kaj, distribuinte la monon je kvar amasetoj, li modeste deiris flanken, dirante:

- Al vi, al mi, al li, kaj al Kozleviĉ.

- Tre bone, - rimarkis Ostap. - Kaj nun dividu Panikovskij, ĉe li, ŝajne, estas aparta opinio.

Restinta ĉe aparta opinio Panikovskij komencis la aferon kun granda pasio. Kliniĝinte super la lito li movis siajn dikajn lipojn, salivis la fingrojn, kaj senfine translokigis la paperojn de loko al loko, kvazaŭ ludkartis grandan reĝan paciencludon. Post ĉiuj ĉi artifikoj sur la litkovrilo ordiĝis tri staketoj: Unu - granda, el puraj novaj paperoj, dua - sama, sed el paperoj ne tiel puraj, kaj tria - malgranda kaj tute malpura.

- Al vi kaj al mi po kvar mil, - diris li al Bender. - al Balaganov - du. Li eĉ du ne perlaboris.

- Kaj al Kozleviĉ? - demandis Balaganov, duonfermante pro kolero la okulojn.

- Pro kio al Kozleviĉ? – ekjelpis Panikovskij.
- Tio estas rabo! Kio estas Kozleviĉ, por dividi kun li? Mi konas neniun Kozleviĉ.
- Ĉu ĉio? – demandis la granda kombinanto.
- Ĉio, – respondis Panikovskij, ne forigante la okulojn de stako da puraj paperetoj. – Kiu Kozleviĉ povas esti ĉi-momente?
- Kaj nun dividos mi, – mastre diris Ostap.
- Li ne haste kunigis la amasetojn, enigis la monon en la feran skatoleton, kaj enŝovis ĝin en poŝon de la blanka pantalono.
- Tuta tiu ĉi mono, – konkludis li, – estos senprokraste redonata al suferinta flanko, al civitano Korejko. Ĉu plaĉas al vi tiu ĉi maniero de la divido?
- Ne, ne plaĉas, – elŝiriĝis ĉe Panikovskij.
- Ĉesu ŝerci, Bender, – malkontente diris Balaganov. – Oni devas dividi juste.
- Tio ne okazos, – malvarme diris Ostap. – Kaj, entute, mi ne intencas ŝerci en tiu ĉi meznokta horo.
- Panikovskij dissvingis la maljunulajn violkolorajn manplatojn. Li kun teruro ekrigardis la grandan kombinanton, deiris en angulon kaj silentiĝis. Nur iam brilis de tie ora dento de la konvenci-rompanto.
- Vizaĝo de Balaganov ekestis malseka, kvazaŭ kuiriĝinta per suno.
- Por kio do ni laboris? – diris li peze spirante. – Tiel ne decas. Tio... klarigu.

- Al vi, - ĝentile diris Ostap, - al amata filo de leŭtenanto Ŝmit, mi povas ripeti nur tion kion mi diris en Arbatov. Mi estimas kriminalan kodon. Mi estas ne rabisto sed idea batalanto pri bankbiletoj. En mian kvarcenton da honestaj manieroj forpreni monon rabo ne eniras, iel ne kongruas tio. Kaj, krom tio, ni venis ĉi tien ne por deko da miloj. Tiujn ĉi milojn mi, persone, bezonas minimume kvincent.

- Do por kio vi sendis nin? - demandis Balaganov, trankviliĝante. - Ni penadis.

- Alivorte vi volas demandi ĉu estas sciate al tre estimata komandanto kun kiu celo li entreprenis tiun ĉi lastan operacion? Al tio mi respondos: jes, estas sciate. Temas pri tio...

Ĉi-momente en la angulo estingiĝis la ora dento. Panikovskij turniĝis, klinis la kapon, kaj kun krio: «Sed ci, kio ci estas?» - ĵetiĝis, ekscitita, na Ostap. Sen ŝanĝi la pozon, kaj eĉ ne turnante la kapon, la granda kombinanto per puŝo de sia kaŭĉuka pugno revenigis la rabiĝintan konvenci-rompanton sur la antaŭan lokon, kaj daŭrigis:

- Temas pri tio, Ŝura, ke tio estis kontrolo. En poŝo de oficisto kun kvardek-rubla salajro okazis dek mil rubloj, kio aspektas iom strange, kaj donas al ni grandajn ŝancojn; tio permesas, kiel diras bukmekroj, esperi pri granda gajno. Kvincent mil, tio sendube estas gajno. Kaj ni ricevos ĝin tiel. Mi redonos al Korejko la dekon

da miloj, kaj li prenos ilin. Volus mi vidi homon kiu ne konsentos repreni sian monon. Kaj tiam venos lia fino. Lin pereigos la avido. Post kiam li konfesos pri sia riĉeco, mi tuj prenos lin simple per nudaj manoj. Estiel homo saĝa li komprenos ke parto estas malpli granda ol tuto, kaj fordonos al mi tiun ĉi parton por ne perdi ĉion. Kaj tiam, Ŝura, sur la sceno aperos certa telereto kun blua bordero...

– Ĝuste! – kriis Balaganov.

En la angulo ploris Panikovskij.

– Fordonu al mi mian monon, – lispis li, – mi estas tute malriĉa! Mi jam jaron ne estis en banejo. Min junulinoj ne amas.

– Turnu vin en Tutmondan ligon de seks-reformoj, – diris Bender. – Povas esti ke tie oni helpos al vi.

– Neniu min amas, – daŭrigis Panikovskij, tremante.

– Sed kial oni amu vin? Junulinoj ne amas tiajn kiel vi. Ili amas junajn, longpiedajn, politike doktajn. Sed vi post nelonge mortos. Kaj neniu skribos pri vi en ĵurnalo: «Ankoraŭ unu forbrulis laborante». Kaj ĉe via tombo ne sidos bela vidvino kun persaj okuloj. Kaj plorantaj infanoj ne demandos: «Paĉjo, paĉjo, ĉu vi aŭdas nin?»

– Ne parolu tiel! – kriis timigita Panikovskij.

– Mi pretervivos ĉiun el vi. Vi ne konas na Panikovskij. Panikovskij ankoraŭ ĉiujn vin

vendos kaj aĉetos. Fordonu mian monon.

– Pli bone diru, ĉu vi servos? Jes aŭ ne? Lastfoje mi demandas.

– Mi servos, – respondis Panikovskij, forviŝante malrapidajn maljunulajn larmojn.

Nokto, nokto, nokto kuŝis super la tuta lando.

En Nigramarska haveno facile turniĝis grupoj; ili sobigis la ŝtalajn kablojn en profundajn holdojn de alilandanoj, kaj denove turniĝis, por singarde, kun kata amo mallevi sur la kajon pinajn kestojn kun instalaĵoj por konstruo de Traktor-uzino. Rozkolora kometa flamo ŝiriĝis el altaj tuboj de siliciaj uzinoj. Flagris stelaroj de Dnepro-konstruo, de Magnitogorsko kaj Stalingrado. Norde leviĝis Krasnopotila stelo, kaj post ĝi ekflamis grandega kvanto da steloj unuagradaj. Estis ĉi tie fabrikoj, uzinoj, elektrostacioj, novkonstruadoj. Lumiĝis la tuta kvin-jara plano, per sia brilo superante antikvan, kutiman eĉ al egiptanoj ĉielon.

Kaj junulo, malfruvespere sidanta kun la amatino en laborista klubo, haste lumigis elektrizitan mapon de la kvinjara plano, kaj flustris:

– Rigardu, jen estas ruĝa lumeto. Tie estos Siberi-kombajno. Ni veturos tien. Ĉu vi volas?

Kaj la amatino mallaŭte ridis, liberigante sin el liaj manoj.

Nokto, nokto, nokto, kiel jam estas dirite, kuŝis super la tuta lando.

Ĝemis dormante monarkisto Malsanulev, kiu sonĝis grandegan sindikatan membrokarton. En trajno, sur supra dorma loko, ronkis inĝeniero Talmudovskij, ruliĝanta el Ĥarkov na Rostov, kien logis lin pli alta salajro.

Sur vasta atlantika ondo balanciĝis la usonaj ĝentlemanoj, veturigante en la patrolandon recepton de perfekta tritika memdistilaĵo. Sur sia kanapo turniĝis Vasisualij Loĥankin, frotante per la mano suferitajn lokojn. Maljuna rebusisto Sinickij vane uzadis elektron, verkante por periodaĵo «Akvokonduka afero» enigman bildeton: «Kie estas prezidanto de tiu ĉi komuna kunsido de laboristoj kaj oficistoj, venintaj elekti lokan sindikatkomitaton de la pumpa stacio?». Dum tio li penis ne brui, por ne vekti na Zosja. Brulegov kuŝis en la lito kun Serna Miĥajlovna. Ceteraj herkulesanoj maltrankvile dormis en diversaj partoj de la urbo. Aleksandr Ivanoviĉ Korejko ne povis endormiĝi, turmentata per pensoj pri sia riĉeco. Se tiu ĉi riĉaĵo tute forestus, li dormus trankvile. Kion faris Bender, Balaganov kaj Panikovskij, estas jam sciate. Kaj nur pri Kozleviĉ, ŝoforo kaj mastro de «Antilopo-Gnu», estos nun dirite nenio, kvankam jam trafis lin malagrabraĵo de tre politika eco.

Frumatene Bender malfermis sian akuŝistan

valizeton, prenis el ĝi policistan kaskedon kun blazono de urbo Kievo kaj, enpoŝiginte ĝin, ekiris al Aleksandr Ivanoviĉ Korejko. Survoje li parol-incitetis laktistinojn, (ĉar venis jam horo de tiuj energiaj virinoj, dum horo de oficistoj ankoraŭ ne komenciĝis), kaj murmuris vortojn de romanco «Kaj ĝojo de unua rendezuo jam ne sukcesas ekscitigi mian sangon». La granda kombinanto iom hipokritis. Unua rendezuo kun la milionulo-kontoristo ekscitis lin. Enirinte domon numero 16 sur Eta Tanĝanta strato, li surkapigis la oficialan kaskedon kaj, kuntirinte la brovojn, frapetis la pordon.

Meze de la ĉambro staris Aleksandr Ivanoviĉ. Li estis en senmanika ret-ĉemizo, kaj jam sukcesis surtiri la et-oficistan pantalonon. La ĉambro estis meblita kun ekzempla malriĉeco, akceptita dum antaŭrevolucia tempo en orfejoj kaj ceteraj similaj organizaĵoj, kiuj troviĝis sub protekto de imperiestrino Maria Fjodorovna. Ĉi tie troviĝis tri objektoj: fera malsanuleja liteto, kuireja tablo kun klapoj, provizitaj per turnebla lignaĵeto, kiun oni uzas kutime por ŝlosi vilaĝan necesejon, kaj kalviĝinta viena seĝo. En angulo kuŝis du halteroj, kaj inter ili staris du grandaj peziloj, plezuraĵo de pez-atleto.

Ekvidinte policiston Aleksandr Ivanoviĉ peze paŝis antaŭen.

– Ĉivitano Korejko? – demandis Ostap, helradie smajlante.

– Mi, – respondis Aleksandr Ivanoviĉ, ankaŭ montrante ĝojon pro renkonto kun potenc-rezentanto.

– Aleksandr Ivanoviĉ? – informiĝis Ostap, smajlante pli helradie.

– Ĝuste tiel, – konfirmis Korejko, varmigate sian ĝojon kiom eble pli.

Post tio al la granda kombinanto restis nur eksidi la vianan seĝon kaj establi sur sia vizaĝo eksternaturan smajlon. Farinte tion li ekrigardis na Aleksandr Ivanoviĉ. Sed la milionulo-kontoristo streĉiĝis, kaj elmontris diablo scias kion: kortuŝiĝon, ravon, kaj silentan adoron. Kaj ĉion ĉi – okaze de ĝoja renkonto kun la potenc-rezentanto.

Tiu ĉi kreskado de smajloj kaj sentoj memorigis manuskripton de komponisto Franc List (Franz Liszt), kie sur unua paĝo estas instrukciite ludi «rapide», sur la dua – «tre rapide», sur la tria – «multe pli rapide», sur la kvara – «kiel eble rapide», kaj malgraŭ ĉio, sur la kvina – «pli rapide».

Ekvidinte ke Korejko atingis la kvinan paĝon, kaj daŭrigi la konkuron jam ne eblas, Ostap turnis sin al la afero.

– Sed mi venis al vi kun komisio, – diris li,

estante serioza.

– Bonvolu, bonvolu, – rimarkis Aleksandr Ivanoviĉ, ankaŭ nebuliĝinte.

– Ni volas ĝojigi vin.

– Estos scivole ekscii.

Kaj, senmezure sopirante, Bender enpoŝigis la manon. Korejko sekvis liajn agojn kun tute jam funebra vizaĝo. Aperis fera skatoleto de cigaredoj «Kaŭkazo». Sed elkrio de miro, atendita de Ostap, ne sekvis. La kaŝa milionulo rigardis la skatolon kun plena indiferento. Ostap elprenis la monon, atente rekalkulis ĝin kaj, ŝovinte la staketon al Aleksandr Ivanoviĉ, diris:

– Ĝuste dek mil. Bonvolu skribi kvitancon pri la ricevo.

– Vi eraris, kamarado, – diris Korejko tre mallaŭte, – Kiu dek mil? Kiu kvitanco?

– Kial kiu? Ja oni prirabis vin hieraŭ, ĉu?

– Neniu min rabis.

– Kiel ne rabis? – ekmaltrankvilis Ostap. – Hieraŭ ĉe maro. Oni forprenis de vi dekon da mioj. La rabistoj estas arestitaj. Skribu la kvitancon.

– Je dio, neniu rabis min, – diris Korejko, sur kies vizaĝo preteriris lumeto. – Ĉi tie estas evidenta eraro.

La granda kombinanto, ne konsciinte ankoraŭ profundon de sia malvenko, permesis al si maldecan vantadon kiun, poste, li elmemoris kun honto. Li insistis, koleris, ŝovis la monon en

manojn de Aleksandr Ivanoviĉ, kaj entute, kiel diras ĉinoj, perdis la vizaĝon. Korejko levis la ŝultrojn, afable smajlis, sed la monon ne prenis.

– Do oni ne rabis vin?

– Neniu min rabis.

– Kaj oni ne prenis de vi dek milojn?

– Certe ne. Kion vi opinias, de kie ĉe mi povas esti tiom da mono?

– Vere, vere, – respondis Ostap, iom trankviliĝinte. – De kie ĉe malgrava oficisto tioma kvanto da mono?.. Do ĉe vi ĉio estas en ordo?

– Ĉio! – respondis la milionulo kun ĉarma smajlo.

– Kaj la stomako estas en ordo? – demandis Ostap, smajlante pli deloge.

– Plene. Ĉu vi scias, mi estas tre sana homo.

– Kaj pezaj sonĝoj ne turmentas vin?

– Jes, ne turmentas.

Poste, se paroli pri smajloj, ĉio iris kiel ĉe List: rapide, tre rapide, multe pli rapide, kiel eble rapide, kaj eĉ pli rapide. La novaj konatoj adiaŭis tiel, kvazaŭ ili senmezure ŝatis unu la alian.

– Vian kaskedeton policistan bonvolu ne forgesi, – diris Aleksandr Ivanoviĉ. – Sur la tablo ĝi restis.

– Ne manĝu antaŭnokte krudajn tomatojn, – konsilis Ostap, – por ne malutili al la stomako.

- Ĉion bonan, - diris Korejko gaje kliniĝante, kaj ĝentile riverencante.

- Ĝis revido, ĝis revido, - respondis Ostap, - interesa homo vi estas! Ĉio estas en ordo ĉe vi. Mirinde: kun tia feliĉo, - sed libera.

Kaj daŭre portante sur la vizaĝo ne bezonatan jam smajlon, la granda kombinanto elsaltis sur la straton. Kelkajn kvartalojn li trairis rapidpaŝe, forgesinte pri tio ke sur lia kapo sidas oficiala kaskedo kun blazono de urbo Kievo, tute ne kongrua kun urbo Nigramarsk. Kaj nur okazinte en amaso da respektindaj maljunuloj, brue parolantaj apud tegmentita verando de popolnura manĝejo numero 68, li rekonsciiĝis kaj komencis trankvile aprezi la ŝancojn.

Dum li profundiĝis siajn meditojn, distriĝe promenante tien kaj reen, la maljunuloj daŭrigis sian ĉiutagan aferon.

Tio estis homoj strangaj kaj ridindaj en nia tempo. Preskaŭ ĉiuj ili vestis blankajn tolajn veŝtojn kaj pajlajn ĉapelojn. Kelkaj portis eĉ ĉapelojn el malheliĝinta panama pajlo. Kaj certe ĉiuj portis flaviĝintajn amelitajn kolumojn, el kiuj leviĝis harplenaĵoj kokinaj koloj. Ĉi tie, ĉe manĝejo numero 68, kie antaŭe troviĝis famiĝinta kafejo «Florido», kolektiĝis rompaĵoj de antaŭrevolucia komerca Nigramarsk: makleristoj, restintaj sen siaj kontoroj, komisiistoj, velkintaj pro foresto de komisiantoj,

grenaj agentoj, mense siniliĝintaj librotenistoj, kaj aliaj malgravuloj. Iam ili kolektiĝis ĉi tie por aranĝi kontraktojn. Sed nun ilin tiris ĉi tien, en la sunan angulon, multjara kutimo, kaj bezono uzadi babile la maljunajn langojn. Ili ĉiutage pelegis moskvan «Vero», ĉar lokan gazetaron ili ne estimis, kaj ĉion ajn kio okazis en la mondo la maljunuloj pririgardis estiel preludo al deklaro ke Nigramarsk ekestis libera urbo. Iam, antaŭ cent jaroj, proksimume, Nigramarsk vere estis libera urbo, kaj tio estis tiel gaje kaj profite, ke legendo pri «*porto franko*» ĝis nun ĵetis oran brilon sur helan angulon de kafejo «Florido».

– Ĉu vi legis pri senarmiga konferenco? – turnis unu tola veŝto al tola veŝto alia. – Elpaŝo de grafo Bernstorf.

– Bernstorf estas kapo! – respondis la demandita veŝto per tia tono kvazaŭ konvinkiĝis pri tio surbaze de multjara konatiĝo kun la grafo. – Kaj vi, ĉu vi legis paroladon de Snouden en kunveno de voĉdonantoj en Birmingamo, tiu ĉi citadelo de konservativuloj?

– Nu, pri kio paroli... Snouden estas kapo! Aŭskultu, Valiadis, – turnis li al tria maljunulo en panam-ĉapelo. – Kion vi diros pri Snouden?

– Mi diros al vi honeste, – respondis la panam-ĉapelo, – al Snouden oni ne metu fingron en la buŝon. Mi, persone, mian fingron ne metus.

Kaj neniom ĝenita per tio ke Snouden pro

nenio en la mondo permesus al Valiadis enŝovi la fingron en sian buŝon, la maljunulo daŭrigis:

– Sed, malgraŭ ĉio, mi diros al vi sincere: Ĉemberlen (Chamberlain) ankaŭ estas kapo.

La tolaj veŝtoj levis la ŝultrojn. Ili ne neis ke ankaŭ Ĉemberlen estas kapo. Sed plej multe konsolis ilin Brian (Briand).

– Brian! – diris ili arde. – Jen estas kapo! Li, kun sia projekto de «Pan-Eŭropo»...

– Mi diru al vi sincere, *mesje Funt*, – flustris Valiadis, – ĉio estas en ordo. Beneŝ (Benesh) jam konsentis pri pan-Eŭropo, sed ĉu vi scias je kiu kondiĉo?

La tolaj veŝtoj venis pli proksimen, kaj eltiris la kokinajn kolojn.

– Je kondiĉo ke Nigramarsk estos deklarita libera urbo. Beneŝ estas kapo. Ili bezonas vendi al iu siajn agrikulturajn maŝinojn, ĉu? Do ni, ni aĉetos ilin.

Ĉe tiu informo okuloj de la maljunuloj ekbrilis. Ili jam multajn jarojn volis aĉetadi kaj vendadi.

– Brian – tio estas kapo! – diris ili suspirante. – Ankaŭ Beneŝ estas kapo.

Kiam Ostap rekonsciiĝis de siaj meditoj, li ekvidis ke baskon de lia surtuto forte tenas nekonata maljunulo en dispremita pajla ĉapo kun grasiĝinta nigra rubando. Lia alkroĉa kravato deflankiĝis, kaj rekte na Ostap rigardis lia kupra manuma fiksbutono.

– Kaj mi diras al vi, – kriis la maljunulo en orelon de la granda kombinanto, – ke MacDonald sur tiun ĉi fiŝhokon ne iros! Ĉu vi aŭdas?

Ostap permane deŝovis la emociiĝintan maljunulon, kaj eliris el la amaso.

– Guver (Hoover) – tio estas kapo! – aŭdiĝis de tie. – Ankaŭ Hindenburg estas kapo.

Ĝis tiu ĉi tempo Ostap venis jam al la decido. Li trafolumis mense tutan kvarcenton da rimedoj de honesta forpreno de mono kaj, kvankam inter ili troviĝis tiaj perloj kiel organizo de akcia komunumo por elakvigo de ŝipo kun ora ŝarĝo, droninta dum krimea milito, aŭ granda popolfesto por helpi al malliberuloj de kapitalismo, aŭ koncesio pri lupreno de vendejaj elpendaĵoj, – neniu el ili taŭgis al tiu ĉi nuna situacio. Do Ostap elpensis kvarcent-unuan rimedon.

«Konkero de la fortikaĵo per neatendita atako ne sukcesis», – pensis li, – «do endas komenci regulan sieĝon. Plej ĉefa fakto jam evidentiĝis. Mono ĉe la defendato estas. Kaj, se juĝi laŭ tio ke li senhezite rifuzis preni la dekon da miloj, – ege multe da mono. Do, pro foresto de konsento inter la flankoj, la kunsido daŭriĝas».

Li revenis hejmen, aĉetinte dumvoje firman flavan paperujon kun botetaj laĉoj.

– Nu? – samtempe demandis turmentitaj per la deziro Balaganov kaj Panikovskij.

Ostap silente venis al la bambua tableto, metis antaŭ si la paperujon, kaj grandlitere surskribis: «Dosiero pri Aleksandr Ivanoviĉ Korejko. Komencita la 25-an de junio de 1930. Pe-ita ___ _____ 19__» La laktaj fratoj rigardis la paperujon de post ŝultro de Bender.

– Sed kio estas tie, interne? – demandis scivolema Panikovskij.

– Ho! – diris Ostap. – Tie estas ĉio: palmoj, junulinoj, bluaj ekspresoj, helblua maro, blanka ŝipo, preskaŭ ne uzita smokingo, lakeo-japano, propra bilardejo, platenaj dentoj, sendifektaj ŝtrumpetoj, tagmanĝoj kun vera butero kaj, kio gravas, miaj etaj amikoj, honoro kaj potenco, kiujn donas mono.

Kaj antaŭ la mirigitaj antilopanoj li malfermis la malplenan paperujon.

Ĉapitro 15

Kornoj kaj hufoj

Vivis en mondo malfeliĉa privatulo. Tio estis sufiĉe riĉa homo, havanto de galanteria vendejo, troviĝanta oblikve de kinejo «Kapitolo». Li kviete vendis negliĝojn, puntajn enmetaĵojn, kravatojn, butonojn, kaj alian etan sed profitodonan varon. Foje, vespere, li revenis hejmen kun deformita vizaĝo. Li silente malfermis la ŝrankon, prenis de tie kompletan malvarman kokinon kaj, paŝante en la ĉambro, pe-manĝis ĝin tutan. Farinte tion li denove

malfermis la ŝrankon, prenis el ĝi ringon da kolbaso pezantan ĝuste duonkilogramo, eksidis sur la seĝon kaj, nevide rigardante saman punkton, malrapide pe-maĉis la tutan duonkilogramon. Kiam li etendis la manon por preni kuiritajn ovojn, kuŝantajn sur la tablo, la edzino time demandis:

– Kio okazis, Borja?

– Malfeliĉo! – respondis li, enigante en la buŝon malmolan kaŭĉukan ovon. – Oni terure impostis min. Vi eĉ ne povas imagi.

– Sed kial vi manĝas tiom multe?

– Mi devas distriĝi, – respondis la privatulo.
– Mi timas.

Kaj la tutan nokton iris la privatulo en siaj ĉambroj, kie nur vestoŝrankoj estis okopaj, kaj manĝis. Li pe-manĝis ĉion kio estis en la hejmo. Li timis.

Sekvonttage li fordonis duonon de la vendejo al vendado de kancelariaj varoj. Nun en la unua ekspon-fenestro troviĝis kravatoj kaj ŝelkoj, sed en la alia, sur du ŝnuretoj, pendis giganta flava krajono.

Poste venis tempo eĉ pli malbona. En la vendejo aperis tria kunhavanto. Tio estis horloĝisto, depuŝinta la krajonon flanken, kaj okupinta duonon de la fenestro per bronza horloĝo kun figuro de Psiĥo, sed sen minuta montrilo. Kaj kontraŭ malfeliĉa galanteriisto, kiu ne ĉesis jam ironie smajli, sidis nun, krom la

ĝenulo-krajonisto, ankaŭ horloĝisto kun nigra lupeo, enpuŝita en la okulon.

Ankoraŭ dufoje post tio vizitis la galanteriiston la malfeliĉo. La vendejon enveturis ankaŭ akvokondukisto, kiu tuj ekbruligis sian lutilan primuson, kaj jam tute stranga vendisto, decidinta ke loĝantaro de Nigramarsk ĝuste en 1930-a jaro post naskiĝo de Kristo ĵetiĝos aĉeti lian varon: amelitajn kolumojn.

Kaj iam fiera trankvila elpendaĵo de la galanteriisto akceptis abomenan aspekton:

VENDADO DE GALANTERIAJ VAROJ GALANT-KARTEL'

B.Kulturtriger

RIPARO DE DIVERSAJ HORLOĜOJ B. PAŬLO BURE

Glazus-Ŝenker

KANC-PAPER', ĈIO POR PENTRISTO KAJ SOVETIA OFICISTO

Leo Sokolovskij

RIPARO DE TUBOJ, LAVABOJ KAJ NECESABOJ

N.Fanatjuk

**PROFESIO: AMELITAJ KOLUMOJ
EL LENINGRADO**

Karlo Paviajnen.

Aĉetantoj kaj mendantoj kun timo eniris tiun iam aroman vendejon. Horloĝisto Glazius-Ŝenker, ĉirkaŭigita per radetoj, nazumoj kaj risortetoj, sidis sub la horloĝoj, inter kiuj estis eĉ unu tura. En la vendejo ofte kaj akre sonoris vekhorloĝoj. En profundo de la ejo amasiĝis lernantoj, informiĝantaj pri deficitaj kajeroj. Karlo Paviajn, atendante tempon kiam venos mendantoj, eltondis siajn kolumojn. Kaj ne sukcesis ĝentila B. Kulturtriger demandi aĉetantinon: «Kion vi deziras?» kiam akvokondukisto Fanatjuk tondre batis rustan tubon per la martelo, kaj fulgo de lia lut-primuso falis sur la teneran galanterian varon.

Finfine la stranga kartelo de privatuloj disfalis, kaj Karlo Paviajn forveturis per fiakro en mallumon, kunpreninte sian ne harmonian kun la epoko varon. Post li en maleston falis Galant-kartel kaj Kanc-paper, kiujn persekutis rajdaj financ-inspektoroj. Fanatjuk alkoholismiĝis, Glazius-Ŝenker foriris en horloĝistan kolektivon «Nova tempo». La feraj kurtenoj frape falis. Malaperis ankaŭ la amuza elpendaĵo.

Tamen, post nelonge, la kurteno denonve leviĝis, kaj super eksa arkeo da privatuloj aperis negranda akurata plataĵo:

**NIGRAMARSKA FILIO DE ARBATOV-KONTORO
PRI ŜTAT-PROVIZO
PER KORNOJ KAJ HUFOJ.**

Senokupa nigramarskano, enirinta la vendejon, povus rimarki ke vendotabloj kaj bretoj malaperis, planko estas pure lavita, staras ovaj kontoraj tabloj, kaj sur la muroj pendas ordinaraj oficejaj afiŝoj pri horoj de akcepto kaj malutilo de manpremoj. La novaperintan oficejeton jam sekciis bariero, starigita kontraŭ vizitantoj kiuj, tamen, ankoraŭ forestis. Ĉe eta tablo, sur kiu flava samovaro eligadis la vaporojn kaj alte plendis pri sia samovara sorto, sidis kuriero kun ora dento. Reviŝante teajn kruĉojn li incite kantis:

**Vere nunaj tempoj ne karesas
Vere nunaj tempoj ne karesas:
Oni jam je Dio kredi ĉesas
Oni jam je Dio kredi ĉesas.**

Post la bariero vagadis rufa bubo. Tempo de tempo li venis al tajpilo, frapis per la dika nefleksa fingro ĝian klavon, kaj ridegis. En profundo mem de la kontoro, sub plateto «Estro de la fako», sidis la granda kombinanto, lumigita per elektra lampo.

Hotelo «Karlsbad» jam delonge estis lasita. Ĉiuj antilopanoj, krom Kozleviĉ, ekloĝis en «Korvejo», ĉe Vasisualij Loĥankin, kiu estis ege skandalita pri tio. Li eĉ penis protesti, dirante ke li ludonis la ĉambron ne al tri, sed al sola intelekta fraŭlo. «*Mon dje*, Vasisualij Andreiĉ, – respondis Ostap senzorge, – ne turmentu vi vin. Intelektula el nia triopo estas nur mi, do la

kondiĉo estas observita». Al aliaj plendoj de la mastro Bender rezone diris: «*Majn got*, kara Vasisualij, eble ĝuste en tio troviĝas la majesta kruda vero». Kaj Loĥankin tuj trankviliĝis, elpetinte de Ostap dudekon da rubloj. Panikovskij kaj Balaganov bonege enviviĝis en «Korvejo», kaj iliaj voĉoj konvinke sonis en la komunloĝeja ĥoro. Na Panikovskij oni eĉ sukcesis akuzi pri tio ke li elverŝas nokte kerosenon el malpropraj primusoj. Mitriĉ ne preterlasis eblecon fari al Ostap iun ofendan rimarkon, responde al kio la granda kombinanto silente puŝis lin je la brusto.

La kontoro pri ŝtat-provizo per kornoj kaj hufoj estis establita pro multaj kaŭzoj.

– Esploro de Korejko-afero, – diris Ostap, – povas preni multe da tempo. Kiom, nur Dio scias. Sed, ĉar Dio forestas, do scias neniu. Terura stato. Povas esti ke tio prenos jaron, sed povas esti – monaton. Ĉiukaŭze ni bezonas legitimecon. Oni devas miksiĝi kun vigla amaso da oficistoj. Ĉion tion donos al ni kontoro. Min jam delonge allogas administra agado. En la animo mi estas burokrato kaj napkapulo. Ni ŝtat-provizos ion tre ridindan, ekzemple tekuleretojn, hundajn kol-identigilojn. Aŭ kornojn kaj hufojn. Bonege! Kornojn kaj hufojn por bezonoj de kombila kaj cigaredinga industrio. Kial ne? Krom tio en mia valizeto troviĝas mirindaj formularoj por ĉiu okazo, kaj ronda

universala stampilo.

Mono, de kiu rezignis Korejko, kaj kiun skrupula Ostap decidis enregistri, estis metita en bankon je konto de la nova oficejo. Panikovskij denove ribelis, kaj postulis dividon, do, pune, li ricevis postenon de malalte pagata kuriero, kio estis humiliga por lia liberama karaktero. Balaganov akiris gravan oficon de rajtigito pri hufoj kun salajro je naŭdek du rubloj. En pulbazaro estis aĉetita malnova tajpilo «Adler», en kiu forestis litero «ko». Do estis bezonate uzi anstataŭe literon «go». Tial unua jam oficiala letero, kiun Ostap sendis en vendejon pri kancelariaj varoj sonis tiel:

Bonvolu transdoni al prezentanto de ĉi-letero, al guriero de Nigramarska filio, gamarado Panigovskij, gancelariajn varojn je 150 rubloj (cent gvindek) je gonto de Administracio en urbo Arbatov.

Aldonoj: sen aldonoj.

– Jen sendis Dio la stultulon – rajtigiton pri hufoj! – koleris Ostap. – Nenion oni povas komisii al li: aĉetis tajpilon kun nazkatara akĉento. Do mi estas nun fag-estro, ĉu? Porko vi estas Ŝura, post tio!

Sed eĉ tajpilo kun la mirinda prononco ne sukcesis nebuligi luman ĝojon de la granda kombinanto. Al li tre plaĉis lia nova okupo. Ĉiuhore li enkuris la kontoron kun aĉetoj. Li

venigis tiel komplikajn kancelariajn maŝinojn kaj aparatojn, ke la kuriero kaj la rajtigo nur aĥis. Ĉi tie estis truigiloj, kopiilaj premiloj, ŝraŭba tabureto kaj multekosta bronza inkujo por diverskolora inko, aspektanta kiel kelkaj kabanoj. Nomo de tiu ĉi verko estis «Vizaĝe al vilaĝo», kaj kostis ĝi cent kvindek rublojn. Ĉion kronis krudfera fervoja dat-stampilo, kiun Ostap elpostulis de fervojstacio. Fine Bender alportaĉis branĉajn cervajn kornojn. Panikovskij, grakĝemante, kaj plendante pri sia malalta salajro, alnajlis ilin super tablo de la estro. Ĉio iris bone, eĉ bonege. Al la glate iranta laboro ĝenis nur nekomprena foresto de la aŭto kaj de ĝia glora ŝoforo Adam Kozleviĉ.

Dum tria tago de la kontor-ekzisto aperis unua vizitanto. Al ĉies miro tio estis poŝtisto. Li alportis ok pakaĵojn kaj, post konversacio kun kuriero Panikovskij pri tio kaj alio, li foriris. En pakaĵoj okazis tri avizoj, per kiuj reprezentanto de la kontoro estis urĝe vokata al konsiliĝoj kaj kunsidoj, kaj ĉiuj ili substrekis ke la alveno estas deviga. En aliaj paperoj troviĝis postuloj de nekonataj sed, ŝajne, energiaj oficejoj prezenti diversajn informojn, antaŭkalkulojn kaj tabelojn en multaj ekzempleroj, kaj ankaŭ tion urĝe kaj devige.

– Kio estas tio? – kriis Ostap. – Nur antaŭ tri tagoj mi estis libera monta aglo, krakis per la flugiloj kie mi volis, sed nun, rigardu, la ĉeesto

devigatas! Okazas ke en tiu ĉi urbo estas multe da homoj al kiuj Ostap Bender estas ege bezonata. Sed kiu gvidos tiun ĉi korespondadon kun la amikoj? Necesas konsenti pri monperdo kaj reordigi la personaron. Estas bezonata sperta kancelariistino. Ŝi ordigu tiujn ĉi aferojn.

Post du horoj okazis nova malfeliĉo. Venis kamparano kun peza sako.

– Kiu akceptos la kornojn? – demandis li, deĵetante la portaĵon sur la plankon.

La granda kombinanto oblikve alrigardis la vizitanton kaj lian havaĵon. Tio estis etaj kurbaj malpuraj kornoj, kaj Ostap rigardis ilin kun abomeno.

– Ĉu la varo estas bona? – singarde demandis la fakestro.

– Sed vi rigardu la kornetojn! – fervoris la kamparano, aligante flavan kornon al nazo de la granda kombinanto. – Altkvalitaj kornetoj. Laŭnormaj.

Kion fari, la laŭnorma varo estis aĉetita. Longe post tio la kamparano trinkis teon kun Panikovskij, rakontis pri la vilaĝa vivo, elvokante en Ostap naturan inciton de homo vane perdinta dek kvin rublojn.

– Se Panikovskij enlasos ankoraŭ iun kornoportanton, – diris Ostap post foriro de la vizitanto, – ne servos Panikovskij plu. Mi maldungos lin sen elira subvencio. Kaj, entute, sufiĉas por ni tiuj ĉi ŝtataj aferoj. Venis tempo

okupiĝi pri veraj gravaĵoj.

Pendinte sur la vitran pordon plateton «Tagmeza interrompo», estro de la fako prenis el la ŝranko la paperujon kiu, laŭdire, enhavis bluan maron kun blanka ŝipo, kaj, frapante ĝin per la manplato, li diris:

– Jen pri kio laboros nia kontoro. Nun en tiu ĉi «dosiero» estas eĉ ne unu paĝo. Sed ni trovos finaĵon de la ŝnureto eĉ se por akiro de la procesa materialo bezonatos sendi na Panikovskij kaj na Balaganov en sablojn de Karakuma dezerto aŭ, ekzemple, na Kremenĉug.

Ĉi-minute manilo de la kontora pordo ekŝiriĝis. Post la vitro paŝadis surloke maljunulo en panama ĉapelo, flikita per blanka fadeno, kaj en vasta krudsilka jako, el kiu videblis tola veŝto. La maljunulo eltiradis la kokinan kolon, kaj aligis al la vitro sian grandan orelon.

– Fermite, fermite! – haste elkriis Ostap. – Ŝtatprovizo per hufoj estas portempe ĉesigita.

Tamen la maljunulo daŭrigis la man-signaladon.

Se Ostap ne enlasus la maljunan blank-veŝtulon do, eble, la ĉefa linio de la romano irus alian direkton, kaj neniam okazus tiuj mirindaj eventoj, en kiuj devis partopreni kaj la granda kombinanto, kaj lia ekscitema kuriero, kaj la senzorga rajtigitito pri hufoj, kaj ankoraŭ multaj homoj, inter ili ankaŭ iu orienta saĝulo, nepino de maljuna rebusisto, fama socia aktivulo, estro

de «Herkules», kaj ankaŭ granda kvanto da sovetiaj kaj alilandaj civitanoj.

Sed Ostap malfermis la pordon. La maljunulo, funebre smajlante, venis post la barieron, kaj malleviĝis sur la seĝon. Li fermis la okulojn, kaj silente sidis sur la seĝo ĉirkaŭ kvin minutoj. Aŭdeblis nur mallongaj fajfoj, kiujn tempo de tempo eligis lia pala nazo.

Фунт («Funt»)

Kiam la kunlaborantoj decidis ke la vizitanto jam neniam parolos, kaj flustre konsiliĝis kiel pli oportune elporti la korpon sur la straton, la maljunulo malfermis la brunajn palpebrojn, kaj per malalta voĉo diris:

– Mia familinomo estas Funt. Funt.

– Kaj tio, laŭ vi, sufiĉas por enrompiĝi en oficejojn fermitajn por tagmeza interrompo? – gaje diris Bender.

– Jen vi ridas, – respondis la maljunulo, sed mia familinomo estas Funt. Mi estas naŭdek-jara.

– Do kion vi bezonas? – demandis Ostap, komencante perdi la paciencon.

Sed tiam civitano Funt denove eksilentis, kaj silentis sufiĉe longan tempon.

– Ĉe vi estas kontoro, – diris li fine.

– Jes, jes, kontoro, – kuraĝigis Ostap. – Antaŭen, antaŭen.

Sed la maljunulo nur karesis permane sian genuon.

– Ĉu vi vidas sur mi tiun ĉi pantalonon? – diris li post longa silento. – Tio estas paska pantalono. Antaŭe mi vestis ĝin dum pasko, sed nun mi portas ĝin ĉiutage.

Kaj, malgraŭ tio ke Panikovskij frapetis lian dorson por ke la vortoj eliru senĝene, Funt denove eksilentis. Vortojn li prononcis rapide, sed inter la frazoj li faris paŭzojn kiuj daŭriĝis iam ĝis tri minutoj. Por homoj kiuj ne kutimiĝis al tiu ĉi specifo de Funt, konversacio kun li estis neeltenebla. Ostap jam intencis preni na Funt je lia amelita kolringo, kaj montri al li foriran vojon, kiam la maljunulo denove malfermis la buŝon. Post tio la konversacio akceptis ĝis tiom amuzan karakteron, ke Ostap estis devigata paciĝi kun la konversacia maniero de Funt.

– Ĉu vi bezonas prezidanton? – demandis Funt.

– Kiun prezidanton? – elkriis Bender.

– Oficialan. Unuvorte estron de la oficejo.

– Mi mem estas la estro.

– Do vi intencas prizoniĝi mem? Sed vi devis tuj diri tion. Kial vi jam du horoj ĝenas min?

La maljunulo en la paska pantalono koleriĝis, sed intervaloj inter la frazoj ne malpliiĝis.

– Mi estas Funt, – ripetis li signifoplene. Mi estas naŭdek-jara. Tutan vivon mi prizoniĝis

anstataŭ aliaj. Tio estas mia profesio, – suferi anstataŭ aliaj.

– Ho, vi estas do ŝajna respondeculo, ĉu?

– Jes, – diris la maljunulo, fiere skuante la kapon. – Mi estas sidprezidanto Funt. Mi sidis ĉiam. Mi sidis ĉe Aleksandr la dua «Liberigulo», ĉe Aleksandr la tria «Paciganto», ĉe Nikolao la dua «Sanga». Kaj la oldulo malrapide fleksis la fingrojn, kalkulante la carojn.

– Ĉe Kerenskij mi ankaŭ sidis. Dum milita komunismo mi, fakte, tute ne sidis: malaperis pura komerco, forestis laboro. Tamen kiel mi sidis ĉe NEP! Kiel mi sidis ĉe NEP! Tio estis plej bonaj tagoj de mia vivo. Dum kvar jaroj mi pasigis en libero ne pli ol tri monatoj. Mi edzinigis mian nepinon, Golkonda Evseevna, kaj donis dote horizontalan pianon, arĝentan birdeton, kaj okdek rublojn per oraj moneroj. Sed nun mi iras kaj ne rekonas nian Nigramarsk. Kie estas ĉio? Kie estas privata kapitalo? Kie estas unua societo de reciproka kredito? Kie, demandas mi vin, estas dua societo de reciproka kredito? Kie estas konfida kompanio? Kie estas akciaj kompanioj kun miksita kapitalo? Kie ĉio ĉi estas? Maldecaĵo!

Tiu ĉi kurta parolado daŭriĝis relative nelonge: duonhoron. Aŭskultante na Funt Panikovskij kortuŝiĝis. Li forkondukis na Balaganov flanken kaj estime flustris:

– Oni tuj vidas homon el antaŭa tempo. Ili

jam ne ekzistas nun kaj, post nelonge, ili tute malaperos.

Kaj li ĝentile prezentis al la maljunulo kruĉon da dolĉa teo.

Ostap altiris la sid-prezidanton al sia estra tablo, ordonis fermi la kontoron, kaj komencis paciencie pridemandi la eternan malliberulon, fordonintan sian vivon al «proksimuloj siaj». La sid-prezidanto parolis plezure. Se li ne ripozus tiel longe inter la frazoj, oni povus diri eĉ ke li babiladas senhalte.

– Ĉu vi konas tiun: Korejko Aleksandr Ivanoviĉ? – demandis Ostap, enrigardinte la paperujon kun botetaj laĉoj.

– Ne konas, – respondis la maljunulo. – Tiun mi ne konas.

– Kaj ĉu vi havis aferojn kun «Herkules»?

Ĉe vorto «Herkules» la sid-prezidanto iom moviĝetis. Ostap eĉ ne rimarkis tiun ĉi moveton, sed se sur lia loko estus iu alia tola veŝto el kafejo «Florido», konanta na Funt delonge, ekzemple Valiadis, do li ekpensus: «Funt ege ardiĝis, li fakte eĉ ekscitiĝis».

Kial Funt ne sciu na «Herkules», se liaj lastaj kvar prizonadoj estis ligitaj ĝuste kun tiu ĉi entrepreno! Ĉirkaŭ «Herkules» nutris sin kelkaj privataj akciaj kompanioj. Estis, ekzemple, kompanio «Intensivnik». Sur lokon de prezidanto estis invitita Funt. «Intensivnik» ricevis de «Herkules» grandan antaŭpagon por

provizo de io arbara: sid-prezidanto ne devas scii kion. Kaj tuj kreviĝis. Iu alŝovelis monon, kaj Funt prizoniĝis je duonjaro. Post «Intensivnik» ordiĝis konfida kompanio «Laborula cedro» sub, kompreneble, prezidanteco de digne-aspekta Funt. Temis, certe, pri antaŭpago el «Herkules» por provizo per altkvalitaj cedroj. Kaj, certe: neatendita bankrotiĝo; iu riĉiĝis, kaj Funt prilaboras la prezidantan salajron: sidas en prizono. Poste estis «Segil-helpo»: «Herkules», antaŭpago, bankrotiĝo, iu alŝovelis, prizonado. Kaj denove: avanco, «Herkules», «Suda hakisto». Por Funt – prizonado, al iu – mono.

– Sed al kiu? – demandadis Ostap, irante ĉirkaŭ la maljunulo. – Kiu vere gvidis tion?

La maljunulo silente suĉis teon el la kruĉo, malfacile malfermante la pezajn palpebrojn.

– Kiu scias? – diris li ĉagrene. – De Funt oni kaŝis ĉion. Mi devis nur sidi. Tio estas mia profesio. Mi sidis ĉe Aleksandr la dua, kaj ĉe la tria, kaj ĉe Nikolaj Aleksandroviĉ Romanov, kaj ĉe Aleksandr Fjodoroviĉ Kerenskij. Kaj ĉe NEP, antaŭ haladzo de NEP, kaj post la haladzo. Kaj nun mi estas senlaborulo, kaj devas vesti la paskan pantalonon.

Ankoraŭ longe daŭrigis Ostap eltiradon de vortetoj el la maljunulo. Li agis kiel orserĉisto, senlace tralavanta tunojn da koto kaj sablo por trovi sur la fundo kelkajn orajn grajnetojn. Li

puŝetis na Funt je la ŝultro, vekis lin, kaj eĉ tiklis liajn akselojn. Post ĉiuj ĉi artifikaĵoj li sukcesis ekscii ke, laŭ opinio de Funt, post ĉiuj tiuj ĉi krevintaj societoj kaj kompanioj sendube kaŝiĝas iu sama persono. Se paroli pri «Herkules», do el ĝi oni elmelkis ne unu centon da miloj.

– Ĉiuokaze, – aldonis la olda sid-prezidanto, – ĉiuokaze tiu ĉi nekonato estas kapo. Ĉu vi konas na Valiadis? Al tiu ĉi homo Valiadis ne enbuŝigus sian fingron.

– Kaj al Brian? – demandis Ostap kun smajlo, elmemorinte kunvenon de tolaj veŝtoj ĉe eksa kafejo «Florido». – Ĉu Valiadis metus sian fingron en buŝon de Brian? Kion vi opinias?

– Nenikaze! – respondis Funt. – Brian, tio estas kapo.

Tri minutoj li sensone movis la lipojn, kaj poste aldonis:

– Huver – tio estas kapo. Huver kaj Hindenburg – tio estas du kapoj.

Na Ostap ekposedis timo. Plej aĝa el la tolaj veŝtoj profundiĝis en marĉon de alta politiko. Aperis danĝero ke li tuj parolos pri pakto de Kelloga aŭ pri hispana diktatoro Primo de Rivera, kaj tiam neniu forto povos delogi lin de tiu ĉi respektinda okupo. En liaj okuloj jam aperis idiota brilo, kaj super la flaveta ameligitita kolumo jam ekstremis la gorĝa pomo, aŭgurante naskiĝon de nova frazo, kiam Bender elŝraŭbis

la elektran lampon kaj ĵetis ĝin sur la plankon. La lampo rompiĝis kun malvarma krako de fusila elpafo. Kaj nur tiu ĉi evento delogis la sidprezidanton de internaciaj aferoj. Ostap rapide eluzis tion.

– Sed estis en «Herkules» iu kun kiu vi malgraŭ ĉio renkontiĝis, ĉu? – demandis li. – Pri antaŭpagaj aferoj?

– Kun mi kontaktis nur herkulesa librotenisto Berlaga. Li ricevis salajron de ili. Sed mi scias nenion. Oni ĉion kaŝis de mi. Mi estas bezonata al homoj nur por prizoniĝi. Mi sidis ĉe carismo, kaj ĉe socialismo, kaj ĉe hetmano, kaj dum franca okupacio. Brian estas kapo.

El la maljunulo oni povis jam elpremi nenion plu. Sed ankaŭ la dirito donis eblecon komenci la serĉojn.

«Ĉi tie sentiĝas manaĉo de Korejko» – pensis Ostap.

Estro de Nigramarska filio de Arbatov-kontoro pri ŝtat-provizo per kornoj kaj hufoj alsidis la skribotablon, kaj surpaperigis paroladon de sidprezidanto Funt. Meditojn pri rilatoj inter Valiadis kaj Briand li ellasis.

Unua paĝo de la kaŝa esploro pri la kaŝa milionulo estis numerigita, truigita en koncernaj lokoj, kaj enigita la paperujon.

– Kio do, ĉu vi dungos la prezidanton? – demandis la maljunulo, surkapigante sian

flikitan panam-ĉapelon. – Mi vidas ke via kontoro bezonas prezidanton. Mi prenas malmulte: cent dudek rublojn monate ĉe libero, kaj ducent kvardek – en prizono. Cent procentoj – tio estas aldono pro la san-malutilo.

– Mi opinias ke jes, – diris Ostap. – Prezentu la petskribon al la rajtigito pri hufoj.

Ĉapitro 16

Jahrbuch für Psychoanalytik

Labortago en financ-kalkula fako de «Herkules» komenciĝis, kiel kutime, ĝuste je la naŭa.

Kukuŝkind jam levis baskon de sia jako por purigi per ĝi la okulvitrojn, kaj samtempe informi la kunlaborantojn pri tio ke labori en banka kontoro «Sikimorov kaj Cezarido» estis senkompare pli trankvile, ol en tiu ĉi herkulesa sodomo; Tezoimenickij turniĝis jam sur sia ŝraŭba tabureto al la muro, kaj etendis la manon por deŝiri paĝon de la kalendaro, Lapidus-juna malfermis jam la buŝon al peco da pano kun haringa ŝmiraĵo, kiam la pordo malfermiĝis, kaj sur la sojlo aperis neniu alia ol librotenisto Berlaga.

Tiu ĉi neatendita apero elvokis konfuzon en la financkalkula halo. Tezoimenickij gliĉiĝis sur sia ŝraŭba telereto, kaj la kalendara folio unue, povas esti, dum tri jaroj, restis ne deŝirita. Lapidus-juna, forgesinte ekmordi la sandviĉon,

vane ekmovadis la makzelojn. Drejfus, Ĉevaĵevskaja kaj Saĥarkov senmezure ekmiris. Korejko levis kaj mallevis la kapon. Kaj maljuna Kukuŝkind rapide surmetis la okulvitrojn, forgesinte purigi ilin, kio neniam okazis dum tridek jaroj de lia ofica servo. Berlaga, kvazaŭ okazis nenio, eksidis ĉe sia tablo kaj, ne respondante al kaŝa smajlo de Lapidus-juna, malfermis siajn librojn.

– Kiel vi fartas? – demandis Lapidus malgraŭ ĉio. – Kio pri la kalkana nervo?

– Ĉio pasis, – respondis Berlaga, ne levante la kapon. – Mi eĉ ne kredas ke tiu ĉi nervo vere ekzistas ĉe homoj.

Ĝis la tagmanĝa paŭzo mem tuta financ-kalkularo ŝoviĝis sur siaj taburetoj kaj kusenetoj, turmentata per scivolo. Kaj kiam eksonis la kriza sonorilo, elito de la librotenista mondo ĉirkaŭigis na Berlaga. Sed la fuĝanto preskaŭ ne respondis al la demandoj. Li forkondukis flanken plej fidelajn kaj, evidentiĝinte ke proksime estas neniu superflua, rakontis al ili pri siaj eksterordinaraj aventuroj en frenezulejo. Sian rakonton la fuĝa librotenisto akompanis per multaj malsimplaj esprimoj kaj interjekcioj, kiuj estas ellasitaj ĉi tie por senĝena fluo de la rakonto.

**RAKONTO DE LIBROTENISTO BERLAGA, KIUN LI,
SUB STRIKTA SEKRETO, KOMUNIKIS AL
BORISOĤLEBSKIJ, DREJFUS, SAĤARKOV KAJ AL**

LAPIDUS-JUNA PRI KIO OKAZIS AL LI EN LA FRENEZULEJO.

Librotenisto Berлага, kio estas jam informita, fuĝis frenezulejon por eviti danĝeron de la purigado. En tiu ĉi kuraca stablo li intencis sidi ĝis preterpaso de la alarma periodo, kaj reveni na «Herkules» kiam la tondro kvietiĝos, kaj la oko da kamaradoj kun grizetaj okuloj fornombados en najbaran entreprenon.

La tutan aferon ordigaĉis lia bofrato. Li akiris libron pri moroj kaj kutimoj de mensmalsanuloj kaj, post longaj disputoj, el ĉiuj fiksjaj ideoj estis elektita deliro de megalomanio.

– Vi nenion devas fari, – enkapigis la bofrato, – nur krii en orelojn de ĉiu ajn: «Mi estas Napoleono!», aŭ: «Mi estas Emil Zola!», aŭ «Mahometo!», se vi volas.

– Ĉu oni povas esti vicreĝo de Hindio? – konfide demandis Berлага.

– Povas, povas. Frenezulo povas ĉion. Do vicreĝo de Hindio, ĉu?

La bofrato parolis tiel konvinke kvazaŭ li estus, minimume, studento-asistanto en psikiatria kliniko. Sed li estis fakte modesta agento pri disvastigo de luksaj abon-eldonaĵoj de ŝtata eldonejo, kaj de lia pasinta komerca majesteco restis nur, en lia kofreto, viena melon-ĉapelo kun blanka silka reverso.

La bofrato ekkuris al la telefono por voki ambulancan, kaj la nova vic-reĝo de Hindio

demetis la jakon, disŝiris sur si kotonan ĉemizon kaj, por iu ajn okazo, elverŝis sur la kapon boteleton da plej bona unuaklasa por-kopia fero-gala inko. Poste li ekkuŝis ventre sur la plankon kaj, pe-atendinte venon de subflegistoj, komencis krii:

– Mi estas ne pli ol vicreĝo de Hindio! Kie estas miaj fidelaj nababoj, maharaĝoj, miaj **abrekoj** ¹⁹, **kunakoj** ²⁰, kaj miaj elefantoj?

Aŭskultante tiun ĉi deliron de megalomanio la bofrato dube balancis la kapon. Laŭ lia opinio *abrekoj* kaj *kunakoj* ne eniris agosferon de hindia vicreĝo. Sed la subflegistoj nur viŝis per malseka tuko vizaĝon de la librotenisto, malpurigitan per la unuaklasa inko kaj, akorde preninte, enigis lin en la ambulanco. Frapis lakitaj pordoklapoj, eksonis alarma kuracista sireno, kaj la aŭto haste forveturigis vicreĝon Berlaga en lian novan posedejon.

Dum la vojo la malsanulo svingis per la manoj, balbutis ion, ne ĉesante time pensi pri unua renkonto kun veraj frenezuloj. Li tre timis ke ili ofendados, aŭ eĉ murdos lin.

La malsanulejo okazis tute alia ol Berlaga imagis ĝin. En longa luma halo sidis sur kanapoj, kuŝis sur litoj, kaj promenadis homoj en bluetaj kiteloj. La librotenisto rimarkis ke la

19. *abrek*: kontraŭrusia militanto dum rusia okupaciado de Kaŭkazo.

20. *kunak*: amiko (el lingvoj de kaŭkaz-regiono).

frenezuloj preskaŭ ne konversacias unu kun alia. Ili ne havas tempon por konversacioj. Ili meditas. Ili meditas konstante. Ĉe ili estas multe da pensoj, necesas elmemori ion, ion plej gravan, de kio dependas la feliĉo. Sed la pensoj disfalas kaj, plej grave, malaperas, svinginte per la vosteto. Kaj oni devas denove pripensi ĉion, kompreni kio okazis, kial ĉio ekestis malbona, kvankam antaŭe ĉio estis bona.

Preter Berlaga jam kelkfoje iris frenezulo nekombita kaj malfeliĉa. Kaptinte per la fingroj sian mentonon li iris sur unu linio: de la fenestro al la pordo, kaj denove al la fenestro. Kaj tiom da pensoj tondris en lia kompatinda kapo, ke li almetadis alian sian manon al la frunto, kaj rapidigis la paŝojn.

– Mi estas vicreĝo de Hindio! – kriis Berlaga, retrorigardante la subflegiston.

La frenezulo eĉ ne rigardis flankon de la librotenisto. Dolore sulkiĝinte li denove komencis kolekti siajn pensojn, diskurintajn pro la sovaĝa krio de Berlaga. Sed, anstataŭe, al la vicreĝo venis malalta idioto kaj, konfide ĉirkaŭbrakumante lian talion, diris kelkajn vortojn per birda lingvo.

– Kio? – flate demandis timigita Berlaga,

– *Ene, bene raba, kvinter, finter ĵaba*, – klare pronincis la nova konato.

Dirinte: «oj», Berlaga deiris malproksimen de la idioto. Farante tion li proksimiĝis al homo

kun citrona kalvaĵo. Tiu tuj turniĝis al la muro kaj singarde ekrigardis la libroteniston.

– Kie estas miaj maharaĝoj? – demandis lin Berlaga, sentante bezonon subteni reputacion de frenezulo.

Sed tiam malsanulo, sidanta sur lito en profundo de la halo, leviĝis sur siajn piedojn, maldiketajn kaj flavajn kiel preĝejaj kandeloj, kaj sufere ekkriis:

– En liberon! En liberon! En pampon!

Poste la librotenisto eksciis ke pri veno en pampon petis maljuna instruisto pri geografio, laŭ kies lernolibro juna Berlaga konatiĝis, siatempe, kun vulkanoj, kaboj kaj terkoloj. La geografo freneziĝis tute neatendite: foje li rigardis mapon de ambaŭ duonsferoj, kaj ne trovis sur ĝi Beringan markolon. Tutan tagon ekzamenis maljuna instruisto la mapon. Ĉio estis surloke: kaj Nju-Faundlend, kaj Sueza kanalo, kaj Madagaskaro, kaj Havaja insularo kun ĉefurbo Honolulu, kaj eĉ vulkano Popokatepetlo, sed Beringa markolo forestis. Do samloke, apud la mapo, la maljunulo mensŝoviĝis. (Laŭ informoj, troviĝantaj ĉe la aŭtoroj, sur tiu ĉi mapo, kiu frenezigis la malfeliĉan geografon, Beringa markolo vere forestis. Foreston de la markolo elvokis napkapuleco de eldonejo «Libro kaj poluso». La kulpulojn trafis meritita puno. Estro de la eldonejo estis depostenita kaj sendita al

posteno malpli grava, kaj aliajn trafis skriba riproĉo kun averto). Tio estis bonanima frenezulo, kiu al neniu faris iun malbonon, sed Berlaga ege ektimis. La krio ŝiris lian animon.

– En liberon! – daŭre kriis la geografo, – en pampon!

Plej bone en la mondo sciis li kio estas libero. Li estis geografo, do konis tiajn vastejojn, pri kiuj ordinaraj homoj, okupataj per siaj enuaj aferoj, eĉ ne supozas. Li volis liberon, li volis rajdi tra kreskaĵejoj sur la ŝvita mustango.

En la ĉambregon eniris juna kuracistino kun plendaj bluaj okuloj, kaj direktiĝis rekte al Berlaga.

– Nu, kiel vi fartas, kolombeto? – demandis ŝi, per la varma mano tuŝante pulson de la librotenisto. – Nun vi sentas sin pli bone, ĉu?

– Mi estas vicreĝo de Hindio, – raportis li, ruĝiĝante. – Redonu al mi mian ŝatatan elefanton!

– Tio estas deliro ĉe vi, – karese diris la kuracistino, – vi estas en malsanulejo, ni pekuracos vin.

– Ho-o! Mia elefanto! – defie kriis Berlaga.

– Sed komprenu vi, – eĉ pli karese diris la kuracistino, – vi ne estas reĝo, tio estas deliro, komprenu, deliro!

– Ne, ne deliro, – oponis Berlaga, scianta ke antaŭ ĉio oni devas obstini.

- Jes, deliro!
- Ne, ne deliro!
- Deliro!
- Ne deliro!

La librotenisto, vidante ke la fero estas arda, komencis forĝi ĝin. Li puŝis la bonaniman kuracistinon kaj eligis tiran kriaĉon, kiu ekscitis ĉiujn malsanulojn, precipe la malgrandan idioton, kiu eksidis sur la plankon kaj, eligante salivon, diris:

- *En, den, truakatr, mademuazel Ĵurovatr.*

Kaj Berlaga kontentiĝe aŭskultis post sia dorso voĉon de la kuracistino, kiu alparolis subflegiston:

- Oni devas relokigi lin al tiuj tri; se ne, li ĉi tie la tutan halon pe-timigos.

La du paciencaj subflegistoj forkondukis la kvereleman vicreĝon en negrandan ĉambron por malsanuloj kun neregula konduto, kie kviete kuŝis tri homoj. Nur ĉi tie la librotenisto komprenis kio estas veraj frenezuloj.

Ekvidinte la vizitantojn la malsanuloj elmontris nekutiman aktivadon. Dika viro deruliĝis de sia lito, rapide manpiediĝis kaj, altigante la tegitan, kiel mandolino, postaĵon, komencis abrupte boji, kaj disŝovi la pargeton per malantaŭaj piedoj en malsanulejaj pantofloj. Alia envolviĝis en la litkovrilon, kaj komencis krii: «Ankaŭ vi, Bruto, vendis sin al komunistoj!». Tiu ĉi homo sendube imagis sin

Gaj Julio Cezaro (Gaius Julio Cezaro). Tamen iam, en lia kirlita kapo desaltis iu butono, kaj li erare kriis: «Mi estas Henriko Julio Cimerman!»

– Foriru! Mi estas nuda! – kriis la tria. – Ne rigardu min. Mi hontas. Mi estas nuda virino. Tamen tio estis vestita liphara viro.

La subflegistoj foriris. La vicreĝon de Hindio kaptis tia teruro, ke li ne kuraĝis jam postuli redonon de la ŝatata elefanto, maharaĝojn, fidelajn nababojn kaj na enigmaj *abrekoj* kaj *kunakoj*.

«Tiuuj senprobleme sufokos», – pensis li glaciiginte.

[Ярбур фюр психоаналитик](#)
(«Jahrbuch für Psychoanalytik»)

Kaj ege bedaŭris li pri tio ke skandalis en la trankvila halo. Tiom agrable estus sidi nun ĉe piedoj de bona instruisto pri geografio, kaj aŭskulti teneran balbuton de la malgranta idioto: «*Ene, bene raba, kvinter finter ĵaba*». Sed okazis nenio terura. Homo-hundo elbojis ankoraŭ kelkfoje kaj, grumblante, surgrimpis sian liton. Gaj Julio deĵetis sian litkovrilon, fortege oscedis, kaj streĉiĝis per la tuta korpo. Virino kun la lipharoj ekfumis la pipon, kaj dolĉaodoro de «Nia ŝipestro» venigis trankvilon en tumultan animon de Berlaga.

– Mi estas vicreĝo de Hindio, – deklaris li, kuraĝinte.

- Silentu, fatraso, - maldiligente respondis Gaj Julio. Kaj kun senartifikeco de romiano aldonis: - Murdos mi vin! Animon eligos!

Tiu rimarko de plej kuraĝa el imperiestroj kaj batalantoj sobrigis la forkurintan libroteniston. Li kaŝiĝis sub la litkovrilon kaj ekdormetis, melankolie meditante pri sia vivo, plena per maltrankviloj.

Matene, tra la dormo, Berlaga ekaŭdis strangajn vortojn:

- Enigis oni frenezulon sur niajn kapojn. Tiel bone estis trioĉe, sed subite... Turmentiĝos ni nun pro li! Eblas eĉ ke tiu ĉi malbenita vicreĝo mordados nin ĉiujn.

Laŭ la voĉo Berlaga komprenis ke la vortojn prononcis Gaj Julio Cezaro. Post iom da tempo, malferminte la okulojn, li ekvidis ke lin, kun esprimo de viglega scivolo, rigardas la homo-hundo.

«Fino», - ekpensis la vicreĝo, - «nun li mordos!»

Sed la homo-hundo neatendite dissvingis la manojn, kaj demandis lin per homa voĉo:

- Diru, ĉu vi ne estas filo de Foma Berlaga?

- Jes, filo, - respondis la librotenisto kaj, subite rekonsciiĝinte, tuj elkriaĉis: - Fordonu al la malfeliĉa vicreĝo lian fidelan elefanton!

- Rigardu, - proponis la homo-strathundo. - Ĉu vi vere ne rekonas min?

- Miĥail Aleksandroviĉ! - kriis elblindiĝinta

librotenisto. – Jen la renkonto!

La vicreĝo kaj la homo-hundo plenkore kisis unu la alian. Dum tio ili svinge frapiĝis per la fruntoj, produktante bilardan sonon. En okuloj de Miĥail Aleksandroviĉ videblis larmoj.

– Do vi ne estas frenezulo, – demandis Berlaga. – Sed kial vi stultadis?

– Kaj kial vi stultadis? Jen, elefantojn oni donu al li! Sed, amiko mia Berlaga, mi devas diri al vi ke por bona frenezulo vicreĝo estas primitive, tro primitive.

– Sed mia bofrato diris ke oni povas, – ekmalĝojis Berlaga.

– Prenu, ekzemple min, – diris Miĥail Aleksandroviĉ, – subtila ludo. Homo-hundo. Skizofrenia deliro, komplikigita per mani-depresia psikozo kaj, krom tio rimarku, Berlaga, krepuska stato de animo. Ĉu vi opinias ke tio venis al mi facile? Mi studis aŭtoritatajn fontojn. Ĉu vi legis libron de profesoro Blejler «Aŭtisma pensmaniero»?

– N-ne, – respondis Berlaga per voĉo de vicreĝo, de kiu oni deŝiris ordenon de «Kruzono», kaj degradis lin je oficir-servisto.

– Sinjoroj! – kriis Miĥail Aleksandroviĉ. – Li ne legis libron de Blejler! Ja ne timu vi, iru ĉi tien. Li estas sama reĝo kiel vi – Cezaro.

Paro da aliaj prizorgatoj de la eta ĉambro por personoj kun neregula konduto proksimiĝis.

– Ĉu vi ne legis na Blejler? – demandis Gaj

Julio mirigite. Do, pardonu, laŭ kiuj materialoj vi prepariĝis?

– Verŝajne li abonis germanan revuon «Jahrbuch für Psychoanalytik und Psychopathologie» esprimis la supozon neplenalvalora lipharulo.

Berlaga staris kiel kraĉita. Kaj la spertuloj daŭre elŝutis saĝegajn frazojn el sfero de teorio kaj praktiko de psikoanalizo. Ĉiuj venis al konkludo ke al Berlaga estos malbone, kaj ke ĉefa kuracisto Titanetov, kies revenon el oficvojaĝo oni atendis post unu-du tagoj, senmaskos lin dum kvin minutoj. Pri tio ke reveno de Titanetov venigas angoron ankaŭ sur ilin, ili ne paroladis.

– Ĉu, eble, mi ŝanĝu la deliron? – time demandis Berlaga. – Kio se mi estu Emil Zola aŭ Mahometo?

– Malfrue, – diris Gaj Julio. – En historion de la malsano jam estas enskribite ke vi estas vicreĝo, kaj frenezulo ne povas ŝanĝi siajn maniojn kiel ŝtrumpetojn. Nun vi tutan vian vivon troviĝos en stulta stato de la vicreĝo. Ni sidas ĉi tie jam semajnon, kaj konas la regulojn.

Post unu horo Berlaga sciis jam ĉiujn detalojn kaj verajn malsan-historiojn de siaj samĉambranoj.

Apero de Miĥail Aleksandroviĉ en la frenezulejo klariĝis per aferoj sufiĉe simplaj, eĉ banalaj. Li estis riĉa NEP-ulo, kiu hazarde ne

elpagis kvardek tri mil rublojn de la enspeza imposto. Tio minacis per kontraŭvola veturo en nordan regionon, sed la aferoj insiste postulis ĉeeston de Miĥail Alekseviĉ en Nigramarsk. Duvanov, tio estis nomo de viro kiu prezentis sin virino, estis, ŝajne, eta sabotanto, kiu havis kaŭzon timi areston. Sed tute alia estis Gaj Julio Cezaro kiu, laŭ pasporto, estis eksa advokato I. N. Malnovvulgarulov.

Gaj Julio Malnovvulgarulov venis en la frenezulejon pro la altaj ideaj konsideroj.

– En Sovetio, – diris li, drapirante sin per la litkovrilo, – frenezulejo estas sola loko kie povas vivi normala homo. Ĉio alia estas pandemonio. Ne, mi ne povas vivi kun komunistoj. Pli bone mi vivos ĉi tie, apud ordinaraj frenezuloj. Tiuj ĉi, kontraste al aliaj, ne konstruas socialismon. Krom tio oni nutras ĉi tie. Sed tie, en ilia frenezulejo, oni devas labori. Sed mi ne intencas labori por ilia socialismo. Krom tio ĉi tie mi havas, finfine, personan liberon. Liberon je religio. Parolliberon.

Rimarkinte preterirantan subflegiston Gaj Julio Malnovvulgarulov jelpo elkriis:

– Vivu Konstitucia Asembleo! Ĉiuj en la forumon! Ankaŭ vi, Brutus, vendis sin al respondeculoj! – Kaj, turniĝinte al Berlaga, li aldonis: – Ĉu vi vidis? Kion mi volas, tion mi krias. Sed provu tion surstrate!

La tutan tagon kaj plimulton de la nokto

kvaro da malsanuloj kun neregula konduto ludadis je «sesdek ses» sen dudeko kaj kvardeko, je ludo ruza, kiu postulas memregadon, sagacon, purecon de animo, kaj klarecon de pensado.

Matene el la oficvojaĝo revenis profesoro Titanetov. Li rapide pririgardis la kvaropon kaj samloke ordonis elĵeti ilin el la malsanulejo. Helpis nek libro far Blejler, nek krepuska stato de la animo, komplikita per mani-depresia psikozo, nek «Jahrbuch für Psychoanalytik und Psychopathologik». Profesoro Titanetov ne ŝatis simululojn.

Kaj ili ekkuris surstrate, dispuŝante pasantojn per la kubutoj. Antaŭe moviĝis Gaj Julio. Post li rapidis la viro-ino kaj la homohundo. Post ili ĉiuj tiriĝis la dekronita vicreĝo, damnante la bofraton, kaj kun teruro pensante pri tio kio okazos nun.

Pe-rakontinte tiun ĉi instruan historion librotenisto Berlaga angore rigardis komence na Borisoĥlebskij, poste na Drejfus, post tio na Saĥarkov, kaj fine na Lapidus-juna, kies kapoj, kiel ŝajnis al li, kondolence balanciĝis en duonlumo de la koridoro.

– Nu, ĉu vi vidas kion vi atingis per viaj fantaziaĵoj, – diris krudkora Lapidus-juna, – vi volis eviti unu purigon, kaj trafis nun en alian. Malbonas viaj aferoj. Se oni elpurigis vin el la

frenezulejo, do el «Herkules» oni vin certe elpurigos.

Borisoĥlebskij, Drejfus kaj Saĥarkov diris nenion. Kaj, nenion dirinte ili komencis malrapide fornaĝi en la mallumon.

– Amikoj! – feble kriis la librotenisto. – Ja kien vi!

Sed la amikoj jam kuregis tutforte, kaj iliaj orfaj pantalonoj malaperis, lastfoje brilinte sur la ŝtuparo.

– Malbone, Berlaga, – malvarme diris Lapidus, – vane vi implikas min en viajn malpurajn antisovetiajn friponaĝojn. *Adje!*

Kaj la vicreĝo de Hindio restis sola.

Kion vi faris, librotenisto Berlaga? Kie estis viaj okuloj, librotenisto? Kion dirus al vi via patro Foma, se li ekscius ke la filo, jam ne juna, iris esti vicreĝo? Jen kien venigis vin, librotenisto, viaj strangaj rilatoj kun sinjoro Funt, kiu estis prezidanto de multaj akciaj kompanioj kun miksita kaj malpura kapitalo. Estas time eĉ pensi kion dirus maljuna Foma pri la faraĉoj de sia amata filo. Sed jam delonge kuŝas Foma en dua kristana tombejo sub ŝtona serafo kun derompita flugilo, kaj nur knabaĉoj, enkurantaj ĉi tien ŝteli siring-florojn, ĵetas iam nescivolan rigardon sur la tomban surskribon: «De l' viv ĉesiĝis flugo saga, do pace dormu F. Berlaga». Sed povas okazi ke nenion dirus la maljunulo. Ja certe dirus nenion, ĉar li mem

vivis ne tro juste. Simple li konsilus konduiti sin pli singarde, kaj en gravaj aferoj ne konfidi sian bofraton. Jes, diablo scias kion vi faraĉis, librotenisto Berlaga!

La pezaj meditoj, kaptintaj eksan reprezentanton de Henriko la kvina en Hindio estis rompitaĵoj per krioj, venintaj de la ŝtuparo:

– Berlaga! Ja kie li estas? Iu demandas pri li. Ha, jen li staras! Eniru, civitano!

En koridoro aperis la rajtigito pri hufoj. Soldate svingante la manojn Balaganov venis al Berlaga kaj enmanigis al li avizon:

«Gamarado Berlaga. Post ricevo de tio ĉi estas proponate al vi tuj veni por glarigo de gelkaj cirkonstancoj.»

La papero estis provizita per stampo de Nigramarska filio de Arbatov-kontoro pri ŝtat-provizo per kornoj kaj hufoj, kaj per ronda stampo, kies enhavon estis ne tro simple diveni, eĉ se fari tion venus en kapon de Berlaga. Sed la fuĝa librotenisto estis tiel premita per falintaj sur lin malfeliĉoj, ke nur demandis:

– Ĉu eblas telefoni hejmen?

– Pri kio jam telefoni, – severe diris la respondeculo pri hufoj.

Post ĉirkaŭ du horoj homamaso, staranta ĉe kinejo «Kapitolo», atendente unuan prezenton, kaj pro nenifarado gapanta ion ajn, rimarkis ke el pordo de kontoro pri ŝtat-provizo per kornoj

eliris homo kaj, kaptante la koron, malrapide ekiris for. Tio estis librotenisto Berlaga. Komence li apatie trenis la piedojn, poste poiome komencis plirapidigi la paŝadon. Turniĝinte post angulon la librotenisto nerimarke faris kruccsignon, kaj ekkuris ege rapide. Post nelonge li sidis jam ĉe sia tablo en financ-kalkula halo, kaj senkomprene rigardis na «Ĉefa libro». La ciferoj flugis kaj turniĝis en liaj okuloj.

La granda kombinanto frape fermis paperujon «Dosiero de Korejko», ekrigardis na Funt, kiu sidis sub nova surskribo «Prezidanto de la administracio», kaj diris:

– Kiam mi estis tre juna, tre malriĉa, kaj nutriĝis per tio ke montris en ĥersona foiro dikan grandbrustan monaĥon, asertante ke tio estas virino kun barbo, neklarigebla natura fenomeno, ankaŭ tiam mi ne falis en tiujn moralajn profundaĵojn kiel tiu ĉi vulgara Berlaga.

– Mizera sensignifa homo, – konfirmis Panikovskij, disportante teon al la tabloj. Al li estis agrable konscii ke en la mondo estas homoj eĉ pli sensignifaj ol li mem.

– Berlaga – tio ne estas kapo, – informis sid-prezidanto Funt kun karaktera por li senrapideco. – MakDonald – tio estas homo. Lia ideo pri klasa paco en industrio...

– Sufiĉe, sufiĉe, – diris Bender. – Ni fiksos

specifan kunsidon por evidentigi vian opinion pri MakDonald, kaj pri aliaj burĝaj politikistoj. Nun mi ne havas tempon. Berlaga, tio vere ne estas kapo, tamen li informis nin pri io el vivo kaj ago de memeksploziantaj akciaj kompanioj.

Subite la granda kombinanto eksentis gajon. Ĉio iris perfekte. Fiodorajn kornojn oni plu ne alportis. Laboron de Nigramarska filio oni povis opinii kontentiga, kvankam la poŝto denove alportis en la kontoron amason da novaj oficialaj leteroj, cirkuleroj kaj postuloj, kaj Panikovskij jam dufoje kuris en dung-oficejon por trovi kontoristinon.

– Sed! – kriis subite Ostap. – Kie estas Kozleviĉ? Kie estas «Antilopo»? Ĉu oficejo sen aŭto estas oficejo? Mi devas veturi al kunsidoj. Ĉiuj invitas min, eĉ vivi sen mi oni ne povas. Kie estas Kozleviĉ?

Panikovskij demovis la rigardon, kaj kun suspiro diris:

– Stato de Kozleviĉ ne estas bona.
– Kion tio signifas? Ĉu li estas ebria?
– Pli malbone, – respondis Panikovskij, – ni timis diri al vi pri tio. Lin delogis katolikaj pastroj.

Dum tio la kuriero ekrigardis la rajtigiton pri hufoj, kaj ili ambaŭ malgaje balancis la kapojn.

Ĉapitro 17

La erarinta filo revenas hejmen

La granda kombinanto ne ŝatis katolikajn pastrojn. Samgrade li negative rilatis al rabenoj, dalai-lamaoj, rus-ortodoksaj pastroj, muezinoj, ŝamanoj kaj al ceteraj Di-servantoj.

- Ankaŭ mi estas inklina al trompo kaj ĉantaĝo, - diris li, - nun, ekzemple, mi okupiĝas pri ellogo de granda monkvanto de unu obstina civitano. Sed mi akompanas miajn dubindajn agojn nek per kantado, nek per muĝo de orgeno, nek per stultaj sorĉaj ritoj, nek per latina aŭ slavortodoksa lingvo. Kaj, entute, mi preferas labori sen incensiloj kaj mistikaj sonoriletoj.

Kaj dum Balaganov kaj Panikovskij interrompante unu la alian rakontis pri malbona sorto, trafinta ŝoforon de «Antilopo», heroa koro de Ostap pleniĝadis per kolero kaj domaĝo.

La pastroj kaptis animon de Adam Kozleviĉ en la kamparana gastejo, kie inter duĉevalaj germanaj pakaĵ- kaj moldavaj frukt-ĉaroj, en sterka kaĉo staris «Antilopo». Pastro Kuŝakovskij venadis en la kamparan-gastejon por moralaj konversacioj kun katolikoj-kolonianoj. Rimarkinte na «Antilopo», la kultservisto ĉirkaŭiris ĝin, kaj kelkfoje tuŝetis per la fingro la pneŭon. Li konversaciis kun Kozleviĉ, kaj eksciis ke Adam Kazimiroviĉ apartenas al pola-katolika eklezio, sed ne konfesis jam ĉirkaŭ dudek jaroj.

Dirinte «Malbone, malbone, *pan* Kozleviĉ»,

pastro Kuŝakovskij foriris, levante per la ambaŭ manoj la nigran jupon, kaj saltante trans ŝaŭmaj bieraj urin-flakoj.

Sekvonttage, ege frue, kiam benk-ĉaristoj ekveturigis, al foiro en vilaĝon Koŝar, maltrankvilantajn et-spekululojn, preninte po dek kvin homoj en unu ĉaron, pastro Kuŝakovskij aperis denove. Ĉi-foje lin akompanis ankoraŭ unu pastro: Aloizij Moroŝek. Dum Kuŝakovskij salutis na Adam Kazimiroviĉ, pastro Moroŝek atente pririgardis la aŭton, kaj ne nur tuŝis per la fingro la pneŭon, sed eĉ premis la hupon, elvokinte sonojn de «maĉiŝ».

Post tio la pastroj interrigardis, venis al Kozleviĉ de du flankoj, kaj komencis delogi lin.

Блудный сын («La erarinta filo»)

Ili delogis lin la tutan tagon. Kiam Kuŝakovskij ĉesis paroli, ekparolis Moroŝek. Kaj ne sukcesis li halti, por viŝi la ŝviton, kiam pri Adam denove okupiĝis Kuŝakovskij. Iam Kuŝakovskij levis al ĉielo la flavan montrofingron, kaj Moroŝek dume ŝovetis la bidojn. Sed iam bidojn ŝovetis Kuŝakovskij, kaj la ĉielon montris Moroŝek. Kelkfoje la pastroj komencis mallaŭte kanti latine, kaj jam ĝis vespero de la unua tago Adam Kazimiroviĉ komencis alkanti ilin. Dum tio la ambaŭ pastroj afereme alrigardis la aŭton.

Post iom da tempo Panikovskij rimarkis

ŝanĝon en mastro de «Antilopo». Adam Kazimiroviĉ prononcis iujn neklarajn vortojn pri reĝlando surĉiela. Tion konfirmis ankaŭ Balaganov. Poste li komencis foresti dum longa tempo kaj, fine, tute lasis la kamparanan gastejon.

– Sed kial vi ne raportis al mi? – indigniĝis la granda kombinanto.

Ili volis raporti, sed timis koleron de la komandanto. Ili esperis ke Kozleviĉ rekonsciĝos kaj revenos mem. Sed nun ĉiuj esperoj estas perditaj. La pastroj jam delogis lin. Jes, ne pli malfrue ol hieraŭ la kuriero kaj la respondeculo pri hufoj renkontis hazarde na Kozleviĉ. Li sidis ĉe eniro en katolikan preĝejon. Ili ne sukcesis veni al li. El la preĝejo eliris pastro Aloizij Moroŝek kun knabo en punktoj.

– Ĉu vi komprenas, Bender, – diris Ŝura, – ĉiu tiu ĉi anaĉo ensidis nian «Antilopo», kompatinda Kozleviĉ demetis la ĉapon, la knabo ektintis per la sonorileto, kaj ili forveturis. Vere estis bedaŭre rigardi nian Adam. Neniam ni vidos plu na «Antilopo».

La granda kombinanto silente surkapigis sian ŝipestran kaskedon kun lakita viziero, kaj turniĝis al la eliro.

– Funt, – diris li, – vi restas en la kontoro! Kornojn kaj hufojn ricevu neniokaze. Se venos poŝtaĵoj, ŝutu ilin en la korbon. Kontoristino poste ordigos ilin. Ĉu vi komprenas?

Kiam la sid-prezidanto malfermis la buŝon por la respondo (tio okazis ĝuste post kvin minutoj), orfiĝintaj antilopanoj estis jam malproksime. Komence de la procesio rapidegis la komandanto, farante gigantajn paŝojn. Iam li turnis la kapon malantaŭen, kaj murmuris: «Ne pe-gardis vi teneran Kozleviĉ, melankoluloj! Ĉiujn mi maldungos! Jen kia ĝi estas, tiu ĉi nigra kaj blanka ekleziaro». La ĉefmekanikisto iris silente, ŝajnigante ke tiuj ĉi riproĉoj ne koncernas lin. Panikovskij saltis kiel simio, varmigita per sento de venĝo al ŝtelintoj de Kozleviĉ, kvankam sur lia animo kuŝis granda malvarma rano. Li timis nigrajn pastrojn, al kiuj li atribuis multajn magiajn kvalitojn.

Ĉi-orde la tuta filio pri provizo per kornoj kaj hufoj venis al bazo de la preĝejo. Antaŭ fera reto, plektita el spiraloj kaj krucoj, staris malplena «Antilopo». La preĝejo estis kolosa. Ĝi entranĉiĝis la ĉielon pika, kiel fiŝa ostoj. Ĝi pike fiksiĝis en gorĝo. Polurita ruĝa brikaroj, tegolaj tegment-deklivoj, ladaj flagoj, masivaj abutmentoj kaj belaj ŝtonaj idoloj, kaŝantaj sin de pluvo en la niĉoj, tuta tiu ĉi streĉiĝinta soldata gotiko tuj ekpemis la antilopanojn. Ili eksentis sin etaj. Ostap engrimpis la aŭton, enspiris la aeron, kaj kun abomeno diris:

– Fi! Aĉaĵo! Nia «Antilopo» odoras jam per kandeloj, kruĉoj por konstruo de preĝejo, kaj per pastraj botegoj. Certe veturadi kun

preĝilaro en aŭto estas pli agrable ol per fiakro. Krom tio senpage! Sed ne, karaj patroj, niaj aferoj estas pli gravaj!

Kun tiuj ĉi vortoj Bender eniris la preĝejan korton kaj, irinte inter infanoj, ludantaj sur desegnita per kreto asfalto li, per granita banka ŝtuparo leviĝis al pordoj de la preĝejo. Barelifaj sanktuloj, dismetitaj en kvadratetoj de la dikaj pordo-klapegoj, plakitaj per barelringoj, interŝanĝis aerkisojn aŭ montris per la manoj diversflanken, aŭ distriĝis per legado de diketaj libroj, sur kiuj konscienca ĉizisto prezentis eĉ latinajn literojn. La granda kombinanto ŝiris la pordon, sed ĝi ne cedis. El interne aŭdeblis mildaj sonoj de harmoniumo.

– Ili delogas! – kriis Ostap, sobiĝante de la ŝtuparo, – Ĝuste nun oni delogas! Ĉe dolĉmurmura mandolino.

– Ĉu ni foriru? – demandis Panikovskij, movante en la manoj sian ĉapelon. – Ja malgraŭ ĉio – Dia templo.

Sed Ostap, malatentante lin, venis al «Antilopo», kaj komencis senpacience premi la hupan pilkon. Li plenumis la «maĉiŝ» ĝis kiam post la dika pordo ekaŭdiĝis tintado de ŝlosiloj. Antilopanoj turnis la kapojn supren. La pordo malfermiĝis ambaŭklape, kaj la gajaj sanktuloj en siaj kverkaj kvadratetoj malrapide ekveturis internen. El mallumo de la portalo sur altan luman peronon elpaŝis Adam Kozleviĉ. Li estis

pala. Liaj konduktoraj lipharoj estis humidaj, kaj plore pendis el la naztruoĵoj. En la manoj li tenis preĝlibron. De ambaŭ flankoj lin subtenis la pastroj. De maldekstra flanko – pastro Kuŝakovskij, de la dekstra – Aloizij Moroŝek. Okuloj de la pastroj estis enunditaj per sankta oleo.

– Hola, Kozleviĉ! – kriis de sobe Ostap. – Ĉu vi ankoraŭ ne enuiĝis?

– Saluton, Adam Kazimiroviĉ, – familiare diris Panikovskij, tamen kaŝante sin post dorson de la komandanto.

Balaganov salute levis la manon kaj faris grimacon kiu verŝajne signifis: «Adam, lasu viajn ŝercojn!».

Korpo de la kondukisto de «Antilopo» faris paŝon antaŭen, sed animo lia, de ambaŭ flankoj vipita per penetraj rigardoj de Kuŝakovskij kaj Moroŝek, ŝiriĝis malantaŭen. Kozleviĉ angore ekrigardis la amikojn, kaj mallevis la okulojn.

Kaj jen komenciĝis grandioza batalo por senmorta animo de la ŝoforo.

– Hej vi, keruboj kaj serafoj, – diris Ostap, vokante la malamikojn al la disputo. – Dio ne ekzistas!

– Ekzistas, – oponis pastro Aloizij Moroŝek, ŝirmante per sia korpo na Kozleviĉ.

– Tio estas nura huliganismo, – elbalbutis pastro Kuŝakovskij.

– Jes, ne ekzistas, – daŭrigis la granda

kombinanto, – kaj neniam ekzistis. Tio estas medicina fakto.

– Mi opinias tiun ĉi konversacion nekonvena, – kolere deklaris Kuŝakovskij.

– Sed la aŭton forpreni – tio estas konvene? – kriis sentakta Balaganov. – Adam! Ili simple volas forpreni na «Antilopo».

Aŭdinte tion la ŝoforo demande ekrigardis la pastrojn. La pastroj ektumultis, kaj fajfante per la silkaj sutanoj penis forkonduki na Kozleviĉ reen. Sed tiu obstinis.

– Do kio okazos pri Dio? – insistis la granda kombinanto.

La pastroj estis devigataj komenci la diskuton. La infanoj ĉesis saltadi sur unu piedo, kaj venis pli proksimen.

– Kial vi asertas ke Dio ne ekzistas, – komencis Aloizij Moroŝek per intima voĉo, – kiam ĉio vivanta estas kreita per Li!..

– Scias mi, scias, – diris Ostap, – mi mem estas delonga katolikano kaj latinisto. *Puer, socer, vesper, gener, liber, mizer, asper, tener.*

Tiuj ĉi latinaj esceptoj, parkeraĉitaj per Ostap en tria klaso de privata gimnazio de Iliadi, kaj ĝis nun senutile sidintaj en lia kapo, efikis na Kozleviĉ magnetite. Lia animo kuniĝis kun la korpo kaj, rezulte de tiu ĉi kuniĝo, la ŝoforo nedecide moviĝis antaŭen.

– Filo mia, – diris Kuŝakovskij, kun malamo rigardante na Ostap, – vi eraras, filo mia.

Mirakloj Diaj atestas...

– Pastro! Ĉesu babilaĉi! – severe diris la granda kombinanto. – Mi mem faris miraklojn. Antaŭ ne pli ol kvar jaroj mi, en unu urbeto, estis devigata kelktage esti Jesuo Kristo. Kaj ĉio estis en ordo. Mi eĉ nutris per kvin panoj kelkajn milojn da kredantoj. Jes, mi nutris ilin, sed kia interpuŝiĝo okazis!

La disputo daŭriĝis en sama stranga maniero. Nekonvinkaj sed gajaj argumentoj de Ostap influis na Kozleviĉ plej vivige. Sur vangoj de la ŝoforo ekmateniĝis apenaŭ videbla ruĝo, kaj liaj lipharoj poiome komencis leviĝi.

– Tiel ilin, tiel! – aŭdiĝis aklamado el post spiraloj kaj krucoj de la barilo, kie jam kolektiĝis nemalgranda amaso da scivoluloj. – Vi al ili pri papo diru, pri krucmilitoj.

Ostap diris ankaŭ pri papo. Li malhonoris na Aleksandr Borĝia (Borgia) pro ties nebona konduto, kaj precipe menciis inkvizicion, persekutintan Galilejon. Li tiel entuziasmiĝis, ke pri malfeliĉoj de la granda sciencisto akuzis na Kuŝakovskij kaj Moroŝek persone. Tio estis lasta guto. Aŭdinte pri terura sorto de Galilejo, Adam Kazimiroviĉ rapide metis la preĝlibron sur la ŝtupon, kaj falis en vastajn kiel pordego brakumojn de Balaganov. Ankaŭ Panikovskij ĉeestis, karesante vangojn de la erarinta filo. En la aero pendis feliĉaj kisoj.

– *Pan* Kozleviĉ! – ĝemis la pastroj, – Kien vi

iras? Rekonsciiĝu!

Sed herooj de la rapid-veturado jam ensidadis la aŭton.

- Ĉu vi vidas, - kriis Ostap al la malgajiĝintaj pastroj, okupante la komandantan lokon, - mi ja diris al vi ke Dio ne ekzistas. Scienca fakto. Adiaŭ, pastroj! Ĝis revido!

«Antilopo», akompanata per aprobaj krioj de la homamaso forveturis, kaj baldaŭ ladaj flagoj kaj tegolaj tegment-deklivoj de la preĝejo ekestis nevideblaj. Por celebri la okazaĵon la antilopanoj haltis ĉe biera kiosko.

- Koran dankon, fratoj, - diris Kozleviĉ, tenante en la mano pezan kruĉon. - Preskaŭ pereis mi. Delogis min la pastroj. Precipe Kuŝakovskij. Jen ruzulo, diablo lin prenu! Ĉu vi kredas, li devigis min fasti! Ĉar alie, laŭ li, ne trafos mi la ĉielon.

- Ĉielo! - diris Ostap. - Ĉielo estas nun neglektita. Alia epoko. Malsama tempospaco. Anĝeloj deziras nun sur la teron. Sur la tero estas bone, tie estas komunumaj servoj, tie estas planetarioj, do oni povas rigardi stelojn kun akompano de kontraŭreligia lekcio.

Post oka kruĉo Kozleviĉ postulis la naŭan, alte levis ĝin super la kapo kaj, suĉinte sian konduktoran lipharon, jubile demandis:

- Forestas Dio, ĉu?

- Jes, - respondis Ostap.

- Tute forestas? Do estu ni sanaj.

Ĝuste same, post tio, li drinkadis, prononcante antaŭ ĉiu nova kruĉo:

– Ĉu estas Dio? Ne? Do estu ni sanaj.

Panikovskij drinkis samkvante al ĉiuj, sed pri Dio li ne parolis. Li ne volis enmiksiĝi tiun ĉi disputindan aferon.

Post reveno de la erarinta filo kaj de «Antilopo» nigramarska filio de Arbatov-kontoro por ŝtat-provizo per kornoj kaj hufoj akceptis antaŭe mankantan brilon. Ĉe pordo de eksa kartelo de kvin privatuloj nun konstante deĵoris aŭto. Certe ĝi ne similis bluan buick (buick) kaj long-korpan linkoln (lincoln), ĝi estis malproksima eĉ de ford-kaleŝetoj, tamen tio estis aŭto, transportilo kiu, kiel diris Ostap, malgraŭ ĉiuj siaj malavantaĝoj kapablas moviĝi sur stratoj, iam eĉ sen helpo de ĉevaloj.

Ostap laboris entuziasme. Se li uzus siajn fortojn por vera provizo per kornoj aŭ hufoj, do oni povas opinii ke cigaredinga kaj kombila produktado estus provizitaj per la krudmaterialoj minimume ĝis fino de nuna buĝeta jarcento. Sed estro de la kontoro okupiĝis pri io tute alia.

Depuŝiĝinte de Funt kaj Berlaga, kies informoj estis tre interesaj, sed dume ne gvidis al Korejko persone, Ostap ekintencis, por bono de la afero, amikiĝi kun Zosja Sinickaja kaj, inter paro da ĝentilaj kisoj sub nokta robin-

arbo, priparoli iom na Aleksandr Ivanoviĉ, kaj ne tiel lin kiel liajn financajn aferojn. Sed longa observo, plenumita per la rajtigito pri hufoj, montris ke inter Zosja kaj Korejko forestas amo, kaj ke tiu ĉi, laŭ esprimo de Ŝura, vane ĉirkaŭpaŝas ŝin.

– Kie ne estas amo, – kun suspiro komentis Ostap, – tie oni ne parolas pri mono. Lasu ni la fraŭlinon flanke.

Dum Korejko kun rideto elmemoris friponon en policista kaskedo, kiu entreprenis mizeran provon de malalt-kvalita ĉantaĝo, estro de la fako haste veturadis ene de la urbo en la flava aŭto, kaj trovadis homojn kaj hometojn pri kiuj milionulo-kontoristo jam delonge forgesis, sed kiuj bone memoris lin. Kelkfoje Ostap telefonis en Moskvon, vokante al la aparato sian konatulon-privatulon, kiu estis aprobita spertulo pri komercaj sekretoj. Nun en la kontoron venis leteroj kaj telegramoj kiujn Ostap rapide elprenis el komunaj poŝtaĵoj kiuj, kiel antaŭe, abundis per invitoj, postuloj pri kornoj, kaj riproĉoj pro ne sufiĉe energia provizo per hufoj. Io el tiuj ĉi leteroj kaj telegramoj trafis en la paperujon kun botetaj laĉoj.

Fine de la julio Ostap preparis sin al oficvojaĝo en Kaŭkazon. La afero postulis personan ĉeeston de la granda kombinanto en unu malgranda vinbera respubliko.

Dum la forvetura tago en la filio okazis

skandala evento. Panikovskij, sendita kun trideko da rubloj en havenstacion por aĉeti la bileton, revenis post duonhora ebria, sen bileto kaj sen la mono. Li nenion povis diri por pravigi sin, nur eltiradis la poŝojn, kiuj pendis ĉe li kiel bilardaj retetoj, kaj senĉese ridegis. Ĉio ridigis lin: kaj kolero de la komandanto, kaj riproĉaj rigardoj de Balaganov, kaj la samovaro, fidinta al lia prizorgo, kaj Funt, dormetanta ĉe sia tablo kun la panam-ĉapelo ŝovita sur la nazon. Sed kiam Panikovskij ekrigardis la cervajn kornojn, fiero kaj plibeligaĵo de la kontoro, lin trafis tia rid-paroksismo, ke li falis sur la plankon, kaj baldaŭ ekdormis kun ĝoja smajlo sur la violkoloraj lipoj.

– De nun ĉe ni estas plej vera oficejo, – diris Ostap: ni havas jam propran malversaciulon, kiu estas samtempe pordisto-alkoholulo. Ambaŭ tiuj ĉi tipoj faras realaj ĉiujn niajn okupojn.

Dum foresto de Ostap sub fenestroj de la kontoro kelkfoje aperis Aloizij Moroŝek kaj Kuŝakovskij. Kozleviĉ, vidinte la pastrojn, kaŝis sin en plej malproksiman angulon de la oficejo. La pastroj malfermis la pordon, enrigardis internen, kaj mallaŭte vokis:

– *Pan* Kozleviĉ! *Pan* Kozleviĉ! Ĉu vi aŭdas voĉon de la patro ĉiela? Rekonsciĝu, *pan*!

Dum tio pastro Kuŝakovskij levis al ĉielo la fingron, kaj pastro Aloizij Moroŝek ŝovetis la

bidojn. Tiam renkonten al la Di-servantoj eliradis Balaganov, kaj silente montris al ili sian fajran pugnon. Kaj la pastroj foriris, malgaje rigardante na «Antilopo».

Ostap revenis post du semajnoj. Lin renkontis la tuta organizaĵo. De alta nigra muro de la albordiĝanta ŝipo la granda kombinanto rigardis siajn subulojn amike kaj karese. Li odoris per ŝafido kaj per *imertina* vino.

En Nigramarska filio, krom kontoristino, kiu estis dungita ĝis la oficvojaĝo de Ostap, sidis du junaj homoj en botoj. Tio estis studentoj, senditaj el bestbredada faklernejo por provlaboro.

– Jen kiel bone! – diris Ostap acide. – Venas jam nova generacio. Sed ĉe mi, karaj kamaradoj, estos bezonate laboradi. Vi ja certe scias ke kornoj, tio estas elkreskaĵoj kovritaj per haroj aŭ per firma korna tavolo, estas aldonajoj de kranio, kaj renkontiĝas plejparte ĉe mamuloj?

– Tion ni scias, – decide diris la studentoj, – sed ni venis por provlaboro.

Maniero, per kiu oni devis liberiĝi de la studentoj, okazis komplika kaj sufiĉe multekosta. La granda kombinanto sendis ilin en oficvojaĝon en kalmukiajn stepojn por organizado de provizejoj. Tio kostis al la kontoro ses cent rublojn, sed alia eliro forestis: la studentoj malhelpus pe-i la sukcese irantan

aferon.

Kiam Panikovskij eksciis kiom kostas la studentoj, li forkondukis na Balaganov flanken, kaj incite flustris:

– Sed min oni ne sendas en oficvojaĝojn. Kaj forpermeson oni ne donas. Mi bezonas veturi na Esentuki por kuraci min. Ankaŭ liberajn tagojn mi ne havas, kaj profesion veston mi ne ricevas. Ne, Ŝura, al mi tiuj ĉi kondiĉoj ne taŭgas. Kaj, entute, mi eksciis ke salajro en «Herkules» estas pli alta. Iru mi tien esti kuriero. Je mia honora nobla vorto, iru mi!

Vespere Ostap denove vokis al si na Berlaga.

– Genuiĝu! – kriis Ostap per voĉo de Nikolao la unua, kiam li ekvidis la libroteniston.

Tamen la konversacio havis amikan karakteron, kaj daŭriĝis du horoj. Post tio Ostap ordonis sekvontmatene venigi na «Antilopo» al enirejo de «Herkules».

Ĉapitro 18

Sur la maro kaj sur la firma tero

Kamarado Skombrieviĉ venis sur la plaĝon tenante en la manoj premian teknon. Al la teko estis alforĝita silvera vizitkarto kun fleksita angulo kaj kun longega kursivo, el kiu sekvis ke Jegor Skombrieviĉ sukcesis jam festeni sian kvinjaran jubileon de servado en «Herkules».

Lia vizaĝo estis pura, rekta, aŭdaca, kiel ĉe

razanta sin anglo sur reklamaj paneloj. Skombrieviĉ haltis ĉe la tabulo, kie per kreto oni indikas temperaturon de la akvo, kaj ekiris, malfacile liberigante la piedojn el la varmega sablo, elekti oportunan loketon.

Tendaro da banantoj estis multnombra. Ĝiaj facilaj konstruaĵoj aperis matene, por malaperi kune kun sunmalleviĝo, lasinte sur la sablo urbajn forĵetaĵojn: velkitajn melonajn kaj ov-ŝeletejn, kaj ĵurnalpecojn, kiuj poste tutnokte vivas sur la malplena bordo sekretan vivon, pri io susuras, kaj flugas sub la rokoj.

Skombrieviĉ penetris inter viŝtukaj kabanetoj, ombreletoj kaj litotukoj, streĉitaj sur bastonoj. Sub ili kaŝiĝis junulinoj en banjupetoj. Ankaŭ viroj estis en kostumoj, sed ne ĉiuj. Iuj el ili limigis sin nur per figarbaj folioj, sed ankaŭ tiuj kovris ne bibliajn lokojn, sed nazojn de la nigramarskaj ĝentlemanoj. Oni faris tion por ke de la nazoj ne deŝeliĝu la haŭto. Ordiĝinte tiel, la viroj kuŝis en diversaj liberaj pozoj. Iam ili, kovrante per la mano la bibliajn lokon, eniris la akvon, mergis sin, kaj rapide kuris al siaj kuŝejoj, enpremitaj en la sablon, por perdi eĉ ne unu kuban centimetron de la saniga sunbano.

Ne sufiĉan kvanton da vestoj ĉe tiuj ĉi civitanoj bonege kompensis ĝentlemano de tute alia aspekto. Li vestis ledajn botetojn kun butonoj, vizit-pantalono, plene butonumitan

surtuton, kolumon, kravaton, horloĝĉeneton, kaj ankaŭ feltan ĉapelon. Dikaj lipharoj kaj vato en la oreloj kompletigis aspekton de tiu ĉi homo. Apud li staraĉis perpendikle ensablita bastono kun vitra tenilo. La varmego turmentis lin. La kolumo ŝvelis pro la ŝvito. Ene de akseloj de la ĝentlemano estis varmege kiel en fornego: tie oni povus fandi ercon. Sed li daŭrigis la senmovan kuŝadon. Sur ĉiu plaĝo de mondo oni povas renkonti tian homon. Kio li estas, por kio li venis ĉi tien, kial kuŝas plenekipita – nenio estas sciate. Sed tiuj homoj estas, po unu en ĉiu plaĝo. Eble tio estas anoj de iu sekreta ligo de stultuloj, aŭ restaĵo de iam potenca ordeno de Rozkrucanoj, aŭ freneziĝintaj fraŭloj, – kiu scias...

Jegor Skombrieviĉ lokiĝis apud ano de ligo de stultuloj, kaj rapide senvestiĝis.

На суше и на море («Sur la firma tero kaj sur la maro»)

Senvesta Skombrieviĉ okulfrape malsimilis na Skombrieviĉ vestitan. Seketa kapo de anglo sidis sur blanka ina korpo kun deklivaj ŝultroj kaj tre vastaj koksoj.

Jegor alvenis la akvon, kontrolis ĝin per la piedo, kaj eljelpis. Poste li enakvigis la duan piedon, kaj denove eljelpis. Poste li faris kelkajn paŝojn antaŭen, per la dikaj fingroj ŝtopis la orelojn, per la montrofingroj fermis la okulojn,

per la aliaj pinĉe premis la nazajn truojn, eligis animŝiran krion, kaj mergiĝis laŭvice kvarfoje. Nur post tio li eknaĝis antaŭen svinge, turnante la kapon post ĉiu svingo de la mano. Kaj eta ondaro akceptis en sin na Jegor Skombrieviĉ – ekzemplan herkulesanon kaj eminentan socian aktivulon. Post kvin minutoj, kiam la laca soci-aktivulo turniĝis sur la dorson, kaj lia ronda globusa ventraĉo ekbalanciĝis sur surfaco de la maro, de supro de la plaĝa abrupto ekaŭdiĝis «maĉiŝ» de «Antilopo».

El la aŭto eliris Ostap Bender, Balaganov, kaj librotenisto Berlaga, sur kies vizaĝo speguliĝis plena humileco al sia sorto. Ĉiuj tri malleviĝis kaj, senceremonie pririgardante vizaĝojn de la banantoj, komencis serĉi iun.

– Tio estas lia pantalono, – diris fine Berlaga, haltante antaŭ vestoj de nenion suspektanta Skombrieviĉ. – Li, verŝajne, fornaĝis malproksimen.

– Sufiĉas! – kriis la granda kombinanto. – Plu mi ne intencas atendi. Kion fari, estas bezonate agi ne nur sur firma tero, sed ankaŭ sur la maro.

Li deĵetis la kostumon kaj la ĉemizon, sub kiuj okazis naĝa kalsoneto, kaj, svingante la manojn, eniris la akvon. Sur brusto de la granda kombinanto videblis blua pulva tatuoj, prezentanta Napoleonon en triangula ĉapo kaj kun bierkruĉo en la mallonga mano.

– Balaganov! – kriis Ostap jam el la akvo. – Senvestigu kaj preparu na Berlaga. Eblas ke li povos esti utila.

Kaj la granda kombinanto eknaĝis sur la flanko, dismovante la akvon per la kupra ŝultro, kaj tenante direkton al nord-nordoriento, kie konturiĝis perlamota ventro de Jegor Skombrieviĉ.

Antaŭ ol mergiĝi la marajn profundojn, Ostap estis devigata multe laboradi sur la kontinento. Ĉefvoja spuro gvidis la grandan kombinanton sub orajn literojn de «Herkules», kaj plimulton de la tempo li pasigis en tiu ĉi institucio. Lin jam ne mirigis ĉambroj kun alkovoj kaj lav-tabloj, statuoj, kaj la pordisto en kaskedo kun ora zigzago, ŝatanta paroladi pri flama sepulto.

El perturbaj klarigoj de kuraĝe senespera Berlaga konturiĝis duonrajtigita figuro de kamarado Skombrieviĉ. Li okupis grandan dufenestran ĉambron, kiun ise loĝigis alilandaj ŝipestroj, leon-dresistoj, aŭ riĉaj studentoj el Kievo.

En la ĉambro ofte kaj incite sonoris telefonoj, iam aparte, kaj iam ambaŭ kune. Sed neniu deprenis la aŭskultilojn. Eĉ pli ofte malfermiĝis la pordo, kaj iu tondita oficeja kapo, eniĝinte la ĉambron, konfuziĝe movadis la okulojn, kaj malaperis, por tuj doni lokon al alia kapo, sed nun jam ne tondita sed

ĉirkaŭkreskata per krudaj haroj, aŭ simple nuda kaj lilak-kolora kiel cepobulbo. Sed ankaŭ la cepobulba kapo ne longe ŝtopiĝis en la porda fendo. La ĉambro estis malplena.

Kiam la pordo malfermiĝis, eble kvindekan fojon dum tiu ĉi tago, en la ĉambrom enrigardis Bender. Li same al aliaj turnadis la kapon de live dekstren, de dekstre liven kaj, kiel aliaj, evidentiĝis ke kamarado Skombrieviĉ en la ĉambro forestas. Arogante espriminte sian malkontenton, la granda kombinanto treniĝis tra la fakoj, sekcioj, sektoroj kaj kabinetoj, demandante ĉu iu vidis kamaradon Skombrieviĉ. Kaj en ĉiuj tiuj ĉi lokoj li ricevis saman respondon: «Skombrieviĉ ĵus estis ĉi tie», aŭ: «Skombrieviĉ eliris antaŭ minuto».

Duonrespondeca Jegor apartenis al multnombra speco de oficistoj kiuj «ĵus estis ĉi tie», aŭ «eliris antaŭ minuto». Kelkaj el ili dum tuta ofica tago eĉ ne povas atingi sian kabineton. Tia homo eniras la institucian vestiblon ĝuste je la naŭa kaj, plena de bonaj intencoj, levas la piedeton sur unuan ŝtupon de la ŝtuparo. Lin atendas majestaj aferoj. Li fiksas ĉe si, en la kabineto, okon da gravaj rendezuoj, du vastajn kunsidojn, kaj unu malvastan. Sur lia skribotablo kuŝas staketo da paperoj, postulantaj urĝan respondon. Kaj, entute, la aferoj estas multegaj, tagnokto ne sufiĉas. Do la duonrespondeca aŭ respondeca civitano vikle

levas la piedeton sur la marmoran ŝtupeton. Sed mallevi ĝin estas ne tiel simple. «Kamarado Tolaĵov, por unu minuto», – aŭdas li kolomban voĉon, – «ĝuste nun mi volis prilabori kun vi certan problemeton». Oni mole prenas na Tolaĵov sub la brakon, kaj forkondukas lin en angulon de la vestiblo.

Kaj de tiu ĉi momento la rajtigita aŭ duonrajtigita laboranto pereas por la lando: li ekiras de manoj en manojn. Ne sukcesas li prilabori la problemeton kaj trakuri tri ŝtupojn, kiam oni denove subkaptas lin, forkondukas al fenestro aŭ en malluman koridoron, aŭ en iun dezertan angulon, kie malpuremulo-mastrumisto amasigis malplenajn kestojn, kaj ion klarigas al li, ion postulas, pri io insistas, kaj petas urĝe ordigi ion. Ĝis dekkvina horo li, malgraŭ ĉio, atingas unuan interŝtuparan placeton. Al deksepa horo li sukcesas traŝiriĝi eĉ al interŝtuparo de dua etaĝo. Sed, ĉar lia laborloko troviĝas sur tria etaĝo, kaj la labortago jam finiĝis, li rapide kuras soben kaj lasas la institucion por sukcesi veni al urĝa interbranĉa konsiliĝo. Kaj dum tiu ĉi tempo en la kabineto superstreĉiĝas telefonoj, disfalas fiksitaj rendezuoj, la korespondaĵoj kuŝas senresponde, kaj anoj de du vastaj kunsidoj kaj de unu malvasta indiferente trinkas teon kaj parolaĉas pri tram-trafikaj malordoj.

Ĉe Jegor Skombrieviĉ ĉiuj tiuj ĉi specifikaĵoj

estis ekstreme akriĝitaj per socia aktivado, al kiu li fordonis sin kun troa vervo. Li lerte kaj profite uzis reciprokan kaj diversflankan trompon, kiu iel nerimarke penetris vivon de «Herkules», kaj ial portis nomon de porkomunuma alŝarĝo.

Herkulesanoj sidis en kunsidoj po tri horoj seninterrompe, aŭskultante humiligan babiladon de Skombrieviĉ.

Ili ĉiuj tre volus kapti na Jegor je liaj diketaj femuroj, kaj forĵeti el fenestro de sufiĉa alteco. Iam al ili ŝajnis eĉ ke entute okazas neniu porkomunuma agado, kaj neniam okazis, kvankam ili sciis, ke post muroj de «Herkules» ekzistas iu alia, ĝusta komunuma vivo. «Jen bruto», – pensis ili, angore turnante en la manoj krajonojn kaj te-kuleretojn, – «simululo malbenita!». Sed alkroĉiĝi al Skombrieviĉ, senmaskigi lin, estis ekster iliaj fortoj. Jegor prononcis korektajn paroladojn pri soveta komunumo, pri porkultura laboro, pri profesia lernado, kaj pri amatora arta aktiveco. Sed post ĉiuj ĉi varmegaj vortoj staris nenio. Dek kvin rondetoj, politikaj kaj muzik-dramaj, jam du jaroj prilaboris siajn perspektivajn planojn; ĉeloj de libervolaj komunumoj, kies celo estis helpi al disvolviĝo de aviado, kemiaj scioj, aŭta kaj ĉevala sporto, vojkonstrua afero, kaj kiom eble rapida elradikigo de grandpotenca ŝovinismo, ekzistis nur en inflama imago de loka

sindikata komitato. Kaj sindikat-lernejo, kies kreo Skombrieviĉ metis estiel aparta sia merito, tuttempe rekonstruiĝis, kio, kiel sciante, signifas plenan foreston de agado. Se Skombrieviĉ estus honesta persono li, eble, mem dirus ke ĉiun tiun ĉi laboron oni faras «miraĝ-cele». Sed en loka sindikat-komitato tiun ĉi miraĝon oni enigis en la raportojn, kaj, en sekva sindikata instanco, ekzisto de muzik-politikaj rondetoj elvokis jam neniun dubon. La sindikata lernejo bildiĝis tie kiel granda brika konstruaĵo, kie staras lernobenkoj, kaj lerta instruisto, per kredo sur la nigra tabulo, desegnas diagramon de senlaboreco en Usono. Kaj lipharaj lernantoj kreskas politike antaŭ ĉies rigardoj. El tuta vulkana ringo da porkomunuma aktivado, per kiu Skombrieviĉ ĉirkaŭigis na «Herkules», agis nur du flamspirantaj punktoj: murgazeto «Voĉo de prezidanto», aperanta foje monate, kaj produktata dum labortempo per fortoj de Skombrieviĉ kaj Bomze; kaj krucligna tabulo kun surskribo «Ĉesintaj drinkaĉi kaj vokantaj aliulojn», sub kiu tamen videblis neniun familinomo.

Al Bender diable tedis persekuti na Skombrieviĉ tra etaĝoj de «Herkules». La granda kombinanto neniel povis atingi la gloran komunumaganton. Li forglitis el la manoj. Jen ĉi tie, en loka sindikat-komitato li ĵus parolis per telefono, ankoraŭ varma estas la membrano, kaj

nigra lako de la parolilo ankoraŭ ne perdis nebulon de lia spiro. Jen ĉi tie, sur la fenestrobreto ankoraŭ sidas homo kun kiu li ĵus konversaciis. Foje Ostap vidis eĉ respegulon de Skombrieviĉ en la ŝtupara spegulo. Li ĵetiĝis antaŭen, sed la spegulo tuj puriĝis, respegulante nur fenestron kun malproksima nuboj.

– Dipatrino zorganta, polico gardanta! – kriis Ostap, – rekaptante la spiradon. – Ĝis kiom banala kaj abomena por ĉiuj estas tiu ĉi burokratismo! Ankaŭ en nia Nigramarska filio estas iom da malĝustaĵoj, sed ne ĝis tiom kiel en «Herkules»... Ĉu vere, Ŝura?

La rajtigito pri hufoj eligis pezan pumpan ve-spiron. Ili denove okazis en malvarmeta koridoro de tria etaĝo, kiun ili sukcesis viziti ĉitage ĉirkaŭ dek-kvin-foje. Kaj denove, dek-kvinan fojon ili preteriris lignan kanapon, starantan ĉe Brulegov-kabineto.

Sur la kanapo de mateno mem sidis germana specialisto mendita el Germanio per multege da mono, inĝeniero Henriko Mario Zauze. Li vestis ordinaran eŭropan kostumon, kaj nur ukraina ĉemizeto, brodita per kozaka ornamaĵo, montris ke la inĝeniero troviĝas en Rusio ĉirkaŭ tri semajnoj, kaj sukcesis jam viziti vendejon de metiistaj produktaĵoj. Li sidis senmove, retroklinante la kapon al ligna apogilo de la kanapo, kaj fermante la okulojn same al

homo kiun oni intencas razi. Povus ŝajni ke li dormetas. Sed la laktaj fratoj, ne unufoje preterkurintaj lin en serĉoj de Skombrieviĉ, jam sukcesis rimarki ke koloroj sur senmova vizaĝo de la transmara gasto senĉese ŝanĝiĝas. Komence de la labortago, kiam la inĝeniero ekokupis pozicion ĉe pordo de Brulegov, vizaĝo lia estis kutimgrade ruĝa. Kun ĉiu horo ĝi bruliĝis pli kaj pli, kaj ĝis matenmanĝa paŭzo akceptis koloron de poŝta sigelvakso. Ĝis tiu tempo kamarado Brulegov, verŝajne, atingis nur unuan interŝtuparon. Post la matenmanĝa paŭzo la kolorŝanĝo ekis retroiri. La sigelvaksa koloro transformiĝis en stadion de iuj skarlatinaj makuloj. Henriko Mario komencis paliĝi, kaj al mezo de la tago, kiam estro de «Herkules», ŝajne, sukcesis traŝiriĝi al dua interŝtuparo, vizaĝo de la alilanda specialisto ekestis amele blanka.

– Kio okazas pri tiu ĉi homo? – flustris Ostap al Balaganov. – Kiu gamo da sentoj!

Apenaŭ li sukcesis prononci la vortojn, Henriko Mario Zauze saltleviĝis de sur la kanapo, kaj malice ekrigardis pordon de Brulegov, el post kiu aŭdiĝis senesperaj telefon-sonoroj. «*Volokita!*» (aferprokrastado) – eljelpis li diskante kaj, ĵetinte sin al la granda kombinanto komencis plejforte skui lin je la ŝultroj.

– *Genose* (kamarado) Brulegov! – kriis li,

saltante antaŭ Ostap. – *Genose Brulegov!*

Li eltiradis la horloĝon, ŝovis ĝin sub nazon de Balaganov, levis la ŝultrojn kaj denove ĵetiĝis sur Bender.

– *Vas maĥen zi?* (Kion vi faras?) – konsternerne demandis Ostap, montrante iun konatecon kun germana lingvo. *Vas volen zi* (kion vi bezonas) de la kompatinda vizitanto?

Sed Henriko Mario Zauze ne lasis lin. Daŭre tenante la livan manon sur ŝultro de Bender li, per la dekstra mano, altiris al si na Balaganov, kaj prezentis al ili longan kaj pasian paroladon, dum kiu Ostap senpacience rigardis flankojn en espero kapti na Skombrieviĉ, kaj la rajtigito pri hufoj nelaŭte hikis, estime kovrante la buŝon per la mano, kaj sence rigardante ŝuojn de la alilandano.

Inĝeniero Henriko Mario Zauze subskribis kontrakton por unujara laboro en Sovetio, aŭ, kiel difinis Henriko mem, ŝatanta precizecon, – en konzerno «Herkules». «Pripensu, sinjoro Zauze», – avertis lin konatulo, doktoro pri matematiko, Bernhard Herngros, – «kontraŭ sia mono la komunistoj igos vin labori pene». Sed Zauze klarigis ke li ne timas laboron, kaj ke li jam delonge serĉas vastan kampon por apliko de siaj scioj en sfero de mekanizado de arbarmastrumado.

Kiam Skombrieviĉ raportis al Brulegov pri alveturo de la alilanda specialisto, estro de

«Herkules» ektumultis sub siaj palmoj.

– Li estas ege, ege bezonata al ni! Kien vi enigis lin?

– Dume en hotelon. Ripozu li post la vojaĝo.

– Pri kiu ripozo vi parolas! – kriis Brulegov.
– Tiom da mono estas pagita kontraŭ li, valuto! Jam morgaŭ, ĝuste je la deka li devas esti ĉi tie.

Kvin minutoj antaŭ la deka Henriko Mario Zauze, brilanta per kafa pantalono kaj smajlanta pro penso pri vasta sfero de la agado, eniris kabineton de Brulegov. La estro ankoraŭ forestis. Forestis li ankaŭ post horo kaj post du horoj. Henriko komencis jam turmentiĝi. Distris lin nur Skombrieviĉ, kiu tempo de tempo aperis kaj kun senpeka smajlo demandis:

– Kio, ĉu *genose* Brulegov ankoraŭ ne venis? Strange.

Post ankoraŭ du horoj Skombrieviĉ haltis en koridoro matenmanĝantan Bomze kaj komencis interflustri kun li.

– Vere, mi ne scias eĉ kion fari. Brulegov fiksas al la germano renkonton je la deka matene, sed li forveturis en Moskvon klopodi pri la ejo. Pli frue ol post semajno li ne revenos. Helpu, Adolf Nikolaeviĉ! Ĉe mi estas porkomunuma agado, jen profesion lernadon neniel sukcesas ni rekonstrui. Sidu vi kun la germano, okupu lin per io. Ja kontraŭ li mono estas pagita. Valuto.

Bomze lastfoje flaris sian ĉiutagan kotleton, forglutis ĝin kaj, deskuinte la pecetojn, ekiris konatiĝi kun la gasto.

Dum la semajno inĝeniero Zauze, gvidata per ĝentila Adolf Nikolaeviĉ, sukcesis viziti tri muzeojn, spekti baleton «Dormanta belulino», kaj sidi proksimume dek horoj sur solena kunveno, aranĝita je lia honoro. Post la solenaĵo okazis neoficiala parto, dum kiu elektitaj herkulesanoj tre ĝojadis, skuis la glasetojn kaj, rigardante na Zauze kriis «Drinku ĝisfunde!».

«Kara Tili», – skribis la inĝeniero al sia fianĉino en Aaĥen (Aachen), – «Jam dek tagoj loĝas mi en Nigramarsk, sed labori en konzerno «Herkules» mi ankoraŭ ne komencis. Mi timas ke pagon kontraŭ tiuj ĉi tagoj oni deprenos el la kontraktita sumo.»

Tamen la dek-kvinan de la monato la kasisto enmanigis al Zauze lian duonmonatan salajron.

– Ĉu ne ŝajnas al vi, – diris Henriko Mario al sia nova amiko Bomze, – ke oni pagis al mi vane? Ja mi plenumis neniun laboron.

– Lasu, kolego, tiujn ĉi malserenajn pensojn! – kriis Adolf Nikolaeviĉ. – Tamen, se vi volas, oni povas meti por vi specialan tablon en mia kabineto.

Post tio Zauze skribis leteron al la fianĉino, sidante ĉe speciala propra tablo:

«Ĉarma mia. Mi vivas strangan neordinaran vivon. Mi tute nenion faras, sed ricevas la

monon akurate, en kontraktitaj tagoj. Ĉio tio mirigas min. Rakontu pri tio al nia amiko doktoro Bernhard Herngros. Tio ŝajnos al li interesa».

Alveturinta el Moskvo Brulegov, sciinte ke Zauze havas jam tablon, ekĝojis.

– Jen kiel bonegas! – diris li. – Skombrieviĉ informu la germanon pri ties taskoj.

Sed Skombrieviĉ, kun ĉiu sia pasio fordoninta sin al kreo de potenca rondeto de tir-harmonikistoj, deĵetis la germanon al Adolf Nikolaeviĉ. Al Bomze tio ne plaĉis. La germano malhelpis al li manĝeti kaj, entute, ŝovis sin en malproprajn aferojn. Do Bomze fordonis lin en ekspluatan fakon. Sed ĉar tiu ĉi fako tiutempe reorganizis sian laboron, kio konsistis en senĉesa ŝovado de tabloj de loko en lokon, do na Henriko Mario oni transdonis en fakon financkalkulan. Ĉi tie Arnikov, Drejfus, Saĥarkov, Korejko kaj Borisoĥlebskij, ne konantaj germanan lingvon, decidis ke Zauze estas alilanda turisto el Argentino, kaj kelktage klarigis al li herculesan sistemon de librotenado. Dum tio ili uzis abocon de surdmutuloj.

Post monato tre maltrankvila Zauze kaptis na Skombrieviĉ en bufedejo kaj komencis krii:

– Mi ne deziras ricevi monon vane! Donu al mi laboron! Se daŭriĝos same, mi plendos al via patrono!

Finaĵo de parolado de la alilanda specialisto

ne plaĉis al Skombrieviĉ. Li elvokis al si Bomze.

– Kio pri la germano? – demandis li. – Kial li frenezadas?

– Ĉu vi scias, – diris Bomze, – laŭ mia opinio li estas nura kverelulo. Je Dio. Sidas la homo ĉe tablo, faras tute nenion, ricevas multegon da mono, kaj kuraĝas plendi post tio.

– Vere kverelema tipo, – rimarkis Skombrieviĉ, – malgraŭ ke germano. Oni devas apliki represion. Mi foje diros al Brulegov. Tiu rapide enigis lin en botelon.

Tamen Henriko Mario mem decidis tratabiĝi al Brulegov. Sed ĉar estro de «Herkules» estis elstara reprezentanto de la laborantoj kiuj «eliris antaŭ minuto» aŭ «ĵus estis ĉi tie», tiu ĉi provo venigis lin nur al sidado sur ligna kanapo kaj al la eksplodo, kies viktimoj estis senkulpaj filoj de leŭtenanto Ŝmit.

– *Burokratismus!* – kriis la germano, pro la ekscitiĝo transiranta al malfacila rusa lingvo.

Ostap silente prenis la eleŭropan gaston je la mano, alkondukis lin al kesto por plendoj, pendanta sur la muro, kaj diris, kiel al surdulo:

– Ĉi tien! Ĉu vi komprenas? En la keston. *Ŝrajben, ŝrib, geŝriben.* Skribi. Ĉu vi komprenas? Mi skribas, vi skribas, li skribas, ŝi, ĝi skribas. Ĉu vi komprenas? Ni, vi, ili, skribas plendojn kaj metas ilin en tiun ĉi keston. Meti. Verbo meti. Mi, vi, ili, oni metas la plendojn... Kaj neniu elprenas ilin. Elpreni! Mi ne elprenas, vi ne

elprenas...

Sed tiam la granda kombinanto ekvidis en fino de la koridoro vastajn femurojn de Skombrieviĉ kaj, ne fininte la gramatik-lecionon, ekkuris post la nekaptebla socia aktivulo.

- Tenu vi vin, Germanio! - kuraĝige kriis Balaganov al la germano, ĵetante sin post la komandanto.

Sed, al ega bedaŭro de Ostap, Skombrieviĉ denove malaperis, kvazaŭ demateriigis.

- Tio jam estas mistiko, - diris Bender, turnante la kapon, - ĵus estis la homo, kaj - ne estas jam.

Pro la malespero la laktaj fratoj komencis malfermi ĉiujn pordojn laŭvice. Sed jam el tria ĉambro Balaganov elsaltis kiel el surrivera glaci-aperturo. Vizaĝo lia neŭralgie tordiĝis.

- Va-va, - diris la rajtigito pri hufoj, apogante sin al la muro, - va-va-va.

- Kio pri vi, bebo mia? - demandis Bender.
- Ĉu iu ofendis vin?

- Tie, - elbalbutis Balaganov, etendante la tremantan manon.

Ostap malfermis la pordon, kaj ekvidis nigran ĉerkon.

La ĉerko staris meze de la ĉambro sur kancelaria tablo. Ostap demetis sian ŝipestran kaskedon, kaj sur ŝupintoj alvenis la ĉerkon. Balaganov time observis liajn agojn. Post minuto Ostap mansignis al Balaganov kaj

montris al li grandan blankan surskribon, pentritan sur la ĉerkaj deklivoj.

– Ĉu vi vidas, Ŝura, kio estas skribita ĉi tie? – diris li. – «Morton al burokratismo!». Ĉu nun vi trankviliĝis?

Tio estis belega agita ĉerko kiun herkulesanoj, dum grandaj festoj, eltiris sur la straton, kaj kun kantado portadis tra la tuta urbo. Kutime la ĉerkon subtenis per siaj ŝultroj Skombrieviĉ, Bomze, Berlaga kaj Brulegov mem, kiu estis homo demokratia, kaj ne hontis aperi apud la subuloj ĉe diversaj procesioj kaj politikaj karnavaloj. Skombrieviĉ tre estimis tiun ĉi ĉerkon, kaj atribuis al ĝi grandan signifon. Tempo de tempo, pendiginte sur sin antaŭtukon, Jegor propramane refarbis la ĉerkon kaj refreŝigis la antiburokratajn sloganojn, dum en lia kabineto raŭkis kaj histeriiĝis telefonoj, kaj plej diversaj kapoj, eniĝinte la pordan fendon, malĝoje movis la okulojn.

Malgraŭ ĉiuj penoj Jegor ne estis trovita. Pordisto en kaskedo kun zigzago informis na Bender ke kamarado Skombrieviĉ estis ĉi tie antaŭ minuto, kaj ĵus foriris, forveturis baniĝi al Komendanta plaĝo, kio donas al li, laŭ lia diraĵo, ŝarĝon da vicleco.

Preninte kun si, por iu ajn kazo, na Berlaga, kaj dispuŝinte na Kozleviĉ, dormetantan ĉe la stirilo, la antilopanoj direktiĝis al la plaĝo.

Do, post ĉio okazinta, ĉu oni devas miri ke

ekscitita Ostap senprokraste eniris post Skombrieviĉ la akvon, tute ne atentante tion ke gravan konversacion pri malpuraj akciaj aferoj li devos gvidi en Nigra maro.

Balaganov precize plenumis ordonon de la komandanto. Li senvestigis humilan Berlaga, venigis lin al la akvo kaj, tenante lin per la ambaŭ manoj je la talio, komencis trankvile atendi. En la maro, ŝajne, okazis malfacila disputo. Ostap kriis kiel mara reĝo. La vortoj ne estis klareblaj.

Videblis nur ke Skombrieviĉ penas preni direkton al la bordo, sed Ostap detranĉis la vojon kaj ekpelis lin en liberan maron. Poste la voĉoj plifortiĝis, kaj ekestis aŭdeblaj apartaj vortoj: «'Intensivnik'! Kaj kiu prenis? Ĉu Puŝkin prenis?..»

Berlaga jam delonge paŝadis surloke per la nudaj kalkanoj, stampante sur la malseka sablo indianajn spurojn. Fine el la maro venis krio:

– Enigu!

[Запускайте Берлагу!](#) («Funkciigu na Berlaga!»)

Balaganov enigis en la maron na Berlaga, kaj tiu kun neverŝajna rapideco eknaĝis hunde, batante la akvon per manoj kaj piedoj. Ekvidinte na Berlaga, Jegor Skombrieviĉ, pro la timo, enakviĝis plene.

Dume la rajtigito pri hufoj etendiĝis sur la sableto, kaj ekfumis cigaredon. Li atendis

dudek, proksimume, minutoj. Unua revenis Berлага. Li kaŭriĝis, prenis el poŝo de la pantalono sian nasztukon kaj, viŝante la vizaĝon, diris:

– Konfesis nia Skombrieviĉ. Ne eltenis li la konfronton.

– Do denunciis vi, vipuraĉo, ĉu? – bonanime demandis Ŝura. Kaj, preninte la cigaredstumpeton per la granda kaj montra fingroj li klakis per la lango. Dum tio el lia buŝo elflugis kraĉaĵo longa kaj rapida kiel torpedo.

Saltante sur unu piedo, kaj per la dua celante la krurumon, Berлага klarigis nebule:

– Mi faris tion ne interese de veraĵo, sed interese de vero.

Dua venis la granda kombinanto. Li svinge ekkuŝis surventren kaj, preminte la vangon al la varmiĝinta sablo, longe kaj multsignife rigardis bluan, elgrimpantan el la akvo Skombrieviĉ. Poste li prenis el manoj de Balaganov la paperujon kaj, salivante per la lango la neforviŝeblan kraĵonon, komencis enigi en la dosieron novajn informojn, akiritajn per la pena laboro.

Mirinda transformiĝo okazis pri Jegor Skombrieviĉ. Nur antaŭ duonhoro la ondo akceptis en sin plej aktivan komunum-aganton, homon pri kiu eĉ prezidanto de loka sindikato kamarado Nederlandjuk diris: «Mistrafis povas iu ajn, sed ne Skombrieviĉ». Sed mistrafis ja

Skombrieviĉ. Kaj kiel mistrafis! Eta somera ondo alportis sur la bordon jam ne mirindan inan korpon kun kapo de razanta sin anglo, sed iun senforman felsakon, plenan per mustardo kaj kreno.

Dum la granda kombinanto piratis sur la maro, Henriko Mario Zauze, kiu sukcesis malgraŭ ĉio pe-gvati na Brulegov, kaj havinta kun li sufiĉe seriozan konversacion, eliris el «Herkules» tute konsternita. Strange smajlante li direktiĝis en poŝtoŝtationojn kaj tie, starante ĉe alta skriba pupitro, kovrita per vitra plato, pe-skribis leteron al la fianĉino en urbon Aaĥen:

«Kara mia knabino. Mi rapidas komuniki al vi ĝojan informon. Finfine mia estro Brulegov sendas min en produktojn. Sed jen kio mirigas min, kara Tili: en konzerno 'Herkules' tio nomiĝas 'enigi en botelon' (*zagnatj v butylku!*). Mia nova amiko Bomze informis min ke sendo en produktojn estas speco de puno. Ĉu vi povas imagi al vi tion? Kaj ĉu nia bona doktoro pri matematiko Bernhard Herngros sukcesos iam ajn kompreni tion?»

Ĉapitro 19

Universala stampilo

Ĝis dekdua horo de sekvanta tago tra «Herkules» ekrapidis onidiro ke la estro fermiĝis en sia palma halo kun iu vizitanto, kaj jam tri horoj reagis nek pord-frapetojn de Serna

Miĥajlovna, nek vokoĵn de la interna telefono.

Herkulesanoj penis diveni la okazaĵon. Ili kutimiĝis al tio ke na Brulegov oni tuttage promenigas tenante je la brako, sidigas lin sur fenestrobretojn, aŭ entiras sub la ŝtuparon, kie fakte solviĝas ĉiuj aferoj. Aperis eĉ supozo ke la estro forlasis kategorion de laborantoj kiuj «ĵus eliris», kaj enviciĝis influan kategorion de «fermiĝuloj», kiuj kutime penetras siajn kabinetojn frumatene, ŝlosiĝas tie, malfunkciigas la telefonon kaj, bariĝinte ĉi-maniere de tuta mondo, verkas plej diversajn raportoĵn.

Tamen laboro daŭriĝis, paperoj postulis subskribojn, respondojn kaj rezoluciojn. Serna Miĥajlovna malkontente venadis al pordo de Brulegov kaj aŭskultadis. Dum tio en ŝiaj grandaj oreloj balanciĝis facilaj perlaĵ globetoj.

– Fako ne havanta precedencon, – profund-pense diris la sekretariino.

– Sed kiu ja, kiu sidas ĉe li? – demandis Bomze, kiu mikse odoris per parfumo kaj kotletoj. – Ĉu iu el inspekcio?

– Sed ne, mi jam diris al vi, ordinara vizitanto.

– Kaj Brulegov sidas kun li jam tri horoj?

– Fako ne havanta precedencon, – ripetis Serna Miĥajlovna.

– Sed kie estas eliro el tiu ĉi senelirejo? – eknervozigis Bomze. – Mi urĝe bezonas rezolucion de Brulegov. Ĉe mi estas detala

raporto pri sentaŭgeco de ejo de eksa "Lado kaj lardo" al labor-kondiĉoj de «Herkules». Mi ne povas sen rezolucio.

Na Serna Miĥajlovna de ĉiuj flankoj sieĝigis kunlaborantoj. Ili ĉiuj tenis en la manoj grandajn kaj malgrandajn paperojn. Atendinte ankoraŭ unu horon, dum kiu postporda obtuza bruo ne ĉesiĝis, Serna Miĥajlovna eksidis ĉe sia tablo kaj humile diris:

– Bone, kamaradoj, alvenu kun viaj paperoj.

Ŝi elprenis el la ŝranko longan lignan tenaĵeton, sur kiu balanciĝis tridek ses stampiloj kun diketaj lakitaj teniloj kaj, lerte elprenante necesajn el ili, komencis stampi la paperojn ne tolerantajn prokraston.

Универсальный штемпель («Universala stampilo»)

Estro de «Herkules» jam delonge ne subskribis paperojn propramane. En okazo de neceso li elprenis el la veŝta poŝo stampilon kaj, ame spirinte sur ĝin, premsignis la bluetan nom-faksimilon. Tiu ĉi labora procedo tre plaĉis al li, kaj eĉ puŝetis lin al penso ke estus bone transigi sur kaŭĉukon ankaŭ kelkajn plej ofte uzatajn rezoluciojn.

Tiel aperis unuaj kaŭĉukaj aforismoj:

«Ne kontraŭas. Brulegov».

«Konsentas. Brulegov».

«Bonega ideo. Brulegov».

«Efektivigu.Brulegov».

Provinte la novan ilon praktike, estro de «Herkules» venis al konkludo ke ĝi signife simpligas lian laboron, kaj bezonas daŭran stimulon kaj disvolvon. Post nelonge ekestis uzata nova grupo da kaŭĉukaĵoj. Ĉi-foje rezolucioj estis pli multvortaj:

«Deklari malaprobom per ordono. Brulegov».

«Atentigi riproĉe. Brulegov».

«Forsendi en periferion. Brulegov».

«Maldungi sen subvencio. Brulegov».

Lukto, kiun estro de «Herkules» gvidis kontraŭ la komunuma fako pri la ejo, inspiris lin al novaj normaj tekstoj:

«Al la komunuma fako mi ne estas subigata. Brulegov».

«Kio, ĉu ili freneziĝis tie? Brulegov».

«Ne malhelpu labori. Brulegov».

«Mi ne estas via nokta gardisto. Brulegov».

«La hotelo apartenas al ni kaj punkto. Brulegov».

«Konas mi viajn artifikaĵojn. Brulegov».

«Mi fordonos nek litojn nek lavtablojn. Brulegov».

Tiu ĉi serio estis mendita trikomplete. Antaŭvideblis longa lukto, kaj la sagaca estro ne senkaŭze timis ke unu kompleto ne sufiĉos.

Poste estis mendita kompleto da rezolucioj por internaj herkulesaj bezonoj.

«Demandu na Serna Miĥajlovna. Brulegov».

«Ne ĉagrenaĉu min. Brulegov».

«Ju malpli rapide, des pli certe. Brulegov».

Certe krea penso de la estro ne limiĝis nur per administra flanko de la afero. Estante homo de vasta imagopovo li ne povis preterpasi temojn de aktuala momento. Do li mendis bonegan universalan stampilon, kies tekston li verkis dum kelkaj tagoj. Tio estis brila kaŭĉuka penso, kiun Brulegov povis apliki al iu ajn kazo de la vivo. Krom tio ke ĝi donis eblecon reagi tuj al okazaĵoj, ĝi ankaŭ liberigis lin de ĉiufoja turmenta pensado. La stampilo estis konstruita tiel oportune, ke sufiĉis nur plenigi lasitan en ĝi spacon por produkti aktualan rezolucion:

Reage al:

«.....»

ni, herculesanoj, unuanime respondos:

- a) per altigo de kvalito de la ofica korespondado**
- b) per pligrandigo da laborproduktado**
- c) per plifortigo de lukto kontraŭ burokratismo, prokrastado, nepotismo kaj flataĉismo**
- d) per neniigo de senkaŭzaj forestoj kaj nomtagoj**
- e) per malpliigo de suplementaj elspezoj dum aĉeto de kalendaroj kaj portretoj**
- f) per komuna kresko de sindikata aktivado**
- g) per rezigno festi kristnaskon, paskon, pentokoston, anonciacion, bapton, kurban-bajramon, jom-kipuron, ramadanon, purimon kaj aliajn religiajn festojn**
- h) per senindulga lukto kun napkapuleco, huliganismo, drinkado, foresto de persona respondeco,**

senspineco kaj Pereverzev-ismo

i) per senescepta enviciĝo en societon «For rutinon de operaj scenejoj!»,

j) per senescepta transiro al sojo

k) per senescepta transigo de ofic-aktivado je latinan abocon, kaj ankaŭ per ĉio kio okazos necesa.

La punktolinion Brulegov plenigis persone, laŭ postuloj de aktuala momento.

Poiome Brulegov komencis pli kaj pli ofte uzi sian universalan rezolucion. Venis ĝis tio ke li respondis per ĝi al malamikaj agoj, intrigoj, eliratakoj kaj ekscesoj de propraj subuloj.

Ekzemple: «Reage al aroganta eksceso de librotenisto Kukuŝkind, postulinta pripagon de supernormaj horoj, ni respondos...». Aŭ: «Reage al aĉaj intrigoj kaj kovardaj atakoj de kunlaboranto Borisoĥlebskij, petinta ekstervican forpermeson, ni respondos...» ktp.

Kaj al ĉio tio estis bezonate senprokraste respondi per altigo, pligrandigo, plifortigo, neniigo, malpliigo, komuna kresko, rezigno de, senindulga lukto, senescepta enviciĝo, senescepta transiro, unuanima ŝanĝo, kaj ankaŭ per tio kio okazos necesa.

Kaj nur post ĉi-maniera riproĉo al Kukuŝkind kaj Borisoĥlebskij, la estro uzadis mallongan kaŭĉukaĵon:

«Atentigi skribe. Brulegov».

Aŭ:

«Forsendi en periferion. Brulegov».

Ĉe unua konatiĝo kun la kaŭĉuka rezolucio iuj herkulesanoj malgajiĝis. Ilin timigis abundo da punktoj. Precipe konfuzis ilin punkto pri latina aboco kaj pri senescepta enviciĝo en societon «For rutinon de operaj scenejoj!». Sed ĉio, tamen, pasis tute pace. Kvankam Skombrieviĉ ekagis svinge, kaj organizis, krom la nomita societo ankaŭ rondeton «For operon «Ĥovansĉina»», ĉio limiĝis nur per tio.

Do, dum el post de Brulegov-pordo aŭdiĝis ventumila zumado de voĉoj, Serna Miĥajlovna vigle laboris. Tenaĵeto kun la stampiloj, aranĝitaj laŭstature de plej eta: «Ne kontraŭas. Brulegov.» ĝis plej granda, universala, memorigis malsimplan cirkan instrumenton, per kiu blanka klaŭno kun suno subdorse, plenumas per bastonetoj serenadon de Braga. La sekretariino elektis stampilon, proksimume taŭgan enhance, kaj stampis per ĝi la paperojn. Plej ofte ŝi uzis singardan kaŭĉukaĵon «Ju malpli rapide, des pli certe», memorante ke tio estas plej ŝatata rezolucio de la estro.

La laboro prosperis senpaŭze. Kaŭĉuko perfekte anstataŭigis la homon. Kaŭĉuka Brulegov tute ne cedis al Brulegov viva.

Jam malpleniĝis «Herkules», kaj nudpiedaj purigistinoj iradis sur la koridoroj kun malpuraj siteloj, jam foriris lasta tajpistino, restinta unuhore por retajpi por si persone liniojn de Jesenin: «Bast-maton origitan vestaĉante, al vi

mi teneraĵon volus diri», jam Serna Miĥajlovna, kiu tedis atendi, leviĝis kaj, antaŭ eliri sur la straton, komencis masaĝi la palpebrojn per la malvarmaj fingroj, kiam pordo de Brulegov-kabineto ekstremis, kaj de tie maldiligente eliris Ostap Bender. Li dormeme rigardis na Serna Miĥajlovna, kaj ekiris for, svingante la flavan paperujon kun botetaj laĉoj. Post li, el sub viviga ombro de palmoj kaj sikomoroj, elplonĝis Brulegov. Serna alrigardis sian altan amikon, kaj silente mallevĝis sur la kvadratan matraceton, mildigantan malmolecon de ŝia seĝo. Kiel bone ke laborantoj jam disiris, kaj ne povis vidi ĉi-momente sian estron! Sur liaj lipharoj, kiel birdeto en branĉoj, sidis diamanta larmo. Brulegov mirinde rapide palpebrumis, kaj tiel energie frotadis la manojn, kvazaŭ volis frote akiri fajron laŭ maniero akceptita ĉe indiĝenoj de Oceanio. Li kuris post Ostap, malhonore ridetante kaj kurbigante la dorson.

– Sed kio okazos? – balbutis li, alkurante ĉu de tiu ĉu de alia flanko. – Ja mi ne pereos, ĉu? Diru ja, ora mia, arĝenta, mi ne pereos, ĉu? Ĉu mi povas esti trankvila?

Li volis aldoni ke ĉe li estas edzino, infanoj, Serna, infanoj de Serna, kaj de ankoraŭ unu virino kiu loĝas en Rostov-Dono, sed en gorgo lia io senintence elkvivitis, kaj li pretersilentis.

Plore hurletante li akompanis na Ostap ĝis la vestiblo mem. En malpleniĝinta konstruaĵo ili

renkontis nur du homojn. Fine de la koridoro staris Jegor Skombrieviĉ. Ekvidinte la grandan kombinanton li kaptis sin je la makzelo, kaj retropaŝis en niĉon. Sobe, sur ŝtuparo, el post la marmora junulino kun elektra torĉo, elrigardis librotenisto Berlaga. Li humilege kliniĝis antaŭ Ostap, kaj eĉ diris «Saluton al vi», sed Ostap ne respondis al saluto de la vicreĝo.

Ĉe eliro mem Brulegov kaptis na Ostap je la maniko kaj elbalbutis:

– Mi kaŝis nenion. Honora vorto! Do mi povas esti trankvila, ĉu?

– Plenan trankvilon donas nur asekura poliso, – respondis Ostap, ne malrapidante la iron. – Tion diros al vi ĉiu agento pri vivasekuro. Al mi persone vi jam ne estas bezonata. Sed la ŝtato ĝi, verŝajne, post nelonge ekinteresiĝos pri vi.

Ĉapitro 20

La komandanto dancas tango

En eta bufedejo de artefaritaj mineralaj akvoj, sur kies elpendaĵo estis pentritaj bluaj sifonoj, ĉe blanka tableto sidis Balaganov kaj Panikovskij. La rajtigito pri hufoj maĉis tubeton, observante ke la kremo ne elpremiĝu de alia ĝia ekstremo. Tiun ĉi nutraĵon de dioj li posttrinkis per gasakvo kun verda siropo «Freŝa fojno». La kuriero trinkis sanigan kefiron. Antaŭ li staris jam ses malplenaj boteletoj. El la sepa

Panikovskij zorge elŝutis en la glason la densan likvaĵon. Hodiaŭ en la kontoro nova kontoristino pagis salajron laŭ listo, subskribita per Bender, kaj la amikoj ĝuis la malvarmeton, elirantan de italaj ŝtonaj platoj de la bufedejo, de brulrezista ŝranko-glaciujo kie konserviĝis malseka ŝafa fromaĝo, de malheliĝintaj cilindraj balonoj kun ŝaŭma akvo, kaj de marmora vendotablo. Peco da glacio elglitis el la ŝranko, kaj kuŝis sur la planko, eligante la akvon. Estis agrable rigardi ĝin post laciga vidaĵo de la strato kun mallongaj ombroj, kun batitaj per la varmego pasantoj, kaj kun pestiĝintaj pro soifo hundoj.

– Bona urbo estas Nigramarsk! – diris Panikovskij, lekante la lipojn. – Kefiro tre utilas al koro.

Tiu ĉi informo ial ridigis na Balaganov. Li nesingarde premis la tubeton, kaj el ĝi elpremiĝis dika kolbaseto da kremo, kiun la rajtigito sukcesis subkapti nur lastmomente.

– Ĉu vi scias, Ŝura, – daŭrigis Panikovskij, – mi iel ĉesis konfidi na Bender. Li faras ion ne tion.

– Nu, nu! – minace diris Balaganov. – Oni vin ne demandis.

– Jes, serioze. Mi tre estimas na Ostap Ibrahimoviĉ: li estas tia homo!.. Eĉ Funt, vi ja scias kiel mi estimas na Funt, eĉ li diris pri Bender ke tio estas kapo. Sed mi diros al vi, Ŝura: Funt estas azeno. Je dio, tio estas tia

stultulo. Simple mizera sensignifa persono! Sed kontraŭ Bender mi havas nenion. Malgraŭ tio ke li ne plaĉas al mi. Al vi, Ŝura, mi diros ĉion, kiel al parenco.

Al Balaganov, de tempo de lia lasta konversacio kun subinspektoro de krim-serĉado, neniu rilatis kiel al parenco. Tial li kun kontento aŭskultis vortojn de la kuriero, kaj facilanime permesis al li daŭrigi.

– Vi scias, Ŝura, flustris Panikovskij, – ke mi tre estimas na Bender, sed mi devas diri al vi: Bender estas azeno! Je Dio, mizera, sensignifa persono!

– No, no! – averte diris Balaganov.

– Kial no-no? Vi nur pripensu, por kio li elspezas nian monon? Pripensu ja! Por kio ni bezonas tiun ĉi stultan kontoron? Tiom da elspezoj! Nur al Funt ni pagas cent dudek. Kaj la kontoristino. Kaj nun ankoraŭ iujn oni alsendis, mi vidis: ili hodiaŭ ricevis salajron laŭ la listo. Altruduloj! Por kio tio ĉi? Li diras: por legitimigo. Kraĉis mi al la legitimigo, se ĝi kostas tiom da mono. Kaj cervaj kornoj je sesdek kvin rubloj! Kaj la inkujo! Kaj tiuj ĉi truigiloj-kunigiloj!

Panikovskij malbutonigis la jakon, kaj duonrubla fals-ĉemizo, albutonigita ĉe kolo de la konvenci-rompanto, ekimpetis supren, volviĝinte kiel pergament-rulaĵo. Sed Panikovskij tiel pasiiĝis ke ne atentis tion.

- Jes, Ŝura. Mi kaj vi ricevas mizeran salajron, sed li banas en lukso. Por kio, demandas mi, li veturis en Kaŭkazon? Li diras: oficvojaĝo. Mi ne kredas! Panikovskij ne estas devigata kredi al ĉio! Tio estas mi kiu kuris en la havenon por aĉeti por li bileton. Rimarku, bileton por unua klaso. Tiu ĉi ĉefurba dando ne povas veturi en la dua! Jen kien foriras niaj dek miloj! Li konversacias per interurba telefono, dissendas tutmonden urĝajn telegramojn. Ĉu vi scias kiom kostas urĝa telegramo? Kvardek kopekoj po vorto. Sed mi devas limigi min pri kefiro kiu tiel bezonatas al mia sano. Mi estas maljuna malsana homo. Kaj mi diros al vi rekte: Bender - tio ne estas kapo.

- Vi tamen ne tro, - rimarkis Balaganov, hezitante. - Bender faris el vi homon. Elmemoru kiel vi kuris kun ansero en Arbatov. Kaj nun vi servas, ricevas salajron, vi estas ano de komunumo.

- Mi ne volas esti ano de komunumo! - deklaris subite Panikovskij, kaj mallaŭte aldonis: - Via Bender estas idioto. Li entreprenis tiun ĉi stultan serĉadon, dum la monon oni povas eĉ hodiaŭ preni per nudaj manoj.

Ĉi tie la rajtigito pri hufoj, forgesinte jam la ŝatatan estron, alŝoviĝis al Panikovskij. Kaj tiu, senĉese volvante soben la malobeeman falsĉemizon, rakontis al Balaganov pri ege serioza

eksperimento kiun li faris je sia respondeco.

En tago kiam la granda kombinanto kaj Balaganov persekutis na Skombrieviĉ, Panikovskij memvole lasis la kontoron al majuna Funt, kaŝe penetris ĉambron de Korejko kaj, uzante foreston de la mastro, efektivigis tie detalan esploron. Certe li trovis en la ĉambro nenium monon, sed li trovis ion pli bonan: pezilojn, tre grandajn nigrajn pezilojn, je **pudo**²¹ kaj duono ĉiu.

– Al vi, Ŝura, mi diros kiel al parenco. Mi malkovris sekreton de tiuj ĉi peziloj.

Panikovskij kaptis finfine vivan vosteton de sia fals-ĉemizo, fiksis ĝin per butono al la pantalono, kaj solene ekrigardis na Balaganov.

– Kiu sekreto povas esti ĉi tie? – disiluziiĝinte diris la rajtigito pri hufoj. – Ordinaraĵoj peziloj por gimnastiko.

– Vi scias, Ŝura, kiel mi estimas vin, – pasiiĝis Panikovskij, – sed vi estas azeno. Tio estas oraj peziloj! Ĉu vi komprenas? Peziloj el pura oro! Ĉiu pezilo je pudoj kaj duono. Tri pudoj da pura oro. Tion mi tuj komprenis, min kvazaŭ batis io. Mi staris antaŭ tiuj peziloj, kaj sovaĝe ridegis. Kia kanajlo estas tiu Korejko! Li muldis al si orajn pezilojn, farbis ilin nigre, kaj pensas ke neniu ekscios. Al vi, Ŝura, mi diros kiel al parenco, – ĉu mi rakontus al vi tiun ĉi sekreton se mi scipovus forporti la pezilojn? Sed mi estas

21. pudo: 16.38 kg (PIV)

maljuna malsana homo, kaj la peziloj estas pezaj. Do mi invitas vin kiel parencon. Mi ne estas Bender. Mi estas honesta!

– Kaj kio se ili ne estas oraj? – demandis ŝatata filo de leŭtenanto Ŝmidt, kiu tre volis ke Panikovskij kiel eble rapide dispelu liajn dubojn.

– Sed kiaj, laŭ vi, ili estas? – ironie demandis rompanto de la konvencio.

– Jes, – diris Balaganov, palpebrumante per la rufaj okulharoj, – nun estas klare al mi. Rigardu ja, maljunulo, sed ĉion malkovris! Kaj Bender vere faras ion ne tion: skribas paperaĉojn, veturas... Malgraŭ ĉio ni donu al li parton, laŭ justeco, ĉu?

– Kial? – refutis Panikovskij. – Ĉio por ni! Nun ni ekvivos bonege, Ŝura. Mi ordigos al mi orajn dentojn kaj edziĝos, je Dio, edziĝos, jen mia honora nobla vorto!

Estis decidite elpreni la valorajn pezilojn senprokraste.

– Pagu por la kefiro, Ŝura, – diris Panikovskij, – ni kvitiĝos poste.

La konspirantoj eliris el la bufedejo kaj, blindigitaj per la suno, komencis vagadi en la urbo. Ilin turmentis senpacienca. Longe staris ili sur urbaj pontoj kaj, premante la ventrojn al la parapeto, apatie rigardis soben, sur tegmentojn de domoj, sur ŝtratojn sobiĝantajn al la haveno, sur kiuj, kun singardo de ĉevalo, malsupreniĝis kamionoj. Grasaj havenaj paseroj ĉizis per la

bekoj la pavimon, dum el ĉiuj subpordegoj ilin observadis malpuraj katoj. Post rustaj tegmentoj, subtegmentaj fenestretoj kaj antenoj, videblis blueta akvo, kutreto, kuranta per ĉiuj fortoj, kaj flava ŝipa tubo kun granda ruĝa litero.

Tempo de tempo Panikovskij levis la kapon, kaj komencis kalkuli. Li tradukis pudojn en kilogramojn, kilogramojn – je eksajn *zolotnik*, kaj ĉiufoje rezultiĝis tia alloga nombro, ke la rompanto de la konvencio eĉ jelpetis nelaŭte.

Je la dek-unua vespere la laktaj fratoj, kliniĝinte sub premo de la du grandaj peziloj, direktiĝis al kontoro de provizo per kornoj kaj hufoj. Panikovskij portis sian parton per ambaŭ manoj, eligante la ventron, kaj ĝoje anhelante. Li ofte haltis, metis la pezilon sur la trotuaron, kaj murmuris: «Edziĝos mi! Je mia honora nobla vorto, edziĝos!».

Fortegulo Balaganov tenis la pezilon sur la ŝultro. Iam Panikovskij neniel povis turniĝi post angulon, ĉar la pezilo, pro inercio, daŭrigis tiri lin antaŭen. Tiam Balaganov, per la libera mano, subtenis na Panikovskij je la kolumo, kaj aldonis al lia korpo necesan direkton.

[Пилите, Шура!](#) («*Segu, Ŝura!*»)

Ĉe pordo de la kontoro ili haltis.

– Nun ni desegu po peceto, – zorgeme diris Panikovskij, – kaj morgaŭ matene vendu. Ĉe mi

estas unu konatulo-horloĝisto, sinjoro Biberĥam. Li donos veran prezon. Ne kiel en ŝtata vendejo, kie veran prezon oni donos neniam.

Sed tiam la konspirantoj rimarkis ke el sub verdaj kontoraj kurtenoj videblas lumo.

– Kiu povas esti tie en tiu ĉi horo? – miris Balaganov, kliniĝante al la ŝlosila truo.

Ĉe la skribotablo, lumigita per flankaj lumoj de forta elektra lampo, sidis Ostap Bender. Li skribis ion.

– Verkisto! – diris Balaganov ridegante, (Ilf kaj Petrov, aldonis li en la filmo) kaj cedante la ŝlosiltruon al Panikovskij.

– Certe, – rimarkis Panikovskij, ĝissate rigardinte, – denove li skribas. Je dio, tiu ĉi mizera homo ridigas min. Sed kie ni segos?

Kaj, arde konversaciante pri bezono morgaŭ matene vendi komencajn du pecetojn da oro al la horloĝisto, la laktaj fratoj levis sian ŝarĝon kaj ekiris en la mallumon.

Dume la granda kombinanto pe-adis vivpriskribon de Aleksandr Ivanoviĉ Korejko. De ĉiuj kvin kabanetoj, kiuj konsistigis skribilaron «Vizaĝe al vilaĝo», estis demetitaj la bronzaj kovriletoj. Ostap trempis la plumon senelekte, kien trafos la mano, ŝoviĝis sur la seĝo, kaj skrape bruis sub la tablo per la ŝuoj.

Ĉe li estis lacega vizaĝo de kartludanto, kiu tutan nokton malgajnis, kaj nur mateniĝe

kaptis, fine, na *talija*. Dum la tuta nokto ne venis bonaj kartoĵoj. La ludanto ŝanĝis tablojn, penis trompi la sorton, kaj trovi feliĉan lokon. Sed la karto obstine ne venis. Li jam komencis «elpremi», tio estas rigardinte unuan karton, per plej malrapida maniero eltiri ĝin el post dorso de alia, jam provis li meti karton sur randon de la tablo, kaj rigardi ĝin desube, jam metis li du kartoĵojn per la reverso eksteren kaj malfermis ilin kiel libron, – do faris ĉion kion faras homoj al kiuj ne prosperas en «naŭ». Sed tio ne helpis. En la manojn venis plej ofte bildetoj: fantoj kun ŝnuretaj lipharoj, damoj, flarantaj paperajn florojn, kaj reĝoj kun barboj de stratpurigistoj. Tre ofte venis nigraj kaj rozkoloraj dekaĵoj. Resume venadis tiu aĉaĵo kiun oficiale oni nomas «*bakara*», kaj neoficiale: «*bak*» aŭ «*graso*». Kaj nur en tiun horon kiam la lustroj flaviĝas kaj malŝaltiĝas, kiam sub afiŝo «*Dormi malpermesatas*» ronkas kaj glutsufokiĝas sur la seĝoj malprosperuloj en nefreŝaj kolumoj, estiĝas miraklo. Aĉaj figuroj kaj dekaĵoj malaperas, enamasiĝas okaĵoj kaj naŭaĵoj. La ludanto ne tumultas jam en la halo, ne elpremas karton, ne enrigardas ĝin de sube. Li sentas en la manoj feliĉan *talija*. Kaj malsukcesuloj amasiĝas jam post la feliĉulo, tiradas lin je la ŝultro kaj flate flustras: «Onklo Jura, donu tri rublojn». Kaj li, palvizaĝa kaj fiera, arogante renversas la kartoĵojn, kaj ĉe

krioj: «Liberiĝas lokoj ĉe naŭa tablo!» sentripigas siajn partnerojn. Kaj la verda tablo, desegnita per blankaj linioj kaj arkoj, iĝas por li ĝoja kaj gaja kiel futbala ludejo.

Ostap jam ne havis dubojn. La ludo venis al turna punkto.

Ĉio neklara ekestis klara. Multego da homoj kun ŝnuretaj lipharoj kaj kun reĝaj barboj, kun kiuj Ostap havis okazon kunpuŝiĝi, kaj kiuj lasis spuron en lia flava paperujo kun botetaj laĉoj, subite ekŝutiĝis flanken, kaj sur la unuan planon, ruinigante ĉiujn kaj ĉion, elviciĝis blankokula ŝinka muzelo kun tritikaj brovoj kaj profundaj ĉefsoldataj faldoj sur la vangoj.

Ostap metis punkton, sorbigis la vivpriskribon per sorbigilo kun arĝenta ursido anstataŭ tenilo, kaj komencis alkudri la dokumentojn. Li ŝatis teni la paperojn en ordo. Lastfoje admiris li la bone platigitajn depoziciojn, telegramojn, kaj diversajn atestojn. En la paperujo estis eĉ fotografaĵoj kaj librotenistaj elskribaĵoj. Tuta vivo de Aleksandr Ivanoviĉ troviĝis en la paperujo, kaj kune kun ĝi estis tie palmoj, junulinoj, helblua maro, blanka pasaĝera ŝipo, bluaj ekspresaj trajnoj, spegula aŭto, kaj Rio-de-Ĵanejro, sorĉa urbo en profundo de golfo, kie loĝas bonkoraj mulatoj, kaj kie plimulto da civitanoj portas blankajn pantalonojn. Finfine la granda kombinanto trovis la individuon pri kiu li revis tutan sian vivon.

- Bedaŭrindas ke neniu scipovas eĉ aprezi mian titanan laboron, -malgaje diris Ostap leviĝante kaj kunligante kovrilojn de la dika paperujo. - Balaganov estas tre simpatia sed stulta. Panikovskij estas nur kverelema maljunulo. Kaj Kozleviĉ - anĝelo sen flugiloj. Li ĝis nun ne dubas pri tio ke ni provizadas kornojn por bezonoj de cigared-inga industrio. Kie vi estas, miaj edzinoj, miaj infanoj? Restis nura espero pri tio ke estimata Aleksandr Ivanoviĉ aprezos mian gigantan verkon kaj donos al mia malriĉeco ĉirkaŭ kvincenton da miloj. Tamen ne! Nun mi prenos ne malpli ol milionon, ĉar alie la bonkoraj mulatoj simple ĉesos esti mi.

Ostap eliris de ĉe la tablo, prenis sian mirindan paperujon, kaj komencis enpeniĝe promenadi en la malplena kontoro, preterirante la tajpilon kun nazkatara akĉento, fervojan datstampilon, preskaŭ tuŝante per la kapo la cervajn kornojn. Blanka cikatro sur gorĝo de Ostap koloriĝis roze. Movo de la granda kombinanto iom post iom ekis malrapidiĝi, kaj liaj piedoj en ruĝaj ŝuoj, aĉetitaj hazarde de greka matroso, komencis senbrue gliti sur la planko. Nerimarke li komencis moviĝi flanken. Per la dekstra mano tenere, kiel junulinon, li premis al sia brusto la paperujon, kaj la maldekstran etendis antaŭen. Super la urbo klare ekaŭdiĝis kolofana knaro de Fortuna rado.

Tio estis delikata muzika sono, kiu transformiĝis subite en facilan violonan unisonon. Kaj delonge forgesita, la koron kaptanta melodio igis soni ĉiujn aĵojn, troviĝantajn en Nigramarska filio de Arbatov-kontoro por provizo per kornoj kaj hufoj.

Unua komencis la samovaro. El ĝi, sur la pleton, subite elfalis peceto da karbo, kaptita per flamo. Kaj la samovaro ekkantis:

**En bluĉiela Argentino,
kie belegas junulinoj...**

La granda kombinanto dancis tangon. Lia medala vizaĝo estis turnita profile. Li apogis sin sur unu genuon, rapide ekstaris, turniĝis kaj, facile paŝante, denove glitis antaŭen. Nevideblaj baskoj de lia frako disflugis ĉe neatenditaj turnoj.

Kaj la melodion rekaptis jam tajpilo kun nazkatara akĉento:

**... Gie belegas junulinoj,
gie parfumas sudaj vinoj**

Kaj la malgracia krudfera datstampilo obtuze ĝemis pri la nerevena tempo:...

**kie parfumas sudaj vinoj,
dancadas ĉiuj tangon.**

Ostap dancis klasikan provincan tangon, kiun oni plenumis en teatroj de miniaturoj antaŭ dudek, ĉirkaŭ, jaroj, kiam librotenisto Berlaga portis sian unuan melon-ĉapelon, Skombrieviĉ servis en kancelario de urbestro, Brulegov

ekzameniĝis je unua civila rango, kaj sidprezidanto Funt estis ankoraŭ vigla sepdekjara homo, kaj kune kun aliaj tolaj veŝtoj sidis en kafejo «Florido», pridiskutante teruran fakton de Dardanel-markola fermo pro Ital-turka milito. Kaj tolaj veŝtoj, tiutempe ankoraŭ ruĝvangaj kaj glataj, priparolis politikajn agantojn de tiu epoko. «Enver Paŝa, tio estas kapo. Juan Ŝikaj estas kapo. Puriŝkeviĉ, malgraŭ ĉio, ankaŭ estas kapo» – diris ili. Kaj jam tiam ili asertis ke Brian estas kapo, ĉar ankaŭ tiam li estis ministro.

Ostap dancis. Super lia kapo krakis palmoj, kaj preterhastis koloraj birdetoj. Oceanaj ŝipoj frotiĝis per siaj randoj je kajoj de Rio-de-Ĵanejro. Sagacaj brazilaj komercistoj malkaŝe okupiĝis pri kafa dumpingo, kaj en liberaeraj restoracioj lokaj junaj homoj distriĝis per alkoholaĵoj.

– La paradon komandos mi! – kriis la granda kombinanto.

Malŝaltinte elektron li eliris el la ĉambro, kaj per plej rekta vojo direktiĝis al Eta Tanĝanta strato. Palaj cirkelaj piedoj de serĉaj lumĵetiloj disiĝis sur la ĉielo, sobiĝis, detranĉis subite pecon de domo, malfermante balkonon aŭ vitran arnaut-stratan galerion kun iu am-pareto, rigidiĝinta pro la subiteco. El de post angulo, renkonte al Ostap, balanciĝante kaj frapante per la raŭpaj bendoj, elveturis du etaj tankoj kun

cirklaĵoj fungaj ĉapeletoj. Ĉevalrajdisto, kliniĝinte de la selo, pridemandis preterpasanton pri plej mallonga vojo al Malnova bazaro. En unu el la lokoj vojon de Ostap baris artilerio. Li trasaltis intervalon inter du baterioj. En alia loko policistoj haste alnajlis al pordego de domo plataĵon kun nigra surskribo: «Gasrifuĝejo».

Ostap rapidis. Lin alpelis argentina tango. Ne rimarkante ĉirkaŭaĵojn li eniris domon de Korejko, kaj frapis la konatan pordon.

– Kiu estas tie? – ekaŭdiĝis voĉo de kaŝa milionulo.

– Telegramo! – respondis la granda kombinanto, okulumante en la mallumon.

La pordo malfermiĝis, kaj li eniris, kroĉiĝinte per la paperujo je la porda fosto.

Mateniĝe, malproksime de la urbo, en ravino sidis la respondeculo kaj la kuriero. Ili segis la pezilojn. Iliaj nazoj estis malpurigitaj per la krudfera polvo. En la herbo, apud Panikovskij, kuŝis lia fals-ĉemizo. Li demetis ĝin: ĝi malhelpis labori. La antaŭvida rompanto de la konvencio sternis sub la pezilojn ĵurnalan folion, por perdiĝu eĉ ne unu polvo de la grandvalora metalo.

Tempo de tempo la laktaj fratoj interrigardis gravmiene, kaj komencis segi kun novaj fortoj. En matena silento aŭdiĝis nur fajfado de zizeloj kaj grincado de la varmiĝintaj segiloj.

– Kio estas tio! – diris subite Balaganov, ĉesante labori. – Jam tri horoj mi segas, kaj ĝis nun ĝi ne estas ora.

Panikovskij ne respondis. Li jam komprenis ĉion, kaj lastan duonhoron movis la segilon nur por ŝajnigi laboron.

– Nu bone, segu ni daŭre! – vigle diris rufa Ŝura.

– Certe, oni devas segi, – rimarkis Panikovskij, penante malproksimigi teruran horon de la puno.

Li fermis la vizaĝon per la manplato, kaj tra la disigitaj fingroj rigardis vastan, egalritme moviĝantan dorson de Balaganov.

– Nenion mi komprenas! – diris Ŝura peseginte kaj disigante la pezilon je du pomaj duonoj. – Tio ne estas oro!

– Segu, segu, – elbalbutis Panikovskij.

Sed Balaganov, tenante en la ambaŭ manoj po pezila duonglobo, komencis malrapide proksimiĝi al rompanto de la konvencio.

– Ne proksimiĝu al mi kun tiu ĉi feraĵo! – jelpis Panikovskiŭ, dekurante flanken. – Mi malestimas vin!

Sed tiam Ŝura svingis la manon kaj, ĝemante pro la penado, ĵetis en la intrigulon pecon de la pezilo. Ekaŭdinte super sia kapo fajfon de la obuso, la intrigulo ĵetiĝis sur la teron.

Batalo de la rajtigito kontraŭ la kuriero ne

estis longa. Koleriĝinta Balaganov kun delico tretis komence la fals-ĉemizon, kaj poste venis al ĝia havanto. Post ĉiu bato Ŝura alparoladis:

- Kiu elpensis tiujn pezilojn? Kiu malversaciis la fiskan monon? Kiu insultis na Bender?

Krom tio unua naskito de leŭtenanto Ŝmidt elmemoris pri rompo de Suĥarev-konvencio, kio kostis al Panikovskij kelkajn apartajn frapojn.

- Vi respondecos pri tiu ĉi fals-ĉemizo! - malice kriis Panikovskij, fermante sin per la kubutoj. - Vi sciu ke mi neniam pardonos al vi la falsan ĉemizon! Tiaj ĉemizoj jam ne estas aĉeteblaj!

Konklude Balaganov deprenis de la malamiko la eluzitan monujeton kun tridek ok rubloj.

- Tio estas pago pro via kefiro, vipuraĉo! - diris li dum tio.

En la urbon ili revenis sengaje.

Antaŭe iris kolerigita Ŝura, kaj post li, lamante je unu piedon kaj laŭte plorante, treniĝis Panikovskij.

- Mi estas malriĉa kaj malfeliĉa oldulo! - plorĝemis li. - Vi respondecos pri la fals-ĉemizo. Fordonu al mi mian monon.

- Vi ja ricevos de mi! - diris Ŝura ne retrorigardante. - Pri ĉio mi diros al Bender. Aventuristaĉo!

Ĉapitro 21

Fino de «Korvejo»

Varvara Ptiburdukova estis feliĉa. Sidante ĉe la ronda tablo ŝi ĉirkaŭrigardis sian mastrumejon. En ĉambro de Ptiburdukov-familio staris multe da mebloj, do libera spaco preskaŭ forestis. Sed la spaco kiu restis estis tute sufiĉa por feliĉo. La lampo sendis sian lumon en la transfenestron kie, kiel ina broĉo, tremis verda branĉeto. Sur la tablo kuŝis biskvitoj, bombonoj, kaj marinita sandro en ronda lada skatoleto. La elektra tekaldrono kolektis sur sia kurba surfaco tutan komforton de la Ptiburdukov-nesto. En ĝi respegulis kaj la lito, kaj la blankaj kurtenetoj, kaj la noktotablo. Respeguliĝis en ĝi ankaŭ Ptiburdukov mem, sidanta kontraŭ la edzino en blua piĵamo kun ŝnuretoj. Ankaŭ li estis feliĉa. Eligante tra la lipharoj cigaredan fumon li segis kruclignon por fari imitan eksterdoman necesejon. La laboro estis skrupula. Estis necese elsegi la murojn, surmeti la oblikvan tegmenton, fari internan instalaĵon, vitrigi la fenestreton, kaj fiksi sur la pordon mikroskopan hoketon. Ptiburdukov laboris pasie; li opiniis la elsegadon plej bona ripozo.

Pe-inte la laboron la inĝeniero ĝoje ekridis, frapetis la edzinon je ŝia dika varma dorso, kaj ŝovetis al si skatoleton kun la sandro. Sed tiuminute ekaŭdiĝis forta frapo je la pordo, ekflagretis la lampo, la tekaldrono ŝoviĝis de la

drata submetajo.

– Kiu ja povas esti tiel malfrue? – diris Ptiburdukov, malfermante la pordon.

Sur la ŝtupara placeto staris Vasisualij Loĥankin. Ĝis la barbo mem li estis envolvita en blankan marsejlan litkovrilon, el sub kiu videblis la harozaj piedoj. Al la brusto li premis libron «Viro kaj virino», dikan kaj orizitan kiel ikono. Okuloj de Vasisualij vagadis.

– Bonvenon, – konsternite diris la inĝeniero, farante paŝon retren. – Varvara, kio estas tio?

– Al vi mi venis por ĉe vi ekloĝi, – respondis Loĥankin per tomba jambo, – esperas mi ĉe vi rifuĝon trovi.

– Kial rifuĝon? – diris Ptiburdukov, ruĝiĝante. – Kion vi bezonas, Vasisualij Andreiĉ? Sur la placeton elkuris Varvara.

– Saŝa! Rigardu, li estas nuda! – kriis ŝi. – Kio okazis Vasisualij? Ja eniru, eniru.

Loĥankin transiris la sojlon per la nudaj piedoj kaj, balbutante: «Malfeliĉo, malfeliĉo» komencis tumulti en la ĉambro. Per sia litkovrilo li tuj deĵetis sur la plankon la delikatan lignan verkon de Ptiburdukov. La inĝeniero deiris en la angulon, sentante ke antaŭvideblas jam nenio bona.

– Kiu malfeliĉo? – esploris Varvara. – Kial vi en nura litkovrilo?

– Al vi mi venis por ĉe vi ekloĝi, – ripetis Loĥankin per bovina voĉo.

Lia flava tambura kalkano elfrapis sur la pura vaksa planko alarman krakadon.

– Kion vi elbalbutas? – atakis Varvara la eksan edzon. – Iru hejmen kaj dormaĉu. For de ĉi tie! Iru, iru hejmen!

– Forestas jam la domo, – diris Vasisualij, daŭre tremante. – Ĝi forbrulis. La incendio pelis min ĉi tien. Nur litkovrilon savi mi sukcesis, kaj libron tiun mian plej ŝatatan. Sed se al mi vi tiel malbonkoras, foriros mi, kaj damnos vin pro tio.

Vasisualij, malfeliĉe ŝanceliĝante, ekiris al la eliro. Sed Varvara kun la edzo haltis lin. Ili petis pardonon, diris ke ne tuj komprenis, kaj entute ekklopodis. Estis eligitaj nova kostumo de Ptiburdukov, tolaĵo kaj botetoj.

Dum Loĥankin vestiĝis, la geedzoj interkonsiliĝis en la koridoro.

– Kien ni ordigu lin? – flustris Varvara. – Li ne povas dormi ĉe ni, ĉe ni estas nur unu ĉambro.

– Mi miras pri vi, – diris la bonkora inĝeniero, – al la homo okazis malfeliĉo, sed vi pensas nur pri via bonstato.

Kiam la geedzoj revenis en la ĉambron, la incendi-viktimo sidis ĉe la tablo, kaj senpere el la fera skatoleteto manĝis la marinitan fiŝon. Krom tio de la libro-breteto estis deĵetitaj du volumoj de «Rezisto de materialoj», kaj ilian lokon ekokupis orizita «Viro kaj virino».

– Ĉu vere la tuta domo forbrulis? – komplate

demandis Ptiburdukov. – Jen la teruro!

– Sed mi opinias ke, eble, tiel decas, – diris Vasisualij, pe-manĝante vespermanĝon de la mastroj, – eble mi eliros el la flamo aliiĝinta, ĉu?

Sed li ne aliiĝis.

Kiam ĉio estis jam priparolita, geedzoj Ptiburdukov komencis enlitiĝi. Por Vasisualij oni sternis matraceton sur tiu resto de la spaco kiu nur antaŭ unu horo estis sufiĉa por la feliĉo. La fenestron oni fermis, la lumon malŝaltis, kaj en la ĉambron eniris nokto. Ĉirkaŭ dudek minutoj ĉiuj kuŝis silente, tempo de tempo turniĝante kaj ĝene suspirante. Poste de la planko ekaŭdiĝis tenaca flustro de Loĥankin:

– Varvara! Varvara! Aŭskultu, Varvara!

– Kion vi volas? – indigne demandis la eksa edzino.

– Kial vi foriris de mi, Varvara?

Ne ricevinte respondon al tiu ĉi principa demando Vasisualij eklamentis:

– Bestino estas vi kaj filupino! Jen kial vi forlasis min, Varvara...

La inĝeniero senmove kuŝis sur la lito, sufokiĝante pro la kolero kaj pugnante la manojn.

«Korvejo» ekbrulis je la dek-dua nokte, en saman tempon kiam Ostap Bender dancis tangon en la malplena kontoro, kaj kiam laktaj fratoj Balaganov kaj Panikovskij eliris el la urbo,

kurbiĝante sub pezo de la oraj peziloj.

Komenca ĉenero en longa ĉeno da aventuroj, kiuj antaŭis la incendion en loĝejo numero tri, estis nenies avino. Ŝi, kiel oni scias, bruligis sur sia duonetaĝo kerosenon, ĉar ŝi ne fidis je elektro. En la loĝejo, post vergado de Vasisualij Andreiĉ, jam delonge okazis nenio interesa, do maltrankvila cerbo de kortegano Mitriĉ suferis pro la deviga nenifarado. Pripensinte bone kutimojn de la avino li ekmaltrankviliĝis.

– Forbruligos ŝi, olda, la loĝejon! – balbutis li. – Ĉu ŝi zorgas? Sed ĉe mi nur horizontala piano kostas, eble, du milojn.

Veninte al tiu ĉi konkludo Mitriĉ asekuris kontraŭ fajro ĉiun sian moveblan havaĵon. Nun li povis esti trankvila, kaj indiferente rigardis kiel la avino pene portas supren al si grandan malklaran botelegon kun keroseno, tenante ĝin en la manoj kiel bebon. Unua pri tiu ĉi singarda ago de Mitriĉ eksciis civitano Higienoŝvili, kiu tuj interpretis ĝin si-maniere. Li alpaŝis na Mitriĉ en la koridoro kaj, kaptinte je la brusto, minace diris:

– Ĉu vi forbruligi la tutan loĝejon volas? Ĉu vi asekurpremion ricevi volas? Ĉu vi opinias ke Higienoŝvili estas stultulo? Higienoŝvili ĉion komprenas.

Kaj la pasia loĝanto samtage asekuriĝis mem je granda sumo. Informo pri tio terurigis

tutan «Korvejo». Lucina Francevna Pferd enkuris la kuirejon kun elstreĉitaj okuloj.

– Ili forbruligos nin, tiuj ĉi kanajloj. Vi, civitanoj, agu kiel vi volas, sed mi tuj iru asekuri min. Certe ni brulos, do, se tiel, mi almenaŭ asekurpremion ricevos. Mi ne deziras almozpetadi pro ili.

Sekvonttage asekuriĝis la tuta loĝejo, krom Loĥankin kaj nenies avino. Loĥankin legis na «Patrujo», kaj rimarkis nenion, kaj la avino ne kredis je asekuro same kiel ŝi ne kredis je elektro. Nikita Prjaĥin alportis hejmen la asekuran polison kun blua bordero, kaj longe pririgardis ĝiajn akvomarkojn.

– Tio signifas do ke la ŝtato zorgas pri ni? – diris li minace. – Helpas ĝi al loĝantoj, ĉu? Dankon! Do kion ni deziras, tion ni faros nun.

Kaj, kaŝinte la polison sub la ĉemizon, Prjaĥin malproksimiĝis en sian ĉambron. Liaj vortoj enigis tian timon, ke ĉi-nokte en «Korvejo» dormis neniu. Dunja ligis sian havaĵon en **tukojn**, kaj aliaj lit-anoj disiris dormi ĉe la konatuloj. Tage ĉiuj observis unu la alian, kaj poparte elportis la havaĵon el la domo.

Ĉio estis klara. La domo estis kondamnita. Ĝi ne povis ne forbruli.

Kaj vere, en la dek-dua nokte ĝi ekflamegis, bruligita samtempe de ses flankoj.

Lasta el la domo, kiu jam pleniĝadis per

samovara fumo kun vejnoj da flamo, elsaltis Loĥankin, kovrante sin per la blanka litkovrilo. El ĉiuj fortoj li kriis: «Incendio! Incendio!», kvankam per tiu ĉi novaĵo li povis mirigi neniun. Ĉiuj loĝantoj de "Korvejo" estis jam kuniĝintaj. Ebria Prjaĥin sidis sur sia kofro kun forĝigitaj anguloj. Li sence rigardis la flagrantajn fenestrojn alparolante: «Kion ni deziras, tion ni faros». Higienoŝvili naŭze flaris siajn manojn, kiuj odoris per keroseno, kaj ĉiufoje post tio purigis ilin je la pantalono. Flama risorto elŝiriĝis el la ventola subtegmenta fenestreto kaj, faligante fajrerojn, vastiĝis sub la ligna kornico. Krevis kaj elfalis tintante unua vitro. Nenies avino timige ekhurlis.

– Kvardek jaroj staris la domo, – senhaste klarigis Mitriĉ, promenante en la homamaso, – dum ĉiuj reĝimoj ĝi staris, bona domo estis tio. Sed dum sovetia reĝimo ĝi forbrulis. Tia estas ja malĝoja fakto, civitanoj.

Virina parto de "Korvejo" kuniĝis en unu grupon, kaj ne forigis la okulojn de la fajro. Kanona flamo elŝiriĝis jam el ĉiuj fenestroj. Iam la flamo malaperis, kaj tiam mallumiĝinta domo, ŝajne, retrosaltis, kiel kanona korpo post la elpafo. Kaj denove ruĝ-flava ombro elimpetis eksteren, parade lumigante Citronan interstraton. Ekestis varmege. Apud la domo jam ne eblis stari, kaj la komunumo denomadis sur kontraŭan trotuaron.

Nur Nikita Prjaĥin dormetis sur la kofreto meze de la pavimo. Subite li saltleviĝis, nudpieda kaj timiga.

– Ortodoksuloj! – kriis li, ŝirante sur si la ĉemizon. – Civitanoj!

Li flanke ekkuris for de la flamo, entranciĝis la homamason kaj, elkriante nekomprenajn vortojn, komencis montri la brulantan domon. En la homamaso aperis tumulto.

– Oni infanon forgesis, – konvinke diris virino en pajla ĉapelo.

Oni ĉirkaŭiĝis na Nikita. Li forpuŝiĝis per la manoj kaj ŝiriĝis al la domo.

– Sur la lito kuŝas! – furioze kriis Prjaĥin. – Lasu, mi diras!

Sur lia vizaĝo ruliĝis fajraj larmoj. Li batis kapon de Higienoŝvili, kiu baris al li vojon, kaj ĵetiĝis en la korton. Post minuto li elkuris de tie, portante ŝtuparon.

– Haltu lin! – kriis la virino en pajla ĉapelo. – Li forbrulos!

– Foriru, mi diras! – kriegis Nikita Prjaĥin, almetante la ŝtuparon al la muro, kaj depuŝante junajn homojn el la homamaso, kiuj kaptis lin je la piedoj. – Ne donu mi ke malaperu ĝi. La animo brulas.

Li kalcitris kaj grimpis supren, al fumanta fenestro de la dua etaĝo.

– Reen! – oni kriis el la amaso. – Por kio vi grimpas? Forbrulos vi!

– Sur la lito ĝi kuŝas! – daŭre kriis Nikita. – Kompleta ansero, tri-litraĵo da vodko. Kio, ortodoksuloj, ĉu ni donu malaperi al tio?

Kun neatendita lerteco Prjaĥin kaptis la fenestrobreton, kaj tuj malaperis, entirita enen per aera pumpilo. Liaj lastaj vortoj estis: «Kion ni deziras, tion ni faros». En la interstraton venis silento, rompita per sonorilo kaj trumpetaj signaloj de fajrobrigada ĉararo. En la korton enkuris hakistoj en neflekseblaj krudtolaj kostumoj kun vastaj bluaj zonoj.

Minuto post kiam Nikita Prjaĥin okazigis solan en sia vivo heroaĵon, de la domo apartiĝis kaj brue frapiĝis sur la teron brulanta trabo. La tegmento, krakante, disiĝis, kaj falis enen de la domo. Al ĉielo leviĝis radianta fosto, kvazaŭ oni ellasis el la domo kuglegon al luno.

Tiel pereis loĝejo numero tri, pli bone konata estiel «Korvejo».

Subite en la interstrato ekaŭdiĝis sono de hufoj. En brilo de la incendio preterhastis en fiakro inĝeniero Talmudovskij. Sur liaj genuoj kuŝis la valizo ĉirkaŭgluita per etikedoj. Saltante sur la sidloko la inĝeniero kliniĝis al la fiakristo kaj kriis:

– Pro tiu ĉi salajro mi eĉ minuton ne restos ĉi tie! Pli rapide!

Kaj tuj lia grasa dorso, lumigita per la incendio kaj per la fajrobrigadistaj torĉoj, malaperis post la stratangulo.

Ĉapitro 22

La paradon komandos mi

– Mi mortas pro enuo, – diris Ostap, – ni konversacias nur du horoj, sed vi tedis al mi kvazaŭ mi konas vin tutan vivon. Kun tia spitema karaktero bonas esti milionulo en Usono. Ĉe ni milionulo devas esti pli cedema.

– Vi estas frenezulo! – respondis Aleksandr Ivanoviĉ.

– Ne ofendu min, – milde rimarkis Bender. – Mi estas filo de turka civitano, do posteulo de janiĉaroj. Mi ne indulgos se vi min ofendados. Janiĉaroj konas kompaton nek al virinoj, nek al infanoj, nek al kaŝaj sovetiaj milionuloj.

– Foriru, civitano! – diris Korejko per voĉo de herkulesa burokrato. – Estas jam la tria nokte, mi volas dormi, mi devas frue veni en la oficejon.

– Ĝuste, ĝuste, mi ja forgesis! – kriis Ostap. – Vi ne rajtas malfruiĝi. Oni povas maldungi vin sen elirsubvencio. Sed tio estas dusemajna salajro: dudek tri rubloj! Pro via ŝparemo vi povas vivi duonjaron.

– Ne via la problemo. Lasu min. Ĉu vi aŭdas? Iru for!

– Sed tiu ĉi ŝparemo pereigos vin. Certe al vi ne estas sendanĝere montri viajn milionojn. Sed vi troigas. Ĉu vi pensis pri tio kio okazos se vi, finfine, povos elspezi la monon? Abstinado estas afero danĝera! Mi konis instruistino de

franca lingvo, ŝia nomo estis Ernestina Iosifovna Puankre, kiu neniam en la vivo drinkis vinon. Kaj kio! Dum unu festeno oni regalis ŝin per glaseto da konjako. Ĝi tiel ekplaĉis al ŝi, ke ŝi eldrinkis plenan botelon, kaj sur sama loko, dum la vespermanĝo, freneziĝis. Kaj en la mondo ekestis malpli da instruistinoj de franca lingvo. Samo povas okazi al vi.

– Kion, al diablo, vi volas de mi?

– Samon kion volis atingi amiko de mia infaneco Kola Osten-Baken de amikino, ankaŭ de mia infaneco, pola belulino Inga Zajonc. Li volis akiri amon. Ankaŭ mi agas por akiri amon. Mi volas ke vi, civitano Korejko, ekamu min, kaj por montri vian simpation, donu al mi unu milionon da rubloj.

– For! – nelaŭte diris Korejko.

– Jen, denove vi forgesas ke mi estas posteulo de janiĉaroj.

Kun tiuj ĉi vortoj Ostap leviĝis de la loko. Nun la konversaciantoj staris unu kontraŭ la alia. Ĉe Korejko estis sturma vizaĝo, en la okuloj intermitis blankaj ŝafidoj. La granda kombinanto bonkore smajlis, montrante blankajn maizajn dentojn. La malamikoj proksimiĝis al la surtabla lampo, kaj sur la muro ekuŝis iliaj gigantaj ombroj.

– Milfoje mi ripetis al vi, – diris Korejko, detenante sin, – ke ĉe mi estis kaj estas neniu milionoj. Ĉu vi komprenis? Komprenis? Do iru

for! Mi plendos pri vi.

– Vi neniam plendos pri mi, – multsignife diris Ostap, kaj mi povas foriri. Sed eĉ ne sukcesos mi eliri sur vian Etan Tanĝantan straton, kiam vi, plorante, kuros post mi, kaj lekos miajn janiĉarajn kalkanojn, petegante min reveni.

– Kial ja mi petegos vin?

– Vi faros tion. Tiel decas, kiel ŝatas diri mia amiko Vasisualij Liĥankin, ĝuste en tio troviĝas kruda vero. Jen ĝi estas!

La granda kombinanto metis sur la tablon la paperujon kaj, malrapide malligante ĝiajn botetajn laĉojn, daŭrigis:

– Sed, petas mi, ni interkonsentu. Neniujn ekscesojn! Vi devas nek sufoki min, nek ĵetiĝi el la fenestro, kaj, plej grave, ne mortu pro apopleksio. Se vi decidis morti surloke antaŭtempe, vi metos min per tio en tre stultan staton. Pereos frukto de longa konsciencia laboro. Do, preparolu ni la aferon. Jam ne estas sekreto ke vi ne amas min. Neniam akiros mi tion kion Kola Osten-Baken akiris de Inga Zajonc, amikino de mia infaneco. Tial mi ne vespirados vane, ne kaptados vin je la talio. La serenadon vi opiniu finita. Silentiĝis balalajkoj, psalterioj kaj orizitaj harpoj. Mi venis al vi estiel jura persono al jura persono. Jen estas pakaĵo pezanta tri aŭ kvar kilogramoj. Ĝi estas vendata, kaj kostas milionon da rubloj, la

saman milionon kiun vi, pro via avideco, ne volas donaci al mi. Aĉetu!

Korejko kliniĝis super la tablo kaj pe-legis sur la paperujo: "Dosiero pri Aleksandr Ivanoviĉ Korejko. Komencita: la 23-an de junio 1930. Pe-ita: la 10-an de aŭgusto 1930."

- Kiu stultaĵo! - diris li, disigante la manojn. - Kiu malfeliĉo! Foje vi venis al mi kun iu mono, nun vi iun dosieron elpensis. Tio estas ja ridindaĵo.

- Nu kio, ĉu okazos la aĉetado? - insistis la granda kombinanto. - La prezo ne estas alta. Kontraŭ ĉiu kilogramo da ege rimarkindaj informoj el sfero de kaŝa komerco mi prenas nur tricent mil.

- Kiuj ja informoj? - malĝentile demandis Korejko, etendante la manon al la paperujo.

- Plej interesaj, - respondis Ostap, ĝentile demovante lian manon. - Informoj pri via dua kaj ĉefa vivo, kiu ege diferencas de via unua kvardek-ses-rubla, herkulesa. Via unua vivo estas konata al ĉiuj. De la deka ĝis la kvara vi estas pro sovetia reĝimo. Sed pri via dua vivo, de la kvara ĝis la deka, scias sole mi. Ĉu vi aprezis la situacion?

Korejko ne respondis. Ene de liaj ĉefsoldataj faltoj kuŝis ombro.

- Ne, - decide diris la granda kombinanto, - vi devenas ne de simio, kiel ĉiuj civitanoj, sed de bovino. Vi meditas tre malrapide, ĝuste kiel

tiuj parhufaj mamuloj. Tion mi diras al vi estiel specialisto pri kornoj kaj hufoj. Do ankoraŭfoje. Ĉe vi, laŭ miaj informoj, estas sep aŭ ok milionoj. La paperujo estas vendata kontraŭ miliono. Se vi ne aĉetos, mi tuj portos ĝin en alian lokon. Tie oni donos al mi nenion kontraŭ ĝi. Eĉ ne kopekon. Sed vi pereos. Tion mi diras al vi estiel jura persono al jura persono. Mi restos sama malriĉa poeto kaj multedzinulo kia mi estis, sed ĝis mia morto mem min plezurigos penso ke mi liberigis la socion de ega avarulo.

- Montru la dosieron, - pripense diris Korejko.

- Ne vantuu, - rimarkis Ostap, malfermante la paperujon, - la paradon komandos mi. Siatempe vi estis informita pri tio pere de telegrafo. Do jen, la parado komenciĝis, kaj komandas ĝin, kiel vi povas rimarki, ĝuste mi.

Aleksandr Ivanoviĉ enrigardis unuan paĝon de la dosiero kaj, ekvidinte algluitan en ĝi propran fotografiaĵon, malagrabla smajlis kaj diris:

- Ial mi ne povas kompreni: kion vi volas de mi? Ĉu enrigardu mi, pro scivolemo.

- Ankaŭ mi pro scivolemo, - deklaris la granda kombinanto. - Nu kio, do komencu ni, movataj per tiu ĉi ĉasta sento. Sinjoroj ĵurianoj, Aleksandr Ivanoviĉ Korejko naskiĝis... Cetere, la feliĉan infanecon oni povas ellasi. En tiu ĉi blueta tempo Saŝa ankoraŭ ne okupiĝis pri

komercaj rabadoj. Poste iras rozkolora adoleskado. Forlasu ni ankoraŭ unu paĝon. Kaj jen la juneco, komenco de vivo. Ĉi tie ni povas jam halti. Pro scivolemo. Paĝo sesa de la dosiero...

Ostap foliumis paĝon numero ses, kaj voĉlegis enhavon de paĝoj sepa, oka kaj pli, ĝis dek-dua inkluzive.

– Kaj jen, sinjoroj ĵurianoj, antaŭ vi trairis unuaj gravaj aferetoj de mia defendato, inter ili: vendado de fiskaj medikamentoj dum malsato kaj tifo, kaj laboro pri provizo, kiu venigis al malapero de fervoja trajno kun provianto, iranta en malsatantan ĉe-volgan regionon. Ĉiuj ĉi faktoj, sinjoroj ĵurianoj, interesas nin de vidpunkto de pura scivolemo.

Ostap parolis per aĉa maniero de antaŭrevolucia advokato kiu, kaptinte iun vorteton, jam ne forlasis ĝin el la dentoj, kaj tiris post si dum ĉiuj dek tagoj de granda proceso.

– Ne malhavas ankaŭ scivolemon apero de mia defendato en Moskvo en jaro 1922...

Vizaĝo de Aleksandr Ivanoviĉ konservis neŭtralecon, sed liaj manoj sencele palpis la tablon, kiel ĉe blindulo.

– Permesu, sinjoroj ĵurianoj, unu demandon. Certe pro scivolemo. Kiun enspezon povas alporti al homo du ordinaraj bareloj, plenigitaj per akvokonduka akvo? Ĉu dudek rublojn? Ĉu tri

rublojn? Ĉu ok kopekojn? Ne, sinjoroj, ĵurianoj! Al Aleksandr Ivanoviĉ ili alportis kvarcent mil oraj rubloj nul nul kopekoj. Fakte tiuj ĉi bareloj portis espriman nomon: «Produktiva kooperativo de kemiaĵoj "Kvitiĝo"». Tamen iru ni pluen. Paĝoj kvardek-dua ĝis kvindek-tria. Loko de la okazaĵo: eta kredema respubliko. Blua ĉielo, kameloj, oazoj, kaj dandaĉoj en oraj vertoĉapoj. Mia defendato helpas konstrui elektrostacion. Mi substrekas: li helpas. Alrigardu lian vizaĝon, sinjoroj ĵurianoj!...

Entuziasmiĝinta Ostap turniĝis al Aleksandr Ivanoviĉ, kaj montris lin per la fingro. Sed li ne sukcesis desegni per la mano fluan arkon, kion faradis iamaj advokatoj. La defendato kaptis subite lian moviĝantan manon, kaj komencis silente eltordi ĝin. Samtempe, per alia mano, la sinjoro defendato intencis kroĉiĝi je gorgo de la sinjoro advokato. Ĉirkaŭ duonminuto la kontraŭuloj rompis manojn unu al la alia, tremante pro la streĉo. Ĉe Ostap malbutoniĝis la ĉemizo, kaj sub ĝi, dum momento, ekvideblis la tatuoj. Napoleono tenis, kiel antaŭe, la bierkruĉon, sed estis tiel ruĝa, kvazaŭ sukcesis jam eldrinkaĉi sufiĉe multe.

– Ne premu sur mian psikon! – diris Ostap, deŝirinte de si na Korejko, kaj rekaptinte la spiron. – Oni malhelpas labori.

– Kanajlo! Kanajlo! – flustris Aleksandr Ivanoviĉ. – Jen kia kanajlo!

Li sidis sur la planko, grimacante pro la doloro, okazigita al li per la posteulo de janiĉaroj.

Командовать парадом буду я
(«La paradon komandos mi»)

– La kunsido daŭriĝas! – diris Ostap kvazaŭ okazis nenio. – Do, sinjoroj ĵurianoj, la glacio, kiel vi vidas, ekmoviĝis. La defendato penis mortigi min. Certe pro infana scivolemo. Li simple volis scii kio troviĝas ene de mi. Mi rapidas satigi tiun ĉi scivolemon. Tie interne estas nobla kaj tre sana koro, perfektaj pulmoj, kaj hepato sen signoj de ŝtonoj. Mi petas enigi tiun fakton en la protokolon. Kaj nun daŭrigu ni niajn ludojn, kiel diris redaktoro de humura revuo, malfermante la vican kunsidon, kaj severe rigardante siajn kunlaborantojn.

Tiuj ĉi ludoj ege ne plaĉis al Aleksandr Ivanoviĉ. Oficvojaĝo, el kiu Ostap revenis, spirante per vino kaj ŝafido, lasis en la dosiero vastajn spurojn. Ĉi tie estis kopio de senĉeesta verdikto, kopiaĵoj de planoj de la filantropa kartelo, ekstraktaĵo el la trusta libro pri profitoj kaj malprofitoj, kaj ankaŭ fotografiaĵoj de la elektra montofendejo kaj de kino-reĝoj.

– Kaj fine, sinjoroj ĵurianoj, jen estas tria etapo en agado de mia batalema defendato: modesta kontora laboro en «Herkules» – por la komunumo, kaj kaŝa komerco – por la animo.

Simple pro scivolemo ni menciu spekuladojn pri valuto, feloj, ŝtonetoj, kaj pri ceteraj ege bezonataj kompaktaĵoj objektoj. Kaj, fine, ni parolu pri serio de memeksplodantaj akciaj societoj sub koloraj impertinent-kooperativaj nomoj: «Intensulo», «Laborista cedro», «Seghelpo» kaj «Suda arbohakisto». Kaj pri ĉio ĉi okupiĝis ne sinjoro Funt, katenulo de privata kapitalo, sed mia amiko defendato.

Dum tio la granda kombinanto denove montris per la mano na Korejko, kaj aerdesegnigis per ĝi delonge intencitan efektan arkon.

Poste Ostap per bombastaj frazoj petis de la imagita juĝaro permeson meti antaŭ la juĝato kelkajn demandojn kaj, atendinte pro la ĝentileco unu minuton, li komencis:

– Ĉu havis la juĝato iujn neservajn aferojn kun herkulesano Berлага? Ne havis. Ĝuste! Kaj kun herkulesano Skombrieviĉ? Ankaŭ ne. Bonege. Kaj kun herkulesano Brulegov?

La milionulo-kontoristo silentis.

– Aliajn demandojn mi ne havas. Fu! Mi laciĝis kaj volas manĝi. Diru, Aleksandr Ivanoviĉ, ĉu vi, hazarde, havas malvarman kotleton sub la ĉemizo? Ne? Mirinda malriĉeco, precipe se konsideri grandecon da sumoj kiujn vi, helpe de Brulegov, elpumpis el bona «Herkules». Jen propramana atesto de Brulegov, de sola herkulesano kiu scias kiu kaŝiĝas sub aspekto de kvardek-ses-rubla kontoristo. Sed

ankaŭ li ne vere komprenis kio vi estas. Tamen tion scias mi. Jes, sinjoroj ĵurianoj, mia defendato estas peka. Tio estas pruvite. Sed malgraŭ tio mi permesas al mi peti pri indulgo, sed, tamen, ĉe tiu kondiĉo ke la defendato aĉetos de mi la paperujon. Mi finis.

Ĝis fino de la parolado de la granda kombinanto Aleksandr Ivanoviĉ trankviliĝis. Eniginte la manojn en poŝojn de la facila pantalono li venis al la fenestro. La juna tago jam bruis tra la urbo per tramaj tamburinaj sonoriletoj.

Post la ĉedoma barileto iris osoviahim-anoj, tenante diversdirekten fusilojn, kvazaŭ ili portis pioĉojn. Sur zinkizita kornico promenis kolomboj, frapante per la ruĝaj salikaj piedetoj, kaj ĉiuminute deglitante. Aleksandr Ivanoviĉ, kutimiginta sin al ŝparemo, malŝaltis la surtablan lampon kaj diris:

– Do tio estas vi kiu sendis al mi la stultajn telegramojn?

– Mi, – respondis Ostap. – «Enŝarĝu oranĝojn barelojn fratoj Karamazov». Bone, ĉu?

– Stultete.

– Kaj almozulo-duonidioto? – demandis Ostap, sentante ke la parado sukcesis. – Ĉu bone?

– Bubaĉaĵo! Kaj libro pri milionuloj – ankaŭ. Kaj kiam vi venis al mi kiel kieva gardisto mi tuj komprenis ke vi estas eta fripono. Bedaŭrinde

mi eraris. Alie vi neniamtrovus min.

– Jes, vi eraris. «Iam eĉ maljunulino rompas aman disciplinon», kiel diris pola belulino Inga Zajonc monaton post edziniĝo kun amiko de mia infaneco Kola Osten-Baken.

– Jes, rabo, tio ankoraŭ estas komprenebla, sed peziloj! Por kio vi forŝtelis de mi la pezilojn?

– Kiujn pezilojn? Mi ŝtelis neniujn pezilojn.

– Vi simple ĝenas konfesi. Kaj, entute, vi faris amason da stultaĵoj,

– Eble, – rimarkis Ostap. – Mi ne estas anĝelo. Mi havas mankojn. Tamen mi tro longe babiladas kun vi. Min atendas mulatoj. Ĉu vi ordonos al mi ricevi la monon?

– Jes, mono! – diris Korejko. Pri mono estas problemeto. La paperujo estas bona, mi ne rifuzas, oni povas aĉeti, sed kalkulante miajn enspezojn vi tute preterlasis la elspezojn kaj rektajn malgajnojn. Miliono – tio estas sensenca nombro.

– Ĝis revido, – malvarme diris Ostap, – kaj bonvolu resti en la loĝejo nur dum duonhoro. Por preni vin oni alveturos en mirinda kradigita kaleŝo.

– Tiel oni ne ordigas aferojn, – diris Korejko kun vendista smajlo.

– Povas esti, – suspiris Ostap, – sed, ĉu vi scias, mi ne estas financisto. Mi estas libera artisto kaj malvarma filozofo.

– Sed kontraŭ kio vi volas ricevi la monon?

Mi perlaboris ĝin, sed vi...

- Mi ne nur laboris. Mi eĉ suferis. Post konversacioj kun Berlaga, Skombrieviĉ kaj Brulegov mi perdis kredon je homaro. Ĉu tio ne kostas milionon da rubloj, kredo je homaro?

- Kostas, kostas, - trankviligis Aleksandr Ivanoviĉ.

- Do, ĉu ni iru en la grenejon? - demandis Ostap. - Interalie, kie vi tenas vian kontantan monon? Oni povas supozi ke ne en ŝparkaso, ĉu?

- Iru ni! - respondis Korejko. - Tie vi vidos.

- Povas esti ke malproksimen? - vantis Ostap. - Mi povas venigi aŭton.

Sed la milionulo rifuzis de la aŭto, kaj deklaris ke tio ne estas malproksime kaj, entute, oni ne bezonas superfluan pompon. Li ĝentile tralasis na Bender, kaj eliris, kunpreninte de la tablo iun negrandan pakaĵon, volvitan en ĵurnalan paperon. Sob-irante sur la ŝtuparo, Ostap kantetis: «En bluĉiela Argentino...»

Ĉapitro 23

Koro de la ŝoforo

Sur la strato Ostap prenis na Aleksandr Ivanoviĉ je la brako, kaj la ambaŭ kombinantoj rapide ekiris direkte al la stacidomo.

– Sed vi estas pli bona ol mi opiniis, – amike diris Bender. – Kaj ĝuste. Kun mono oni devas separiĝi libere, sen ĝemoj.

– Al bona homo oni povas doni eĉ milionon, – respondis la kontoristo, fiksaŭskultante ion.

Kiam ili turnis sur straton Mering, super la urbo trahastis hurla sono de sireno. La sono estis longa, onda kaj malgaja. Pro tiu ĉi sono, dum nebulaj noktoj, humoro de maristoj ial malboniĝas, kaj aperas deziro peti aldonon al la salajro pro danĝeroj de la servo. La sireno daŭrigis la penadon. Al ĝi aliĝis surteraj fajfegoj kaj aliaj sirenoj, pli malproksimaj kaj eĉ pli malgajaj. La pasantoj subite ekrapidis, kvazaŭ ilin ekpelis pluvego. Dum tio ĉiuj ridetaĉis kaj rigardetis la ĉielon. Vendistinoj de sunfloraj semoj, grasaj maljunulinoj, kuris, eligante la ventrojn, kaj en iliaj kanaj korboj saltetis, inter la ŝutebla varo, la vitraj glasetoj. Trans la straton, oblikve, kuregis Adolf Nikolaeviĉ Bomze. Li sukcesis bonorde trasalti la turneblan pordon de «Herkules». Sur diverskoloraj ĉevaletoj pretergalopis plotono da surĉevala rezervo de polico. Preterhastis ruĝkruca aŭto. La strato subite malpleniĝis. Ostap rimarkis ke malproksime, de iama kafejo «Florido», deiĝis gregeto da tolaj veŝtoj. La maljunuloj,

svingante ĵurnalojn kaj la panamajn ĉapelojn, kuretis sur la pavimo. Sed antaŭ ol ili sukcesis atingi la angulon, eksonis surdiga krevanta kanona pafo; la tolaj veŝtoj klinis la kapojn, haltis, kaj tuj ekkuris reen. Baskoj de iliaj silkaj jakoj disflugadis.

Konduto de la tolaj veŝtoj ridigis na Ostap. Dum li admiris iliajn mirindajn gestojn kaj saltojn, Aleksandr Ivanoviĉ sukcesis malvolvi la pakaĵon, prenitan el la domo.

– Maldecaj olduloj! Operetaj komikuloj! – diris Ostap, turniĝante al Korejko.

Sed Korejko forestis. Anstataŭ li sur grandan kombinanton rigardis konsterniga muzelaĉo kun vitraj skafandraj okuloj kaj kaŭĉuka rostrino, fine de kiu pendaĉis lada kaki-kolora cilindro. Ostap tiel miris ke eĉ eksaltis.

– Lasu la ŝercojn – severe diris li, etendante la manon al la gasa masko. – Sinjoro defendato, mi alvokas vin al ordo.

Sed ĉi-minute alkuris grupo da homoj en samaj gasmaskoj, kaj inter deko da samaj kaŭĉukaj muzelaĉoj jam ne eblis trovi na Korejko. Subtenante sian paperujon Ostap tuj komencis rigardi piedojn de la monstroj, sed apenaŭ ekŝajnis al li ke li jam difinis vidvinan pantalonon de Aleksandr Ivanoviĉ, oni prenis na Ostap je la brakoj, kaj bravula voĉo diris:

– Kamarado! Vi estas venenigita!

– Kiu estas venenigita? – kriis Ostap,

elŝiriĝante. – Lasu min!

– Kamarado, vi estas venenigita per gaso! – ĝoje ripetis la subflegisto. – Vi trafis venenigitan zonon. Ĉu vi vidas, jen la gasa bombo.

Tovariŝ, vy otravleny!

(«Kamarado, vi estas venenigita!»)

Kaj vere, sur la pavimo kuŝis skatoleto el kiu haste eliĝis densa fumo. La suspektinda pantalono estis jam malproksima. Lastfoje briletis ĝi inter du strioj de la fumo, kaj malaperis. Ostap elŝiriĝadis silente kaj furioze. Lin tenis jam ses maskoj.

– Krom tio, kamarado, vi estas vundita per obus-ero en la brakon. Ne koleriĝu, kamarado! Vi ja scias ke okazas manovro. Nun ni bandaĝos vin, kaj portos en gasrifuĝejon.

La granda kombinanto neniel povis kompreni ke la rezisto senutilas. La ludanto, kaptinta mateniĝe kartludan feliĉon kaj miriginta la tutan tablon, subite, dum dek minutoj, malgajnis ĉion al iu juna homo kiu hazarde enkuris pro scivolemo. Kaj jam ne sidas li, pala kaj solena, kaj jam ne interpuŝiĝas ĉirkaŭe dezirantoj elpetaĉi monereton por feliĉo. Hejmen li iros piede.

Al Ostap alkuris junkomunistino kun ruĝa kruco sur la antaŭtuko. El la krudtola saketo ŝi eltiris panso-bendojn, vaton kaj, sulkgigante la

brovojn, por ne ridi, bandaĝis manon de la granda kombinanto super la maniko. Pe-inte tiun ĉi agon de kompato la junulino ekridis kaj forkuris al alia vundito, kiu humile donis al ŝi sian kruron. Oni ektiris na Ostap al brankardo. Tie okazis nova bataleto, dum kiu balanciĝis la rostroj, kaj la unua subflegisto-ordonanto per laŭta lektora voĉo daŭrigis vekoj ene de Ostap konsciencojn kaj aliajn civitanajn virtojn.

– Fratetoj! – balbutis la granda kombinanto, dum oni per rimenoj bukis lin al la brankardo. – Fratetoj, komuniku al mia mortinta patro, turka civitano, ke lia ŝatata filo, iama spertulo pri kornoj kaj hufoj, pereis heroe sur batala kampo.

Lastaj vortoj de la suferito sur la batalo estis:

– Dormu, la agloj batalaj!

Post tio oni ekportis na Ostap, kaj li silentiĝis, direktante siajn okulojn en la ĉielon, kie komenciĝis tumulto. Ruliĝis densaj, helaj, kor-similaj buloj da fumo. Je granda alteco per ne tro regula angulo iris travideblaj celuloidaj avioj. De ili disvastiĝis sonora vibrado, kvazaŭ ĉiuj ili estis interligitaj per feraj fadenoj. Dum mallongaj intervaloj inter kanonaj batoj daŭriĝis hurlo de sirenoj.

Ostap devis elteni ankoraŭ unu humiliĝon. Oni portis lin preter «Herkules». El fenestroj de la kvaretaĝa lignaĵ-institucio elrigardis oficistoj. Tuta financ-kalkulo staris sur fenestraj bretoj.

Lapidus-juna timigis na Kukuŝkind, aspektante ke volas puŝi lin soben. Berlaga faris grandajn okulojn, kaj kliniĝis antaŭ la brankardo. En fenestro de dua etaĝo, sur fono de palmoj, brakumiĝinte staris Brulegov kaj Skombrieviĉ. Rimarkinte ĉirkaŭligitan Ostap, ili ekflustris, kaj rapide batfermis la fenestron.

Antaŭ elpendaĵo «Gasrifuĝejo numero 34» la brankardo haltis. Oni helpis al Ostap leviĝi kaj, ĉar li denove penis elŝiriĝi, la subflegisto-ordonanto devis ankoraŭfoje alvoki lin al konscienco.

La gasrifuĝejo troviĝis en doma klubo. Tio estis longa kaj luma duonkelo kun ripigita plafono al kiu, per dratoj, estis alligitaj modeloj de militaj kaj poŝtaj avioj. En profundo de la klubo troviĝis eta scenejo, sur kies muro estis desegnitaj du bluaj fenestroj kun luno kaj steloj, kaj bruna pordo. Ĉe muro kun slogano: «Militon ni ne volas, sed al defendo ni pretas» – turmentiĝis la tolaj veŝtoj, kaptitaj tut-gregete. Sur la podio promenadis lektoro en verda milit-jaketo kaj, malkontente rigardante la pordon, kun bruo enlasanta novajn grupojn da venenitoj, kun zorga militista prononco diris:

– Batalaj venenoj, laŭ la efekto, dividiĝas je sufokigaj, larmigaj, komunvenenigaj, abscesigaj, iritigaj ktp. Inter larmigaj venenaĵoj ni povas mencii klor-pikraton, brom-benzolon, brom-acetonon...

Ostap deigis la morozan rigardon de la lektoro al aŭskultantoj. Junaj homoj rigardis en buŝon de la lektoro, aŭ enskribis la lekcion en la notlibrojn, aŭ okupiĝis apud stando kun fusilaj pecoj. Sur dua vico sole sidis junulino aspektanta sportiste, pripense rigardanta la teatran lunon.

«Bona junulino», – decidis Ostap, – «Bedaŭrindas ke la tempo forestas. Pri kio ŝi pensas? Certe ne pri brom-benzolo. Aj-aj-aj! Ankoraŭ hodiaŭ matene mi povus kun tia junulino elŝiriĝi ien en Oceanion, sur Fiĝiojn, sur iujn insulojn de Moluk, aŭ en Rio-de-Ĵanejron.»

Pro penso pri perdita Rio Ostap ektumultis en la rifuĝejo.

La tolaj veŝtoj, nombre kvardeko da homoj, jam rekonsciigis de la konsterno, reŝraŭbis siajn amelitajn kolumojn, kaj entuziasme konversaciis pri Tuteŭropo, pri mara konferenco de tri ŝtatoj, kaj pri Gandiismo.

– Ĉu vi aŭdis? – diris unu veŝto al alia. – Gandi ekveturis en Dandi (Dundee).

– Gandi – tio estas kapo! – suspiris tiu. – Ankaŭ Dandi estas kapo.

Aperis disputo. Iuj el la veŝtoj asertis ke Dandi estas urbo, do ĝi ne povas esti kapo. Aliaj kun freneza obstino pruvis kontraŭon. Tamen ĉiuj akordiĝis pri tio ke dum proksimaj tagoj Nigramarsk estos deklarita libera urbo.

La lektoro denove faltigis la vizaĝon, ĉar la

pordo malfermiĝis, kaj en la ejon kun frapo venis novaj loĝantoj: Balaganov kaj Panikovskij. La gasa atako kaptis ilin dum reveno el la nokta ekspedicio. Post laboro pri la peziloj ili estis malpuraj kiel senhejmaj katoj. Ĉe vido de la komandanto la laktaj fratoj mallevis la okulojn.

– Kio, ĉu vi festis nomtagon ĉe episkopo? – severe demandis Ostap.

Timante demandojn pri progreso de Korejko-afero li kolere kunigis la brovojn kaj atakis.

– Nu, cignoj-anseroj, kion vi faradis?

– Je Dio, – diris Balaganov, metante la manon al la brusto. – Ĉion ĉi tion iniciatis Panikovskij.

– Panikovskij! – severe diris la komandanto.

– Je mia honora nobla vorto! – kriis rompanto de la konvencio. – Vi ja scias, Bender, kiel mi estimas vin! Tio estas faraĉoj de Balaganov.

– Ŝura! – pli severe diris Ostap.

– Kaj vi kredas al li! – riproĉe diris la rajtigito pri hufoj. – Ja kiel vi pensas, ĉu sen via permeso mi prenis tiujn ĉi pezilojn?

– Do tio estas vi kiuj prenis la pezilojn? – kriis Ostap. – Sed por kio?

– Panikovskij diris ke ili estas oraj.

Ostap ekrigardis na Panikovskij. Nur nun li rimarkis ke sub ties jako forestas jam la duonrubla fals-ĉemizo, kaj ke tie videblas jam nuda brusto. Dirante eĉ ne vorton la granda

kombinanto falis sur la seĝon. Li ekstremis, kaptante per la manoj aeron. Poste el lia gorzo elŝiriĝis vulkanaj tondradoj, el la okuloj ekfluis larmoj, kaj rido, en kiu respegulis la nokta laciĝo kaj la tuta disiluziiĝo pri lukto kontraŭ Korejko, tiel mizere parodiita per la laktaj fratoj; terura rido eksonis en la gasrifuĝejo. Tolaj veŝtoj ekstremis, kaj la lektoro pli laŭte kaj pli zorg-prononce ekparoladis pri la batalaj venenaĵoj.

La rido ankoraŭ piketis na Ostap per milo da gasakvaj kudriletoj, sed li jam sentis sin plifreŝita kaj plijunigita, kiel homo kiu trapasis ĉiujn frizistejajn instancojn: kaj amikecon kun razilo, kaj konatecon kun tondiloj, kaj parfuman pluveton, kaj eĉ kombadon de la brovoj per speciala broseto. Laka oceana ondo plaŭdis jam en lian koron, do al demando de Balaganov pri la aferoj li respondis ke ĉio iras perfekte, se ne enkalkuli neatenditan fuĝon de la milionulo en nekonatan direkton.

La laktaj fratoj preteratentis la vortojn de Ostap. Ili ĝojis ke la afero pri la peziloj pasis tiel glate.

– Rigardu, Bender, – diris la rajtigito pri hufoj, – jen fraŭlino sidas. Tio kun ŝi promenadis Korejko.

– Do tio estas Zosja Sinickaja? – kun akcento prononcis Ostap. – Jen vere: «En balo bruega, hazarde...».

Ostap trapuŝiĝis al la scenejo, ĝentile haltis la oratoron kaj, sciinte ke la gasa kaptiteco daŭriĝos ankoraŭ de unu kaj duono ĝis du horoj, dankis, kaj eksidis tie, ĉe la scenejo, apud Zosja. Post iom da tempo la junulino jam ne rigardis la pentraĉitan fenestron. Malĝentile laŭte ridante ŝi elŝiradis sian kombilon el manoj de Ostap. Kio koncernas la grandan kombinanton, do li, se juĝi laŭ movoj de liaj lipoj, parolis senhalte.

En la gasrifuĝejon oni entiris inĝenieron Talmudovskij. Li defendis sin per du valizoj. Lia ruĝkolora frunto estis malseka pro ŝvito, kaj brilis kiel flano.

– Nenion mi povas fari, kamarado! – diris la ordiganto. – Manovroj! Vi trafis la venenitan zonon.

– Sed mi veturis per fiakro! – ekscitiĝis la inĝeniero. – Per fi-ak-ro! Mi rapidas al stacidomo pro la aferbezonoj. Nokte mi malfruis al la trajno. Kio, ĉu ankaŭ nun mi malfruiĝu?

– Kamarado, estu vi konscienca!

– Kial mi estu konscienca se mi veturis per fiakro! – indigniĝis Talmudovskij.

Li tiel emfazis tiun ĉi cirkonstancon, kvazaŭ veturo per fiakro faras la veturanton imuna, kaj senigas klor-pikraton, brom-benzolon kaj brom-acetonon de siaj pereigaj ecoj. Ne estas sciate kiom da tempo Talmudovskij interkverelus kun la osoaviaĥim-anoj, se en la gasrifuĝejon ne

enirus nova venenigito kaj vundito, se juĝi laŭ kapo, ĉirkaŭvolvita per bandaĝa bendo. Vidinte la novan gaston Talmudovskij eksilentis, kaj vigle plonĝis en grupon da tolaj veŝtoj. Sed homo kun la bandaĝo tuj rimarkis pezan figuron de la inĝeniero, kaj direktiĝis rekte al li.

- Finfine mi kaptis vin, inĝeniero Talmudovskij! - diris li malbonpromese. - Sur kio vi baziĝis, lasinte la fabrikon?

Talmudovskij ekmovis diversdirekten la etajn aprajn okuletojn. Konvinkiĝinte ke forkuro ne eblas, li eksidis sur siajn valizojn, kaj ekfumis cigaredon.

- Alveturas mi al li en hotelon, - plenvoĉe daŭrigis homo en la bandaĝo, - oni diras: forveturis li. Kial forveturis, se li nur hieraŭ vespere venis kaj, laŭ kontrakto, devas labori jaron? Li forveturis na Kazan, oni diras, kun la valizoj. Mi pensis jam ke ĉio finiĝis, ke denove ni serĉu specialiston, sed jen, kaptis; sidas li, ĉu vi vidas, fumetas. Vi estas fluganto, inĝeniero Talmudovskij! Vi ruinigas la produktadon!

La inĝeniero desaltis de la valizoj kaj kun krioj «Tio estas vi kiu ruinigas la produktadon!» kaptis la senvualiganton je la talio, kondukis lin en angulon, kaj ekzumis sur lin kiel granda muŝo. Post nelonge el la angulo ekaŭdiĝis pecoj de frazoj: «Ĉe tiu salajro...», «Iru kaj serĉu», «Kaj pripago de oficvojaĝoj?». La bandaĝulo

angore rigardis la inĝenieron.

La lektoro jam finis siajn instrukciojn, montrante fine kiel oni uzu gasmaskon, jam malfermiĝis pordoj de la gasrifuĝejo, kaj la tolaj veŝtoj, tenante unu je alia, kuris al «Florido», jam Talmudovskij, deĵetinte sian persekutanton, elŝiriĝis al libero, vokante plengorĝe fiakriston, sed la granda kombinanto daŭre babilis kun Zosja.

– Kia femino! – ĵaluze diris Panikovskij, elirante kun Balaganov sur la straton. – Aĥ, se la peziloj estus oraj! Je mia honora nobla vorto, mi edzinigus ŝin!

Dum memorigo pri la malbonfamaj peziloj Balaganov dolore puŝis na Panikovskij per la kubuto. Tio estis tute ĝustatempe. En pordoj de la gasrifuĝejo aperis Ostap kun la femino brako ĉe la brako. Li longe adiaŭis, tenere kaj rekte rigardante ŝin. Zosja lastfoje ridetis kaj foriris.

– Pri kio vi parolis kun ŝi? – suspekto demandis Panikovskij.

– Ja pri nenio, fakte, – respondis Ostap. – Nu, ora roto, je laboro! Estas necese trovi la defendaton.

Panikovskij estis sendita en «Herkules», Balaganov – en loĝejon de Aleksandr Ivanoviĉ. Ostap mem ĵetiĝis en la stacidomojn. Sed milionulo-kontoristo malaperis. En «Herkules» lia ĵetono ne estis prenita de la kontrolo tabulo, en la loĝejon li ne revenis, kaj de la stacidomoj,

dum tempo de la gasa atako, foriris ok malproksim-irantaj trajnoj. Sed Ostap ne atendis alian rezulton.

– Finfine, – diris li ne gaje, – okazis nenio timiga. Jes, en Ĉinio ne estas simple trovi necesan homon: tie loĝas kvarcent milionoj da homoj. Sed ĉe ni – tre facile: nur cent sesdek milionoj, trifoje pli simple ol en Ĉinio. Gravas ke estu mono. Kaj ni havas ĝin.

Tamen el la banko Ostap eliris tenante en la manoj tridek kvar rublojn.

– Tio estas ĉio kio restis de deko da miloj, – diris li kun neesprimebla malĝojo, – sed mi opiniis ke en la kuranta konto estas ses aŭ sep miloj... Sed kiel okazis tio? Ĉio iris tre gaje, ni provizadis kornojn kaj hufojn, la vivo estis ekstaza, terglobo rotaciis speciale por ni – kaj jen subite... Mi komprenas! Komprenas! Administra aparato! La aparato pe-manĝis la tutan monon.

Kaj li riproĉe ekrigardis la laktajn fratojn. Panikovskij levis la ŝultrojn, kvazaŭ dirante: «Vi ja scias, Bender, kiel mi estimas vin! Mi ĉiam diris ke vi estas azeno!». Balaganov konsternite ordigis siajn buklojn kaj demandis:

– Do kion ni faru nun?

– Kial «kion»? – kriis Ostap. – Ĉu ni ne havas kontoron por provizo per kornoj kaj hufoj? Kaj la ilaron? Kontraŭ nur inkuja kompleto «Vizaĝe al vilaĝo» iu ajn organizaĵo

ĝoje donos al ni cent rublojn! Kaj la tajpilo! Kaj truigilo, cervaj kornoj, tabloj, bariero, samovaro! Ĉion tion ni povas vendi. Fine ni havas, estiel rezervo, oran denton de Panikovskij. Certe ĝi cedas per grandeco al la peziloj sed, malgraŭ ĉio, tio estas molekulo da oro, de multvalora metalo.

Ĉe la kontoro la amikoj haltis. El la malfermita pordo aŭdiĝis junaj leonaj voĉoj de la studentoj de bestbredada faklernejo, kiuj revenis el la oficvojaĝo, dorma murmuro de Funt, kaj ankoraŭ iuj nekonataj basoj kaj baritonoj sendube de bestbredada tembro.

– Tio estas krimaĵo! – kriis la praktikantoj. – Ni ankoraŭ tiam miris. Dum tuta kampanjo estas provizita nur dudek kilogramoj da eksterkvalitaj kornoj.

– Vi estos juĝata! – tondris basoj kaj baritonoj. – Kie estas estro de la kontoro? Kie estas rajtigito pri kornoj?

Balaganov ekstremis.

– La kontoro mortis, – flustris Ostap, – kaj ni ne estas jam bezonataj ĉi tie. Ni iros sur vojo verŝita per suno, sed na Funt oni kondukos en ruĝbrikan domon, al kies fenestroj, pro stranga kaprico de la arkitekto, estas alŝraŭbitaj dikaj kradoj.

Eks-estro de la fako ne eraris. Kiam la faligitaj anĝeloj sukcesis malproksimiĝi ne pli ol je tri kvartaloj, ili ekaŭdis post si krakon de

fiakro. En la fiakro veturis Funt. Li estus tute simila al bona avo, veturanta post longaj preparoj al la edziĝinta nepo, se ne policisto, kiu starante sur la ŝtupeto subtenis la oldulon je ties pika dorso.

– Funt ĉiam sidis, – aŭdis ili malaltan obtuzan voĉon de la maljunulo, kiam la veturilo preterveturis ilin. – Funt sidis ĉe Aleksandr la dua, «Liberiganto», ĉe Aleksandr la tria, «Pacfaranto», ĉe Nikolaj la dua «Sanga», ĉe Aleksandr Fjodoroviĉ Kerenskij...

Kaj, kalkulante la regantojn, Funt fleksis la fingrojn.

[Контора умерла](#) («La kontoro mortis»)

– Do kion ni faru nun? – demandis Balaganov.

– Mi petas ne forgesi ke vi kaj Ostap Bender vivas ene de sama tempospaco, – malgaje diris la granda kombinanto. – Mi petas memori ke ĉe li estas rimarkinda valizeto, en kiu troviĝas ĉio por akiro da poŝa mono. Iru ni hejmen, al Loĥankin.

En Citrona interstrato ilin atendis nova bato.

– Sed kie estas la domo? – kriis Ostap. – Ja nur hieraŭ vespere ĉi tie estis domo, ĉu?

Sed la domo forestis, forestis «Korvejo». Sur la bruligitaj traboj paŝadis nur asekura inspektoro. Trovinte sur la malantaŭa korto kerosenujon li ekflaris ĝin, kaj kun dubo

balancis la kapon.

– Kaj kio nun? – demandis Balaganov, time smajlante.

La granda kombinanto ne respondis. Li estis premita per perdo de la valizeto. Forbrulis la mirinda sako, en kiu estis hinda turbano, afiŝo "Venis Kriŝna-pastro", kuracista kitelo kaj stetoskopo. Kiom da mirindaĵoj estis tie!

– Jen, – diris fine Ostap, – sorto ludas pri homo, kaj homo ludas trumpeton.

Ili ekvagis sur la stratoj, palaj, seniluziitaj, stultiĝintaj pro la ĉagreno.

Ilin puŝis pasantoj, sed ili eĉ ne reagis. Panikovskij, kiu levis la ŝultrojn ankoraŭ dum malsukceso en la banko, jam ne mallevis ilin de tiam. Balaganov taŭzis siajn ruĝajn krispojn, kaj aflikte suspiris. Bender iris post ĉiuj, mallevinte la kapon kaj mekanike zumante: «Jam pasis, pasis tago rava, do pafu mia et-zuavo». En tia stato ili altiriĝis en kamparan-gastejon. En ĝia profundo, sub la baldakeno, flaviĝis «Antilopo». Sur peroneto de la manĝoĉambro sidis Kozleviĉ. Dolĉe spirante li suĉis el subtasoj varman teon. Ĉe li estis ruĝa pota vizaĝo. Li ĝuadis.

– Adam! – diris la granda kombinanto, haltante antaŭ la ŝoforo. – Ĉe ni restis nenio. Ni estas almozuloj, Adam! Akceptu nin! Ni pereas.

Kozleviĉ leviĝis. La komandanto, humiligita kaj malriĉa, staris antaŭ li kun nekovrita kapo. Helaj polaj okuloj de Adam Kazimiroviĉ ekbrilis

pro larmoj. Li deiris de la ŝtupetoj, kaj laŭvice ĉirkaŭbrakis ĉiujn antilopanojn.

– La taksio estas libera! – diris li, – glutante larmojn de kompato. – Ensidu, mi petas.

– Sed povas esti ke ni devos veturi malproksimen, tre malproksimen, – diris Ostap, – povas esti ke ĝis rando de la mondo, aŭ eĉ pli malproksimen. Pripensu!

– Kien vi volas! – respondis fidela Kozleviĉ.
– La taksio estas libera!

Panikovskij ploris, fermante la vizaĝon per la pugnetoj kaj frustrante:

– Kia koro! Je mia honora nobla vorto! Kia koro!

Ĉapitro 24

La vetero favoris al la amo

Pri ĉio kion la granda kombinanto faris dum la tagoj sekvantaj translokiĝon en la kamparagastejon, Panikovskij parolis kun granda malaprobato.

– Bender frenezadas! – diris li al Balaganov.
– Li tute pereigos nin!

Kaj vere, anstataŭ ŝpari kiel eble longe restintajn tridek kvar rublojn, kaj uzi ilin ekskluzive por aĉeto de nutraĵoj, Ostap direktiĝis en flor-vendejon, kaj per tridek kvin rubloj aĉetis grandan kiel florbedo, moviĝantan bukedon da rozoj. Mankantan rublon li prenis de Balaganov. Inter la floroj li metis skribaĵeton:

«Ĉu aŭdas vi kiel batiĝas mia granda koro?». Al Balaganov estis ordonite alporti la florojn al Zosja Sinickaja.

– Kion vi faras? – diris Balaganov, svingante la bukedon. – Por kio tiu ĉi ŝiko?

– Tio endas, Ŝura, endas, – respondis Ostap. – Ne eblas alie! Ĉe mi estas granda koro. Kiel ĉe bovido. Krom tio ne mono gravas. Gravas ideo.

Post tio Ostap eksidis na «Antilopo», kaj petis na Kozleviĉ veturigi lin ien transurben.

– Mi devas, – diris Ostap, – filozofadi pri ĉio okazinta kaj fari necesajn prognozojn pri la estonto.

La tutan tagon veturigis fidela Adam la grandan kombinanton sur blankaj ĉemaraj vojoj, preter ripozejoj, sanatorioj, kie ripozantoj frapetis per la pantofloj, frapadis per marteloj krocketajn kuglojn, aŭ saltis ĉe la retpilkaj retoj. Telegrafa drato eligis violonĉelajn sonojn. Somer-feriulinoj pene portadis en la ŝtofaj mansakoj bluajn melongenojn kaj melonojn. Junaj homoj kun naztukoj sur la malsekaj post banado haroj arogante enrigardis okulojn de la virinoj kaj diris afablaĵojn, kies plenan kompletan havas ĉiu nigramarskano en aĝo ĝis dudek kvin jaroj. Se iris du feriulinoj, junaj nigramarskanoj diris post ilin: «Aĥ, ĝis kiom beletas tiu, kiu iras flanke!». Dum tio ili plezure ridegis. Ilin ridigis ke la feriulinoj ne sukcesos

diveni al kiu el ili rilatas la komplimento. Sed se oni renkontis feriulinon solan, tiam la ŝercemuloj haltis, kvazaŭ trafitaj per tondro, kaj longe ŝmacis per la lipoj, aspektante la aman suferon. La juna feriulino ruĝiĝis, kaj transkuris la vojon, elfaligante la bluajn melongenojn, kio elvokis ĉe la amindumuloj homeran ridegon.

Ostap duonkuŝis sur malmolaj antilopaj kusenoj, kaj meditis. Elŝiri monon de Brulegov aŭ Skombrieviĉ ne eblis: la herkulesanoj forveturis ferii. Freneza librotenisto Berlaga ne estis enkalkulebla: de li oni ne povis atendi bonan melkadon. Sed malgraŭ tio planoj de Ostap kaj lia granda koro postulis de li ĉeeston en Nigramarsk. Kiom longe daŭros tiu ĉi ĉeesto, estis malfacile supozi.

Ekaŭdinte la konatan transtomban voĉon Ostap alrigardis la trotuaron. Post vico da poploj paŝadis mano ĉe mano ne juna jam paro. La geedzoj, verŝajne, iris al marbordo. Post ili treniĝis Loĥankin. Li portis en la manoj inan ombrelon kaj korbon, el kiu elstaris termosoj kaj elpendis bana tola tuko.

– Varvara, – tenace diris li, – aŭskultu, Varvara!

– Kion vi volas, malfeliĉo vi mia, – demandis Ptiburdukova, ne turniĝante.

– Mi ekposedi volas vin, Varvara!..

– Ja kia kanajlo! – rimarkis Ptiburdukov, ankaŭ ne turniĝante.

Kaj la stranga familio malaperis en polvo de «Antilopo».

Kiam la polvo falis sur la teron Bender ekvidis sur fono de la maro kaj la flora partero grandan vitran atelieron.

Gipsaj leonoj kun malpurigitaj muzeloj sidis ĉe piedo de la vasta ŝtuparo. El la ateliero frapis maltrankviligaodoro de pira esenco. Ostap ekflaris la aeron kaj petis na Kozleviĉ halti. Li eliris el la aŭto, kaj denove komencis entiri per la naztruo vivigan odoron de la esenco.

– Kial mi ne konjektis tuj! – elmurmuris li, vagante ĉe la enirejo.

Li sendis la rigardon sur elpendaĵon «1-a Nigramarska kinofabriko», karesetis la ŝtuparan leonon je ties varma kolhararo kaj, dirinte «**Golkonda**»²², rapide direktiĝis reen, en la kamparan-gastejon.

La tutan nokton sidis li ĉe la fenestra breto, kaj skribis ĉe lumo de kerosena lampo. La vento, enkuranta iam la fenestron, foliumis la pe-skribitajn paĝojn. Antaŭ la verkanto malfermiĝis ne tro alloga pejzaĝo. La delikata luno lumigis tute ne palacon. La kamparan-gastejo spiris, moviĝis kaj raŭkis en la dormo. En mallumaj anguloj interfrapadis nevideblaj ĉevaloj. Etaj spekulantoj dormis sur la ĉaroj, metinte sub sin sian mizeran vararon.

22. Golkonda: regiono en Hindio, 16-17a jarcento, fama per siaj valoraj produktaĵoj.

Elkomplikiĝinta ĉevalino vagadis en la korto, singarde transpaŝis timonojn, tirante post si la kaprimenon kaj, en serĉo de hordeo, enŝovis la muzelon en la ĉarojn. Venis ĝi ankaŭ al fenestro de la verkanto kaj, metinte la kapon sur la fenestrobreton, malgaje rigardis na Ostap.

- Iru, iru, ĉevalino, - rimarkis la granda kombinanto, - ne por via menskapablo estas la afero!

Antaŭ la mateniĝo, kiam la kamparagastejo komencis viviĝi, kaj inter la ĉaroj ekvagadis jam knabo kun sitelo da akvo, per alteta voĉo elkrianta: «Al kiu mi la ĉevalojn drinkigu?», Ostap pe-is sian laboron, prenis el Korejko-dosiero blankan paĝon da papero, kaj kaligrafie skribis sur ĝi la titolon:

"KOLO"

PLENDAŬRA FILMO

Scenaro de O. Bender.

En 1-a Nigramarska kinofabriko estis tiu malordaĉo kiu okazas nur ene de ĉeval-foiroj, kaj ĝuste en tiu momento kiam la tuta komunumo persekutas poŝ-ŝteliston.

Ĉe la eniro sidis gardisto. De ĉiuj enirantoj li strikte postulis paspermesilon, sed, se oni ne donis al li la permesilon, li enlasis ankaŭ sen ĝi.

Homoj en bluaj biretoj kunpuŝiĝis kun homoj en laboristaj kombinvestoj, diskuris per multnombraj ŝtuparoj kaj, senprokraste, per la

samaj ŝtuparoj, kuris soben. En vestiblo ili kurdesegnis rondon, haltis pormomente, konsterniĝe rigardante antaŭ si, kaj denove impetis supren kun tia verovo, kvazaŭ oni vipis ilin de malantaŭe per malseka ŝnuro. Preterhastis asistantoj, konsilantoj, ekspertoj, administrantoj, reĝisoroj kun siaj adjutantinoj, lumigistoj, redaktoroj-muntistoj, maljunaj scenaristinoj, administrantoj pri komoj, kaj gardantoj de granda krudfera stampilo.

Ostap, kiu komencis promenadi en la kinofabriko per siaj ordinaraj paŝoj, baldaŭ rimarkis ke li neniel povas ekesti parto de tiu ĉi turniĝanta mondo. Neniu respondis liajn demandojn, neniu haltis.

- Necesas adaptiĝi al specifaĵoj de la malamiko, - diris Ostap.

Li nerapide ekkuris, kaj tuj eksentes mildiĝon. Li sukcesis eĉ interĵeti kelkajn vortetojn kun iu adjutantino. Tiam la granda kombinanto ekkuris plej rapide, kaj baldaŭ rimarkis ke li jam akordiĝas al la ritmo. Nun li kuris nazo ĉe nazo kun administranto pri literatura fako.

- Scenaro! - kriis Ostap.

- Kia? - demandis la administranto, frapante solidan troton.

- Bona! - respondis Ostap, eligante sin je duonkorpo.

– Mi ja demandas vin: kia? Silenta, aŭ parola?

– Silenta.

Facile elĵetante la piedojn en dikaj ŝtrumpoj, la literatur-faka administranto preteriris na Ostap ĉe turno, kaj kriis:

– Ne estas bezonata!

– Kial ja ne estas bezonata? – demandis la granda kombinanto, komencante peze saltadi.

– Ja tial! Silenta kino jam ne ekzistas. Turnu vin al sonigistoj.

Ili ambaŭ haltis dum momento, konsternite ekrigardis unu la alian, kaj diskuris diversflanken. Post kvin minutoj Bender, svingante la manuskripton, denove kuris en taŭga kompanio, inter du trotulaj konsilistoj.

– Scenaro! – informis ilin Ostap, malfacile spirante.

La konsilistoj, akorde movante la krurojn, turniĝis al Ostap:

– Kia scenaro?

– Parola.

– Ne estas bezonata, – respondis la konsilistoj, plirapidiĝante.

La granda kombinanto denove perdis la ritmon, kaj malhonore eksaltadis.

– Kial ja ne estas bezonata?

– Tial ja. Parola kino ankoraŭ ne ekzistas.

Dum duonhoro de la konscienca trotado

Bender venis al kompreno pri tikla stato de aferoj en 1-a Nigramarska kinofabriko. Tiu ĉi tikleco formiĝis pro tio ke silenta kino jam ne funkciis pro veno de parol-kina erao, sed parola kino ankoraŭ ne funkciis pro organizaj malglataĵoj, okazintaj pro likvidado de silent-kina erao.

Dum kulmino de la labora tago, kiam kuro de la asistantoj, konsilantoj, ekspertoj, administrantoj, reĝisoroj, adjutantinoj, lumigistoj, scenaristoj, kaj gardantoj de granda krudfera stampilo atingis rapidecon de fama siatempe kurĉevalo «Fortikulo», disvastiĝis onidiro ke ie, en iu ĉambro sidas homo kiu urĝe konstruacias parolan kinon. Ostap plenrapide ensaltis la grandan kabineton, kaj haltis, konsternita pro la silento. Ĉe tablo flanke sidis malgranda homo kun beduena barbeto kaj orkadrigita nazumo kun ŝnureto. Kliniĝinte, li pene demetis de la piedo la boteton.

– Saluton, kamarado! – laŭte diris la granda kombinanto.

Sed la homo ne respondis. Li demetis la boteton, kaj komencis deŝuti el ĝi sablon.

– Saluton! – ripetis Ostap. – Mi alportis scenaron!

La homo kun beduena barbeto malhaste surmetis la boteton, kaj silente komencis laĉadi ĝin. Pe-ininte tiun ĉi aferon li turniĝis al siaj paperoj kaj, ferminte unu okulon, komencis

skribi bideajn literaĉojn.

– Kial vi silentas? – elkriaĉis Bender per tiu forto ke sur tablo de la kinoaganto ektintis telefona aŭskultilo.

Nur tiam la kinoaganto levis la kapon, ekrigardis na Ostap kaj diris:

– Bonvolu paroli pli laŭte. Mi ne aŭdas.

– Vi skribu al li, – rekomendis preterimpetanta konsultisto en bunta veŝto, – li estas surda.

Ostap alsidis la tablon kaj pe-skribis sur peco de papero:

«Ĉu vi estas sonigisto?» – Jes, – respondis la surdulo.

«Mi alportis parolan scenaron. Ĝi nomiĝas "Kolo". Popola tragedio en ses partoj», – rapide pe-skribis Ostap.

La surdulo ekrigardis la skribaĵeton tra la ora nazumo, kaj diris:

– Bonege! Ni tuj entiros vin en la laboron. Ni bezonas freŝajn fortojn.

«Mi estas ĝoja kontribuari. Kio pri la antaŭpago?» pe-skribis Bender.

– «Kolo» – tio estas ĝuste kion ni bezonas! – diris la surdulo. – Sidu ĉi tie, mi baldaŭ revenos. Nur ne foriru. Mi revenos precize post minuto.

La surdulo kunprenis scenaron de plendaŭra filmo «Kolo», kaj elglitis el la ĉambro.

– Ni entiros vin en parolan grupon! – kriis li,

malaperante post la pordo. – Post minuto mi revenos.

Post tio Ostap sidis en la kabineto horon kaj duono, sed la surdulo ne revenis. Nur elirinte sur la ŝtuparon, kaj akordiĝinte al la ritmo, Ostap eksciis ke la surdulo jam delonge forveturis per aŭto, kaj hodiaŭ li ne revenos. Kaj entute li ne revenos ĉi tien, ĉar oni subite transĵetis lin en urbeton Uman por gvidi kulturan laboron inter ŝarĝ-ĉaristoj. Sed plej terura estis tio ke la surdulo forveturigis scenaron de plendaŭra filmo "Kolo". La granda kombinanto eltiriĝis el rondo de kurantoj, kaj malleviĝis sur benkon, premiĝinte al ŝultro de sidanta tie pordisto.

Бородица («Barbego»)

– Jen mi, ekzemple, – diris subite la pordisto disvolvigante, ŝajne, delonge turmentantan lin penson. – Diris al mi helpreĝisoro Terentev elkreskigi barbon. Ludos vi, li diras, na Nebukadnecar aŭ na Baltazar en filmo, kies nomon mi ne memoras. Do pekreskigis mi, rigardu kia barbego patriarka! Sed kion mi faru nun pri ĝi, pri la barbo! Helpreĝisoro diras: ne estos plu silenta filmo, sed en parola, diras li, vi ludi ne povas, voĉo ĉe vi estas malagraba. Do sidas mi kun la barbo, sput! kiel kapro. Forrazi estas domaĝe, kaj porti – honte. Tiel do vivas mi.

- Kaj ĉu efektivigas ĉe vi filmadoj? -
demandis Bender, poiome rekonsciiĝante.

- Kiuj povas esti filmadoj? - grave
respondis la barbula pordisto. - Pasintan
someron oni pe-filmis ĉi tie silentan filmon el
romia vivo. Ĝis nun oni ne povas liberiĝi de juĝo
pro okazinta krim-afero.

- Sed kial do ili ĉiuj kuradas? - ekinteresiĝis
la granda kombinanto, montrante la ŝtuparon.

- Ne ĉiuj ĉe ni kuras, - rimarkis la pordisto,
- jen kamarado Geedzov ne kuradas. Agema
homo. Ĉiam mi pensas veni al li pro la barbo,
kiel oni pagos pri ĝi: per salajra listo aŭ per
aparta mandato...

Aŭdinte vorton "mandato", Ostap ekiris al
Geedzov. La pordisto ne mensogis. Geedzov ne
saltis tra la etaĝoj, ne portis alpan bereton, ne
portis eĉ alilandan pufpantalonon "golfo". Sur li
agrabla ripozis rigardo.

La grandan kombinanton li renkontis
ekstreme seke.

- Mi estas okupata, - diris li per pava voĉo,
- al vi mi povas dediĉi nur du minutojn.

- Tio tute sufiĉas, - komencis Ostap. - Mia
scenaro «Kolo»...

- Pli kurte, - diris Geedzov.

- Scenaro «Kolo»...

- Diru klare, kion vi volas?

- «Kolo»...

- Pli kurte. Kiom oni ŝuldas al vi?

– Ĉe mi iu surdulo...

– Kamarado! Se vi tuj ne diros kiom vi devas ricevi, mi petos vin foriri. Mi estas okupata.

– Naŭcent rublojn, – elmurmuris la granda kombinanto.

– Tricent! – kategorie deklaris Geedzov. – Prenu kaj foriru. Kaj sciuj: vi forŝtelis de mi superfluajn minutojn kaj duonon.

Geedzov svinge pe-skribis letereton en librotenistejon, donis ĝin al Ostap, kaj kaptis la telefonan aŭskultilon.

Elirinte el la librotenistejo Ostap enŝovis la monon en la poŝon kaj diris:

– Nebukadnecar estas prava. Sola agema homo ĉi tie, ve, estas Geedzov.

Dume kurado sur ŝtuparoj, rotaciado, akutkrioj kaj gakoj en 1-a Nigramarska kinofabriko atingis la apogeon. Adjutantinoj nudigis la dentojn. Helpreĝisoroj kondukis nigran kapron, admirante ĝiajn fotograf-ecojn. Konsilantoj, ekspertoj, kaj gardantoj de granda krudfera stampilo kunpuŝiĝis kaj raŭke ridegis. Pretertanĝis kurierino kun balailo. Al la granda kombinanto ekŝajnis eĉ ke unu asistanto-aspiranto, en blua pantalono, ekflugis super la amaso kaj, preterfluginte la lustron, eksidis sur la **kornico**²³.

23. Ĉi tie estas priludata timige-mistika novelo far Gogol «Vij».

Kaj samminute ekaŭdiĝis sonoro de la vestibla horloĝo. «Bamm!» – batis la horloĝo.

Hurloj kaj kriĉoj ekstremigis la vitran atelieron. Asistantoj, konsilistoj, ekspertoj kaj redaktoroj-muntistoj ruliĝis soben sur la ŝtuparoj. Ĉe elira pordo komenciĝis baraktado.

«Bamm! Bamm!» batis la horloĝo.

Silento eliradis el anguloj. Malaperis gardantoj de granda stampilo, fakestroj pri komoj, administrantoj kaj adjutantinoj. Lastfoje preterhastis balailo de la kurieristino. «Bamm!» – batis la horloĝo kvaran fojon.

En la ateliero estis jam neniu. Kaj nur ĉe pordo, kroĉiĝinte je la kupra manilo per la jaka poŝo, plende ĵetiĝis la asistanto-aspiranto en blua pantalono. Li jelpis, kaj fosis per la hufetoj la marmoran plankon. La labora tago pe-iĝis. De mara bordo, el fiŝista vilaĝo, venis krio de koko.

Kiam antilopa kaso pleniĝis per kinomono, aŭtoritato de la komandanto, iom paliĝinta post forkuro de Korejko, plifortiĝis. Al Panikovskij estis donita negranda sumo por kefiro, kaj estis promesitaj oraj dentarprotezoj. Al Balaganov Ostap aĉetis jakon kaj, aldone al ĝi, ledan monujon, knarantan kiel selo. Kvankam la monujo estis malplena, Ŝura ofte elpoŝigis kaj enrigardis ĝin. Kozleviĉ ricevis kvindek rublojn por aĉeti benzinon.

Antilopanoj vivis pure, konsciencie, preskaŭ

vilaĝe. Ili helpis al administranto de la kamparan-gastejo subteni ordon, kaj informiĝis pri prezoj de hordeo kaj acidkremo. Panikovskij eniris iam la korton, zorgeme malfermis buŝon de plej proksima tirbesto, pririgardis la dentojn, kaj murmuris: «Bona ĉevalo», kvankam antaŭ li staris bona ĉevalino.

Nur la komandanto malaperadis tuttage kaj, kiam venis en la kamparan-gastejon, estis gaja kaj distriĝa. Li alsidis la amikojn, kiuj trinkis teon en malpura vitra galerio, metis sur la genuon sian fortan piedon en ruĝa ŝuo, kaj diris amike:

– Ĉu vere vivo estas bela, Panikovskij, aŭ tio nur ŝajnas al mi?

– Sed kie vi frenezadas? – ĵaluze demandis rompanto de la konvencio.

– Maljunulo! Tiu ĉi junulino ne estas por vi, – respondis Ostap.

Dum tio Balaganov kunsente ridegis kaj pririgardis la novan monujon, kaj Kozleviĉ ridetis en siajn konduktorajn lipharojn. Li jam ne unufoje veturigis na Zosja sur Ĉemara ŝoseo.

La vetero favoris al amo. La tolaj veŝtoj asertis ke tia aŭgusto ne okazis eĉ de tempo de «*porto-franko*». Nokto montris puran teleskopan ĉielon, kaj tago alruligis en la urbon freŝigan maran ondon. Kortistoj, ĉe siaj pordegoj, vendis striajn monaĥejajn akvomelonojn, kaj civitanoj penegadis, premante la akvomelonojn je la

polusoj, kaj mallevente la orelon por ekaŭdi deziratan krakon. Dum vesperoj de sportaj kampoj revenis ŝvitaj kaj feliĉaj piedpilkistoj. Post ili, suprenigante polvon, kuris knaboj. Ili montris per la fingroj faman golulon, kaj iam eĉ levis lin sur la ŝultrojn kaj portis estime.

Foje vespere la komandanto avertis personaron de «Antilopo» ke morgaŭ okazos granda distra eksterurba promenado kun disdono de donacoj.

– Ĉar nian porinfanan matenprezentadon vizitos unu junulino, – diris Ostap multsignife, – mi petus la sinjorojn volontulojn lavi la vizaĝojn, purigi sin kaj, grave, dum la veturo ne uzadi krudajn vortojn.

Panikovskij tre ekscitiĝis, elpetis de la komandanto tri rublojn, haste vizitis banejon, kaj poste tutan nokton purigis kaj gratis sin kiel soldato antaŭ parado. Li ellitiĝis antaŭ ĉiuj, kaj tre rapidigis na Kozleviĉ. Antilopanoj mire rigardis na Panikovskij. Li estis razita, pudrigita tiel, ke similis eks-anonciston. Li ĉiuminute ordigis sur si la jakon, kaj malfacile turnis la kolon en oskar-ŭajlda (Oskar Wild-a) kolumo.

Dum la promeno Panikovskij tenis sin tre strikte. Kiam oni konatigis lin kun Zosja, li elegante kliniĝis, sed dum tio tiel konfuziĝis, ke ruĝiĝis eĉ pudro sur liaj vangoj. Sidante en la aŭto li subtiris maldekstran piedon, kaŝante la ŝiritan boteton, el kiu elrigardis la granda

piedfingro. Zosja estis en blanka robo, ĉirkaŭkudrita per ruĝa fadeno. Antilopanoj tre ekplaĉis al ŝi. Ŝin ridigis kruda Ŝura Balaganov, kiu tutan vojon kombis sian hararon per kombilo "Sobinov". Sed iam li purigis la nazon per la fingro kaj, post tio, nepre elpoŝigis la naztukon kaj lactenere ventumis sin. Adam Kazimiroviĉ instruis na Zosja stiri na «Antilopo», per kio ankaŭ li gajnis ŝian favoron. Iom konfuzis ŝin Panikovskij. Ŝi opiniis ke li ne parolas kun ŝi pro la fiero. Sed plej ofte ŝi haltis sian rigardon sur medala vizaĝo de la komandanto.

Dum sunsubiro Ostap disdonis promesitajn donacojn. Kozleviĉ ricevis brelok-kompason, kiu tre konvenis al ties dika arĝenta horloĝo. Al Balaganov estis prezentita "Leg-deklamisto" en imit-leda kovrilo, kaj al Panikovskij – rozkolora kravato kun bluaj floroj.

– Kaj nun, amikoj miaj, – diris Bender, kiam «Antilopo» revenis en la urbon, – mi kaj Zosja Viktorovna iom promenados, kaj al vi venis tempo reveni la kamparanan gastejon kaj lu-lu-iĝi.

Jam endormiĝis la kamparana gastejo, Balaganov kaj Kozleviĉ eligis jam arpeĝon per la nazoj, sed Panikovskij, kun nova kravato sur la kolo, vagis inter la ĉaroj, tordante la manojn en muta angoro.

– Kia femino! – flustris li. – Mi amas ŝin kiel sian filinon!

Ostap sidis kun Zosja sur ŝtupoj de muzeo de antikvaĵoj. Sur la placo, pavimita per lafo, promenadis junaj homoj, amindumante kaj ridante. Post vico da platanoj lumiĝis fenestroj de internacia klubo de maristoj. Alilandaj matrosoj en molaj ĉapeloj promenadis duope, triope, interŝanĝante mallongajn rimarkojn.

– Kial vi ekamis min? – demandis Zosja, tuŝante na Ostap je la mano.

– Vi estas tenera kaj mirinda, – respondis la komandanto, – vi estas plej bona en la mondo.

Longe kaj silente sidis ili en nigra ombro de la muzeaj kolonoj, pensante pri sia eta feliĉo. Estis varme kaj mallume kiel inter manplatoj.

– Ĉu vi memoras, mi rakontis al vi pri Korejko? – diris Zosja subite. – Pri tiu kiu proponis edziniĝon al mi.

– Jes, – diris Ostap distriĝe.

– Li estas tre amuza homo, – daŭrigis Zosja. – Ĉu vi memoras, mi rakontis al vi kiel neatendite li forveturis.

– Jes, – diris Ostap pli atente, – li estas tre amuza.

– Imagu, hodiaŭ mi ricevis de li leteron, tre amuzan...

– Kio? – kriis la amanto, leviĝante de la loko.

– Ĉu vi ĵaluzas? – ruzete demandis Zosja.

– M-m, iomete. Kion do skribas al vi tiu ĉi vulgarulo?

- Li tute ne estas vulgarulo. Li simple estas tre malfeliĉa kaj kompatinda homo. Sidu, Ostap. Kial vi ekstaris. Serioze, mi tute ne amas lin. Li petas min veturi al li.

- Kien, kien veturi? - kriis Ostap. - Kie li estas?

- Ne, mi ne diros al vi. Vi estas ĵaluzulo. Vi, povas okazi, eĉ mortigos lin.

- Ja pri kio vi, Zosja! - singarde diris la komandanto. - Simple estas interese scii kie homoj scipovas aranĝi sian vivon.

- Ho, li estas tre malproksima! Li skribas ke trovis tre profitan servon, ke ĉi tie oni pagis al li malmulte. Li estas nun en konstruo de Orienta Ĉefvojo.

- En kiu loko?

- Je mia vorto, vi estas tro scivola! Ne decas esti tia Otelo!

- Je Dio, Zosja, vi ridigas min. Ĉu mi similas tiun ĉi maljunan kaj stultan maŭron? Simple estus interese scii en kiu parto de Orienta Ĉefvojo oni sukcesas ordiĝi.

- Mi diros, se vi volas. Li laboras estiel registristo en Norda instala urbeto, - milde diris la junulino, - sed ĝi nur nomiĝas tiel: urbeto. Fakte tio estas trajno. Aleksandr Ivanoviĉ tre interese priskribis al mi tion. Tiu ĉi trajno surmetas relojn. Ĉu vi komprenas? Kaj sur samaj reloj ĝi moviĝas. Kaj renkonten al ĝi, de sudo, iras alia, simila urbeto. Post nelonge ili

renkontiĝos. Kaj tiam okazos solena realkuniĝo. Kaj ĉio tio okazas en dezerto, li skribas, kameloj... interese, ĉu?

– Eksterordinare interese, – diris la granda kombinanto, kurante sub la kolonoj. – Ĉu vi scias, Zosja, mi devas iri. Estas jam malfrue. Kaj malvarme. Kaj, entute, iru ni!

Li levis na Zosja de la ŝtupoj, kondukis ŝin sur la placon, kaj ĉi tie konfuziĝis.

– Ĉu vi ne akompanos min hejmen? – maltrankvile demandis la junulino.

– Kio? – diris Ostap. – Ha, hejmen? Ĉu vi scias, mi...

– Bone, – seke diris Zosja, – ĝis revido. Kaj plu ne venu al mi. Ĉu vi aŭdas?

Sed la granda kombinanto aŭdis jam nenion. Nur pe-kurinte kvartalon li haltis.

– Tenera kaj mirinda! – elmurmuris li.

Ostap returnis kaj ekkuris post la amatino. Ĉirkaŭ du minutoj kuregis li sub la nigraj arboj. Poste li denove haltis, demetis la ŝipestran kaskedon kaj ekpaŝis surloke.

– Ne, tio ne estas Rio-de-Ĵanejro! – diris li fine.

Li faris ankoraŭ du hezitajn paŝojn, denove haltis, surkapigis la kaskedon kaj, jam ne rezonante, ekkuregis en la kamparan-gastejon.

Samnokte el pordoj de la kamparan-gastejo, pale lumante per la antaŭaj lanternoj, elveturis «Antilopo». Dormema Kozleviĉ pene turnadis la

stiran radon. Balaganov, dum la mallongaj preparoj, sukcesis ekdormi en la aŭto, Panikovskij malgaje movis la okuletojn, tremetante pro la nokta malvarmeto. Sur lia vizaĝo ankoraŭ videblis restaĵoj de la festa pudro.

- La karnavalo finiĝis! - kriis la komandanto, kiam «Antilopo», frapante, subveturis la relvojan ponton. - Komenciĝas rigora ĉiutageco.

Kaj en ĉambro de la maljuna rebusisto ĉe bukedo de sekiĝintaj rozoj ploris la tenera kaj mirinda.

Ĉapitro 25

Tri vojoj

«Antilopo» fartis malbone. Ĝi haltis eĉ sur facilaj ascendoj, kaj senvole ruliĝis malantaŭen. En la motoro aŭdiĝis nekutimaj bruoj kaj raŭkoj, kvazaŭ sub flava kapoto de la aŭto oni sufokas iun. La aŭto estis troŝarĝita. Krom la personaro ĝi portis sur si grandan provizon da karburajo. En kanistroj kaj botelegoj, kiuj plenigis ĉiun liberan lokon, gluglis benzino. Kozleviĉ balancis la kapon, premis la gaspedalon, kaj ĉagrene rigardis na Ostap.

- Adam, - diris la komandanto, - vi estas nia patro, ni - viaj infanoj. Direktiĝu al oriento! Ĉe vi estas perfekta naviga brelok-kompaso. Ne perdu la direkton!

Antilopanoj ruliĝis jam trian tagon sed, krom Ostap, neniu sciis ĝuste celon de la nova vojaĝo. Panikovskij angore rigardis la vilajn maizajn kampojn, kaj nekuraĝe lispis:

– Por kio ni denove veturas? Por kio ĉio ĉi tio? Tiel bone estis en Nigramarsk.

Kaj ĉe elmemoro pri la rava femino li konvulsie suspiris. Krom tio li volis manĝi, sed nutraĵo forestis: finiĝis la mono.

– Antaŭen! – respondis Ostap. – Ne lamentu, oldulo. Vin atendas oraj dentarprotezoj, diketa vidvineto, kaj plena baseno da kefiro. Al Balaganov mi aĉetos matrosan kostumeton kaj sendos lin en lernejon de unua ŝtupo. Tie li lernos legi kaj skribi, kio en lia aĝo estas absolute necesa. Kaj Kozleviĉ, nia fidela Adam, ricevos novan aŭton. Kiun vi preferas, Adam Kazimiroviĉ? Ĉu na «Studebeker»? Ĉu na «Linkoln»? Na «Rojs»? Ĉu na «Hispano-suizo»?

– Na «Izota-fraskini», – diris Kozleviĉ, vangruĝinte.

– Bone. Vi ricevos ĝin. Ĝi nomiĝos «Antilopo la dua» aŭ «Filino de Antilopo», laŭ via deziro. Kaj nun ni ne senkuraĝiĝu. Per nutraĵo mi vin provizos. Jes, mia valizeto forbrulis, tamen restis la brulrezistaj ideoj. Se estos ege malbone, ni haltos en iu feliĉa urbeto, kaj ordigos tie sevilan taŭrobatalon. Panikovskij estos pikadoro. Tio sola elvokos malsanan intereson ĉe publiko kaj, sekve, eĝan profiton.

La aŭto moviĝis sur vasta vojo, signita per spuroj de traktoraj spronoj. Subite la ŝoforo bremsis.

– Kien veturi? – demandis li. Triopo da vojoj.

La pasaĝeroj elaŭtiĝis kaj, malrigidante la senfortiĝintajn kruojn, ekiris iom antaŭen. Ĉe la voja disbranĉiĝo oblikve staris ŝtonego, sur kiu sidis dika korvo. Platiĝinta suno malleviĝis en post maizaj vilaĝoj. Mallarĝa ombro de Balaganov foriris al horizonto. La teron tuŝetis nigra farbo, kaj avana stelo ĝustatempe signalis pri veno de nokto.

Antaŭ antilopanoj sternaĝis tri vojoj: asfalta, gruza kaj grunda. Asfalto ankoraŭ flaviĝis pro la suno, blua vaporo staris super la gruzo vojo, la grunda vojo estis tute malluma, kaj perdiĝis en la kampo tuj post la ŝtono. Ostap alkriis la korvon, kiu tre ektimis, sed ne forflugis. Li vagadetis enpenŝiĝe ĉe la voj-disbranĉiĝo kaj diris:

– Konferencon de rusaj kavaliroj mi deklaras malfermita.

Ĉeestantoj: Ilja el Murom – Ostap Bender; Dobrynja Nikitiĉ – Balaganov; kaj Aloŝa Popoviĉ – estimata per ni ĉiuj Miĥail Panikovskij.

http://en.wikipedia.org/wiki/File:Die_drei_Bogatyr.jpg> («Tri kavaliroj»)

Kozleviĉ, uzante la halton, engrimpis sub na «Antilopo» kun universala deŝtraŭbilo, kaj tial ne estis inkluzivita en aron da kavaliroj.

– Kara Dobrinja, – diris Ostap, – bonvolu stari dekstre! *Mesje* Popoviĉ, prenu vian lokon maldekstre! Almetu la plandojn al viaj fruntoj kaj enrigardu antaŭen.

– Por kio tiuj ĉi ŝercoj? – indigniĝis Aloŝa Popoviĉ. – Mi estas malsata. Rapidu ni ien!

– Hontu, kara Aloŝa, – diris Ostap, – staru kiel decas al sagaa kavaliro. Kaj enpenŝigu. Rigardu kiel Dobrinja kondutas sin. De li oni povas eĉ nun verki sagaon. Do, kavaliroj, sur kiu el la vojoj ni veturu? Sur kiu el ili kuŝaĉas mono, bezonata al ni por kurantaj elspezoj? Mi scias, Kozleviĉ veturus sur la asfalto, ŝoforoj ŝatas bonajn vojojn. Sed Adam estas honesta homo, li malbone konas vivon. Kavaliroj ne bezonas asfalton. Ĝi gvidas, verŝajne, al iu greneja giganto. Ni perdiĝos tie en bruoj de maŝinoj. Tie nin povas eĉ pe-premi iu «Katerpiler» aŭ kombajno. Morti sub kombajno estas enue. Ne, kavaliroj, ni ne veturu sur la asfalta vojo. Nun – la gruzo ŝoseo. Kozleviĉ, certe, ankaŭ de ĝi ne rifuzus. Sed kedu al Ilja el Murom: ŝoseo ne taŭgas al ni. Ni ne veturu tiun ĉi vojon, eĉ se oni akuzos nin pri malprogresemo. La intuicio antaŭdiras al mi renkonton kun malĝentilaj kolĥozanoj kaj kun ceteraj imitindaj civitanoj. Krom tio ili ne havas

nun tempon por ni. Sur iliaj komunigitaj teroj
vagas nun multnombraj literaturaj kaj muzikaj
brigadoj, kolektante materialojn por agro-
poemoj kaj legom-ĝardenaj kantatoj. Restas la
grunda vojo, civitanoj kavaliroj! Jen ĝi estas,
antikva fabela vojo, sur kiu veturos nia
«Antilopo». Ĉi tie ĝi troviĝas, animo rusa! Rusio
mem odoras ĉi tie! Ĝis nun flugas ĉi tie fabela
fajra sed jam estingiĝanta birdo, kaj homoj de
nia profesio povas tempo de tempo akiri orajn
plumetojn de ĝi. Ĉi tie ankoraŭ sidas sur siaj
kofroj **kulako Kasĉej**²⁴, kiu opiniis sin senmorta,
kaj nun, kun teruro, konvinkiĝis ke venas fino al
li. Sed ni, herooj, ankoraŭ povas ricevi ion de li,
precipe se ni prezentos nin vagantaj monaĥoj.
Vidpunkte de voja tekniko tiu ĉi fabela vojo
estas abomena. Sed alia vojo forestas por ni.
Adam! Ni veturu!

Kozleviĉ malgaje ekgvidis la aŭton sur la
grunda vojo, kie ĝi tuj komencis desegni
kurbaĵojn, kliniĝi flanken kaj suprenĵeti la
pasaĝerojn. Antilopanoj kaptis unu la alian,
premiĝe blasfemis, kaj frapiĝis per la genuoj je
la firmaj kanistroj.

– Mi volas manĝi, – ĝemis Panikovskij. – Mi

24. Kulako Kasĉej: la aŭtoroj komparas fabelan negativan
personaĵon Kasĉej-senmorta kun tiamaj «riĉaj»
kampanoj (kulakoj), de kiuj oni komencis jam forpreni
tutan ilian havaĵon kun tutfamilia forsendo en Siberion.
Teroj, brutoj kaj laborrimedoj de aliaj kampanoj estis
«kolektivigitaj».

volas anseron! Kial ni forveturis el Nigramarsk?

La aŭto jelpis, elŝirante sin el la profunda vojsulko, kaj denove falante en ĝin.

– Tenu vin, Adam! – kriis Bender. – Spite al ĉio tenu vin! Tasko de «Antilopo» estas veturigi nin ĝis Orienta Ĉefvojo, kaj tiam ni premioj ĝin per oraj pneŭoj kun glavoj kaj bantoj!

Kozleviĉ ne aŭskultis. Pro la frenezaj ĵetiĝoj la stirilo forŝiriĝis el liaj manoj. Panikovskij daŭrigis angori.

– Bender, – ekraŭkis li subite, – vi scias kiel mi estimas vin, sed vi komprenas nenion! Vi ne scias kio estas ansero! Ho, kiel mi ŝatas tiun ĉi birdon! Tio estas mirinda grasa birdo, je mia honora nobla vorto. Ansero! Bender! Flugileto! Koleto! Krureto! Ĉu vi scias, Bender, kiel mi kaptas anseron? Mi mortigas ĝin kiel matadoro, – per unu bato. Tio estas opero, kiam mi iras kontraŭ ansero! «Karmen»!..

– Scias, – diris la komandanto, – vidis ni en Arbatov. Mi ne konsilas ripeti.

Panikovskij eksilentis, sed jam post minuto, kiam nova puŝo de la aŭto ĵetis lin sur Bender, denove ekaŭdiĝis lia delira flustro:

– Bender! Ĝi promenas sur vojo. Ansero! Tiu ĉi mirinda birdo promenas, sed mi staras kaj faras aspekton ke tio ne koncernas min. Ĝi alvenas. Nun ĝi siblos sur min. Tiuj birdoj opinias ke ili estas plej fortaj, kaj tio estas ilia malforta eco!..

Nun la rompanto de la konvencio preskaŭ ekkantis:

- Ĝi iras sur min, kaj siblas kvazaŭ gramofono. Sed mi ne estas unu el timuloj. Iu ajn sur mia loko forkurus, sed mi staras kaj atendas. Jen ĝi alvenas kaj etendas la kolon, blankan anseran kolon kun flava beko. Ĝi volas mordi min. Rimarku, Bender, morala avantaĝo estas sur mia flanko. Ne mi atakis ĝin, ĝi min atakas. Kaj tiam, defendante min, mi ĝin kapt...

Sed Panikovskij ne sukcesis pe-i sian paroladon. Ekaŭdiĝis terura naŭziga krako, kaj antilopanoj, dum sekundo, trovis sin sur la vojo en plej diversaj pozoj.

Piedoj de Balaganov elstaris el la voj-defluilo. Sur ventro de la granda kombinanto kuŝis kanistro kun benzino. Panikovskij ĝemis, iom premita per risorto. Kozleviĉ leviĝis kaj, ŝanceliĝante, faris kelkajn paŝojn. «Antilopo» forestis. Sur la vojo kuŝaĉis monstra amaso da rompaĵoj: piŝtoj, kusenoj, risortoj. Kupraj intestetoj brilis sub la luno. Disfalinta karoserio deŝoviĝis en la defluilon kaj kuŝis apud rekonsciiĝinta Balaganov. La ĉeno enrampadis la vojsulkon kvazaŭ vipuro. En veninta silento ekaŭdiĝis alta sonoro, kaj de iu altaĵeto alruliĝis rado, verŝajne malproksimen ĵetita per la frapo. La rado desegnis arkon, kaj mole ekkuŝis ĉe piedoj de Kozleviĉ. Nur tiam la ŝoforo komprenis ke ĉio finiĝis. «Antilopo» pereis.

Смерть Антилопы («Morto de Antilopo»)

Adam Kazimiroviĉ eksidis sur la teron, kaj kaptis la kapon per la manoj. Post kelkaj minutoj la komandanto tuŝis lian ŝultron, kaj diris per aliĝinta voĉo:

– Adam, ni devas iri.

Kozleviĉ leviĝis, kaj tuj sobiĝis sur saman lokon.

– Ni devas iri, – ripetis Ostap. – «Antilopo» estis fidela aŭto, sed en mondo estas ankoraŭ multe da aŭtoj. Post nelonge vi povos elekti iun ajn. Iru, ni devas rapidi. Ni devas trovi noktejon, manĝi, akiri monon por biletoj. Ni devos veturu longe. Iru, ni iru, Kozleviĉ! Vivo estas belega, malgraŭ kelkaj ĝiaj mankoj. Kie estas Panikovskij? Kie estas tiu ĉi anser-ŝtelisto? Ŝura! Kondutu na Adam!

Ili ektiris na Kozleviĉ, tenante lin je la brakoj. Li sentis sin kiel rajdanto ĉe kiu, pro lia kulpo, pereis la ĉevalo. Al li ŝajnis ke nun ĉiuj piedirantoj ridos pri li.

Post pereco de «Antilopo» la vivo tuj komplikiĝis. Ili devis noktumi en kampo.

Ostap tuj kolere ekdormis, ekdormis ankaŭ Balaganov kaj Kozleviĉ, sed Panikovskij la tutan nokton sidis ĉe la fajro, kaj tremis.

Antilopanoj leviĝis dum mateniĝo, sed plej proksiman vilaĝon ili pene atingis nur ĝis la dek-sesa. La tutan vojon Panikovskij tiriĝis

malantaŭe. Li lametis. Pro la malsato liaj okuloj akiris katan brilon, kaj li senĉese plendis pri sia sorto kaj pri la komandanto.

En la vilaĝo Ostap ordonis al la personaro atendi sur Tria strato, deiri nenien, kaj direktiĝis en la Unuan, en la vilaĝestrejon. De tie li revenis sufiĉe rapide.

– Ĉio estas aranĝita, – diris li per pli gaja voĉo, – nun oni loĝigos nin kaj donos tagmanĝon. Post la tagmanĝo ni dorlotos nin sur fojno. Ĉu vi memoras: lakto kaj fojno? Kaj vespere ni donos spektaklon. Mi jam vendis ĝin per dek kvin rubloj. La mono estas ricevita. Ŝura! Vi devos deklami ion el «Leg-deklamisto», mi montros antireligiajn kartajn trukojn, kaj Panikovskij... Sed kie estas Panikovskij? Kien li malaperis?

– Li ĵus estis ĉi tie, – diris Kozleviĉ.

Sed tiam, post plektobarilo apud kiu staris antilopanoj, ekaŭdiĝis ansera gakado kaj kamparanina jelpo, ekflugis blankaj plumoj, kaj en la straton elkuris Panikovskij. Verŝajnas ke mano malfidelis al la matadoro, kaj li, defendante sin, aplikis kontraŭ la birdo malĝustan baton. Post li kuris la mastrino, svingante ŝtipon.

<http://petrov.com.ua/GoldCalf/pages/51.htm>

(«Kiam mi iras kontraŭ ansero»)

– Mizera sensignifa virino! – kriis

Panikovskij, – impetante for el la vilaĝo.

– Kia fiulo! – kriis Ostap, ne kaŝante la ĉagrenon. – Tiu ĉi kanajlo fiaskigis nian spektaklon. Kuru ni, ĝis oni ne reprenis la dek kvin rublojn.

Dume la kolerigita mastrino kuratingis na Panikovskij, lertiĝis, kaj frapis lian spinon per la ŝtupo. Rompanto de la konvencio falis sur la teron, sed tuj leviĝis, kaj ekkuris nenature rapide. Okaziginte tiun ĉi akton de revenĝo, la mastrino ĝoje turniĝis reen. Preterkurante antilopanojn ŝi minacis al ili per la ŝtupo.

– Nun nia aktora kariero finiĝis, – diris Ostap, – per rapidaj paŝoj lasante la vilaĝon. – Tagmanĝo, ripozo, ĉio ruiniĝis.

Na Panikovskij ili atingis nur post ĉirkaŭ tri kilometroj. Li kuŝis en voja defluilo, kaj laŭte plendis. Pro laco, timo kaj doloro li paliĝis, kaj la multnombraj maljunulaj vangruĝoj lasis lian vizaĝon. Li estis tiom kompatinda, ke la komandanto nuligis la venĝon kiun li intencis efektiviĝi.

– Frapetis oni na Aloŝa Popoviĉ je la fortega dorsego lia! – diris Ostap, preterirante.

Ĉiuj alrigardis na Panikovskij kun abomeno. Kaj li denove ektiriĝis post la kolono, ĝemante kaj balbutante:

– Atendu min, ne rapidu. Mi estas maljuna, malsana, mi fartas malbone!.. Ansero! Femureto! Koleto! Femina!.. Mizeraĵ sensignifaj

homoj!

Sed antilopanoj tiel kutimis al plendoj de la maljunulo, ke ne atentis ilin. La malsato pelis ilin antaŭen. Neniam estis al ili tiel malvaste kaj neoportune en la mondo. La vojo tiriĝis senfine, kaj Panikovskij postrestis pli kaj pli. La amikoj jam sobiĝis en nevastan flavan valon, sed rompanto de la konvencio daŭre nigriĝis sur monteta spino sur fono de verdeta krepuska ĉielo.

– La oldulo ekestis neeltenebla, – diris malsata Bender. – Oni devas maldungi lin. Iru, Ŝura, altiru tiun ĉi simululon!

Malkontenta Balaganov iris plenumi la taskon. Dum li surkuris la altaĵeton, figuro de Panikovskij malaperis.

– Io okazis, – diris Kozleviĉ post ioma tempo, rigardante spinon de la altaĵeto, de kiu Balaganov semaforis per la manoj.

La ŝoforo kaj la komandanto leviĝis supren.

Rompanto de la konvencio kuŝis meze de la vojo senmove, kiel pupo. Rozkolora strio de la kravato oblikve strekis lian bruston. Unu lia mano estis enigita sub la dorson. Liaj okuloj impertinente rigardis la ĉielon. Panikovskij estis morta.

– Paralizo de la koro, – diris Ostap, por diri eĉ ion. – Tion mi povas difini sen stetoskopo. Kompatinda maljunulo!

Li deturniĝis. Balaganov ne povis demeti

sian rigardon de la mortinto. Subite lia vizaĝo tordiĝis, kaj li diris malfacile:

– Sed mi batis lin pro la peziloj. Ankaŭ pli antaŭe ni interbatiĝis.

Kozleviĉ elmemoris na pereinta «Antilopo», kun teruro ekrigardis na Panikovskij, kaj ekkantis latinan preĝon.

– Ĉesu, Adam! – diris la granda kombinanto. – Mi scias ĉion kion vi intencas fari. Post la psalmo vi diros: «Dio donis, Dio prenis», poste: «Ĉiuj ni sub Dio iras», kaj poste ankoraŭ ion sensencan, ekzemple: «Tamen al li estas nun pli bone ol al ni». Ĉio tio ne estas bezonata, Adam Kazimiroviĉ. Antaŭ ni staras simpla tasko: la korpon oni devas fordoni al tero.

Estis jam tute malfrue kiam por la rompanto de la konvencio ekestis trovita lasta azilo. Tio estis natura tombo, elpluvigita ĉe bazo de vertikale staranta ŝtona plato. Verŝajnas ke delonge staras tiu ĉi plata ŝtonego ĉe la vojo. Povas esti ke iam plibeligis ĝin surskribo: «Tio estas posedejo de bienulo eksmajoro Georgij Afanasjeviĉ Lupo-Vulpickij», sed eblas ke tio estis simple antikva interkampara signo, sed tio tute ne estis grava. Panikovskij estis metita en la kavon, kaj superŝutita per tero, elfosita per bastonoj. Poste antilopanoj surprimis per la ŝultroj la ŝtonegon, pro la tempo starantan ne tro fortike, kaj faligis ĝin soben. Nun la tombo ekestis preta. Ĉe ekflamo de alumetoj la granda

kombinanto per peco de briko surskribis sur la ŝtonego epitafon:

**ĈI TIE KUŜAS
MIĤAIL SAMUELEVIĈ PANIKOVSKIJ
HOMO SEN PASPORTO**

Ostap demetis sian ŝipestran kaskedon kaj diris:

– Mi ofte estis maljusta al la mortinto. Sed ĉu estis la mortinto morala homo? Ne, li ne estis morala. Tio estis iama blindulo, falsnomulo kaj anser-ŝtelisto. Ĉiujn siajn fortojn li eluzis por vivi je kosto de komunumo. Sed komunumo ne volis ke li vivu je ĝia kosto. MiĤail Samueleviĉ ne povis toleri tiujn ĉi kontraŭ-opiniojn, ĉar li havis kolereman karakteron. Tial li mortis. Ĉio!

Kozleviĉ kaj Balaganov restis malkontentaj per la ĉetomba parolado de Ostap. Ili opiniis ke estus pli ĝustaloke se la granda kombinanto priparolus bonajn agojn kiujn la mortinto okazigis al komunumo, pri lia helpo al malriĉuloj, pri sentema animo de la mortinto, pri lia amo al infanoj, kaj ankaŭ pri ĉio tio kion oni atribuas al ĉiu mortinto. Balaganov eĉ alvenis la tombon por diri tion, sed la komandanto jam surmetis la kaskedon, kaj malproksimiĝis per rapidaj paŝoj.

Kiam restaĵoj de antilopana armeo transiris la valon, kaj suriris alian altaĵeton, tuj post ĝi aperis eta fervoja stacio.

– Jen estas civilizacio, – diris Ostap, – eblas

bufedo, manĝo. Ni dormu sur la benkoj. Matene ni ekmoviĝu orienten. Kion vi opinias? La ŝoforo kaj la ĉefmekanikisto silentis.

– Kial vi silentas kvazaŭ fianĉoj?

– Ĉu vi scias, Bender, – diris fine Balaganov, – mi ne veturos. Vi ne ofendiĝu, sed mi ne kredas. Mi ne scias kien oni devas veturi. Ni ĉiuj pereos tie. Mi restas.

– Ĝuste tion mi volis diri al vi, – subtenis Kozleviĉ.

– Kiel vi volas, – rimarkis Ostap kun subita sekeco.

Bufedo en la stacio forestis. Brulis granda kerosena lampo. En pasaĝera halo dormetis sur la sakoj du kamparaninoj. Tuta fervoja personaro vagadis sur la ligna kajo, maltrankvile enrigardante antaŭmatenan mallumon post la semoforo.

– Kiu trajno? – demandis Ostap.

– Speciala, – nerveze respondis la staciestro, ordigante la ruĝan kaskedon kun arĝenta pasamento. – De specifa destino. Ĝi estas haltigata por du minutoj. La disvojiĝo ne donas la permeson.

Ekaŭdiĝis obtuza bruo, ekstremis dratoj, el la bruo elkoviĝis lupaj okuletoj, kaj mallonga brila trajno svinge enflugis la stacion. Eklumiĝis vastaj vitroj de la litvagonoj, antaŭ antilopanoj preterkuris bukedoj kaj vinboteloj de vagono-restoracio, dum la veturo desaltis konduktoroj

kun la lanternoj, kaj la kajo tuj pleniĝis per gaja rusa kaj alilanda parolado. Sur la vagonoj pendis koniferpinglaj arkoj kaj sloganoj: – «Saluton al herooj konstruantoj de Orienta Ĉefvojo!» La speciala trajno kun gastoj iris al malfermo de la fervojo.

La granda kombinanto malaperis. Post duonminuto li denove aperis kaj ekflustris:

– Mi veturas! Kiel, mi ne scias, sed mi veturas! Ĉu vi volas kun mi? Lastfoje mi demandas.

– Ne, – diris Balaganov.

– Mi ne veturos, – diris Kozleviĉ, – mi ne povas plu.

– Sed kion vi faros?

– Kion mi povas fari? – respondis Ŝura. – Iru mi esti filo de leŭtenanto Ŝmit, jen kion.

– Kaj mi intencas remunti na «Antilopo», – plende diris Adam Kazimiroviĉ, – iru mi al ĝi, rigardu, riparu ĝin.

Ostap volis diri ion, sed longa fajfo ŝtopis lian buŝon. Li altiris al si na Balaganov, karesis lian dorson, interkisis kun Kozleviĉ, svingis la manon, kaj ekkuris al la trajno, kies vagonoj jam kunpuŝiĝis pro unua puŝo de la vaporlokomotivo. Sed, ne ĝiskurante, li revenis, enŝovis en manon de Kozleviĉ dek kvin rublojn, ricevitajn por la vendita spektaklo, kaj sursaltis ŝtupeton de jam moviĝanta trajno.

Retrorigardante li ekvidis du etajn figurojn, en la violkolora mallumo suprenirantajn la taluson. Balaganov revenis maltrankvilan anaron de filoj de leŭtenanto Ŝmit. Kozlevič tiriĝis al restaĵoj de «Antilopo».

Parto tria

Privata persono

Ĉapitro 26

Pasaĝero de speciala trajno

Ĉe asfalta kajo de Rjazana stacidomo de Moskvo staris mallonga speciala trajno. Ĝi estis nur sesvagona: pakaĵa, kie kontraŭ kutimo troviĝis ne pakaĵoj, sed metitaj sur glacieron nutraĵoj, vagono-restoracio, el kiu elrigardis blanka kuiristo, kaj la registara. Restintaj tri vagonoj estis pasaĝeraj, kaj sur iliaj divanoj, kovritaj per krudtolaj striigitaj tegaĵoj, devis lokiĝi delegacioj de laboristoj-avangarduloj, kaj ankaŭ alilandaj kaj sovetiaj ĵurnalistoj.

La trajno prepariĝis iri al relkuniĝo de Orienta Ĉefvojo.

Oni anticipis longan vojaĝon. La avangarduloj enŝovis en enirejojn de la vagonoj siajn vojaĝajn korbojn kun nigraj seruretoj, pendantaj sur fera vergeto. Sovetia ĵurnalistaro vantis sur la kajo, svingante la lakitajn

kruclignajn valizetojn.

La alilandanoj observis la portistojn, kiuj transportis iliajn dikajn ledajn valizojn, kofrojn kaj kartonaĵojn kun koloraj etiketoj de turismaj oficejoj kaj ŝipaj firmaoj.

La pasaĝeroj jam sukcesis provizi sin per libro "Orienta Ĉefvojo", sur kies kovrilo estis desegnita kamelo, flaranta relon.

Экзотика ("Ekzotiko")

La libro vendiĝis samloke, de sur pakaĵa ĉareto. Aŭtoro de la libro, ĵurnalisto Palamidov, jam kelkfoje preteriris la ĉareton, ĵaluze rigardante la aĉetantojn. Oni opiniis lin spertulo pri Ĉefvojo, kien li veturis jam trian fojon.

Proksimiĝis tempo de la forveturo, sed nenio memorigis deiron de ordinara pasaĝera vagonaro. Sur la kajo forestis maljunulinoj, neniu elŝovis el la fenestro bebon, por ke ĝi lastfoje rigardu sian avon. Certe forestis ankaŭ la avo, en kies okuloj respegulas kutime timo antaŭ fervojaj trablovoj. Kaj, certe, neniu interkisis. Delegacion de laboristoj-avangarduloj venigis en la stacidomon sindikatuloj, kiuj ankoraŭ ne sukcesis pridiskuti problemon de adiaŭaj kisoj. Moskvajn ĵurnalistojn akompanis la redakciaj laboruloj, kutimiĝintaj ĉi-okaze limigi sin per manpremoj. Kaj alilandaj ĵurnalistoj, kvante tridek personoj, veturis al malfermo de Ĉefvojo komplete, kun la edzinoj

kaj gramofonoj, do estis neniu por akompani ilin.

Partoprenantoj de la ekspedicio, kongrue kun la momento, parolis pli laŭte ol kutime, senkaŭze kaptis siajn notlibrojn, kaj riproĉis la akompanantojn pro tio ke ili ne kunveturas en tiun ĉi interesan vojaĝon. Precipe bruis ĵurnalisto Lavuazjan. Li estis juna anime, sed en liaj bukloj, kiel luno en ĝangaloj, lumiĝis kalvaĵo.

– Estas abomene rigardi vin! – kriis li al la akompanantoj. – Ĉu vi kapablas kompreni kio estas Ĉeforienta fervojo!

Se manoj de arda Lavuazjan ne estus okupataj per granda tajpmaŝino en laktola fiakrista tegaĵo, li, povas esti, eĉ batus iun el la amikoj, tiel li estis pasia kaj fidela al afero de ĵurnala informado. Li jam nun volis sendi en sian redakcion urĝan telegramon, forestis nur pri kio.

Plimalbonigov, ano de sindikata organo, kiu unua venis en la stacion, nehaste promenadis laŭ la trajno. Li portis kun si na «Turkestana regiono, plena geografia priskribo de nia patrujo, surtabla kaj vojaĝa libro por rusoj», verko far Semjonov-Tjanŝanskij, eldonita en 1903-a jaro. Li haltis ĉe grupoj de veturontoj kaj adiaŭantoj, kaj kun iom satira noto en la voĉo diris:

– Ĉu vi forveturas? Nu, nu!

Aŭ:

– Ĉu vi restas? Nu, nu!

Ĉi-maniere li venis al antaŭo de la trajno, longe, retroklinante la kapon rigardis la vapor-lokomotivon kaj, fine, diris al la maŝinisto:

– Ĉu vi laboras? Nu, nu!

Poste ĵurnalisto Plimalbonigov foriris en la kupeon, malfermis lastan numeron de sia sindikat-organo, kaj dediĉis sin al lego de propra artikolo sub titolo «Plibonigu ni laboron de butikaj komisionoj» kun antaŭtitolo «Komisionoj rekonstruas sin nesufiĉe». La artikolo enhavis raporton pri iu kunsido. Kaj rilaton de la aŭtoro al la priskribita okazaĵo oni povus difini per unu frazo: «Ĉu vi kunsidas? Nu, nu!». Plimalbonigov legis ĝis la ekveturo mem.

Unu el la adiaŭantoj, homo kun rozkolora pluŝa nazo, kaj kun veluraj tempioj, prononcis profetaĵon, kiu ege timigis ĉiujn.

– Mi konas tiujn veturadojn, – deklaris li, – mi mem veturis. Via estonto estas konata al mi. Ĉi tie vi estas ĉirkaŭ centopaj. Veturados vi, entute, plenan monaton. Duopo el vi postrestos en eta izolita stacio sen mono kaj sen dokumentoj, kaj atingos vin nur post semajno, malsata kaj disŝirita. De iu oni nepre ŝtelos la valizon. Povas esti ke de Palamidov, aŭ de Lavuazjan, aŭ de Navrockij. Kaj la suferinto plendos dum la tuta vojaĝo, kaj petaĉos de la najbaroj razpenikon. La penikon li redonados

nelavitan, kaj la pelveton li perdos. Certe unu el la vojaĝantoj mortos, kaj amikoj de la mortinto, anstataŭ veturi al la relkuniĝo, estos devigataj transporti la karajn restaĵojn en Moskvon. Tio estas tre enue kaj abomene- transporti la restaĵojn. Krom tio dum la vojo komenciĝos kverelaĉo. KREDU AL MI! Iu el vi, eĉ sama Palamidov aŭ Plimalbonigov, faros antikomunuman agon. Kaj vi longe kaj angore juĝos lin, kaj li kun jelpoj kaj ĝemoj defendiĝos sin. Ĉion mi scias. Nun vi veturas en ĉapoj kaj kaskedoj, sed revenos vi en vertoĉapoj. Plej stulta el vi aĉetos plenan kirasveston de **buĥara**²⁵ judo: veluran ĉapon, randaĵitan per ŝakalo, kaj dikan vatan litkovrilon, kudritan kiel negliĝa mantelo. Kaj ĉiuj vi, certe, kantos en la vagono dum vesperoj pri ribelulo Stepan Razin, kaj stulte hurlos: «Kaj li ĵetis ŝin transranden en la ondojn de l' river'». Pli ol tio, eĉ alilandanoj kantos: «Sur patrin-rivero Volgo, *sjur notr mer Volga...*»

Lavuazjan ekkoleris, kaj batminacis per la tajpmaŝino.

– Vi envas nin! – diris li. – Ni ne kantos.

– Vi kantos, karaj miaj. Tio estas neeviteble. Ĉio estas sciata al mi.

– Ni ne kantos.

– Kantos. Kaj, se vi estas honestaj homoj,

25. Buĥara: urbo kaj, historie, emir-lando en nuna Uzbekio.

tuj sendu al mi poŝtkarton pri tio.

Ĉi-momente eksonis premiĝa krio. De tegmento de la pakaja vagono falis fotoĵurnalisto Menŝov. Li grimpis tien por fotografi momenton de la forveturo. Kelkajn sekundojn Menŝov kuŝis sur la kajo, tenante la fotografilon super la kapo. Poste li leviĝis, zorge kontrolis la obturilon de la aparato, kaj denove ekgrimpis sur la tegmenton.

– Ĉu vi faladas? – demandis Plimalbonigov, elŝoviĝinte el la fenestro kun la ĵurnalo.

– Ĉu tio estis falo! – malrespekte diris la fotoĵurnalisto. – Se vi vidus kiel mi falis de spirala sobiĝo en amuz-parko!

– Nu, nu, – rimarkis la reprezentanto de sindikat-organo, kaj malaperis post la fenestro.

Pe-grimpinte la tegmenton, kaj kaŭrinte sur unu genuon, Menŝov daŭrigis la laboron. Sur lin kun esprimo de tre vigla kontentiĝo rigardis norvega verkisto, kiu jam lokigis siajn aĵojn en la kupeo, kaj eliris sur la kajon promenadi. La verkisto havis helajn infanajn harojn, kaj grandan normanan nazon. La norvego estis tiel ravita per fotografista heroeco de Menŝov, ke eksentis bezonon dividi kun iu siajn sentojn. Per rapidaj paŝoj li alvenis maljunulon-avangardulon de Treĥgorka teksaĵ-fabriko, almetis sian montran fingron al lia brusto, kaj orelbore elkriis:

– Vi!!

Poste li montris propran bruston, kaj same orelbore elkriis:

– Mi!!

Eluzinte ĉi-maniere ĉiujn disponeblajn rusajn vortojn la verkisto afable smajlis, kaj kuris al sia vagono, ĉar sonis jam dua sonoro. Ankaŭ la avangardulo kuris al la sia. Menŝov surteriĝis. Ekklinadis kapoj, aperis lastaj smajloj, preterkuris felietonisto en palto kun nigra velura kolumo. Kiam vosto de la trajno balanciĝis jam ĉe elira relkomutilo, el bufedejo elsaltis du fratoj-ĵurnalistoj: Lev Ĉemizov kaj Jan Sidbenkov. En dentoj de Sidbenkov estis premita viena kotleto. La fratoj, saltante kiel junaj hundoj, impetis laŭ la kajo, desaltis sur la makulitan per nafto teron, kaj nur ĉi tie, inter ŝpaloj, komprenis ke atingi la trajnon ili ne scipovas.

Kaj la trajno, elkurante el la konstruata Moskvo, jam komencis sian surdigan kanton. Ĝi frapis per la radoj, infere ridegis sub pontoj, kaj nur okazinte inter ĉeurbaj arbaroj iom trankviliĝis, kaj atingis grandan rapidecon. Ĝia tasko estis desegni sur la globuso sufiĉe grandan arkon, ŝanĝi kelkajn klimatajn zonojn, translokiĝi el la mezlanda malvarmeto en varmegan dezerton, preterkuri multajn grandajn kaj malgrandajn urbojn, kaj devanci moskvan tempon je kvar horoj.

Vespere de la unua tago en vagono de

sovetiaj ĵurnalistoj aperis du senditoj de kapitalisma mondo: reprezentanto de liberpensanta aŭstria ĵurnalo sinjoro Hejnriĥ kaj usonano Ĥiram Burman. Ili venis konatiĝi. Sinjoro Hejnriĥ estis malalt-statura. Sur sinjoro Ĥiram estis mola ĉapelo kun supren fleksitaj ĉirkaŭrandoj. Ili ambaŭ parolis ruse sufiĉe bone kaj senerare. Iom da tempo ĉiuj silente staris en la koridoro, kun intereso pririgardante unu la alian. Por komenci oni ekparolis pri unu el moskvaj teatroj. Hejnriĥ laŭdis la teatron, kaj sinjoro Burman flankiĝe rimarkis ke en Sovetio lin, estiel cioniston, plej interesas juda problemo.

– Ĉe ni tiu ĉi problemo jam forestas, – diris Palamidov.

– Kiel povas foresti juda problemo? – miris Ĥiram.

– Forestas. Ne ekzistas ĝi.

Mister Burman ekscitiĝis. La tutan vivon skribis li en sia ĵurnalo artikolojn pri juda problemo, kaj separiĝi de ĝi estus al li dolore.

– Sed en Rusio estas judoj, ĉu? – diris li singarde.

– Estas, – respondis Palamidov.

– Do estas ankaŭ la problemo, ĉu?

– Ne. Judoj estas, sed la problemo – ne.

La elektro, akumuliginta en la vagona koridoro, estis iom malŝargita per apero de Plimalbonigov. Li iris en la lavejon kun viŝtuko

sur la kolo.

– Ĉu vi konversacias? – diris li, balanciĝante pro la trajna rapideco.– Nu, nu!

Kiam li revenis, pura kaj freŝa, kun gutoj da akvo sur la tempioj, la disputo kaptis jam la tutan koridoron. El kupeo eliris sovetiaj ĵurnalistoj, el najbara vagono venis kelkaj avangarduloj, venis ankoraŭ du alilandanoj: itala ĵurnalista kun faŝisma ĵetoneto, figuranta diktatoran faskon kaj hakileton, kaj germana profesoro-orientologo, kiu veturis al la solenaĵo laŭ invito de Socio pri kulturaj rilatoj kun alilando. Fronto de la diskuto estis tre vasta: de konstruo de socialismo en Sovetio ĝis viraj beretoj, modiĝintaj en Okcidento. Kaj pri ĉiuj temoj, senescepte, aperadis kontraŭopinioj.

– Ĉu vi disputas? Nu, nu, – diris Plimalbonigov, malproksimiĝante en sian kupeon.

En la komuna bruo oni povis distingi nur apartajn elkriojn.

– Se estas tiel, – diris sinjoro Hejnriĥ, kaptante laboriston Suvorov je la ĉemizo, – do kial vi jam dek tri jaroj nur babilas? Kial vi ne estigas tutmondan revolucion, pri kiu vi tiel multe parolas? Ĉu tio signifas ke vi ne povas? Do ĉesu babili!

– Sed ni ne intencas fari revolucion ĉe vi! Vi mem faros ĝin.

– Mi? Ne, mi ne faros revolucion.

– Do oni faros sen vi, kaj vin ne demandos.

Mister Hiram Burman staris, apoginte sin je imit-leda intermuro, kaj seninterese rigardis la diskutantojn. Juda problemo falis en iun disputan fendon en komenco mem de la konversacio, kaj aliaj temoj elvokis en lia animo neniujn emociojn. De grupo kie germana profesoro pozitive parolis pri avantaĝoj de sovetia edziĝo antaŭ la religia, deiris versaĵ-felietonisto, kiu subskribis siajn verkojn per pseŭdonimo Hargantua. Li proksimiĝis al enpenŝiĝinta Hiram, kaj komencis varme klarigi al li ion. Hiram komencis aŭskulti, sed rapide konvinkiĝis ke povas kompreni tute nenion. Dume Hargantua ĉiuminute ordigis ion en vestaĵo de Hiram, ĉu ligante lian kravaton, ĉu demetante iun lanugeton, ĉu butonumante aŭ malbutonumante lian jakon. Li parolis sufiĉe laŭte kaj, ŝajne, klare. Sed en lia parolmaniero estis iu malfacile kaptebla difekto, kiu transformis liajn vortojn en polvojn. La problemo komplikiĝis per tio ke Hargantua ŝatis paroladi, kaj postulis de la kunkonversaciulo subtenon de ĉiu sia frazo.

– Ĉu vere? – diris li, movante la kapon, kvazaŭ intencis per sia granda bona nazo beki iun nutraĵon. – Ĉu ĝuste?

Sed nur tiuj ĉi vortoj estis kompreneblaj en paroladoj de Hargantua. Ĉio alia kuniĝis en ravan konvinkan murmuron. Sinjoro Burman

konsentis pro la ĝentileco, kaj baldaŭ forkuris. Ĉiuj konsentis kun Hargantua, kaj li opiniis sin homo kapabla konvinki iun ajn pri io ajn.

– Ĉu vi vidas, – diris li al Palamidov, – vi ne scipovas konversacii. Sed mi, mi konvinkis lin. Mi ĵus pruvis al li, kaj li konsentis ke ĉe ni ekzistas jam neniu juda problemo. Ĉu vere? Ĉu ĝuste?

Palamidov komprenis nenion kaj, kapjesante, komencis aŭskulti konversacion okazantan inter germana orientalistoj kaj kondukto de la vagono. La kondukto jam delonge penis eniri la konversacion, kaj nur nun trovis liberan samnivelan aŭskultanton. Eksciinte antaŭe titolon, kaj ankaŭ nomon kaj familinomon de la konversacianto, la kondukto demetis la balailon flanken, kaj nehaste komencis:

– Vi verŝajne ne aŭdis, civitano profesoro, sed en Centra Azio estas besto kiu nomiĝas kamelo. Sur ĝia dorso troviĝas du buloj. Kaj estis ĉe mi konatulo-fervojoisto, eble vi aŭdis pri li, kamarado Postenjok, disdonanto de pakaĵoj. Eksidis li tiun kamelon inter la buloj, kaj batis ĝin per vipeto. La kamelo estis malica, kaj komencis per tiuj ĉi buloj premi lin, preskaŭ pe-premis. Tamen Postenjok sukcesis desalti. Brava bubo li estis, ĉu vi aŭdis pri li? Sed la kamelo tutan uniforman jakon lian ĉirkaŭkraĉis, sed la jako estis ĵus el lavejo...

La vespera konversacio estingiĝis. Kunpuŝiĝo de la du mondoj finiĝis kontentiĝe. Kverelo ial ne okazis. Kunekzisto de du sistemoj: kapitalisma kaj socialisma en la speciala trajno vole-nevole devis daŭri ĉirkaŭ monaton. Malamiko de tutmonda revolucio, sinjoro Hejnriĥ, rakontis malnovan vojan anekdoton, post kio ĉiuj ekiris en restoracion vespermanĝi, irante el vagono en vagonon sur vibrantaj feraj platoj, kaj duonfermante la okulojn pro la penetra vento. Tamen en la restoracio loĝantaro de la trajno eksidis aparte. Ĉi tie, dum la vespermanĝo, oni pririgardis unu la alian. Eksterlando, prezentita per ĵurnalistoj de plej gravaj ĵurnaloj kaj telegraf-agentejoj de tuta mondo, dece ekdrinkis vodkon, kaj kun terura ĝentileco rigardetis avangardulojn en botoj, kaj sovetiajn ĵurnalistojn, kiuj venis vestitaj hejme en pantofloj kaj fiksbutonoj anstataŭ kravatoj.

En la vagono-restoracio sidis diversaj homoj: kaj provinculo el Nov-Jorko sinjoro Burman, kaj junulino el Kanado, veninta el trans-oceano nur unu horo antaŭ deiro de la speciala trajno, kaj pro tio senkomprene turnadanta la kapon super la kotleto en longa metala telereto, kaj japania diplomato, kaj alia japano, pli juna, kaj sinjoro Hejnriĥ, kies flavaj okuloj ial smajlis, kaj juna angla diplomato kun maldika tenisa talio, kaj germano orientalista,

sufiĉe pacience aŭskultinta rakonton de la konduktoro pri ekzisto de stranga besto kun du buloj sur la dorso, kaj usona ekonomiisto, kaj ĉeĥoslovako, kaj polo, kaj kvar usonaj ĵurnalistoj, inter kiuj estis pastro, verkanta en gazeton por unuiĝo de kristanaj gejunuloj, kaj centprocenta usonanino el antikva pionira familio kun nederlanda familinomo, kiu famiĝis per tio ke, pasintjare, postrestis de la trajno en Mineral-Akvoj kaj, por reklami sin, iom da tempo kaŝiĝis en la stacia bufedejo. (Tiu okazaĵo elvokis en usona gazetaro grandan tumulton. Tri tagoj oni publikigis artikolojn sub allogaj titoloj: «Junulino el antikva familio en ungoj de sovaĝaj kaŭkazaj montaruloj», «Morto aŭ elaĉeto», kaj multajn aliajn). Iuj el la eksterlandanoj rilatis al ĉio sovetia malamike, aliaj esperis dum plej mallonga tempo kompreni enigmajn animojn de azianoj, kaj triaj penis konsciencie kompreni kio, finfine, okazas en Sovetio.

Sovetia flanko bruis ĉe siaj tabletoj. Avangarduloj alportis kun si manĝon en paperaj pakaĵoj, kaj volonte trinkis teon en blankmetalaj glasingoj. Ĵurnalistoj, estante pli monhavaj, mendis eskalopojn, kaj Lavuazjan, kiun subite kaptis paroksismo de slavismo, decidis impresi alilandanojn, do mendis renojn-sote. Renojn li ne pe-manĝis, ĉar ne ŝatis ilin de la infaneco, tamen pleniĝis per fiero, kaj ĵetadis

sur la alilandanojn defiajn rigardojn. Ankaŭ sur soveta flanko estis diversaj homoj. Estis ĉi tie laboristo el Sormovo, sendita en la vojaĝon per komuna kunsido, kaj konstruanto el stalingrada traktora uzino, antaŭ dek jaroj kuŝinta en tranĉeoj kontraŭ Vrang-el-anoj sur sama kampo kie staras nun la traktora giganto, kaj teksisto el Serpuĥov, interesiĝinta pri Orienta Ĉefvojo ĉar ĝi devas plirapidigi transportadon de kotono en teksajn regionojn.

Sidis ĉi tie ankaŭ metalurgiistoj el Leningrado, kaj ministoj el Donbaso, kaj maŝinisto el Ukrainio, kaj estro de la delegacio en blanka rusa ĉemizo kun granda buĥara stelo, ricevita pro lukto kontraŭ emiro. Kiom mirus diplomato kun tenisa talio, se ekscius ke malgranda ĝentila versfaranto Hargantua ok fojoj estis en kaptiteco ĉe diversaj ukrainaj hetmanoj, kaj foje estis eĉ pafekzekutita per maĥno-anoj, kion li ne ŝatis preparoli, ĉar konservis pri tio malagrablegajn memorojn, elgrimpane kun trapafita ŝultro el la komuna tombo.

Eblas ke ankaŭ reprezentanto de kristanaj gejunuloj kaptus sian koron, eksciante, ke gaja Palamidov estis estro de arma tribunalo, kaj Lavuazjan, en intereso de ĵurnala informado, alivestiĝis foje je virino kaj penetris kunvenon de baptistinoj, pri kio li verkis grandan antireligian korespondaĵon, ke neniu el

ĉeestantaj sovetaĵaj civitanoj baptis siajn infanojn, kaj ke inter tiuj ĉi aĉuloj troviĝas eĉ kvar verkistoj. Diversaj homoj sidis en la vagono-restoracio.

Dum dua tago efektiviĝis vortoj de la pluŝa profeto. Kiam la trajno bruante kaj tondrante transveturis Volgon per Sizran-ponto, la specialaj pasaĝeroj, per la malagrablaj urbaj voĉoj ektenacis kanton pri la volga heroo. Dum tio ili penis ne rigardi okulojn de aliuloj. En najbara vagono alilandanoj, kiuj ne sciis ĝuste kion kaj kie oni devas kanti, verve plenumis «Hej, plenplenas mia kolportujo» kun ne malpli stranga refreno: «*Eĥ juĥnem!*». Neniu, pro la honto, sendis poŝtkarton al homo kun pluŝa nazo. Nur Plimalbonigov rezistis. Li ne kantis kune kun ĉiuj. Kiam la kanta diboĉado kaptis la trajnon, li sola silentis, forte kunpremante la dentojn, kaj aspektante ke li legas na «Plena geografia priskribo de nia patrolando». Li estis severe punita. La muzika paroksismo kaptis lin nokte, malproksime post Samara. Meznokte, kiam la neordinara trajno jam dormis, el kupeo de Plimalbonigov ekaŭdiĝis ŝanceliĝanta voĉo: «Estas roko ĉe Volgo, kiun musko surkreskis». La vojaĝo prenis sion.

Kaj iom pli poste, kiam endormiĝis ankaŭ Plimalbonigov, pordo de la enir-plateto malfermiĝis; dum sekundo aŭdiĝis libera tondrado de la radoj, kaj en la malplenan

brilantan koridoron eniris, ĉirkaŭrigardante, Ostap Bender. Momenton li ŝanceliĝis, sed poste svingis dorme la manon, kaj malfermis plej proksiman pordon de kupeo. Ĉe lumo de blua nokta lampo dormis Hargantua, Plimalbonigov kaj fotografisto Menŝov. Kvara supra litbenko estis libera. La granda kombinanto ne meditis. Sentante malforton en la piedoj post la longaj vagadoj, nerevenaj perdoj, kaj duhora starado sur ŝtupeto de la vagono, li pe-grimpis supren. De tie al li prezentiĝis admirinda vidaĵo: ĉe la fenestro, levante la piedetojn kiel timonojn, kuŝis blankkorpa kuirita kokino.

– Mi iras laŭ malĝusta vojo de Panikovskij, – elflustris Ostap.

Kun tiuj ĉi vortoj li levis la kokinon al si, kaj pe-manĝis ĝin sen pano kaj salo. La ostetojn li metis sub la firman tolan rulaĵon. Li ekdormis feliĉa, ĉe knaro de la intermuroj, enspirante neimiteblan fervojan odoron de farbo.

Ĉapitro 27

«Permesu eniri al la dungito de kapitalo»

Nokte Ostap sonĝis malgajan kaj iom nebulan vizaĝon de Zosja, kaj poste aperis Panikovskij. Rompanto de la konvencio estis en fiakrista ĉapelo kun plumo, kaj diris, tordante la manojn: «Bender! Bender! Vi ne scias kio estas kokino! Tio estas admirinda grasa birdo,

kokino!». Ostap ne komprenis kaj koleris: «Kial kokino? Ja via specialeco estas ansero!». Sed Panikovskij insistis pri sia: «Kokino, kokino, kokino!».

Bender vekigis. Malalte super la kapo li ekvidis plafonon, fleksitan kiel kovrilo de avina kofro. Ĉe nazo mem de la granda kombinanto balanciĝis багаĝa reteto. En la kupeo estis tre lume. Tra la duonsobigitan fenestron enŝiriĝis varmega aero de orenburga stepo.

– Kokino! – aŭdiĝis de sobe. – Kien malaperis mia kokino? Krom ni en la kupeo estas neniu! Ĉu vere? Permesu, sed kies piedoj estas tio? Ostap fermis la okulojn per la mano kaj tuj malkontente elmemoris ke ankaŭ Panikovskij faris tion, kiam lin trafis minaco. Demetinte la manon, la granda kombinanto ekvidis kapojn, aperintajn nivele de lia litbenko.

– Ĉu vi dormas? Nu, nu, – diris unua kapo.

– Diru, kara, – bonvole demandis la dua, ĉu tio estas vi kiu pe-manĝis mian kokinon? Ĉu vere? Ĉu ĝuste?

Fotoĵurnalisto Menšov sidis sube, ĝis kubuto eniginte la ambaŭ manojn en la nigran fotografan sakon. Li reŝargis fotografajn kasedojn.

– Jes, diskrete diris Ostap, – mi pe-manĝis ĝin.

– Dankon al vi! – neatendite kriis Hargantua. – Mi jam ne sciis kion fari pri ĝi. Ja

estas varmege, la kokino povis difektiĝi. Vere, ĉu? Bedaŭrindas forĵeti! Ĝuste, ĉu?

– Certe, – diris Ostap singarde, – mi tre ĝojas ke povis okazigi al vi tiun ĉi etan servon.

– Vi de kiu ĵurnalo? – demandis la fotoĵurnalisto, daŭrigante kun dolĉelaca rideto serĉadi ion en la sako. – Ĉu vi envagoniĝis ne en Moskvo?

– Vi, vidas mi, estas fotografisto, – diris Ostap, evitante rektan respondon, – mi konis iun provincan fotografiston kiu eĉ konservaĵojn malfermis nur ĉe ruĝa lumo: li timis ke ili difektiĝos.

Menšov ekridis. Ŝerco de la nova pasaĝero plaĉis al li. Kaj dum tiu mateno neniu plu venis al la granda kombinanto kun glitaj demandoj. Li desaltis de la litbenko kaj, karesante siajn vangojn, sur kiuj dum la tri tagoj elkreskis rabista hirtaĵo, demande alrigardis bonkoran Hargantua. Versaĵ-felietonisto elpakis la valizon, prenis el ĝi razil-kompleton kaj, etendinte ĝin al Ostap, longe klarigis ion, bekante nevideblan nutraĵon kaj ĉiuminute postulante konfirmon de siaj vortoj.

Dum Ostap razis, lavis kaj purigis sin, Menšov, ĉirkaŭzonita per fotografistaj rimenoj, disvastigis tra la tuta vagono informon ke en ilia kupeo veturas nova provinca ĵurnalisto, atinginta nokte la trajnon per avio, kaj pe-manĝinta kokinon de Hargantua. Rakonto pri la

kokino elvokis grandan viklecon. Preskaŭ ĉiuj ĵurnalistoj kunprenis en la vojon hejmajn manĝaĵojn: sekajn kuketojn, hakitajn kotletojn, panbulojn kaj pe-kuiritajn ovojn. Tiun ĉi nutraĵon manĝis neniu. La ĵurnalistoj preferis viziti la restoracion.

Do Bender eĉ ne sukcesis pe-i sian tualeton, kiam en la kupeo aperis dika verkisto en mola infana jaketo. Li metis antaŭ Ostap, sur la tablon, dek-duon da ovoj kaj diris:

– Manĝu. Tio estas ovoj. Se ovoj ekzistas, do iu devas pe-manĝi ilin, ĉu?

Poste la verkisto elŝovetis sin el la fenestro, rigardis la verukitan stepon, kaj amare diris:

– Dezerto – tio estas sentalentaĵo! Sed ĝi ekzistas. Kaj oni devas konsideri tion.

Li estis filozofo. Aŭskultinte dankon de Ostap la verkisto skuis la kapon, kaj iris al si pe-skribi rakonton. Estante homo akurata, li firme decidis nepre verki po rakonto ĉiutage. Tiun decidon li plenumis kun diligenteco de unua lernanto. Verŝajne lin inspiris penso ke se papero ekzistas, do iu devas skribi sur ĝi.

Ekzemplon de la filozofo sekvis ankaŭ aliaj pasaĝeroj. Navrockij alportis farĉitan kapsikon en vitra vazo, Lavuazjan – kotletojn kun algluitaj al ili ĵurnalaj linioj, Sapegin – haringon kaj kuketojn, kaj Dnestrov – glason da poma marmelado. Venis ankaŭ aliaj, sed Ostap ĉesis la akceptadon.

- Mi ne povas, ne povas, amikoj miaj, -
diris li: provu nur fari bonon al unu - ĉiuj
alamasiĝas.

La ĵurnalistoj tre plaĉis al li. Ostap estis
preta kortuŝiĝi, sed li tiel satiĝis, ke ekestis ne
kapabla fordoni sin al iuj ajn sentoj. Li malfacile
engrimpis sian litbenkon, kaj dormis preskaŭ
tutan tagon.

Iris tria tagnokto de la vojaĝo. Speciala
trajno suferetis, atendante okazintaĵojn. Ĝis la
Ĉefvojo estis ankoraŭ malproksime, okazis
nenio menciinda sed, malgraŭ tio, moskvaj
ĵurnalistoj, turmentataj per la kontraŭvola
senokupeco, suspekto rigardis unu la alian.

«Ĉu ne eksciis iu ion kaj ĉu ne sendis li
urĝan telegramon pri tio en sian redakcejon?»

Fine Lavuazjan ne eltenis, kaj sendis
telegrafan informon:

«Preterveturis na Orenburg pkt
lokomotiva tubo elamasigas fumo pkt
humoro vigla komo delegit-vagonoj
konversacias nur orienta ĉefvojo pkt
telegrafu instrukciojn arala maro
lavuazjan».

La sekreto baldaŭ evidentiĝis, kaj sur
sekvonta jam stacio ĉe telegrafa giĉeto ordiĝis
vico. Ĉiuj sendis mallongajn informojn pri la
vigla humoro, kaj pri tubo de la lokomotivo el
kiu elamasigas fumo.

Por alilandanoj vasta kampo da agado
malfermiĝis tuj post Orenburgo, kiam ili ekvidis

unuan kamelon, unuan jurton, kaj unuan kazaĥon en pinta fela ĉapo, kun vipo en la mano. En stacieto, kie la trajno hazarde ekestis haltita, minimume dudeko da fotografiloj ekcelis kamelan muzelon. Komenciĝis ekzotiko, ŝipoj de dezerto, liberaj filoj de stepoj, kaj cetera romantika ĉiutageco.

Usonino el antikva familio eliris el la vagono en rondaj malhelaj okulvitroj. Ankaŭ verda ombrelo gardis ŝin de la suna lumo. En tiu aspekto ŝin longe fotografis per portebla kamerao "Ajmo" griza usonano. Komence ŝi staris apud la kamelo, poste antaŭ ĝi kaj, fine, sur ĝi, lokiĝinte inter la buloj, pri kiuj tiel varme rakontis la kondukto. Eta kaj malica Hejnriĥ vagaĉis en la amaso kaj al ĉiuj diris:

- Vi pririgardu ŝin, ĉar ŝi povas hazarde postresti en la stacio, kaj denove okazos sensacio en usona gazetaro: «Kuraĝega ĵurnalistino en ungoj de frezeziĝinta kamelo».

Japana diplomato staris du paŝoj de la kazaĥo. Ambaŭ silente rigardis unu la alian. Ĉe ili estis tute samaj, iom platigitaj vizaĝoj, hirtaj lipharoj, flaveta lakita haŭto kaj okuloj, iomete ŝvelaj kaj nevastaj. Oni povus opinii ilin ĝemeloj, se la kazaĥo ne estus en ŝafa peltaĵo, zonigita per katuna tuko, kaj la japano - en griza londona kostumo, kaj se la kazaĥo ne komencus legi nur en pasinta jaro, kaj la japano ne pe-lernus, antaŭ dudek jaroj, du

universitatojn: en Tokio kaj en Parizo. La diplomato retroiris unu paŝon, klinis la kapon al sia reflektita fotografilo, kaj klakis per la obturilo.

[Фото с верблюдом](#) («Fotografaĵo kun kamelo»)

La kazaĥo ekridis, eksidis sian raspan ĉevaleton, kaj forrajdis en la stepon.

Sed jam sur sekvanta stacio en la romantikan rakonton eniris novaj elementoj. Post la staciejo kuŝis ruĝaj cilindraj bareloj: feraj ujoj por brulaĵo, flavis nova ligna konstruaĵo, kaj antaŭ ĝi liniigis spaliro da traktoroj, peze eniĝinte en la teron siajn raŭpojn. Sur krada staplo da ŝpaloj staris junulino-traktoristino en nigra labora pantalono kaj feltaj botoj. Ĉi tie revanĉon prenis sovetiaj ĵurnalistoj. Tenante la fotografilojn sur nivelo de la okuloj ili komencis kaŝiri al la junulino. Antaŭ ĉiuj ŝteliris Menŝov.

En la dentoj li tenis aluminian kasedon, kaj per siaj movoj memorigis soldaton, farantan kuradojn ene de atakanta ĉeno. Sed se la kamelo fotografiĝis kun plena konscio pri sia rajto je fameco, la traktoristino okazis pli modesta. Ĉirkaŭ kvin fotografadojn ŝi eltenis trankvile, sed poste ruĝiĝis kaj foriris. La fotografistoj transiris al la traktoroj. Bonokaze sur la horizonto, malantaŭ la maŝinoj, videblis ĉeneto da kameloj. Ĉio tio: la traktoroj kaj la kameloj perfekte aranĝis sceneton sub nomo

"Malnovo kaj novo" aŭ "Kiu kiun?".

Ostap vekigis antaŭ sunsubiro. La trajno daŭrigis kuri en la dezerto. En la koridoro vagadis Lavuazjan, konvinkigante la kamaradojn eldoni specialan trajnan ĵurnalon. Li eĉ elpensis la titolon: "Plenvapore".

– Ĉu tio estas nomo! – diris Ostap. – Foje mi vidis en fajrobrigadejo murĵurnalon kiu nomiĝis "El fajro en flamegon". Tio estis esence.

– Ja vi estas plum-profesiulo! – kriis Lavuazjan. – Konfesu ke vi simple maldiligentas verki por organo de la trajna komunumo.

La granda kombinanto ne neis ke li estas plum-profesiulo. Se estus bezonate li povus glate klarigi kiun organon li prezentas en tiu ĉi trajno: na "Nigramarska ĵurnalo". Tamen tio ne estis bezonata, ĉar la trajno estis speciala, kaj ĝin ne vizitis koleraĵoj kontrolistoj kun nikelizitaj truigiloj. Sed Lavuazjan sidis jam ĉe sia tajpilo en vagono de la avangarduloj, kie lia propono elvokis tumulton. Maljunulo de Treĥgorka per neforviŝebla kraĵono skribis jam artikoleon pri bezono aranĝi en la trajno vesperon pri interŝanĝo de spertoj, kaj literaturan voĉlegadon; oni jam serĉis karikaturiston kaj mobilizis na Navrockij por aranĝi demandadon pri tio kiu entrepreno, el prezentitaj per la delegitoj, pli bone plenumis sian produktad-financan planon.

Vespere, en kupeo de Hargantua, Menŝov,

Plimalbonigov kaj Bender, kolektiĝis multe da ĵurnalista popolo. Ili sidis premiĝe, po ses homoj sur litbenko. De supre pendis kapoj kaj kruroj. Sufiĉe malvarmeta nokto trankviligis la ĵurnalistojn, kiujn turmentis la tuttaga varmego, kaj longaj taktoj de la radoj, ne ĉesantaj jam tri tagoj, vokis al amikeco. Oni parolis pri Orienta Ĉefvojo, elmemoris siajn redaktorojn kaj sekretariojn, rakontis ridindajn ĵurnalajn fuŝaĵojn, kaj ĉiuj kune insultetis na Plimalbonigov pro foresto de ĵurnalisma inklino en lia karaktero. Plimalbonigov alte levis la kapon kaj superece respondis:

– Ĉu vi babilaĉas? Nu, nu!

Dum kulmino de la gajeco aperis sinjoro Hejnriĥ.

– Permesu eniri al la dungito de kapitalo, – vigle diris li.

Hejnriĥ aranĝiĝis sur genuoj de la dika verkisto, pro kio la verkisto suspiretis kaj stoike ekpensis: «Se ĉe mi estas genuoj, iu devas sidi sur ili, ĉu? Do jen li sidas».

– Nu, kiel konstruiĝas la socialismo? – impertinente demandis la reprezentanto de liberala ĵurnalo.

Iel okazis ke al ĉiuj entrarnaj alilandanoj oni rilatis ĝentile, aldonante al la familinomoj «*mister*», «*her*» aŭ «sinjoro», sed la ĵurnaliston de liberala ĵurnalo oni nomis simple Hejnriĥ, opiniis lin babilulo, kaj ne prenis lin serioze. Tial

al la rekte starigita demando Palamidov respondis:

– Hejnriĥ, vane vi klopodas! Nun vi denove insultos sovetian reĝimon, sed tio estas enue kaj neinterese. Krom tio ni povas aŭdi tion de malica oldulino staranta en ĉebutika vico.

– Temas ne pri tio, – diris Hejnriĥ, – mi volas rakonti biblian historion pri Adamo kaj Eva. Ĉu vi permesos?

– Aŭskultu, Hejnriĥ, kial vi tiel bone parolas ruse? – demandis Sapegin.

– Mi pe-lernis la lingvon en Odeso, kiam en mil-naŭcent-dek-oka jaro, ene de armeo de generalo fon Belc, mi okupaciis tiun ĉi mirindan urbon. Mi havis tiam rangon de leŭtenanto. Vi verŝajne aŭdis pri fon Belc?

– Ne nur aŭdis, – diris Palamidov, – sed ankaŭ vidis. Via fon Belc kuŝis en sia ora kabineto en palaco de komandanto de Odesa milita regiono kun trapafita kapo. Li pafmortigis sin, eksciinte ke en via patrolando okazis revolucio.

Dum vorto «revolucio», sinjoro Hejnriĥ oficiale smajlis kaj diris:

– La generalo estis fidela al la ĵuro.

– Kaj vi, Hejnriĥ, kial vi ne pafmortigis vin? – oni demandis de supra litbenko. – Kio okazis ĉe vi pri la ĵuro?

– Nu, kio, ĉu vi aŭskultos la biblian historion? – incite diris reprezentanto de

liberala ĵurnalo.

Tamen iom da tempo oni ankoraŭ penis pridemandi lin pri la ĵuro. Kaj nur kiam li tute jam ofendiĝis, kaj decidis foriri, oni konsentis aŭskulti la historion.

RAKONTO DE SINJORO HEJNRIĤ PRI ADAMO KAJ EVA

– Estis en Moskvo, sinjoroj, junulo, jun-komunisto. Lia nomo estis Adamo. Kaj estis en sama urbo junulino, jun-komunistino Eva. Kaj jen tiuj ĉi junaj homoj ekiris foje promeni en moskvan paradizon: en Parkon de kulturo kaj ripozo. Mi ne scias pri kio ili konversaciis tie. Ĉe ni junaj homoj parolas kutime pri la amo. Sed viaj Adamo kaj Eva estis marksistoj kaj, eble, ili konversaciis pri tutmonda revolucio. Sed okazis tiel ke promenante en iama Ne-enua parko ili eksidis sur herbon sub iu arbo. Mi ne scias kiu arbo estis tio. Povas esti ke tio estis arbo de percepto de bono kaj malbono. Sed marksistoj, kiel estas sciata al vi, ne ŝatas mistikon. Al ili, eble, ŝajnis ke tio estas ordinara sorpo. Daŭrigante konversacii, Eva deŝiris de la arbo branĉeton kaj donacis ĝin al Adamo. Sed tiam aperis homo, kiun senimagemaj junaj marksistoj opiniis esti parka gardisto. Tamen tio, verŝajne, estis anĝelo kun flama glavo. La anĝelo, insultante kaj grumblante, kondukis na Adamo kaj Eva en kontoron por enprotokoli

fakton de la difekto, okazigita al la parka mastrumejo. Tiu ĉi signifa ĉiutageca okazaĵo delogis la gejunulojn de alta politiko, kaj Adam ekvidis ke antaŭ li staras tenera Eva, kaj Eva rimarkis ke antaŭ ŝi staras vireca Adamo. Kaj la junaj homoj ekamis unu la alian. Post tri jaroj ĉe ili estis jam du filoj.

Veninte al tiu ĉi loko sinjoro Hejnriĥ subite eksilentis, enŝovante en la manikojn la molajn striigitajn manumojn.

– Nu, sed kio ja? – demandis Lavuazjan.

– Ja tio, – fiere diris Hejnriĥ, – ke unu el la filoj nomiĝis Kain, kaj la alia – Habel, kaj ke post certa tempo Kain mortigos na Habel, Abraham naskos na Isaak, Isaak naskos na Jakob kaj, entute, la biblia historio komenciĝos denove, kaj neniu marksismo sukcesos malhelpi al tio. Ĉio ripetiĝas. Ankaŭ diluvo okazos, estos Noa kun siaj tri filoj, kaj Ĥam ofendos na Noa, estos ankaŭ Babilona turo, sinjoroj, kiu neniam pe-konstruiĝos. Kaj tiel plu. Nenio nova okazos en la mondo. Do vane vi boladas pri via nova vivo.

Kaj Hejnriĥ kontentiĝe retrokliniĝis, preminte per sia malvasta haringa dorso la dikan bonaniman verkiston.

– Ĉio tio estus bonega, – diris Palamidov, – se ĝi estus pruvita. Sed pruvi vi povas nenion. Simple vi volas ke estu tiel. Tute ne estas bezonate malpermesi al vi kredi je miraklo.

Kredu, preĝu.

– Kaj ĉu ĉe vi estas pruvoj ke ĉio iros alie? – kriis la reprezentanto de liberala ĵurnalo.

– Estas, – respondis Palamidov, – unun el ili vi vidos postmorgaŭ, ĉe relkuniĝo de Orienta Ĉefvojo.

– Nu-u, komenciĝas! – grumblis Hejnriĥ. – Konstruaĵoj! Fabrikoj! Kvinjara plano! Kial vi ŝovas en miajn okulojn viajn feraĵojn? Gravas spirito! Ĉio ripetiĝos! Estos kaj tridekjara milito, kaj centjara milito, kaj denove oni bruligos homojn, kiuj aŭdacos diri ke Tero estas globa. Kaj denove oni trompos kompatindan Jakob, igante lin labori sep jaroj senpage, kaj ŝovinte al li nebelan miopan edzinon Lea anstataŭ grandmama Raĥel. Ĉio, ĉio ripetiĝos. Kaj Eterna Judo, Ahasver, kiel antaŭe vagados en la mondo...

– Ahasfer neniam vagados plu! – diris subite la granda kombinanto, gaje ĉirkaŭrigardante la kuniĝintojn.

– Kaj ĉu ankaŭ al tio vi povas dum du tagoj prezenti pruvojn? – kriis Hejnriĥ.

– Eĉ nun, – ĝentile respondis Ostap. – Se la komunumo permesos, mi rakontos pri tio kio okazis pri tiel nomata Eterna Judaĉo.

La komunumo volonte permesis. Ĉiuj preparis sin aŭskulti rakonton de la nova kunvojaĝanto, kaj Plimalbonigov eĉ diris: «Ĉu vi rakontas? Nu,nu».

RAKONTO DE OSTAP BENDER PRI ETERNA JUDAĈO

– Mi ne rememorigos al vi longan kaj enuan historion de Eterna Judaĉo. Mi diros nur ke ĉirkaŭ du mil jaroj tiu ĉi vulgara oldulo vagadis en tuta mondo, ne registrante sin en hoteloj, kaj ĝenante civitanojn per siaj plendoj pri alteco de fervojaj prezoj, pro kio li estas devigata vagadi piede. Oni vidis lin multfoje. Li partoprenis historian konferencon kie Kolumbo malsukcesis defendi elspezon de antaŭpagitaj sumoj, prenitaj por malkovro de Ameriko. Estante ankoraŭ juna homo li spektis incendion de Romo. Ĉirkaŭ cent kvindek jaroj li vivis en Hindio, eksterordinare konsternante joganojn per sia vivkapablo kaj kverelema karaktero. Unuvorte, la oldulo povus rakonti multe da interesaĵoj, se post ĉiu centjariĝo li eldonus la memorverkojn. Sed Eterna Judaĉo ne scipovis legi kaj, krom tio, havis aĉan memorkapablon.

Antaŭnelonge la oldulo loĝis en rava urbo Rio-de-Ĵaneiro, trinkis malvarmetajn trinkaĵojn, rigardis oceanajn ŝipojn, kaj promenadis en blanka pantalono sub tieaj palmoj. Tiun ĉi pantalonon li aĉetis antaŭ okcent jaroj en Palestino ĉe iu kavaliro, elmilitinta Dian Ĉerkon, kaj ĝi estis ankoraŭ kiel nova. Sed subite la

oldulo maltrankviliĝis. Li ekvolis en **Rusion**²⁶, al Dnepro. Li estis jam ĉie: kaj ĉe Rejno, kaj ĉe Gango, kaj ĉe Misisipo, kaj ĉe Jangzio kaj ĉe Niĝero, kaj ĉe Volgo. Nur ĉe Dnepro li ne estis. Kaj, vidu, ekvolis li ĵeti rigardon ankaŭ sur tiun ĉi vastan riveron.

Ĝuste en jaro 1919 Eterna Judaĉo en sia kavalira pantalono neleĝe transiris rumanian limon. Ĉu valoras paroli pri tio ke sur lia brusto kaŝiĝis ok paroj da silkaj ŝtrumpoj kaj boteleto da pariza parfumo, kiun unu sinjorino el Kiŝinevo petis transdoni al siaj kievaj parencoj. Dum tiu ŝtorma tempo portado de kontrabando surventre nomiĝis «porti kompreson». Tiun ĉi aferon oni rapide instruis al la oldulo en Kiŝinevo. Kiam Eterna Judaĉo, pe-inte la taskon, staris sur bordo de Dnepro, pendigante sian malordan verdan barbon, al li venis homo kun flavbluaj pantalon-strioj, petlur-anaj epoletoj, kaj severe demandis:

– Ĉu judaĉo?

– Judaĉo, – respondis la maljunulo.

– Nu, iru ni, – invitis la homo kun la strioj.

Kaj li alkondukis lin al la kozaka hetmano.

– Judaĉon ni kaptis, – raportis li, alpuŝante la oldulon per la genuo.

– Ĉu judaĉo? – demandis la hetmano kun

26. en Rusion: Fakte en Ukrainion. Temas pri tempo de nelonga sendependeco de Ukrainio inter ĝia aparteno al cara Rusio kaj, poste, al Sovetio.

gaja miro.

– Judaĉo, – respondis la vaganto.

– Do almetu vi lin al muro, – karese diris la estro.

– Sed mi estas eterna! – kriis la oldulo.

Du mil jaroj li senpacience atendis la morton, sed nun li subite tre ekvolis vivi.

– Silentu, ĵidaĉa muzelo! – gaje kriis la diklipa estro. – Haku lin, buboj-bravuloj!

Kaj la eterna vaganto malaperis.

– Jen estas ĉio, – finis Ostap.

– Mi opinias ke al vi, sinjoro Hejnriĥ, estiel eksa leŭtenanto de aŭstria armeo, estas konata konduto de viaj amikoj-petluranoj? – diris Palamidov.

Hejnriĥ respondis nenion, kaj tuj foriris. Komence ĉiuj opiniis ke li ofendiĝis, sed jam dum sekvonta tago evidentiĝis ke el la sovetia vagono la korespondanto de liberala ĵurnalo direktiĝis rekte al sinjoro Hiram Burman, al kiu li vendis la historion pri Eterna Judaĉo per kvardek dolaroj.

Kaj Hiram telegrafe, sur unua jam stacio, sendis rakonton de Ostap Bender en sian ĵurnalon.

Ĉapitro 28

Ŝvita atako de inspiro

Matene de kvara vojaĝ-tago la trajno turniĝis al oriento. Preter neĝaj ĉenoj de

himalajaj antaŭmontoj, tondre transrulante diversajn konstruaĵojn (pontetojn, tubojn por ellaso de printempa akvo ktp), kaj ĵetante trembrilan ombron sur la montajn riveretojn, la speciala trajno pretersaltis urbeton sub poploj, kaj longe turniĝis ĉe flanko mem de granda neĝa monto. Ne havante fortojn venki la montopasejon tuj, la speciala alsaltis la monton ĉu de dekstre, ĉu de maldekstre, revenis, anhelis, frotiĝis je la monto per siaj polvo-verdaj flankoj, diversmaniere ruzadis kaj, finfine, elsaltis al libero. Honeste laborinte per la radoj la trajno brave haltis sur lasta stacio antaŭ komenco de Orienta Ĉefvojo.

Fone de aluminiaj montoj, ene de buloj da mirinda suna lumo staris jun-herb-kolora vapor-lokomotivo. Tio estis donaco de la staciaj laboristoj al la nova fervojo.

Kio koncernas donacoj al diversaj solenaĵoj kaj datrevenoj, do oni devas diri ke la afero dum sufiĉe longa tempo estis ne tute bonstata. Oni kutimis donaci aŭ tre malgrandan, kiel kato, modelon de vapor-lokomotivo aŭ, inverse, ĉizilon, kiu per la dimensioj superas telegrafan foston. Tiu ĉi turmenta aliformiĝo de etaj aĵoj en grandajn kaj inverse forrabis multe da tempo kaj mono. Tute senutilaj vapor-lokomotivoj polviĝis sur kancelariaj ŝrankoj, kaj grandega ĉizilo, kiun oni transportis per du ĉaroj, sence kaj sovaĝe rustiĝis en korto de la

jubilea organizaĵo.

Sed vapor-lokomotivo ŜF kiun oni ellasis el la riparo antaŭ ol estis planite, estis tute normala laŭdimensie, kaj videblis ke ĉizilo, kiun oni sendube uzis dum ĝia riparo, ankaŭ estis ordinar-dimensia. La belan donacon oni senprokraste jungis en la trajnon, kaj la «ŝafeto», kiel fervojistoj kutimas nomi lokomotivojn de serio ŜF, ekruliĝis al suda elfluo de la Ĉefvojo: al stacio Montara, portante sur sia antaŭaĵo sloganon «Estu la relkuniĝo!».

Ĝuste antaŭ du jaroj ĉi tie estis metita unua nigra-blua relo, produkto de urala uzino. De tiam el laminatiloj de la uzino senĉese elflugis fajraj strioj da reloj. Ĉefvojo postulis pli kaj pli da ili. La instaligaj urbetoj, irantaj renkonten unu al la alia, deklaris laborkonkuron, kaj atingis tiun rapidecon, ke al ĉiuj liverantoj de la materialoj ekestis malfacile.

Vespero sur stacio Montara, lumigita per rozkoloraj kaj verdaj raketoj, estis ĝis tiom bona, ke malnovloĝantoj, se ili ekzistus ĉi tie, dirus ke tian vesperon ili eĉ ne memoras. Sed, feliĉe, malnovloĝantoj en la Montara forestis. Ankoraŭ en jaro 1928 ĉi tie forestis ne nur malnovloĝantoj, sed ankaŭ domoj, staciaj ejoj, rela vojo, kaj ligna triumfa arko kun krakantaj sur ĝi sloganoj kaj flagoj, proksime al kiu haltis la speciala trajno.

Dum ĉe lumo de brilaj kerosen-lanternoj

okazadis mitingo, kaj la tuta loĝantaro amasiĝis ĉe la tribunuo, fotoĵurnalisto Menšov kun du fotografiloj, stativo kaj magnezia aparato, turniĝadis apud la arko. La arko ŝajnis al la fotografisto taŭga, ĝi bonegus sur fotografiaĵo. Sed la trajno, staranta ĉirkaŭ dudek paŝoj de ĝi, aspektus tro malgranda. Se fotografi de flanko de la trajno, do eta aspektus la arko. En tiaj okazoj Mahometo kutime iras al monto, bonege komprenante ke la monto ne iros al li. Sed Menšov faris tion kio ŝajnis al li plej simpla. Li petis venigi la trajnon sub la arkon per same kutima tono per kiu oni petas pasaĝerojn en tramo iom enmoviĝi. Krom tio li insistis ke el tubo de la lokomotivo elamasiĝu densa blanka vapore. Ankoraŭ li postulis ke la maŝinisto kuraĝege rigardu el la fenestreto malproksimen, tenante la manplaton viziere super la okuloj. La fervojistoj embarasiĝis kaj, opiniante ke decas ĝuste tiel, plenumis la peton. La trajno, klakante, altiriĝis al la arko, el la tubo elamasiĝis la postulata vapore, kaj la maŝinisto, elŝoviĝinte el la fenestreto, faris bestecan vizaĝon. Tiam Menšov estigis tian ekflamon de la magnezio, ke ektermis la tero, kaj je cent kilometroj ĉirkaŭe ekbojis hundoj.

[Потный вал вдохновенья](#) («Ŝvita atako de inspiro»)

Fotografinte, la fotografisto seke dankis la fervojistojn, kaj rapide foriris en sian kupeon.

Malfrunokte la speciala trajno iris jam sur Orienta Ĉefvojo. Kiam loĝantaro de la trajno jam preparis sin al dormo, en koridoron de la vagono eniris fotografisto Menšov kaj, rilatante al neniu, funebre diris:

- Stranga okazo! Evidentiĝis ke tiun malbenitan arkon mi fotografis sur malplenan kasedon! Do rezultiĝis nenio.

- Tio ne estas problemo, - kunsente respondis al li Lavuazjan, - simpla afero. Petu la maŝiniston, kaj li tuj veturos retren. Post nur tri horoj vi denove okazos en Montara kaj ripetos la fotografadon. La relkuniĝon oni povas prokrasti je unu tago.

- Diablo prenu, - malgaje diris la fotoĵurnalisto. - Ĉe mi finiĝis magnezio. Se ne, certe ni devus reveni.

Vojaĝo sur Orienta Ĉefvojo venigis al la granda kombinanto multe da ĝojo. Ĉiu horo proksimigis lin al Norda instala urbeto, kie troviĝas Korejko. Plaĉis al Ostap ankaŭ la literaturaj pasaĝeroj. Tio estis homoj junaj, gajaj, sen tiu burokrata frenezeto kiu distingis liajn herculesajn konatulojn. Por plena feliĉo mankis nur mono. Donacitan nutraĵon li jam pe-manĝis, sed en vagono-restoracio oni postulis kontantan monon. Komence, kiam la novaj amikoj tiris lin tagmanĝi, Ostap rifuzis pretekste de foresto de apetito, sed baldaŭ li komprenis ke tiel vivi ne eblas. Iom da tempo li pririgardis

na Plimalbonigov, kiu tutajn tagojn staris ĉe la koridora fenestro, rigardante telegrafajn fostojn kaj birdetojn, flugantajn de la dratoj. Dum tio eta satira smajlo tuŝis lipojn de Plimalbonigov. Li retroklinis la kapon, kaj flustris al la birdoj: «Ĉu vi flirtas? Nu, nu». Ostap disvastigis sian scivolon ĝis tio ke konatiĝis eĉ kun lia artikolo «Plibonigu ni laboron de butikaj komisionoj». Post tio Bender ĉirkaŭrigardis la strangan ĵurnaliston de la piedoj ĝis la kapo, malbone smajlis kaj, sentante konatan ekscitecon de pafisto-ĉasisto, fermiĝis en la kupeo.

De tie li eliris nur post tri horoj, tenante en la manoj grandan folion da papero.

– Ĉu vi verkadas? – seninterese demandis Plimalbonigov.

– Speciale por vi, – respondis la granda kombinanto. – Vin, kiel mi rimarkis, ĉiam turmentas suferoj de kreado. Sendube estas tre malfacile verki. Mi, estiel malnova ĉefartikolisto kaj via frato je plumo, povas konfirmi tion. Sed mi inventis aĵon kiu liberigas de neceso atendi kiam vin kaptos ŝvita atako de inspiro. Jen, bonvolu konatiĝi.

Kaj Ostap etendis al Plimalbonigov folion, sur kiu estis skribite:

**SOLENA KOMPLETO,
NEANSTATAŬEBLA HELPILO POR VERKI
JUBILEAJN ARTIKOLOJN, FELIETONOJN,
KAJ ANKAŬ PARADAJN VERSAĴOJN, ODOJN**

PARTO 1. VORTARO

SUBSTANTIVOJ

1. Batalkrioj
2. Laboristoj
3. Matenruĝo
4. Vivo
5. Lumturo
6. Eraroj
7. Standardo (flago)
8. Baalo
9. Moloĥo
10. Servisto
11. Horo
12. Malamiko
13. Paŝado
14. Ondego
15. Sablo
16. Galopo
17. Ĉevalo
18. Koro
19. Pasinteco

ADJEKTIVOJ

1. Imperiisma
2. Kapitalisma
3. Historia
4. Lasta
5. Industria
6. Ŝtala
7. Fera

VERBOJ

1. Flamas
2. Suprenĵet(iĝ)i
3. Malkaŝi
4. Ruĝiĝi
5. Supreni-gi (-ĝi)

6. Esti-gi (-ĝi)
7. Kanti
8. Kalumnii
9. Grinci
10. Minaci

ARTAJ EPITETOJ

1. Malicega
2. Denta

CETERAJ PAROL-ELEMENTOJ

1. Naŭa
2. Dek-dua
3. – u
4. Spite
5. Antaŭen!

(Interjekcioj, prepozicioj, konjunkcioj, komoj, tripunktoj, krisignoj, citiloj ktp.)

Rimarko: Komojn oni metas antaŭ «kio», «kiu» kaj «se». Tripunktojn, krisignojn kaj citilojn – ĉie kie eblas.

PARTO 2. VERK-EKZEMPLEROJ

(Senescepte el vortoj de parto 1-a)

§1. ĈEFARTIKOLO

Orienta Ĉefvojo – tio estas fera ĉevalo, kiu suprenĵetante per sia ŝtala galopo sablojn de pasinteco, estigas paŝadon de historio, malkaŝante laŭvican malicegan dent-grincadon de kalumnianta malamiko, sur kiun jam suprenĵetiĝas naŭa ondego, minacanta per dek-dua horo, lasta horo por servistoj de imperiisma Moloĥo, tiu ĉi kapitalisma Baalo, sed, malgraŭ la eraroj, ruĝiĝu kaj altiĝu standardoj ĉe lumturo de industriigo, flamanta ĉe batalkrioj de laboristoj, per kiuj, ĉe kanto de koroj, malkaŝiĝas

matenruĝo de la nova vivo: antaŭen!

§2. ARTA SKIZO-FELIETONO:

SPITE!

– Antaŭen!

Ĝi flamas ĉe batalkrioj de laboristoj...

Ĝi malkaŝas matenruĝon de la nova vivo...

– Lumturo!

– De industriigo!

Spite al apartaj eraroj. Spite.

Sed malgraŭ tio kiel ruĝiĝas...

kiel galopas... kiel leviĝas...

tiuj standardoj! Tiuj flagoj!..

– Spite – al Baalo de kapitalismo!

Spite – al Moloĥo de imperiismo! Spite!

Sed sur la servistoj jam suprenĵetiĝas:

– Lasta ondego!

– Naŭa horo!

– Dekdua Baalo!

Ili kalumniu. Ili grincadu.

Malkaŝiĝu malicega dentega malamiko!

Estiĝas historia paŝado.

Sabloj de pasinteco suprenĵetiĝas

per galopo de ŝtalo.

Tio – «fera ĉevalo»!..

Tio:

– Orienta!

– Ĉefvojo!

«Kantas koroj»...

§3. ARTA VERSAJO

A) DEKTRIA BAALO

**Dekdua proksimiĝas hor'
Galopas la ĉeval'
Kantadas laborista kor'
Bruegas fera ŝtal'**

**Serviston de kapitalist'
Disbatos l' industri'!
Batalon vokas laborist'
Ekflamu histori'!**

**Imperiisma lasta kant'
Pro sanga bat' ruĝiĝu
Sed nia ruĝo de l' standard'
Por ĉiam supreniĝu.**

B) AZIA ORNAMAJO

- 1. Plovo (manĝaĵo)**
- 2. Bajo (malbona homo)**
- 3. Basmaĉo (malbona homo)**
- 4. Ŝakalo (besto)**
- 5. Pialo (taso)**
- 6. lĉigo (piedvesto)**
- 7. Ŝajtano (diablo)**
- 8. Ŝajtan-arbao (Centr-azia fervojo)**
- 9. Mia-via ne kompren' (frazo)**
- 10. lom-iome (frazo)**

11. Uruko (abrikoto)
12. Kiŝlako (vilaĝo)
13. Ariko (kanalo)
14. Arbao (ĉaro)
15. Medreso (religia lernejo)
16. Iŝako (azeno)

B) ORIENTA VARIANTO DE ARTA VERSAĴO

Ĉe bruo de l' tagoj ekfloris uruko, (11)

Ruĝiĝas matene kiŝlak'. (12)

Kaj inter arikoj, arbaoj, medresoj (13-15)

Ripoze promenas iŝak'. (16)

ALDONO

Helpe de materialoj de parto 1-a, laŭ metodo de parto 2-a verkiĝas ankaŭ: romanoj, noveloj, prozaj poemoj, rakontoj, ĉiutagaĵaj skizoj, artaj raportoj, kronikoj, epopeoj, teatraĵoj, politrevuoj, oratorioj ktp.

Kiam Plimalbonigov konatiĝis kun enhavo de la dokumento, liaj okuloj, ĝis tiam malklaraj, ekviviĝis. Al li, kiu ĝis nun limigis sin per raportoj pri kunsidoj, subite malfermiĝis brilantaj stilaj altecoj.

– Kaj ĉio ĉi kontraŭ nur dudek kvin *tugrik*-oj, dudek kvin mongoliaj rubloj, – senpacience diris Ostap, turmentata per malsato.

– Mi ne havas mongoliajn – diris la laboranto de sindikata organo, ne lasante el la manoj na "Solena kompleto".

Ostap konsentis preni ordinarajn rublojn, invitis na Hargantua, kiun li nomis jam «baptopatro kaj bonfaranto», kaj kune kun li direktiĝis en vagonon-restoracion. Oni alportis al li karafon da vodko, brilantan per glacio kaj hidrargo, salaton, kaj grandan, pezan kiel huffero kotleton. Post la vodko, kiu okazigis en lia kapo ioman turniĝon, la granda kombinanto mistere informis la baptopatron kaj bonfaranton ke en Norda instala urbeto li esperas trovi hometon kiu ŝuldas al li negrandan sumon. Tiam li kunvokos ĉiujn ĵurnalistojn al festeno. Al tio Hargantua respondis per longa konvinka parolado, el kiu, kiel kutime, oni povis kompreni eĉ ne vorton. Ostap vokis la bufediston, pridemandis ĉu li kunhavas ĉampanon, kaj kio ankoraŭ estas el gastronomiaĵoj, kaj en kiuj kvantoj, kaj krome li diris ke tiujn ĉi informojn li bezonas ĉar post ĉirkaŭ du tagoj li intencas estigi bankedon al siaj fratoj je plumo. La bufedisto deklaris ke estos farata ĉio kio eblas.

– Laŭ leĝoj de gastamo, – aldonis li ial.

Ju pli proksima estis loko de la relkuniĝo, des pli multnombraj ekestis nomaduloj. Ili sobiĝis de montetoj en ĉapoj, similaj al ĉinaj pagodoj. La speciala trajno, tondrante, kun kapo eniris rokajn porfirajn eltranĉaĵojn, trairis novan trisekcian ponton, kies lasta sekcio estis surŝovita nur hieraŭ, kaj komencis ataki faman Kristalan intermonton. Famigis ĝin konstruantoj

de la Ĉefvojo, plenumintaj ĉiujn eksplodajn kaj instalajn laborojn dum tri monatoj anstataŭ laŭplanaj ok.

La trajno poiome ĉirkaŭkreskis per ĉiutagaĵoj. La alilandanoj, elveturintaj el Moskvo en firmaj kolumoj, faritaj kvazaŭ el apoteka fajenco, en pezaj silkaj kravatoj kaj drapaj kostumoj, komencis liberiĝi. Premis la varmego. Unua ŝanĝis la vestadon unu el usonanoj. Honte smajlante, li eliris el sia vagono vestita strange. Sur li estis flavaj dikaj ŝuoj, ŝtrumpoj kaj pantalono-golfo, korne kadrigitaj okulvitroj, kaj rusa kamparana bluzo, brodita krucete. Ju iĝis pli varmege, des malpli da alilandanoj restis fidelaj al ideo de eŭropa kostumo. Bluzoj, tolstoj-jakoj, fals-tolstoj-jakoj, duontolstoj-jakoj, odesaj sandaloj kaj pantofloj plene transformis la ĵurnal-laborantojn de kapitalisma mondo. Ili ekestis ege similaj al nejunaj sovetiaj oficistoj, kaj elvokis turmentan deziron purigi ilin, pridemandi kion ili faris ĝis la revolucio, ĉu ne estas ili burokratoj aŭ napkapuloj, kaj ĉu ĉio ordas ĉe ili de flanko de iliaj parencoj.

Malfrunokte la laborema «ŝafeto», ĉirkaŭpendigita per flagoj kaj hirlandoj, entiris la specialan trajnon en stacion Tondranta Fonto, lokon de la relkuniĝo. Kinofilmistoj bruligis siajn torĉojn. En ilia fortega blanka lumo staris estro de la konstruado, emociplene rigardanta la trajnon. En la vagonoj forestis lumoj. Ĉiuj

dormis. Kaj nur registara vagono brilis per la grandaj kvadrataj fenestroj. Ĝia pordo rapide malfermiĝis, kaj sur la malaltan teron elsaltis ano de la registaro.

Estro de la Ĉefvojo faris paŝon antaŭen, salutis armee, kaj diris raporton, kiun atendis la tuta lando. Orienta Ĉefvojo, kuniginta per rekta linio Siberion kun Centra Azio, estis pekonstruita je unu jaro pli frue ol laŭ la plano.

Kiam la formalaj estis plenumita, la raporto – donita kaj ricevita, la du nejunaj kaj nesentimentalaj homoj interkisis.

Ĉiuj korespondantoj, kaj sovetiaj kaj alilandaj, ankaŭ Lavuazjan, kiu senpacience sendis telegramon pri fumo elamasiginta el la lokomotiva tubo, kaj la kanadia junulino, kiu haste venis el trans oceano, – ĉiuj dormis.

Nur Palamidov tumultis sur la freŝa taluso, serĉante telegrafon. Li elkalkulis ke se li senprokraste sendos urĝan telegramon, ĝi sukcesos aperi en la matena numero. Kaj en la nigra dezerto li sukcesis trovi haste kunnajlitan kabanon de telegrafo.

«brilo de steloj», – skribis li, kolerante je la krajono, – «estis raportite pri plenumo de la ĉefvojkonstruado pkt ĉeestis historian interkison estro de ĉefvojo kun ano de la registaro palamidov».

Unuan parton de la telegramo la redakcio

publikigis, sed la interkison forlasis. La redaktoro diris ke interkisoj ne estas decaj al ano de registaro.

Ĉapitro 29

Tondranta Fosto

Suno leviĝis super la monteta dezerto je la 5-a 02 minutoj 46 sekundoj. Ostap leviĝis post unu minuto. Fotoĵurnalisto Menšov jam ĉirkaŭpendigis sin per saketoj kaj rimenoj. La kaskedon li surkapigis inverse, por ke la viziero ne malhelpu rigardi en la celilon. La fotografisto anticipis grandan tagon. Ankaŭ Ostap esperis pri granda tago, do, eĉ ne lavinte sin, li elsaltis el la vagono. La flavan paperujon li prenis kun si.

Trajnoj, venigintaj gastojn el Moskvo, Siberio kaj Centra Azio, estigis stratojn kaj interstratojn. La vagonaroj de ĉiuj flankoj sieĝis la tribunon, raŭkis vapor-lokomotivoj, blanka vaporo haltetis sur longa tola slogano: «La Ĉefvojo – unua ido de la kvinjara plano».

Ĉiuj ankoraŭ dormis, kaj malvarmeta vento frapis per flagoj sur la malplena tribuno kiam Ostap ekvidis ke pura horizonto de la tre diversnivela ĉirkaŭaĵo subite malklariĝas pro eksplodoj da polvo. El post la montetoj de ĉiuj flankoj eliĝis pintaj ĉapoj. Miloj da rajdantoj, sidante sur siaj lignaj seloj, kaj instigante la multharajn ĉevaletojn, rapidis al ligna fosto, kiu troviĝis sur loko kiu antaŭ du jaroj estis elektita

estiel loko de estonta relkuniĝo.

La nomadoj rajdis tut-klane. Moviĝis patroj de familioj, virece rajdis la edzinoj, infanoj moviĝis trioje sur propraj ĉevaletoj, kaj eĉ malicaj bopatrinoj, ankaŭ tiuj sendis antaŭen siajn fidelajn ĉevalojn, batante ilin per la kalkanumoj sub la ventron. La rajdaj grupoj turniĝis en la polvo, galopis en la kampo kun ruĝaj flagoj, etendiĝis sur la piedingo kaj, turniĝinte flanken, scivole pririgardis la miraklaĵojn. Miraklaĵoj estis multaj: trajnoj, reloj, bravulaj figuroj de kinofilmistoj, krada manĝejo, subite elkreskita sur la malplena loko, kaj laŭtparoliloj, el kiuj aŭdiĝis freŝa voĉo «unu, du, tri, kvar, kvin, ses»: oni kontrolis pretecon de la radioaparataro. Du instalaj urbetoj, du konstruaj entreprenoj sur la radoj, kun remizoj da materialoj, kun manĝejoj, kancelarioj, banejoj, kaj loĝejoj por la laboristoj, staris ĉe la tribunon unu kontraŭ la alia, dividitaj nur per dudek metroj da ŝpaloj, ankoraŭ ne trakudritaj per reloj. Sur tiu ĉi loko kuŝos lasta relo, kaj estos enmarteligita lasta najlego. Sur kapo de Suda urbeto pendis slogano: «Donu Nordon!». Sur kapo de la Norda – «Donu Sudon!».

Laboristoj de la ambaŭ urbetoj kuniĝis en unu amason. Ili renkontiĝis unue, kvankam konis kaj memoris unu pri la alia de komenco mem de la konstruado, kiam ilin dividis miloj kaj duono da kilometroj de dezerto, rokoj, lagoj kaj

riveroj. Konkuro dum la laboro plirapidigis la rendevuon je unu jaro. Dum lasta monato oni muntis relojn kure. Kaj Nordo kaj Sudo vervis eniri Tondrantan Fonton unua. Gajnis Nordo.

Ostap ekkuris al vagonoj de Norda urbeto, sed la urbeto estis malplena. Ĉiuj ĝiaj loĝantoj foriris al la tribunon, antaŭ kiu sidis jam muzikistoj. Brulvundante la lipojn per la varmegaj metalaj buŝpecoj ili ludis uverturon.

Sovetiaj ĵurnalistoj okupis maldekstran alon de la tribunon. Lavuazjan, kliniĝinte soben, petegis na Menšov fotografi lin dum plenumo de la oficaĵ taskoj. Sed Menšov ne havis tempon por tio. Li fotografis avangardulojn de Ĉefvojo grupe kaj aparte, igante la martelistojn svingi la martelegojn, kaj fosistojn apogi la fosilojn. Sur dekstra alo sidis alilandanoj.

Soldatoj, ĉe eniroj sur la tribunon, kontrolis invitbiletojn. Ostap ne havis la bileton. Intendanto de la trajno disdonis ilin laŭ listo kie reprezentanto de «Nigramarska gazeto» O. Bender ne estis registrita. Vane Hargantua logis la grandan kombinanton veni supren, kriante: «Ĉu vere, ĉu ĝuste?» – Ostap nee turnis la kapon, movante la rigardon sur la tribunon kie malvaste sidis la herooj kaj gastoj. En la unua vico trankvile sidis registristo de Norda instala urbeto Aleksandr Korejko. Por gardi la kapon de suno li ŝirmis ĝin per ĵurnalpapera triangula ĉapo. Li iom eligis la orelon por pli bone aŭdi

unuan parolanton, kiu jam trapuŝiĝis al la mikrofono.

– Aleksandr Ivanoviĉ! – kriis Ostap, kuniginte la manojn tube.

Korejko ekrigardis soben kaj leviĝis. La muzikistoj ekludis himnon "Internacio". Sed la riĉa registristo aŭskultis ĝin neatente. Tumulta figuro de la granda kombinanto, kiu kuradis sur la terpeco platigita por la lastaj reloj, tuj senigis lin de la anima trankvilo. Li rigardis trans kapojn de la amaso, meditante kien forkuri, sed ĉirkaŭe estis dezerto.

Dek kvin milo da rajdantoj senĉese moviĝis antaŭen kaj malantaŭen, dekfoje travadis la malvarman rivereton, kaj nur al komenco de la mitingo lokiĝis surĉevale post la tribuno. Sed kelkaj, sinĝenaj kaj fieraj, ĝis fino de la tago mem intermitis sur pintoj de la montetoj, ne decidante proksimiĝi al la murmuranta kaj muĝanta mitingo.

Konstruistoj de la Ĉefvojo festis sian venkon brue, gaje, kun krioj, kun muziko kaj suprenĵetado de la ŝatatoj kaj herooj. Sur la taluson sonore ekfalis la reloj. Dum minuto ili estis lokigitaj, kaj laboristoj-muntistoj, enmarteligintaj milionojn da najlegoj, prezentis rajton de lastaj batoj al siaj estroj.

– Laŭ leĝoj de gastamo, – diris la bufedisto, sidanta kun la kuiristoj sur tegmento de la vagono-restoracio.

Inĝeniero-orden-portanto retroŝovis la grandan feltan ĉapelon, kaptis la martelegon kun longa tenilo kaj, farante ploran mienon, ekbatis... la teron. Tiun ĉi proceduron akompanis amika rido de najlegistoj, inter kiuj estis forteguloj, enigantaj najlegon per unu bato. Tamen molaj batoj sur la teron baldaŭ ekestis intermitaj kun batoj sonoraj, kiuj atestis ke la martelo iam kontaktas la najlegon. La martelegojn svingis regiona sekretario de la partio, anoj de la registaro, estroj de Nordo kaj Sudo. Kaj la gastoj. Lastan najlegon, dum nur ĉirkaŭ duonhoro, enigis en la ŝpalon estro de la konstruado.

Komenciĝis paroladoj. Ilin oni prononcis dufoje: kazaĥe kaj ruse.

- Kamaradoj, - malrapide diris najlegisto-avangardulo, penante ne rigardi ordenon de Ruĝa Standardo, ĵus fiksitan sur lian ĉemizon, - kio estas farita, tion oni faris, kaj ne valoras multe paroli pri tio. Sed de ĉiu nia instala kolektivo jen peto al la registaro: ni petas senprokraste sendi nin al nova konstruado. Ni bone kunlaboris, kaj dum lastaj monatoj muntis po kvin kilometroj da reloj tage. Ni promesas tiun ĉi normon teni kaj altigi. Kaj vivu nia tutmonda revolucio! Kaj krom tio, kamaradoj, mi volis diri ke ŝpaloj venadis kun multe da difektoj, oni devis deĵeti ilin. Tiun ĉi aferon oni devas meti sur pli altan nivelon.

Korespondantoj jam ne povis plendi pri foresto de okazaĵoj. Ekestis varmege, polve kaj afereme. La mitingo en la dezerto ekfumis kiel grandega fajro. Lavuazjan, skribaĉinte dekon da linioj, kuris al la telegrafo, sendis urĝan telegramon, kaj denove komencis registri. Plimalbonigov registris nenion kaj telegramojn ne sendis. En lia poŝo kuŝis «Solena kompleto», kiu donis eblecon dum kvin minutoj verki perfektan korespondaĵon kun azia ornamaĵo. Estonto de Plimalbonigov estis garantiita. Tial li kun pli alta ol kutime satira noto en la voĉo diris al la kunfratoj:

– Ĉu vi penadas? Nu, nu!

Subite en loĝio de sovetiaj ĵurnalistoj aperis postrestintaj en Moskvo Lev Ĉemizov kaj Jan Sidbenkov. Ilin prenis kun si avio, kiu frumatene alflugis la relkuniĝon. Ĝi alteriĝis dek kilometroj de Tondranta Fonto post malproksima monteto, sur natura aerodromo, kaj la fratoj-korespondantoj nur nun venis de tie piede. Apenaŭ salutante, Lev Ĉemizov kaj Jan Sidbenkov haste elpoŝigis la notlibretojn, kaj komencis kompensi la preterlasitan tempon.

Fotografiloj de alilandanoj klakis senĉese. Gorĝoj sekiĝis pro la paroladoj kaj pro la suno. La partoprenantoj pli kaj pli ofte rigardis soben, sur malvarman rivereton, sur la manĝejon, kie striaj ombroj kuŝis sur longegaj bankedaj tabloj, sur kiujn estis metitaj verdaj boteloj kun

natura gasakvo. Apude lokiĝis kioskoj, kien tempo de tempo kuris trinki partoprenantoj de la mitingo. Na Korejko turmentis soifo, sed li penis elteni tion sub sia infana triangulaĵo. La granda kombinanto de malproksime incitis lin, tenante super la kapo botelon da limonado kaj la flavan paperujon kun botetaj laĉoj.

Sur la tablon, apud la karafo kaj mikrofono, oni starigis knabinon infan-komunistinon.

- Nu, knabino, - gaje diris estro de la konstruado, - diru al ni, kion vi opinias pri Orienta Ĉefvojo?

Ne estus mirinde se la knabino subite frapus per la piedo kaj komencus: «Kamaradoj! Permesu al mi sumigi la atingojn, kiujn...» - kaj tiel plu, ĉar renkontiĝas ĉe ni modelaj infanoj, kiuj kun malgaja penado eldiras duhorajn paroladojn. Sed la infankomunistino de Tondranta Fonto per siaj malfortaj manetoj tuj kaptis bovon je la kornoj, kaj per alta ridinda voĉeto elkriis:

- Vivu la kvinjara plano!

Palamidov venis al la alilanda profesoro-ekonomiisto, dezirante ricevi de li intervjuon.

- Mi estas ravita, - diris la profesoro, - tuta konstruado, kiun mi vidis en Sovetio, estas grandioza. Mi ne dubas ke la kvinjara plano estos plenumita. Mi skribos pri tio.

Kaj, post duonjaro, li vere eldonis libron, en kiu li sur ducent paĝoj pruvis ke la kvinjara

plano estos plenumita dum antaŭ nomita tempo, kaj ke Sovetio estos unu el plej potencaj industriaj regnoj. Kaj sur ducent-unua paĝo la profesoro deklaris ke ĝuste pro tio oni devas kiom eble pli frue neniigi Sovetion, alie ĝi alportos naturan pereon al kapitalisma komunumo. La profesoro okazis persono pli agema ol babilema Hejnriĥ.

El post la monteto leviĝis la blanka avio. La kazaĥoj ĵetiĝis ĉiudirekten. La granda ombro de la avio traflugis la tribunon kaj, fleksiĝante, ekkuris en la dezerton. La kazaĥoj, kriante kaj levante la skurĝojn, ekgalopis post la ombro. La kinofilmistoj alarme ektornadis siajn aparatetojn. Ekestis eĉ pli malorde kaj polve. La mitingo finiĝis.

– Jen kio, kamaradoj, – diris Palamidov, hastante kune kun la plumfratoj en la manĝejon, – mi proponas interkonsenton: ne verku ni vulgaraĵojn.

– Vulgaraĵoj estas abomenaj! – subtenis Lavuazjan. – Ili estas teruraj.

Kaj dum vojo en la manĝejon la ĵurnalistoj unuvoĉe decidis ne mencii *Uzun-Kulak*, kio signifas Longa Orelo, kio siavice signifas: stepa telegrafo. Pri tio verkis ĉiuj kiuj vizitis Orienton, kaj estas turmente jam legi pri tio. Ne verku ni ankaŭ rakontojn sub titolo «Legendo de lago Isyk-Kul». Tedis jam vulgaraĵoj en orienta stilo!

Sur la malplena tribuno, inter cigared-

stumpoj, disŝiritaj skribaĵetoj kaj alportita el la dezerto sablo, sole sidis Korejko. Li ne decidiĝis sobiĝi.

– Deiru, Aleksandr Ivanoviĉ! – kriis Ostap. – kompatu vi vin! Gluto da malvarma gasita akvo! Ĉu? Vi ne volas? Do min kompatu! Mi volas manĝi! Ja malgraŭ ĉio mi ne foriros! Eble vi deziras ke mi kantu al vi serenadon de Ŝubert (Schubert) «Facilpaŝe alvenu vi, ho amikino»? Mi povas!

Sed Korejko ĉesis prokrasti. Ankaŭ sen serenado al li estis klare ke la mono estas fordoninda. Kliniĝinte kaj haltante sur ĉiu ŝtupo li komencis malsupreniĝi.

– Sur vi estas triangula ĉapo, ĉu? – petolis Ostap. – Sed kie la griza kampara jako? Vi eĉ ne kredos kiel mi enuis sen vi. Nu, saluton, saluton! Ĉu ni interkisu? Aŭ ni iru rekte en la grenejon, en la kavernon kie vi gardas viajn luidorojn!

– Antaŭ ĉio – tagmanĝi, – diris Korejko, kies lango sekiĝis pro la soifo kaj gratis kiel fajlilo.

– Jes, oni povas tagmanĝi. Sed ĉi-foje sen petolaĵoj. Cetere vi havas neniujn ŝancojn. Post la montetoj kuŝas miaj bravuloj, – por iu ajn okazo mensogis Ostap.

Kaj, elmemorinte la bravulojn, li ekmalĝojetis.

La tagmanĝo por la konstruantoj kaj la gastoj estis prezentita en eŭro-azia stilo.

Kazaĥoj lokiĝis sur tapiŝoj, subtirante la piedojn, kion en oriento faras ĉiuj, kaj en okcidento nur tajloroj. La kazaĥoj manĝis rizpladojn el blankaj teleroj, posttrinkis ilin per limonado. La eŭropanoj eksidis ĉe la tabloj.

Multe da laboro, zorgoj kaj nervoziĝoj eltenis konstruantoj de Ĉefvojo dum du jaroj da laboro. Sed ne malmulte da zorgoj okazigis al ili ordigo de la festa tagmanĝo en mezo de la dezerto. Oni longe preparolis menuon, azian kaj eŭropan. Longan disputon elvokis problemo de alkoholaĵoj. Dum kelkaj tagoj administracio de la konstruado similis Usonon antaŭ baloto de prezidento. Komenciĝis lukto inter subtenantoj de sekeco kaj malsekeco. Fine la partia ĉelo malaprobis alkoholaĵojn. Tiam aperis nova cirkonstanco: alilandanoj, diplomatoj, moskvanoj! Kiel nutri ilin pli elegante? Ja ili tie, en Londonoj kaj Nov-Jorkoj kutimiĝis al diversaj kulinariaj ekscesoj. Kaj jen el Taŝkento estis elvokita maljuna specialisto Ivan Osipoviĉ. Iam li estis ĉefkelnero en Moskvo ĉe fama Martjaniĉ, kaj nun ĝisvivadis siajn jarojn estante estro de ŝtata bufedejo ĉe Kokina bazaro.

– Do vi pripensu ĉion, Ivan Osipoviĉ, – oni diris al li en la administrejo, – por ne okazu fuŝaĵo. Alilandanoj estos. Oni devas fari ĉion iom pli bone, pli fasone.

– KREDU al mia vorto, – murmuris la maljunulo kun larmoj sur la okuloj, – ja kiujn

homojn mi nutris! Princon de Vurtenbergo priservis mi! Oni eĉ ne pagu al mi. Kial mi ne nutru homojn fine de mia vivo? Nutru mi ilin kaj mortu!

Ivan Osipoviĉ ege nervumis. Eksciinte pri difinitiva rezigno de alkoholaĵoj li preskaŭ malsaniĝis, sed lasi eŭropon sen tagmanĝo li ne kuraĝis. La prezentitan de li antaŭkalkulon oni tre limigis, kaj la oldulo, frustrante al si «Nutru mi kaj mortu», aldonis sesdek rublojn el sia ŝparmono. En tago de la tagmanĝo Ivan Osipoviĉ venis en naftalenita frako. Dum la mitingo li nervumis, rigardis la sunon, kaj alkrietis la nomadojn, kiuj pro nura scivolemo penis enrajdi la manĝejon. La oldulo minace svingis sur ilin la telertukon, kaj tintadis:

– Deiru, Ĝingiso, ĉu vi ne vidas kio okazas! Ho, Dio! Saŭco *pikan* staros tro longe. Kaj konsomeo kun *paŝoto* ne estas preta!

Sur la tablo jam staris antaŭmanĝo. Ĉio estis aranĝita ege bele kaj kun granda scipovo. Elstaris firmaj buŝtukoj, sur vitraj teleretoj kuŝis en glacio butero, tordita je florburĝonoj, haringoj tenis en la buŝoj ringetojn da cepo aŭ olivojn, estis floroj, kaj eĉ ordinara griza pano aspektis sufiĉe feste.

Fine la gastoj venis al la tablo. Ĉiuj estis polvitaj, ruĝaj pro la varmego, kaj tre malsataj. Neniu el ili similis princon de Vurtenbergo. Subite Ivan Osipoviĉ eksentis proksimiĝon de

malfeliĉo.

– Mi petas pardonon de la gastoj, – diris li pete, – ankoraŭ kvin minutetoj, kaj ni komencos tagmanĝi. Mi havas personan peton al vi – tuŝu nenion ĝis la komenco, por ke ĉio estu kiel decas.

Por unu minuto li forkuris en la kuirejon, mondume aldancante kaj, kiam revenis, portante sur plado iun paradan fiŝon, li ekvidis teruran scenon de disrabo de la tablo. Tio ĝis tiom ne similis prilaboritan far Ivan Osipoviĉ ceremonion de akcepto de la nutraĵoj, ke li haltis. Anglo kun tenisa talio senzorge manĝis panon kun butero, kaj Hejnriĥ, kliniĝinte super la tablo, eltiradis per la fingroj olivon el haringa buŝo. Sur la tablo ĉio miksiĝis. La gastoj, trankviligantaj la unuan malsaton, gaje interŝanĝis la impresojn.

– Kio estas tio? – demandis la oldulo per falinta voĉo.

– Sed kie estas supo, patreto? – kriis Hejnriĥ kun plenŝtopita buŝo.

Ivan Osipoviĉ respondis nenion. Li nur svingis la telertukon, kaj foriris. Postajn zorgojn li lasis al siaj subuloj.

Kiam la kombinantoj trapuŝiĝis al la tablo, dika homo kun nazo, pendanta kiel banano, prononcis unuan toston. Al sia ekstrema miro Ostap rekonis en li na inĝeniero Talmudovskij.

– Jes! Ni estas herooj! – kriis Talmudovskij,

etendante antaŭen glason da gasakvo. – Saluton al ni, konstruantoj de Ĉefvojo! Sed kiaj estas kondiĉoj de nia laboro, civitanoj! Mi diru, ekzemple, pri salajro. Mi ne kontraŭas, en la Ĉefvojo salajro estas pli bona ol en aliaj lokoj, sed kio pri kulturaj oportunaĵoj? Teatro forestas! Dezerto! Neniu kloako!.. Ne, en tiuj kondiĉoj mi labori ne povas!

– Kio li estas! – demandis unu alian la konstruistoj. – Ĉu vi konas lin?

Dume Talmudovskij jam eltiris el sub la tablo siajn valizojn.

– Kraĉis mi pri la kontrakto! – kriis li direktiĝante al la eliro. – Kio? Redoni translokiĝan monon? Nur per juĝo, nur per juĝo!

Kaj eĉ puŝante la manĝantojn per siaj valizoj, anstataŭ «pardonu» li krude kriis «nur per juĝo!».

Malfrunokte li jam ruliĝis en motora drezino, aliĝinte al laboristoj, veturantaj ofice al suda elfluo de Ĉefvojo. Talmudovskij sidis rajdiste sur la valizoj, kaj klarigis al la laboristoj kaŭzojn, pro kiuj honesta specialisto ne povas labori en tiu ĉi truo. Kun ili veturis hejmen ĉefkelnero Ivan Osipoviĉ. Pro la ĉagreno li ne sukcesis eĉ demeti la frakon. Li estis ege ebria.

– Barbaroj! – kriis li, elŝovante sin al la razanta vento, kaj minacante per la pugno derekte al Tondranta Fonto. – Tutan aranĝadon al porkoj hundaj!.. Na Anton Pavloviĉ Ĉeĥov mi

nutris, ankaŭ princon de Vurtenbergo!.. Revenu mi hejmen kaj mortu! Oni elmemoros tiam na Ivan Osipoviĉ. Aranĝu, oni diros, bankedan tablon por okdek kvar personoj, al porkoj hundaj. Sed estos neniu por fari tion! Forestas Ivan Osipoviĉ Trikartov! Mortis! Foriris li en mondon pli bonan, kie estas nek malsanoj, nek ve-spiroj, sed vivo senfina... E-ter-na memo-oro!

Kaj dum la oldulo funebradis sin mem, vostoĵ de lia frako krakis sur la vento kiel kojnoflagoj.

Ostap, ne donante al Korejko pe-manĝi la kompoton, levis lin de la tablo, kaj ektiris kvitiĝi. Per almetita ŝtupareto la kombinantoj engrimpis la ŝarĝvagonon, kie troviĝis kancelario de Norda instala urbeto, kaj kie staris faldebla tola lito de la registristo. Ĉi tie ili ŝlosiĝis.

Post la tagmanĝo, kiam specialaj pasaĝeroj ripozis, akumulante fortojn por partopreni la vesperan festadon, felietonisto Hargantua kaptis fratojn-korespondantojn ĉe malpermesita okupo. Lev Ĉemizov kaj Jan Sidbenkov portis al telegrafo du paperfoliojn. Sur unu el ili estis mallonga informo:

«urĝe moskvo stepa telegrafo streko
uzun-kulak disportis aulojn sciigon
okazinta relkuniĝo ĉemizov».

La dua folio estis plenskribita. Jen kion ĝi

enhavis:

LEGENDO PRI LAGO ISIK-KUL

Maljuna karakalpako Uĥum Buĥeev rakontis al mi tiun ĉi legendon, kovritan per spiro de centjaroj. Antaŭ ducent mil kvarcent okdek kvin lunoj juna, rapidkura kiel ĝejran (monta ŝafo), edzino de la ĥano belulino Sumburun arde ekamis junan nukeron (soldaton) Aj-Bulak. Ega estis ĉagreno de la maljuna ĥano, kiam li eksciis pri perfido de la pasie amata edzino. Dudek lunoj preĝis la maljunulo, kaj poste kun larmoj sur la okuloj sigelfermis li la belulinon en barelon kaj, alliginte al ĝi fandblokon da pura oro pezantan sep ĝasasin (18 kilogramoj) ĵetis li la valoregan portaĵon en la montan lagon. De tiam la lago ricevis sian nomon Isyk-Kul, kio signifas «Koro de junulino inklinas al perfido»...

Jan Sidbenkov-Sarmatskij (Piŝto).

– Ĉu vere? – demandis Hargantua, montrante la foliojn elŝiritajn de la fratoj. – Ĉu ĝuste?

– Certe tio estas indignaĵo! – respondis Palamidov. – Kial vi aŭdacis skribi la legendon post ĉio kio estis parolita? Laŭ vi, Isyk-Kul tradukiĝas estiel «Koro de junulino inkliniĝas al perfido». Ĉu vere? Ĉu ne mensogis al vi neekzistanta karakalpako Uĥum Buĥeev? Ĉu ne signifas nomo de la lago tion: «Ne ĵetu junajn belulinojn en la lagon, sed ĵetu en ĝin kredemajn ĵurnalistojn, kiuj cedas al pereiga influo de ekzotiko»?

Verkisto en infana jaketo ruĝiĝis. En lia

notlibro jam troviĝis kaj Uzun-Kulak, kaj du aromaj legendoj, provizitaj per orienta ornamo.

– Sed laŭ mi, – diris li, – en tio ĉi estas nenio timiga. Se Uzun-Kulak ekzistas, do iu devas verki pri ĝi, ĉu?

– Sed oni jam milfoje verkis! – diris Lavuazjan.

– Uzun-Kulak ekzistas, – suspiris la verkisto, – kaj tion oni devas rekoni.

Ĉapitro 30

Aleksandr Ibn-Ivanoviĉ

Aero en varmigita kaj malluma ŝarĝvagono estis densa kaj stabila, kiel en malnova boteto. Starisodoro de ledo kaj piedoj. Korejko lumigis konduktorlan lanternon, kaj ekgrimpis sub la liton. Ostap pripense rigardis lin, sidante sur malplena por-makaronia kesto. La ambaŭ kombinantoj estis lacigitaj per la lukto, kaj rilatis al la okazaĵo, kiun Korejko ege timis, kaj kiun Bender atendis la tutan vivon, kun iu fiska trankvilo. Povis eĉ ŝajni ke la afero okazas en kooperativa vendejo: aĉetanto petas kapveston, kaj la vendisto maldiligente elĵetas sur la vendotablon vilan kaskedon de pavimŝtona koloro. Al li estas tute egale ĉu prenos la aĉetanto la kaskedon aŭ ne prenos. Kaj ankaŭ la

aĉetanto ne tre ardas, demandante nur por trankviligi la konsciencon: «Eble estas aliaj?» al kio kutime sekvas respondo: «Prenu, prenu, ĉar ankaŭ tio forestos». Kaj ambaŭ ili rigardas unu la alian kun plena indiferento. Korejko longe okupiĝis sub la lito, malŝlosante ŝajne kovrilon de la valizo, kaj serĉante en ĝi palpe.

– Hej tie, sur la skuno! – lace kriis Ostap. – Kia feliĉo ke vi ne fumas! Peti cigaredon de avarulo estiel vi estus tre turmente. Vi neniam etendus la cigaredujon, timante ke anstataŭ unu oni prenos de vi kelkajn, kaj longe serĉus palpe en la poŝo, malfacile malfermante la skatoleton kaj eltirante el ĝi cigaredon kurbigitan kaj kompatindan. Nebona vi estas homo. Kial vi ne eltiru la tutan valizon!

– Jen kio! – elgrumblis Korejko, sufokiĝante sub la lito.

Komparo kun avarulo-fumanto estis malagraba al li. Ĝuste tiumomente li eltiris el la valizo diketajn faskojn. Nikelizita langeto de la seruro gratis liajn nudigitajn ĝis la kubuto brakojn. Por oportuneco li ekkuŝis sur la dorson, kaj daŭrigis la laboron kiel karboministo. En okulojn de la milionulo ŝutiĝis, el la matraco, spik-pikiloj, iu pulvoro, kaj ceteraj pajlaj aĉaĵoj.

«Ho kiel malbone», – pensis Aleksandr Ivanoviĉ, – «malbone kaj time! Kio se li subite sufokos min kaj prenos la tutan monon? Tre simple. Distranĉos la korpon je pecoj kaj sendos

per malrapida poŝto en diversajn urbojn. Kaj la kapon fermentigos en barelo kun brasiko».

Na Korejko traigis kela malsekeco. Li elrigardis time el sub la lito.

Bender dormetis sur sia kesto, klininte la kapon al la fervoja lanterno.

[Вот я и миллионер](#) («Jen mi estas milionulo»)

«Kaj eble mi lin... per malrapida poŝto...» – pensis Aleksandr Ivanoviĉ, daŭrigante eltiri la faskojn kaj teruriĝante – «en diversajn urbojn? Tute sekrete. Ĉu?»

Li denove elrigardis. La granda kombinanto etendiĝis, kaj oscedis furioze, kiel dogo. Poste li prenis la konduktoran lanternon, kaj komencis svingi ĝin, elkriante:

– Stacio Ĥacepetovka! Eliru, civitano! Alveturis ni! Bonokaze, mi tute forgesis diri al vi: eble vi intencas pe-tranĉi min? Do sciu: mi ne konsentas. Krom tio oni jam mortigis min unufoje. Estis tia malracia maljunulo el bona familio, iama gvidanto de nobelaro, kaj poste registristo de civilaj aktoj Kisa Vorobjaninov. Ni, kontraktiĝinte, serĉadis feliĉon je sumo cent kvindek mil rubloj. Kaj jen, antaŭ divido mem de la akirita sumo, la stulta gvidanto tranĉ-batis mian kolon per razilo. Ho kiel tio estis banale, Korejko! Banale kaj dolore! Kirurgoj longe penis savi mian junan vivon, pro kio mi estas ege danka al ili.

Fine Korejko elgrimis el sub la lito, alŝovante al piedoj de Ostap faskojn da monbiletoj. Ĉiu fasko estis akurate ĉirkaŭgluita per blanka papero, kaj ligita per ŝnureto.

- Naŭdek naŭ faskoj, - diris Korejko malgaje, - je dek mil ĉiu. Per bankbiletoj ducent-kvindek-rublaj. Vi povas ne kontroli, ĉe mi - kiel en banko.

- Kaj kie estas centa fasko? - demandis Ostap entuziasme.

- Dek mil mi deprenis. Konte al pirabo sur la mara bordo.

- Nu, tio estas porkaĵo. La mono estis eluzita por vi. Ne okupiĝu pri formalajĵoj.

Korejko, suspirante, eldonis la mankantan monon, anstataŭ kio li ricevis sian vivpriskribon en flava paperujo kun botetaj laĉoj. La vivpriskribon li tuj forbrulis en fera forno, kies tubo eliris tra tegmento de la vagono. Ostap dume prenis, por kontroli, unu el la faskoj, deŝiris la volvaĵon kaj, konvinkiĝinte ke Korejko ne trompis, enŝovis ĝin en la poŝon.

- Sed kie estas valuto? - riproĉe diris la granda kombinanto. Kie estas meksikaj dolaroj, turkiaj liroj, kie estas pundoj, rupioj, pesetoj, rumaniaj levoj, kaj zlotoj? Donu eĉ parton per valuto!

- Prenu, prenu kio estas, - respondis Korejko, sidante antaŭ la forno kaj rigardante la dokumentojn, konvulsiantajn en la flamo, -

prenu, ĉar post nelonge ankaŭ tio forestos. Mi ne tenas valuton.

– Jen mi estas milionulo! – elkriis Ostap kun gaja miro. – Efektiviĝis revoj de idioto!

Subite Ostap malgajiĝis. Lin konsternis ordinareco de la medio, al li ŝajnis strange ke mondo ne ŝanĝiĝis samsekunde, kaj ke nenio, tute nenio okazis ĉirkaŭe. Kaj, kvankam li sciis ke en nia severa tempo estas rajtigitaj neniuj misteraj kavernoj, bareletoj kun oro, kaj lampoj de Aladino, malgraŭ tio li bedaŭris ion. Al li ekestis iom enue, same kiel al Roald (Rual) Amundsen kiam tiu, transflugante en zepelino «Norge» nordan poluson, kiun li penis atingi tutan sian vivon, diris sen entuziasmo al siaj kunuloj: «Nu, jen ni venis». Sube estis rompita glacio, fendoj, malvarmo kaj malpleno. La mistero estas jam malkaŝita, la celo atingita, ne restis kion fari plu, kaj necesas ŝanĝi la profesion. Sed la malĝojo estas minuta, ĉar antaŭe estas famo, honoro kaj estimo: sonas ĥoroj, staras spaliroj da gimnaziinoj en blankaj antaŭtukoj, ploras maljunulinoj-patrinaj de polusregionaj esploristoj, kiujn pe-manĝis iliaj ekspedici-kamaradoj, oni plenumas naciajn himnojn, elpafas raketojn, kaj maljuna reĝo premas la esploriston al siaj pikaj ordenoj kaj steloj.

La minuta malforteco pasis. Ostap enĵetis la faskojn en saketon, afable proponitan per

Aleksandr Ivanoviĉ, prenis ĝin sub la brakon, kaj deruligis pezan pordon de la ŝarĝa vagono.

La festeno finiĝadis. Raketoj kiel oraj fiŝhokoj estis enĵetataj en la ĉielon, elkaptante de tie ruĝajn kaj verdajn fiŝetojn, malvarma flamo ŝprucis en okulojn, turniĝis piroteknikaj sunoj. Sur ligna scenejo, post kabano de la telegrafo, estis prezentata spektaklo por la namadoj. Kelkaj el ili sidis sur benkoj, kaj aliaj spektis de alto de siaj seloj. Ofte henis ĉevaloj. La speciala trajno estis lumigita de vosto ĝis la kapo.

- Hej! - kriis Ostap. - Bankedo en vogono-restoracio! Mi forgesis! Kia ĝojo! Iru, Korejko, mi vin regalos, mi ĉiujn regalos! Laŭ leĝoj de gastamo! Konjako kun citroneto, buloj el ĉasaĵo, frikando kun ĉampinjonoj, malnova hungara, nova hungara, ĉampana vino!..

- Frikando, frikando, - diris Korejko malice, - kaj poste oni arestos. Mi ne volas reklami min!

- Mi promesas al vi paradizan vespermanĝon sur blanka tablotuko, - insistis Ostap. - Iru ni, iru! Kaj, entute, lasu vi vian ermitecon, rapidu eldrinki vian parton da alkoholaĵoj, formanĝi viajn dudek mil kotletojn. Alie alkuros eksteraj personoj, kaj pe-voros vian porcion. Mi ordigos vin en la specialan trajnon, mi estas plenrajtulo tie, kaj jam morgaŭ ni estos en relative civiliza loko. Kaj tie, kun niaj

milionoj... Aleksandr Ivanoviĉ!..

La granda kombinanto deziris nun fari bonon al ĉiuj, li volis ke al ĉiuj estu gaje. Malluma vizaĝo de Korejko ĝenis lin. Kaj li komencis konvinki na Aleksandr Ivanoviĉ. Li estis konsenta pri tio ke ne decas afiŝi sin, sed por kio turmenti sin per malsato? Ostap mem ne tro bone komprenis por kio li volas gajigi la registriston, sed, komencinte, li ne povis jam halti. Fine li komencis eĉ minaci:

– Ja sidos vi sur via valizo, kaj en unu bela tageto venos al vi la ostula kaj, per la falĉilo – la kolon. Ha? Ĉu vi imagas tiun ĉi atrakcion? Rapidu, Aleksandr Ivanoviĉ, la kotletoj ankoraŭ troviĝas sur la tablo. Ne estu obstina.

Post perdo de la miliono Korejko ekestis pli mola kaj akceptema.

– Eble mi vere iom aerumu min? – diris li nekonvinke. – Veturu mi en civilizon, ĉu? Sed, certe, sen ŝiko, sen husareco.

– Kiu ja husareco! Simple du kuracistoj soci-agantoj veturas en Moskvon por viziti Artan teatron, kaj propraokule pririgardi mumion en Muzeo de elegantaj artoj. Prenu la valizon.

La milionuloj ekiris al la trajno. Ostap malzorge, kiel incensilon svingis sian sakon. Aleksandr Ivanoviĉ smajlis plej stulte. Special-trajnaj pasaĝeroj promenis, penante teni sin pli proksime al la vagonoj, ĉar oni jam alkroĉadis la lokomotivon. En mallumo lumetis blankaj

pantalonoj de ĵurnalistoj.

En la kupeo, sur supra litbenko de Ostap, sub litotuko kuŝis kaj legis ĵurnalon nekonata al li homo.

- Nu, degrimpu, - amike diris Ostap. - Venis la mastro.

- Tio estas mia loko, kamarado, - rimarkis la nekonato. - Mi estas Lev Ĉemizov.

- Ĉu vi scias, Lev Ĉemizov, ne veku en mi beston, foriru de ĉi tie.

La grandan kombinanton puŝis al la lukto mira rigardo de Aleksandr Ivanoviĉ.

- Jen novaĵo, - diris la ĵurnalista arogante. - Kio vi estas?

- Ne via hunda afero! Oni diras al vi degrimpu, do degrimpu!

- Ĉiu ebrulo, - jelpe komencis Ĉemizov, - huliganados ĉi tie...

Ostap silente kaptis nudan piedon de la korespondanto. Al krioj de Ĉemizov kunkuris la tuta vagono. Korejko por iu ajn okazo fuĝis en enirejon.

- Ĉu vi interbatiĝas? - demandis Plimalbonigov. - Nu, nu.

Na Ostap, kiu jam sukcesis frapi per la sako kapon de Ĉemizov, tenis je la brakoj Hargantua kaj dika verkisto en infana jaketo.

- Montru li la bileton! - kriaĉis la granda kombinanto. - Porlokan karton li montru!

Ĉemizov, tute nuda, saltis de benko sur

benkon kaj postulis intendanton. Ostap, deŝiriĝinta de realeco, ankaŭ postulis voki estrojn. La skandalon kronis granda malagrabraĵo. Ĉemizov montris la bileton kaj la lok-karton, post kio per tragedia voĉo li ekpostulis samon de Bender.

– Sed mi ne montros pro la principo! – deklaris la granda kombinanto, haste lasante lokon de la okazaĵo. – Tiaj estas miaj principoj!

– Leporo! – jelpis Lev Ĉemizov, nude elsaltanta en la koridoron. –

Mi rimarkigas vin, kamarado intendanto, ke ĉi tie veturis **leporo** ²⁷!

– Kie estas leporo? – kriis la intendanto, en kies okuloj aperis ĉasist-hunda brilo.

Aleksandr Ivanoviĉ, time kaŝinta sin post elstarajo de la tribuno, enrigardis la mallumon, sed povis distingi nenion. Apud la vagono baraktis figuroj, saltis cigaredlumetoj, kaj aŭdiĝis voĉoj: «Bonvolu prezenti!» – «Sed mi diras al vi ke el principo!» – «Huliganismo!» – «Ĉu vere? Ĉu ĝuste?» – «Sed devas iu veturi sen bileto!». Frapiĝis la intervagonaj teleregoj; ĉe tero mem, siblante, preterkuris bremsa aero, kaj lumaj fenestroj de la vagonoj ekmoviĝis. Ostap daŭre kuraĝadis, sed preter li jam veturis striigitaj divanoj, bagaĝaj retetoj, konduktoroj kun la lanternoj, bukedoj, kaj plafonaj helicoj

27. leporo: Ĉu nur en Rusio senbiletulon oni mok-nomas «leporo»?

de vagono-restoracio. Forveturis la bankedo kun ĉampagna vino, kun la malnova kaj nova hungara. Buloj el ĉasaĵo elŝiriĝis el la manoj, kaj forhastis en la nokton. Frikando, tenera frikando, pri kiu tiel varme parolis Ostap, lasis na Tondranta Fonto. Aleksandr Ivanoviĉ proksimiĝis.

- Tio ne restos senpuna, - grumblis Ostap.
- Oni lasis en dezerto korespondanton de sovetia gazetaro! Mi alarmigos tutan socion. Korejko! Ni elveturu per unua jam rapidega trajno! Ni aĉetos ĉiujn lokojn en unuaklasa vagono!

- Pri kio vi, - diris Korejko, - kiu ja rapidega! De ĉi tie iras neniuj trajnoj. La ekspluatado, laŭ plano, komenciĝos nur post du monatoj.

Ostap levis la kapon. Li ekvidis nigran abisenan ĉielon, sovaĝajn stelojn, kaj komprenis ĉion. Sed timida memorigo de Korejko pri bankedo aldonis al li novajn fortojn.

- Post la monteto staras avio, - diris Bender, - kiu alflugis por la solenaĵo. Ĝi forflugos nur mateniĝe. Ni sukcesos.

La milionuloj, por ne malfruiĝi, ekiris per grandaj dromaderaj paŝoj. Brulis fajroj de nomadoj, la piedoj disŝoviĝis en la sablo, porti la valizon kaj la sakon estis ne tiom malfacile kiel ekstreme abomene. Dum ili grimpis sur la monteton de flanko de Tondranta Fonto, de

transa flanko, ĉe krakado de la helicoj, almoviĝis la mateniĝo. Soben de la monteto Bender kaj Korejko jam kuris, timante ke la avio forflugos sen ili.

Sub la altaj kiel tegmento ripigitaj flugiloj de la avio iris etaj mekanikistoj en ledaj paltoj. Tri helicoj malforte turniĝis, ventumante la dezerton.

Sur kvadrataj fenestroj de la pasaĝera kupeo pendis kurtenoj kun pluŝaj globetoj. La piloto apogis sian dorson al la alumina ŝtupeto, kaj manĝis kuketon, posttrinkante ĝin per elbotela gasakvo.

- Ni estas pasaĝeroj, - kriis Ostap sufokiĝante, - du biletojn de unua klaso!

Neniu respondis al li. La piloto forĵetis la botelon, kaj komencis surtiri la gantojn.

- Ĉu estas lokoj? - ripetis Ostap, kaptante la piloton je la brako.

- Ni ne prenas pasaĝerojn, - diris la piloto, prenante per la mano la ŝtupar-barilon. - Tio estas speciala flugo.

- Mi aĉetas la avion! - haste diris la granda kombinanto. - Volvu ĝin en paperon.

- For de la vojo! - kriis la mekanikisto, leviĝante post la piloto.

La helicoj malaperis en rapida turniĝo. Tremante kaj balanc-irante, la avio komencis turniĝi kontraŭ la vento. La aeraj turnoblovoj forpuŝis la milionulojn reen al la monteto. De

Ostap forŝiriĝis la ŝipestra kaskedo kaj ekruĝis en direkton de Hindio kun tiu rapideco, ke ĝian venon na Kalkato oni devis atendi ne pli malfrue ol post tri horoj. Tiel ĝi enruliĝus sur ĉefan straton de Kalkato, elvokante per sia enigma apero atenton de rondoj, proksimaj al *Inteliĝens-Servis*, se la avio ne forflugus, kaj la tempesto ne ĉesiĝus. La avio ekbriletis en la aero per la flugilaj ripoj, kaj malaperis en la suna lumo. Ostap kuris post la kaskedo, kiu ekpendis sur dezerta arbusteto, kaj diris:

– Transportiloj ĉesis obeadi nin. Kun fervojo ni kvereliĝis. Flugtransporto estas fermita por ni. Ĉu ni iru piede? Kvarcent kilometroj. Tio ne emociigas. Restis nur akcepti islamon kaj rajdi sur kameloj.

Islamon Korejko prisilentis, sed ideo pri kameloj al li ekplaĉis. Alloga aspekto de la vagono-restoracio kaj de la avio plifortigis lin en deziro okazigi distran veturadon de kuracisto soci-aganto, certe sen diboĉo, sed ne sen ioma braveco.

Portempaj loĝejoj de nomadoj, venintaj al la relkuniĝo, ankoraŭ ne malaperis, do ili, proksime al Tondranta Fonto, sukcesis aĉeti kamelojn. Ŝipoj de dezerto kostis po cent okdek rubloj.

– Kiel ĉipe! – elflustris Ostap. – Aĉetu ni kvindek kamelojn. Aŭ cent!

– Tio estas husareco – malserene diris

Aleksandr Ivanoviĉ. – Kion fari pri ili? Ankaŭ du sufiĉas.

La kazaĥoj kun krioj sidigis la vojaĝantojn inter la ĝiboj, helpis alligi la valizon, sakon, kaj provianton por la vojo: felsakon kun kumiso, kaj du ŝafojn. La kameloj leviĝis komence per la malantaŭaj piedoj, pro kio la milionuloj profunde kliniĝis, kaj poste per la antaŭaj piedoj, kaj ekiris laŭ Orienta Ĉefvojo. La ŝafoj, alligitaj per ŝnuretoj, kuretis malantaŭe, tempo de tempo elruligante globetojn, kaj korŝire blekante.

– Hej, ŝejko Korejko! – kriis Ostap. – Aleksandr Ibn-Ivanoviĉ! Ĉu la vivo estas belega?

La ŝejko respondis nenion. Lia kamelo okazis maldiligenta, kaj li furioze batis ĝian kalvan postaĵon per arbusta bastono.

Ĉapitro 31

Bagdad

Sep tagoj trenigis kameloj la novaperintajn ŝejkojn sur la dezerto. Komence de la vojaĝo Ostap gajis plenanime. Ĉio ridigis lin: kaj baraktanta inter la kamelaj buloj Aleksandr Ibn-Ivanoviĉ, kaj la maldiligenta dezerta ŝipo, kiu penis eviti siajn taskojn, kaj la sako kun miliono, per kies batoj la granda kombinanto tempo de tempo vigligis la nehumilajn ŝafojn. Ostap nomis sin kolonelo Lourens (Lawrence).

Я впереди на белом верблюде
(«Antaŭ ĉiuj mi, sur blanka kamelo»)

– Mi estas emiro-dinamito! – kriis li, balanciĝante sur la altaĵo. Se post du tagoj ni ne ricevos taŭĝan manĝaĵon, mi ribeligos iujn ajn tribojn. Je mia vorto! Mi oficigos min rajtigito de la profeto, kaj deklaras sanktan militon, na *ĝihad*. Ekzemple al Danio. Kial la danlandanoj pe-turmentis sian princon Hamlet? Ĉe nunaj politikaj cirkonstancoj eĉ Ligo de Nacioj konsentos kun tiu ĉi preteksto al la milito. Je Dio, aĉetos mi de angloj milionon da fusiloj, ili ŝatas vendi paf-armilojn al triboj, kaj marŝ-marŝ en Danion. Germanio tralosas – je kosto de la reparacioj. Ĉu vi imagas al vi invadon de la triboj en Kopenhago? Antaŭ ĉiuj mi, sur blanka kamelo. Aĥ! Panikovskij forestas! Danian anseron al li!..

Sed post kelkaj tagoj, kiam de la ŝafoj restis nur ŝnuretoj, kaj la kumiso estis eltrinkita, eĉ la emiro-dinamito malgajiĝis, kaj nur melankolie murmuris:

– Tri palmoj fieraj en land’ orienta staraĉis por io en sabla dezerto.

La ambaŭ ŝejkoj signife malgrasiĝis, ĉirkaŭkreskis per barbetoj, kaj estis similaj al derviŝoj el neriĉa paroĥo.

– Ankoraŭ iom da tolero, Ibn-Korejko, – kaj ni atingos urbeton kiu ne cedas al Bagdad.

Plataj tegmentoj, aborigenaj orkestroj, restoracietoj en orienta stilo, dolĉaj vinoj, legendaj junulinoj, kaj kvardek mil rostostangoj kun ŝaŝlikoj kaŭkazaj, turkaj, mezopotamiaj kaj odesaj. Kaj, krom tio, fervojo.

Dum oka tago la vojaĝantoj alveturis antikvan tombejon. Ĝis horizonto mem treniĝis, per ŝtoniĝintaj ondoj, linioj da duonrondaj tomboj. Mortintojn ĉi tie oni ne enterigis. Oni metis ilin sur la teron, ĉirkaŭkonstruante ŝtonajn duonsferojn. Super la cindra urbo de mortintoj brilis terura suno. Antikva Oriento kuŝis en siaj varmegaj ĉerkoj.

La kombinantoj bat-instigis la kamelojn, kaj baldaŭ enrajdis la oazon.

Ĉirkaŭe videblis verdaj torĉoj da poploj, kiuj lumigis la urbon, respeguliĝante en akvigitaj kvadratoj de rizaj kampoj. Sole staris arboj nomataj tie «karagaĉ», kiuj reproduktis formon de giganta globuso sur ligna stangeto. Komencis renkontiĝi azenetoj, portantaj sur si dikajn rajdantojn en roboj, kaj faskojn da trifolio.

Korejko kaj Bender veturis preter butikoj, vendantaj verdan pulvoran tabakon, kaj fetoran konusan sapon, similan al kapetoj de ŝrapneloj. Metiistoj kun blankaj muslinaj barboj okupiĝis pri kupraj folioj, volvante ilin en pelvojn kaj mallarĝkolajn vazojn. Ŝuistoj sekigis sub suno etajn ledojn, farbitajn per inko. Malhelbluaj, flavaj kaj helbluaj kaheloj de moskeoj brilis per

likva vitra lumo.

Reston de la tago kaj nokto la milionuloj peze kaj sensente dormis en gastejo. Matene ili banis sin en blankaj kuvoj, raziĝis, kaj eliris la urbon. Sennuban humoron de la ŝejkoj difektis neceso tiri kun si la valizon kaj la sakon.

– Mi opinias ke mia unuagrada devo – diris Bender fanfarone, – estas konatigi vin kun mirakla keleto. «Sub luno». Mi estis ĉi tie antaŭ kvin jaroj, proksimume, prezentis lekcion pri lukto kontraŭ abortoj. Kia keleto! Duonlumo, malvarmeto, mastro el Tiflis, loka orkestro, malvarma vodko, dancistinoj kun karooj kaj cimbaloj. Enruliĝu ni tien por tuta tago. Povas ja ĉe kuracistoj soci-agantoj esti miniaturaj malfortaĵoj? Mi regalas. Ora bovido respondecas pri ĉio. Kaj la granda kombinanto skuis la sakon.

Sed keleto «Sub luno» jam forestis. Al miro de Ostap forestis eĉ la strato, kie sonis ĝiaj karooj kaj cimbaloj. Ĉi tie iris rekta eŭropa strato, kiun oni konstruadis je tuta ĝia longo samtempe. Staris bariloj, pendadis gipsa polvo, kaj ŝarĝaŭtoj ardigis ankaŭ sen tio varmegan aeron. Rigardante minuton la griz-brikajn fasadojn kun longaj kuŝaj fenestroj, Ostap puŝetis na Korejko kaj, dirinte: «Estas ankoraŭ unu loketo, tenas ĝin iu el Baku», kondukis lin en alian flankon de la urbo. Sed sur la loketo forestis jam versaĵa elpendaĵo, verkita persone

far la tavernisto el Baku:

**ESTIMU VI VIN
ESTIMU VI NIN,
ESTIMU KAŬKAZON,
VIZITU VI NIN**

Anstataŭ tio al okuloj de la ŝejkoj prezentiĝis kartona elpendaĵo kun arabaj kaj rusaj literoj:

URBA MUZEO DE ELEGANTAJ ARTOJ

- Eniru ni, - malgaje diris Ostap, - tie minimume estas malvarmete. Krom tio viziti muzeojn estas program-parto de vojaĝantaj kuracistoj soci-agantoj.

Ili enpaŝis grandan blankigitan per kredo ĉambron, ellasis sur la plankon siajn milionojn, kaj longe defrotis per la manikoj la varmegajn fruntojn. En la muzeo estis nur ok eksponaĵoj: dento de mamuto, donaco al la juna muzeo far urbo Taŝkent, olea pentraĵo "Kunpuŝiĝo kun *basmaĉanoj*²⁸», du roboj de emiro, ora fiŝeto en akvario, vitrino kun sekigita akrido, porcelana skulptaĵeto far fabriko de Kuznecov kaj, fine, modelo de obelisko, kiun la urbo intencis instali sur la ĉefa placo. Samloke, ĉe bazo de la projekto, kuŝis granda lada krono kun rubandoj. Ĝin alvenigis antaŭnelonge speciala delegacio el najbara respubliko sed, ĉar la obelisko anoraŭ

28. *basmaĉ*: kontraŭsovetia centr-azia gerilulo.

forestis (rimedoj asignitaj por ĝi foriris por konstrui banejon, kiu okazis multe pli necesa), la delegacio, prononcinte konvenajn paroladojn, metis la kronon ĉe la projekto.

Al la vizitantoj tuj alvenis junulo en tapiŝa buĥara vertoĉapo sur la razita kapo, kiu emociiĝante kiel aŭtoro, demandis:

– Viaj impresoj, kamaradoj?

– Ne malbone, – diris Ostap.

La juna homo estris la muzeon, kaj senprokraste komencis paroli pri malfacilaĵoj, kiuj trafas lian idon. Kreditoj ne sufiĉas. Taŝkento kontentiĝis per unu dento, kaj estas neniu kiu kolektus lokajn artajn kaj historiajn valorajojn. Oni ne alsendas profesiulon.

– Se oni donus al mi tricent rublojn! – kriis la administranto. – Mi Luvron ĉi tie farus!

– Diru, ĉu vi bone konas la urbon? – demandis Ostap, palpebruminte al Aleksandr Ivanoviĉ. – Ĉu vi povus indiki al ni kelkajn rimarkindaĵojn? Mi konis vian urbon, sed ĝi iel ŝanĝiĝis.

La administranto tre ekĝojis. Kriante ke ĉion li montros persone, li ŝlisis la muzeon per seruro, kaj kondukis la milionulojn sur saman straton, kie ili antaŭ duonhoro serĉis keleton «Sub luno».

– Prospekto je nomo de Socialismo! – diris li, plezure enspirante la gipsan polvon. – Aĥ! Kiel mirindas la aero! Kio estos ĉi tie post jaro!

Asfalto! Aŭtobuso! Instituto pri irigacio! Tropika instituto! Sed se ankaŭ ĉi-foje Taŝkento ne donos sciencajn fortojn... Ĉu vi scias, ĉe ili estas tiom da ostoj de mamuto, sed al mi ili sendis nur unu denton, dum en nia respubliko estas tia interesiĝo pri naturscienco.

- Ĉu tiel? - rimarkis Korejko, riproĉe rigardante na Ostap.

- Kaj ĉu vi scias, - ekflustris la entuziasto, - mi suspektas ke tio ne estas dento de mamuto. Ili ŝovis al mi la elefantan!

- Kaj kiel statas ĉe vi pri... tavernetoj en azia stilo, vi ja scias, kun timbaloj kaj flutoj? - senpacience demandis la granda kombinanto.

- Elvivigis ni, - indiferece respondis la junulo, - jam delonge oni devis ekstermi tiujn ĉi infektejojn, fontojn de epidemioj. Ĝuste ĉi-printempe ni pe-sufoketis lastan malĉastulejon. Ĝi nomiĝis «Sub luno».

- Pe-sufoketis? - aĥis Korejko.

- Je mia vorto! Sed kompanse estas malfermita fabriko-kuirejo. Eŭropaj manĝaĵoj. Teleroj estas lavataj kaj sekigataj per elektro. Kurbo de stomakaj malsanoj krute ekfalas.

- Kio okazas! - kriis la granda kombinanto, fermante la vizaĝon per la manoj.

- Sed vi ankoraŭ vidis nenion, - diris la administranto de la muzeo, konfuze ridante. - Veturu ni en la fabrikon-manĝejon tagmanĝi.

Ili eksidis benk-ĉaron sub tolan baldakenon

borderitan blue, kaj ekveturis.

Dum la vojo la afabla kondukanto ĉiuminute igis la milionulojn elŝoviĝi el sub la baldakeno, kaj montris al ili konstruaĵojn jam pe-itajn, konstruaĵojn komencitajn, kaj lokojn kie ili estos konstruataj. Korejko rigardis na Ostap per malicaj okuloj.

Багдад! («Bagdad»)

Ostap deturniĝadis kaj diris:

– Kia mirinda bazareto! Bagdad!

– La dek-sepan de ĉi-monato ni komencos detrui ĝin, – diris la juna homo, – ĉi tie estos hospitalo kaj kooperativa centro.

– Ĉu vi ne bedaŭras tiun ĉi ekzotikon? Ja tio estas Bagdad!

– Tre bele, – suspiris Korejko.

La juna homo ekkoleris:

– Tio por vi estas bele, por alveturantoj, sed ni ja devas vivi ĉi tie.

En granda halo de la fabriko-kuirejo, inter kahelaj muroj, sub paperaj glu-rubandaj muŝkaptiloj, kiuj pendis de la plafono, la vojaĝantoj manĝis hordean supon kaj etajn brunajn viandobulojn. Ostap informiĝis pri vino, sed ricevis entuziasman respondon ke, antaŭnelonge, apud la urbo estas trovita fonto de minerala akvo kiu, laŭ sia gusta kvalito, superas plej famajn el ili. Por pruvi tion estis postulata botelo da nova akvo, kaj pe-trinkita

ĉe funebra silento.

– Kaj kio pri kurbo de prostituado? – kun espero demandis Aleksandr Ibn-Ivanoviĉ.

– Abrupte ekiris soben, – respondis la senindulga junulo.

– Aj, kio okazas! – diris Ostap kun falsa rido.

Sed li vere ne sciis kio okazas. Kiam ili eliris de ĉe la tablo, evidentiĝis ke la juna homo sukcesis pagi por ĉiuj. Li decide ne volis preni monon de la milionuloj, kredigante ke jam postmorgaŭ li ricevos salajron, kaj ĝis tiu tempo li iel ajn elturniĝos.

– Nu, kaj kio pri gajeco? Kiel la urbo gajiĝas? – jam sen ekstazo demandis Ostap. Timbaloj, cimbaloj, ĉu?

– Ĉu vi ne scias! – miris administranto de la muzeo. Antaŭ semajno ĉe ni malfermiĝis urba filharmonio. Granda simfonia kvarteto nome de Bebel kaj Paganini. Veturu ni tuj. Kiel mi forgesis tion!

Post tio ke li pripagis la tagmanĝon, rifuzi de vizito en la filharmonion estis neeble pro etikaj konsideroj. Elirante de tie Aleksandr Ibn-Ivanoviĉ diris per voĉo de stratpurigisto:

– Urba harmoniumo!

La granda kombinanto ruĝiĝis.

Dum vojo en la gastejon la juna homo subite haltis la veturigiston, elirigis la milionulojn, prenis ilin je la manoj kaj, leviĝante

pro disblovanta lin jubilo sur pintojn de la piedoj, alkondukis ilin al eta ŝtono, ĉirkaŭbarita per reteto.

- Ĉi tie staros la obelisko! - diris li signifoplene. - Kolono de marksismo!

Adiaŭante, la juna homo petis alveturi pli ofte. Bonanima Ostap promesis nepre alveturi, ĉar ĝis nun li neniam havis tiom ĝojan tagon kiel la hodiaŭa.

- Mi - en la stacidomon, - diris Korejko, restinte sola kun Bender.

- Veturu ni en alian urbon diboĉi, ĉu? - demandis Ostap. - En Taŝkent oni povas gaje pasigi tri tagojn.

- Por mi sufiĉas, - respondis Aleksandr Ivanoviĉ, - mi veturu en la stacidomon deponi mian valizon, servu mi ie ĉi tie estiel kontoristo. Atendu mi kapitalismon. Jen kiam mi distriĝos.

- Do atendu, - diris Ostap sufiĉe krude, - sed mi veturu. Hodiaŭa tago - tio estas domaĝa miskompreno, surloka troigo. Ora bovido en nia lando havas ankoraŭ iun ajn potencon!

Sur la stacidoma placo ili ekvidis amason da special-trajnaj korespondantoj kiuj, post la relkuniĝo, ekskursis en Centra Azio. Ili ĉirkaŭigis na Plimalbonigov. Posedanto de la solena kompleto memkontente turnis sin ĉiudirekten, montrante siajn akiraĵojn. Sur li estis velura ĉapo, randaĵita per ŝakala vosto, kaj robo, tajlita el vata litkovrilo.

Profetaĵoj de la pluŝa profeto daŭre efektiviĝis.

Ĉapitro 32

Pordego de grandegaj eblecoj

En tiun malgajan kaj luman aŭtunan tagon, kiam en moskvaj skvaroj ĝardenistoj detranĉas florojn, kaj disdonas ilin al infanoj, ĉefa filo de leŭtenanto Ŝmit, Ŝura Balaganov, dormis sur benko en pasaĝera halo de Rjazana stacidomo. Li kuŝis, metinte la kapon sur lignan apogilon. La ĉifita kaskedo estis ŝovita sur la nazon. Laŭ ĉio videblis ke la ĉefmekanikisto de «Antilopo» kaj rajtigito pri hufoj estas malfeliĉa kaj almoza. Al lia nerazita vango algluiĝis dispecigita ova ŝelo. Liaj velŝtofaj ŝuoj tute perdis sian formon kaj koloron.

Sub vitrizita plafono de la halo flugis hirundoj. Post grandaj nelavitaj fenestroj videblis relkomutiloj, semaforoj, kaj ceteraj aĵoj necesaj en fervoja mastrumado. Ekkuris portistoj, kaj baldaŭ tra la halo ektiriĝis anaro de la veninta trajno. De la kajo eniris lasta pasaĝero en pura vesto. Sub la malbutonumita malpeza pluvmantelo videblis kostumo kun etetaj kalejdoskopaj kvadratetoj. La pantalono akvofale sobiĝis sur la lakajn ŝuojn. Alilandan aspekton de la pasaĝero kronis mola ĉapelo, iom ŝovita sur la frunton. Servon de portisto li ne uzis, kaj la valizon portis mem. La pasaĝero

maldiligente iris en la malpleniĝinta halo, kaj sendube okazus en la vestiblo, se ne rimarkus subite plorindan figuron de Balaganov. Li duonfermis la okulojn, venis pli proksimen, kaj iom da tempo pririgardis la dormanton. Poste li singarde, per du fingroj en gantoj, levetis kaskedon de vizaĝo de la ĉefmekanikisto, kaj ekridetis.

– Vekiĝu, grafo, oni vokas vin el subterejo!
– diris li, puŝante na Balaganov.

[Вставайте, граф!](#) («Leviĝu, grafo!»)

Ŝura eksidis, frotis la vizaĝon per la mano, kaj nur tiam rekonis la pasaĝeron.

– Komandanto! – kriis li.

– Ne, ne, – rimarkis Bender, gardante sin per la manplato, – ne brakumu min. Nun mi estas fiera.

Balaganov ektorniĝis ĉirkaŭ la komandanto. Li ne rekonis lin. Ŝanĝiĝis ne nur kostumo. Ostap malgrasiĝis, en liaj okuloj aperis distriĝo, la vizaĝo estis kovrita per kolonia sunbruno.

– *Zaburel, zaburel!* – gaje kriis Balaganov. – Jen kiel *zaburel!*

– Jes, mi *zaburel*, – informis Bender digne. Rigardu la pantalonon. Eŭropo-«A»! Kaj ĉu vi rimarkis tion? Meza fingro de mia maldekstra mano surhavas brilliantan ringon. Kvar karatoj. Nu, kaj kio pri viaj atingoj? Ĉu vi ĝis nun estas filo?

- Ne, - konfuziĝis Ŝura, - plej ofte -
bagatelaĵoj.

En bufedejo Ostap postulis blankan vinon kaj biskvitojn por si, kaj bieron kun sandviĉoj por la ĉefmekanikisto.

- Diru, Ŝura, honeste, kiom da mono vi bezonas por esti feliĉa? - demandis Ostap. - Sed prikalkulu ĉion.

- Cent rublojn, - respondis Balaganov, kun bedaŭro deŝirante sin de la pano kun kolbaso.

- Sed ne, vi ne komprenis min. Ne por hodiaŭa tago, sed entute. Por feliĉo. Ĉu estas klare? Por ke al vi estu bone en la mondo.

Balaganov pensis longe, nekuraĝe smajlante, kaj, fine, deklaris, ke por plena feliĉo li bezonas ses mil kvarcent rublojn, kaj kun tiu ĉi sumo al li estos tre bone en la mondo.

- Bone, - diris Ostap, - ricevu kvindek mil.

Li malŝlosis sur la genuoj la kvadratan valizeton, kaj ŝovis al Balaganov kvinon da blankaj faskoj, kunligitajn per ŝnureto. Ĉe la ĉefmekanikisto tuj malaperis apetito. Li ĉesis manĝi, kaŝis la monon en la poŝojn, kaj jam ne eltiris de tie la manojn.

- Ĉu vere la telereto? - demandis li rave.

- Jes, jes, telereto, - respondis Ostap indifere. - Kun blua bordero. La defendato alportis ĝin en la dentoj. Longe li svingis la voston antaŭ ol mi konsentis preni. Nun mi komandas la paradon! Sentas mi min perfekte.

La lastajn vortojn li prononcis ne tro konvinke. La parado, se diri veron, ne sukcesis, kaj la granda kombinanto mensogis ke sentas sin perfekte. Pli juste li devus diri ke sentas iun maloportunon, pri kio, tamen, li ne volas konfesi eĉ al si mem.

Pasis jam monato de kiam li separiĝis de Aleksandr Ivanoviĉ ĉe pakaĵ-deponejo, kien la kaŝ-milionulo deponis sian valizaĉon.

Jam en unua urbo, en kiun Ostap enveturis kun sentoj de milit-akiranto, li ne sukcesis trovi lokon en hotelo.

- Mi pagos kiom estas bezonate! - fiere diris la granda kombinanto.

- Ne eblas, civitano, - respondis la akceptisto, - kongreso de grundsciencistoj alveturis komplete por pririgardi la eksperimentan stacion. Ĉio estas rezervita por reprezentantoj de la scienco.

Kaj ĝentila vizaĝo de la akceptisto esprimis estimon al la kongreso. Ostap volis krie ke li esta ĉefa, ke oni devas estimi kaj respekti lin, ke ĉe li en la sako estas miliono, sed li decidis ke pli bone estas deteni sin, tial li eliris en la straton ekstreme incitita.

La tutan tagon veturis li en la urbo per fiakro. En plej bona restoracio li dum horo kaj duono suferis atendente kiam la grundsciencistoj, manĝantaj tutkongrese, lasos la tablojn. En la teatro oni donis ĉi-tage

spektaklon por la grund-sciencistoj, kaj al aliaj civitanoj oni ne vendis biletojn. Krom tio oni ne enlasus na Ostap en la spektantan halon kun sako en la manoj, sed estis neniu ebleco por lasi ĝin. Por ne noktumi pro la scienco surstrate, la milionulo samvespere forveturis, kaj ĝissate dormis en unuaklasa vagono.

Matene Bender elvagoniĝis en granda ĉevolga urbo. De arboj, turniĝante helice, defalis flavaj travideblaj folioj. Volgo spiris per vento. Libera loko estis eĉ ne en unu hotelo.

- Eble post monato, - dube diris hotelaj estroj kun barbetoj kaj sen barbetoj, kun lipharaj, kaj simple razitaj, - antaŭ ol en la elektrostacio oni pe-muntos la trian turbinon, eĉ ne esperu. Ĉio estas fordonita al specialistoj. Kaj poste - regiona konferenco de junaj komunistoj. Nenion ni povas fari.

Dum la granda kombinanto staraĉis ĉe alta pupitro de la akceptisto, sur hotelaj ŝtuparoj rapidis inĝenieroj, teknikistoj, alilandaj specialistoj, kaj junaj komunistoj - delegitoj de la konferenco.

Kaj denove Ostap pasis la tagon en fiakro, senpacience atendente rapidegan trajnon, kie oni povas lavi sin, ripozi, kaj legi ĵurnaletan.

La granda kombinanto pasigis dek kvin tagojn en diversaj trajnoj, veturante de urbo en urbon, ĉar liberaj ĉambroj estis nenie. En unu loko oni konstruis ferfandan fornegon, en alia -

fridujon, en tria – zinkan uzinon.

Ĉio estis superplenigita per aferemaj homoj. En kvara loko vojon de Ostap baris infankomunista kuniĝo, kaj en la ĉambro, kie la milionulo povus senenue pasigi vesperon kun kunulino, bruegis infanoj. Dum la vojaĝo li ekposedis: aĉetis valizon por la miliono, vojaĝajn bezonaĵojn, kaj vestiĝis. Jam planis Ostap longan kaj trankvilan vojaĝon en Vladivostok, kalkulante ke la ambaŭdirekta veturo prenos tri semajnojn, kiam subite li eksentis ke se li tuj ne ĉesos nomadi, li mortos pro iu mistera fervoja malsano. Kaj li faris tion kion faradis ĉiam, kiam li estis feliĉa posedanto de malplenaj poŝoj. Li komencis prezenti sin alie, telegrafante antaŭe ke veturas inĝeniero, aŭ kuracisto-sociaganto, aŭ tenorulo, aŭ verkisto. Al lia miro por ĉiuj homoj alveturintaj afere la ĉambroj troviĝis, kaj Ostap iom ripozis de la trajna balancado. Unufoje, por ricevi ĉambron, li devis eĉ prezenti sin filo de leŭtenanto Ŝmit. Post tiu ĉi epizodo la grandan kombinanton kaptis negajaj meditoj.

«Ĉu tio estas vojo de milionulo?» – pensis li ĉagrene. – «Kie estas timo, kie estas honoro, famo, potenco?»

Eĉ Eŭropo – «A», per kiu Ostap fanfaronis antaŭ Balaganov, – la kostumo, la ŝuoj kaj la ĉapelo, ĉio estis aĉetita en vendejo de hazardaĵoj, kaj malgraŭ ĉiuj siaj bonaj kvalitoj

havis difekton: tio estis aĵoj ne siaj, ne propraj, sed de sur aliaj ŝultroj. Iu jam portis ilin, povas esti ke horon, minuton, tamen iu fremdulo vestaĉis ilin. Ofende estis ke la registaro tute ne atentis mizeran staton de milionuloj, kaj distribuas viv-bonaĵojn nur laŭplane. Kaj entute estis malbone. Staciestro ne levis la manon sub la vizieron, kion en antaŭa tempo li faris antaŭ ĉiu komercisto kun kvindek mila kapitalo, patroj de la urbo ne alveturis la hotelon por prezenti sin, gazetaro ne rapidis preni intervjuon, kaj anstataŭ fotografaĵoj de milionuloj ĝi publikigis portretojn de iuj avangarduloj, enspezantaj cent dudek rublojn monate.

Ostap ĉiutage kalkulis sian milionon, kaj ĝi ĉiam restis sama miliono sen iu bagatelaĵo. Li penis, tagmanĝis kelkfoje tage, drinkis plej delikatajn vinojn, disdonis enorman trinkmonon, aĉetis ringon, japanan vazon kaj peltaĵon el putoro. La peltaĵon kaj la vazon ekestis necese donaci al ĉambristo, ĉar Ostap ne ŝatis okupiĝi dumvoje pri malkompaktaĵoj. Krom tio, se ekestus bezono, li povus aĉeti ankoraŭ multe da peltaĵoj kaj vazoj. Tamen dum la monato estis elspezitaj nur ses miloj.

Ne! Parado decide ne sukcesis, kvankam ĉio estis surloke. Ĝustatempe estis elsenditaj spaliranoj, ĝis la indikita tempo venis taĉmentoj, ludis orkestro. Sed regimentoj rigardis ne lin, ne al li ili kriis «hura», ne por li

svingis manojn la militdirigento. Sed Ostap ne cedis. Li tre esperis pri Moskvo.

– Kaj kio pri Rio-de-Ĵanejro, – emocie demandis Balaganov. – Ĉu ni veturu?

– Al diablo ĝin! – kun neatendita kolero diris Ostap. – Ĉio tio estas elpenŝaĵo. Ekzistas neniu Rio-de-Ĵanejro, kaj Ameriko ne ekzistas, kaj ankaŭ Eŭropo, nenio ekzistas. Kaj entute lasta urbo – tio estas Ŝepetovka, kontraŭ kiu disbatiĝas ondoj de Atlantika oceano.

– Jen kiaj aferoj! – suspiris Balaganov.

– Unu doktoro klarigis al mi ĉion, – daŭrigis Ostap, – eksterlando – tio estas mito pri postmorta vivo. Kiu trafas tien, tiu ne revenas.

– Vera cirko! – kriis Ŝura, kompreninte nenion. – Jen kiel mi nun ekvivos! Kompatinda Panikovskij! Jes, certe li rompis la konvencion, sed pardonu lin Dio! Kiel ĝojus la maljunulo!

– Mi proponas honori memoron de la mortinto per ekstaro, – diris Bender.

La laktaj fratoj leviĝis, kaj minuton staris silente, rigardante soben, sur la rompitajn biskvitojn kaj ne pe-manĝitan sandviĉon.

La turmentan silenton rompis Balaganov.

– Ĉu vi scias pri Kozleviĉ? – diris li. – Vera cirko! Malgraŭ ĉio li pe-muntis na «Antilopo», kaj laboras en Nigramarsk. Leteron li sendis. Jen...

La ĉefmekanikisto elprenis el la kaskedo la leteron.

«Saluton, Ŝura», – skribis ŝoforo de «Antilopo», – «kiel vi fartas? Ĉu vi daŭre estas filo de L. Ŝ.? Mi vivas bone, nur mono forestas, kaj la aŭto post la riparo ial kapricas kaj funkcias nur unu horon tage. Tuttempe mi riparas ĝin, jam fortojn ne havas. Pasaĝeroj ofendiĝas. Eble vi, kara Ŝura, sendos al mi kaŭĉukan oleo-kondukan tubon, eĉ ne novan. Ĉi tie en pulbazaro tute ne eblas akiri ĝin. Serĉu en Smolensk-bazaro, kie oni vendas malnovajn serurojn kaj ŝlosilojn. Kaj se estas malbone al vi, tiam alveturu, iel elturniĝos ni. Mi staras ĉe angulo de strato Mering, ĉe borso. Kie nun estas O. B.? Via kun estimo Adam Kozleviĉ. Mi forgesis skribi. Al la borso, kie mi staras, venis pastroj Kuŝakovskij kaj Moroŝek. Estis skandalo. A. K.»

– Kuru mi nun serĉi la kaŭĉukan tubon, – zorgeme diris Balaganov.

– Ne faru tion, – respondis Ostap, – mi aĉetos al li novan aŭton. Veturu ni en «Grand-Otel», mi, per telefono, rezervis tie ĉambron por dirigento de simfonia orkestro. Kaj vin, Ŝura, oni devas lavi, vesti, doni al vi seriozan riparon. Antaŭ vi, Ŝura, malfermiĝas pordego de grandiozaj eblecoj.

Ili eliris sur Kalanĉov-placon. Taksio forestis. Veturi per fiakro Ostap rifuzis.

– Tio estas kaleŝo de pasinteco, – diris li naŭze, – en ĝi ne eblas veturi malproksimen.

Krom tio en ili, sub la ŝtofajo, loĝas etaj musoj.

Do restis tramo. La vagono estis ŝtopita. Tio estis unu el tiuj infektitaj per malpaco vagonoj, kiuj ofte cirkulas tra la ĉefurbo. Kverelon en ili komencas iu venĝema maljunulino dum matenaj horoj de antaŭlabora premiĝo.

Poio me en la kverelon entiriĝis ĉiuj pasaĝeroj de la vagono, eĉ tiuj kiuj trafis tien duonhoron post komenco de la incidento. La malica maljunulino jam delonge eliris, perdiĝis jam kaŭzo de la kverelo, sed krioj kaj reciprokaj ofendoj daŭriĝas, kaj en la interinsultadon daŭre eniras novaj kaj novaj aroj da pasaĝeroj. En tiu vagono ĝis malfrua nokto ne ĉesas la kverelado.

Ekscititaj pasaĝeroj rapide deŝovis na Balaganov de Ostap, kaj baldaŭ la laktaj fratoj ŝanceliĝis en diversaj partoj de la vagono, premitaj per mamoj kaj korboj. Ostap pendis sur rimeno, pene elŝirante la valizon, kiun ĉiam forportis la fluo.

Subite, superigante la ordinaran traman kverelon, de flanko kie balanciĝis Balaganov ekaŭdiĝis ina hurlo:

– Forŝtelis! Tenu! Sed jen li staras!

Ĉiuj turnis la kapojn. Al loko de la incidento, sufokiĝante pro la scivolemo, komencis trapuŝiĝi ŝatantoj. Ostap ekvidis konsternitan vizaĝon de Balaganov. La ĉefmekanikisto ankoraŭ mem ne komprenis kio okazis, sed oni jam tenis lin je la

mano, en kiu estis premita senvalora ina saketo kun maldika bronza ĉeneto.

– Bandito! – kriis la virino. – Mi nur deflankiĝis, kaj li...

Posedanto de kvindeko da miloj forŝtelis la saketon, en kiu estis testudŝela pudrujo, sindikata membrokarto, kaj unu rublo sepdek kopekoj da mono. La vagono haltis. La ŝatantoj ektiris na Balaganov al la eliro. Preterirante na Ostap, Ŝura ĉagrene flustris:

– Kio ja okazas? Ja mi aŭtomate.

– Mi montros al vi aŭtomate! – diris ŝatanto en nazumo kaj kun teko, plezure batante la ĉefmekanikiston je la kolo.

Tra fenestro Ostap vidis kiel al la grupo per rapidaj paŝoj venis policisto, kiu forkondukis la krimulon.

[Ведь я машинально!](#) («Ja mi aŭtomate!»)

La granda kombinanto deturniĝis.

Ĉapitro 33

Hindia gasto

En granda kvadrata fermita korto de "Grand-Otel" aŭdiĝis kuirejaj frapoj, siblo de vaporo kaj krioj: «Du teajn kompletojn en la dek-sesan!», kaj en la blankaj koridoroj estis klare kaj silente kiel en distribua halo de elektrostacio. En la cent kvindek ĉambroj dormis kongreso de

grundsciencistoj, reveninta el la veturo, tridek ĉambroj estis destinitaj por alilandaj komercistoj, kiuj klarigadis turmentan demandon, ĉu oni povas finfine gajni el komerco kun Sovetio. Plej bonan apartamenton el kvar ĉambroj okupis fama hindia poeto kaj folozofo, kaj en eta ĉambro, destinita al dirigento de simfonia orkestro, dormis Ostap Bender.

Li kuŝis sur pluŝa litkovrilo vestita, premante al la brusto valizon kun la miliono. Dum la nokto la granda kombinanto enspiris en sin tutan oksigenon, troviĝintan en la ĉambro, kaj restintajn en ĝi kemiajn elementojn oni povis nomi azoto nur pro ĝentileco. Odoris tie per acidiĝinta vino, per inferaj kotletoj, kaj ankoraŭ per io, nepriskribeble aĉa. Ostap ekĝemis kaj turniĝis. La valizo falis sur la plankon. Ostap rapide malfermis la okulojn.

- Sed kio estis tio? - murmuris li grimacante. - Husareco en restoracia halo! Kaj ŝajne iu diboĉado! Fi! Mi kondukis kiel komercisto de dua rango! Dio mia, ĉu ne ofendis mi la ĉeestantojn? Iu stultulo kriis tie: «Grundsciencistoj, ekstaru!» kaj poste ploris kaj ĵuris ke en la animo li mem estas grund-sciencisto. Certe tio estis mi! Jes, sed kio estis la preteksto?..

Kaj li elmemoris ke hieraŭ, veninte al ideo komenci decan vivon, li decidis konstrui al si izoldomon en maŭra stilo. Tiun matenon li

pasigis en grandiozaj revoj. Li imagis al si domon kun minaretoj, pordiston kun vizaĝo de monumento, etan gastĉambron, bilardejon, kaj iun konferenĉalon. En terena fako de Soveto oni klarigis al la granda kombinanto ke terpecon oni povas ricevi. Sed jam en konstrua kontoro ĉio ruiniĝis. Defalis la pordisto, tondrante per la ŝtona muzelo, ekŝanceliĝis la ora konferenĉhalo, kaj disfalis la minaretoj.

– Ĉu vi estas privata persono? – oni demandis la milionulon en la kontoro.

– Jes, – respondis Ostap, – mi estas akre esprimita individuo.

– Bedaŭrinde ni konstruas nur por kolektivoj kaj organizaĵoj.

– Por kooperativaj, komunumaj kaj mastrumaj, ĉu? – demandis Bender amare.

– Jes, por ili.

– Kaj mi?

– Kaj vi konstruu memstare.

– Sed kie mi prenu ŝtonojn, riglilojn? Aŭ kahelojn?

– Akiru iel. Kvankam tio malfacilas. Ĉiuj konstru-materialoj estas jam distribuitaj laŭ postuloj de industrio kaj kooperativo.

Verŝajne ĝuste tio estis kaŭzo de la aĉa nokta husareco.

Ostap, kuŝante, elprenis la notlibreton, kaj komencis kalkuli la elspezojn de tempo kiam li ricevis la milionon. Sur unua paĝo estis

memorenskribo:

Kamelo 180 r(ubloj).

Ŝafoj 30 r.

Kumiso 1r. 75 k(opekoj)._____ Sume 211r. 75 k.

Poste estis ne pli bone. La peltaĵo, saŭco, fervoja bileto, denove saŭco, denove bileto, tri turbanoj, aĉetitaj por malbona tago, fiakristoj, vazo, kaj ceteraj stultaĵoj. Se ne enkalkuli kvindek-milon de Balaganov, kiuj ne venigis al li feliĉon, la miliono restis surloke.

«Oni ne donas fari kapitalajn investojn!» – indignadis Ostap. – «Ne donas! Ĉu mi ekvivu intelektan vivon kiel mia amiko Loĥankin? Materiajn valoraĵojn mi jam akiris, nun mi devas kolekti, poiome, valoraĵojn spiritajn. Mi devas senprokraste ekscii kio estas senco de vivo».

Li elmemoris ke en la hotela vestiblo tutan tagon amasiĝas junulinoj kiuj aspiras konversacii pri animo kun alveturinta hindia filozofa.

«Iru mi al la hindoj», – decidis li, – «finfine informiĝu mi pri la afero. Se diri veron tio estas dandaĉaĵo, sed alia ebleco forestas».

Ne disiĝante de la valizo Bender, kiel estis, en ĉifita kostumo, sobiĝis en teretaĝon, kaj frapetis pordon de la granda homo. La pordon malfermis la tradukisto.

– Ĉu la filozofa akceptas? – demandis Ostap.

– Ne ĉiujn, respondis la tradukisto ĝentile. –

Ĉu vi estas privata persono?

– Ne, ne, – time diris la granda kombinanto,
– mi reprezentas unu kooperativan organizaĵon.

– Ĉu vi venis kun grupo? Kiom da homoj?
Ĉu vi scias, al la instruisto estas malfacile akceptadi apartajn personojn. Li preferas konversacii...

– Kun kolektivo, ĉu? – subtenis Ostap. – Ĝuste kolektivo sendis min klarigi unu grandan principan demandon pri senco de vivo.

La tradukisto foriris, kaj post kvin minutoj revenis. Li deŝovis la pordan kurtenon, kaj pompe diris:

– Eniru kooperativa organizaĵo, deziranta ekscii kio estas senco de vivo.

En brakseĝo kun alta kaj neoportuna ĉizita dorso sidis la granda folozofa kaj poeto en bruna velura robo kaj en sama kapvesto. Lia vizaĝo estis bruna kaj tenera, la okuloj nigraj, kiel ĉe subleŭtenanto. La barbo, blanka kaj vasta, fermis la bruston kvazaŭ fals-ĉemizo. Stenografistino sidis ĉe liaj piedoj. Du tradukistoj, hinda kaj anglo, lokiĝis ĉe la flankoj.

Ekvidinte na Ostap kun valizo, la filozofa ekmoviĝis sur la brakseĝo, kaj maltrankvile ekflustris ion al la tradukisto. La stenografistino komencis haste registri, kaj la tradukisto alparolis la grandan kombinanton:

– La instruisto deziras scii ĉu ne troviĝas en

la valizo kantoj kaj sagaoj, kaj ĉu ne intencas la veninto legi ilin plenvoĉe, ĉar al la instruisto oni pe-legis jam multe da kantoj kaj sagaoj, kaj li ne scipovas plu aŭdi ilin.

– Diru al la instruisto ke sagaoj forestas, – estime respondis Ostap.

La nigraokula maljunulo ekmaltrankviliĝis eĉ pli ol antaŭe kaj, vigle parolante, time montris per la fingro la valizon.

– La instruisto demandas – komencis la tradukisto, – ĉu ne intencas la veninto ekloĝi ĉe li en la ĉambro, ĉar ĝis nun neniu, por esti akceptata, venis al li kun valizo.

Kaj nur post kiam Ostap trankviligis la tradukiston, kaj la tradukisto la filozofon, la tensio pasis, kaj komenciĝis la konversacio.

– Antaŭ ol respondi al via demando pri senco de vivo, – diris la tradukisto, – la instruisto deziras diri kelkajn vortojn pri popola klerigo en Hindio.

– Transdonu al la instruisto, – informis Ostap, – ke problemo de popola klerigo ekscitas min de la infaneco.

La filozofo fermis la okulojn, kaj komencis nehaste paroli. Unuan horon li parolis angle, la duan – bengale. Iam li komencis kanti per mallaŭta agraba voĉo, kaj unufoje eĉ ekstaris kaj, iom levinte la robon, faris kelkajn dancajn movojn, montrantajn, verŝajne, ludojn de lernejoj en Penĝabo. Poste li eksidis, denove

fermis la okulojn, kaj Ostap longe aŭskultis la tradukon. Komence Ostap ĝentile klinis la kapon, poste dormeme rigardis en fenestron kaj, fine, komencis distriĝi: palpe ŝovetis en la poŝo monerojn, admiris sian ringon, kaj eĉ sufiĉe klare okulumis al la simpatia stenografistino, post kio ŝi eĉ pli rapide ekstrekis per la kraĵono.

– Sed kio tamen okazas pri senco de vivo, – demandis la milionulo, uzante momenton.

– La instruisto deziras antaŭe, – klarigis la tradukisto, – konatigi la veninton kun vastaj materialoj, kiujn li kolektis dum konatiĝo kun popola klerigo en Sovetio.

– Transdonu al lia moŝto, – respondis Ostap, ke la veninto ne kontraŭas.

Kaj la maŝino ekmoviĝis denove. La instruisto parolis, kantis infankomunistajn kantojn, montris murĵurnalon, kiun prezentis al li infanoj de cent-kvardek-sesa produktiva lernejo, kaj unufoje eĉ ekploretis. La tradukistoj zumis duvoĉe, la stenografistino skribis, kaj Ostap distriĝe purigis la ungojn.

Fine Ostap laŭte ektusis.

– Ĉu vi scias, – diris li, – ne traduku pli. Mi komencis ial kompreni la bengalan. Sed kiam estos tuŝata temo pri senco de vivo, tiam vi traduku.

Kiam oni konfirmis al la filozofo insistan deziron de Ostap, la nigraokula maljunulo

ekscitiĝis.

- La instruisto diras, - deklaris la tradukisto, - ke li mem venis en vian grandegan landon por ekscii kio estas senco de vivo. Vivo komencas esti sencohava nur tie kie popola klerigo estas levigita sur tiun altecon kiel ĉe vi. Kolektivo...

- Ĝis revido, - rapide diris la granda kombinanto, - transdonu al la instruisto ke la veninto petas permeson urĝe foriri.

Sed la filozofa jam kantis per la tenera voĉo na «Marŝo de milit-rajdistoj», kiun li lernis de sovetiaj infanoj. Kaj Ostap foriris sen la permeso.

- Kriŝno! - kriis la granda kombinanto, kurante en sia ĉambro. - Viŝnuo! Kio okazas en la mondo? Kie estas la kruda vero? Sed eble mi estas stultulo kaj komprenas nenion, do la vivo pasis stulte, sensisteme? Vera hindo, vidu vi, scias ĉion pri nia vasta lando, kaj mi, kiel india komercisto el fama opero, bekadas ĉiam la samon: «Ne kalkuleblas diamantoj bonaj en kavernegoj stonaj!» Ĝis kiom tio aĉas!

Ĉi tage Ostap tagmanĝis sen vodko, kaj unuan fojon lasis la valizon en la ĉambro. Poste li trankvile sidis sur la fenestrobreto, kun intereso pririgardante ordinarajn preterirantojn, kiuj ensaltis aŭtobusojn kiel sciuroj.

Nokte la granda kombinanto subite vekiĝis kaj eksidis sur la lito. Estis silente, kaj nur el la

restoracio, tra la ŝlosiltruo, penetris melankolia valso.

– Sed kiel mi forgesis! – diris li kolere.

Poste li ekridis, ŝaltis elektron, kaj rapide skribis telegramon:

«nigramarsk al zosja sinickaja pro viveraro pretas flugi na nigramarsk flugiloj amo fulme telegrafu respondon moskvo grandhotelo bender.»

Li telefonis, kaj postulis ke la telegramo estu sendata tuj, ekstremrapide.

Zosja ne respondis. Ne estis respondo ankaŭ al aliaj telegramoj, verkitaj en sama malespera kaj lirika maniero.

Ĉapitro 34

Amikado kun juneco

La trajno iris na Nigramarsk.

Unua pasaĝero demetis la jakon, pendis ĝin sur kupran spiralaĵon de la pakaĵujo, poste detiris la botetojn, laŭvice aligante siajn dikajn piedetojn preskaŭ al la vizaĝo mem, kaj surmetis pantoflojn kun langoj.

– Ĉu vi aŭdis historion pri unu termezuristo el Voroneĵ, kiu okazis parenco de japana imperiestro? – demandis li, antaŭ-ridetante.

Dua kaj tria pasaĝeroj alŝoviĝis pli proksimen. La kvara pasaĝero jam kuŝis sur supra divano sub pika frambkolora litkovrilo,

malkontente rigardante ilustritan gazeton.

– Ĉu vere ne aŭdis? Iom da tempo oni multe parolis pri tio. Tio estis ordinara termezuristo: edzino, unu ĉambro, cent-dudek-rubla salajro. Familinomo Bigusov. Ordinara, se vi volas scii, tute nerimarkinda homo, eĉ krudulo, inter ni parolate. Revenis li foje el la oficejo, sed ĉe li en la ĉambro sidas japano kun okulvitroj, en tia, inter ni parolate, perfekta kostumo kaj, se vi volas scii, en botetoj el serpenta haŭto, lasta novaĵo.

– «Ĉu via familinomo estas Bigusov?» – demandas la japano. – «Jes», – diras Bigusov. – «Kaj nomo-patronomo?» – «Tia kaj tia», – respondas Bigusov. – «Ĝuste», – diras la japano, – «ĉi-okaze ĉu vi ne estos afabla demeti la jakon: mi devas pririgardi vian nudan torson». – «Bonvolu», – diras li. Nu, inter ni parolate, se vi volas scii, la japano eĉ ne pririgardis la torson, sed tuj ĵetiĝis al nask-makuleto. Estis ĉe Bigusov tiu makuleto sur la flanko. Ekrigardis ĝin la japano tra lupeo, paliĝis, kaj diras: – «Mi gratulas vin, civitano Bigusov, kaj permesu enmanigi al vi la keston kaj la pakaĵon». – La edzino, certe, malfermis la keston. Kaj tie, se vi volas scii, kuŝas sur rabotaĵoj japana duklinga glavo. – «Kial ja glavon al mi?» – demandis la termezuristo. – «Sed vi» – diras la japano, – «pe-legu la leteron. Tie ĉio estas skribite. Vi estas

samurajo». – Ĉi tie ankaŭ Bigusov paliĝis. Voroneĵ, se vi volas scii, estas ne tre granda urbo. Kia, inter ni parolate, povas esti tie rilato al samurajoj? Plej negativa. Sed kion li povas fari. Bigusov prenas la leteron, malfermas dek kvar vaksajn sigelojn, kaj legas ĝin. Kaj kion vi opinias? Evidentiĝis ke ĝuste antaŭ tridek ses jaroj Voroneĵ-gubernion preterveturis unu japana duonprinco-inkognito. Kaj certe, inter ni parolate, kuniĝadis lia moŝto kun unu junulino el Voroneĵ, kaj ŝi naskis infanon, inkognite. Li eĉ volis edziĝi, sed la imperiestro malpermesis tion per ĉifrita telegramo. La duonprinco estis devigata forveturi, kaj la infano restis neleĝa. Tio ja estis Bigusov. Kaj jen post tiom da jaroj la duonprinco komencis morti kaj, kvazaŭ speciale, leĝaj infanoj forestas, ne estas al kiu transdoni la heredaĵon. Kaj, krom tio, malaperas la fama gento, kio por japano estas plej malbone. Do ekestis bezonate elmemori na Bigusov. Jen falis feliĉo sur la homon! Nun, onidire, li estas jam en Japanio. La maljunulo mortis. Kaj Bigusov estas nun princo, parenco de la imperiestro kaj, krom tio, inter ni parolate, li ricevis kontante milionon da jenoj. Milionon! Tiu ĉi stultulo!

– Se oni donus al mi milionon da rubloj! – diris la dua pasaĝero, interfrotante la piedojn. – Mi montrus al ili kion oni faru per miliono!

Inter la du supraj divanoj aperis kapo de la

kvara pasaĝero. Li atente pririgardis homon ĝuste sciantan kion oni povas fari per miliono kaj, nenion dirante, denove fermis sin per la gazeto.

– Jes, – diris la tria pasaĝero, malfermante fervojan pakaĵeton kun du personaj krakenoj, – diversaj faktoj okazas en sfero de mona cirkulado. Ĉe unu moskva fraŭlino mortis en Varsovio onklo, kaj lasis al ŝi milionan heredaĵon, kaj ŝi eĉ ne sciis pri tio. Sed tie, eksterlande, oni elflaris, kaj jam post monato en Moskvo aperis sufiĉe konvena alilandano. Tiu ĉi knabo decidis edzinigi ŝin, ĝis ŝi ekscios pri la heredaĵo. Sed ĉe ŝi, en Moskvo, estis fianĉo, ankaŭ sufiĉe bela juna homo el Kontrolejo pri pesiloj kaj mezuriloj. Ŝi tre amis lin kaj, nature, ne volis edziniĝi kun iu alia. Kaj tiu, alilandano, fakte frenezadas, sendas al ŝi bukedojn, bombonojn, kaj silkajn ŝtrumpojn. Okazis ke la alilandano venis ne private, sed de akcia kompanio, kiun oni establis speciale por ekspluati la onklan heredaĵon. Ili eĉ havis bazan kapitalon je dek ok mil zlotoj. Tiu ĉi ilia rajtigitio devis nepre edzinigi la junulinon, kaj elveturigi ŝin eksterlanden! Tre romantika historio! Imagu al vi staton de la rajtigitio. Tia respondeco! Li ja antaŭpagon prenis, sed ne povas pravigi ĝin pro tiu ĉi sovetia fianĉo. Kaj tie, en Varsovio, koŝmaro! La akciuloj atendas, nervoziĝas, akcioj falas. Entute ĉio finiĝis per fiasko. La junulino

edziniĝis kun sia, soveta. Tial ŝi eksciis nenion.

– Jen stultulino! – diris la dua pasaĝero. – Se oni donus al mi tiun ĉi milionon!

Pro la emociiĝo li eĉ elŝiris el manoj de la najbaro la krakenon, kaj nerveze pe-manĝis ĝin.

Okupanto de la supra divano riproĉe ektusis. Ŝajne la konversacio malhelpis al li ekdormi.

Sobe oni komencis paroli malpli laŭte. Nun la pasaĝeroj sidis premiĝe, kapo ĉe kapo kaj, sufokiĝante, flustris:

– Antaŭnelonge internacia asocio de Ruĝa Kruco publikigis en ĵurnaloj anoncon pri tio ke oni serĉas heredantojn de usona soldato Hari Kovalĉuk, pereinta en mil-naŭcent-dek-oka jaro dum la milito. Heredaĵo – miliono! Fakte estis malpli ol miliono, sed alkreskis procentoj... Kaj jen en iu perdita vilaĝeto en Volino...

Sur supra divano ĵetiĝis la framba litkovrilo. Bender sentis sin malbone. Lin tedis supraj kaj subaj divanoj, tuta skuiĝanta mondo de vojaĝoj. Li senprobleme donus duonmilionon por ekdormi, sed desoba flustro ne ĉesiĝis:

– ... Ĉu vi komprenas, en unu loĝeja kooperativo aperis maljunulino kaj diras: – «Mi», – diras ŝi, – «trovis en mia kelo poteton, ne scias mi kio estas en la poteto, do estu bonaj rigardu vi mem». Enrigardis la kooperativ-estraro en tiun ĉi poteton, kaj tie estas oraj hindiaj rupioj, miliono da rupioj...

– Jen stultulino! Trovis ŝi al kiu rakonti! Se

oni donus al mi tiun ĉi milionon, do mi...

– Inter ni parolate, se vi volas scii, mono – tio estas ĉio.

– Kaj en unu kaverno apud Moĵajsk...

De supre ekaŭdiĝis ĝemo, sonora ĝemo de pereanta individuo.

La rakontantoj pormomente konsterniĝis, sed ĉarmo de subitaj riĉaĵoj, verŝantaj el poŝoj de japanaj princoj, varsoviaj parencoj aŭ usonaj soldatoj, estis tiom granda, ke ili denove komencis kapti unu alian je la genuoj, balbutante:

– Kaj jen kiam oni malfermis la mumiaĵon, oni trovis tie, inter ni parolate, milionon da...

Matene Ostap, ankoraŭ inundita per la sonĝo, ekaŭdis sonon de disŝovantaj fenestrokurtenetoj, kaj voĉon:

– Miliono! Ĉu vi komprenas, tuta miliono...

Tio estis tro. La granda kombinanto kolere ekrigardis soben. Sed hieraŭaj pasaĝeroj jam forestis. Ili elvagoniĝis mateniĝe en Ĥarkovo, lasinte post si ĉifitajn litaĵojn, grasiĝintan folion de aritmetika papero, kotletajn kaj panajn pecetojn, kaj ankaŭ ŝnureton. Nova pasaĝero, staranta ĉe la fenestro, indifereinte alrigardis na Ostap kaj daŭrigis, rilatante al du siaj kunvojaĝantoj:

– Milion tunoj da kruda fero. Ĝis fino de la jaro. La komisiono trovis, ke la trusto povas doni tion. Kaj kio estas plej ridinda: Ĥarkovo

konfirmis!

Ostap trovis en tiu ĉi deklaro nenion ridindan. Sed la novaj pasaĝeroj tuj komencis ridegi. Dum tio sur la tuta triopo ekknaris kaŭĉukaj manteloj, kiujn ili ankoraŭ ne sukcesis demeti.

– Kaj kio pri Ivan Nikolaeviĉ Bubeŝko,? – demandis plej juna el la pasaĝeroj kun entuziasmo. – Verŝajne li teron per la nazo fosas?

– Jam ne fosas. Li okazis en stulta situacio. Sed kio estis! Komence li ŝoviĝis interbatiĝi... vi ja scias, Ivan Nikolaeviĉ, – karaktero... Okcent dudek kvin mil tunoj kaj eĉ ne unu tunon pli. Kaj ĉi tie komenciĝis jam serioza afero. Malpliigo de eblecoj... Fakto! Uzado de preteksto pri problemaj lokoj – fakto! La homo devus tuj plene konfesi sian eraron. Sed ne! Ambicio! Aristokrateco! Konfesu vi, – kaj ĉio. Sed li komencis poparte. Decidis li gardi sian aŭtoritaton. Kaj jen komenciĝas muziko, dostojevskij-eca: «De unu flanko mi konfesas, sed, de alia flanko, mi substrekas». Sed kion vi substreku, por kio tiu ĉi senspina svingado! Do estis devigata nia Bubeŝko skribi duan leteron.

La pasaĝeroj denove ekridis.

– Sed ankaŭ tie eĉ ne unu vorton li diris pri sia oportunismo. Kaj ekskribadis li. Ĉiutage venas letero. Oni intencas jam establi por li specialan fakon: «Korektoj kaj deflankiĝoj».

Fakte li mem scias ke kaptiĝis, kaj volas elgrimpi, sed tiom li amasigis, ke ne povas jam. Kaj lastfoje ĝis tio li venis, ke eĉ skribis: «Tial kaj tial... la eraron mi konfesas, kaj tiun ĉi leteron mi opinias ne sufiĉa».

Ostap jam delonge foriris lavi sin, sed la novaj pasaĝeroj daŭre ridadis. Kiam li revenis, la kupeo estis balaita, la divanoj levitaj, kaj la konduktoro malproksimiĝis, premante per la mentono plenbrakon da litotukoj kaj litkovriloj. Junaj homoj, ne timantaj trablovon, malfermis la fenestron, kaj en la kupeo, kvazaŭ mara ondo, ŝlosita en keston, saltis kaj baraktadis aŭtuna vento.

Ostap enĵetis valizon kun la miliono en la багаĝan reton, kaj sidis sube, amike rigardante la novajn najbarojn, kiuj iel aparte energie envivis ĉiutagecon de la unuaklasa vagono: ili ofte rigardis sin en la porda spegulo, saltadis sur la divano, kontrolante elastecon de ĝiaj risortoj, aprobis kvaliton de la ruĝa polurita plakaĵo, kaj premis la butonojn. Tempo de tempo unu el ili malaperis por kelkaj minutoj kaj, reveninte, interflustris kun la kamaradoj. Fine en la pordo aperis junulino en drapa vira palto kaj gimnastikaj pantofloj kun ŝnuretoj, ĉirkaŭigantaj ŝiajn maleolojn en maniero de antikva Grekio.

– Kamaradoj! – diris ŝi decide. – Tio estas porkaĵo. Ankaŭ ni volas veturi ene de lukso. En

unua ja stacio ni devas interŝanĝi.

La kunvojaĝantoj de Bender minace ekbruegis.

– Negrave, negrave. Ĉiuj havas samajn rajtojn, – daŭrigis la junulino. – Ni jam lotis. Gajnis Tarasov, Parovickij kaj mi. Elbalaiĝu en la trian klason.

El la okazinta bruo Ostap komprenis ke na Nigramarsk, post la somera praktiko, revenas per la trajno granda grupo da studentoj de politeknika instituto. Lokoj en triaklasa vagono ne sufiĉis por ĉiuj, do ili estis devigataj aĉeti tri biletojn en unuaklasa vagono, kun distribuo de la diferenco sur la tutan kompanion.

Rezulte la junulino restis en la kupeo, kaj triopo da unuaj loĝantoj kun iom malfrua digno lasis la lokon. Sur iliaj lokoj tuj aperis Tarasov kaj Parovickij. Ili senprokraste komencis saltadi sur la divanoj kaj premi la butonojn. La junulino klopode saltis kune kun ili. Pasis eĉ ne duonhoro kiam en la kupeon enfalis la unua triopo. Ĝin alpelis reen sopiro pri la perdita pompo. Post ili kun ĝenaj smajloj ekvideblis duopo, kaj poste ankoraŭ unu junulo, liphara. Vico de la lipharulo veturi ene de la lukso estis nur por dua tago, sed li ne povis elteni. Lia apero elvokis aparte ekscitajn kriojn, al kiuj ne prokrastis aperi la konduktoro.

– Kio estas tio, civitanoj, – diris li per fiska voĉo, – tuta bando kolektiĝis ĉi tie. Foriru kiuj

el tria klaso. Se ne, mi iros al la ĉefulo.

La bando konsterniĝis.

- Tio estas gastoj, - diris la junulino, malgajiĝinte, - ili venis nur por iom sidi kun ni.

- Laŭ la reguloj tio estas malpermesate, - deklaris la kondukto, -foriru.

La lipharulo ekis retroiri al la eliro, sed tiam en la konflikton enmiksiĝis la granda kombinanto.

- Kio vi, paĉjo, - diris li al la kondukto, - ne estas bezonate linĉi pasaĝerojn sen aparta bezono. Kial tiel strikte agi laŭ litero de leĝo? Oni devas esti gastama. Ĉu vi scias, kiel en Oriento! Iru ni, mi ĉion klarigos al vi.

La kondukto, konversaciinte en la koridoro kun Ostap, ekestis ĝis tiom saturita per spirito de Oriento ke, ne pensante jam pri elpelo de la bando, alportis al ĝi naŭ glasojn da teo en pezaj glasingoj, kaj tutan sian stokon da individuaj krakenoj. Li eĉ ne prenis monon.

- Laŭ orienta kutimo, - diris Ostap al la komunumo, laŭ leĝoj de gastamo, kiel diris unu laboranto de kulinaria sektoro.

La komplezo estis prezentita kun tia facileco kaj simpleco, ke oni ne povis rifuzi ĝin. Krakis la disŝirataj krakenaj pakaĵetoj, Ostap mastre disdonis la teon, kaj baldaŭ amikiĝis kun ĉiuj ok studentoj kaj unu studentino.

- Min delonge interesas problemo de universala, egala, kaj sekreta instruado, -

babilis li gaje, – antaŭ nelonge mi eĉ konversaciis pri tiu ĉi temo kun unu hinda filozofa-hobiulo. Tio estis homo de ekstrema klereco. Tial ĉion kion li diras oni tuj registras sur gramofonajn diskojn. Kaj, ĉar la maljunulo ŝatas paroladi, estas ĉe li tiu peketo, – do amasiĝis jam ok vagonoj da diskoj, kaj nun oni jam faras butonojn el ili.

Komencinte de tiu ĉi libera improvizo, la granda kombinanto prenis en la manojn krakenon.

– Al tiu ĉi krakeno – diris li, – restis nur unu paŝo por iĝi akriĝa ŝtono. Kaj tiu ĉi paŝo jam estas farita.

La amikeco, varmigita per ĉi-manieraj ŝercoj, disvolviĝis tre rapide, kaj baldaŭ la tuta bando sub gvido de Ostap jam kantis:

**Ĉe ruslanda caro Petro²⁹
tre malmultas proksimuloj:
Nur ĉevalo, serpentego kaj...
finiĝis la kalkulo.**

Ĝis la vespero Ostap konis jam nomojn de ĉiuj, kaj kun kelkaj ligis jam «ci»-rilatojn. Sed multon el tio kion diris la junaj homoj li ne komprenis. Subite li eksentis sin ege maljuna. Antaŭ li sidis juneco, iom kruda, senartifika, iel ofende simpla. Li estis alia en siaj dudekaj

29. caro Petro. Temas pri monumento al caro Petro la granda en Peterburgo: ĉevalo, sur kiu sidas la caro, tretas serpentegon.

jaroj. Li konfesis al si ke li estis multe pli diversflanka kaj malbona. Tiam li ne ridis sed ridetis. Sed tiuj ĉi ridegas.

«Kio tiel ĝojigas ĝin, tiun grandmuzelan junecon?» – pensis li kun subita agaco. – «Je mia vorto, mi komencas envii».

Kvankam Ostap sendube estis centro de atento de la tuta kupeo, kaj lia parolo fluis senhalte; kvankam la ĉirkaŭantoj rilatis al li plej bone, estis ĉi tie nek adoro de Balaganov, nek timema subiĝo de Panikovskij, nek fidela amo de Kozleviĉ. En la studentoj sentiĝis supereco de spektanto antaŭ anoncisto. Spektanto aŭskultas la civitanon en frako, iam ridas, maldiligente aplaŭdas al li, sed fine foriras hejmen, kaj tute ne interesiĝas plu pri tiu ĉi anoncisto. Kaj la anoncisto, post la spektaklo, venas en aktoran klubon, malgaje sidas super la kotleto, kaj plendas al la kunulo, opereta komikisto, ke publiko ne komprenas lin, kaj la registaro ne aprezas. La komikisto drinkas vodkon, kaj ankaŭ plendas ke oni lin ne komprenas. Sed kion ja estas kompreni? La ŝercoj estas malnovaj, kaj la maniero estas malnova, sed relerni estas jam malfrue. Ŝajnas ke ĉio estas klara.

Historio pri Bubeŝko, kiu penis malpliigi la planon, estis rakontita denove, ĉi foje speciale por Ostap. Kune kun siaj novaj amikoj li iris en vagonon de tria klaso konvinki studentinon Lida

Pisarevskaja veni al ili por esti gasto, kaj paroladis li tiel konvinke, ke ĝenema Lida venis kaj prenis parton en la komuna bruado. La subita kredemo diskreskis eĉ ĝis tiom ke antaŭvespere, promenante kun la junulino en vira palto sur kajo de granda fervoja stacio, la granda kombinanto alkondukis ŝin preskaŭ al elira semaforo, kaj ĉi tie, surprize por si mem, elverŝis al ŝi sian animon per sufiĉe vulgaraj frazoj.

– Ĉu vi komprenas, – klarigis li – lumis luno, reĝino de la pejzaĝo. Ni sidis sur ŝtupoj de muzeo de antikvaĵoj, kaj jen mi eksentis ke amas ŝin. Sed mi devis samvespere forveturi, do la afero ruiniĝis. Ŝi ŝajne ofendiĝis. Eĉ certe ofendiĝis.

– Ĉu oni sendis vin en oficvojaĝon? – demandis la junulino.

– M-jes. Simile al tio. Tio estis ne tiom oficvojaĝo kiom urĝa afero. Kaj nun mi suferas. Majeste kaj stulte suferas.

– Tio ne estas terura, – diris la junulino, – reŝaltu vian superfluan energion al plenumo de iu labora procedo. Segu vi brulaĵ-ŝtipojn, ekzemple. Ekzistas nun tiu metodo.

Ostap promesis reŝalti sin kaj, kvankam ne imagis al si kiel li anstataŭos na Zosja per segado de brulaĵ-ŝtipoj, eksentis grandan mildiĝon. Ili revenis en la vagonon kun mistera aspekto, kaj poste kelkfoje eliris en la koridoron

interflustri pri nereciproka amo kaj pri novaj fluoj en tiu ĉi sfero.

En la kupeo Ostap daŭre penadis plaĉi al la kompanio. Kaj li atingis tion ke la studentoj komencis opinii lin samulo. Kaj malĝentila Parovickij plenforte frapis na Ostap je la ŝultro kaj kriis:

– Aniĝu nian politeknikan. Je Dio! Ricevados vi stipendion sepdek kvin rublojn. Vivos vi kiel Dio. Ĉe ni manĝejo – ĉiutage viando. Poste en Uralon veturu ni por praktikado.

– Mi jam pe-lernis unu humanisman universitaton, – rapide diris la granda kombinanto.

– Kaj kion ci faras nun? – demandis Parovickij.

– Ion pri financoj.

– Ĉu ci servas en banko?

Ostap satire ekrigardis la studenton kaj subite diris:

– Ne, mi ne servas. Mi estas milionulo.

Certe tiu ĉi deklaro devigis na Ostap al nenio, kaj li povus transformi ĉion en ŝercon, sed Parovickij ekridis kun tiu penado, ke la granda kombinanto eksentis sin ofendita. Lin kaptis deziro konsterni la kunvojaĝantojn, elvoki ĉe ili eĉ pli grandan admiron.

– Kiom da milionoj vi havas? – demandis junulino en gimnastikaj pantofloj, provokante lin al gaja respondo.

- Unu, - diris Ostap, pala pro la fiero.
- Ial malmulte, - deklaris la lipharulo.
- Malmulte, malmulte! - kriis ĉiuj.
- Al mi sufiĉas, - diris Ostap solene.

Kun tiuj ĉi vortoj li prenis sian valizon, klakis per la nikelizitaj seruretoj, kaj elŝutis sur la divanon tutan ĝian enhavon. La paperaj platetoj ekkuŝis per disfaliĝanta monteto.

Я - миллионер («Mi estas milionulo»)

Ostap fleksis unu el ili, kaj la volvaĵeto krevis kun ludkarta krako.

- En ĉiu pakaĵo po dek miloj. Ĉu sufiĉas al vi? Miliono sen iu malgravaĵo. Ĉio estas surloke. Subskriboj, kontrolo reteto kaj akvomarkoj.

Ĉe komuna silento Ostap enŝovis la monon reen en la valizon, kaj surĵetis ĝin en la bagaĝujon per gesto kiu ŝajnis al Ostap reĝa. Li denove eksidis sur la divanon, apogis sin je la muro, vaste dismetis la piedojn, kaj ekrigardis la bandon.

- Kiel vi vidas, ankaŭ humanismaj sciencoj venigas fruktojn, - diris la milionulo, invitante la studentojn gaji kune kun li.

La studentoj silentis, rigardante diversajn butonojn kaj hoketojn sur la ornamentitaj muroj de la kupeo.

- Vivas mi kiel Dio, - daŭrigis Ostap, - aŭ kiel duondio, kio fakte estas samo.

Iom atendinte, la granda kombinanto maltrankvile ekmoviĝis, kaj kriis per plej amika tono:

– Kial vi eksilentis?

– Nu, mi iru, – diris la lipharulo post ioma pripenso, – iru mi al mia loko, rigardu kio, kiel.

Kaj li elsaltis el la kupeo.

– Mirinda afero, rimarkinda afero, – diris Ostap, – ankoraŭ hodiaŭ matene ni eĉ ne estis konatoj, sed nun ni sentas nin kvazaŭ konas unu la alian dek jaroj. Kio estas tio, ĉu fluidoĵoj agas?

– Kiom ni ŝuldas pro teo? – demandis Parovickij. – Kiom ni eltrinkis, kamaradoj? Naŭ glasojn aŭ dek? Mi informiĝos ĉe la konduktoro. Tuj mi revenos.

Post li ekmoviĝis ankoraŭ kvar personoj, tirataj per deziro helpi al Parovickij en kontegaligo kun la konduktoro.

– Ĉu ni kantu ion? – proponis Ostap. – Ion feran. Ekzemple, «Sergej pop’, Sergej pop’!». Ĉu vi volas? Ĉe mi estas mirinda volga baso.

Kaj, ne atendente la respondon, la granda kombinanto ekkantis: «Sur la rivero, sur Kazan-rivero naĝas viranaso griza kaj fiera». Kiam venis tempo subkapti la refrenon, Ostap dirigente svingis la manojn kaj frapis per la piedo, sed la minaca korusa krio ne sekvis. Nur Lida Pisarevskaja, pro la konfuziĝemo, elpepis: «Sergej pop’, Sergej pop’», sed tuj ŝi stumblis

kaj elkuris.

La amikeco pereis antaŭ la okuloj. Post nelonge en la kupeo restis nur bonkora kaj kompatema junulino en gimnastikaj pantofloj.

– Kien ja forkuris ĉiuj? – demandis Bender.

– Vere, – flustris la junulino, – oni devas sciigi.

Ŝi vigle ĵetiĝis al la pordo, sed malfeliĉa milionulo kaptis ŝin je la mano.

– Mi ŝercis, – balbutis li, – mi estas laboristo. Mi estas dirigento de simfonia orkestro!.. Mi estas filo de leŭtenanto Ŝmit!.. Mia patro estas turkia civitano. Kredu al mi!..

– Lasu min! – flustris la junulino.

La granda kombinanto restis sola.

La kupeo skuiĝis kaj grincis. La kuleretoj turniĝis en la malplenaj teaj glasoj, kaj la tuta te-glasa gregeto poiome ŝoviĝis al rando de la tableto. En la pordo aperis la konduktoro, premanta per la mentono staketon da litkovriloj kaj litotukoj.

Ĉapitro 35

Lin amis dommastrinoj, hejmservistinoj, vidvinoj, kaj eĉ unu virino: dentprotezisto

En Nigramarsk tondris tegmentoj, kaj laŭ la stratoj promenis trablovoj. Per forto de nord-orienta vento, kiu subite atakis la urbon, tenera malfru-somero estis enpelita al rubaĵuoj,

defluiloj, kaj dom-elstaraĵoj. Tie ĝi mortis inter karbiĝintaj aceraj folioj kaj disŝiritaj tramaj biletoj. Malvarmaj krizantemoj dronis en teleregoj de florvendistinoj. Frapis verdaj ŝutroj de ŝlositaj kvas-budoj. Kolomboj diris «*umru, umru*». Paseroj varmiĝis bekante freŝajn ĉeval-elĵetaĵojn. Nigramarskanoj treniĝis kontraŭ la vento, mallevinte la kapojn kiel bovoj. Plej malbone estis al tolaj veŝtoj. La vento deŝiris de ili la panamajn ĉapelojn, kaj ruligis ilin sur pargeta pavimo soben, al la bulvardo. La olduloj postkuris ilin, anhelante kaj indignante. Trotuaraj turnoblovoj kurigis la persekutantojn tiel forte, ke iam ili eĉ lasis post si siajn kapvestojn, kaj rekonsciiĝis nur premiĝinte al malsekaj piedoj de bronza figuro de potenculo el tempo de imperiestrino Ekaterina, kiu staris centre de la placo.

«Antilopo» sur sia haltejo eligis ŝipajn knarojn. Se antaŭe maŝino de Kozleviĉ elvokis gajan embarason, do nun ĝi elvokis kompaton: la maldekstra malantaŭa kot-ŝirmilo estis alligita per ŝnuro, sufiĉe granda parto de la ventŝirma vitro estis anstataŭigita per kruclignaĵo, kaj sur loko de perdita dum la katastrofo kaŭĉuka pilko kun "*maĉiŝ*" pendis, sur ŝnureto, nikelizita prezidanta sonorileto. Eĉ la stirilo, sur kiu ripozis honestaj manoj de Adam Kazimiroviĉ, iom fleksiĝis flanken. Sur trotuaro, apud «Antilopo», staris la granda kombinanto.

Apoginte sin je flankon de la aŭto, li diris:

– Mi trompis vin, Adam. Mi povas donaci al vi nek na «Izota-fraskini», nek na «Linkoln», nek na «Bjuik», eĉ nek na «Ford». Mi ne povas aĉeti novan aŭton. La ŝtato ne rekonas min estiel aĉetanto. Mi estas privata persono. Sole kion mi povus akiri, per gazet-anoncoj, estas sama fatraso kiel nia «Antilopo».

– Kial ja, – refutis Kozleviĉ, – mia «Lorenditriĥ» estas bona aŭto. Se mi trovus uzitan oleo-kondukan tubon, tiam neniu «Bjuik» estus bezonata al mi.

– La tubon mi venigis al vi, – diris Ostap, – jen ĝi estas. Kaj tio estas ĉio, kara Adam, per kio mi povas helpi al vi en sfero de mekanika transporto.

Kozleviĉ tre ekĝojis al la tubo, longe turnardis ĝin en la manoj, kaj tuj komencis almunti ĝin. Ostap puŝis la sonorileton kiu eligis konferencan sonoron, kaj varme komencis:

– Ĉu vi scias novaĵon, Adam: sur ĉiun civitanon premas kolono de aero per forto je ducent dek kvar kilogramoj!

– Ne, ne scias, – diris Kozleviĉ, – kio do?

– Kial kio! Tio estas scienc-medicina fakto. Kaj tio, de antaŭnelonge, ekestis malfacila al mi. Nur pripensu! Ducent dek kvar kilogramoj! Ili premas ĉiam, precipe nokte. Mi malbone dormas. Kio?

– Nenio, mi aŭskultas, – karese respondis

Kozleviĉ.

– Estas tre malbone al mi, Adam. Ĉe mi estas tro granda koro.

Ŝoforo de «Antilopo» diris «hm». Ostap daŭrigis babili:

– Hieraŭ, sur strato, al mi venis maljunulino kaj proponis aĉeti eternan nadlon por primuso. Ĉu vi scias, Adam, mi ne aĉetis. Mi ne bezonas eternan nadlon. Mi ne volas vivi eterne. Mi volas morti. Ĉe mi estas ĉiuj vulgaraj signoj de enamiĝo: foresto de apetito, sendormeco, kaj mania strebo verki versaĵojn. Aŭskultu kion mi verkaĉis hieraŭ nokte, ĉe ŝancelanta lumo de elektra lampo: «Memoras mi momenton ravan, kiam alvenis el fabel' Vi, kiel floro de papavo, kiel geni' de pura bel'». Bone, talente, ĉu? Kaj nur mateniĝe, kiam mi pe-verkis la lastajn liniojn, mi elmemoris ke tiun ĉi versaĵon jam kreis A.Puŝkin. Kiu bato de flanko de la klasikulo! Ĉu?

– Ne, ne, daŭrigu, – diris Kozleviĉ komplate.

– Do tiel mi vivas, – daŭrigis Ostap per vibranta voĉo. – Korpo mia estas registrita en hotelo «Kairo», kaj la animo neglektas siajn devojn, eĉ en Rio-de-Ĵanejron ĝi ne volas. Kaj, krom tio, min sufokas la atmosfera kolono.

– Ĉu vi estis ĉe ŝi? – demandis senartifika Kozleviĉ. – Ĉe Zosja Viktorovna?

– Mi ne iros, – diris Ostap, – pro fiera hontemo. En mi vekiĝis janiĉaroj. Al tiu ĉi

malbonulino mi sendis el Moskvo telegramojn je kvincent rubloj, sed ricevis respondon eĉ ne duonrublan. Kaj tio estas mi, kiun amis dommastrinoj, hejmservistinoj, vidvinoj, kaj eĉ unu virino: dentprotezigisto. Ne, Adam, mi ne iros tien. Ĝis revido!

La granda kombinanto direktiĝis en la hotelon, kaj eliris el sub la lito valizon kun la miliono, kiu kuŝaciĝis apud eluzitaj ŝuoj. Iom da tempo li rigardis ĝin sufiĉe stulte. Poste li prenis ĝin je la tenilo, kaj eliris surstraten. La vento kaptis na Ostap je la ŝultroj, kaj ektiris al Ĉemara bulvarado. Ĉi tie estis dezerte, neniu sidis sur la blankaj benkoj, ĉizitaj dum la somero per amaj surskriboj. En eksteran rodon, ĉirkaŭirante la lumturon, iris malalta ŝargulo kun dikaj rektaj mastoj.

– Sufiĉas, – diris Ostap, – la ora bovido estas ne por mi. Prenu ĝin kiu volas. Milioneradu ĝi laŭdezire!

Li rigardis ĉirkaŭen kaj, vidante ke estas neniu, ĵetis la valizon sur la gruzon.

– Bonvolu, – diris li rilatante al la nigraj aceroj, kaj faris ĝentilan piedmovon.

Li iris sur la aleo ne retrorigardante. Komence li iris malrapide, per paŝoj de promenanto, poste enigis la manojn en la poŝojn, ĉar subite ili komencis malhelpi al li, kaj aldonis la rapidecon por venki la ŝanceliĝon. Li igis sin turni post angulon, kaj eĉ ekkanti, sed

jam post minuto li ekkuris reen. La valizo kuŝis sur la sama loko. Tamen de kontraŭa flanko al ĝi, kliniĝante kaj etendante la manojn, iris mezaĝa civitano de sufiĉe ordinara eksteraĵo.

– Ja kien ci?! – kriis Ostap ankoraŭ de malproksime. – Mi montros al ci kio estas kapti malproprajn valizojn! Eĉ por sekundo oni ne povas lasi! Kia aĉaĵo!

La civitano malkontente levis la ŝultrojn kaj deiris. Kaj Bender denove ektiriĝis kun la ora bovido en la manoj.

«Kion do mi faru nun?» – meditis li. – «Kion fari pri tiu ĉi malbenita sumo, kiu riĉigas min nur per moralaj turmentoj? Ĉu bruligi ĝin?».

Sur tiu ĉi penso la granda kombinanto haltis plezure.

«Bonokaze en mia ĉambro estas kameno. Forbruligi ĝin en la kameno! Tio estas majeste! Ago de Kleopatro! En flamon! Faskon post fasko! Kial mi okupaĉu min pri ili? Kvankam ne, stulte. Forbruligi monon – tio estas dandaĉaĵo! Husareco! Sed kion mi povas fari per ĝi, krom NEP-ula vorado? Stulteĝa situacio! Muzea administranto per tricent rubloj intencas krei Luvron, iu ajn kolektivo de iuj riveristoj aŭ kooperativa korporacio de dramverkistoj povas kontraŭ miliono konstrui duonon de nubskrapulo kun plata tegmento por lekcioj sur freŝa aero. Sed Ostap Bender, posteulo de janiĉaroj, povas fari tute nenion! Jen kiel la reganta hegemonia

klaso premeĝas la milionulon-solulon!»

Meditante kion fari pri la miliono la granda kombinanto kuris sur la aleoj, sidis sur cementa parapeto, kaj kolere rigardis vaporŝipon, balanciĝantan post la moleo.

«Ne, de la incendio mi devas rezigni. Bruligi monon estas timide kaj ne gracie. Oni devas elpensi iun efektan geston. Ĉu krei stipendion nome de Balaganov por studentoj de koresponda mezgrada teknika lernejo? Ĉu aĉeti kvindek-milon da silveraj kuleretoj, gisi el ili statuon de rajdanta Panikovskij, kaj instali ĝin sur lian tombon? Ĉu inkrusti na «Antilopo» per perlamoto? Kaj ĉu...»

La granda kombinanto desaltis de la parapeto, fulmigita per nova penso. Perdante nek minuton li lasis la bulvardon kaj, stoike eltenante premon de frontaj kaj flankaj ventoj, ekiris en poŝtejon.

Tie, laŭ lia peto, oni volvis la valizon per bast-mato, kaj kruce ĉirkaŭligis ĝin per ŝnureto. Rezultiĝis banale aspektanta pakaĵo, milojn da kiuj poŝtoŝefo akceptas ĉiutage, en kiuj civitanoj sendas al siaj parencoj lardon, konfitaĵon aŭ pomojn.

Ostap prenis neforviŝeblan krajonon kaj, ekscite svingante ĝin en la aero, surskribis:

VALORA
AL POPOLA KOMISARO PRI FINANCOJ
MOSKVO

Kaj la sendaĵo, ĵetita per mano de fortega poŝtisto, falis sur amason da molaj pakaĵetoj, saketoj kaj skatoloj. Enpoŝigante la kvitancon, Ostap ekvidis ke lian milionon, kune kun alia ŝarĝo, jam forveturigas sur puŝĉaro maldiligenta maljunulo kun blankaj fulmaj kolum-insignoj.

- La kunsido daŭriĝas, - diris la granda kombinanto, - ĉi-foje sen partopreno de O. Bender, deputito de frenezaj agraruloj.

Ankoraŭ longe staris li sub arko de la poŝtejo, jen pravigante sian agon, jen bedaŭrante pri ĝi. La vento penetris sub pluvmantelon de Ostap. Li eksentis malvarmon, kaj kun ĉagreno elmemoris ke ne aĉetis alian peltaĵon.

Antaŭ li, por sekundo, haltis junulino. Levante la kapon ŝi ekrigardis la brilan ciferplaton de la poŝteja horloĝo, kaj ekiris pluen. Sur ŝi estis raspa palteto, mapli longa ol la robo, kaj blua bereto kun infana bulkvasto. Per la dekstra mano ŝi altenis deblovatan per la vento baskon de la palto. Koro de la komandanto ekbalanciĝis eĉ antaŭ ol li rekonis na Zosja, kaj li ekiris post ŝi sur malsekaj trotuaraj platoj, senintence gardante iun distancon. Iam la junulinon ŝirmis la pasantoj, kaj tiam Ostap deiris sur la pavimon, pririgardante na Zosja de flanko, kaj pripensante tezojn de la okazonta interklarigado.

Ĉe angulo Zosja haltis antaŭ galanteria kiosko, kaj komencis pririgardi brunajn virajn ŝtrumpetojn, balanciĝantajn sur la ŝnureto. Ostap ekpatrolis ne malproksime.

Ĉe rando mem de la trotuaro varme konversaciis du viroj kun tekoj. Ili ambaŭ estis en intersezonaĵaj paltoj, el sub kiuj videblis blankaj someraj pantalonoj.

– Vi ĝustatempe foriris el «Herkules», Ivan Pavloviĉ, – diris unu, premante al la brusto sian tekon, – tie nun okazas detruado, oni purigas kiel bestoj.

– Jes, tuta urbo parolas pri tio, – suspiris la alia.

– Hieraŭ oni purigis na Skombrieviĉ – volupte diris unua, – oni eĉ trabatiĝi ne povis. Komence ĉio iris tre civilize. Skombrieviĉ tiel rakontis sian biografion, ke ĉiuj aplaudis lin. «Mi», – diris li, – «naskiĝis inter martelego kaj amboso». Per tio li volis substreki ke liaj gepatroj estis forĝistoj. Kaj poste iu el la publiko demandis: «Diru, ĉu vi memoras, estis iam komerca firmao «Skombrieviĉ kaj filo. Ferartikloj»? Ĉu vi estas tiu Skombrieviĉ?». Kaj tiam tiu ĉi stultulo diris: «Ne, mi ne estas tiu Skombrieviĉ, mi estas lia filo». Ĉu vi imagas kio nun okazos pri li? Unua kategorio estas jam garantiita.

– Jes, kamarado Vajntorg, tiaj ja severaĵoj. Kaj kiun oni purigas hodiaŭ?

– Hodiaŭ estas granda tago! Hodiaŭ Berлага, sama kiu saviĝis en frenezulejo. Kaj poste Brulegov mem kaj tiu vipuro Serna Miĥajlovna, lia neleĝa edzino. Al neniu en «Herkules» donis ŝi spiri. Hodiaŭ mi venu je du horoj antaŭ la komenco, ĉar poste oni ne trapuŝiĝos. Krom tio Bomze...

Zosja ekiris antaŭen, kaj tial Ostap eksciis nenion pri kio okazis al Adolf Nikolaeviĉ Bomze. Tio, tamen, neniom maltrankviligis lin. Komence frazo por la konversacio estis jam preta. La komandanto rapide atingis la junulinon.

– Zosja, – diris li, – mi revenis, kaj tiun ĉi fakton oni ne povas jam forsvingi.

La frazo estis prononcita kun terura familiareco. La junulino deŝanceliĝis, kaj la granda kombinanto komprenis ke prenis falsan tonon. Li ŝanĝis la intonacion, li parolis rapide kaj multe, plendis pri la cirkonstancoj, diris pri tio ke la juneco pasis tute ne kiel li imagis dum la infanaj jaroj, ke vivo okazis maldelikata kaj malalta kiel muzik-nota bas-signo.

– Ĉu vi scias, Zosja, – diris li fine, – sur ĉiun homon, eĉ sur anon de la partio, premas atmosfera kolono per forto de ducent dek kvar kilogramoj. Ĉu vi rimarkis tion?

Zosja ne respondis.

Dum tio ili preteriris kinejon «Kapitolo». Ostap rapide ekrigardis oblikve la flankon kie somere troviĝis establita per li kontoro, kaj

eligis mallaŭtan krion. Tra la tuta konstruaĵo tiriĝis vasta elpendaĵo:

ŜTATUNUIĜO KORNOJ KAJ HUFOJ

En ĉiuj fenestroj videblis tajpiloj kaj portretoj de la ŝtatgvidantoj. Ĉe la eniro staris, kun venka smajlo, bubo-kuriero, nekomparebla al Panikovskij. En malfermitan pordegon kun plateto «Baza tenejo» enveturis tritunaj ŝarĝaŭtoj, plene ŝarĝitaj per laŭnormaj kornoj kaj hufoj. Laŭ ĉio videblis ke la ido de Ostap prenis ĝustan direkton.

– Jen kiel premas la hegemonia klaso, – diris Ostap malgaje, – eĉ tiun ĉi mian facilaniman ideon ĝi eluzis por siaj celoj. Kaj min oni deŝovis, Zosja. Ĉu vi aŭdas, oni deŝovis min. Mi estas malfeliĉa.

– Malgaja enamiĝinto, – prononcis Zosja, unuafoje turniĝinte al Ostap.

– Jes, – respondis Ostap, – mi estas tipa Evgenij Onegin, kaj ankaŭ kavaliro senigita de la heredaĵo per sovetia reĝimo.

– Kiu ja kavaliro vi estas!

– Ne koleru, Zosja. Konsideru la atmosferan kolonon. Al mi ŝajnas eĉ ke sur min ĝi premas multe pli forte ol sur aliajn civitanojn. Tio pro amo al vi. Krom tio mi ne estas ano de sindikato. Ankaŭ pro tio.

– Krom tio ĉar vi mensogas pli ol aliaj civitanoj.

– Tio ne estas mensogo. Tio estas leĝo de

fiziko. Sed, eble, vere ekzistas neniu kolono, kaj tio estas nur mia fantazio?

Zosja haltis kaj komencis detiri de la mano la ganton de grizŝtrumpa koloro.

- Mi aĝas tridek tri jaroj, - haste diris Ostap, - aĝo de Jesuo Kristo. Sed kion mi pe-faris ĝis nun? Instruon mi ne kreis, lernantojn perdis, mortan Panikovskij mi ne revivigis, kaj nur vi...

- Nu, ĝis revido, - diris Zosja, - mi - en la manĝejon.

- Ankaŭ mi tagmanĝos, - deklaris la granda kombinanto, rimarkinte elpendaĵon: «Instru-modela nutraĵ-kartelo ĉe Nigramarska ŝtata akademio de spacaj artoj», - pe-manĝu mi iun deĵor-modelan legomsupon de tiu ĉi akademio. Eble eksentos mi min pli bone.

- Ĉi tie nur por anoj de sindikato, - avertis Zosja.

- Do mi simple sidu tie.

Ili sobiĝis per tri ŝtupoj. En profundo de la instru-modela kartelo, sub verda plafono de palmo, sidis nigraokula junulo kaj digne rigardis tagmanĝan karton.

- Periklo! - ankoraŭ de malproksime kriis Zosja. - Mi aĉetis al vi ŝtrumpetojn kun duobla kalkano. Konatiĝu. Tio estas Femidi.

- Femidi, - diris la juna homo, kore premante manon de Ostap.

- Bender-Transdanuba, - malĝentile

respondis la granda kombinanto, tuj kompreninte ke li malfruis al festo de la amo, kaj ke la ŝtrumpetoj kun duobla kalkano estas ne simple produkto de iu kooperativa kolektivo de kvazaŭinvalidoj, sed simbolo de feliĉa kaj registrita geedziĝo.

– Kio! Ĉu vi estas ankaŭ Transdanuba? – gaje demandis Zosja.

– Jes, –Transdanuba. Ankaŭ vi ne estas jam nur Sinickaja, ĉu? Se juĝi laŭ la ŝtrumpoj...

– Mi estas Sinickaja-Femidi.

– Jam dudek sep tagoj, – rimarkis la juna homo, frotante la manojn.

– Al mi plaĉas via edzo, – diris la kavaliro senigita de la heredaĵo.

– Ankaŭ al mi li plaĉas, – respondis Zosja ekscite.

Dum la junaj geedzoj manĝis sian maristan barĉon, alte levante la kulerojn kaj interrigardante, Ostap malkontente strabis la kultur-sloganojn, pendantajn sur la muroj. Sur unu el ili estis skribite:

**«Ne deflankiĝu dum la manĝado per konversacioj.
Tio malhelpas al ĝusta sekrecio de stomaka suko».**

Alia estis verkita verse:

**«Nin sukoj fruktaj kaj tomatoj provizas per karbon-
hidratoj».**

Jam ne restis kion fari. Li devis foriri, sed

malhelpis neniu scias de kie aperinta sinĝeno.

– En tiu ĉi marista barĉo, – elpremiĝe diris Ostap, – flosas restaĵoj de ŝiprompiĝo.

Geedzoj Femidi bonkore ekridis.

– Kaj pri kio, fakte, vi okupiĝas? – demandis Ostap la junan homon.

– Mi, fakte, estas sekretario de plastik-arta kolektivo de fervojaj pentristoj, – respondis Femidi.

La granda kombinanto komencis malrapide leviĝi.

– Ha, reprezentanto de kolektivo! Tion oni povis atendi! Tamen mi ne deflankigu vin per la konversacioj. Tio malhelpos al vi sekrecii la stomakan sukon, tiom bezonatan por la sano.

Li foriris, ne adiaŭante, direktiĝante rekte al la eliro, kaj preterirante angulojn de la tabletoj.

– Forkondukis oni la junulinon, – murmuris li sur la strato. – Senpere el la stalo forkondukis. Femidi! Nemezidi! Reprezentanto de kolektivo Femidi forkondukis de privatulo-milionulo...

Kaj tiam Bender kun skuiga klareco kaj pureco elmemoris ke li havas neniun milionon. Tiun ĉi penson li pe-meditadis jam kurante, disŝovante per la manoj preterpasantojn kiel naĝanto – la akvon dum konkuro por nova mondrekordo.

– Ankoraŭ unu apostolo Paŭlo eltroviĝis, – flustris li, transsaltante florbedojn de la urba

ĝardeno, – mon-rezignulo, f-filo de hundino!
Menonito malbenita, adventisto de sepa tago!
Stultulo! Se ili jam forsendis la pakaĵon,
pendumu mi min! Oni devas mortigi tiujn ĉi
tolstoj-istojn!

Glitiĝinte dufoje sur kaŝela planko de la
poŝtejo, la granda kombinanto alkuris la
giĉeton. Ĉi tie staris negranda severa kaj silenta
vico. Ekscitita Ostap penis enigi la kapon en la
fenestreton, sed civitano, staranta unua en la
vico, nerveze levis la akrajn kubutojn, kaj iom
deŝovis la veninton malantaŭen.

[Баночку варенья!](#) («Vazeton da konfitaĵo»)

Ankaŭ dua civitano, kiel mekanika ludilo,
levis la kubutojn, kaj la granda kombinanto
okazis iom malpli proksima al la dezirata
fenestreto. La kubutoj, en plena silento, leviĝis
kaj disiĝis ĝis kiam la arogantulo okazis sur la
leĝa loko: ĉe la vosto.

– Mi nur... – komencis Ostap.

Sed li ne daŭrigis. Tio estis senutila. La vico
griza, ŝtona, estis nerompebla kiel greka
falango. Ĉiu konis sian lokon, kaj estis preta
morti por siaj etaj rajtoj.

Nur post kvardek kvin minutoj Ostap enigis
la kapon en la poŝtan fenestreton, kaj
entuziasme ekpostulis la pakaĵon. La poŝtisto
indiferente redonis al Ostap lian kvitancon.

– Kamarado, ni ne redonas la sendaĵojn.

– Kio! Ĉu oni jam forsendis? – demandis la granda kombinanto per vibranta voĉo. – Mi nur antaŭ horo lasis ĝin!

– Kamarado, ni ne redonas la sendaĵojn, – ripetis la poŝta laboranto.

– Sed tio estas mia pakaĵo, – diris Ostap karese, – ĉu vi komprenas, mia. Mi ĝin sendis, kaj mi volas ĝin repreni. Ĉu vi komprenas, mi forgesis enmeti vazon da konfitaĵo. El pometoj. Mi ege petas vin. La onklo terure ofendiĝos. Ĉu vi komprenas...

– Kamarado, ni ne redonas la sendaĵojn.

Ostap retrorigardis, serĉante helpon. Malantaŭe staris vico, silenta kaj severa, konanta ĉiujn regulojn, ankaŭ tiun laŭ kiu la sendaĵojn oni ne redonas.

– Nur la vazeton enŝovi, – elbalbutis Ostap, – pometojn.

– Kamarado, sendu vian vazeton per aparta pakaĵo, – diris la poŝtisto moliĝinte. – Nenio okazos al via onklo.

– Vi ne konas mian onklon! – varme diris Ostap. – Kaj krom tio mi estas malriĉa studento, kaj mi ne havas monon. Mi petas vin estiel sociaganton.

– Ĉu vi vidas, kamaradoj, – diris la poŝtisto per plora voĉo, – kie mi serĉu ĝin nun! Tie estas tri tunoj da sendaĵoj.

Sed tiam la granda kombinanto komencis elbalbuti ĝis tiom kompat-elvokajn

sensencaĵojn, ke la poŝt-laboranto foriris en alian halon serĉi la pakaĵon de la malriĉa studento. La vico, ĝis tiam silenta, tuj ekkriadis. La grandan kombinanton oni diversmaniere insultis pro nekono de poŝtaj reguloj, kaj unu civitanino, pro la kolero, eĉ pinĉis lin.

– Neniam plu faru tion, – severe diris la poŝtlaboristo, elĵetante al Bender lian valizeton.

– Neniam plu! – diris la komandanto. – Je mia studenta vorto!

Pro la vento frapadis tegmentoj, balanciĝis strataj lanternoj, sur la tero moviĝis ombroj, kaj la pluvon traigis projekciaj radioj de aŭtaj lumĵetiloj.

– Sufiĉe da psikologiaj eksceso, – ĝoje diris Bender, – sufiĉe da travivaĵoj kaj psikoanalizo. Venis jam tempo komenci laboran burĝan vivmanieron.

En Rio-de-Ĵanejron! Aĉetu mi farmon kaj, kiel simion, elveturigu na Balaganov. Deŝiru li bananojn por mi!

Ĉapitro 36

Kavaliro de ordeno de Ora Ŝafa Felo

Stranga homo iris nokte en ĉe-dnestra kana densejo. Li estis grandega kaj senforme dika. Sur li strikte sidis krudtola robo kun surkapigita kapuĉo. Preter kanaj parceloj, sub disbranĉiĝintaj fruktaj arboj la stranga homo moviĝis sur la piedfingroj, kiel en dormejo. Iam

li haltis kaj suspiris. Tiam ene de la mantelo aŭdiĝis tintado, kiun eligis kunpuŝiĝantaj metalaj pecoj. Kaj ĉiufoje post tio en la aero pendis alta, ege delikata sonoro. Foje la stranga homo stumblis je malseka radiko kaj falis sur la ventron. Tiam ekaŭdiĝis tiel laŭta sono, kvazaŭ sur pargeton falis kavalira kiraso. Ankoraŭ longe post tio la stranga homo ne leviĝis de la tero, enrigardante la mallumon.

Bruis marta nokto. De arboj ŝutiĝis kaj frape faladis sur la teron plendimensiaj apotekaj gutoj.

– Malbenita plado! – flustris la homo.

Li leviĝis, kaj ĝis Dnestro mem venis sen aventuroj. La homo levis la baskojn, degrimpis de la bordo kaj, perdante la ekvilibron sur la moliĝinta glacio, ekkuris en Rumanion.

La granda kombinanto prepariĝis la tutan vintron. Li aĉetis usonajn dolarojn kun bildoj de prezidentoj en blankaj bukloj, orajn horloĝojn kaj cigaredujojn, edziĝringojn, brilantojn kaj aliajn valoregajn aĵojn.

Nun li portis sur si dek-sepon da pezaj cigareduoj kun monogramoj, kun aglo, kaj kun gravuraĵoj: «Al direktoro de Rusa-Karpata banko kaj bonfaranto Evsej Rudolfoviĉ Duonfabrikanto en tago de lia arĝenta edziĝfesto de dankemaj kunlaborantoj». «Al sekreta konsilanto M. I. Sakrilegiev pro finiĝo de la senata revizio de oficistoj de Nigramarska

urbeŝtraro». Sed plej peza estis cigaredujo kun dediĉo: «Al sinjoro estro de Alekseevskij policejo de dankemaj judoj de komercista rango». Sub la teksto troviĝis brulanta emajla koro, trabatita per sago, kio certe devis simboli amon de la judoj de komercista rango al la sinjoro policej-estro.

En la poŝojn estis ŝovitaj faskoj da edziĝringoj, sigelringoj, kaj braceletoj. Sur la dorso, sur tri fortikaj ŝnuretoj, pendis dek du oraj horloĝoj. Kelkaj el ili incite tiktakis, kaj al Bender ŝajnis ke sur lia dorso rampas insektoj. Inter ili estis donacaj ekzempleroj, kio sekvis el surskribo sur la kovrilo: «Al mia amata filo Serjoĝa Kastraki en tago de plenumo de ekzamenoj je atestato de matureco». Super vorto «matureco» estis surskrapita per pinglo vorto «seksa». Tio estis farita, verŝajne, per amikoj de juna Kastraki, samaj maldiligentuloj kiel li mem. Ostap longe ne volis aĉeti tiun ĉi maldecan horloĝon, sed tamen aĉetis ĝin, ĉar li firme decidis investi en valorajojn la tutan milionon.

Kaj entute la vintro pasis en grandaj penoj. Brilantojn la granda kombinanto akiris nur je kvarcent mil; valuton, kiu inkluzivis iujn dubindajn polajn kaj balkanajn bankbiletojn, li sukcesis akiri nur je kvindek mil rubloj. Per restinta sumo li endis aĉeti pezaĵojn. Aparte malfacile estis moviĝi kun ora plado sur la

ventro. La plado estis granda kaj ovala kiel ŝildo de afrika tribestro, kaj pezis ok kilogramoj. Fortega kolo de la komandanto fleksiĝis sub pezo de episkopa kruco kun surskribo «Je nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito», kiun li akiris ĉe eksa helppastro de granda katedralo, civitano Memkulpantulo. Super la kruco, sur eksterordinara rubando, pendis ordeno de Ora Ŝafa Felo: muldita ŝafido.

Tiun ĉi ordenon Ostap elmarĉandis de mirinda oldulo kiu estis, eble, eĉ granda duko, aŭ ĉambristo de granda duko. La maljunulo tre alte taksis la aĵon, menciante ke tiuj ĉi ordenoj troviĝas nur ĉe kelkaj personoj de mondo, kaj ankaŭ tiuj, plej ofte, ĉe kronitaj personoj.

– Oran Ŝafan Felon – murmuris la maljunulo – oni donas pro plej alta braveco!

– Kaj ĝuste ĉe mi ĝi estas plej alta, krom tio mi aĉetas la ŝafidon nur estiel ordinaran oron.

Sed la komandanto diris malveron. La ordeno tuj ekplaĉis al li, kaj li decidis teni ĝin ĉe si estiel ordenon de Ora Bovido.

Pelata per timo, kaj atendo de tondra fusila elpafo, Bender alkuris mezon de la rivero kaj haltis. Premis la oro: plado, kruco, braceletoj. La dorso jukis sub dispenditaj sur ĝi horloĝoj. Baskoj de la robo malsekiĝis, kaj pezis dekoj da kilogramoj. Ostap kun ĝemo deŝiris la robon, ĵetis ĝin sur la glacieron, kaj ekimpetis pluen. Nun evidentiĝis peltaĵo, majesta, preskaŭ

eksterordinara, povas esti eĉ plej valora el vestoj de Ostap. Li konstruis ĝin kvar monatoj, konstruis kvazaŭ domon, produktis la desegnojn, altransportis materialojn. La peltaĵo estis duobla: ĝi estis provizita per unikaj arĝentaj vulpoj, kaj kovrita per aŭtentika foka pelto. La kolumo estis produktita el zibeloj. Mirinda peltaĵo estis tio! Superpeltaĵo kun poŝoj el ĉinĉilo, kiuj estis ŝtopitaj per medaloj pro savo de dronantoj, per surbrustaj krucetoj, kaj per oraj dentaj protezoj, lasta atingo de dentista tekniko. Sur kapo de la granda kombinanto altiĝis ĉapo. Tio estis ne ĉapo sed kastora tiaro.

Tuta tiu ĉi mirinda ŝarĝo devis garantii al la komandanto facilan senzorgan vivon sur bordo de la varma oceano, en imagita urbo de la infaneco, inter balkonaj palmoj kaj fikus-arboj de Rio-de-Ĵanejro. Je la tria nokte la spite ma ido de janiĉaroj surpaŝis malpropran alilandan bordon. Ankaŭ ĉi tie estis silente, mallume, ankaŭ ĉi tie estis printempo, kaj de branĉoj deŝiriĝis gutoj. La granda kombinanto ekridis.

- Nun restis kelkaj formalajoj kun konsentemaj rumaniaj bojaroj, kaj la vojo estos libera. Mi opinias ke du-tri medaloj pro savo de dronantoj plibeligos ilian grizan liman vivon.

Li turniĝis al sovetia flanko kaj, etendante en la digelantan mallumon la dikan fokan manon, diris:

- Ĉion oni devas fari laŭ tiucela formo. Formo numero kvin: adiaŭo kun la patrolando. Do ĝis, la majesta lando. Mi ne ŝatas esti unua lernanto, kaj ricevi poentojn pro atentemo, diligenteco kaj konduto. Mi estas privata persono, kaj ne estas devigata interesiĝi pri silofuraĝaj kavoj, tranĉeoj kaj turoj. Min, ial, malmulte interesas problemo de socialisma transformado de homo en anĝelon kaj en deponanton de ŝparkaso. Inverse. Min interesas maturiĝintaj problemoj de zorga rilato al personecoj de soluloj-milionuloj...

Tiam adiaŭo kun la patrolando laŭ formo numero kvin estis interrompita per apero de kelkaj armitaj figuroj, en kiuj Bender rekonis rumaniajn limgardistojn. La granda kombinanto kliniĝis digne, kaj klare prononcis speciale parkeritan frazon:

- Trajasku Romania mare!

Li karese enrigardis vizaĝojn de la limgardistoj, apenaŭ videblajn en la duonobskuro. Al li ŝajnis ke la limgardistoj smajlas.

- Vivu la granda Rumanio! - ripetis Ostap ruse. - Mi estas maljuna profesoro, forkurinta el moskva sekret-policejo! Je dio, apenaŭ elŝiriĝis mi! Viapersone mi salutas ...

Unu el la limgardistoj kontakte proksimiĝis al Ostap, kaj silente demetis de li la peltan tiaron. Ostap etendiĝis post sia kapvesto, sed la

limgardisto same silente deĵetis lian manon malantaŭen.

– No! – diris la komandanto bonanime. – No, no! Sen manoj! Mi plendos pri vi ĉe **Sfatul-Cerij**³⁰, ĉe Granda **Ĥurultaj**³¹!

Dume alia limgardisto vigle, kun lerteco de sperta amoranto, komencis malbutonumi sur Ostap lian majeston, preskaŭ neeblian superpeltaĵon. La komandanto ŝiriĝis. Dum tiu ĉi movo ie el la poŝo elfalis kaj ekruliĝis sur la tero granda ina braceleto.

– Branzuletko! – ekjelpis la limgardista oficiro en mallonga palto kun hunda kolumo kaj grandaj metalaj butonoj sur la konvekso postaĵo.

– Branzuletko! – kriis ĉiuj aliaj, ĵetante sin sur Ostap.

Komplikiĝinte en la peltaĵo la granda kombinanto falis kaj, sammomente, eksentis ke el lia pantalono oni eltiras la valoregan pladon. Kiam li leviĝis, li ekvidis ke la oficiro kun nehoma smajlo pesas la pladon en la manoj. Ostap kroĉiĝis en sian proprajon, kaj elŝiris ĝin el manoj de la oficiro, post kio ricevis blindigan baton en la vizaĝon. La okazintaĵoj disvolviĝis kun milita rapideco. Al la granda kombinanto malhelpis la peltaĵo, kaj iom da tempo li batalis kontraŭ la malamikoj starante sur la genuoj,

30. Statul-Cerij: parlamento de Besarabio (1917-1918).

31. Granda Ĥurultaj: Mongolia parlamento.

ĵetante sur ilin medalojn pro savo de dronantoj. Poste li eksentis subite neklarigeblan faciliĝon, kiu permesis al li kaŭzi al la malamikoj serion da ruinigaj batoj. Evidentiĝis ke de li oni sukcesis deŝiri la cent-mil-rublan peltaĵon.

– Ha, do tia la rilato! – orelbore elkantis Ostap, sovaĝe ĉirkaŭrigardante.

Estis momento kiam li staris, apoginte sin je arbo, kaj batis per la brilanta plado kapojn de la atakantoj. Estis momento kiam de lia kolo oni ŝiradis ordenon de Ora Ŝafa Felo, kaj la komandanto ĉevale skuis la kapon. Estis ankaŭ momento kiam li, alte levinte la episkopan krucon kun surskribo «Je nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito» kriis histerie:

– Ekspluatantoj de laboranta popolo! Araneoj! Servantoj de kapitalo! Serpentaĉoj!

Dum tio el lia buŝo fluis rozkolora salivo. Ostap batalis por sia miliono kiel gladiatoro. Li forĵetis de si la malamikojn, kaj leviĝis de la tero, rigardante antaŭen per malklariĝinta rigardo.

Li rekonsciiĝis sur la glacio, kun sangigita vizaĝo, kun unu boto sur la piedoj, sen la peltaĵo, sen la cigaredujoj, plibeligitaj per surskriboj, sen kolekto da horloĝoj, sen la plado, sen la valuto, sen la kruco kaj brilantoj, sen miliono. Sur la alta bordo staris la oficiro kun la hunda kolumo kaj rigardis soben, na Ostap.

Бранзулетка! («**Branzuletk!**»)

– **Siguranca**³² malbenita! – kriis Ostap, levante la nudan piedon. – Parazitoj!

La oficiro nehaste eltiris la pistolon kaj streĉis ĝin. La granda kombinanto komprenis ke la intervjuo pe-iĝis.

Kurbiĝinte li eklamis reen, al sovetia bordo.

В управдомы... («**Ŝanĝu mi la profesion...**»)

Blanka cigareda nebulo leviĝis de la rivero. Malstreĉinte la manon Bender ekvidis sur la manplato platan kupran butonon, buklon de ies fortikaj nigraj haroj, kaj la mirakle konserviĝintan en la batalo ordenon de Ora Ŝafa Felo. La granda kombinanto stulte ekrigardis la trofeojn, restaĵojn de sia riĉaĵo, kaj daŭrigis moviĝi pluen, glitante en glaciaj kavetoj, kaj grimacante pro la doloro.

Longa kaj laŭtega, preskaŭ kanona frapo elvokis vibradon de la glacia surfaco. Senpripense-kuraĝe blovis varma vento. Bender ekrigardis sub la piedojn, kaj ekvidis sur la glacio grandan verdan fendon. Glacia plataĵo, sur kiu li troviĝis, balanciĝis, kaj komencis angule grimpi en la akvon.

– La glacio ekmoviĝis! – kriis la terurigita

32. siguranca: sekreta servo en monarkia Rumanio.

granda kombinanto. – La glacio ekmoviĝis, sinjoroj ĵurianoj!

Li eksaltadis sur la disŝoviĝantaj glacieroj, per ĉiuj fortoj hastante en la landon kun kiu li tiel digne adiaŭis nur antaŭ horo. La nebulo leviĝis, grava kaj malhasta, malkovrante la nudan kanaron.

Post dek minutoj sur sovetian bordon eniris stranga homo sen ĉapo kaj en unu boto. Al neniu rilatante li laŭte diris:

– Sen ovacioj, bonvolu! Esti grafo Monte Kristo (Monte Cristo) mi ne sukcesis. Do ŝanĝu mi la profesion je dom-administranto.

DE LA TRADUKINTO

Kaj nun, se vi ne legis ankoraŭ alian romanon de samaj aŭtoroj (tradukitan far sama tradukinto), kiu nomiĝas «Dek du seĝoj», ni priparolu iomete nian lingvon.

Ĉi tie la tradukinto prezentas al juĝo de la

publiko proponaĵojn kiuj, li esperas, neniel kontraŭas Fundamenton kaj animon de Esperanto:

Prefikso PE-

Pragrafo 109 de PAG (1980) estas dediĉita al problemo de «fina aspekto». Jes, en Esperanto forestas esperant-maniera rimedo por indiki kompletan plenumon de ago.

Plenumon de ago oni indikas nacilingve, tio estas divers-rimede. Jen la ekzemploj:

legis **tralegis; tutlegis**

trinkis **sattrinkis**

manĝis **formanĝis**

lernis **ellernis**

vendis **disvendis**

kuracis **fin**kuracis? Sed kion signifas tiu ĉi

fin: ĉu vivon, ĉu morton? Aŭ nur ĉeson de la kuracado?

Por indiki kompletan plenumon de ago esperant-maniere la tradukinto uzis laŭdezire uzatan prefikson

pe- (**plenum'**):

legis **pelegis**

manĝis **pe**manĝis

tradukis **pe**tradukis

konstruis **pe**konstruis

riparis **pe**riparis

vendis **pe**vendis

atendis **pe**atendis

lernis **pe**lernis

kreskis **pe**kreskis

segis **pe**segis

rikoltis **pe**rikoltis

flugis **pe**flugis
kuracis **pe**kuracis

Prepozicio NA

Prepozicion **na** proponis G.F.Makkink (Rigardu ties libron «Nia Fundamento sub lupeo»).

Prepozicio **na** utilas por:

1) indiki, laŭdezire, akuzativon de ne-esperantigitaj vortoj:

a. Ĉu vi spektis **na** «My Fair Lady»?

b. Ĉu vi legis **na** «Pigmalion (Pygmalion)»?

c. Ĉu vi konas **na** Ĉeĥov?

d. Li atente alrigardis **na** Ipolit Matveeviĉ, kaj ĝoje ekridis.

f. Klientoj ne trovis **na** Viktor Miĥajloviĉ.

2) Indiki direkton: Iras Parizon**n**; Iras **na** Voroneĵ.

Pri vorto LA

Unua el dek-seso da gramatikaj Esperanto-reguloj, laŭ unua, vere unua (ruslingva) libro de L. Zamenhof tekstas:

«Artikolo nedifinita ne ekzistas. Ekzistas nur artikolo difinita **la**, egala por ĉiuj genroj, kazoj kaj nombroj».

Onidiro pri tio ke la regulo enhavas tie daŭrigon: «La uzado de la artikolo estas tia sama kiel en germana, franca kaj aliaj lingvoj» tute ne estas vera!

Sed ĉar uzado de nia vorto **la** vere similas tiun de angla **the**, kiun senerare regas nur klera denaskulo, la tradukinto uzis ĉi tie jenan regulon:

Vorto **la**:

1) **Konkretigas** starantan post ĝi substantivon, t.e. donas al ĝi sencon de vorto «**tiu**», sed ne sencon de vortoj «iu» «iu ajn», «ĉiu», «entute», ktp. kaj:

2) La vorto anstataŭigas ellasaĵo(j)n.

(Provu kompari tiun ĉi 6-linian regulon kun 5-paĝa ĉi-tema analizo en PAG [«Plena Analiza Gramatiko»], kaj kun 21-paĝa esploro en «Plena manlibro de Esperanta Gramatiko»).

Ekzemploj de konkretiga **La**:

a. **La** leono (konkreta leono, tiu) gardis **la** virinon (konkretan virinon, tiun).
Sed: Leono (leono entute) estas besto.

b. **La** infano (konkreta infano) jam ne ploras.
Sed: Infano (infano entute) ne estas matura homo.

c. Ĝis **la** revido (konkreta, interkonsentita revido).
Sed: Ĝis revido. (ne konkreta, iu ajn revido).

d. Diru al **la** patro (konkreta, mia) ke mi estas diligenta.

Sed: Patro kaj patrino kune (iuj ajn) estas

nomataj gepatroj.

Ekzemploj de anstataŭiga **La**:

- a. El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas **la** plej juna (infano).
- b. Ĉiu retrovu sian mantelon! – Tiu ĉi estas **la** mia! (mantelo).
- c. Hodiaŭ estas **la** dudek sepa (tago) de Marto.
- d. Li lernas **la** francan (lingvon).
- e. Ludoviko **la** dekkvara; Frederiko **la** granda (tiu, kies kromnomo estas...).
- f. – Tiu ĉi homo, kiu... (sekvas rakonto).
– Jes, mi konas **la** historion.

Rimarko:

Vorton **la** oni uzu ne **ĉar**: «ĉar oni kutime metas ĝin ĉi-okaze», sed **por**: por konkretigi, laŭdezire, tiun aŭ alian substantivon. Ja **vi**, nur **vi**, parolanto/ skribanto, scias kiu el substantivoj valoras esti konkretigita.

Sed se vi dubas ĉu uzi aŭ ne uzi vorton **la**, prefere ne uzu ĝin. Evitu konkretigon de konkretaĵoj.

Jen ankoraŭ iom da ekzemploj:

- a) **La** fera bastono, kiu kuŝis en forno, estas nun brule varmega.
- b) Fera bastono, kiu kuŝis en **la** forno, estas nun brule varmega.
- c). **La** fera bastono, kiu kuŝis en **la** forno, estas nun brule varmega.

d). Fera bastono, kiu kuŝis en forno povas esti brule varmega.

ENHAVO

Parto unua. Personaro de «Antilopo»

Ĉapitro 1. Pri tio kiel Panikovskij rompis la konvencion.....	2.
Ĉapitro 2. Trideko da filoj de leŭtenanto Ŝmit.....	20.
Ĉapitro 3. Benzino via – ideoj niaj.....	38.
Ĉapitro 4. Ordinara valizaĉo.....	56.
Ĉapitro 5. Subtera regno.....	69.
Ĉapitro 6 «Antilopo-Gnu».....	80.
Ĉapitro 7. Dolĉa ŝarĝo de gloro.....	97.
Ĉapitro 8. Krizo de la ĝenro.....	113.
Ĉapitro 9. Denove krizo de la ĝenro.....	132.

Parto dua. Du kombinantoj

Ĉapitro 10. Telegramo de fratoj Karamazov	148.
Ĉapitro 11. Herkulesanoj.....	153.
Ĉapitro 12. Homero, Milton kaj Panikovskij.....	166.
Ĉapitro 13. Vasisualij Loĥankin, kaj lia rolo en rusia revolucio	182.
Ĉapitro 14. Unua rendevuo.....	205.
Ĉapitro 15. Kornoj kaj hufoj.....	222.
Ĉapitro 16. Jarbuch für Psychoanalytik.....	238.
Ĉapitro 17. La erarinta filo revenas hejmen.....	256.
Ĉapitro 18. Sur la maro kaj sur la firma tero.....	270.
Ĉapitro 19. Universala stampilo.....	290.
Ĉapitro 20. La komandanto dancas tangon.....	298.
Ĉapitro 21. Fino de "Korvejo.....	314.
Ĉapitro 22. La paradon komandos mi.....	323.
Ĉapitro 23. Koro de la ŝoforo.....	335.
Ĉapitro 24. La vetero favoris al la amo.....	350.
Ĉapitro 25. Tri vojoj.....	369.

Parto tria. Privata persono

Ĉapitro 26. Pasaĝero de speciala trajno.....	384.
Ĉapitro 27. «Permesu eniri al la dungito de kapitalo».....	400.
Ĉapitro 28. Ŝvita atako de inspiro.....	415.
Ĉapitro 29. Tondranta Fonto.....	428.

Ĉapitro 30. Aleksandr Ibn-Ivanoviĉ.....	444.
Ĉapitro 31. Bagdad.....	456.
Ĉapitro 32. Pordego de grandegaj eblecoj.....	465
Ĉapitro 33. Hindia gasto.....	476.
Ĉapitro 34. Amikado kun juneco.....	484.
Ĉapitro 35. Lin amis dommastrinoj, hejmservistinoj, kaj eĉ unu virino: dentprotezigisto.....	500.
Ĉapitro 36. Kavaliro de ordeno de Ora Ŝafa Felo.....	516.
 De la tradukinto.....	 525.